ESPERANTO TRANSLATION

THE QUR'ĀN

DONATE QURAN

www.donatequran.com

LA NOBLA KORANO

El la araba originalo tradukis
Prof. D-ro Italo Chiussi

©
Copyright:
Eldonisto kaj tradukinto

2-a eldono 1970

Presita de la eldonejo

LA NOBLA KORANO

Serio „Oriento-Okcidento" n-ro 10
sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio
en konsultaj rilatoj kun UNESCO

tk

Kopenhago 1970

ENKONDUKO

Pri la Serio Oriento-Okcidento

En la kadro de la konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O. establitaj en 1954, Universala Esperanto-Asocio iniciatis ankaŭ la Serion Oriento-Okcidento. La celo estas duobla: unuflanke, kontribui al la t.n. Granda Projekto pri la Reciproka Aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj; aliflanke riĉigi la literaturon en la Internacia Lingvo per pliaj mondsignifaj verkoj.

La publikigo de La Nobla Korano en la araba originalo kun paralela Esperanta traduko, kiel la deka, jubilea, volumo de la Serio, estas per si mem unuaranga kultura evento. Krome, ĝi malfermas la pordon por grandskala penetrado de la Internacia Lingvo en la vastan mondon de la arabe parolantaj landoj. Koran gratulon al la brila tradukanto kaj sinceran dankon al la klarvida eldonisto.

Detaloj pri la Granda Projekto, ĝia ĉvoluo kaj la partopreno de U.E.A. aperis en la Enkondukoj al antaŭaj volumoj. Ci tie necesas nur aldoni, ke en la jus publikigita libro Pritakso de la Granda Projekto pri Reciproka Aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj (Appraisal of the Major Project on Mutual Appreciation of Eastern and Western Cultural Values 1957-1966, Unesco, Paris, 1968) la laboro de U.E.A. estas objektive prezentita (ekzemple sur pp. 76,78) kun eksplicita rekono, ke "majstroverkoj de Orientaj kaj Okcidentaj literaturoj" jam estas publikigitaj en Esperanto en la Serio Oriento-Okcidento. Al ili aldoniĝas nun nova juvelo. Pluaj sekvos.

Prof. D-ro Ivo Lapenna
prezidanto de U.E.A.

Noto de la Eldonejo

La ĉi suban antaŭparolon al la Esperanta traduko de la Nobla Korano, farita de d-ro Italo Chiussi, verkis Lia Moŝto Sir Muhammad Zafrulla Khan, en la islama mondo vaste konata kaj aŭtoritata aŭtoro de multaj religiaj verkoj pri la Islamo kaj fama ekzegezisto. Sir Zafrulla Khan estas nuntempe juĝisto ĉe la Internacia Juĝejo en Hago, kies Vic-Prezidanto li ankaŭ estis siatempe; antaŭ kelkaj jaroj li prezidis la kunsidon de la Unuiĝintaj Nacioj kiel gvidanto de la Pakistana Delegitaro kaj li ankaŭ estis longan tempon la Ministro por eksteraj aferoj de sia lando.

ANTAŬPAROLO

بسم الله الرحمن الرحيم

Kara leganto

Assalamo alaikum va rahmatullahe
(kun vi estu la paco kaj la graco de Allah)

Mi rigardas kiel grandan honoron, ke mi estis petita de d-ro Italo Chiussi verki mallongan enkondukon por lia Esperanta traduko de la Nobla Korano.

Estas karakteriza aspekto de la Islamo, ke eĉ la nomo mem proklamas la esencon de tiu kredo: "Islamo" signifas "submetiĝo" kaj "paco". Tiel ĝi substrekas la submetiĝon al la volo de Dio, kiel ilon por atingi la pacon, en ĉi tiu kaj en la venonta vivo.

La nomo nu estis donita de Dio mem al tiu kredo, ĝi estas Lia elekto: "Hodiaŭ Mi perfektigis por vi vian religion, kaj Mi plenumis Mian gracon por vi, kaj Mi elektis por vi la Islamon kiel religion" (5:4)*. Religio, antaŭ Allah, signifas tutan submetiĝon al Li. Tiu, kiu serĉas alian kredon, ol la submetiĝon al Li, kiel religion, sciu, ke ĝi neniam estos akceptita de Allah (3:86). Tiusence ĉiuj, kiuj tute submetiĝas al Allah, estas islamanoj (2:113). Kiam la Sinjoro postulis de Abraham: "Submetiĝu al Mi", Abraham respondis: "Mi submetiĝis al la Sinjoro de l' Universo". Tial Abraham estis piega Islamano. Tiel estis ĉiuj Profetoj kaj tiuj, kiuj kredis al ili, kiel ekzemple la disĉiploj de Jesuo.

Simile la atesto de la Islamo: "Ne ekzistas alia Dio ol Allah" (2:164; 59:23-24) klarigas la sencon de ĉiu fido: strebi por plaĉi al Li, por plenumi Lian volon, por atingi la proksimecon al Li, por akiri Lian amon (13:23; 92:21-22; 56:12; 3:32), por esti en ĉiuj aferoj kaj en ĉiu senco manifestaĵo de Liaj atributoj; tio

* Unua numero: ĉapitro; dua: verso. La citaĵoj estas ĉiuj el la "Nobla Korano".

devas esti la daŭra celo kaj objekto de tiu, kiu vere kredas, ke Allah estas la Ununura Adorinda. En ĉiuj aferoj, grandaj aŭ malgrandaj, tia homo havas nur unu deziron, lia plej profunda amo kaj sindono estas al Allah.

"Korano" signifas "legata, recitata, proklamata". Ankaŭ ĉi tiu nomo estas donita de Allah. Ekzemple: "Vere Ni faris ĝin Skribo ofte legata, en lingvo araba, por ke vi komprenu" (43:4) aŭ aliloke: "Vere Ni sendis ĝin – la Koranon arablingvan – por ke vi komprenu" (12:3). La nomo mem "Korano" estas tial granda profetaĵo kaj pruvo de la fakto, ke la aŭtoro de la Libro estas Dio. La nomo esprimas ke la Libro estos ĉiam pli vaste legata, recitata, proklamata, en ĉiuj tempoj kaj en ĉiam pli vastaj regionoj. Tio ne estus ebla pere de nura homa strebado, por tio oni bezonas Dian helpon.

La Korano estas registraĵo de la parola revelacio konsentita per la Dia graco al la Profeto de la Islamo (la paco estu super li), dum preskaŭ dudek du jaroj, en la komenco de la sepa jarcento de la Kristana erao (610-632). Ĝi estis legata, recitata, proklamata en la originalo, t.e. en la vortoj mem de la revelacio, fare de amaso da homoj, kiuj estas multoblo de tiuj, kiuj iam kapablis atingi la originalon de ĉiu ajn alia Skribo en la lingvo, en kiu ĝi estis formulita.

La profetaĵo estis ne nur entenata en la Die elektita nomo de la Libro, ĝi ankaŭ estis klaresprimita dum la unuaj jaroj de la misio de la Sankta Profeto (la paco estu super li) en Mekko, kiam, laŭ la opinio de liaj malamikoj, ekzistis tre malgranda ŝanco, ke la Libro postvivu en Mekko, kaj tute certe ankoraŭ pli malgranda, ke ĝi povu esti disvastigata ekster tiu urbo. La revelacio anoncis: "Kaj Ni vere donis al vi la ofte redirotajn sep versojn – la ĉapitron unuan, Al-Fâteha, la malfermantan – kaj la eminentan Koranon" (15:88). Ke la malfermanta ĉapitro estos ofte redirata, signifis la esencan kvaliton kaj karakteron de la Korano, kies Dia antaŭparolo kaj resumo ĝi estas. Kiam tiu revelacio estis farita al la Sankta Profeto (la paco estu super li), la Islamanoj estis malgranda komunumo kaj al ili ne estis permesate de la Kurajŝ kunveni publike por la Dia kulto. Hodiaŭ la ĉapitro Al-Fâteha estas recitata dum la ĉiutagaj kvin ritaj preĝoj fare de la kredantoj en la tuta mondo proksimume miliardon da fojoj laŭ prudenta takso.

Ĉi tiu ne estas tamen la plej taŭga okazo por detale komentarii ĝian amplekson kaj ĝiajn inspirigajn kvalitojn kaj karakterojn. Alia revelacio de la sama epoko anoncis: "Vere, Ni sendis la Admonon kaj Ni certe estos gardanto super ĝi" (15:10).

La konservado de la Admono enhavis plurajn aspektojn. Rigardante ilin tre rapide, ni devas memori, ke la Korano estis revelaciita, peco post peco, dum pli ol dudek du jaroj, dum kiuj plej ofte la Profeto (la paco estu super li) kaj la Islamanoj tre malofte ĝuis pacon kaj trankvilecon kaj tre malofte estis sen iu ajn zorgo aŭ aflikto. En Mekko ne ekzistis instruiteco, kaj ĝi ankaŭ poste ne estis tre vasta, kvankam ĉiam kreskanta, en Medino. La Profeto mem kapablis nek legi nek skribi (29:49). Papero kaj aliaj iloj por konservi raporton, kiuj estas kutimaj nuntempe, kaj kiujn ni rigardas kiel memkompreneblajn, praktike ne ekzistis aŭ ne estis haveblaj en Centra Arabujo antaŭ dekkvar jarcentoj.

La plej grava kaj certe centra aspekto de la konservado de la Admono estis la konservado de la teksto mem de la revelacio, nedifektebla kaj kompleta. La metodo estis, ke – kiam unu verso aŭ grupo da versoj estis revelaciitaj – la Profeto (la paco estu super li) venigis unu aŭ la alian, el inter malgranda grupo de kleraj Islamanoj, kiujn li elektis kiel skribistojn, kaj sciigis al li la tekston de la ricevita

revelacio; ĉi tiu tiam klopodis trovi ilojn por skribi ĝin, kiel eble plej bone li kapablis. La Profeto ankaŭ sciigis tiam la lokon de la verso aŭ de la versoj rilate al la cetera teksto de la Korano. La revelacio tiam estis proklamita kaj ĉiam kreskanta nombro da kredantoj lernis ĝin parkere. Poste ĝi estis intermetita en la recitadon de la Korano laŭ la sekvo asignita. Revelaciitaj partoj de la Korano tre ofte estis recitataj kaj deklamataj dum la ritaj preĝoj kaj en ĉiu alia taŭga okazo. La Profeto (la paco estu super li) mem tre ĝuis aŭskulti parkere recitatajn porciojn de la Korano.

Per la disvastigado de la Islamo, la nombro de tiuj, kiuj lernis parkere la tutan tekston de la Korano pligrandiĝis tre rapide kaj tiu praktiko decide firmiĝis.

Kiam la iloj por multobligi la skribitan tekston fariĝis haveblaj, oni fervore uzis kaj utiligis ilin, sed la ebleco, ĉiam pli kutima, havigi al si la manuskripton kaj-pli malfrue-presitajn ekzemplerojn, ne forigis la neceson konservi la tekston en al homa memoro. Tute kontraŭe: ĝi plifaciligis lerni parkere la skribitan tekston. Lerni parkere estas esprimo de dankemo kaj respektego al la Sinjoro pro Lia abunda graco kaj kompato, ĉar Li havigis al la homaro la grandegajn trezorojn de lumo kaj gvidado, kiujn enhavas la Korano. Tiel preciza kaj sekve tiel akurata kaj senmanka estas la memorado, ke la korekteco de presita teksto devas esti certigata de du personoj, kiuj konservas la Koranon sekure en sia memoro, prefere ol inverse. Tiuj, kiuj plenumis la laboron necesan por lerni parkere la tutan tekston, estas ĉiam viglaj kaj atentaj por konservi ĝian memoriĝon kompleta kaj nedifektita. Ankoraŭ pli granda nombro da personoj posedas en sia memoro porciojn de la teksto.

Tiaj estis la iloj por konservi sendifekta la tekston de la Admono. La kaŭzo por la sukceso de tiu strebado, ordonita de Dio, malgraŭ la sennombraj okazaĵoj, kiuj instigis al aliaj rezultoj dum la jarcentoj, ne estis tamen iu speciala virto de la iloj adoptitaj, sed tute simple la graco kaj la kompato de Allah, kiu havigis al la homaro tiujn ilojn kaj faris ilin efikaj.

La rezulto estas, ke la plej kritikaj kaj akurataj esploradoj faritaj de la okcidentaj orientalistoj certigis, ke la Korano estas, rilate al ĉiu vorto, kiun ĝi enhavas, precize tiel, kiel Mahometo (la paco estu super li) transdonis ĝin al la mondo kiel revelacion donitan al li. Tio certe estas la plenumiĝo de unu el la aspektoj de la Dia promeso ke la Admono estos tute gardata. Alia, same fundamenta aspekto estas, ke la lingvo, en kiu la Admono estis formulita, ĉiam devos plue esti vivanta kaj neniam fariĝos estingita kaj forgesita esprimilo, ĉar aliokaze la signifo kaj la spirito de la Admono estus en danĝero. La klasika Araba lingvo tute kontentigas tiun postulon: ĝi estas hodiaŭ parolata, skribata kaj komprenata en multe pli vastaj regionoj ol antaŭ dekkvar jarcentoj kaj ĝi amasigis riĉan kaj abundan kaj multaspektan kulturan heredaĵon. Ankaŭ tio ne povus rezulti nur el homa strebado, ĝi estas la plenumiĝo de la Dia promeso.

La homa vivo kaj la homa societo estas dinamikaj. Novaj problemoj kaj novaj metodoj, pli vastaj konceptoj kaj novaj filozofiaj ideoj daŭre estiĝas. La Korano asertas, ke la gvidado, kiun ĝi enhavas, estas adekvata por ĉiuj tempoj kaj por ĉiuj cirkonstancoj. Tiusence la unika karaktero de la Korano, ke ĝi estas en sia tuta teksto parola revelacio kaj tiel laŭlitere la vorto de Dio, prezentas subliman signifon kaj gravecon. Kiel la Universo estas la esprimo de la Dia atributo de kreado, tiel la Korano estas la esprimo – inter aliaj – de la Dia atributo de gvidado kaj estas, kiel la Universo, viva. Gi liveras gvidadon en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj cir-

konstancoj. "Ĝi estas kiel bona arbo, kies radiko estas fortikega kaj kies brancoj atingas la ĉielon. Ĝi estigas siajn fruktojn ĉie pro la dekreto de sia Sinjoro" (14: 25-26). Se nova interpreto estus necesa pro iu ajn neatendita cirkonstanco, la Dia kompato inspirus kaj vigligus la spiriton de iu el Liaj fervoraj servantoj per la bezonata prudento kaj kapabligus lin klarigi ĝin por la homaro. Tio okazis, kiel estis antaŭdirite de la Sankta Profeto (la paco estu super li) en ĉiu jarcento de la Islama erao, kaj liveris la daŭran manifestadon de la Dia promeso, ke la Admono estos tute sekura kaj gardata en ĉiuj tempoj.

La unua duono de la dudeka jarcento vidis senparalelan intelektan kaj sciencan progresadon kaj teknikan antaŭenpuŝon, kiu ŝajnas estigi tute novajn perspektivojn kaj aldoni novajn dimensiojn al la homa ekzistado. Sekve, ĉiuj valoroj, inkluzive de la moralaj kaj spiritaj, kiuj speciale koncernas la religion, estas submetataj al decida elprovo. Laŭ la Dia promeso, la gvidado, kiu estas necesa en tiu ĉi nia epoko, estis pretigita antaŭe, el la Korano, dum la lasta parto de la deknaŭa jarcento kaj komence de la dudeka fare de Die inspirita majstro kaj gvidanto, kiu estis elektita kiel atestanto de la vero de la Sankta Profeto (11:18), kaj en kies persono plenumiĝis la profetaĵo (62:4) de la dua, spirita, alveno de la Sankta Profeto (la paco estu super li). Tiel la Korano estas universala kaj eterna fonto de ĉioampleksanta gvidado. Ĝi provas konvinki racie kaj klarigante, tute ne aŭtoritate: "Ni donis en ĉi tiu Korano ĉiuspecajn similaĵojn por la homaro, por ke ili estu admonitaj. Korano araba, sen iu ajn malrekteco, por ke ili fariĝu justuloj" (39:28-29). Ke dum preskaŭ dekkvar jarcentoj la Korano daŭre antaŭiris de longe la bezonon de gvidado en ĉiuj aferoj, kaj neniam mankis en sia efiko, estas ne nur miriga tributo al ĝia tutenhava saĝo (54:6), sed ankaŭ pruvo senduba de ĝia deveno de la Saĝa, de la Ĉioscia (27:7).

Nek historio, nek arkeologio, nek eltrovo aŭ esploro en la pasinteco, nek la progresoj en scienco kaj tekniko aŭ serĉado aŭ racie fundamentita spekulacio pri la estonteco iam kapablos liveri kontraŭdiron de la vero, kiun enhavas la Korano.

"... ĝi vere estas potenca Libro. Al ĝi ne alproksimiĝas la falso de antaŭe nek de malantaŭe. Tio estas revelacio de la Saĝa, de la Laŭdegenda."(41:42-43). "Jen la revelacio de la Donema, Pardonema. Libro, kies versoj estas vere klaraj, ĝi estas ofte legata, ĝi estas en araba lingvo, por popolo, kiu scias, portanta la bonan novaĵon kaj admonanta" (41:3-5). "La Spirito de Sankteco portis ĝin de via Sinjoro kune kun la vero por firmigi la kredantojn, kiel gvidilon kaj bonan novaĵon por la submetiĝintoj" (16:103). "La Donema instruis la Koranon" (55:2-3). "Ĉi tiu estas vere nobla Korano, en Libro bone gardata, kiun neniu alia povas tuŝi ol la puruloj, revelacio de la Sinjoro de l' Universo" (56:78-81).

La Korano estas nomata Admono (15:10), saĝa admono (3:59). "Vere venis al vi lumo de Allah kaj klara Libro, per kiu Allah gvidas tiun, kiu sekvas Lian plezuron por la afero de la paco, kaj Li kondukas ilin el la mallumo al la lumo per Sia dekreto, kaj gvidas ilin al la rekta vojo" (5:16-17). "Vere tiu ĉi Korano gvidas al tio, kio estas plej bona, kaj portas al la kredantoj, kiuj bonfaras, la bonan novaĵon, ke por ili estos granda rekompenco" (17:10). "Ho vi, homoj! Vere venis al vi la admono de via Sinjoro kaj la resanigo por tio, kio estas en la brustoj, kaj gvidilo kaj kompato por la kredantoj" (10:58).

La gvidado, kiun enhavas la Korano, estas neelĉerpebla. "Diru (ho Profeto!): "Se la maro estus inko por skribi la vortojn de mia Sinjoro, vere la maro sekiĝus, antaŭ ol finiĝos la vortoj de mia Sinjoro, eĉ se Ni aldonus ankoraŭfoje al ĝi unu

saman kvanton" (18:110). "Se ĉiuj arboj, kiuj estas sur la tero, estus plumoj, kaj la maro inko, kaj sep oceanoj estus aldonitaj al ĝi, tamen ne elĉerpiĝus la vortoj de Allah. Vere Allah estas ĉiopova, saĝa". La Korano asertas la veron de la antaŭaj revelacioj. "Vere Ni sendis la Toraon, en kiu estas gvidilo kaj lumo" (5:45). "Ni lasis Jesuon, la filon de Maria, sekvi iliajn piedsignojn, kiel plenumiĝon de tio, kio jam estis en la Torao, kaj Ni donis al li la Evangelion, en kiu estas gvidilo kaj lumo kaj plenumiĝo de tio, kio jam estis antaŭ ĝi en la Torao, gvidilo kaj admono por la justuloj" (5:47). Ĝi tamen substrekas la fakton, ke la antaŭaj revelacioj suferis interpoladojn kaj ŝanĝojn fare de la manoj de tiuj, kies devo estus gardi ilin (2:80; 3:79).

La Korano estas plenumiĝo de tio, kio estis revelaciita antaŭ ĝi kaj ĝi ankaŭ estas garantio super tio, montrante, kiam necese, la kripligon de la tekstoj aŭ de la signifoj fare de tiuj, kiuj asertas, ke ili sekvas kaj observas la veran kredon. "Ni sendis al vi la Libron kun la vero kiel plenumiĝon de tio, kio estis en antaŭa Skribo kaj kiel protekton por tio" (5:49). "Ho, popolo de la Skribo! Vere venis al vi Nia sendito por klarigi al vi multajn aĵojn el la Skribo, kiujn vi kaŝis, kaj por preterpasi multajn" (5:16). Tio, kio estis fundamenta en la antaŭaj revelacioj, troviĝas ankaŭ en la Korano (98:3-4). Tio, kio havis nur lokan aŭ paseman karakteron, estis forlasita aŭ forigita; kio estis esenca sed estis forgesita, tio estis restarigita, kaj tio, kio respondis al nova bezono, estis liverita. "La miskredantoj el la popolo de la Skribo kaj la idolanoj ne deziras, ke estu sendita al vi io bona de via Sinjoro, sed Allah elektas per Sia graco, kiun Li volas, kaj Allah estas la fonto de granda graco. Ni ne nuligas verson aŭ forgesigas ĝin, antaŭ ol Ni donas alian pli valoran aŭ almenaŭ similan. Ĉu vi ne scias, ke Allah havas povon super ĉiuj aferoj? " (2:106-107). Tio, kaj eĉ pli multe ol tio estas en la Korano: gvidado, lumo, resanigo, saĝo. En ĝi la homaro povus trovi adekvatan kuracilon de ĉiu malbono, pro kiu ĝi suferas hodiaŭ, kaj kiu minacas detrui ĝin morgaŭ. Ĝi estas "revelacio de Tiu, kiu kreis la teron kaj la altajn ĉielojn" (20:5), la Sinjoro de l' Universo (26:193; 32:3; 56:81; 69:44), la Ĉiopova, la Pardonema (36:6), la Ĉiopova, la Saĝa (39:2; 45:3; 46:3), la Ĉiopova, la Ĉioscia (40:3), la Donema, la Pardonema (41:3), la Saĝa, la Laŭdegenda (41:43).

La homaro estas ĉe la rando de senfunda abismo el blekeganta fajro. La sola ilo por atingi sekurecon estas "teni sin forte al la ŝnuro de Allah". "Ho vi, kredantoj! Respektegu Allahon per konvena respekto, kaj ne mortu, antaŭ ol vi estos submetiĝintaj! Tenu vin firme, ĉiuj kune, al la ŝnuro de Allah, kaj ne disiĝu, kaj memoru la favorojn de Allah kontraŭ vi, kiam vi estis malamikoj. Poste Li kunigis viajn korojn per Sia graco, tiel ke vi fariĝis gefratoj, kvankam vi estis ĉe la rando de fajra foso, kaj Li protektis vin de ĝi. Tiel Allah evidentigas Siajn signojn al vi, por ke vi estu gvidataj. Estiĝu inter vi societo, kiu instigu al la bono kaj ordonu la justecon kaj malpermesu la malbonon. Nur tiuj estos sukcesaj (3: 103-105). Havigi al tiuj, kiuj ne posedas la ilojn por atingi la vastajn kaj senlimajn trezorojn de saĝeco kaj gvidado, kiujn enhavas la Korano, eĉ malgrandan porcion da ili, signifas kontentigi la plej akran bezonon de la homo en la plej fatala cirkonstanco de lia sorto.

Neniu povas pretendi, ke li diris la lastan vorton pri la Korano. Kiel la Universo, ĝi estas senlima. Ĝi estas senkompare riĉa kaj multaspekta. Ekzemple la sep koncizaj versoj de la Fāteha, kiuj estis nomitaj la "resumo de la Korano". Plej eminentaj kaj famaj studuloj asertis, jarcento post jarcento, ke ĉiu legado de la Fāteha malkaŝas ĉiam pli riĉajn kaj profundajn verojn.

Eĉ per la plej bonaj havebiaj tradukoj, studulo devas perfektigi sian studadon per specialaj karakteroj, se li volas ricevi utilon per ĝi. La plej gravaj el ili estas respektego kaj humileco. La Korano asertas esti la Vorto de Dio. Komenĉanto eble povas ne kredi al tio, sed li tamen devas memori kaj respekti tiun aserton, alie li nenion atingos per sia studado, krom seniluziiĝo. La Korano reagas kontraŭ tiu, kiu studadas ĝin, laŭ ties konduto kontraŭ la Korano mem. Se li komencas la studadon per la konvinko, ke ĝi estas simpla elpensaĵo, lia studado akiros neniun rezulton, krom la certigo de lia antaŭjuĝo. Li devas forigi el sia spirito ĉiun antaŭjuĝon kaj sincere deziri lerni kaj estimi.

Serĉanto devus elesperi saĝecon de Allah kaj li devus konservi sian sintenon de respektego (71:14). La Korano postulas komprenemon kaj pripensadon kaj malfermitan spiriton fare de tiu, kiu elesperas utilon de ĝi (47:25). Ĝi respektas la prudenton de la leganto kaj postulas de li, ke li uzu ĝin. Ĝi estas, ekzemple, plena de metaforoj, similaĵoj kaj paraboloj diversspecaj. Ĝi plejofte atentigas pri naturaj fenomenoj kaj klarigas pere de la fizikaj kaj materiaj aĵoj la metafizikajn kaj spiritajn.

Estas karakterize pri la Korano, ke ĝi liveras sian propran interpreton, kaj ke ĝi estas fidinda gvidanto ankaŭ tiurilate. Kiam fundamenta leĝo estas proklamita, ĝi estas neŝanĝebla (33:63; 35:44; 48:24). Ĉiu anonco, kiu ŝajne kontraŭdiras ĝin, devas esti akurate klarigita kaj interpretita. Ekzemple: "Ne estas ŝanĝo en la kreo de Allah" (30:31) estas fundamenta leĝo. Ni tamen legas ankaŭ: "Vi certe scias, kiuj el vi pekis kontraŭ la devo de la sabato. Ni diris al ili: "Estu simioj, forpelindaj! " (2:66), aŭ aliloke: "...tiuj, kiujn Allah malbenis, kaj kontraŭ kiuj Li koleris, kaj kiujn Li faris simioj kaj porkoj, kaj kiuj adoras la idolojn" (5:61). Estas evidente, ke "simioj" kaj "porkoj" en ĉi tiuj versoj signifas homojn havantajn ties kvalitojn.

Ankoraŭ: "Estas nenuligebla la dekreto super urbo, kiun Ni detruis, ke ili ne revenos" (21:96). "Kiam venas al iu el ili la morto, li diras: Ho mia Sinjoro! Resendu min, por ke mi agu bone pri tio, kion mi postlasis. Neniel! Estas nur vortoj, kiujn li elparolas, kaj malantaŭ ili estas barilo ĝis la tago, en kiu ili estos vekitaj" (23:100-101). Estas do fundamenta leĝo, ke tiuj, kiuj demetas ĉi tiun vivon, ne revenas. Ni tamen legas en 2:260: "Allah igis lin kuŝi mortinta cent jarojn, poste Li vekis lin". El la kunteksto evidentiĝas tamen, ke Allah igis lin d o r m i, kaj revelaciis al li dum lia dormo la okazontaĵojn de la venontaj cent jaroj. En la tuj sekvanta verso (2:261), ni legas pri la peto de Abraham: "Sinjoro, montru al mi, kiel Vi revivigas la mortintojn", sed en tio evidente temas pri la revivigo de popoloj spirite mortintaj kaj tute ne pri la reveno en ĉi tiun mondon de iu ajn homo, kiu lasis ĝin. Ĉiam, kiam reveno al la vivo post la morto estas menciita, ĝi signifas spiritan revivigon de tiuj, kiuj ankoraŭ ne mortis. "Ho vi, kredantoj! Respondu al Allah kaj al la sendito, kiam li vokas vin, por ke Li revivigu vin".

La Korano, estante la Vorto de Allah, estas tute pura, kaj postulas de tiuj, kiuj volas penetri en ĝian plej profundan signifon, purecon de pensado, agado, celo kaj projekto (56:80). Ju pli granda la pureco de studanto de la Korano, des pli ampleksa kaj klara estos lia komprenado de ĝia signifo.

La Korano estas plej konciza sed tamen multaspekta, kaj ĝi senĉese postulas profundan pripensadon (4:83). Se oni ne uzas tiun kapablon, tio estigas la sen substancan kaj tute eraran sekvon, ke ekzistas tre malmulte da ordo en la sekv

de la Korano. Fakte, kiu pripensas kaj provas malkovri la ordon de la sekvo en la Korano, tiu estas riĉe rekompencata kaj malkovras ne nur ordon, sed aron da kontentigaj kaj revelaciantaj ordoj en la sekvo kaj en la interdependeco de ĝiaj versoj kaj ĉapitroj, en kompleta harmonio kun la esploro, kiun li entreprenis. Ankaŭ tiurilate la Korano estas do kiel la Universo. Por la teditaj okuloj de hazarda rigardanto, la pejzaĝo, kiun li trairas, eble prezentas senordan sekvon de natura beleco, sed li certe ne trovos iun ajn ordon en ĝi. Por la sperta okulo de geologo, botanikisto, herbokolektisto, pentristo, la sama pejzaĝo prezentas multenombrajn kaj tamen bone kunordigitajn aspektojn. Ekzistas perfekta harmonio en la Universo, oni ne povas trovi en ĝi malordon aŭ mankon (67:4-5). Same estas pri la Korano: en ĝi ne ekzistas kontraŭdiroj (4:83).

La celo de la Korano estas doni gvidadon al la homaro, por ke ĝi estu gvidata al la vojo, kiu kondukos ĝin al la Kreinto en stato de kompleta submetiĝo al Li, tiel plenumante la celon de la kreo. "Libro, kiun Ni sendis al vi, por ke vi konduku la homaron for de la mallumo al la lumo per la dekreto de ilia Sinjoro sur la vojon de la Ĉiopova, de la Laŭdegenda, de Allah, al kiu apartenas ĉio, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero" (14:2). Por tiu celo ĝi atentigas pri ĉiuspecaj fenomenoj kaj revelacias vastajn trezorojn de profundaj veroj, sed ĉio ĉi tamen estas nur por difinita celo kaj devas esti rigardata en tiu kunteksto.

Ekzemple, la Korano anoncas multajn historiajn faktojn por substreki la diversajn aspektojn de la gvidado, ĝi tamen ne estas historia libro. Ĝi atentigas pri diversaj fazoj de la kreo de la Universo (21:31) kaj de la homo (71:14; 32:8; 40:68) sed ĝi ne estas traktato pri kosmologio aŭ pri la origino de la specoj. "Estas Li Tiu, kiu kreis la nokton kaj la tagon kaj la sunon kaj la lunon. Ĉiu el ili ambaŭ ŝvebas en sia sfero" (21:34), "...kaj Li servigis ilin al vi, la sunon kaj la lunon senĉese revenantajn" (14:34), "... Li kreis la sunon kaj la lunon kaj la stelojn, kiuj servas laŭ Lia ordono. Cu ne apartenas al Li la kreo kaj la leĝo? Benata estu Allah, la Sinjoro de l' Universo! " (7:55). "Li servigis al vi la nokton kaj la tagon kaj la sunon kaj la lunon, kaj la steloj estas servemaj pro Lia ordono. Vere en tio estas signo por popolo komprenema" (16:13). La Korano tamen ne estas traktato pri astronomio.

Ĝi aludas al la leĝo, kiu revivigas la sekiĝintan teron per pluvo (7:58) kaj al la miriga sistemo, per kiu dolĉa kaj sala akvo estas en riveroj kaj oceanoj (25:54; 35:13), sed ĝi ne estas lernolibro pri meteorologio aŭ hidraŭliko.

"Vere Ni kreis la homon el pura argilo, poste Ni metis lin kiel spermoguton en sekuran restadejon, poste Ni faris la spermoguton buleto el koaguliĝinta sango, poste Ni faris la koaguliĝintan sangon peco da karno, poste Ni estigis el la peco da karno ostojn, poste Ni vestigis la ostojn per muskoloj, poste Ni elirigis ĝin al la lumo kiel novan kreitaĵon. Estu do laŭdegata Allah, la plej bona Kreinto! " (23:15). Tio estis revelaciita antaŭ dekkvar jarcentoj, la Korano tamen ne estas verko pri akuŝarto.

Ĝi mencias, ke al David kaj al Salomono estis instruita la metodo por fandi feron kaj kupron (34:11-14) kaj tio estis certigita antaŭ nelonge per la eltrovo de fornegoj, kiuj estis uzataj por tiu celo. La Korano tamen ne estas instruilo pri metalurgio. Ĝi admonas pri iam florantaj antikvaj civilizacioj, multe pli progresintaj, ol tiu en Centra Arabujo en la sepa jarcento de la Kristana erao, kiuj estis neniigitaj pro malobeo kaj malbonfarado de la popolo (30:10), kaj la eltrovo de iliaj restaĵoj en diversaj regionoj de Arabujo liveris la pruvon. Sed la Korano ne estas libro pri arkeologio.

Ĝi asertas, ke, kiam Faraono, kiu persekutis Moseon kaj la Hebreojn, preskaŭ atingis ilin, kaj li vidis la ondegon, kiu englutos lin, li petis kompaton de Dio kaj al li estis dirite, ke lia lastminuta pento ne utilos, sed: "Ni tamen volas savi hodiaŭ vian korpon, por ke vi mem estu signo por la posteuloj" (10:93). Tio estis certigita per la eltrovo de lia korpo en la jaro 1909. La Korano tamen ne okupiĝas pri egiptologio.

La profetaĵoj, kiujn enhavas la Korano, senĉese plenumiĝas en ĉiuj tempoj. Ĉio ĉi estas nur certigo de la celo de la Korano, kiu estis klarigita ĉi-supre.

Necesega ilo por profitdonanta studado de la Korano estas la preĝo. Tiu, kiu provas malkovri la veran signifon kaj la gvidadon, kiujn enhavas la Korano, ne povas ignori la neceson petegi inspiradon fare de la Ĉioscia (40:61; 29:70).

Al d-ro Italo Chiussi oni devas gratuli pro lia entrepreno, verki tradukon de la Nobla Korano en la lingvon Esperanto, kiu devus fariĝi komuna dua lingvo en ĉiam pli vastaj regionoj, kaj tiel pavimi la vojon por la komprenado de la Korano por tiuj, kiuj ne havas taŭgan tradukon en sia propra lingvo, sed scipovas Esperanton. Tial ĝi estas altvalora faro. Traduki ne estas facila tasko. Interpreto el unu lingvo en alian prezentas eminentajn problemojn. Precipe pri la Korano, kiu estis difinita de famaj sciencistoj kiel "netradukebla", la malfacilaĵoj estas eĉ pli grandaj. La lingvo, la stilo, la koncizo kaj ekonomio de la esprimoj, la diversaj aspektoj, kiuj estas karakterizaj de la Korano, faras la taskon delikata kaj komplikita.

D-ro Chiussi laboris diligente, per metodo de kontroloj kaj re-kontroloj, elpensitaj de li mem kaj de aliaj scienculoj, sur la tereno de ekzegezo kaj de semantiko, por fari sian laboron kiel eble plej proksima al la spirito de la originalo, en la limoj de la homa kapablo. Lia laboro estis laboro karakterizita per amo, kaj estas la amo tiu, kiu liveras la plej veran kaj intiman konon.

Fervore oni devas esperi, ke la altvalora laboro de d-ro Chiussi estos entuziasme bonvenigita en ĉiuj rondoj, en kiuj oni komprenas Esperanton. Ĝi certe estos elstara aldonaĵo por ĉiu Esperanta biblioteko, ĉu publika, ĉu privata.

La intereso pri la studado de la Korano vigliĝis tre intense en la lastaj jaroj inter la okcidentaj studuloj kaj pensuloj. Tio estas feliĉa evoluiĝo precipe en tempo, en kiu kritika studado de ĉiuj valoroj – ĉu materiaj, ĉu moralaj, ĉu spiritaj – ĉie progresas. Pro tiu progreso estiĝos ĉiam pli vasta intereso pri la valoroj, kiujn la Korano donacis rilate al ĉiuj cirkonstancoj de la homa strebado. Mi estas certa, ke la verko de d-ro Chiussi estos tre valora kontribuaĵo al tiu celo. Mi preĝas por ke tio efektiviĝu, kaj ke la laboro de d-ro Chiussi estu akceptita de Tiu, kiu faris la gvidadon de la Korano deviga por la homaro. Amen.

Hago, en Majo 1968

Zafrulla Khan

Zafrulla Khan

Antaŭparolo de la tradukinto

Ĵus mi ektuŝis la klavaron de mia skribmaŝino por tajpi la lastan vorton de la Esperanta traduko de "La nobla Korano" kaj nun urĝas min la devo kiel eble plej rapide daŭrigi kaj fini mian laboron per ĉi tiu klariga "antaŭparolo", por ke mi ne subfalu al la tento bruligi la paĝojn, kiuj kviete kuŝas sur mia tablo, ordigitaj kaj pretaj por la eldonejo.

Estas du motivoj, kiuj malhelpas tiun agon: unue la kaŭzo mem de mia traduklaboro, nome la firma konvinko, ke la ekkono de "La Legaĵo" – kvankam nur pere de neperfekta kopio – estas utila kaj laŭdinda, kaj due la fakto, ke mi ne kuraĝas seniluziigi la eldoniston, kiu jam atendas mian manuskripton.

Restas tamen en mi akra sento de neadekvateco, ĉar – malgraŭ la riĉeco de la Esperanta lingvo, kiu eble faras ĉi tiun tradukon iusence eĉ pli taŭga ol kelkaj nacilingvaj (sen merito miaflanka) – mi tro evidente ne sukcesis traduki tiel adekvate, kiel mi esperis tute komence, la kolorojn kaj la forton de la bildoj, kiujn oni senpere perceptas el la araba originalo.

Bonvolu permesi al mi kelkajn rimarkojn pri mia metodo de traduko:
La Korana lingvo estas, en sia mirinda fleksebleco, tiel riĉa je metaforoj intime kunligitaj kun la pensmaniero kaj kun la kutimoj de la araba popolo kaj ofte ankaŭ kun la okazintaĵoj de la originoj de la Islamo, ke tute laŭlitera traduko certe fariĝus malfacile komprenebla por alilingvanoj aŭ alilandanoj. Pro tio mi klopodis aranĝi tradukon, kiu respektu la intencojn de la originala teksto, tamen ankaŭ konsideru la okcidentan imagkapablon.

Laŭ la ĝenerala strukturo de la araba lingvo, estas kutime, ke la verboj liveras la radikojn de la diversaj "esprimunuoj" (kiel cetere en ĉiuj semidaj lingvoj, kies bazo estas pli ofte agoj ol statoj aŭ objektoj). La substantivoj kutime devenas de la verboj, tamen iufoje okazas la malo, kaj tio precipe pri esprimoj, kiuj estas proksimume klarigeblaj sed tute ne tradukeblaj, se per tio oni komprenas la paŭson de unu vorto per unu vorto. En tiuj okazoj mi preferis reteni la araban vorton en la teksto kaj klarigi ĝin per piednotoj (ekz. Ka'ba, Kibla, Umra, ktp).

Por ke la legado estu kiel eble plej malofte interrompita, mi tamen klopodis eviti inflacion da piednotoj, sed tio devigis min iufoje akcepti kompromisojn por uzi koncizajn esprimojn, kiuj nur neperfekte ebligas elvoki la originan intencon. Tio okazis ekzemple je la provo traduki du esprimojn, kiuj revenas tre ofte en la araba teksto kaj bedaŭrinde ne posedas paralelajn vortojn eĉ en la esprimriĉa Esperanta lingvo, nome: Rahmān kaj Rahīm. Ĉi-tiuj du vortoj estas la Diaj atributoj plej ofte citataj en la Korana teksto kaj signifas:

Rahmān: Dia atributo, kiu esprimas la senfinan radiadon de favoroj kaj graco, kiuj devenas propramove de Li por la tuta Universo kreita, ek de la komenco de la tempo, sen iu ajn merito flanke de la kreitaĵoj vivantaj aŭ nevivantaj, kiuj ricevas ilin. Mia traduko estas: Donema.

Rahīm: Dia atributo, kiu esprimas la fakton, ke Li distribuas favorojn kaj gracojn al la homoj kiel rezulton de iliaj preĝoj kaj bonfaroj, tamen laŭ Sia saĝa decido, t.e. celante la veran bonon de la preĝanta homo, tial do ne ĉiam sekvante lian propran intencon esprimitan per la preĝo. Ĉar parto de tiuj gracoj estas la pardono, mi tradukis per: Pardonema.

Per tiuj ĉi du ekzemploj mi intencis ankaŭ klarigi, kial mi kelkafoje en mia laboro ankaŭ uzis la principon "esperantigi" t.e. "belsonigi" la esprimojn, kiam tio ne riskis troe kripligi la signifon. Mia traduko – mi tion konfesas sen falsa hontemo – estis farita, ĉar mi intencis diskonatigi la noblan Libron en Esperantujo, kaj por tiu celo mi devis klopodi atingi belsonan kaj facile legeblan tekston sen tro multe da citaĵoj kaj klarigoj, kiuj plejfoje nur interrompus la plezuron de la legado, tamen ne aldonante ion esencan al la komprenebleco. Principe mi ankaŭ devis akcepti la fakton neforigeblan, ke iuj gramatikaj formoj, kiel ekzemple la "dualo", ne trovas sian respondan formon en Esperanto. Kiam estis necese esprimi la dualon, mi faris tion per la vorto "ambaŭ" aldonita al la persona pronomo.

Tre longe mi hezitis pri la elekto de la pronomo en la dua persono. En la Korana teksto ofte ekzistas grava diferenco inter la uzado de la ununombra kaj de la multenombra aŭ de la duala pronomo. Eble oni riproĉos ke mi elektis "modernan lingvon", forlasante kelkajn nuancojn, sed mi ne povis devigi min al la sistema uzado de la peza vorteto "ci", kiu ankaŭ en Esperanto estus tro nekutima por vivanta teksto, kiel miaopinie la Korano ĉiam estas.

Miaj intencoj estis honestaj kaj pro tio mi esperas ke la eraroj kaj la neadekvateco estos pardonitaj. Mi estus plene kontenta, se la legado de ĉi tiu traduko povus eĉ inciti la legantojn al la studado de la belega araba lingvo, por ke ili mem povu decidi ĉu mia provo sukcesis, almenaŭ duone, aŭ malsukcesis. Mi nur esperas ke mi ne meritos la verdikton, kiun miaj samlandanoj kutimas esprimi per la ŝerca itala vorto: "traduttore – traditore": (tradukinto – perfidulo).

Miajn plej elkorajn dankojn al s-ro Fazle Ilahi Anweri, Lagos (Nigerio), kiu helpis min en mia laboro per senĉesa morala subteno, konsilo kaj altvaloraj klarigoj kaj interpretado, kaj al d-ro Nassif Isaac, Cairo, kiu akurate kaj sindone kontrolis la tutan tradukon dum monatoj da inteligenta kaj diligenta laboro. Danke al la perado de la Universala Esperanto-Asocio mi sukcesis havigi al mi la plej altvaloran kunlaboron, kiun mi povis esperi rilate al la kontrolo de la lingva kvalito: prof. Gaston Waringhien, la prezidanto mem de la Akademio de Esperanto, akceptis la taskon tralegi mian tradukon kaj li prezentis al mi multajn rimarkojn kaj konsilojn, kiuj certe plibonigis la lingvan nivelon. Ankaŭ en ĉi tiu okazo mi sentas la devon prezenti al li mian plej sinceran dankon.

Prof. D-ro Italo Chiussi

PRI ĈI TIU LIBRO

La Korano (laŭlitere: La ofte legata) estas la sankta libro de la Islamanoj (Muslim-oj) kaj prezentas, kune kun la "Ahadîs" (Diroj) kaj la "Sunna" (Agoj) de la Profeto Mahometo, la skribitan fundamenton de la Islama religio, de la kredo je Allah* (la unu Dio). La Islamanoj ne deziras esti nomataj Mahometanoj, kiel estas kutime en Okcidento, ĉar ili rigardas Mahometon nur kiel Profeton, tute ne kiel Dian estaĵon aŭ ion adorindan.

Por doni kelkajn ĝeneralajn ideojn, kiuj povas helpi la komprenadon de la centra temo, jen iuj "Ahadîs", rilatantaj kun la formalaj kaj kun la esencaj aspektoj de la Islamo.

LA EKSTERA IDEO DE LA ISLAMO – LA RITOJ

1) La ses artikoloj de la fido

Raportis Omar, filo de Khatāb (Allah benu lin!): diris la sendito de Allah (la paco kaj la beno de Allah estu kun li!): tio, kio necesas por la fido estas, ke vi kredu je Allah kaj je Liaj anĝeloj kaj je Liaj Libroj kaj al Liaj Profetoj kaj al la Tago de la Lasta Juĝo kaj je Lia povo super la bono kaj la malbono. (Muslim)

1) La kvin kolonoj de la Islamo

Raportis Abdullah, filo de Omar: diris la sendito de Allah: la Islamo staras sur kvin (kolonoj): la atestado de la koro kaj de la lango, ke neniu alia Dio ekzistas ol Allah kaj ke Mahometo estas Lia sendito; plenumi la ritan preĝon; pagi la imposton por la malriĉuloj; plenumi la pilgrimon al la Domo; fasti en la monato Ramadān. (Bukhāri)

3) Pri la pozicio de Mahometo en la Islamo

Raportis Ĝabîr: diris la sendito de Allah: al mi estas donitaj kvin distingiloj, kiuj ne estis donitaj al iu ajn antaŭe: respektego de Dio tiel granda kiel unumonata vojaĝo; por mi la tuta tero fariĝis moskeo kaj purigejo; la milita kaptaĵo fariĝis laŭleĝa, dum antaŭe ĝi neniam estis laŭleĝa; al mi estas donita la kapablo por propeti antaŭ Dio; la antaŭaj Profetoj estis senditaj ĉiu al sia propra popolo, mi male estas sendita al la tuta homaro. (Bukhāri)

---

* Elparolita: Allā'

4) Citaĵo el la Nobla Korano (ĉapitro dudek-naŭa, verso 70a):
Tiujn, kiuj strebas por Nia afero, Ni gvidos sur Niajn vojojn. Vere Allah estas kun tiuj, kiuj bonfaras.

5) Raportis Anās: diris la sendito de Allah: diras Allah: kiam Mia servanto alproksimiĝas al Mi unu colon, Mi alproksimiĝas al li unu futon, kiam li alproksimiĝas al Mi unu futon, Mi alproksimiĝas al li unu klafton kaj, se li venas al Mi marŝante, Mi iras al li kurante. (Bukhāri)

6) Raportis Abu-Hurajra: diris la sendito de Allah: Vere diros Allah en la tago de la Juĝo: "Ho ido de la homo, Mi estis malsana kaj vi ne zorgis pri Mi" kaj tiu respondos: "Ho mia Sinjoro! Kiel mi povis zorgi pri Vi, dum Vi estas la Sinjoro de la ĉieloj? ". Li diros: "Ĉu vi ne plu memoras, kiam tiu servanto Mia malsaniĝis, kaj vi ne zorgis pri li? Ĉu vi ne scias, ke, se vi estus irinta al li, vi trovus Min ĉe li? Ho ido de la homo, Mi petis manĝaĵon de vi kaj vi ne nutris Min". Tiu demandos tiam: "Ho mia Sinjoro, kiel mi povis nutri Vin, dum Vi estas la Sinjoro de la ĉieloj? " kaj Li respondos: "Ĉu vi ne plu memoras, kiam tiu servanto Mia petis manĝaĵon de vi, kaj vi ne nutris lin? Ĉu vi ne scias, ke, se vi estus nutrinta lin, vi farus tion al Mi? ". (Muslim)

7) Raportis Abu-Zarr: diris la sendito de Allah: kiam vi kuiras vian supon, aldonu akvon kaj zorgu pri via najbaro. (Muslim)

8) Raportis Abu-Hurajra: diris la sendito de Allah: la karitato neniam malpliigas la havaĵojn de iu ajn homo kaj la pardono nur pliigas lian honoron. Kiu ajn humiliĝas pro amo al Allah, tiun Allah altigas. (Muslim)

9) Citaĵo el la Nobla Korano (ĉapitro tria Āl-'Imrān", verso 32a)
"Diru: Se vi amas Allahon, sekvu min kaj Allah amos vin".

10) Hadīs (el la kolektoj Bukhāri kaj Muslim):
Diris la sendito de Allah: vere Allah posedas cent kvantojn da amo. El ili Li sendis unu al la Ĝinnoj, al la homoj, al la malsovaĝaj kaj al la sovaĝaj bestoj, al ĉiuj kune, kaj el ĝi estiĝis la tuta inklino kaj la tuta amo de la estaĵoj unu al la alia kaj al siaj idoj. Naŭdeknaŭ partojn Allah rezervis por ami Siajn servantojn en la tago de la reviviĝo.

11) Raportis Anās: diris la sendito de Allah: vere mi ĵuras per Tiu, en kies mano estas mia animo: neniu el vi estas vera kredanto, kiu ne deziras al sia frato la samon, kion li deziras al si mem.

Rimarko de la tradukinto

Estas rekomendite al la islamanoj legi la Koranon kiel eble plej ofte kaj lerni ĝiajn instruojn tre akurate, ĉar ĝi prezentas la bazon mem de la kredo. Precipe en la Monato Ramadān oni devus legi ĝin tute kaj pro tio, laŭ la tradicio, la tuta libro estas dividita en tridek partojn, el kiuj ĉiu estas legenda dum unu tago de la monato. En ĉi tiu traduko la divido en partojn estas tial ankaŭ donita.
Alian dividon oni same devis respekti, nome tiun en "ruku-ojn", t.e. en sekciojn, interne de ĉiu ĉapitro, kiuj prezentas kompletajn, logike en si fermitajn pensunuojn. Tiun dividon la traduko tute simple esprimas per iomete pli da spaco inter la lasta verso de unu "ruku" kaj la unua de la sekvanta. Tio kaŭzas certan tipografian neregulecon, kiu tamen estas necesa, ĉar ĝi plenumas precizan funkcion.

Noto pri la dua eldono

La unua eldono (1969) de "La Nobla Korano" vekis – ne nur en la Esperantomovado – vastan eĥon kaj grandegan intereson. Ŝtatestroj kaj eminentuloj el la islama mondo pruvis, per siaj leteroj al la eldonisto kaj al la tradukinto, ke la publikigo de tiu verko povus liveri la bazon por estigi intensajn rilatojn inter Islamo kaj Esperantaj rondoj.

Post kvin monatoj ekde la apero la unua eldono tute elĉerpiĝis.

Ĉi tiu dua eldono, kiu tuj sekvas, ne estas refarita teksto. La ŝanĝoj de tre limigita amplekso, kiujn eldonisto kaj tradukinto rigardis necesaj, koncernas tute simple kelkajn esprimojn, kiuj, sub la vidpunkto de akurata kritiko, ŝajnis eble klarigindaj respektive plibonigindaj.

La araba teksto estas kontraŭe tute neŝanĝita, kaj korespondas al la originala prateksto.

Eldonisto kaj tradukinto

LA NOBLA KORANO

ALFABETA INDEKSO DE LA ĈAPITROJ

	Ĉapitro
'Abasa	80
'Ādejāt	100
Ahkāf	46
Ahzāb	33
A'lā	87
'Alak	96
Āl-Imrān	3
An'ām	6
Anbijā	21
Anfāl	8
'Ankabūt	29
A'rāf	7
'Asr	103
Bajjenā	98
Bákara	2
Balad	90
Banī Isrāīl	17
Burūĝ	85
Dahr	76
Duhā	93
Duhān	44
Faĝr	89
Falak	113
Fāteha	1
Fath	48
Fātir	35
Fīl	105
Furkān	25
Ĝāŝeja	88
Ĝāseja	45
Ĝumu'a	62
Hadīd	57
Haĝĝ	22
Hākka	69
Hā-Mīm-As-Saĝda	41
Haŝr	59
Hiĝr	15
Hūd	11
Huĝurāt	49
Humaza	104
Ibrāhīm	14
Iħlās	112
Infetūār	82

	Ĉapitro
Inŝekāk	84
Inŝerāh	94
Jā-Sīn	36
Jūnus	10
Jūsuf	12
Jinn	72
Kadr	97
Kāf	50
Kāferūn	109
Kahf	18
Kalam	68
Kamar	54
Kāre'a	101
Kasas	28
Kaŭsār	108
Kejama	75
Kurajŝ	106
Lajl	92
Lahab	111
Lukmān	31
Ma'āreĝ	70
Mā'eda	5
Marjam	19
Mā'ūn	107
Mo'min	40
Mo'minūn	23
Muddassir	74
Muĝādila	58
Muhammad	47
Mulk	67
Mumtahana	60
Munāfikūn	63
Mursalāt	77
Muzzammil	73
Nabā	78
Naĝm	53
Nahl	16
Naml	27
Nās	114
Nasr	110
Näze'āt	79
Nisā	4
Nūh	71

	Ĉapitro		Ĉapitro
Nūr	24	Takāsur	102
Ra'd	13	Takvīr	81
Raḥmān	55	Tatfīf	83
Rūm	30	Taŭba	9
Sabā	34	Tīn	95
Sāffāt	37	Tŭā-Hā	20
Saĝda	32	Tŭalāk	65
Sŭād	38	Tŭārek	86
Ŝŭaff	61	Tūr	52
Ŝams	91	Vāĵke'a	56
Ŝu'arā	26	Zārejāt	51
Ŝūrā	42	Zilzāl	99
Tagābun	64	Zuĥruf	43
Taḥrīm	66	Zumar	39

سُوْرَةُ الْفَاتِحَةِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

2. Estu laŭdegata Allah, Sinjoro de l' Universo,

اَلْحَمْدُ لِلّٰهِ رَبِّ الْعٰلَمِيْنَ ②

3. la Donema, la Pardonema,

الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ③

4. Majstro de la tago de la Lasta Juĝo.

مٰلِكِ يَوْمِ الدِّيْنِ ④

5. Nur Vin ni adoras kaj nur ĉe Vi ni serĉas helpon.

اِيَّاكَ نَعْبُدُ وَاِيَّاكَ نَسْتَعِيْنُ ⑤

6. Gvidu nin sur la rektan vojon,

اِهْدِنَا الصِّرَاطَ الْمُسْتَقِيْمَ ⑥

7. sur la vojon de tiuj, al kiuj Vi donis Vian gracon, kiuj ne meritis Vian koleron, kiuj ne eraris.

صِرَاطَ الَّذِيْنَ اَنْعَمْتَ عَلَيْهِمْ ۙ غَيْرِ الْمَغْضُوْبِ
عَلَيْهِمْ وَلَا الضَّآلِّيْنَ ⑦

سُوْرَةُ الْبَقَرَةِ مَدَنِيَّةٌ (٢)

revelaciita en Medino

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

2. Alef Lãm Mĩm.**

الٓمّٓ ②

3. Ĉi tiu estas la Libro, en kiu ne estas dubo, gvidilo por la justuloj,

ذٰلِكَ الْكِتٰبُ لَا رَيْبَ ۛ فِيْهِ ۛ هُدًى لِّلْمُتَّقِيْنَ ③

4. por tiuj, kiuj kredas je la Nevideblaĵoj kaj levas la preĝon kaj distribuas almozojn el tio, kion Ni donacis al ili,

الَّذِيْنَ يُؤْمِنُوْنَ بِالْغَيْبِ وَيُقِيْمُوْنَ الصَّلٰوةَ وَمِمَّا رَزَقْنٰهُمْ يُنْفِقُوْنَ ④

5. por tiuj, kiuj kredas je tio, kio estis revelaciita al vi, kaj je tio, kio estis revelaciita antaŭ vi, kaj firme kredas al la vivo venonta.

وَالَّذِيْنَ يُؤْمِنُوْنَ بِمَآ اُنْزِلَ اِلَيْكَ وَمَآ اُنْزِلَ مِنْ قَبْلِكَ ۚ وَبِالْاٰخِرَةِ هُمْ يُوْقِنُوْنَ ⑤

6. Por ili estos la gvidado de ilia Sinjoro kaj ili estos sukcesaj.

اُولٰٓئِكَ عَلٰى هُدًى مِّنْ رَّبِّهِمْ ۗ وَاُولٰٓئِكَ هُمُ الْمُفْلِحُوْنَ ⑥

7. Vere tiuj, kiuj ne kredas – kaj por ili estas egale, ĉu vi ilin admonas aŭ ne admonas – ili ne volas kredi;

اِنَّ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا سَوَآءٌ عَلَيْهِمْ ءَاَنْذَرْتَهُمْ اَمْ لَمْ تُنْذِرْهُمْ لَا يُؤْمِنُوْنَ ⑦

8. Allah sigelis iliajn korojn kaj iliajn orelojn kaj dika vualo kovras iliajn okulojn; por ili estos terura turmento.

خَتَمَ اللّٰهُ عَلٰى قُلُوْبِهِمْ وَعَلٰى سَمْعِهِمْ ۭ وَعَلٰٓى اَبْصَارِهِمْ غِشَاوَةٌ ۠ وَّلَهُمْ عَذَابٌ عَظِيْمٌ ⑧

9. Inter la homoj estas iuj, kiuj diras: "Ni kredas je Allah kaj al la Tago de la Juĝo", sed tamen ne estas kredantoj;

وَمِنَ النَّاسِ مَنْ يَّقُوْلُ اٰمَنَّا بِاللّٰهِ وَبِالْيَوْمِ الْاٰخِرِ وَمَا هُمْ بِمُؤْمِنِيْنَ ⑨

---

* v. la verson 68an k.sekv.

Entute 28 ĉapitroj de la Korano komenciĝas per similaj mallongigoj. Laŭ iuj tradicioj ĉiu litero prezentas specialan atributon aŭ sencon intime ligitan kun la enhavo de la koncerna ĉapitro. Ĉi tie la klarigo kutime akceptata de la tri literoj Alef (A), Lãm (L) kaj Mĩm (M) estas: Mi, Allah, Cioscia.

10. ili volus trompi Allahon kaj la kredantojn, sed ili ne sukcesas trompi iun alian ol sin mem; ili tamen ne konscias tion;

يُخٰدِعُوْنَ اللّٰهَ وَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا ۚ وَمَا يَخْدَعُوْنَ
اِلَّآ اَنْفُسَهُمْ وَمَا يَشْعُرُوْنَ ۝١٠

11. en iliaj koroj estas malsano, kaj Allah pliigis tiun malsanon, kaj por ili estos dolora puno, ĉar ili mensogadis.

فِيْ قُلُوْبِهِمْ مَّرَضٌ ۙ فَزَادَهُمُ اللّٰهُ مَرَضًا ۚ وَلَهُمْ
عَذَابٌ اَلِيْمٌ ۢ بِمَا كَانُوْا يَكْذِبُوْنَ ۝١١

12. Kiam estas dirite al ili: "Ne estigu malpacon sur la tero", ili respondas: "Male, ni estas pacemuloj! ".

وَاِذَا قِيْلَ لَهُمْ لَا تُفْسِدُوْا فِى الْاَرْضِ ۙ قَالُوْٓا اِنَّمَا
نَحْنُ مُصْلِحُوْنَ ۝١٢

13. Aŭskultu! Vere ili estas malpacemuloj, sed ili ne konscias tion.

اَلَآ اِنَّهُمْ هُمُ الْمُفْسِدُوْنَ وَلٰكِنْ لَّا يَشْعُرُوْنَ ۝١٣

14. Kiam estas dirite al ili: "Kredu vi, kiel jam aliaj kredis! ", ili respondas: "Ĉu ni kredu kiel la stultuloj? ". Aŭskultu! Vere ili mem estas stultuloj, sed ili ne scias tion.

وَاِذَا قِيْلَ لَهُمْ اٰمِنُوْا كَمَآ اٰمَنَ النَّاسُ قَالُوْٓا اَنُؤْمِنُ
كَمَآ اٰمَنَ السُّفَهَآءُ ۗ اَلَآ اِنَّهُمْ هُمُ السُّفَهَآءُ وَلٰكِنْ
لَّا يَعْلَمُوْنَ ۝١٤

15. Kiam ili renkontas la kredantojn, ili diras: "Ni kredas", sed kiam ili kaŝe kunvenas kun siaj delogistoj, ili diras: "Vere ni estas kun vi, vere ni nur mokadis".

وَاِذَا لَقُوا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا قَالُوْٓا اٰمَنَّا ۚ وَاِذَا خَلَوْا اِلٰى
شَيٰطِيْنِهِمْ ۙ قَالُوْٓا اِنَّا مَعَكُمْ ۙ اِنَّمَا نَحْنُ مُسْتَهْزِءُوْنَ ۝١٥

16. Allah repagos ilin pro ilia mokado kaj lasos ilin progresi je ilia malpiegeco; ili vagados kiel blinduloj.

اَللّٰهُ يَسْتَهْزِئُ بِهِمْ وَيَمُدُّهُمْ فِىْ طُغْيَانِهِمْ
يَعْمَهُوْنَ ۝١٦

17. Estas ili tiuj, kiuj aĉetis eraradon kontraŭ gvidado, sed tiu komerco ne havigis al ili iun ajn profiton, ili certe ne estas gvidataj.

اُولٰٓئِكَ الَّذِيْنَ اشْتَرَوُا الضَّلٰلَةَ بِالْهُدٰى ۖ فَمَا
رَبِحَتْ تِّجَارَتُهُمْ وَمَا كَانُوْا مُهْتَدِيْنَ ۝١٧

18. Ili similas al homo, kiu ekbruligis fajron: kiam ĝi ĉirkaŭe ĉion eklumigas, Allah forprenas ilian lumon kaj lasas ilin en la mallumo; ili nenion vidas:

مَثَلُهُمْ كَمَثَلِ الَّذِى اسْتَوْقَدَ نَارًا ۚ فَلَمَّآ اَضَآءَتْ
مَا حَوْلَهٗ ذَهَبَ اللّٰهُ بِنُوْرِهِمْ وَتَرَكَهُمْ فِىْ ظُلُمٰتٍ
لَّا يُبْصِرُوْنَ ۝١٨

19. surdaj, mutaj, blindaj; ili ne revenos.

صُمٌّۢ بُكْمٌ عُمْىٌ فَهُمْ لَا يَرْجِعُوْنَ ۝١٩

20. Aŭ alie: kiel pluvego el la nuboj; en ĝi estas mallumo kaj tondro kaj fulmo; ili metas siajn fingrojn en siajn orelojn pro la fulmofrapo kaj timas la morton; Allah ĉirkaŭas la miskredantojn.

اَوْ كَصَيِّبٍ مِّنَ السَّمَآءِ فِيْهِ ظُلُمٰتٌ وَّرَعْدٌ وَّبَرْقٌ ۚ
يَجْعَلُوْنَ اَصَابِعَهُمْ فِىْٓ اٰذَانِهِمْ مِّنَ الصَّوَاعِقِ حَذَرَ

21. La fulmo preskaŭ forprenas ilian vidadon; kiam ĝi ilin eklumigas, ili iras en ĝia lumo, kaj kiam fariĝas mallume, ili haltas. Se Allah volus, Li forprenus ilian aŭdadon kaj ilian vidadon: vere Allah havas povon super ĉiuj aferoj.

22. Ho vi homoj! Adoru vian Sinjoron, kiu kreis vin kaj tiujn, kiuj estis antaŭ vi, por ke vi estu ŝirmataj;

23. kiu faris por vi la teron kuŝejo kaj la ĉielon tegmento kaj sendis el la ĉielo akvon; poste Li sendis al vi nutraĵon el fruktoj. Do ne aldonu rivalojn al Allah; la veron vi ja konas.

24. Se vi tamen estas en dubo pri tio, kion Ni sendis al Nia servanto, vi alportu ĉapitron kiel estas tiu ĉi kaj voku viajn atestantojn* anstataŭ Allahon, se vi estas sinceraj.

25. Sed se vi ne faros tion – kaj vi neniam kapablos fari tion – timu la fajron, kies nutraĵo estas homoj kaj ŝtonoj**: ĝi estas pretigita por la miskredantoj.

26. Kaj vi, vi donu la bonan novaĵon al la kredantoj, ke por ili estos ĝardenoj, sub kiuj fluas riveroj. Ciam, kiam ili ricevos nutraĵon el iliaj fruktoj, ili diros: "Tio estas, kion ni kutimis ricevi antaŭe! " ĉar al ili estos donataj similaj donacoj. Tie estos por ili puraj edzinoj kaj tie ili restos por ĉiam.

27. Vere, Allah ne rifuzas doni klarigon eĉ pri aĵo tiel malgranda kiel muŝeto kaj eĉ pli malgranda. La kredantoj scias, ke tio estas la vero de ilia Sinjoro, sed la miskredantoj diras: "Kion intencas Allah per tiu klarigo? ". Per tio Li sigelas la eraradon de multaj kaj per tio Li gvidas multajn, kaj Li ne erarigas iun alian ol la malobeemulojn,

* t.e: la rivalojn (idolojn)
** la idoloj mem

28. kiuj rompis la aliancon kun Allah, post kiam estis interkonsentite pri ĝi, kaj detrancis tion, kion Allah ordonis kunigi, kaj estigis malpacon sur la tero; ili estas la perdontoj.

29. Kial vi rifuzas kredi je Allah? Vi vere estis senvivaj kaj Li vivigis vin, poste Li lasis vin morti, poste Li revivigos vin kaj fine vi revenos al Li.

30. Li, kiu kreis por vi ĉion sur la tero kaj Sin poste turnis al la ĉielo kaj perfektigis sep ĉielojn; Li vere scias ĉion.

159. Vere la montetoj As-Safã kaj Al-Marva* estas memorigaĵoj pri Allah, do por tiu, kiu plenumos la pligrimon al la Domo aŭ la Umra-on**, ne estos peko ĉirkaŭiri ilin ambaŭ. Kiu pli bonfaros ol estas devo, tiu sciu: vere Allah estas ŝatema, ĉioscia.

إِنَّ الَّذِينَ يَكْتُمُونَ مَآ أَنزَلْنَا مِنَ الْبَيِّنَٰتِ وَالْهُدَىٰ
مِنۢ بَعْدِ مَا بَيَّنَّٰهُ لِلنَّاسِ فِي الْكِتَٰبِ ۙ أُولَٰئِكَ يَلْعَنُهُمُ
اللَّهُ وَيَلْعَنُهُمُ اللَّٰعِنُونَ ﴿١٥٩﴾

160. Vere, kiuj kaŝas la signojn manifestitajn kaj la gvidilon, kiujn Ni sendis, post kiam Ni manifestis ilin al la gentoj, tiujn Allah malbenos kaj tiujn ĉiuj riproĉos.

إِلَّا الَّذِينَ تَابُوا وَأَصْلَحُوا وَبَيَّنُوا فَأُولَٰئِكَ أَتُوبُ
عَلَيْهِمْ ۚ وَأَنَا التَّوَّابُ الرَّحِيمُ ﴿١٦٠﴾

161. Al tiuj tamen, kiuj pentos kaj plibonigos kaj proklamos la veron, Mi turnos Min kompateme, ĉar Mi estas la Kompatema, la Pardonema.

إِنَّ الَّذِينَ كَفَرُوا وَمَاتُوا وَهُمْ كُفَّارٌ أُولَٰئِكَ
عَلَيْهِمْ لَعْنَةُ اللَّهِ وَالْمَلَٰٓئِكَةِ وَالنَّاسِ أَجْمَعِينَ ﴿١٦١﴾

162. Vere sur la miskredantojn, kiuj restos tiaj ĝis la morto, falos la malbeno de Allah kaj de la anĝeloj kaj de la gentoj ĉiuj kune.

خَٰلِدِينَ فِيهَا ۖ لَا يُخَفَّفُ عَنْهُمُ الْعَذَابُ وَلَا
هُمْ يُنظَرُونَ ﴿١٦٢﴾

163. Sub ĝi ili restos ĉiam; ilia puno neniam malgraviĝos kaj por ili ne estos prokrasto.

وَإِلَٰهُكُمْ إِلَٰهٌ وَاحِدٌ ۖ لَّآ إِلَٰهَ إِلَّا هُوَ الرَّحْمَٰنُ الرَّحِيمُ ﴿١٦٣﴾

164. Via Dio estas la sola Dio; krom Li ne ekzistas alia Dio, Li estas la Donema, la Pardonema.

إِنَّ فِي خَلْقِ السَّمَٰوَٰتِ وَالْأَرْضِ وَاخْتِلَافِ اللَّيْلِ وَ
النَّهَارِ وَالْفُلْكِ الَّتِي تَجْرِي فِي الْبَحْرِ بِمَا يَنفَعُ
النَّاسَ وَمَآ أَنزَلَ اللَّهُ مِنَ السَّمَآءِ مِن مَّآءٍ فَأَحْيَا
بِهِ الْأَرْضَ بَعْدَ مَوْتِهَا وَبَثَّ فِيهَا مِن كُلِّ دَآبَّةٍ
وَتَصْرِيفِ الرِّيَٰحِ وَالسَّحَابِ الْمُسَخَّرِ بَيْنَ السَّمَآءِ
وَالْأَرْضِ لَءَايَٰتٍ لِّقَوْمٍ يَعْقِلُونَ ﴿١٦٤﴾

165. Vere estas signoj, por la gentoj, kiuj komprenas, en la kreo de la ĉieloj kaj de la tero kaj en la alternado de la nokto kaj de la tago kaj en la ŝipoj, kiuj sulkas la maron por la utilo de la homoj, kaj en la akvo, kiun Allah sendas el la ĉielo kaj per kiu Li vivigas la teron sekiĝintan – kaj sur ĝin Li dissendas bestojn ĉiuspecajn – kaj en la alternado de la ventoj kaj de la nuboj, kiuj estas devigataj servi inter la ĉielo kaj la tero.

* Du montetoj en Mekko, proksime de la Ka'ba

** v. verson 197an

وَمِنَ النَّاسِ مَنْ يَّتَّخِذُ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ اَنْدَادًا
يُّحِبُّوْنَهُمْ كَحُبِّ اللّٰهِ ؕ وَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اَشَدُّ حُبًّا
لِّلّٰهِ ؕ وَلَوْ يَرَى الَّذِيْنَ ظَلَمُوْٓا اِذْ يَرَوْنَ الْعَذَابَ لَا
اَنَّ الْقُوَّةَ لِلّٰهِ جَمِيْعًا ۙ وَّاَنَّ اللّٰهَ شَدِيْدُ الْعَذَابِ ﴿١٦٥﴾
اِذْ تَبَرَّاَ الَّذِيْنَ اتُّبِعُوْا مِنَ الَّذِيْنَ اتَّبَعُوْا وَرَاَوُا الْعَذَابَ
وَتَقَطَّعَتْ بِهِمُ الْاَسْبَابُ ﴿١٦٦﴾
وَقَالَ الَّذِيْنَ اتَّبَعُوْا لَوْ اَنَّ لَنَا كَرَّةً فَنَتَبَرَّاَ مِنْهُمْ
كَمَا تَبَرَّءُوْا مِنَّا ؕ كَذٰلِكَ يُرِيْهِمُ اللّٰهُ اَعْمَالَهُمْ حَسَرٰتٍ
عَلَيْهِمْ ؕ وَمَا هُمْ بِخٰرِجِيْنَ مِنَ النَّارِ ﴿١٦٧﴾

يٰٓاَيُّهَا النَّاسُ كُلُوْا مِمَّا فِى الْاَرْضِ حَلٰلًا طَيِّبًا ۖ وَّلَا
تَتَّبِعُوْا خُطُوٰتِ الشَّيْطٰنِ ؕ اِنَّهٗ لَكُمْ عَدُوٌّ مُّبِيْنٌ ﴿١٦٨﴾
اِنَّمَا يَاْمُرُكُمْ بِالسُّوْٓءِ وَالْفَحْشَآءِ وَاَنْ تَقُوْلُوْا عَلَى
اللّٰهِ مَا لَا تَعْلَمُوْنَ ﴿١٦٩﴾
وَاِذَا قِيْلَ لَهُمُ اتَّبِعُوْا مَآ اَنْزَلَ اللّٰهُ قَالُوْا بَلْ
نَتَّبِعُ مَآ اَلْفَيْنَا عَلَيْهِ اٰبَآءَنَا ؕ اَوَلَوْ كَانَ اٰبَآؤُهُمْ
لَا يَعْقِلُوْنَ شَيْـًٔا وَّلَا يَهْتَدُوْنَ ﴿١٧٠﴾
وَمَثَلُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا كَمَثَلِ الَّذِىْ يَنْعِقُ بِمَا لَا يَسْمَعُ
اِلَّا دُعَآءً وَّنِدَآءً ؕ صُمٌّۢ بُكْمٌ عُمْىٌ فَهُمْ لَا
يَعْقِلُوْنَ ﴿١٧١﴾
يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا كُلُوْا مِنْ طَيِّبٰتِ مَا رَزَقْنٰكُمْ
وَاشْكُرُوْا لِلّٰهِ اِنْ كُنْتُمْ اِيَّاهُ تَعْبُدُوْنَ ﴿١٧٢﴾

166. Malgraŭ tio estas inter la homoj iuj, kiuj aldonas rivalojn al Allah, kaj donas al ili amon, kiel la amon al Allah. La kredantoj tamen ankoraŭ pli amas Allahon, kaj, se la malbonfarantoj scius, kiam ili vidos Lian punon, ili komprenus, ke ĉiu povo apartenas al Allah kaj ke Allah estas severa je la puno.

167. Se tiuj, kiuj gvidas, repuŝus siajn sekvantojn – kaj ili vidos la punon kaj iliaj ligiloj ĉiuj estos trancitaj! –

168. la sekvantoj dirus: "Se ni nur povus reiri, ni repuŝus ilin, kiel ili repuŝis nin". Tiel Allah montros al ili iliajn farojn; por ili estos doloro kaj ne estos savo de l' fajro.

169. Ho vi homoj! Manĝu tion, kio estas permesita kaj bona sur la tero, kaj ne sekvu la piedsignojn de Satano; vere li estas via evidenta malamiko,

170. vere li ordonas al vi nur malbonon kaj hontindaĵojn kaj faras, ke vi parolu pri Allah ion, kion vi ne scias.

171. Kiam estas dirite al ili: "Sekvu tion, kion Allah sendis", ili diras: "Ne! Ni sekvos tion, en kio ni trovis niajn prapatrojn". Kiel? Eĉ se iliaj prapatroj nenion komprenis kaj ne estis gvidataj?

172. La miskredantoj similas al iu, kiu nenion aŭdas krom vokon aŭ krion*. Surdaj, mutaj, blindaj, ili nenion komprenas.

173. Ho vi kredantoj, manĝu la bonajn aĵojn, kiujn Ni donis al vi, kaj danku Allahon, se estas Li Tiu, kiun vi adoras.

* Kutime oni interpretas ĉi tiun frazon: "...similas al homoj ĉirkaŭantaj iun, kiu vokas la bestojn, kiuj nur komprenas krion, sed ne komprenas vortojn".

174. Vere Li malpermesis al vi ĉian mortintaĵon kaj sangon kaj viandon porkan kaj tion, super kio alia nomo estis vokita ol tiu de Allah. Kiu tamen estas puŝata de neceso – ne pro avido aŭ ekscesemo – por li tio ne estos peko. Vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

إِنَّمَا حَرَّمَ عَلَيْكُمُ الْمَيْتَةَ وَالدَّمَ وَلَحْمَ الْخِنْزِيرِ
وَمَا أُهِلَّ بِهِ لِغَيْرِ اللَّهِ ۖ فَمَنِ اضْطُرَّ غَيْرَ بَاغٍ وَلَا
عَادٍ فَلَا إِثْمَ عَلَيْهِ ۚ إِنَّ اللَّهَ غَفُورٌ رَحِيمٌ ﴿١٧٣﴾

175. Kiuj kaŝas tion, kion Allah sendis el la Libro, kaj vendas ĝin kontraŭ malalta prezo, tiuj plenigas sian ventron per nenio alia ol per fajro, kaj Allah ne parolos al ili en la tago de la reviviĝo, kaj Li ne purigos ilin kaj por ili estos dolora puno.

إِنَّ الَّذِينَ يَكْتُمُونَ مَا أَنْزَلَ اللَّهُ مِنَ الْكِتَابِ وَ
يَشْتَرُونَ بِهِ ثَمَنًا قَلِيلًا ۙ أُولَٰئِكَ مَا يَأْكُلُونَ فِي بُطُونِهِمْ
إِلَّا النَّارَ وَلَا يُكَلِّمُهُمُ اللَّهُ يَوْمَ الْقِيَامَةِ وَلَا يُزَكِّيهِمْ ۖ
وَلَهُمْ عَذَابٌ أَلِيمٌ ﴿١٧٤﴾

176. Ili estas tiuj, kiuj vendas la gvidadon kontraŭ la erarado kaj pardonon kontraŭ puno; kiom granda estas ilia nekompreno de la fajro!

أُولَٰئِكَ الَّذِينَ اشْتَرَوُا الضَّلَالَةَ بِالْهُدَىٰ وَالْعَذَابَ
بِالْمَغْفِرَةِ ۚ فَمَا أَصْبَرَهُمْ عَلَى النَّارِ ﴿١٧٥﴾

177. Tio estas, ĉar Allah sendis la Libron kun la vero, kaj certe tiuj, kiuj malkonsentas pri la Libro, iris malproksimen sur la vojo de la skismo.

ذَٰلِكَ بِأَنَّ اللَّهَ نَزَّلَ الْكِتَابَ بِالْحَقِّ ۗ وَإِنَّ الَّذِينَ اخْتَلَفُوا
فِي الْكِتَابِ لَفِي شِقَاقٍ بَعِيدٍ ﴿١٧٦﴾ ع ٢٢

178. Virto ne signifas turni vin orienten aŭ okcidenten, sed kredi je Allah kaj al la vivo venonta kaj je la anĝeloj kaj je la Libro kaj al la profetoj, kaj doni monon por la parencoj kaj por la orfoj kaj por la malriĉuloj kaj por la vojirantoj kaj por la almozuloj kaj por la elaĉeto de la malliberuloj, kaj levi preĝon, kaj doni almozojn, kaj respekti la aliancojn ĉiam, kiam ili estas faritaj; kaj havi firmecon en malriĉo kaj en malsano kaj en milittempo. Kiuj tiel agas, tiuj estas sinceremuloj kaj justuloj.

لَيْسَ الْبِرَّ أَنْ تُوَلُّوا وُجُوهَكُمْ قِبَلَ الْمَشْرِقِ وَ
الْمَغْرِبِ وَلَٰكِنَّ الْبِرَّ مَنْ آمَنَ بِاللَّهِ وَالْيَوْمِ الْآخِرِ
وَالْمَلَائِكَةِ وَالْكِتَابِ وَالنَّبِيِّينَ ۚ وَآتَى الْمَالَ عَلَىٰ
حُبِّهِ ذَوِي الْقُرْبَىٰ وَالْيَتَامَىٰ وَالْمَسَاكِينَ وَابْنَ السَّبِيلِ
وَالسَّائِلِينَ وَفِي الرِّقَابِ ۚ وَأَقَامَ الصَّلَاةَ وَآتَى
الزَّكَاةَ ۚ وَالْمُوفُونَ بِعَهْدِهِمْ إِذَا عَاهَدُوا ۖ وَالصَّابِرِينَ
فِي الْبَأْسَاءِ وَالضَّرَّاءِ وَحِينَ الْبَأْسِ ۗ أُولَٰئِكَ الَّذِينَ
صَدَقُوا ۖ وَأُولَٰئِكَ هُمُ الْمُتَّقُونَ ﴿١٧٧﴾

179. Ho vi kredantoj, al vi estas ordonite repagi murdon laŭrajte: liberulon pro liberulo, sklavon pro sklavo, virinon pro virino; tamen se indulgo estos konsentita al iu ajn fare de lia frato, tiam la persekuto estu farita juste kaj la kulpulo pagu al li la murdopagon volonte. Tio estas por vi de via Sinjoro plifaciligo kaj graco. Por la ofendantoj post tio estos dolora puno.

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا كُتِبَ عَلَيْكُمُ الْقِصَاصُ فِي الْقَتْلَى ۖ
الْحُرُّ بِالْحُرِّ وَالْعَبْدُ بِالْعَبْدِ وَالْأُنْثَىٰ بِالْأُنْثَىٰ ۚ فَمَنْ
عُفِيَ لَهُ مِنْ أَخِيهِ شَيْءٌ فَاتِّبَاعٌ بِالْمَعْرُوفِ وَأَدَاءٌ

إِلَيْهِ بِإِحْسَانٍ ۗ ذٰلِكَ تَخْفِيفٌ مِّن رَّبِّكُمْ وَرَحْمَةٌ ۗ
فَمَنِ اعْتَدٰى بَعْدَ ذٰلِكَ فَلَهُ عَذَابٌ أَلِيمٌ ﴿١٧٨﴾
وَلَكُمْ فِي الْقِصَاصِ حَيٰوةٌ يٰٓأُولِي الْأَلْبَابِ لَعَلَّكُمْ
تَتَّقُونَ ﴿١٧٩﴾

180. En la leĝo de la repago estas vivo por vi prudentuloj, por ke vi evitu la malbonon.

كُتِبَ عَلَيْكُمْ إِذَا حَضَرَ أَحَدَكُمُ الْمَوْتُ إِن تَرَكَ
خَيْرًا ۖ الْوَصِيَّةُ لِلْوَالِدَيْنِ وَالْأَقْرَبِينَ بِالْمَعْرُوفِ ۖ
حَقًّا عَلَى الْمُتَّقِينَ ﴿١٨٠﴾

181. Al vi estas ordonite, kiam alproksimiĝas por iu el vi la morto – se li postlasas havaĵojn – testamenti por la gepatroj kaj por la parencoj laŭ justeco; tio estas devo por la justuloj.

فَمَن بَدَّلَهُ بَعْدَ مَا سَمِعَهُ فَإِنَّمَا إِثْمُهُ عَلَى الَّذِينَ
يُبَدِّلُونَهُ ۚ إِنَّ اللَّهَ سَمِيعٌ عَلِيمٌ ﴿١٨١﴾

182. Sur tiuj, kiuj poste ŝanĝos, kion ili aŭdis, restos la kulpo. Vere Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

فَمَنْ خَافَ مِن مُّوصٍ جَنَفًا أَوْ إِثْمًا فَأَصْلَحَ بَيْنَهُمْ
فَلَا إِثْمَ عَلَيْهِ ۚ إِنَّ اللَّهَ غَفُورٌ رَّحِيمٌ ﴿١٨٢﴾ ع ٢٢

183. Kiu tamen timos de la testamentanto partiecon aŭ maljustecon kaj pro tio sin intermetos paciganto, tiu ne pekos; vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

يٰٓأَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا كُتِبَ عَلَيْكُمُ الصِّيَامُ كَمَا كُتِبَ
عَلَى الَّذِينَ مِن قَبْلِكُمْ لَعَلَّكُمْ تَتَّقُونَ ﴿١٨٣﴾
أَيَّامًا مَّعْدُودٰتٍ ۚ فَمَن كَانَ مِنكُم مَّرِيضًا أَوْ عَلٰى
سَفَرٍ فَعِدَّةٌ مِّنْ أَيَّامٍ أُخَرَ ۚ وَعَلَى الَّذِينَ يُطِيقُونَهُ
فِدْيَةٌ طَعَامُ مِسْكِينٍ ۖ فَمَن تَطَوَّعَ خَيْرًا فَهُوَ خَيْرٌ
لَّهُ ۚ وَأَن تَصُومُوا خَيْرٌ لَّكُمْ إِن كُنتُمْ تَعْلَمُونَ ﴿١٨٤﴾

184. Ho vi kredantoj! Al vi estas ordonite fasti, kiel estis ordonite al tiuj, kiuj estis antaŭ vi, por ke vi evitu la malbonon.

185. Tio validas por fiksita nombro da tagoj; sed kiu el vi estas malsana aŭ en vojaĝo, tiu fastu poste por la sama nombro da tagoj; kaj por tiuj, kiuj ne kapablas fari tion krom per grava ofero, estos eble alie plenumi ilian devon, nome nutri malriĉulon. Kaj por tiu, kiu faros bonon, pli ol estas devo, des pli bone estos por li; kaj fasti estas bone por vi, se nur vi komprenas tion.

186. Estas la monato Ramadān, en kiu estis sendita al vi la Korano kiel gvidilo por la homaro kaj kiel evidenta signo kaj ekkonigilo. Kiu el vi estos hejme en tiu monato, tiu fastu. Kiu tamen estos malsana aŭ en vojaĝo, tiu fastu poste por la sama nombro da tagoj. Allah volas faciligi kaj ne malfaciligi vian taskon, kaj Li volas, ke vi plenumu la nombron da tagoj kaj laŭdegu Allahon, ĉar Li gvidis vin, kaj ke vi estu dankaj.

شَهْرُ رَمَضَانَ الَّذِيْٓ اُنْزِلَ فِيْهِ الْقُرْاٰنُ هُدًى
لِّلنَّاسِ وَبَيِّنٰتٍ مِّنَ الْهُدٰى وَالْفُرْقَانِ ۚ فَمَنْ شَهِدَ
مِنْكُمُ الشَّهْرَ فَلْيَصُمْهُ ۭ وَمَنْ كَانَ مَرِيْضًا اَوْ عَلٰي
سَفَرٍ فَعِدَّةٌ مِّنْ اَيَّامٍ اُخَرَ ۭ يُرِيْدُ اللّٰهُ بِكُمُ
الْيُسْرَ وَلَا يُرِيْدُ بِكُمُ الْعُسْرَ ۡ وَلِتُكْمِلُوا الْعِدَّةَ
وَلِتُكَبِّرُوا اللّٰهَ عَلٰي مَا هَدٰىكُمْ وَلَعَلَّكُمْ تَشْكُرُوْنَ ۝۱۸۵

187. Kiam Miaj servantoj demandos vin pri Mi: vere Mi estas proksima, Mi ĉiam respondas al la preĝo de preĝanto, kiam li petas,do aŭskultu Min kaj kredu je Mi, por ke vi sekvu la ĝustan vojon.

وَاِذَا سَاَلَكَ عِبَادِيْ عَنِّيْ فَاِنِّيْ قَرِيْبٌ ۭ اُجِيْبُ دَعْوَةَ
الدَّاعِ اِذَا دَعَانِ ۙ فَلْيَسْتَجِيْبُوْا لِيْ وَلْيُؤْمِنُوْا بِيْ لَعَلَّهُمْ
يَرْشُدُوْنَ ۝۱۸۶

188. Estas permesite al vi unuiĝi kun viaj edzinoj dum la nokto de la fasto. Ili estas vesto por vi kaj vi estas vesto por ili. Allah scias, ke vi estis agintaj maljuste kontraŭ vi mem, kaj Li turnis Sin kompateme al vi kaj konsentis al vi faciligon. Tiel nun unuiĝu kun ili kaj serĉu tion, kion ordonis al vi Allah, kaj manĝu kaj trinku, ĝis vi kapablos distingi la blankan fadenon disde la nigra fadeno je la tagiĝo. Poste plenumu la faston ĝis la nokto, kaj ne unuiĝu kun ili, kiam vi restas en la moskeoj*. Tiuj estas la baroj de Allah, kaj vi ne eĉ alproksimiĝu al ili. Tiel Allah manifestas Siajn signojn por la homoj, por ke ili forbaru la malbonon.

اُحِلَّ لَكُمْ لَيْلَةَ الصِّيَامِ الرَّفَثُ اِلٰى نِسَاۗىِٕكُمْ ۭ هُنَّ
لِبَاسٌ لَّكُمْ وَاَنْتُمْ لِبَاسٌ لَّهُنَّ ۭ عَلِمَ اللّٰهُ اَنَّكُمْ
كُنْتُمْ تَخْتَانُوْنَ اَنْفُسَكُمْ فَتَابَ عَلَيْكُمْ وَعَفَا
عَنْكُمْ ۚ فَالْئٰنَ بَاشِرُوْهُنَّ وَابْتَغُوْا مَا كَتَبَ اللّٰهُ لَكُمْ ۠
وَكُلُوْا وَاشْرَبُوْا حَتّٰى يَتَبَيَّنَ لَكُمُ الْخَيْطُ الْاَبْيَضُ
مِنَ الْخَيْطِ الْاَسْوَدِ مِنَ الْفَجْرِ ۡ ثُمَّ اَتِمُّوا الصِّيَامَ
اِلَى الَّيْلِ ۚ وَلَا تُبَاشِرُوْهُنَّ وَاَنْتُمْ عٰكِفُوْنَ ۙ فِي الْمَسٰجِدِ ۭ
تِلْكَ حُدُوْدُ اللّٰهِ فَلَا تَقْرَبُوْهَا ۭ كَذٰلِكَ يُبَيِّنُ اللّٰهُ
اٰيٰتِهٖ لِلنَّاسِ لَعَلَّهُمْ يَتَّقُوْنَ ۝۱۸۷

189. Ne formanĝu unu de la alia la havaĵojn kaj ne proponu ilin kiel subaĉeton al la aŭtoritatuloj, por formanĝi maljuste parton de la proprajoj de aliaj.

190. Ili demandas vin pri la novaj lunoj. Diru: "Ili estas mezurilo de la tempo por la homoj kaj por la pilgrimo". Ne estas virto eniri la domojn de malantaŭe**, sed vere estas virto respektegi Allahon. Do eniru la domojn tra iliaj pordoj, kaj respektegu Allahon, por ke vi estu sukcesaj,

وَلَا تَاْكُلُوْٓا اَمْوَالَكُمْ بَيْنَكُمْ بِالْبَاطِلِ وَتُدْلُوْا بِهَا
اِلَى الْحُكَّامِ لِتَاْكُلُوْا فَرِيْقًا مِّنْ اَمْوَالِ النَّاسِ بِالْاِثْمِ
وَاَنْتُمْ تَعْلَمُوْنَ ۝۱۸۸ ع ۲۳

* t.e.: en la lastaj dek tagoj de la tempo de fasto, kiam la preĝado kaj la meditado intensiviĝas.

** Aludo al superstiĉa kutimo de la tiamaj Araboj

يَسْـَٔلُوْنَكَ عَنِ الْاَهِلَّةِ ۭ قُلْ هِىَ مَوَاقِيْتُ لِلنَّاسِ
وَالْحَجِّ ۭ وَلَيْسَ الْبِرُّ بِاَنْ تَاْتُوا الْبُيُوْتَ مِنْ ظُهُوْرِهَا
وَلٰكِنَّ الْبِرَّ مَنِ اتَّقٰى ۚ وَاْتُوا الْبُيُوْتَ مِنْ اَبْوَابِهَا ۠
وَاتَّقُوا اللّٰهَ لَعَلَّكُمْ تُفْلِحُوْنَ ﴿١٨٩﴾

191. kaj batalu por la afero de Allah kontraŭ tiuj, kiuj batalas kontraŭ vi, sed neniam ekscesu. Vere Allah ne amas la ekscesantojn.

وَقَاتِلُوْا فِيْ سَبِيْلِ اللّٰهِ الَّذِيْنَ يُقَاتِلُوْنَكُمْ وَلَا
تَعْتَدُوْا ۭ اِنَّ اللّٰهَ لَا يُحِبُّ الْمُعْتَدِيْنَ ﴿١٩٠﴾

192. Mortigu ilin, kie ajn vi ilin trovos, kaj forpelu ilin de ĉie, de kie ili vin forpelis, ĉar la persekuto estas pli malbona ol la mortigo. Tamen ne batalu kontraŭ ili apud la Sankta Moskeo, ĝis ili ne batalos kontraŭ vi apud ĝi. Tamen, se ili atakos vin, mortigu ilin. Tio estu la repago por la miskredantoj.

وَاقْتُلُوْهُمْ حَيْثُ ثَقِفْتُمُوْهُمْ وَاَخْرِجُوْهُمْ مِّنْ
حَيْثُ اَخْرَجُوْكُمْ وَالْفِتْنَةُ اَشَدُّ مِنَ الْقَتْلِ ۚ وَ
لَا تُقٰتِلُوْهُمْ عِنْدَ الْمَسْجِدِ الْحَرَامِ حَتّٰى يُقٰتِلُوْكُمْ
فِيْهِ ۚ فَاِنْ قٰتَلُوْكُمْ فَاقْتُلُوْهُمْ ۭ كَذٰلِكَ جَزَاۗءُ الْكٰفِرِيْنَ ﴿١٩١﴾

193. Se ili tamen forlasos, vere Allah estas kompatema, pardonema.

فَاِنِ انْتَهَوْا فَاِنَّ اللّٰهَ غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ﴿١٩٢﴾

194. Batalu kontraŭ ili, ĝis estos libera la religio de Allah. Se ili tamen forlasos, tiam ne estos permesite al vi agi malamike krom kontraŭ la malbonfarantoj.

وَقٰتِلُوْهُمْ حَتّٰى لَا تَكُوْنَ فِتْنَةٌ وَّيَكُوْنَ الدِّيْنُ لِلّٰهِ ۭ
فَاِنِ انْتَهَوْا فَلَا عُدْوَانَ اِلَّا عَلَي الظّٰلِمِيْنَ ﴿١٩٣﴾

195. Sanktan monaton pro sankta monato; estu repago por sanktaĵoj; kaj tiujn, kiuj vin ofendis, vi repagu en la sama kvanto, kiel ili vin ofendis. Respektegu Allahon kaj sciu, ke Allah estas kun la justuloj.

اَلشَّهْرُ الْحَرَامُ بِالشَّهْرِ الْحَرَامِ وَالْحُرُمٰتُ قِصَاصٌ ۭ
فَمَنِ اعْتَدٰى عَلَيْكُمْ فَاعْتَدُوْا عَلَيْهِ بِمِثْلِ مَا اعْتَدٰى
عَلَيْكُمْ ۠ وَاتَّقُوا اللّٰهَ وَاعْلَمُوْٓا اَنَّ اللّٰهَ مَعَ الْمُتَّقِيْنَ ﴿١٩٤﴾

196. Donu almozojn por la afero de Allah kaj ne ĵetu vin mem en pereon per viaj propraj manoj, kaj agu bone; vere Allah amas la bonfarantojn.

وَاَنْفِقُوْا فِيْ سَبِيْلِ اللّٰهِ وَلَا تُلْقُوْا بِاَيْدِيْكُمْ اِلَى التَّهْلُكَةِ ۛ
وَاَحْسِنُوْا ۚ اِنَّ اللّٰهَ يُحِبُّ الْمُحْسِنِيْنَ ﴿١٩٥﴾

197. Plenumu la pilgrimon kaj la Umra-on* pro amo al Allah, sed, se tio neeblas, tiam oferu tion, kio estas pli facila; kaj ne razu viajn kapojn, antaŭ ol la ofero estos atinginta sian destinon. Kiuj el vi estas malsanaj aŭ havas iun malsanon en sia kapo, tiuj elpagu per fasto aŭ almozoj aŭ ofero. Kaj kiam vi estas sekuraj, kiuj el vi volas plenumi la Umra-on kune kun la pilgrimo, tiuj proponu oferon tre facilan. Kiuj tamen nenion kapablas plenumi, tiuj fastu dum la pilgrimo tri tagojn kaj sep post via reveno, nome entute dek tagojn. Tio validas por tiuj, kies familio ne loĝas apud la Sankta Moskeo. Respektegu Allahon kaj sciu, ke Allah estas severa je la puno.

198. La monatoj por la pilgrimo estas konataj; do kiu decidis plenumi tiam la pilgrimon, ne ekposedu virinon kaj ne peku kaj ne estigu malpacon dum la pilgrimo. Allah scias, kion ajn bonan vi faras. Pretigu provizaĵojn, sed la plej bona provizaĵo estu la justeco. Respektegu nur Allahon, ho vi prudentuloj!

199. Ne estas peko por vi serĉi la gracon de via Sinjoro, kaj, kiam vi revenos de Arafât, vi memoru Allahon en Maŝ'ar-al-Harâm** kaj memoru, kiel Li gvidis vin, kvankam vi antaŭe estis erarantaj.

200. Poste revenu de tie, de kie la gentoj revenas, kaj serĉu pardonon ĉe Allah; vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

201. Kiam vi estos plenumintaj la ritojn de la adorado, memoru Allahon kiel faris viaj prapatroj kaj eĉ pli intense. Inter la homoj estas iuj, kiuj diras: "Nia Sinjoro, donu al ni en ĉi tiu vivo la bonajn aĵojn". Neniu el ili tamen partoprenos en la vivo venonta.

وَأَتِمُّوا الْحَجَّ وَالْعُمْرَةَ لِلَّهِ فَإِنْ أُحْصِرْتُمْ فَمَا اسْتَيْسَرَ
مِنَ الْهَدْيِ ۚ وَلَا تَحْلِقُوا رُءُوسَكُمْ حَتَّىٰ يَبْلُغَ الْهَدْيُ
مَحِلَّهُ ۚ فَمَنْ كَانَ مِنْكُمْ مَرِيضًا أَوْ بِهِ أَذًى مِنْ رَأْسِهِ
فَفِدْيَةٌ مِنْ صِيَامٍ أَوْ صَدَقَةٍ أَوْ نُسُكٍ ۚ فَإِذَا أَمِنْتُمْ
فَمَنْ تَمَتَّعَ بِالْعُمْرَةِ إِلَى الْحَجِّ فَمَا اسْتَيْسَرَ مِنَ
الْهَدْيِ ۚ فَمَنْ لَمْ يَجِدْ فَصِيَامُ ثَلَاثَةِ أَيَّامٍ فِي الْحَجِّ
وَسَبْعَةٍ إِذَا رَجَعْتُمْ ۗ تِلْكَ عَشَرَةٌ كَامِلَةٌ ۗ ذَٰلِكَ لِمَنْ
لَمْ يَكُنْ أَهْلُهُ حَاضِرِي الْمَسْجِدِ الْحَرَامِ ۚ وَاتَّقُوا اللَّهَ
وَاعْلَمُوا أَنَّ اللَّهَ شَدِيدُ الْعِقَابِ ﴿١٩٦﴾
الْحَجُّ أَشْهُرٌ مَعْلُومَاتٌ ۚ فَمَنْ فَرَضَ فِيهِنَّ الْحَجَّ
فَلَا رَفَثَ وَلَا فُسُوقَ وَلَا جِدَالَ فِي الْحَجِّ ۗ وَمَا
تَفْعَلُوا مِنْ خَيْرٍ يَعْلَمْهُ اللَّهُ ۗ وَتَزَوَّدُوا فَإِنَّ خَيْرَ
الزَّادِ التَّقْوَىٰ ۚ وَاتَّقُونِ يَا أُولِي الْأَلْبَابِ ﴿١٩٧﴾
لَيْسَ عَلَيْكُمْ جُنَاحٌ أَنْ تَبْتَغُوا فَضْلًا مِنْ رَبِّكُمْ ۚ
فَإِذَا أَفَضْتُمْ مِنْ عَرَفَاتٍ فَاذْكُرُوا اللَّهَ عِنْدَ الْمَشْعَرِ
الْحَرَامِ ۖ وَاذْكُرُوهُ كَمَا هَدَاكُمْ ۚ وَإِنْ كُنْتُمْ مِنْ
قَبْلِهِ لَمِنَ الضَّالِّينَ ﴿١٩٨﴾
ثُمَّ أَفِيضُوا مِنْ حَيْثُ أَفَاضَ النَّاسُ وَاسْتَغْفِرُوا
اللَّهَ ۚ إِنَّ اللَّهَ غَفُورٌ رَحِيمٌ ﴿١٩٩﴾
فَإِذَا قَضَيْتُمْ مَنَاسِكَكُمْ فَاذْكُرُوا اللَّهَ كَذِكْرِكُمْ
آبَاءَكُمْ أَوْ أَشَدَّ ذِكْرًا ۗ فَمِنَ النَّاسِ مَنْ يَقُولُ
رَبَّنَا آتِنَا فِي الدُّنْيَا وَمَا لَهُ فِي الْآخِرَةِ مِنْ خَلَاقٍ ﴿٢٠٠﴾

* Umra = "malgranda pilgrimo", kiu, male de la "granda pilgrimo" (Haĝĝ), povas esti plenumata ne nur je fiksita tempo, sed kiam oni volas.

** valo, resp. monteto apud Mekko

وَمِنْهُمْ مَّنْ يَّقُوْلُ رَبَّنَآ اٰتِنَا فِي الدُّنْيَا حَسَنَةً وَّ
فِي الْاٰخِرَةِ حَسَنَةً وَّقِنَا عَذَابَ النَّارِ ﴿٢٠٢﴾

202. Aliaj inter ili diras: "Nia Sinjoro, donu al ni bonajn aĵojn en ĉi tiu vivo kaj en la vivo venonta kaj ŝirmu nin kontraŭ la puno de l' fajro! "

أُولٰٓئِكَ لَهُمْ نَصِيْبٌ مِّمَّا كَسَبُوْا ۭ وَاللّٰهُ سَرِيْعُ الْحِسَابِ ﴿٢٠٣﴾

203. Por ili estos ilia parto de propraĵoj laŭ ilia merito. Allah estas rapida je l' juĝo.

وَاذْكُرُوا اللّٰهَ فِيْٓ اَيَّامٍ مَّعْدُوْدٰتٍ ۭ فَمَنْ تَعَجَّلَ فِيْ
يَوْمَيْنِ فَلَآ اِثْمَ عَلَيْهِ ۚ وَمَنْ تَاَخَّرَ فَلَآ اِثْمَ عَلَيْهِ ۙ
لِمَنِ اتَّقٰى ۭ وَاتَّقُوا اللّٰهَ وَاعْلَمُوْٓا اَنَّكُمْ اِلَيْهِ تُحْشَرُوْنَ ﴿٢٠٣﴾

204. Memoru Allahon dum la difinita nombro da tagoj; kiu tamen rapidos kaj post du tagoj foriros, tiu ne pekos; ankaŭ tiu, kiu pli longe restos, ne pekos. Tio estas por la justuloj. Respektegu Allahon kaj sciu, ke vi estos kunvenigitaj al Li.

وَمِنَ النَّاسِ مَنْ يُّعْجِبُكَ قَوْلُهٗ فِي الْحَيٰوةِ الدُّنْيَا
وَيُشْهِدُ اللّٰهَ عَلٰي مَا فِيْ قَلْبِهٖ ۙ وَهُوَ اَلَدُّ الْخِصَامِ ﴿٢٠٤﴾

205. Inter la homoj estas iu, kies parolado pri ĉi tiu vivo eble plaĉus al vi kaj li vokas Allahon kiel atestanton pri tio, kio estas en lia koro. Li tamen estas la plej malpacema el la malpacemuloj.

وَاِذَا تَوَلّٰى سَعٰى فِي الْاَرْضِ لِيُفْسِدَ فِيْهَا وَيُهْلِكَ
الْحَرْثَ وَالنَّسْلَ ۭ وَاللّٰهُ لَا يُحِبُّ الْفَسَادَ ﴿٢٠٥﴾

206. Kian. li estas estro, li klopodas estigi malpacon en la lando kaj neniigi la rikolton kaj la idaron; tamen Allah ne amas la malpacon.

وَاِذَا قِيْلَ لَهُ اتَّقِ اللّٰهَ اَخَذَتْهُ الْعِزَّةُ بِالْاِثْمِ فَحَسْبُهٗ
جَهَنَّمُ ۭ وَلَبِئْسَ الْمِهَادُ ﴿٢٠٦﴾

207. Kiam estas dirite al li: "Respektegu Allahon", lia fiereco puŝas lin al plua pekado. Pro tio la Infero estos lia sorto; malbona estas tiu destino!

وَمِنَ النَّاسِ مَنْ يَّشْرِيْ نَفْسَهُ ابْتِغَاۗءَ مَرْضَاتِ اللّٰهِ ۭ
وَاللّٰهُ رَءُوْفٌۢ بِالْعِبَادِ ﴿٢٠٧﴾

208. Inter la homoj estas iuj, kiuj eĉ vendus sin mem pro la dezirego plaĉi al Allah; Allah estas kompatema kontraŭ Siaj servantoj.

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوا ادْخُلُوْا فِي السِّلْمِ كَاۗفَّةً ۠ وَلَا
تَتَّبِعُوْا خُطُوٰتِ الشَّيْطٰنِ ۭ اِنَّهٗ لَكُمْ عَدُوٌّ مُّبِيْنٌ ﴿٢٠٨﴾

209. Ho vi kredantoj, eniru en la submetiĝon tute kaj ne sekvu la piedsignojn de Satano. Vere li estas evidenta malamiko.

فَاِنْ زَلَلْتُمْ مِّنْۢ بَعْدِ مَا جَاۗءَتْكُمُ الْبَيِّنٰتُ فَاعْلَمُوْٓا
اَنَّ اللّٰهَ عَزِيْزٌ حَكِيْمٌ ﴿٢٠٩﴾

210. Se vi tamen poste stumblos, post kiam vi estos ricevintaj la signojn evidentajn, tiam sciu, ke Allah estas ĉiopova, saĝa.

هَلْ يَنْظُرُوْنَ اِلَّآ اَنْ يَّاْتِيَهُمُ اللّٰهُ فِيْ ظُلَلٍ مِّنَ
الْغَمَامِ وَالْمَلٰۗىِٕكَةُ وَقُضِيَ الْاَمْرُ ۭ وَاِلَى اللّٰهِ تُرْجَعُ
الْاُمُوْرُ ﴿٢١٠﴾ ع ٢٥ ٢٤ ٩

211. Ĉu ili atendas ion alian, ol ke Allah venu al ili en la ombro de la nuboj kun la anĝeloj kaj decidu pri la afero? Al Allah revenas ĉio.

سَلْ بَنِيْٓ اِسْرَاۗءِيْلَ كَمْ اٰتَيْنٰهُمْ مِّنْ اٰيَةٍۢ بَيِّنَةٍ ۭ

وَمَنْ يُّبَدِّلْ نِعْمَةَ اللّٰهِ مِنْۢ بَعْدِ مَا جَآءَتْهُ فَاِنَّ
اللّٰهَ شَدِيْدُ الْعِقَابِ ﴿٢١١﴾

212. Demandu la idojn de Izrael, kiom da signoj evidentaj Ni donis al ili. Kontraŭ tiu, kiu ŝanĝas la donacon de Allah, post kiam ĝi venis al li, Allah estos severa je l' puno.

زُيِّنَ لِلَّذِيْنَ كَفَرُوا الْحَيٰوةُ الدُّنْيَا وَيَسْخَرُوْنَ مِنَ
الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَالَّذِيْنَ اتَّقَوْا فَوْقَهُمْ يَوْمَ الْقِيٰمَةِ ؕ
وَاللّٰهُ يَرْزُقُ مَنْ يَّشَآءُ بِغَيْرِ حِسَابٍ ﴿٢١٢﴾

213. Bela fariĝis ĉi tiu vivo por la miskredantoj, kaj ili mokadas la kredantojn, sed la justuloj staros super ili en la tago de la reviviĝo. Allah donas sen limigo al tiuj, kiujn Li elektas.

كَانَ النَّاسُ اُمَّةً وَّاحِدَةً ۟ فَبَعَثَ اللّٰهُ النَّبِيّٖنَ
مُبَشِّرِيْنَ وَمُنْذِرِيْنَ ۪ وَاَنْزَلَ مَعَهُمُ الْكِتٰبَ بِالْحَقِّ
لِيَحْكُمَ بَيْنَ النَّاسِ فِيْمَا اخْتَلَفُوْا فِيْهِ ؕ وَمَا اخْتَلَفَ
فِيْهِ اِلَّا الَّذِيْنَ اُوْتُوْهُ مِنْۢ بَعْدِ مَا جَآءَتْهُمُ الْبَيِّنٰتُ
بَغْيًۢا بَيْنَهُمْ ۚ فَهَدَى اللّٰهُ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا لِمَا اخْتَلَفُوْا
فِيْهِ مِنَ الْحَقِّ بِاِذْنِهٖ ؕ وَاللّٰهُ يَهْدِيْ مَنْ يَّشَآءُ
اِلٰى صِرَاطٍ مُّسْتَقِيْمٍ ﴿٢١٣﴾

214. La homaro estis unu socio; tiam Allah vekis profetojn kiel portantojn de la bona novaĵo kaj admonantojn, kaj Li sendis kun ili la Libron kun la vero por juĝi inter la homoj pri tio, pri kio ili malkonsentis. Kaj jen pri tio – pro reciproka envio – malkonsentis tiuj, kiuj estis ricevintaj ĝin, post kiam ĝi venis al ili. Tiam Allah gvidis per Sia ordono la kredantojn al la vero, por ke ili ne malkonsentu pri ĝi. Allah gvidas, kiun Li volas, sur la rektan vojon.

اَمْ حَسِبْتُمْ اَنْ تَدْخُلُوا الْجَنَّةَ وَلَمَّا يَاْتِكُمْ مَّثَلُ
الَّذِيْنَ خَلَوْا مِنْ قَبْلِكُمْ ؕ مَسَّتْهُمُ الْبَاْسَآءُ وَالضَّرَّآءُ
وَزُلْزِلُوْا حَتّٰى يَقُوْلَ الرَّسُوْلُ وَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا مَعَهٗ
مَتٰى نَصْرُ اللّٰهِ ؕ اَلَآ اِنَّ نَصْرَ اللّٰهِ قَرِيْبٌ ﴿٢١٤﴾

215. Ĉu vi pensas, ke vi eniros la Paradizon ne atinginte la kondiĉon de tiuj, kiuj venis antaŭe? Malriĉo kaj malfeliĉo trafis ilin kaj ili estis skuegataj, ĝis la sendito kaj la kredantoj kriis: "Kiam venos la helpo de Allah? ". Vere la helpo de Allah estas proksima.

يَسْـَٔلُوْنَكَ مَاذَا يُنْفِقُوْنَ ۬ؕ قُلْ مَآ اَنْفَقْتُمْ مِّنْ
خَيْرٍ فَلِلْوَالِدَيْنِ وَالْاَقْرَبِيْنَ وَالْيَتٰمٰى وَالْمَسٰكِيْنِ
وَابْنِ السَّبِيْلِ ؕ وَمَا تَفْعَلُوْا مِنْ خَيْرٍ فَاِنَّ اللّٰهَ بِهٖ
عَلِيْمٌ ﴿٢١٥﴾

216. Ili vin demandas, kion ili donacu. Diru: "Kion ajn bonan vi donacas, estu por la gepatroj kaj por la parencoj kaj por la orfoj kaj por la malriĉuloj kaj por la vojirantoj, kaj, kion ajn bonan vi faras, Allah scias".

كُتِبَ عَلَيْكُمُ الْقِتَالُ وَهُوَ كُرْهٌ لَّكُمْ ۚ وَعَسٰٓى اَنْ
تَكْرَهُوْا شَيْـًٔا وَّهُوَ خَيْرٌ لَّكُمْ ۚ وَعَسٰٓى اَنْ تُحِبُّوْا

217. Estas ordonite al vi batali, eĉ se vi malŝatas tion. Efektive estas eble, ke vi malŝatos ion, kio estas plej bona por vi, kaj ankaŭ, ke al vi plaĉos io, kio estas malbona por vi. Allah scias, sed vi ne scias.

ع ۲۱۶ شَيْئًا وَّهُوَ شَرٌّ لَّكُمْ ۚ وَاللّٰهُ يَعْلَمُ وَاَنْتُمْ لَا تَعْلَمُوْنَ ﴿۲۱۶﴾

يَسْـَٔلُوْنَكَ عَنِ الشَّهْرِ الْحَرَامِ قِتَالٍ فِيْهِ ۭ قُلْ قِتَالٌ
فِيْهِ كَبِيْرٌ ۭ وَصَدٌّ عَنْ سَبِيْلِ اللّٰهِ وَكُفْرٌۢ بِهٖ ۙ وَ
الْمَسْجِدِ الْحَرَامِ ۙ وَاِخْرَاجُ اَهْلِهٖ مِنْهُ اَكْبَرُ عِنْدَ
اللّٰهِ ۚ وَالْفِتْنَةُ اَكْبَرُ مِنَ الْقَتْلِ ۭ وَلَا يَزَالُوْنَ
يُقَاتِلُوْنَكُمْ حَتّٰى يَرُدُّوْكُمْ عَنْ دِيْنِكُمْ اِنِ اسْتَطَاعُوْا ۭ
وَمَنْ يَّرْتَدِدْ مِنْكُمْ عَنْ دِيْنِهٖ فَيَمُتْ وَهُوَ كَافِرٌ
فَاُولٰۗىِٕكَ حَبِطَتْ اَعْمَالُهُمْ فِي الدُّنْيَا وَالْاٰخِرَةِ ۚ وَاُولٰۗىِٕكَ
اَصْحٰبُ النَّارِ ۚ هُمْ فِيْهَا خٰلِدُوْنَ ﴿۲۱۷﴾

اِنَّ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَالَّذِيْنَ هَاجَرُوْا وَجٰهَدُوْا فِيْ
سَبِيْلِ اللّٰهِ ۙ اُولٰۗىِٕكَ يَرْجُوْنَ رَحْمَتَ اللّٰهِ ۭ وَاللّٰهُ
غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ﴿۲۱۸﴾

يَسْـَٔلُوْنَكَ عَنِ الْخَمْرِ وَالْمَيْسِرِ ۭ قُلْ فِيْهِمَآ اِثْمٌ
كَبِيْرٌ وَّمَنَافِعُ لِلنَّاسِ ۡ وَاِثْمُهُمَآ اَكْبَرُ مِنْ نَّفْعِهِمَا ۭ وَ
يَسْـَٔلُوْنَكَ مَاذَا يُنْفِقُوْنَ ۬ قُلِ الْعَفْوَ ۭ كَذٰلِكَ يُبَيِّنُ اللّٰهُ
لَكُمُ الْاٰيٰتِ لَعَلَّكُمْ تَتَفَكَّرُوْنَ ﴿۲۱۹﴾

فِي الدُّنْيَا وَالْاٰخِرَةِ ۭ وَيَسْـَٔلُوْنَكَ عَنِ الْيَتٰمٰى ۭ قُلْ اِصْلَاحٌ
لَّهُمْ خَيْرٌ ۭ وَاِنْ تُخَالِطُوْهُمْ فَاِخْوَانُكُمْ ۭ وَاللّٰهُ يَعْلَمُ
الْمُفْسِدَ مِنَ الْمُصْلِحِ ۭ وَلَوْ شَاۗءَ اللّٰهُ لَاَعْنَتَكُمْ ۭ اِنَّ اللّٰهَ
عَزِيْزٌ حَكِيْمٌ ﴿۲۲۰﴾

وَلَا تَنْكِحُوا الْمُشْرِكٰتِ حَتّٰى يُؤْمِنَّ ۭ وَلَاَمَةٌ مُّؤْمِنَةٌ
خَيْرٌ مِّنْ مُّشْرِكَةٍ وَّلَوْ اَعْجَبَتْكُمْ ۚ وَلَا تُنْكِحُوا الْمُشْرِكِيْنَ

218. Ili demandas vin pri la batalo en la sankta monato. Diru: "Tiu batalo estas malbona, sed deflankigi de la afero de Allah kaj miskredi je Li kaj je la Sankta Moskeo kaj forpeli la gentojn for de ĝi, estas pli malbone antaŭ Allah kaj la persekuto estas pli malbona ol la mortigo. Ili ne ĉesos batali kontraŭ vi, antaŭ ol ili estos delogintaj vin for de via kredo, supoze ke ili sukcesos. Kiuj el vi estos delogitaj for de sia kredo kaj mortos kiel miskredantoj, ties agoj estos vanaj en ĉi tiu kaj en la venonta vivo, ili estos loĝantoj de l' fajro kaj tie ili restos ĉiam.

219. Vere tiuj, kiuj kredas kaj faris la Elmigron kaj batalas por la afero de Allah, esperas je la graco de Allah. Allah estas senkulpigema, pardonema.

220. Ili demandas vin pri la vino kaj pri la hazardludado. Diru: "En ambaŭ estas grava peko kaj ankaŭ ia utilo por la homoj, sed la peko estas pli grava ol la utilo". Kaj ili demandas vin, kiom ili elspezu (kiel almozon). Diru: "Tion, je kio vi povas seniĝi". Tiel Allah evidentigas por vi la signojn, por ke vi pripensu,

221. en la vivo ĉi tiea kaj en la venonta. Kaj ili demandas vin pri la orfoj. Diru: "Bonfari al ili estas plej bone. Kaj se vi havas rilatojn kun ili, tiam ili estu viaj fratoj. Allah distingas la malpacemulon disde la pacemulo. Se Allah ne volus, vi ne estus sukcesintaj. Vere Allah estas ĉiopova, saĝa.

222. Ne edziĝu al idolaninoj, antaŭ ol ili fariĝos kredantinoj. Eĉ kredanta sklavino estas pli bona ol idolanino, eĉ se tiu tre plaĉas al vi. Kaj ne edzinigu kredantinojn al idolanoj, antaŭ ol ili fariĝos kredantoj. Vere eĉ kredanta sklavo estas pli bona ol idolano, eĉ se tiu tre plaĉas al vi. Ili vokas al la fajro kaj male Allah vokas al la Paradizo kaj al la pardono laŭ Sia ordono, kaj Li evidentigas Siajn signojn por la homoj, por ke ili memoru.

حَتّٰى يُؤْمِنُوْا ۭ وَلَعَبْدٌ مُّؤْمِنٌ خَيْرٌ مِّنْ مُّشْرِكٍ وَّ لَوْ
اَعْجَبَكُمْ ۭ اُولٰۗىِٕكَ يَدْعُوْنَ اِلَى النَّارِ ۚ وَاللّٰهُ يَدْعُوْٓا
اِلَى الْجَنَّةِ وَالْمَغْفِرَةِ بِاِذْنِهٖ ۚ وَيُبَيِّنُ اٰيٰتِهٖ لِلنَّاسِ
لَعَلَّهُمْ يَتَذَكَّرُوْنَ ﴿٢٢١﴾

223. Ili demandas vin pri la menstruoj. Diru: "Tio estas domaĝa, do ne alproksimiĝu al la edzinoj dum la menstruo kaj ne unuiĝu kun ili, antaŭ ol ili estos puriĝintaj. Kiam ili estos puriĝintaj, tiam unuiĝu kun ili, per kie Allah ordonis al vi. Vere Allah amas tiujn, kiuj turnas sin al Li, kaj la purulojn.

وَيَسْـَٔلُوْنَكَ عَنِ الْمَحِيْضِ ۭ قُلْ هُوَ اَذًى ۙ فَاعْتَزِلُوا
النِّسَاۗءَ فِي الْمَحِيْضِ ۙ وَلَا تَقْرَبُوْهُنَّ حَتّٰى يَطْهُرْنَ ۚ
فَاِذَا تَطَهَّرْنَ فَاْتُوْهُنَّ مِنْ حَيْثُ اَمَرَكُمُ اللّٰهُ ۭ اِنَّ
اللّٰهَ يُحِبُّ التَّوَّابِيْنَ وَيُحِبُّ الْمُتَطَهِّرِيْنَ ﴿٢٢٢﴾

224. Viaj edzinoj estas por vi kampo, do alproksimiĝu al via kampo, kiam vi deziras, sed antaŭe bonfaru por la utilo de viaj animoj kaj respektegu Allahon kaj sciu, ke vi renkontos Lin". Vi donu al la kredantoj la bonan novaĵon.

نِسَاۗؤُكُمْ حَرْثٌ لَّكُمْ ۠ فَاْتُوْا حَرْثَكُمْ اَنّٰى شِئْتُمْ ۡ وَ
قَدِّمُوْا لِاَنْفُسِكُمْ ۭ وَاتَّقُوا اللّٰهَ وَاعْلَمُوْٓا اَنَّكُمْ مُّلٰقُوْهُ ۭ
وَبَشِّرِ الْمُؤْمِنِيْنَ ﴿٢٢٣﴾

225. Ne faru Allahon objekto de viaj ĵuroj, ke vi estos virtaj kaj justaj kaj pacemaj ĉe la gentoj. Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

وَلَا تَجْعَلُوا اللّٰهَ عُرْضَةً لِّاَيْمَانِكُمْ اَنْ تَبَرُّوْا وَتَتَّقُوْا
وَتُصْلِحُوْا بَيْنَ النَّاسِ ۭ وَاللّٰهُ سَمِيْعٌ عَلِيْمٌ ﴿٢٢٤﴾

226. Allah ne postulos pravigon de vi pro malatenteco je viaj ĵuroj, sed Li postulos pravigon pro tio, kion estos meritintaj viaj koroj. Allah estas senkulpigema, indulgema.

لَا يُؤَاخِذُكُمُ اللّٰهُ بِاللَّغْوِ فِيْٓ اَيْمَانِكُمْ وَلٰكِنْ يُّؤَاخِذُكُمْ
بِمَا كَسَبَتْ قُلُوْبُكُمْ ۭ وَاللّٰهُ غَفُوْرٌ حَلِيْمٌ ﴿٢٢٥﴾

227. Por tiuj, kiuj ĵuras, ke ili eksedziĝos de siaj edzinoj, estu atendo maksimuma de kvar monatoj, kaj, se poste ili revenos, ili sciu, ke Allah estas senkulpigema, pardonema.

لِلَّذِيْنَ يُؤْلُوْنَ مِنْ نِّسَاۗىِٕهِمْ تَرَبُّصُ اَرْبَعَةِ اَشْهُرٍ ۚ
فَاِنْ فَاۗءُوْ فَاِنَّ اللّٰهَ غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ﴿٢٢٦﴾

228. Se ili male firme decidis eksedziĝi, ili sciu, ke Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

وَاِنْ عَزَمُوا الطَّلَاقَ فَاِنَّ اللّٰهَ سَمِيْعٌ عَلِيْمٌ ﴿٢٢٧﴾

229. La edzinoj en tiu kondiĉo devos atendi por si mem tri menstruojn, kaj ne estos permesite al ili kaŝi tion, kion Allah kreis en ilia utero, se ili kredas je Allah kaj al la vivo venonta. Kaj iliaj edzoj havas pli grandan rajton repreni ilin, kiam ili estas gravedaj, se ili deziras repaciĝon. Rajtoj estas reciprokaj kaj similaj laŭ justeco, tamen la viroj havas ian privilegion. Allah estas ĉiopova, saĝa.

وَالْمُطَلَّقٰتُ يَتَرَبَّصْنَ بِاَنْفُسِهِنَّ ثَلٰثَةَ قُرُوْۗءٍ ۭ وَ
لَا يَحِلُّ لَهُنَّ اَنْ يَّكْتُمْنَ مَا خَلَقَ اللّٰهُ فِيْٓ اَرْحَامِهِنَّ
اِنْ كُنَّ يُؤْمِنَّ بِاللّٰهِ وَالْيَوْمِ الْاٰخِرِ ۭ وَبُعُوْلَتُهُنَّ اَحَقُّ
بِرَدِّهِنَّ فِيْ ذٰلِكَ اِنْ اَرَادُوْٓا اِصْلَاحًا ۭ وَلَهُنَّ مِثْلُ

الَّذِىْ عَلَيْهِنَّ بِالْمَعْرُوْفِ ۪ وَ لِلرِّجَالِ عَلَيْهِنَّ دَرَجَةٌ ؕ
وَ اللّٰهُ عَزِيْزٌ حَكِيْمٌ ﴿٢٢٨﴾ ع ١٢

230. Eksedziĝo povas esti deklarita dufoje; poste tamen, aŭ reprenu ilin konvene aŭ forsendu ilin konvene. Ne estas permesite al vi repreni ion el tio, kion vi donis al ili, krom se vi ambaŭ timas, ke vi ne kapablos respekti la barojn de Allah. Se vi tamen timas, ke ili ne kapablos respekti la barojn de Allah, tiam ne estos peko por ambaŭ, se ŝi donos ion kiel elpagon. Tiuj estas la baroj de Allah, do ne transpaŝu ilin. Tiuj, kiuj transpaŝas la barojn de Allah, estas malbonfarantoj.

اَلطَّلَاقُ مَرَّتٰنِ ۪ فَاِمْسَاكٌۢ بِمَعْرُوْفٍ اَوْ تَسْرِيْحٌۢ بِاِحْسَانٍ ؕ
وَ لَا يَحِلُّ لَكُمْ اَنْ تَاْخُذُوْا مِمَّاۤ اٰتَيْتُمُوْهُنَّ شَيْـًٔا اِلَّاۤ
اَنْ يَّخَافَاۤ اَلَّا يُقِيْمَا حُدُوْدَ اللّٰهِ ؕ فَاِنْ خِفْتُمْ اَلَّا يُقِيْمَا
حُدُوْدَ اللّٰهِ ۙ فَلَا جُنَاحَ عَلَيْهِمَا فِيْمَا افْتَدَتْ بِهٖ ؕ تِلْكَ
حُدُوْدُ اللّٰهِ فَلَا تَعْتَدُوْهَا ۚ وَ مَنْ يَّتَعَدَّ حُدُوْدَ اللّٰهِ
فَاُولٰٓئِكَ هُمُ الظّٰلِمُوْنَ ﴿٢٢٩﴾

231. Kiam li poste estos eksedziĝinta la trian fojon, ŝi ne estos permesita al li, antaŭ ol ŝi estos edziniĝinta al alia viro. Se ĉi tiu tamen denove estos eksedziniginta ŝin, tiam ne estos peko, se ili ambaŭ revenos unu al la alia, se ili estos certaj, ke ili kapablos respekti la barojn de Allah. Tiuj estas la baroj de Allah, kiujn Li klarigas al la sciantoj.

فَاِنْ طَلَّقَهَا فَلَا تَحِلُّ لَهٗ مِنْۢ بَعْدُ حَتّٰى تَنْكِحَ زَوْجًا
غَيْرَهٗ ؕ فَاِنْ طَلَّقَهَا فَلَا جُنَاحَ عَلَيْهِمَاۤ اَنْ يَّتَرَاجَعَاۤ
اِنْ ظَنَّاۤ اَنْ يُّقِيْمَا حُدُوْدَ اللّٰهِ ؕ وَ تِلْكَ حُدُوْدُ اللّٰهِ
يُبَيِّنُهَا لِقَوْمٍ يَّعْلَمُوْنَ ﴿٢٣٠﴾

232. Kiam vi eksedziĝis kaj la virinoj alproksimiĝas al la fino de la tempo konsentita, aŭ reprenu ilin konvene aŭ forsendu ilin konvene, kaj ne reprenu ilin pekeme por ilia malutilo. Kiu tion faras, tiu pekos kontraŭ si mem. Kaj ne moku pri la dekretoj de Allah, kaj memoru la favorojn, kiujn Allah donis al vi, kaj kion Li sendis al vi el la Libro, kaj la saĝon, per kiu Li admonis vin, kaj respektegu Allahon kaj sciu, ke Allah scias ĉion.

وَ اِذَا طَلَّقْتُمُ النِّسَآءَ فَبَلَغْنَ اَجَلَهُنَّ فَاَمْسِكُوْهُنَّ
بِمَعْرُوْفٍ اَوْ سَرِّحُوْهُنَّ بِمَعْرُوْفٍ ۪ وَّ لَا تُمْسِكُوْهُنَّ
ضِرَارًا لِّتَعْتَدُوْا ۚ وَ مَنْ يَّفْعَلْ ذٰلِكَ فَقَدْ ظَلَمَ نَفْسَهٗ ؕ
وَ لَا تَتَّخِذُوْۤا اٰيٰتِ اللّٰهِ هُزُوًا ۟ وَّ اذْكُرُوْا نِعْمَتَ اللّٰهِ عَلَيْكُمْ
وَ مَاۤ اَنْزَلَ عَلَيْكُمْ مِّنَ الْكِتٰبِ وَ الْحِكْمَةِ يَعِظُكُمْ
بِهٖ ۚ وَ اتَّقُوا اللّٰهَ وَ اعْلَمُوْۤا اَنَّ اللّٰهَ بِكُلِّ شَىْءٍ عَلِيْمٌ ﴿٢٣١﴾ ع ١٣

233. Kiam vi eksedziĝis kaj la virinoj atingis la finon de la tempo konsentita, ne malhelpu ilin edziniĝi al alia viro, se ili ambaŭ konsentis pri tio konvene. Tiu estas admono por tiu el vi, kiu kredas je Allah kaj al la vivo venonta. Tio estas pli bona kaj konvena por vi. Allah scias, sed vi ne scias.

وَ اِذَا طَلَّقْتُمُ النِّسَآءَ فَبَلَغْنَ اَجَلَهُنَّ فَلَا تَعْضُلُوْهُنَّ
اَنْ يَّنْكِحْنَ اَزْوَاجَهُنَّ اِذَا تَرَاضَوْا بَيْنَهُمْ بِالْمَعْرُوْفِ ؕ
ذٰلِكَ يُوْعَظُ بِهٖ مَنْ كَانَ مِنْكُمْ يُؤْمِنُ بِاللّٰهِ وَ الْيَوْمِ
الْاٰخِرِ ؕ ذٰلِكُمْ اَزْكٰى لَكُمْ وَ اَطْهَرُ ؕ وَ اللّٰهُ يَعْلَمُ وَ اَنْتُمْ

لَا تَعْلَمُوْنَ ﴿٢٣٢﴾

وَالْوَالِدٰتُ يُرْضِعْنَ اَوْلَادَهُنَّ حَوْلَيْنِ كَامِلَيْنِ
لِمَنْ اَرَادَ اَنْ يُّتِمَّ الرَّضَاعَةَ ؕ وَعَلَى الْمَوْلُوْدِ لَهٗ
رِزْقُهُنَّ وَكِسْوَتُهُنَّ بِالْمَعْرُوْفِ ؕ لَا تُكَلَّفُ نَفْسٌ
اِلَّا وُسْعَهَا ۚ لَا تُضَآرَّ وَالِدَةٌ ۢ بِوَلَدِهَا وَلَا مَوْلُوْدٌ
لَّهٗ بِوَلَدِهٖ ۚ وَعَلَى الْوَارِثِ مِثْلُ ذٰلِكَ ۚ فَاِنْ اَرَادَا
فِصَالًا عَنْ تَرَاضٍ مِّنْهُمَا وَتَشَاوُرٍ فَلَا جُنَاحَ عَلَيْهِمَا ؕ
وَاِنْ اَرَدْتُّمْ اَنْ تَسْتَرْضِعُوْٓا اَوْلَادَكُمْ فَلَا جُنَاحَ
عَلَيْكُمْ اِذَا سَلَّمْتُمْ مَّآ اٰتَيْتُمْ بِالْمَعْرُوْفِ ؕ وَاتَّقُوا
اللّٰهَ وَاعْلَمُوْٓا اَنَّ اللّٰهَ بِمَا تَعْمَلُوْنَ بَصِيْرٌ ﴿٢٣٣﴾

وَالَّذِيْنَ يُتَوَفَّوْنَ مِنْكُمْ وَيَذَرُوْنَ اَزْوَاجًا يَّتَرَبَّصْنَ
بِاَنْفُسِهِنَّ اَرْبَعَةَ اَشْهُرٍ وَّعَشْرًا ۚ فَاِذَا بَلَغْنَ اَجَلَهُنَّ
فَلَا جُنَاحَ عَلَيْكُمْ فِيْمَا فَعَلْنَ فِيْٓ اَنْفُسِهِنَّ بِالْمَعْرُوْفِ ؕ
وَاللّٰهُ بِمَا تَعْمَلُوْنَ خَبِيْرٌ ﴿٢٣٤﴾

وَلَا جُنَاحَ عَلَيْكُمْ فِيْمَا عَرَّضْتُمْ بِهٖ مِنْ خِطْبَةِ النِّسَآءِ
اَوْ اَكْنَنْتُمْ فِيْٓ اَنْفُسِكُمْ ؕ عَلِمَ اللّٰهُ اَنَّكُمْ سَتَذْكُرُوْنَهُنَّ
وَلٰكِنْ لَّا تُوَاعِدُوْهُنَّ سِرًّا اِلَّآ اَنْ تَقُوْلُوْا قَوْلًا
مَّعْرُوْفًا ۬ ؕ وَلَا تَعْزِمُوْا عُقْدَةَ النِّكَاحِ حَتّٰى يَبْلُغَ
الْكِتٰبُ اَجَلَهٗ ؕ وَاعْلَمُوْٓا اَنَّ اللّٰهَ يَعْلَمُ مَا فِيْٓ اَنْفُسِكُمْ
فَاحْذَرُوْهُ ۚ وَاعْلَمُوْٓا اَنَّ اللّٰهَ غَفُوْرٌ حَلِيْمٌ ﴿٢٣٥﴾ ع ٣٤

لَا جُنَاحَ عَلَيْكُمْ اِنْ طَلَّقْتُمُ النِّسَآءَ مَا لَمْ تَمَسُّوْهُنَّ
اَوْ تَفْرِضُوْا لَهُنَّ فَرِيْضَةً ۖ ۚ وَّمَتِّعُوْهُنَّ عَلَى الْمُوْسِعِ

234. La patrinoj mamnutru siajn infanojn du jarojn – tio estas por tiu, kiu volas kompletigi la mamnutradon – kaj tiu, kies devo estas provizi, provizu manĝaĵojn kaj vestaĵojn laŭrajte. Neniu estu ŝarĝata super sia kapablo. Nek la patrino nek la patro estu devigataj suferi pro la infano kaj la samo validas por iliaj heredantoj. Se ili tamen decidos kune post konsilo kaj konsento ĉesigi la mamnutradon, tio ne estos peko por ambaŭ. Se vi tamen volas, ke sućigistino mamnutru viajn infanojn, tio ne estos peko por vi, kondiĉe ke vi pagu tion, pri kio estis konsentite laŭrajte. Respektegu Allahon kaj sciu, ke Allah vidas, kion vi faras.

235. Por tiuj el vi, kiuj mortos postlasante edzinojn: la edzinoj atendu por si mem kvar monatojn kaj dek tagojn. Kiam ili estos atingintaj la finon de la atendo, tiam ne estos peko por ili io ajn, kion ili faros por si mem laŭrajte. Allah atente observas, kion vi faras.

236. Ne estos peko por vi proponeti pri geedziĝo al tiaj virinoj aŭ gardi tian intencon – Allah scias, ke vi pensas pri ili – sed ne konkludu sekrete kontrakton kun ili, krom se vi diros justan vorton. Kaj ne decidu pri geedziĝo, antaŭ ol la tempo priskribita estos pasinta. Sciu, ke Allah scias ĉion, kio estas en viaj koroj, do evitu tion kaj sciu, ke Allah estas senkulpigema, pacienca.

237. Ne estos peko por vi eksedziĝi de virinoj, kiujn vi ne estos tuŝintaj kaj al kiuj vi ne estos promesintaj doton. Tamen provizu ilin: la riĉuloj laŭ siaj havaĵoj kaj la malriĉuloj laŭ siaj havaĵoj, donu konvenan provizaĵon. Tio estas devo por la justuloj.

قَدَرُهٗ وَعَلَى الْمُقْتِرِ قَدَرُهٗ ۚ مَتَاعًا بِالْمَعْرُوْفِ ۚ حَقًّا
عَلَى الْمُحْسِنِيْنَ ﴿٢٣٦﴾

238. Se vi eksedziĝos de virinoj, kiujn vi ne estas tuŝintaj sed al kiuj vi jam estas promesintaj doton, tiam vi donu la duonon de tio, kion vi estas promesintaj, krom se ŝi – aŭ tiu, en kies povo estas la kontrakto de geedziĝo – rezignos. Kaj via rezigno estos simila al pieco. Ne forgesu bonfari reciproke. Vere Allah vidas, kion vi faras.

وَاِنْ طَلَّقْتُمُوْهُنَّ مِنْ قَبْلِ اَنْ تَمَسُّوْهُنَّ وَقَدْ
فَرَضْتُمْ لَهُنَّ فَرِيْضَةً فَنِصْفُ مَا فَرَضْتُمْ اِلَّآ اَنْ
يَّعْفُوْنَ اَوْ يَعْفُوَا الَّذِىْ بِيَدِهٖ عُقْدَةُ النِّكَاحِ ۭ وَ
اَنْ تَعْفُوْٓا اَقْرَبُ لِلتَّقْوٰى ۭ وَلَا تَنْسَوُا الْفَضْلَ بَيْنَكُمْ ۭ
اِنَّ اللّٰهَ بِمَا تَعْمَلُوْنَ بَصِيْرٌ ﴿٢٣٧﴾

239. Observu la preĝojn kaj la preĝon mezan kaj staru humile antaŭ Allah.

حٰفِظُوْا عَلَى الصَّلَوٰتِ وَالصَّلٰوةِ الْوُسْطٰى ۤ وَقُوْمُوْا
لِلّٰهِ قٰنِتِيْنَ ﴿٢٣٨﴾

240. Kiam vi timos danĝeron, vi preĝu starante aŭ rajdante, sed, kiam vi estos sekuraj, tiam memoru Allahon, kiel Li instruis al vi, kion vi ne sciis.

فَاِنْ خِفْتُمْ فَرِجَالًا اَوْ رُكْبَانًا ۚ فَاِذَآ اَمِنْتُمْ فَاذْكُرُوا
اللّٰهَ كَمَا عَلَّمَكُمْ مَّا لَمْ تَكُوْنُوْا تَعْلَمُوْنَ ﴿٢٣٩﴾

241. Tiuj el vi, kiuj mortos postlasante edzinojn, provizu ilin por unu jaro, tiel ke ili ne devu eliri el la domo. Se ili tamen eliros propramove, tiam ne estos peko por vi io ajn, kion ili faros por si mem laŭrajte. Allah estas ĉiopova, saĝa.

وَالَّذِيْنَ يُتَوَفَّوْنَ مِنْكُمْ وَيَذَرُوْنَ اَزْوَاجًا ۙ وَّصِيَّةً
لِّاَزْوَاجِهِمْ مَّتَاعًا اِلَى الْحَوْلِ غَيْرَ اِخْرَاجٍ ۚ فَاِنْ
خَرَجْنَ فَلَا جُنَاحَ عَلَيْكُمْ فِىْ مَا فَعَلْنَ فِىْٓ اَنْفُسِهِنَّ
مِنْ مَّعْرُوْفٍ ۭ وَاللّٰهُ عَزِيْزٌ حَكِيْمٌ ﴿٢٤٠﴾

242. Por la eksedzinigitaj virinoj estu provizite konvene. Tio estas devo por la justuloj.

وَلِلْمُطَلَّقٰتِ مَتَاعٌۢ بِالْمَعْرُوْفِ ۭ حَقًّا عَلَى الْمُتَّقِيْنَ ﴿٢٤١﴾

243. Tiel Allah klarigas al vi Siajn dekretojn, por ke vi komprenu.

كَذٰلِكَ يُبَيِّنُ اللّٰهُ لَكُمْ اٰيٰتِهٖ لَعَلَّكُمْ تَعْقِلُوْنَ ﴿٢٤٢﴾ ع ١٥

244. Ĉu vi ne vidis tiujn, kiuj fuĝis for de siaj domoj, milope, timante la morton? Al ili diris Allah: "Mortu! ", poste Li revivigis ilin. Vere Allah estas indulgema je Sia graco kontraŭ la homoj, sed la plej multaj el ili ne dankas.

اَلَمْ تَرَ اِلَى الَّذِيْنَ خَرَجُوْا مِنْ دِيَارِهِمْ وَهُمْ اُلُوْفٌ
حَذَرَ الْمَوْتِ فَقَالَ لَهُمُ اللّٰهُ مُوْتُوْا ثُمَّ اَحْيَاهُمْ ۭ
اِنَّ اللّٰهَ لَذُوْ فَضْلٍ عَلَى النَّاسِ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَ
النَّاسِ لَا يَشْكُرُوْنَ ﴿٢٤٣﴾

245. Batalu por la afero de Allah kaj sciu, ke Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

وَقَاتِلُوْا فِىْ سَبِيْلِ اللّٰهِ وَاعْلَمُوْٓا اَنَّ اللّٰهَ سَمِيْعٌ
عَلِيْمٌ ﴿٢٤٤﴾

مَنْ ذَا الَّذِىْ يُقْرِضُ اللّٰهَ قَرْضًا حَسَنًا فَيُضٰعِفَهٗ
لَهٗٓ اَضْعَافًا كَثِيْرَةً ۭ وَاللّٰهُ يَقْبِضُ وَيَبْصُۜطُ ۠ وَ
اِلَيْهِ تُرْجَعُوْنَ ﴿٢٤٥﴾

246. Kiu volas pruntedoni al Allah profite, por ke Li redonu multoblon? Allah malpliigas kaj pliigas kaj al Li vi revenos.

اَلَمْ تَرَ اِلَى الْمَلَاِ مِنْۢ بَنِىْٓ اِسْرَاۗءِيْلَ مِنْۢ بَعْدِ
مُوْسٰى ۘ اِذْ قَالُوْا لِنَبِىٍّ لَّهُمُ ابْعَثْ لَنَا مَلِكًا نُّقَاتِلْ
فِىْ سَبِيْلِ اللّٰهِ ۭ قَالَ هَلْ عَسَيْتُمْ اِنْ كُتِبَ عَلَيْكُمُ
الْقِتَالُ اَلَّا تُقَاتِلُوْا ۭ قَالُوْا وَمَا لَنَآ اَلَّا نُقَاتِلَ فِىْ
سَبِيْلِ اللّٰهِ وَقَدْ اُخْرِجْنَا مِنْ دِيَارِنَا وَاَبْنَاۗىِٕنَا ۭ
فَلَمَّا كُتِبَ عَلَيْهِمُ الْقِتَالُ تَوَلَّوْا اِلَّا قَلِيْلًا مِّنْهُمْ ۭ
وَاللّٰهُ عَلِيْمٌۢ بِالظّٰلِمِيْنَ ﴿٢٤٦﴾

247. Ĉu vi ne vidis la estrojn de la idaro de Izrael post Moseo, kiam ili diris al unu el siaj profetoj: "Metu super ni reĝon por ke ni batalu por la afero de Allah" kaj li diris: "Ĉu ne estas kredeble, ke vi ne batalos, se al vi estas ordonite batali? ". Ili diris: "Kial ni ne batalus por la afero de Allah, se ni estas forpelitaj el niaj domoj kaj for de niaj infanoj? ". Tamen, kiam estis ordonite al ili batali, ili turnis sin for, krom malmultaj el ili. Allah konas la malbonfarantojn.

وَقَالَ لَهُمْ نَبِيُّهُمْ اِنَّ اللّٰهَ قَدْ بَعَثَ لَكُمْ طَالُوْتَ
مَلِكًا ۭ قَالُوْٓا اَنّٰى يَكُوْنُ لَهُ الْمُلْكُ عَلَيْنَا وَنَحْنُ
اَحَقُّ بِالْمُلْكِ مِنْهُ وَلَمْ يُؤْتَ سَعَةً مِّنَ الْمَالِ ۭ
قَالَ اِنَّ اللّٰهَ اصْطَفٰىهُ عَلَيْكُمْ وَزَادَهٗ بَسْطَةً فِي
الْعِلْمِ وَالْجِسْمِ ۭ وَاللّٰهُ يُؤْتِيْ مُلْكَهٗ مَنْ يَّشَاۗءُ ۭ
وَاللّٰهُ وَاسِعٌ عَلِيْمٌ ﴿٢٤٧﴾

248. Ilia profeto diris al ili: "Vere Allah metis super vi Tâlûton* kiel reĝon" kaj ili respondis: "Kiel li povas havi suverenecon super ni? Ni estas pli indaj reĝi, ol li estas, kaj li ne posedas abundajn proprajojn! ". Li diris: "Vere Allah lin elektis super vi kaj pliigis lian scion kaj lian staturon". Allah donas Sian povon al tiu, al kiu Li volas. Allah estas indulgema, ĉioscia.

وَقَالَ لَهُمْ نَبِيُّهُمْ اِنَّ اٰيَةَ مُلْكِهٖٓ اَنْ يَّاْتِيَكُمُ
التَّابُوْتُ فِيْهِ سَكِيْنَةٌ مِّنْ رَّبِّكُمْ وَبَقِيَّةٌ مِّمَّا
تَرَكَ اٰلُ مُوْسٰى وَاٰلُ هٰرُوْنَ تَحْمِلُهُ الْمَلٰۗىِٕكَةُ ۭ اِنَّ
فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيَةً لَّكُمْ اِنْ كُنْتُمْ مُّؤْمِنِيْنَ ﴿٢٤٨﴾ ع

249. Ilia profeto diris al ili: "Vere la signo de lia suvereneco estas,ke al vi estos donita kesto, en kiu estas la paco por vi kaj heredaĵo de la idaro de Moseo kaj de Aaron. La anĝeloj portos ĝin. Vere en ĝi estas signo por vi, se vi estas kredantoj".

فَلَمَّا فَصَلَ طَالُوْتُ بِالْجُنُوْدِ ۙ قَالَ اِنَّ اللّٰهَ مُبْتَلِيْكُمْ

* Gideon

بِنَهَرٍ فَمَنْ شَرِبَ مِنْهُ فَلَيْسَ مِنِّي وَمَنْ لَّمْ
يَطْعَمْهُ فَإِنَّهُ مِنِّي إِلَّا مَنِ اغْتَرَفَ غُرْفَةً بِيَدِهِ
فَشَرِبُوا مِنْهُ إِلَّا قَلِيلًا مِّنْهُمْ فَلَمَّا جَاوَزَهُ هُوَ
وَالَّذِينَ آمَنُوا مَعَهُ قَالُوا لَا طَاقَةَ لَنَا الْيَوْمَ
بِجَالُوتَ وَجُنُودِهِ قَالَ الَّذِينَ يَظُنُّونَ أَنَّهُم مُّلَاقُو
اللَّهِ كَم مِّن فِئَةٍ قَلِيلَةٍ غَلَبَتْ فِئَةً كَثِيرَةً بِإِذْنِ
اللَّهِ وَاللَّهُ مَعَ الصَّابِرِينَ ﴿٢٤٩﴾

250. Kaj kiam Tālūt eliris kun la trupoj, li diris: "Vere Allah vin elprovos ĉe rivero; kiu trinkos el ĝi ne estos inda je mi, kaj kiu ne gustumos el ĝi, estos inda je mi krom tiu, kiu prenos manplenon da ĝi". Ili tamen ĉiuj trinkis el ĝi, krom malmultaj el ili, kaj, kiam ili transiris ĝin, – li kune kun la kredantoj – ili diris: "Hodiaŭ ni ne havas forton kontraŭ Gālūt* kaj liaj trupoj". Tiuj tamen, kiuj certe sciis, ke ili iam renkontos Allahon, diris: "Ofte venkis malgranda grupo kontraŭ granda grupo laŭ la dekretoj de Allah". Allah estas kun la persistemuloj.

وَلَمَّا بَرَزُوا لِجَالُوتَ وَجُنُودِهِ قَالُوا رَبَّنَا أَفْرِغْ
عَلَيْنَا صَبْرًا وَثَبِّتْ أَقْدَامَنَا وَانصُرْنَا عَلَى الْقَوْمِ
الْكَافِرِينَ ﴿٢٥٠﴾

251. Kiam ili antaŭeniris kontraŭ Ĝālūton kaj liajn trupojn ili diris: "Ho nia Sinjoro, versu persistemon sur nin kaj firmigu niajn paŝojn kaj helpu nin kontraŭ la popolo miskredanta".

فَهَزَمُوهُم بِإِذْنِ اللَّهِ وَقَتَلَ دَاوُودُ جَالُوتَ وَ
آتَاهُ اللَّهُ الْمُلْكَ وَالْحِكْمَةَ وَعَلَّمَهُ مِمَّا يَشَاءُ وَ
لَوْلَا دَفْعُ اللَّهِ النَّاسَ بَعْضَهُم بِبَعْضٍ لَّفَسَدَتِ
الْأَرْضُ وَلَٰكِنَّ اللَّهَ ذُو فَضْلٍ عَلَى الْعَالَمِينَ ﴿٢٥١﴾

252. Ili venkis laŭ la permeso de Allah kaj David mortigis Ĝālūton kaj Allah donis al li la suverenecon kaj la saĝon kaj instruis al li, kion Li volis, kaj, se Allah ne estus moderiginta la homojn, iujn kontraŭ la aliaj, la tero estus pleniĝinta je malpaco. Allah tamen estas indulgema kontraŭ la homoj.

تِلْكَ آيَاتُ اللَّهِ نَتْلُوهَا عَلَيْكَ بِالْحَقِّ وَإِنَّكَ لَمِنَ
الْمُرْسَلِينَ ﴿٢٥٢﴾

253. Tiuj estas la signoj de Allah. Ni proklamos ilin al vi laŭvere, kaj vi vere estas unu el la senditoj.

* Fino de la 2-a parto

* Goljat

تِلْكَ الرُّسُلُ فَضَّلْنَا بَعْضَهُمْ عَلٰى بَعْضٍ ۘ مِنْهُمْ
مَّنْ كَلَّمَ اللّٰهُ وَرَفَعَ بَعْضَهُمْ دَرَجٰتٍ ۭ وَاٰتَيْنَا
عِيْسَى ابْنَ مَرْيَمَ الْبَيِّنٰتِ وَاَيَّدْنٰهُ بِرُوْحِ الْقُدُسِ ۭ
وَلَوْ شَاۗءَ اللّٰهُ مَا اقْتَتَلَ الَّذِيْنَ مِنْۢ بَعْدِهِمْ مِّنْۢ
بَعْدِ مَا جَاۗءَتْهُمُ الْبَيِّنٰتُ وَلٰكِنِ اخْتَلَفُوْا فَمِنْهُمْ مَّنْ
اٰمَنَ وَمِنْهُمْ مَّنْ كَفَرَ ۭ وَلَوْ شَاۗءَ اللّٰهُ مَا اقْتَتَلُوْا ۠
وَلٰكِنَّ اللّٰهَ يَفْعَلُ مَا يُرِيْدُ ۝

254. Tiujn senditojn Ni plialtigis, kelkajn el ili super aliaj, al iuj el ili Allah parolis kaj iujn Li plialtigis je l' rango. Kaj Ni donis al Jesuo, filo de Maria, signojn evidentajn kaj plifortigis lin per la spirito de sankteco. Kaj se Allah volus, tiuj, kiuj venis poste, ne estus disputintaj, post kiam al ili venis la pruvoj evidentaj. Ili tamen malkonsentis: inter ili estis iuj, kiuj kredis, kaj aliaj, kiuj rifuzis kredi. Kaj se Allah volus, ili ne estus disputintaj. Allah tamen faras tion, kion Li projektis.

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اَنْفِقُوْا مِمَّا رَزَقْنٰكُمْ مِّنْ قَبْلِ
اَنْ يَّاْتِيَ يَوْمٌ لَّا بَيْعٌ فِيْهِ وَلَا خُلَّةٌ وَّلَا شَفَاعَةٌ ۭ
وَالْكٰفِرُوْنَ هُمُ الظّٰلِمُوْنَ ۝
اَللّٰهُ لَآ اِلٰهَ اِلَّا هُوَ ۚ اَلْحَيُّ الْقَيُّوْمُ ۚ لَا تَاْخُذُهٗ سِنَةٌ
وَّلَا نَوْمٌ ۭ لَهٗ مَا فِي السَّمٰوٰتِ وَمَا فِي الْاَرْضِ ۭ مَنْ
ذَا الَّذِيْ يَشْفَعُ عِنْدَهٗٓ اِلَّا بِاِذْنِهٖ ۭ يَعْلَمُ مَا بَيْنَ
اَيْدِيْهِمْ وَمَا خَلْفَهُمْ ۚ وَلَا يُحِيْطُوْنَ بِشَيْءٍ مِّنْ
عِلْمِهٖٓ اِلَّا بِمَا شَاۗءَ ۚ وَسِعَ كُرْسِيُّهُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ ۚ
وَلَا يَـــُٔـوْدُهٗ حِفْظُهُمَا ۚ وَهُوَ الْعَلِيُّ الْعَظِيْمُ ۝
لَآ اِكْرَاهَ فِي الدِّيْنِ ۣ قَدْ تَّبَيَّنَ الرُّشْدُ مِنَ الْغَيِّ ۚ
فَمَنْ يَّكْفُرْ بِالطَّاغُوْتِ وَيُؤْمِنْۢ بِاللّٰهِ فَقَدِ
اسْتَمْسَكَ بِالْعُرْوَةِ الْوُثْقٰى ۤ لَا انْفِصَامَ لَهَا ۭ
وَاللّٰهُ سَمِيْعٌ عَلِيْمٌ ۝

255. Ho vi kredantoj! Donu tion, kion Ni donis al vi, antaŭ ol venos la tago, en kiu ne estos eble komerci kaj ne plu validos amikeco nek propeto; la miskredantoj estas malbonfarantoj.

256. Allah! Ne ekzistas alia Dio ol Li, la Vivanta, la Sendependa kaj Ĉiosubtenanta; nek dormobezono nek dormo venkas Lin. Kio estas en la ĉielo kaj sur la tero, ĉio apartenas al Li. Kiu povas propeti ĉe Li sen Lia permeso? Li scias, kio estas antaŭ kaj malantaŭ la homoj, kaj ili nenion komprenas el Lia scio ol tion, kion Li volas. Lia regno enhavas la ĉielojn kaj la teron kaj la regado de ambaŭ ne lacigas Lin. Li estas la Eminenta, la Grandega.

257. Ne estu perforto je la religio; vere distingiĝas evidente la vero de la eraro. Kiu rifuzos la instruon de la delogistoj kaj kredos je Allah, tiu certe ekkaptos fortan tenilon, kies rompo neeblas. Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

258. Allah estas la protektanto de la kredantoj. Li gvidas ilin el la mallumo al la lumo; kontraŭe, amikoj de la miskredantoj estas la delogistoj, kiuj ilin logas for de la lumo al la mallumo. Ili estos loĝantoj de l' fajro; tie ili restos por ĉiam.

اَللّٰهُ وَلِيُّ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا يُخْرِجُهُمْ مِّنَ الظُّلُمٰتِ اِلَى
النُّوْرِ ۭ وَالَّذِيْنَ كَفَرُوْٓا اَوْلِيٰۗـــُٔهُمُ الطَّاغُوْتُ ۙ
يُخْرِجُوْنَهُمْ مِّنَ النُّوْرِ اِلَى الظُّلُمٰتِ ۭ اُولٰۗىِٕكَ اَصْحٰبُ
النَّارِ ۚ هُمْ فِيْهَا خٰلِدُوْنَ ۝٢٥٧

259. Ĉu vi ne vidis tiun*, kiu disputis kun Abraham pri lia Sinjoro, ĉar Allah donis al li la regnon? Kiam Abraham diris: "Estas la Sinjoro, kiu igas vivi kaj morti" li respondis: "Mi ja igas vivi kaj morti! ". Abraham diris: "Vere Allah alportas la sunon el la oriento, do portu vi ĝin el la okcidento! ". Tiam la miskredanto estis konfuzita. Allah ne gvidas la malbonfaranton.

اَلَمْ تَرَ اِلَى الَّذِيْ حَاۗجَّ اِبْرٰهٖمَ فِيْ رَبِّهٖٓ اَنْ اٰتٰىهُ
اللّٰهُ الْمُلْكَ ۘ اِذْ قَالَ اِبْرٰهٖمُ رَبِّيَ الَّذِيْ يُحْيٖ وَيُمِيْتُ ۙ
قَالَ اَنَا اُحْيٖ وَاُمِيْتُ ۭ قَالَ اِبْرٰهٖمُ فَاِنَّ اللّٰهَ يَاْتِيْ
بِالشَّمْسِ مِنَ الْمَشْرِقِ فَاْتِ بِهَا مِنَ الْمَغْرِبِ
فَبُهِتَ الَّذِيْ كَفَرَ ۭ وَاللّٰهُ لَا يَهْدِي الْقَوْمَ الظّٰلِمِيْنَ ۝٢٥٨

104. Tenu vin firme, ĉiuj kune, al la ŝnuro de Allah kaj ne disiĝu, kaj memoru la favorojn de Allah kontraŭ vi kiam vi estis malamikoj. Poste Li kunigis viajn korojn per Sia graco, tiel ke vi fariĝis gefratoj, kvankam vi estis ĉe la rando de fajra foso, kaj Li protektis vin de ĝi. Tiel Allah evidentigas Siajn signojn al vi, por ke vi estu gvidataj.

وَلْتَكُنْ مِّنْكُمْ اُمَّةٌ يَّدْعُوْنَ اِلَى الْخَيْرِ وَيَاْمُرُوْنَ
بِالْمَعْرُوْفِ وَيَنْهَوْنَ عَنِ الْمُنْكَرِ ؕ وَاُولٰٓئِكَ هُمُ
الْمُفْلِحُوْنَ ﴿١٠٤﴾

105. Estiĝu inter vi societo, kiu instigu al la bono kaj ordonu la justecon kaj malpermesu la malbonon. Nur tiuj estos sukcesaj.

وَلَا تَكُوْنُوْا كَالَّذِيْنَ تَفَرَّقُوْا وَاخْتَلَفُوْا مِنْۢ بَعْدِ
مَا جَآءَهُمُ الْبَيِّنٰتُ ؕ وَاُولٰٓئِكَ لَهُمْ عَذَابٌ
عَظِيْمٌ ﴿١٠٥﴾ ۙ

106. Ne estu kiel tiuj, kiuj malkonsentas kaj disputas, post kiam al ili venis la signoj evidentaj. Por ili estos grava puno

يَّوْمَ تَبْيَضُّ وُجُوْهٌ وَّتَسْوَدُّ وُجُوْهٌ ۚ فَاَمَّا الَّذِيْنَ
اسْوَدَّتْ وُجُوْهُهُمْ ۫ اَكَفَرْتُمْ بَعْدَ اِيْمَانِكُمْ فَذُوْقُوا
الْعَذَابَ بِمَا كُنْتُمْ تَكْفُرُوْنَ ﴿١٠٦﴾

107. en la tago, en kiu iuj vizaĝoj blankiĝos kaj aliaj vizaĝoj nigriĝos. Al tiuj, kies vizaĝoj estos nigraj, estos dirite: "Ĉu vi miskredis, post kiam vi kredis? Do gustumu la punon pro via miskredo".

وَاَمَّا الَّذِيْنَ ابْيَضَّتْ وُجُوْهُهُمْ فَفِيْ رَحْمَةِ اللّٰهِ
هُمْ فِيْهَا خٰلِدُوْنَ ﴿١٠٨﴾

108. Tiuj, kies vizaĝoj estos blankaj, estos en la graco de Allah kaj tie ili restos por ĉiam.

تِلْكَ اٰيٰتُ اللّٰهِ نَتْلُوْهَا عَلَيْكَ بِالْحَقِّ ۗ وَمَا اللّٰهُ يُرِيْدُ
ظُلْمًا لِّلْعٰلَمِيْنَ ﴿١٠٩﴾

109. Tiuj ĉi estas la revelacioj de Allah, kiujn Ni vere proklamas al vi. Allah ne volas maljustecon por la nacioj.

وَلِلّٰهِ مَا فِي السَّمٰوٰتِ وَمَا فِي الْاَرْضِ ۗ وَاِلَى اللّٰهِ تُرْجَعُ
الْاُمُوْرُ ﴿١١٠﴾ ع ١١

110 Al Allah apartenas ĉio en la ĉieloj kaj sur la tero, kaj al Allah ĉio revenos.

كُنْتُمْ خَيْرَ اُمَّةٍ اُخْرِجَتْ لِلنَّاسِ تَاْمُرُوْنَ بِالْمَعْرُوْفِ
وَتَنْهَوْنَ عَنِ الْمُنْكَرِ وَتُؤْمِنُوْنَ بِاللّٰهِ ۗ وَلَوْ اٰمَنَ
اَهْلُ الْكِتٰبِ لَكَانَ خَيْرًا لَّهُمْ ۗ مِنْهُمُ الْمُؤْمِنُوْنَ وَ
اَكْثَرُهُمُ الْفٰسِقُوْنَ ﴿١١١﴾

111. Vi estas la plej bona popolo, sendita por la bono de la homaro; vi ordonas la bonon kaj malpermesas la malbonon kaj kredas je Allah. Se ankaŭ la popolo de la Skribo kredus, vere ankaŭ por ĝi estus pli bone. El ili iuj kredas, sed la plej multaj ribelas.

لَنْ يَّضُرُّوْكُمْ اِلَّآ اَذًى ۗ وَاِنْ يُّقَاتِلُوْكُمْ يُوَلُّوْكُمُ
الْاَدْبَارَ ۫ ثُمَّ لَا يُنْصَرُوْنَ ﴿١١٢﴾

112. Ili ne kapablos kaŭzi grandan malutilon kontraŭ vi; se ili batalos kontraŭ vi, ili turnos siajn dorsojn. Por ili ne estos helpo.

ضُرِبَتْ عَلَيْهِمُ الذِّلَّةُ اَيْنَ مَا ثُقِفُوْٓا اِلَّا بِحَبْلٍ مِّنَ اللّٰهِ
وَحَبْلٍ مِّنَ النَّاسِ وَبَآءُوْ بِغَضَبٍ مِّنَ اللّٰهِ وَضُرِبَتْ
عَلَيْهِمُ الْمَسْكَنَةُ ۗ ذٰلِكَ بِاَنَّهُمْ كَانُوْا يَكْفُرُوْنَ بِاٰيٰتِ اللّٰهِ وَيَقْتُلُوْنَ
الْاَنْۢبِيَآءَ بِغَيْرِ حَقٍّ ۗ ذٰلِكَ بِمَا عَصَوْا وَّكَانُوْا يَعْتَدُوْنَ ﴿١١٣﴾

113. Sur ilin venos humiligo, kie ajn ili estos troveblaj, krom en la alianco kun Allah aŭ kun la homoj. Ili ekscitis la koleron de Allah kaj sur ilin falos la honto. Tio estas, ĉar ili rifuzis la signojn de Allah kaj maljuste mortigis la profetojn. Tio estas, ĉar ili malobeis kaj pekis.

لَيْسُوْا سَوَآءً ۗ مِنْ اَهْلِ الْكِتٰبِ اُمَّةٌ قَآئِمَةٌ يَّتْلُوْنَ
اٰيٰتِ اللّٰهِ اٰنَآءَ الَّيْلِ وَهُمْ يَسْجُدُوْنَ ﴿١١٤﴾

114. Ili ne estas ĉiuj egalaj. Inter la popolo de la Skribo estas kelkaj, kiuj respektas la aliancon: ili proklamas la vortojn de Allah en la horoj de la nokto kaj terenkuŝiĝas.

يُؤْمِنُوْنَ بِاللّٰهِ وَالْيَوْمِ الْاٰخِرِ وَيَاْمُرُوْنَ بِالْمَعْرُوْفِ
وَيَنْهَوْنَ عَنِ الْمُنْكَرِ وَيُسَارِعُوْنَ فِي الْخَيْرٰتِ ۗ
وَاُولٰٓئِكَ مِنَ الصّٰلِحِيْنَ ﴿١١٥﴾

115. Ili kredas je Allah kaj al la vivo venonta, kaj ordonas la justecon kaj malpermesas la malbonon kaj konkuras reciproke pri la bono. Ili estas justuloj.

وَمَا يَفْعَلُوْا مِنْ خَيْرٍ فَلَنْ يُّكْفَرُوْهُ ۗ وَاللّٰهُ عَلِيْمٌ

116. Kion ajn bonan ili faros, tio ne estos rifuzata. Allah konas la justulojn.

117. Neniom utilos al la miskredantoj iliaj proprafoj kaj iliaj filoj kontraŭ Allah. Ili estos loĝantoj de l' fajro kaj tie ili restos por ĉiam.

118. Tio, kion ili disdonas en ĉi tiu vivo. estas kvazaŭ vento, en kiu estas glacia malvarmo; ĝi trafas la rikolton de la kampo de la popolo pekema kaj neniigas ĝin. Ili ne pekis kontraŭ Allah, sed kontraŭ si mem.

119. Ho vi, kredantoj! Ne preferu amikojn krom el via gento. Ili dezirus, ke vin trafu malfeliĉo. Jen, la malamo manifestiĝis el iliaj buŝoj, tamen tio, kion iliaj brustoj kaŝas, estas eĉ pli malbona. Ni vere klarigis al vi la pruvojn, se vi estas komprenemaj.

120. Ho vi! Vi amas ilin sed ili ne amas vin, kaj vi kredas je la tuta Libro. Kiam ili vin renkontas, ili diras: "Ni kredas", sed kiam ili estas solaj, ili de kolero mordas siajn fingrojn kontraŭ vi. Diru: "Mortu pro via furiozo! ". Vere Allah konas la internon de la brustoj!

121. Se okazas al vi io bona, ili suferas, kaj se male okazas malbono, ili ĝojas pro tio. Se vi tamen estos persistemaj kaj justaj, iliaj intrigoj neniom malutilos al vi. Allah neniigos iliajn verkojn.

122. Memoru, kiam vi frumatene lasis vian familion kaj konfidis al la kredantoj iliajn postenojn por la batalo*. Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

بِالْمُتَّقِينَ ﴿١٢٧﴾

إِنَّ الَّذِينَ كَفَرُوا لَن تُغْنِيَ عَنْهُمْ أَمْوَالُهُمْ وَلَا
أَوْلَادُهُم مِّنَ اللَّهِ شَيْئًا ۖ وَأُولَٰئِكَ أَصْحَابُ النَّارِ ۖ
هُمْ فِيهَا خَالِدُونَ ﴿١٢٨﴾

مَثَلُ مَا يُنفِقُونَ فِي هَٰذِهِ الْحَيَاةِ الدُّنْيَا كَمَثَلِ
رِيحٍ فِيهَا صِرٌّ أَصَابَتْ حَرْثَ قَوْمٍ ظَلَمُوا أَنفُسَهُمْ
فَأَهْلَكَتْهُ ۚ وَمَا ظَلَمَهُمُ اللَّهُ وَلَٰكِنْ أَنفُسَهُمْ
يَظْلِمُونَ ﴿١٢٩﴾

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا لَا تَتَّخِذُوا بِطَانَةً مِّن دُونِكُمْ
لَا يَأْلُونَكُمْ خَبَالًا ۚ وَدُّوا مَا عَنِتُّمْ ۚ قَدْ بَدَتِ
الْبَغْضَاءُ مِنْ أَفْوَاهِهِمْ ۖ وَمَا تُخْفِي صُدُورُهُمْ
أَكْبَرُ ۚ قَدْ بَيَّنَّا لَكُمُ الْآيَاتِ إِن كُنتُمْ
تَعْقِلُونَ ﴿١١٨﴾

هَا أَنتُمْ أُولَاءِ تُحِبُّونَهُمْ وَلَا يُحِبُّونَكُمْ وَتُؤْمِنُونَ
بِالْكِتَابِ كُلِّهِ ۖ وَإِذَا لَقُوكُمْ قَالُوا آمَنَّا ۖ وَإِذَا خَلَوْا
عَضُّوا عَلَيْكُمُ الْأَنَامِلَ مِنَ الْغَيْظِ ۚ قُلْ مُوتُوا
بِغَيْظِكُمْ ۗ إِنَّ اللَّهَ عَلِيمٌ بِذَاتِ الصُّدُورِ ﴿١١٩﴾

إِن تَمْسَسْكُمْ حَسَنَةٌ تَسُؤْهُمْ ۖ وَإِن تُصِبْكُمْ
سَيِّئَةٌ يَفْرَحُوا بِهَا ۖ وَإِن تَصْبِرُوا وَتَتَّقُوا لَا
يَضُرُّكُمْ كَيْدُهُمْ شَيْئًا ۗ إِنَّ اللَّهَ بِمَا يَعْمَلُونَ
مُحِيطٌ ﴿١٢٠﴾ ع ١٢

وَإِذْ غَدَوْتَ مِنْ أَهْلِكَ تُبَوِّئُ الْمُؤْمِنِينَ مَقَاعِدَ

* Uhud

لِلْقِتَالِ ۗ وَاللّٰهُ سَمِيْعٌ عَلِيْمٌ ﴿١٢٣﴾

123. Memoru, kiel du el via grupo malkuraĝiĝis, kvankam Allah estas ilia amiko. Je Allah konfidu la kredantoj!

اِذْ هَمَّتْ طَّآئِفَتٰنِ مِنْكُمْ اَنْ تَفْشَلَا ۙ وَاللّٰهُ وَلِيُّهُمَا ۗ
وَعَلَى اللّٰهِ فَلْيَتَوَكَّلِ الْمُؤْمِنُوْنَ ﴿١٢٢﴾

124. Vere Allah helpis vin ĉe Badr, kiam vi estis malfortaj. Respektegu Allahon, por ke vi estu dankaj.

وَلَقَدْ نَصَرَكُمُ اللّٰهُ بِبَدْرٍ وَّاَنْتُمْ اَذِلَّةٌ ۚ فَاتَّقُوا
اللّٰهَ لَعَلَّكُمْ تَشْكُرُوْنَ ﴿١٢٣﴾

125. Memoru, kiam vi mem parolis al la kredantoj: "Ĉu ne sufiĉas al vi, ke via Sinjoro venis por helpi vin kun tri mil anĝeloj?

اِذْ تَقُوْلُ لِلْمُؤْمِنِيْنَ اَلَنْ يَّكْفِيَكُمْ اَنْ يُّمِدَّكُمْ
رَبُّكُمْ بِثَلٰثَةِ اٰلٰفٍ مِّنَ الْمَلٰٓئِكَةِ مُنْزَلِيْنَ ﴿١٢٤﴾

126. Jen! Se vi estas persistemaj kaj justaj kaj ili venas kontraŭ vin antaŭenpuŝe, tiam via Sinjoro venos por helpi vin kun kvin mil anĝeloj elektitaj.

بَلٰٓى ۙ اِنْ تَصْبِرُوْا وَتَتَّقُوْا وَيَاْتُوْكُمْ مِّنْ فَوْرِهِمْ
هٰذَا يُمْدِدْكُمْ رَبُّكُمْ بِخَمْسَةِ اٰلٰفٍ مِّنَ الْمَلٰٓئِكَةِ
مُسَوِّمِيْنَ ﴿١٢٥﴾

127. Tion Allah nur dekretis kiel bonan novaĵon por vi, kaj por ke viaj ĵoroj trankviliĝu per tio. Nur de Allah la Ĉiopova kaj la Saĝa venas helpo,

وَمَا جَعَلَهُ اللّٰهُ اِلَّا بُشْرٰى لَكُمْ وَلِتَطْمَئِنَّ قُلُوْبُكُمْ بِهٖ ۚ
وَمَا النَّصْرُ اِلَّا مِنْ عِنْدِ اللّٰهِ الْعَزِيْزِ الْحَكِيْمِ ﴿١٢٦﴾

128. por fortrancî iujn el la miskredantoj aŭ por humiligi ilin, por ke ili sensukcese reiru".

لِيَقْطَعَ طَرَفًا مِّنَ الَّذِيْنَ كَفَرُوْٓا اَوْ يَكْبِتَهُمْ فَيَنْقَلِبُوْا
خَآئِبِيْنَ ﴿١٢٧﴾

129. Ne koncernas vin, ĉu Li turnos Sin al ili aŭ punos ilin, ĉar ili estis pekemaj.

لَيْسَ لَكَ مِنَ الْاَمْرِ شَيْءٌ اَوْ يَتُوْبَ عَلَيْهِمْ اَوْ يُعَذِّبَهُمْ
فَاِنَّهُمْ ظٰلِمُوْنَ ﴿١٢٨﴾

130. Kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero, apartenas al Allah. Li pardonas al kiu Li volas, kaj punas kiun Li volas. Allah estas senkulpigema, pardonema.

وَلِلّٰهِ مَا فِى السَّمٰوٰتِ وَمَا فِى الْاَرْضِ ۗ يَغْفِرُ لِمَنْ
يَّشَآءُ وَيُعَذِّبُ مَنْ يَّشَآءُ ۗ وَاللّٰهُ غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ﴿١٢٩﴾

131. Ho vi, kredantoj! Ne nutru vin el la procentego, kiu duobligas la duoblon, sed respektegu Allahon, por ke vi estu sukcesaj.

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا لَا تَاْكُلُوا الرِّبٰٓوا اَضْعَافًا مُّضٰعَفَةً ۠
وَّاتَّقُوا اللّٰهَ لَعَلَّكُمْ تُفْلِحُوْنَ ﴿١٣٠﴾

132. Timu la fajron, kiu estas pretigita por la miskredantoj.

وَاتَّقُوا النَّارَ الَّتِىْٓ اُعِدَّتْ لِلْكٰفِرِيْنَ ﴿١٣١﴾

133. Obeu Allahon kaj la profeton, por ke estu kompato por vi.

وَاَطِيْعُوا اللّٰهَ وَالرَّسُوْلَ لَعَلَّكُمْ تُرْحَمُوْنَ ﴿١٣٢﴾

134. Konkuru reciproke pri la pardono de via Sinjoro kaj pri la Paradizo – kiu estas tiel vasta kiel la ĉieloj kaj la tero kune – , kiu estas pretigita por la justuloj,

وَسَارِعُوٓا إِلَىٰ مَغْفِرَةٍ مِّن رَّبِّكُمْ وَجَنَّةٍ عَرْضُهَا
السَّمَٰوَٰتُ وَالْأَرْضُ أُعِدَّتْ لِلْمُتَّقِينَ ﴿١٣٣﴾

135. kiuj almozdonas – aŭ en abundo aŭ en malabundo – kaj subpremas la koleron kaj pardonas al la homoj – Allah amas la bonfarantojn –

الَّذِينَ يُنفِقُونَ فِي السَّرَّآءِ وَالضَّرَّآءِ وَالْكَٰظِمِينَ
الْغَيْظَ وَالْعَافِينَ عَنِ النَّاسِ ۗ وَاللَّهُ يُحِبُّ الْمُحْسِنِينَ ﴿١٣٤﴾

136. kaj kiuj – se ili faris ion malbonan aŭ pekon kontraŭ si mem – memoras Allahon kaj petas senkulpigon pro siaj pekoj – kiu alia povas pardoni la pekojn ol Allah? – kaj ne persistas intence en tiaj agoj.

وَالَّذِينَ إِذَا فَعَلُوا۟ فَٰحِشَةً أَوْ ظَلَمُوٓا۟ أَنفُسَهُمْ ذَكَرُوا۟ اللَّهَ فَٱسْتَغْفَرُوا۟
لِذُنُوبِهِمْ وَمَن يَغْفِرُ الذُّنُوبَ إِلَّا اللَّهُ ۖ وَلَمْ
يُصِرُّوا۟ عَلَىٰ مَا فَعَلُوا۟ وَهُمْ يَعْلَمُونَ ﴿١٣٥﴾

137. Ilia rekompenco estos la pardono de ilia Sinjoro kaj ĝardenoj, sub kiuj fluas riveroj. Tie ili restos ĉiam: kiel estas bona la rekompenco de la bonfarantoj!

أُو۟لَٰٓئِكَ جَزَآؤُهُم مَّغْفِرَةٌ مِّن رَّبِّهِمْ وَجَنَّٰتٌ تَجْرِى
مِن تَحْتِهَا الْأَنْهَٰرُ خَٰلِدِينَ فِيهَا ۗ وَنِعْمَ أَجْرُ
الْعَٰمِلِينَ ﴿١٣٦﴾

138. Antaŭe venis al vi multaj ordonoj; do iru sur la tero kaj rigardu, kiel finiĝis la negantoj!

قَدْ خَلَتْ مِن قَبْلِكُمْ سُنَنٌ ۙ فَسِيرُوا۟ فِى الْأَرْضِ
فَٱنظُرُوا۟ كَيْفَ كَانَ عَٰقِبَةُ الْمُكَذِّبِينَ ﴿١٣٧﴾

139. Tio ĉi estas pruvo por la homoj kaj gvidilo kaj admono por la justuloj.

هَٰذَا بَيَانٌ لِّلنَّاسِ وَهُدًى وَمَوْعِظَةٌ لِّلْمُتَّقِينَ ﴿١٣٨﴾

140. Ne laciĝu kaj ne ĉagreniĝu; vi certe venkos, se vi estas kredantoj.

وَلَا تَهِنُوا۟ وَلَا تَحْزَنُوا۟ وَأَنتُمُ الْأَعْلَوْنَ إِن كُنتُم
مُّؤْمِنِينَ ﴿١٣٩﴾

141. Se vi ricevis vundon, certe la popolo miskredanta jam ricevis ankaŭ similan vundon. Tiajn tagojn Ni igas alterni por la homoj, por ke Allah rekonu la kredantojn kaj elektu el vi atestantojn – Allah ne amas la pekulojn –,

إِن يَمْسَسْكُمْ قَرْحٌ فَقَدْ مَسَّ الْقَوْمَ قَرْحٌ مِّثْلُهُۥ ۚ
وَتِلْكَ الْأَيَّامُ نُدَاوِلُهَا بَيْنَ النَّاسِ ۚ وَلِيَعْلَمَ اللَّهُ
الَّذِينَ ءَامَنُوا۟ وَيَتَّخِذَ مِنكُمْ شُهَدَآءَ ۗ وَاللَّهُ لَا يُحِبُّ
الظَّٰلِمِينَ ﴿١٤٠﴾

142. kaj por ke Allah purigu la kredantojn kaj neniigu la miskredantojn.

وَلِيُمَحِّصَ اللَّهُ الَّذِينَ ءَامَنُوا۟ وَيَمْحَقَ الْكَٰفِرِينَ ﴿١٤١﴾

143. Ĉu vi imagas, ke vi eniros en la Paradizon, antaŭ ol Allah estos distinginta la batalintojn kaj la persistemulojn el vi?

أَمْ حَسِبْتُمْ أَن تَدْخُلُوا۟ الْجَنَّةَ وَلَمَّا يَعْلَمِ اللَّهُ الَّذِينَ
جَٰهَدُوا۟ مِنكُمْ وَيَعْلَمَ الصَّٰبِرِينَ ﴿١٤٢﴾

144. Vi kutimis deziri tiun morton, antaŭ ol vi renkontis ĝin: nun vi vidis ĝin, ĉar vi atente rigardis.

وَلَقَدْ كُنْتُمْ تَمَنَّوْنَ الْمَوْتَ مِنْ قَبْلِ اَنْ تَلْقَوْهُ
فَقَدْ رَاَيْتُمُوْهُ وَاَنْتُمْ تَنْظُرُوْنَ ﴿١٤٣﴾ ع

145. Mahometo estas nur sendito. Vere antaŭ li aliaj senditoj jam pasis; se li mortus aŭ estus mortigita, ĉu vi irus returne? Kiu iras returne, neniel malutilas al Allah. Allah rekompencos la dankemulojn.

وَمَا مُحَمَّدٌ اِلَّا رَسُوْلٌ ۚ قَدْ خَلَتْ مِنْ قَبْلِهِ الرُّسُلُ ؕ
اَفَاْئِنْ مَّاتَ اَوْ قُتِلَ انْقَلَبْتُمْ عَلٰٓى اَعْقَابِكُمْ ؕ وَمَنْ
يَّنْقَلِبْ عَلٰى عَقِبَيْهِ فَلَنْ يَّضُرَّ اللّٰهَ شَيْـًٔا ؕ وَسَيَجْزِى
اللّٰهُ الشّٰكِرِيْنَ ﴿١٤٤﴾

146. Neniu havas la rajton morti sen la permeso de Allah – permeso kun difinita tempo. Kiu deziras la rekompencon de ĉi tiu vivo, tiu ricevos ĝin de Ni kaj, kiu deziras la rekompencon de la vivo venonta, tiu ricevos ĝin de Ni. Ni rekompencos la dankemulojn.

وَمَا كَانَ لِنَفْسٍ اَنْ تَمُوْتَ اِلَّا بِاِذْنِ اللّٰهِ كِتٰبًا
مُّؤَجَّلًا ؕ وَمَنْ يُّرِدْ ثَوَابَ الدُّنْيَا نُؤْتِهٖ مِنْهَا ۚ
وَمَنْ يُّرِدْ ثَوَابَ الْاٰخِرَةِ نُؤْتِهٖ مِنْهَا ؕ وَسَنَجْزِى
الشّٰكِرِيْنَ ﴿١٤٥﴾

147. Iam estis iu profeto, kun kiu multaj trupoj batalis. Ili ne timis tion, kion ili povus renkonti batalante por la afero de Allah, kaj ili ne malfortiĝis kaj ne humiliĝis. Allah amas la persistemulojn.

وَكَاَيِّنْ مِّنْ نَّبِيٍّ قٰتَلَ ۙ مَعَهٗ رِبِّيُّوْنَ كَثِيْرٌ ۚ فَمَا
وَهَنُوْا لِمَآ اَصَابَهُمْ فِىْ سَبِيْلِ اللّٰهِ وَمَا ضَعُفُوْا
وَمَا اسْتَكَانُوْا ؕ وَاللّٰهُ يُحِبُّ الصّٰبِرِيْنَ ﴿١٤٦﴾

148. Ili ne diris eĉ unu vorton krom: "Nia Sinjoro, pardonu al ni niajn pekojn kaj la erarojn de nia konduto kaj firmigu niajn paŝojn kaj helpu nin kontraŭ la popolo miskredanta".

وَمَا كَانَ قَوْلَهُمْ اِلَّآ اَنْ قَالُوْا رَبَّنَا اغْفِرْ لَنَا ذُنُوْبَنَا
وَاِسْرَافَنَا فِىْٓ اَمْرِنَا وَثَبِّتْ اَقْدَامَنَا وَانْصُرْنَا عَلَى
الْقَوْمِ الْكٰفِرِيْنَ ﴿١٤٧﴾

149. Allah donas al ili la rekompencon en ĉi tiu vivo kaj ankaŭ belegan rekompencon en la vivo venonta. Allah amas la bonfarantojn.

فَاٰتٰىهُمُ اللّٰهُ ثَوَابَ الدُّنْيَا وَحُسْنَ ثَوَابِ الْاٰخِرَةِ ؕ
وَاللّٰهُ يُحِبُّ الْمُحْسِنِيْنَ ﴿١٤٨﴾ ع

150. Ho vi, kredantoj! Se vi obeos la miskredantojn, ili ordonos al vi turniĝi sur viaj kalkanoj kaj vi estos perdantoj.

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اِنْ تُطِيْعُوا الَّذِيْنَ كَفَرُوْا
يَرُدُّوْكُمْ عَلٰٓى اَعْقَابِكُمْ فَتَنْقَلِبُوْا خٰسِرِيْنَ ﴿١٤٩﴾

151. Ne! Allah estos via protektanto. Li estas la plej bona helpanto.

بَلِ اللّٰهُ مَوْلٰىكُمْ ۚ وَهُوَ خَيْرُ النّٰصِرِيْنَ ﴿١٥٠﴾

152. En la korojn de la miskredantoj Ni ĵetis teruron, ĉar ili aldonis al Allah rivalojn, kvankam Li ne donis al ili la rajton fari tion. Ilia loĝejo estos la fajro; malbona estos la loĝejo de la pekuloj!

سَنُلْقِىْ فِىْ قُلُوْبِ الَّذِيْنَ كَفَرُوا الرُّعْبَ بِمَآ اَشْرَكُوْا

بِاللّٰهِ مَا لَمْ يُنَزِّلْ بِهٖ سُلْطٰنًا ۚ وَمَاْوٰىهُمُ النَّارُ ۭ وَبِئْسَ مَثْوَى الظّٰلِمِيْنَ ﴿١٥١﴾

153. Allah plenumis Sian promeson, kiam vi rompis ĝin –'kaj Li permesis tion – ĝis vi ŝanceliĝis kaj malkonsentis pri la ordono, kaj poste vi malobeis, kiam Li montris al vi, kion vi amis. Inter vi estas iuj, kiuj deziras ĉi tiun vivon, sed aliaj deziras la vivon venontan. Poste Li turnis Sin for de vi por elprovi vin. Certe Li jam pardonis al vi. Allah estas indulgema en Sia graco kontraŭ la kredantoj.

وَلَقَدْ صَدَقَكُمُ اللّٰهُ وَعْدَهٗٓ اِذْ تَحُسُّوْنَهُمْ بِاِذْنِهٖ ۚ حَتّٰٓى اِذَا فَشِلْتُمْ وَتَنَازَعْتُمْ فِي الْاَمْرِ وَعَصَيْتُمْ مِّنْۢ بَعْدِ مَآ اَرٰىكُمْ مَّا تُحِبُّوْنَ ۭ مِنْكُمْ مَّنْ يُّرِيْدُ الدُّنْيَا وَمِنْكُمْ مَّنْ يُّرِيْدُ الْاٰخِرَةَ ۚ ثُمَّ صَرَفَكُمْ عَنْهُمْ لِيَبْتَلِيَكُمْ ۚ وَلَقَدْ عَفَا عَنْكُمْ ۭ وَاللّٰهُ ذُوْ فَضْلٍ عَلَي الْمُؤْمِنِيْنَ ﴿١٥٢﴾

154. Memoru, kiam vi fuĝis kaj neniu turnis sin al la alia kaj la sendito vokis vin reen. Do Li donis al vi ĉagrenon kiel repagon por ĉagreno, por ke vi ne plendu pro tio, kion vi ĵus perdis, nek pro tio, kion vi akiris. Allah bone scias, kion vi faras.

اِذْ تُصْعِدُوْنَ وَلَا تَلْوٗنَ عَلٰٓى اَحَدٍ وَّالرَّسُوْلُ يَدْعُوْكُمْ فِيْٓ اُخْرٰىكُمْ فَاَثَابَكُمْ غَمًّۢا بِغَمٍّ لِّكَيْلَا تَحْزَنُوْا عَلٰي مَا فَاتَكُمْ وَلَا مَآ اَصَابَكُمْ ۭ وَاللّٰهُ خَبِيْرٌۢ بِمَا تَعْمَلُوْنَ ﴿١٥٣﴾

155. Poste Li sendis al vi la pacon post la ĉagreno, dormeton, kiu trafis iujn el vi, dum la aliaj zorgis pri si mem, ĉar ili opiniis malĝuste pri Allah kaj pensis sen vera scio. Ili diris: "Ĉu ni havos avantaĝon el ĉi tiu afero? ". Diru: "Ĉiuj aferoj apartenas al Allah". Ili kaŝas en siaj memoroj tion, kion ili ne malkaŝas al vi. Ili diras: "Se ni havus iun avantaĝon el ĉi tiu afero, ni ne estus mortigitaj ĉi tie". Diru: "Se vi estus restintaj en viaj domoj, certe estus elirintaj al sia morto tiuj, al kiuj estis ordonite batali". Por ke Allah juĝu pri tio, kio estas en viaj brustoj, kaj purigu tion, kio estas en viaj koroj. Allah konas la internon de la brustoj.

ثُمَّ اَنْزَلَ عَلَيْكُمْ مِّنْۢ بَعْدِ الْغَمِّ اَمَنَةً نُّعَاسًا يَّغْشٰى طَاۗىِٕفَةً مِّنْكُمْ ۙ وَطَاۗىِٕفَةٌ قَدْ اَهَمَّتْهُمْ اَنْفُسُهُمْ يَظُنُّوْنَ بِاللّٰهِ غَيْرَ الْحَقِّ ظَنَّ الْجَاهِلِيَّةِ ۭ يَقُوْلُوْنَ هَلْ لَّنَا مِنَ الْاَمْرِ مِنْ شَيْءٍ ۭ قُلْ اِنَّ الْاَمْرَ كُلَّهٗ لِلّٰهِ ۭ يُخْفُوْنَ فِيْٓ اَنْفُسِهِمْ مَّا لَا يُبْدُوْنَ لَكَ ۭ يَقُوْلُوْنَ لَوْ كَانَ لَنَا مِنَ الْاَمْرِ شَيْءٌ مَّا قُتِلْنَا هٰهُنَا ۭ قُلْ لَّوْ كُنْتُمْ فِيْ بُيُوْتِكُمْ لَبَرَزَ الَّذِيْنَ كُتِبَ عَلَيْهِمُ الْقَتْلُ اِلٰى مَضَاجِعِهِمْ ۚ وَلِيَبْتَلِيَ اللّٰهُ مَا فِيْ صُدُوْرِكُمْ وَلِيُمَحِّصَ مَا فِيْ قُلُوْبِكُمْ ۭ وَاللّٰهُ عَلِيْمٌۢ بِذَاتِ الصُّدُوْرِ ﴿١٥٤﴾

156. Vere Satano faligis – pro io, kion ili faris – tiujn, kiuj turnis siajn dorsojn en la tago, en kiu koliziis la du armeoj*. Allah tamen ilin certe senkulpigis. Vere Allah estas senkulpigema, indulgema.

* Uhud

إِنَّ الَّذِينَ تَوَلَّوْا مِنكُمْ يَوْمَ الْتَقَى الْجَمْعَانِ ۙ إِنَّمَا
اسْتَزَلَّهُمُ الشَّيْطَانُ بِبَعْضِ مَا كَسَبُوا ۖ وَلَقَدْ عَفَا
اللَّهُ عَنْهُمْ ۗ إِنَّ اللَّهَ غَفُورٌ حَلِيمٌ ﴿١٥٥﴾ ع ٦

157. Ho vi, kredantoj! Ne estu kiel la miskredantoj, kiuj diras pri siaj fratoj, kiam ĉi tiuj trairis la landon aŭ iris al la milito: "Se ili restus kun ni, ili ne estus mortintaj aŭ mortigitaj". Tion faris Allah por estigi en iliaj koroj doloron. Allah donas vivon kaj morton. Allah vidas, kion vi faras.

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا لَا تَكُونُوا كَالَّذِينَ كَفَرُوا وَقَالُوا
لِإِخْوَانِهِمْ إِذَا ضَرَبُوا فِي الْأَرْضِ أَوْ كَانُوا غُزًّى لَّوْ
كَانُوا عِندَنَا مَا مَاتُوا وَمَا قُتِلُوا لِيَجْعَلَ اللَّهُ ذَٰلِكَ
حَسْرَةً فِي قُلُوبِهِمْ ۗ وَاللَّهُ يُحْيِي وَيُمِيتُ ۗ وَاللَّهُ بِمَا
تَعْمَلُونَ بَصِيرٌ ﴿١٥٦﴾

158. Kiam vi estos mortigitaj aŭ mortos por la afero de Allah, sciu: la pardono de Allah kaj Lia graco estas preferindaj al ĉiuj aĵoj, kiujn vi amasigas.

وَلَئِن قُتِلْتُمْ فِي سَبِيلِ اللَّهِ أَوْ مُتُّمْ لَمَغْفِرَةٌ مِّنَ
اللَّهِ وَرَحْمَةٌ خَيْرٌ مِّمَّا يَجْمَعُونَ ﴿١٥٧﴾
وَلَئِن مُّتُّمْ أَوْ قُتِلْتُمْ لَإِلَى اللَّهِ تُحْشَرُونَ ﴿١٥٨﴾

159. Kiam vi mortos aŭ estos mortigitaj, sciu: al Allah vi ĉiuj estos kunvenigitaj.

فَبِمَا رَحْمَةٍ مِّنَ اللَّهِ لِنتَ لَهُمْ ۖ وَلَوْ كُنتَ فَظًّا
غَلِيظَ الْقَلْبِ لَانفَضُّوا مِنْ حَوْلِكَ ۖ فَاعْفُ عَنْهُمْ
وَاسْتَغْفِرْ لَهُمْ وَشَاوِرْهُمْ فِي الْأَمْرِ ۖ فَإِذَا عَزَمْتَ
فَتَوَكَّلْ عَلَى اللَّهِ ۚ إِنَّ اللَّهَ يُحِبُّ الْمُتَوَكِّلِينَ ﴿١٥٩﴾

160. Per la graco de Allah vi estas malsevera kontraŭ ili; se vi estus severa, malmolkora, ili estus disiĝintaj de vi; vi do pardonu al ili kaj petu pardonon por ili kaj petu ilian konsilon pri la regado. Kiam vi tamen estos decidinta, tiam konfidu je Allah. Allah vere amas la konfidantojn.

إِن يَنصُرْكُمُ اللَّهُ فَلَا غَالِبَ لَكُمْ ۖ وَإِن يَخْذُلْكُمْ
فَمَن ذَا الَّذِي يَنصُرُكُم مِّن بَعْدِهِ ۗ وَعَلَى اللَّهِ فَلْيَتَوَكَّلِ
الْمُؤْمِنُونَ ﴿١٦٠﴾

161. Se Allah helpos vin, neniu venkos vin, sed, se Li forlasos vin, kiu helpos vin poste? Pro tio la kredantoj konfidu je Allah.

وَمَا كَانَ لِنَبِيٍّ أَن يَغُلَّ ۚ وَمَن يَغْلُلْ يَأْتِ بِمَا
غَلَّ يَوْمَ الْقِيَامَةِ ۚ ثُمَّ تُوَفَّىٰ كُلُّ نَفْسٍ مَّا كَسَبَتْ
وَهُمْ لَا يُظْلَمُونَ ﴿١٦١﴾
أَفَمَنِ اتَّبَعَ رِضْوَانَ اللَّهِ كَمَن بَاءَ بِسَخَطٍ مِّنَ اللَّهِ

162. Ne konvenas al profeto trompi. Kiu trompas, tiu devas kunporti en la tago de la reviviĝo, kion li deprenis. Poste estos donite al ĉiu laŭ merito kaj ne estos por li maljusteco.

163. Ĉu tiu, kiu celas la plezuron de Allah, similas al tiu, kiu meritas la koleron de Allah kaj kies loĝejo estos la infero? Malbonega estas tiu loĝejo!

164. Por ili estas rangoj ĉe Allah kaj Allah vidas, kion ili faras.

165. Vere Allah donis al ili favoron, ĉar Li vekis inter ili sendi ton, kiu instruu al ili la Libron kaj la saĝon; antaŭe ili estis en evidenta erarado.

166. Kiel? Se vin trafas malfeliĉo – kaj vi jam kaŭzis la duoblon – vi demandas: "De kie venas tio? ". Diru (ho sendito): "Tio venas de vi mem". Vere Allah havas povon super ĉiuj aferoj.

167. Tio, kio trafis vin en la tago, en kiu koliziis la du armeoj*, estis pro la ordono de Allah, por ke Li rekonu la kredantojn,

168. kaj por ke Li rekonu la hipokritulojn. Estis dirite al ili: "Venu, batalu por la afero de Allah kaj repuŝu la malamikon". Ili tamen respondis: "Se ni kapablus batali, ni certe sekvus vin". En tiu tago ili estis pli proksimaj al la miskredo ol al la kredo. Ili diris per siaj buŝoj tion, kio ne estis en iliaj koroj. Allah scias, kion ili kaŝas.

169. Ili diras pri siaj fratoj, dum ili restas malantaŭe: "Se ili sekvus nin, ili ne estus mortigitaj". Diru: "Repuŝu do la morton for de vi mem, se vi estas sinceraj".

170. Ne kredu, ke la mortigitoj por la afero de Allah estas mortintaj. Ne! Ili vivas apud sia Sinjoro. Ili ricevas donacojn

وَمَأْوٰىهُ جَهَنَّمُ ۚ وَبِئْسَ الْمَصِيْرُ ﴿١٦٢﴾

هُمْ دَرَجٰتٌ عِنْدَ اللّٰهِ ۗ وَاللّٰهُ بَصِيْرٌۢ بِمَا يَعْمَلُوْنَ ﴿١٦٣﴾

لَقَدْ مَنَّ اللّٰهُ عَلَى الْمُؤْمِنِيْنَ اِذْ بَعَثَ فِيْهِمْ رَسُوْلًا
مِّنْ اَنْفُسِهِمْ يَتْلُوْا عَلَيْهِمْ اٰيٰتِهٖ وَيُزَكِّيْهِمْ وَ
يُعَلِّمُهُمُ الْكِتٰبَ وَالْحِكْمَةَ ۚ وَاِنْ كَانُوْا مِنْ قَبْلُ
لَفِيْ ضَلٰلٍ مُّبِيْنٍ ﴿١٦٤﴾

اَوَلَمَّآ اَصَابَتْكُمْ مُّصِيْبَةٌ قَدْ اَصَبْتُمْ مِّثْلَيْهَا ۙ
قُلْتُمْ اَنّٰى هٰذَا ۭ قُلْ هُوَ مِنْ عِنْدِ اَنْفُسِكُمْ ۭ اِنَّ
اللّٰهَ عَلٰى كُلِّ شَيْءٍ قَدِيْرٌ ﴿١٦٥﴾

وَمَآ اَصَابَكُمْ يَوْمَ الْتَقَى الْجَمْعٰنِ فَبِاِذْنِ اللّٰهِ
وَلِيَعْلَمَ الْمُؤْمِنِيْنَ ﴿١٦٦﴾

وَلِيَعْلَمَ الَّذِيْنَ نَافَقُوْا ۚ وَقِيْلَ لَهُمْ تَعَالَوْا
قَاتِلُوْا فِيْ سَبِيْلِ اللّٰهِ اَوِ ادْفَعُوْا ۭ قَالُوْا لَوْ نَعْلَمُ قِتَالًا
لَّا اتَّبَعْنٰكُمْ ۭ هُمْ لِلْكُفْرِ يَوْمَىِٕذٍ اَقْرَبُ مِنْهُمْ لِلْاِيْمَانِ ۚ
يَقُوْلُوْنَ بِاَفْوَاهِهِمْ مَّا لَيْسَ فِيْ قُلُوْبِهِمْ ۭ وَاللّٰهُ
اَعْلَمُ بِمَا يَكْتُمُوْنَ ﴿١٦٧﴾

اَلَّذِيْنَ قَالُوْا لِاِخْوَانِهِمْ وَقَعَدُوْا لَوْ اَطَاعُوْنَا مَا
قُتِلُوْا ۭ قُلْ فَادْرَءُوْا عَنْ اَنْفُسِكُمُ الْمَوْتَ اِنْ كُنْتُمْ
صٰدِقِيْنَ ﴿١٦٨﴾

وَلَا تَحْسَبَنَّ الَّذِيْنَ قُتِلُوْا فِيْ سَبِيْلِ اللّٰهِ اَمْوَاتًا ۭ بَلْ
اَحْيَاۗءٌ عِنْدَ رَبِّهِمْ يُرْزَقُوْنَ ﴿١٦٩﴾

فَرِحِيْنَ بِمَآ اٰتٰىهُمُ اللّٰهُ مِنْ فَضْلِهٖ ۙ وَيَسْتَبْشِرُوْنَ بِالَّذِيْنَ

* Uhud

لَمْ يَلْحَقُوا بِهِمْ مِّنْ خَلْفِهِمْ أَلَّا خَوْفٌ عَلَيْهِمْ وَلَا هُمْ
يَحْزَنُونَ ﴿١٧٠﴾

171. kaj estas feliĉaj pro tio, kion donas al ili Allah el Sia graco, kaj plenaj je ĝojo pro tiuj, kiuj sekvas ilin, sed ankoraŭ ne atingis ilin, ĉar por ili plu ne estos timo nek malgajeco.

يَسْتَبْشِرُونَ بِنِعْمَةٍ مِّنَ اللَّهِ وَفَضْلٍ وَأَنَّ اللَّهَ لَا يُضِيعُ
أَجْرَ الْمُؤْمِنِينَ ﴿١٧١﴾ ع

172. Ili estas plenaj je ĝojo pro la favoro de Allah kaj pro Lia graco kaj ĉar Allah ne forgesas la rekompencon por la kredantoj,

الَّذِينَ اسْتَجَابُوا لِلَّهِ وَالرَّسُولِ مِن بَعْدِ مَا أَصَابَهُمُ
الْقَرْحُ لِلَّذِينَ أَحْسَنُوا مِنْهُمْ وَاتَّقَوْا أَجْرٌ عَظِيمٌ ﴿١٧٢﴾

173. kiuj sekvas la vokon de Allah kaj de la sendito, kiam ili estas vunditaj – granda rekompenco estos por tiuj, kiuj bonfaras kaj agas juste –,

الَّذِينَ قَالَ لَهُمُ النَّاسُ إِنَّ النَّاسَ قَدْ جَمَعُوا لَكُمْ
فَاخْشَوْهُمْ فَزَادَهُمْ إِيمَانًا وَقَالُوا حَسْبُنَا اللَّهُ
وَنِعْمَ الْوَكِيلُ ﴿١٧٣﴾

174. al kiuj la homoj diras: "Vere grupiĝis ĉirkaŭ vi homoj, do timu ilin". Tio tamen nur fortigas ilian kredon kaj ili diras: "Allah sufiĉas al ni kaj bonega estas nia Protektanto".

فَانقَلَبُوا بِنِعْمَةٍ مِّنَ اللَّهِ وَفَضْلٍ لَّمْ يَمْسَسْهُمْ سُوءٌ
وَاتَّبَعُوا رِضْوَانَ اللَّهِ وَاللَّهُ ذُو فَضْلٍ عَظِيمٍ ﴿١٧٤﴾

175. Ili revenis kun la favoro kaj kun la graco de Allah, kaj malfeliĉo ne tuŝis ilin, kaj ili celis nur la plezuron de Allah. Allah estas la Donanto de granda graco.

إِنَّمَا ذَٰلِكُمُ الشَّيْطَانُ يُخَوِّفُ أَوْلِيَاءَهُ فَلَا تَخَافُوهُمْ
وَخَافُونِ إِن كُنتُم مُّؤْمِنِينَ ﴿١٧٥﴾

176. Vere estas Satano tiu, kiu teruras siajn amikojn, do ne timu ilin, sed respektegu Min, se vi estas kredantoj.

وَلَا يَحْزُنكَ الَّذِينَ يُسَارِعُونَ فِي الْكُفْرِ إِنَّهُمْ لَن
يَضُرُّوا اللَّهَ شَيْئًا يُرِيدُ اللَّهُ أَلَّا يَجْعَلَ لَهُمْ حَظًّا فِي
الْآخِرَةِ وَلَهُمْ عَذَابٌ عَظِيمٌ ﴿١٧٦﴾

177. Ne malgajiĝu pro tiuj, kiuj subfalis al la miskredo; vere ili neniel malutilos Allahon. Allah ne permesos, ke ili partoprenu je la vivo venonta, kaj por ili estos terura turmento.

إِنَّ الَّذِينَ اشْتَرَوُا الْكُفْرَ بِالْإِيمَانِ لَن يَضُرُّوا اللَّهَ
شَيْئًا وَلَهُمْ عَذَابٌ أَلِيمٌ ﴿١٧٧﴾

178. Vere, kiuj aĉetis miskredon kontraŭ kredo, tiuj neniel malutilos Allahon, kaj por ili estos dolora puno.

وَلَا يَحْسَبَنَّ الَّذِينَ كَفَرُوا أَنَّمَا نُمْلِي لَهُمْ خَيْرٌ لِّأَنفُسِهِمْ
إِنَّمَا نُمْلِي لَهُمْ لِيَزْدَادُوا إِثْمًا وَلَهُمْ عَذَابٌ
مُّهِينٌ ﴿١٧٨﴾

179. Ne imagu la miskredantoj, ke la prokrasto estas por ilia avantaĝo: la prokrasto, kiun Mi konsentis, nur efikas por la pliigo de ilia kulpo. Por ili estos puno humiliga.

مَا كَانَ اللَّهُ لِيَذَرَ الْمُؤْمِنِينَ عَلَىٰ مَا أَنتُمْ عَلَيْهِ

حَتّٰى يَمِيْزَ الْخَبِيْثَ مِنَ الطَّيِّبِ ۗ وَمَا كَانَ اللّٰهُ لِيُطْلِعَكُمْ
عَلَى الْغَيْبِ وَلٰكِنَّ اللّٰهَ يَجْتَبِيْ مِنْ رُّسُلِهٖ مَنْ يَّشَآءُ ۖ
فَاٰمِنُوْا بِاللّٰهِ وَرُسُلِهٖ ۚ وَاِنْ تُؤْمِنُوْا وَتَتَّقُوْا فَلَكُمْ اَجْرٌ
عَظِيْمٌ ﴿١٧٩﴾

180. Allah ne estus lasinta la kredantojn en la kondiĉo, en kiu estas vi, ĝis Li distingis la malbonulojn disde la bonuloj, kaj neniam Allah estus volinta malkaŝi al vi la Nevideblaĵon, sed Allah elektas el Siaj senditoj, kiun Li volas. Do kredu je Allah kaj al Liaj senditoj. Se vi kredos kaj estos justaj, por vi estos granda rekompenco.

وَلَا يَحْسَبَنَّ الَّذِيْنَ يَبْخَلُوْنَ بِمَآ اٰتٰىهُمُ اللّٰهُ مِنْ فَضْلِهٖ
هُوَ خَيْرًا لَّهُمْ ۭ بَلْ هُوَ شَرٌّ لَّهُمْ ۭ سَيُطَوَّقُوْنَ مَا بَخِلُوْا بِهٖ
يَوْمَ الْقِيٰمَةِ ۭ وَلِلّٰهِ مِيْرَاثُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ۭ وَاللّٰهُ بِمَا
تَعْمَلُوْنَ خَبِيْرٌ ﴿١٨٠﴾ ع ١٨ ٩

181. Ne imagu la homoj, kiuj estas avaraj je tio, kion Allah donis al ili el Sia graco, ke tio estas bona por ili. Ne! Tio estas malbonega. En la tago de la reviviĝo ĝi estos trudita al ili kvazaŭ peza punjugo. Al Allah apartenas la heredaĵo de la ĉieloj kaj de la tero. Allah atente observas, kion vi faras.

لَقَدْ سَمِعَ اللّٰهُ قَوْلَ الَّذِيْنَ قَالُوْٓا اِنَّ اللّٰهَ فَقِيْرٌ وَّ
نَحْنُ اَغْنِيَآءُ ۘ سَنَكْتُبُ مَا قَالُوْا وَقَتْلَهُمُ الْاَنْۢبِيَآءَ
بِغَيْرِ حَقٍّ ۙ وَّنَقُوْلُ ذُوْقُوْا عَذَابَ الْحَرِيْقِ ﴿١٨١﴾

182. Certe Allah aŭdas la parolon de tiuj, kiuj diras: "Vere Allah estas malriĉa, kaj ni estas riĉaj". Ni fiksos skribe, kion ili diras kaj iliajn provojn mortigi maljuste la profetojn. Ni diros: "Gustumu la punon de la brulado! ".

ذٰلِكَ بِمَا قَدَّمَتْ اَيْدِيْكُمْ وَاَنَّ اللّٰهَ لَيْسَ بِظَلَّامٍ
لِّلْعَبِيْدِ ﴿١٨٢﴾

183. Tio estas pro la agado de viaj manoj. Sciu, ke Allah ne estas maljusta kontraŭ la servantoj.

اَلَّذِيْنَ قَالُوْٓا اِنَّ اللّٰهَ عَهِدَ اِلَيْنَآ اَلَّا نُؤْمِنَ لِرَسُوْلٍ
حَتّٰى يَاْتِيَنَا بِقُرْبَانٍ تَاْكُلُهُ النَّارُ ۭ قُلْ قَدْ جَاۗءَكُمْ
رُسُلٌ مِّنْ قَبْلِيْ بِالْبَيِّنٰتِ وَبِالَّذِيْ قُلْتُمْ فَلِمَ قَتَلْتُمُوْهُمْ
اِنْ كُنْتُمْ صٰدِقِيْنَ ﴿١٨٣﴾

184. Al tiuj, kiuj diras: "Vere Allah ordonis al ni, ke ni ne kredu al iu ajn sendito, antaŭ ol li proponos oferaĵon, kiu estu nutraĵo de l' fajro", vi diru: "Jam antaŭ ol mi, venis al vi senditoj kun pruvoj evidentaj kaj kun tio, kion vi mencias. Kial vi provis mortigi ilin, se vi estas sinceraj? ".

فَاِنْ كَذَّبُوْكَ فَقَدْ كُذِّبَ رُسُلٌ مِّنْ قَبْلِكَ جَاۗءُوْ
بِالْبَيِّنٰتِ وَالزُّبُرِ وَالْكِتٰبِ الْمُنِيْرِ ﴿١٨٤﴾

185. Se ili kulpigas vin pri mensogo, vere ankaŭ estis kulpigitaj pri mensogo simile ĉiuj senditoj antaŭaj al vi, kiuj venis kun pruvoj evidentaj kaj kun skriboj de saĝeco kaj kun la Libro lumiganta.

كُلُّ نَفْسٍ ذَاۗىِٕقَةُ الْمَوْتِ ۭ وَاِنَّمَا تُوَفَّوْنَ اُجُوْرَكُمْ
يَوْمَ الْقِيٰمَةِ ۭ فَمَنْ زُحْزِحَ عَنِ النَّارِ وَاُدْخِلَ الْجَنَّةَ
فَقَدْ فَازَ ۭ وَمَا الْحَيٰوةُ الدُّنْيَآ اِلَّا مَتَاعُ الْغُرُوْرِ ﴿١٨٥﴾

186. Ĉiu homo gustumos la morton kaj vi ricevos vian rekompencon en la tago de la reviviĝo. Kiu do estas eltirita el la fajro kaj kondukita al la ĝardeno, tiu vere estos atinginta sian celon. Ci tiu vivo estas nur trompa plezuro.

لَتُبْلَوُنَّ فِيٓ أَمْوَٰلِكُمْ وَأَنفُسِكُمْ وَلَتَسْمَعُنَّ مِنَ ٱلَّذِينَ
أُوتُوا۟ ٱلْكِتَٰبَ مِن قَبْلِكُمْ وَمِنَ ٱلَّذِينَ أَشْرَكُوٓا۟ أَذًى
كَثِيرًا ۚ وَإِن تَصْبِرُوا۟ وَتَتَّقُوا۟ فَإِنَّ ذَٰلِكَ مِنْ عَزْمِ
ٱلْأُمُورِ ﴿١٨٦﴾

187. Vi estos certe elprovataj en viaj havaĵoj kaj en viaj personoj, kaj vi certe aŭdos multajn ofendojn de tiuj, kiuj antaŭ vi ricevis la Skribon, kaj de la idolanoj. Se vi tamen estos persistaj kaj justaj, vere tia estas la ĝusta konduto en la vivo.

وَإِذْ أَخَذَ ٱللَّهُ مِيثَٰقَ ٱلَّذِينَ أُوتُوا۟ ٱلْكِتَٰبَ لَتُبَيِّنُنَّهُۥ
لِلنَّاسِ وَلَا تَكْتُمُونَهُۥ فَنَبَذُوهُ وَرَآءَ ظُهُورِهِمْ
وَٱشْتَرَوْا۟ بِهِۦ ثَمَنًا قَلِيلًا ۖ فَبِئْسَ مَا يَشْتَرُونَ ﴿١٨٧﴾

188. Memoru, kiam Allah faris aliancon kun la ricevintoj de la Skribo: "Malkaŝu ĝin al la homaro, ne kaŝu ĝin! ". Ili tamen ĵetis ĝin malantaŭ siajn dorsojn kaj vendis ĝin por malalta prezo. Malbona estas tio, kion ili aĉetis!

لَا تَحْسَبَنَّ ٱلَّذِينَ يَفْرَحُونَ بِمَآ أَتَوا۟ وَّيُحِبُّونَ أَن
يُحْمَدُوا۟ بِمَا لَمْ يَفْعَلُوا۟ فَلَا تَحْسَبَنَّهُم بِمَفَازَةٍ مِّنَ
ٱلْعَذَابِ ۖ وَلَهُمْ عَذَابٌ أَلِيمٌ ﴿١٨٨﴾

189. Ne imagu, ke tiuj, kiuj ĝojas pro siaj agoj kaj deziras esti laŭdataj pro tio, kion ili ne faris – ne imagu, ke ili estos sekuraj de la puno. Por ili estos dolora puno.

وَلِلَّهِ مُلْكُ ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَٱلْأَرْضِ ۗ وَٱللَّهُ عَلَىٰ كُلِّ شَىْءٍ
قَدِيرٌ ﴿١٨٩﴾ ع ١٩

190. De Allah estas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero. Allah havas povon super ĉiuj aferoj.

إِنَّ فِى خَلْقِ ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَٱلْأَرْضِ وَٱخْتِلَٰفِ ٱلَّيْلِ
وَٱلنَّهَارِ لَءَايَٰتٍ لِّأُو۟لِى ٱلْأَلْبَٰبِ ﴿١٩٠﴾ ج

191. Vere en la kreo de la ĉieloj kaj de la tero kaj en la alternado de la nokto kaj de la tago estas signoj por la prudentuloj,

ٱلَّذِينَ يَذْكُرُونَ ٱللَّهَ قِيَٰمًا وَقُعُودًا وَعَلَىٰ جُنُوبِهِمْ
وَيَتَفَكَّرُونَ فِى خَلْقِ ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَٱلْأَرْضِ ۚ رَبَّنَا مَا
خَلَقْتَ هَٰذَا بَٰطِلًا ۖ سُبْحَٰنَكَ فَقِنَا عَذَابَ ٱلنَّارِ ﴿١٩١﴾

192. kiuj memoras Allahon starante aŭ kuŝante surflanke, kaj pripensas pri la kreo de la ĉieloj kaj de la tero: "Sinjoro, ne vane Vi kreis tion, Vi estas sankta, savu nin de la puno de l' fajro! ".

رَبَّنَآ إِنَّكَ مَن تُدْخِلِ ٱلنَّارَ فَقَدْ أَخْزَيْتَهُۥ ۖ وَمَا
لِلظَّٰلِمِينَ مِنْ أَنصَارٍ ﴿١٩٢﴾

193. Nia Sinjoro, tiun, kiun Vi puŝas en la fajron, vere Vi hontigis. La pekuloj ne havos helpanton.

رَبَّنَآ إِنَّنَا سَمِعْنَا مُنَادِيًا يُنَادِى لِلْإِيمَٰنِ أَنْ ءَامِنُوا۟
بِرَبِّكُمْ فَـَٔامَنَّا ۚ رَبَّنَا فَٱغْفِرْ لَنَا ذُنُوبَنَا وَكَفِّرْ عَنَّا
سَيِّـَٔاتِنَا وَتَوَفَّنَا مَعَ ٱلْأَبْرَارِ ﴿١٩٣﴾ ج

رَبَّنَا وَ اٰتِنَا مَا وَعَدْتَّنَا عَلٰى رُسُلِكَ وَلَا تُخْزِنَا يَوْمَ
الْقِيٰمَةِ ؕ اِنَّكَ لَا تُخْلِفُ الْمِيْعَادَ ﴿١٩٥﴾

194. Nia Sinjoro, ni vere aŭdis iun vokanton al la kredo: "Kredu je via Sinjoro" kaj ni kredis. Nia Sinjoro, pardonu al ni niajn pekojn kaj forigu niajn erarojn kaj aligu nin – kiam ni mortos – al la justuloj.

فَاسْتَجَابَ لَهُمْ رَبُّهُمْ اَنِّيْ لَاۤ اُضِيْعُ عَمَلَ عَامِلٍ
مِّنْكُمْ مِّنْ ذَكَرٍ اَوْ اُنْثٰى ۚ بَعْضُكُمْ مِّنْ بَعْضٍ ۚ فَالَّذِيْنَ
هَاجَرُوْا وَاُخْرِجُوْا مِنْ دِيَارِهِمْ وَ اُوْذُوْا فِيْ سَبِيْلِيْ
وَ قٰتَلُوْا وَ قُتِلُوْا لَاُكَفِّرَنَّ عَنْهُمْ سَيِّاٰتِهِمْ وَلَاُدْخِلَنَّهُمْ
جَنّٰتٍ تَجْرِيْ مِنْ تَحْتِهَا الْاَنْهٰرُ ۚ ثَوَابًا مِّنْ عِنْدِ
اللّٰهِ ؕ وَ اللّٰهُ عِنْدَهٗ حُسْنُ الثَّوَابِ ﴿١٩٦﴾

195. Nia Sinjoro, donu al ni, kion vi promesis per viaj senditoj, kaj ne hontigu nin en la tago de la reviviĝo. Vere, Vi ne rompas la promeson.

لَا يَغُرَّنَّكَ تَقَلُّبُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا فِي الْبِلَادِ ﴿١٩٧﴾
مَتَاعٌ قَلِيْلٌ ۖ ثُمَّ مَاْوٰىهُمْ جَهَنَّمُ ؕ وَبِئْسَ الْمِهَادُ ﴿١٩٨﴾

196. Respondis al ili ilia Sinjoro: "Vere Mi ne permesos, ke vaniĝu la faro de la farantoj, el vi, aŭ viro aŭ virino. Ĉiu devenas de la alia. Kaj rilate al tiuj, kiuj elmigris kaj kiuj estis forpelitaj de siaj domoj kaj estis persekutitaj pro Mia afero kaj batalis kaj estis mortigitaj, Mi vere forprenos de ili iliajn erarojn kaj kondukos ilin en la ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj: tio estos la rekompenco de Allah. Ĉe Allah estos belega rekompenco.

لٰكِنِ الَّذِيْنَ اتَّقَوْا رَبَّهُمْ لَهُمْ جَنّٰتٌ تَجْرِيْ مِنْ تَحْتِهَا
الْاَنْهٰرُ خٰلِدِيْنَ فِيْهَا نُزُلًا مِّنْ عِنْدِ اللّٰهِ ؕ وَمَا عِنْدَ
اللّٰهِ خَيْرٌ لِّلْاَبْرَارِ ﴿١٩٩﴾

197. Ne trompu vin la prospera komerco de la miskredantoj:

198. tio estas malgranda gajno; poste ilia loĝejo estos la infero; kiom malbonega restadejo!

وَاِنَّ مِنْ اَهْلِ الْكِتٰبِ لَمَنْ يُّؤْمِنُ بِاللّٰهِ وَمَاۤ اُنْزِلَ
اِلَيْكُمْ وَمَاۤ اُنْزِلَ اِلَيْهِمْ خٰشِعِيْنَ لِلّٰهِ ۙ لَا يَشْتَرُوْنَ
بِاٰيٰتِ اللّٰهِ ثَمَنًا قَلِيْلًا ؕ اُولٰٓئِكَ لَهُمْ اَجْرُهُمْ عِنْدَ
رَبِّهِمْ ؕ اِنَّ اللّٰهَ سَرِيْعُ الْحِسَابِ ﴿١٩٩﴾

199. Por tiuj tamen, kiuj respektegas sian Sinjoron, estos ĝardenoj, sub kiuj fluas riveroj; tie ili restos por ĉiam; tio estos la donaco de Allah; kaj tio, kio estas ĉe Allah, estas multe pli bona por la justuloj.

يٰۤاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوا اصْبِرُوْا وَصَابِرُوْا وَرَابِطُوْا ۟ وَاتَّقُوا اللّٰهَ لَعَلَّكُمْ تُفْلِحُوْنَ ﴿٢٠٠﴾ ع ۱۱

200. Certe estas inter la popolo de la Skribo iuj, kiuj kredas je Allah kaj je tio, kio estis sendita al vi, kaj je tio, kio estis sendita al ili mem, humiluloj antaŭ Allah. Ili ne vendas la signojn de Allah por malalta prezo. Por ili estos rekompenco de ilia Sinjoro. Vere Allah estas rapida je l' juĝo!

201. Ho vi, kredantoj! Estu persistemaj kaj konkuru en persistemo kaj estu viglaj kaj respektegu Allahon, por ke vi estu sukcesaj!

سُوْرَةُ النِّسَآءِ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

يٰٓاَيُّهَا النَّاسُ اتَّقُوْا رَبَّكُمُ الَّذِيْ خَلَقَكُمْ مِّنْ نَّفْسٍ
وَّاحِدَةٍ وَّخَلَقَ مِنْهَا زَوْجَهَا وَبَثَّ مِنْهُمَا رِجَالًا كَثِيْرًا
وَّنِسَآءً ۚ وَاتَّقُوا اللّٰهَ الَّذِيْ تَسَآءَلُوْنَ بِهٖ وَالْاَرْحَامَ ۭ
اِنَّ اللّٰهَ كَانَ عَلَيْكُمْ رَقِيْبًا ②

وَاٰتُوا الْيَتٰمٰٓى اَمْوَالَهُمْ ۡ وَلَا تَتَبَدَّلُوا الْخَبِيْثَ بِالطَّيِّبِ ۡ
وَلَا تَاْكُلُوْٓا اَمْوَالَهُمْ اِلٰٓى اَمْوَالِكُمْ ۭ اِنَّهٗ كَانَ حُوْبًا
كَبِيْرًا ③

وَاِنْ خِفْتُمْ اَلَّا تُقْسِطُوْا فِي الْيَتٰمٰى فَانْكِحُوْا مَا طَابَ
لَكُمْ مِّنَ النِّسَآءِ مَثْنٰى وَثُلٰثَ وَرُبٰعَ ۚ فَاِنْ خِفْتُمْ
اَلَّا تَعْدِلُوْا فَوَاحِدَةً اَوْ مَا مَلَكَتْ اَيْمَانُكُمْ ۭ ذٰلِكَ
اَدْنٰٓى اَلَّا تَعُوْلُوْا ۭ ④

وَاٰتُوا النِّسَآءَ صَدُقٰتِهِنَّ نِحْلَةً ۭ فَاِنْ طِبْنَ لَكُمْ
عَنْ شَيْءٍ مِّنْهُ نَفْسًا فَكُلُوْهُ هَنِيْۗـًٔا مَّرِيْۗـًٔا ⑤

وَلَا تُؤْتُوا السُّفَهَاۗءَ اَمْوَالَكُمُ الَّتِيْ جَعَلَ اللّٰهُ لَكُمْ
قِيٰمًا وَّارْزُقُوْهُمْ فِيْهَا وَاكْسُوْهُمْ وَقُوْلُوْا لَهُمْ
قَوْلًا مَّعْرُوْفًا ⑥

وَابْتَلُوا الْيَتٰمٰى حَتّٰٓى اِذَا بَلَغُوا النِّكَاحَ ۚ فَاِنْ اٰنَسْتُمْ
مِّنْهُمْ رُشْدًا فَادْفَعُوْٓا اِلَيْهِمْ اَمْوَالَهُمْ ۚ وَلَا تَاْكُلُوْهَآ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ho vi, homoj, respektegu vian Sinjoron, kiu kreis vin el unu estaĵo; el tiu Li kreis lian kunulinon kaj igis ambaŭ naski multajn virojn kaj virinojn; kaj respektegu Allahon, per kies nomo vi reciproke petas favorojn, kaj respektu viajn patrinojn. Vere Allah gardas vin.

3. Donu iliajn proprajĵojn al la orfoj kaj ne miksu viajn malbonajn havaĵojn kun iliaj bonaj. Ne konsumu iliajn proprajĵojn kune kun viaj. Tio vere estus grava peko.

4. Se vi timas, ke vi ne kapablos agi juste kontraŭ la orfoj, tiam edziĝu al virinoj, kiuj plaĉas al vi, du aŭ tri aŭ kvar*; se vi tamen timas, ke vi ne kapablos agi juste, tiam nur unu aŭ nur tiun, kiun posedas via mano dekstra**. Tiel vi povos eviti la maljustecon.

5. Donu volonte al la virinoj iliajn dotojn; se ili tamen forlasos ion por vi, tiam ĝuu tion agrable kaj trankvile.

6. Ne donu al la stultuloj la havaĵojn, kiujn Allah donis al vi por via vivteno; male, nutru ilin el tiuj havaĵoj kaj vestu ilin kaj parolu al ili per konvenaj vortoj.

---

* En ĉi tiu verso estas fiksita la principo de la poligamio: permeso edziĝi al maksimume kvar virinoj, kaj tio precipe kiel ilo por forigi maljustecon kontraŭ la orfoj, kiuj estis tre multenombraj post la militoj.

** sklavinon

إِسْرَافًا وَبِدَارًا أَنْ يَكْبَرُوا ۚ وَمَنْ كَانَ غَنِيًّا فَلْيَسْتَعْفِفْ ۖ
وَمَنْ كَانَ فَقِيرًا فَلْيَأْكُلْ بِالْمَعْرُوفِ ۚ فَإِذَا دَفَعْتُمْ
إِلَيْهِمْ أَمْوَالَهُمْ فَأَشْهِدُوا عَلَيْهِمْ ۚ وَكَفَىٰ بِاللَّهِ حَسِيبًا ۝٦
لِلرِّجَالِ نَصِيبٌ مِمَّا تَرَكَ الْوَالِدَانِ وَالْأَقْرَبُونَ وَلِلنِّسَاءِ نَصِيبٌ مِمَّا
تَرَكَ الْوَالِدَانِ وَالْأَقْرَبُونَ مِمَّا قَلَّ مِنْهُ أَوْ كَثُرَ ۚ نَصِيبًا مَفْرُوضًا ۝٧
وَإِذَا حَضَرَ الْقِسْمَةَ أُولُو الْقُرْبَىٰ وَالْيَتَامَىٰ وَالْمَسَاكِينُ
فَارْزُقُوهُمْ مِنْهُ وَقُولُوا لَهُمْ قَوْلًا مَعْرُوفًا ۝٨
وَلْيَخْشَ الَّذِينَ لَوْ تَرَكُوا مِنْ خَلْفِهِمْ ذُرِّيَّةً ضِعَافًا
خَافُوا عَلَيْهِمْ ۖ فَلْيَتَّقُوا اللَّهَ وَلْيَقُولُوا قَوْلًا سَدِيدًا ۝٩
إِنَّ الَّذِينَ يَأْكُلُونَ أَمْوَالَ الْيَتَامَىٰ ظُلْمًا إِنَّمَا يَأْكُلُونَ
فِي بُطُونِهِمْ نَارًا ۖ وَسَيَصْلَوْنَ سَعِيرًا ۝١٠ ع
يُوصِيكُمُ اللَّهُ فِي أَوْلَادِكُمْ ۖ لِلذَّكَرِ مِثْلُ حَظِّ الْأُنْثَيَيْنِ ۚ
فَإِنْ كُنَّ نِسَاءً فَوْقَ اثْنَتَيْنِ فَلَهُنَّ ثُلُثَا مَا تَرَكَ ۖ
وَإِنْ كَانَتْ وَاحِدَةً فَلَهَا النِّصْفُ ۚ وَلِأَبَوَيْهِ لِكُلِّ
وَاحِدٍ مِنْهُمَا السُّدُسُ مِمَّا تَرَكَ إِنْ كَانَ لَهُ وَلَدٌ ۚ
فَإِنْ لَمْ يَكُنْ لَهُ وَلَدٌ وَوَرِثَهُ أَبَوَاهُ فَلِأُمِّهِ الثُّلُثُ ۚ
فَإِنْ كَانَ لَهُ إِخْوَةٌ فَلِأُمِّهِ السُّدُسُ مِنْ بَعْدِ وَصِيَّةٍ
يُوصِي بِهَا أَوْ دَيْنٍ ۗ آبَاؤُكُمْ وَأَبْنَاؤُكُمْ لَا تَدْرُونَ
أَيُّهُمْ أَقْرَبُ لَكُمْ نَفْعًا ۚ فَرِيضَةً مِنَ اللَّهِ ۗ إِنَّ اللَّهَ كَانَ
عَلِيمًا حَكِيمًا ۝١١
وَلَكُمْ نِصْفُ مَا تَرَكَ أَزْوَاجُكُمْ إِنْ لَمْ يَكُنْ لَهُنَّ
وَلَدٌ ۚ فَإِنْ كَانَ لَهُنَّ وَلَدٌ فَلَكُمُ الرُّبُعُ مِمَّا تَرَكْنَ

7. Elprovu la orfojn, ĝis ili estos edzigeblaj, sed kiam vi perceptos, ke ili jam estas plenaĝaj, tiam redonu al ili iliajn propraĵojn kaj ne konsumu tiujn vi mem malŝpareme kaj rapide, ĉar ili estas plenkreskaj; kiu estas riĉa, tiu forlasu tute; kiu estas malriĉa, tiu uzu tiujn laŭ justeco; kiam vi redonas la propraĵojn al ili, tiam prenu atestantojn en ilia ĉeesto. Allah sufiĉas por la juĝo.

8. Al la viroj apartenas parto de tio, kion postlasas la gepatroj kaj la parencoj, kaj al la virinoj ankaŭ parto de tio, kion postlasas la gepatroj kaj la parencoj – ĉu multe aŭ malmulte –, difinita parto.

9. Se poste partoprenas aliaj parencoj kaj orfoj aŭ malriĉuloj je la heredaĵo, tiam donu al ili iom da tio kaj diru al ili konvenajn vortojn.

10. Timu tiuj, kiuj postlasas malfortajn idojn, se ili havas zorgojn pri ili: ili respektegu Allahon kaj diru justajn vortojn.

11. Tiuj, kiuj maljuste uzas por si mem la propraĵojn de la orfoj, nur plenigas siajn ventrojn per fajro, kaj ili eniros en la flamojn.

12. Allah ordonas al vi pri viaj idoj: vira ricevu la samon kiel du virinaj; se tamen estos nur virinaj, pli ol du, tiam ili ricevu du trionojn de la heredaĵo; se estas nur unu, ŝi ricevu la duonon. Por la gepatroj estu po sesono de la heredaĵo, se la mortinto havas idon; se li tamen ne havas idon kaj la gepatroj estas la heredantoj, tiam ricevu la patrino trionon; se li havas gefratojn, tiam ricevu la patrino sesonon, post kiam ĉiuj heredaj donacoj aŭ ŝuldoj estos pagitaj. El viaj gepatroj kaj idoj vi ne scias, kiu estas pli proksima al vi. Tiu estas ordono de Allah. Vere Allah estas ĉioscia, saĝa.

مِنۢ بَعْدِ وَصِيَّةٍ يُوصِينَ بِهَآ أَوْ دَيْنٍ وَلَهُنَّ ٱلرُّبُعُ
مِمَّا تَرَكْتُمْ إِن لَّمْ يَكُن لَّكُمْ وَلَدٌ ۚ فَإِن كَانَ لَكُمْ وَلَدٌ
فَلَهُنَّ ٱلثُّمُنُ مِمَّا تَرَكْتُم مِّنۢ بَعْدِ وَصِيَّةٍ تُوصُونَ
بِهَآ أَوْ دَيْنٍ ۗ وَإِن كَانَ رَجُلٌ يُورَثُ كَلَٰلَةً أَوِ ٱمْرَأَةٌ
وَلَهُۥٓ أَخٌ أَوْ أُخْتٌ فَلِكُلِّ وَٰحِدٍ مِّنْهُمَا ٱلسُّدُسُ ۚ فَإِن
كَانُوٓا۟ أَكْثَرَ مِن ذَٰلِكَ فَهُمْ شُرَكَآءُ فِى ٱلثُّلُثِ مِنۢ
بَعْدِ وَصِيَّةٍ يُوصَىٰ بِهَآ أَوْ دَيْنٍ ۙ غَيْرَ مُضَآرٍّ ۚ وَصِيَّةً
مِّنَ ٱللَّهِ ۗ وَٱللَّهُ عَلِيمٌ حَلِيمٌ ﴿١٢﴾

تِلْكَ حُدُودُ ٱللَّهِ ۚ وَمَن يُطِعِ ٱللَّهَ وَرَسُولَهُۥ يُدْخِلْهُ
جَنَّٰتٍ تَجْرِى مِن تَحْتِهَا ٱلْأَنْهَٰرُ خَٰلِدِينَ فِيهَا ۚ وَ
ذَٰلِكَ ٱلْفَوْزُ ٱلْعَظِيمُ ﴿١٣﴾

وَمَن يَعْصِ ٱللَّهَ وَرَسُولَهُۥ وَيَتَعَدَّ حُدُودَهُۥ يُدْخِلْهُ
نَارًا خَٰلِدًا فِيهَا ۖ وَلَهُۥ عَذَابٌ مُّهِينٌ ﴿١٤﴾ ع ١٤

وَٱلَّٰتِى يَأْتِينَ ٱلْفَٰحِشَةَ مِن نِّسَآئِكُمْ فَٱسْتَشْهِدُوا۟
عَلَيْهِنَّ أَرْبَعَةً مِّنكُمْ ۖ فَإِن شَهِدُوا۟ فَأَمْسِكُوهُنَّ
فِى ٱلْبُيُوتِ حَتَّىٰ يَتَوَفَّىٰهُنَّ ٱلْمَوْتُ أَوْ يَجْعَلَ ٱللَّهُ
لَهُنَّ سَبِيلًا ﴿١٥﴾

وَٱلَّذَانِ يَأْتِيَٰنِهَا مِنكُمْ فَـَٔاذُوهُمَا ۖ فَإِن تَابَا وَأَصْلَحَا
فَأَعْرِضُوا۟ عَنْهُمَآ ۗ إِنَّ ٱللَّهَ كَانَ تَوَّابًا رَّحِيمًا ﴿١٦﴾

إِنَّمَا ٱلتَّوْبَةُ عَلَى ٱللَّهِ لِلَّذِينَ يَعْمَلُونَ ٱلسُّوٓءَ بِجَهَٰلَةٍ
ثُمَّ يَتُوبُونَ مِن قَرِيبٍ فَأُو۟لَٰٓئِكَ يَتُوبُ ٱللَّهُ عَلَيْهِمْ ۗ
وَكَانَ ٱللَّهُ عَلِيمًا حَكِيمًا ﴿١٧﴾

13. Por vi estu duono de la heredaĵo de viaj edzinoj, se ili ne havas infanon; se ili tamen havas infanon, tiam vi ricevu kvaronon de la heredaĵo, post kiam ĉiuj heredaj donacoj aŭ ŝuldoj estos pagitaj; viaj edzinoj tamen ricevu kvaronon de via heredaĵo, se vi ne havas infanon; se vi male havas infanon, tiam ili ricevu okonon de via heredaĵo, post kiam ĉiuj heredaj donacoj aŭ ŝuldoj estos pagitaj; se viro aŭ virino ne havas gepatrojn nek gefilojn, sed havas fraton aŭ fratinon, tiam ricevu ili po sesonon. Se ili tamen estas pli multenombraj, tiam ili dividu inter si ĝuste unu trionon, post kiam ĉiuj heredaj donacoj aŭ ŝuldoj estos pagitaj, sen malavantaĝo por iu ajn el ili. Tiu estas la ordono de Allah. Allah estas ĉioscia, saĝa.

14. Tiuj estas la limoj de Allah; tiun, kiu obeas Allahon kaj Lian senditon, Li kondukos en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj; tie li restos por ĉiam, kaj tio estas granda feliĉo.

15. Tiun, kiu male rifuzas obei Allahon kaj Lian sendi:ton kaj transpaŝas Liajn limojn, Li kondukos en la fajron, kie li restos por ĉiam. Por li estos hontiga puno.

16. Se iu el viaj virinoj plenumos hontindaĵojn, estu vokitaj kvar atestantoj el vi; se ĉi tiuj atestos, tiam vi fermu la kulpulinon en la domo, ĝis ŝin atingos la morto aŭ Allah estigos rimedon por ŝi.

17. Se du viroj el vi plenumos tian agon, tiam punu ilin ambaŭ; se ili tamen pentos kaj pliboniĝos, tiam pardonu al ili; vere Allah estas kompatema, pardonema.

18. Vere la pardono de Allah estas por tiuj, kiuj nescie agas malbone kaj poste tuj pentas. Al ili turnas Sin Allah kompateme. Vere Allah estas ĉioscia, saĝa.

19. La pardono ne estas por tiuj, kiuj ĉiam agas malbone ĝis la fino, kiam, se la morto alproksimiĝas al iu el ili, tiu diras: "Vere nun mi pentas", nek por tiuj, kiuj miskredante mortas. Por ili Ni pretigis doloran punon.

وَلَيْسَتِ التَّوْبَةُ لِلَّذِينَ يَعْمَلُونَ السَّيِّاٰتِ ۚ حَتّٰٓى إِذَا
حَضَرَ أَحَدَهُمُ الْمَوْتُ قَالَ إِنِّي تُبْتُ الْـٰٔنَ وَلَا
الَّذِينَ يَمُوتُونَ وَهُمْ كُفَّارٌ ۚ أُولٰٓئِكَ أَعْتَدْنَا
لَهُمْ عَذَابًا أَلِيمًا ﴿١٨﴾

20. Ho vi, kredantoj! Al vi ne estas permesite heredi de virinoj kontraŭ ilia volo, nek estas al vi permesite teni ilin malrajte por preni de ili parton de tio, kion vi antaŭe donis al ili, krom se ili laŭ publika scio plenumis hontindaĵojn. Do agu juste kontraŭ ili. Se vi malŝatas ilin, jen pripensu, estas eble, ke vi malŝatas ion, en kion Allah metis grandegan bonon por vi.

يَٰٓأَيُّهَا الَّذِينَ اٰمَنُوا لَا يَحِلُّ لَكُمْ أَنْ تَرِثُوا النِّسَآءَ كَرْهًا ۖ
وَلَا تَعْضُلُوهُنَّ لِتَذْهَبُوا بِبَعْضِ مَآ اٰتَيْتُمُوهُنَّ
إِلَّآ أَنْ يَأْتِينَ بِفَٰحِشَةٍ مُّبَيِّنَةٍ ۚ وَعَاشِرُوهُنَّ بِالْمَعْرُوفِ ۚ
فَإِنْ كَرِهْتُمُوهُنَّ فَعَسٰٓى أَنْ تَكْرَهُوا شَيْـًٔا وَيَجْعَلَ اللَّهُ
فِيهِ خَيْرًا كَثِيرًا ﴿١٩﴾

21. Se vi deziros ŝanĝi edzinon kontraŭ alia, kaj vi jam donis al ŝi trezoron, ne forprenu de ŝi ion ajn; ĉu vi volus forpreni de ili per mensogo kaj evidenta peko?

وَإِنْ أَرَدْتُمُ اسْتِبْدَالَ زَوْجٍ مَّكَانَ زَوْجٍ ۙ وَ
اٰتَيْتُمْ إِحْدٰىهُنَّ قِنطَارًا فَلَا تَأْخُذُوا مِنْهُ شَيْـًٔا ۚ
أَتَأْخُذُونَهُۥ بُهْتَٰنًا وَإِثْمًا مُّبِينًا ﴿٢٠﴾

22. Kiel vi povus forpreni ion ajn de ili? Vi vere fariĝis unu kun ili, kaj ili ricevis de vi firman promeson!

وَكَيْفَ تَأْخُذُونَهُۥ وَقَدْ أَفْضٰى بَعْضُكُمْ إِلٰى بَعْضٍ
وَأَخَذْنَ مِنكُم مِّيثَٰقًا غَلِيظًا ﴿٢١﴾

23. Ne edziĝu al virinoj al kiuj viaj patroj antaŭe edziĝis, krom se tio jam okazis*. Tio estas vere hontindaĵo, skandala, malbonega kutimo!

وَلَا تَنكِحُوا مَا نَكَحَ اٰبَآؤُكُم مِّنَ النِّسَآءِ إِلَّا مَا قَدْ
سَلَفَ ۚ إِنَّهُۥ كَانَ فَٰحِشَةً وَمَقْتًا ۖ وَسَآءَ سَبِيلًا ﴿٢٢﴾ ع ١٤

24. Estas malpermesitaj al vi viaj patrinoj kaj viaj fratinoj, la fratinoj de via patro kaj de via patrino, kaj la filinoj de viaj fratoj kaj fratinoj, viaj nutristinoj kaj laktofratinoj kaj la patrinoj de viaj edzinoj kaj la duonfilinoj – kiuj estas sub via protekto – de viaj edzinoj, kun kiuj vi jam unuiĝis (se vi tamen ankoraŭ ne unuiĝis kun ili, tiam ne estas peko por vi). Krom tio la virinoj de viaj filoj, kiuj naskiĝis de vi; same estas malpermesite samtempe posedi du fratinojn, krom se tio jam okazis. Vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

حُرِّمَتْ عَلَيْكُمْ أُمَّهَٰتُكُمْ وَبَنَاتُكُمْ وَأَخَوَٰتُكُمْ وَعَمَّٰتُكُمْ
وَخَٰلَٰتُكُمْ وَبَنَاتُ الْأَخِ وَبَنَاتُ الْأُخْتِ وَأُمَّهَٰتُكُمُ
الَّٰتِىٓ أَرْضَعْنَكُمْ وَأَخَوَٰتُكُم مِّنَ الرَّضَٰعَةِ وَأُمَّهَٰتُ
نِسَآئِكُمْ وَرَبَٰٓئِبُكُمُ الَّٰتِى فِى حُجُورِكُم مِّن نِّسَآئِكُمُ
الَّٰتِى دَخَلْتُم بِهِنَّ ۖ فَإِن لَّمْ تَكُونُوا دَخَلْتُم بِهِنَّ فَلَا
جُنَاحَ عَلَيْكُمْ ۖ وَحَلَٰٓئِلُ أَبْنَآئِكُمُ الَّذِينَ مِنْ

* Fino de la 4-a parto

* t.e.: antaŭ la revelacio de ĉi tiu malpermeso

اَصْلَابِكُمْ ۙ وَاَنْ تَجْمَعُوْا بَيْنَ الْاُخْتَيْنِ اِلَّا مَا قَدْ
سَلَفَ ۗ اِنَّ اللّٰهَ كَانَ غَفُوْرًا رَّحِيْمًا ﴿٢٣﴾

وَّالْمُحْصَنٰتُ مِنَ النِّسَآءِ اِلَّا مَا مَلَكَتْ اَيْمَانُكُمْ ۚ
كِتٰبَ اللّٰهِ عَلَيْكُمْ ۚ وَاُحِلَّ لَكُمْ مَّا وَرَآءَ ذٰلِكُمْ اَنْ
تَبْتَغُوْا بِاَمْوَالِكُمْ مُّحْصِنِيْنَ غَيْرَ مُسٰفِحِيْنَ ۭ فَمَا
اسْتَمْتَعْتُمْ بِهٖ مِنْهُنَّ فَاٰتُوْهُنَّ اُجُوْرَهُنَّ فَرِيْضَةً ۭ
وَلَا جُنَاحَ عَلَيْكُمْ فِيْمَا تَرٰضَيْتُمْ بِهٖ مِنْۢ بَعْدِ الْفَرِيْضَةِ ۭ
اِنَّ اللّٰهَ كَانَ عَلِيْمًا حَكِيْمًا ﴿٢٤﴾

وَمَنْ لَّمْ يَسْتَطِعْ مِنْكُمْ طَوْلًا اَنْ يَّنْكِحَ الْمُحْصَنٰتِ
الْمُؤْمِنٰتِ فَمِنْ مَّا مَلَكَتْ اَيْمَانُكُمْ مِّنْ فَتَيٰتِكُمُ
الْمُؤْمِنٰتِ ۭ وَاللّٰهُ اَعْلَمُ بِاِيْمَانِكُمْ ۭ بَعْضُكُمْ مِّنْ
بَعْضٍ ۚ فَانْكِحُوْهُنَّ بِاِذْنِ اَهْلِهِنَّ وَاٰتُوْهُنَّ
اُجُوْرَهُنَّ بِالْمَعْرُوْفِ مُحْصَنٰتٍ غَيْرَ مُسٰفِحٰتٍ
وَّلَا مُتَّخِذٰتِ اَخْدَانٍ ۚ فَاِذَآ اُحْصِنَّ فَاِنْ اَتَيْنَ
بِفَاحِشَةٍ فَعَلَيْهِنَّ نِصْفُ مَا عَلَي الْمُحْصَنٰتِ مِنَ
الْعَذَابِ ۭ ذٰلِكَ لِمَنْ خَشِيَ الْعَنَتَ مِنْكُمْ ۭ وَاَنْ
تَصْبِرُوْا خَيْرٌ لَّكُمْ ۭ وَاللّٰهُ غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ﴿٢٥﴾

يُرِيْدُ اللّٰهُ لِيُبَيِّنَ لَكُمْ وَيَهْدِيَكُمْ سُنَنَ الَّذِيْنَ
مِنْ قَبْلِكُمْ وَيَتُوْبَ عَلَيْكُمْ ۭ وَاللّٰهُ عَلِيْمٌ حَكِيْمٌ ﴿٢٦﴾

وَاللّٰهُ يُرِيْدُ اَنْ يَّتُوْبَ عَلَيْكُمْ وَيُرِيْدُ الَّذِيْنَ يَتَّبِعُوْنَ
الشَّهَوٰتِ اَنْ تَمِيْلُوْا مَيْلًا عَظِيْمًا ﴿٢٧﴾

يُرِيْدُ اللّٰهُ اَنْ يُّخَفِّفَ عَنْكُمْ ۚ وَخُلِقَ الْاِنْسَانُ ضَعِيْفًا ﴿٢٨﴾

25. Malpermesitaj ankaŭ estas al vi virinoj, kiuj havas alian edzon, krom tiuj, kiujn posedas via mano dekstra. Tio estas dekreto de Allah por vi. Ĉiuj aliaj estas permesitaj al vi, por ke vi ilin serĉu per la iloj de viaj propraĵoj, tamen por edziĝi al ili kaj ne adulte. Pro la ĝojoj, kiujn vi ricevos de ili, donu al ili doton, kiel estas ordonite. Ne estos tamen kulpo por vi, se vi reciproke konsentos alie ol ordonite. Vere Allah estas ĉioscia, saĝa.

26. Kiu el vi ne posedos sufiĉe da propraĵoj por edziĝi al liberaj kredantaj virinoj, tiu edziĝu al tiuj, kiujn posedas lia mano dekstra, nome al kredantaj sklavinoj. Allah konas vian kredon. Ĉiu el vi estas de la alia, do edziĝu al ili se ilia gento permesas, kaj donu al ili doton laŭ justeco, se ili estas ĉastaj, ne adultas kaj ne havas amantojn kaŝe. Se tamen ili plenumos hontindaĵon, post kiam ili edziniĝis, tiam ili ricevu la duonon de la puno, kiu estas ordonita por libera virino. Tio validas por tiu el vi, kiu timas la punon. Se vi tamen estos sindetenemaj, estos eĉ pli bone por vi. Allah estas senkulpigema, pardonema.

27. Allah volas klarigi al vi tion kaj gvidi vin sur la vojojn de tiuj, kiuj estis antaŭe, kaj turni Sin al vi; Allah estas ĉioscia, saĝa.

28. Allah volas turni Sin al vi kompateme sed tiuj, kiuj sekvas la malbonajn dezirojn, volas deklini vin malproksimen de la rekta vojo.

29. Allah volas senŝarĝigi vin; fakte la homoj estis kreitaj malfortaj.

يَاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا لَا تَاْكُلُوْٓا اَمْوَالَكُمْ بَيْنَكُمْ
بِالْبَاطِلِ اِلَّآ اَنْ تَكُوْنَ تِجَارَةً عَنْ تَرَاضٍ مِّنْكُمْ ۣ
وَلَا تَقْتُلُوْٓا اَنْفُسَكُمْ ۭ اِنَّ اللّٰهَ كَانَ بِكُمْ رَحِيْمًا ﴿٢٩﴾
وَمَنْ يَّفْعَلْ ذٰلِكَ عُدْوَانًا وَّظُلْمًا فَسَوْفَ نُصْلِيْهِ
نَارًا ۭ وَكَانَ ذٰلِكَ عَلَي اللّٰهِ يَسِيْرًا ﴿٣٠﴾
اِنْ تَجْتَنِبُوْا كَبَاۗىِٕرَ مَا تُنْهَوْنَ عَنْهُ نُكَفِّرْ عَنْكُمْ سَيِّاٰتِكُمْ
وَنُدْخِلْكُمْ مُّدْخَلًا كَرِيْمًا ﴿٣١﴾
وَلَا تَتَمَنَّوْا مَا فَضَّلَ اللّٰهُ بِهٖ بَعْضَكُمْ عَلٰي بَعْضٍ ۭ
لِلرِّجَالِ نَصِيْبٌ مِّمَّا اكْتَسَبُوْا ۭ وَلِلنِّسَاۗءِ نَصِيْبٌ مِّمَّا
اكْتَسَبْنَ ۭ وَاسْـَٔـلُوا اللّٰهَ مِنْ فَضْلِهٖ ۭ اِنَّ اللّٰهَ كَانَ
بِكُلِّ شَيْءٍ عَلِيْمًا ﴿٣٢﴾
وَلِكُلٍّ جَعَلْنَا مَوَالِيَ مِمَّا تَرَكَ الْوَالِدٰنِ وَالْاَقْرَبُوْنَ ۭ
وَالَّذِيْنَ عَقَدَتْ اَيْمَانُكُمْ فَاٰتُوْهُمْ نَصِيْبَهُمْ ۭ اِنَّ
108. Kaj se Allah volus, ili ne estus aldonintaj rivalojn al Li. Kaj Ni ne faris vin gardanto super ili, kaj vi ne estas super ili gardanto.

وَاَقْسَمُوْا بِاللّٰهِ جَهْدَ اَيْمَانِهِمْ لَىِٕنْ جَاۗءَتْهُمْ اٰيَةٌ لَّيُؤْمِنُنَّ بِهَا ۭ قُلْ اِنَّمَا الْاٰيٰتُ عِنْدَ اللّٰهِ ۭ وَمَا يُشْعِرُكُمْ ۙ اَنَّهَآ اِذَا جَاۗءَتْ لَا يُؤْمِنُوْنَ ﴿١٠٩﴾

109. Ne insultu tiujn, kiujn ili alvokis aldone al Allah, por ke ili ne insultu Allahon venĝe en sia nescio. Tiel Ni igis iliajn agojn ŝajni bonaj. Poste al ilia Sinjoro fariĝos la reveno, kaj Ni sciigos ilin pri tio, kion ili faris.

وَنُقَلِّبُ اَفْـِٕدَتَهُمْ وَاَبْصَارَهُمْ كَمَا لَمْ يُؤْمِنُوْا بِهٖٓ اَوَّلَ مَرَّةٍ وَّنَذَرُهُمْ فِيْ طُغْيَانِهِمْ يَعْمَهُوْنَ ﴿١١٠﴾ ع ١٥

110. Ili ĵuras per Allah siajn plej gravajn ĵurojn, ke, se venus al ili signo, ili kredus je ĝi. Diru: "Certe, estas signoj ĉe Allah, sed kio komprenigas vin, ke – kiam la signoj venas – tamen ili ne kredas? ".

وَلَوْ اَنَّنَا نَزَّلْنَآ اِلَيْهِمُ الْمَلٰۗىِٕكَةَ وَكَلَّمَهُمُ الْمَوْتٰى وَحَشَرْنَا عَلَيْهِمْ كُلَّ شَيْءٍ قُبُلًا مَّا كَانُوْا لِيُؤْمِنُوْٓا اِلَّآ اَنْ يَّشَاۗءَ اللّٰهُ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَهُمْ يَجْهَلُوْنَ ﴿١١١﴾

111. Ni konfuzos iliajn animojn kaj iliajn okulojn, ĉar ili ne kredis je ĝi unuafoje, kaj Ni lasos ilin vagadi en sia peko kiel blindulojn.

* Fino de la 7-a parto

وَكَذٰلِكَ جَعَلْنَا لِكُلِّ نَبِيٍّ عَدُوًّا شَيٰطِيْنَ الْاِنْسِ وَالْجِنِّ يُوْحِيْ بَعْضُهُمْ اِلٰى بَعْضٍ زُخْرُفَ الْقَوْلِ غُرُوْرًا ۭ وَلَوْ شَاۗءَ رَبُّكَ مَا فَعَلُوْهُ فَذَرْهُمْ وَمَا يَفْتَرُوْنَ ﴿١١٢﴾

112. Eĉ se Ni sendus al ili anĝelojn kaj igus la mortintojn paroli al ili kaj kunvenigus ĉiujn aĵojn al ili vidalvide, ili ne kredus, krom se Allah volus. Tamen ili kondutas malprudente.

وَلِتَصْغٰٓى اِلَيْهِ اَفْـِٕدَةُ الَّذِيْنَ لَا يُؤْمِنُوْنَ بِالْاٰخِرَةِ وَلِيَرْضَوْهُ وَلِيَقْتَرِفُوْا مَا هُمْ مُّقْتَرِفُوْنَ ﴿١١٣﴾

113. Tiel Ni estigis kontraŭ ĉiu profeto malamikon, Satanon de la homoj kaj de la Ĝinnoj. Ili sugestas unu al alia falsajn parolojn por trompi. Se via Sinjoro estus volinta, ili ne estus farintaj tion; do lasu ilin ĉe iliaj elpensaĵoj,

اَفَغَيْرَ اللّٰهِ اَبْتَغِيْ حَكَمًا وَّهُوَ الَّذِيْٓ اَنْزَلَ اِلَيْكُمُ الْكِتٰبَ مُفَصَّلًا ۭ وَالَّذِيْنَ اٰتَيْنٰهُمُ الْكِتٰبَ يَعْلَمُوْنَ اَنَّهٗ مُنَزَّلٌ مِّنْ رَّبِّكَ بِالْحَقِّ فَلَا تَكُوْنَنَّ مِنَ الْمُمْتَرِيْنَ ﴿١١٤﴾

114. por ke la koroj de tiuj, kiuj ne kredas al la vivo venonta, turnu sin al ĝi, kaj por ke al ili plaĉu tio, kaj por ke ili plue meritu, kion ili meritas.

وَتَمَّتْ كَلِمَتُ رَبِّكَ صِدْقًا وَّعَدْلًا ۭ لَا مُبَدِّلَ

لِكَلِمٰتِهٖ ۚ وَهُوَ السَّمِيْعُ الْعَلِيْمُ ﴿١١٥﴾

وَاِنْ تُطِعْ اَكْثَرَ مَنْ فِى الْاَرْضِ يُضِلُّوْكَ عَنْ
سَبِيْلِ اللّٰهِ ۭ اِنْ يَّتَّبِعُوْنَ اِلَّا الظَّنَّ وَاِنْ هُمْ
اِلَّا يَخْرُصُوْنَ ﴿١١٦﴾

اِنَّ رَبَّكَ هُوَ اَعْلَمُ مَنْ يَّضِلُّ عَنْ سَبِيْلِهٖ ۚ وَهُوَ
اَعْلَمُ بِالْمُهْتَدِيْنَ ﴿١١٧﴾

فَكُلُوْا مِمَّا ذُكِرَ اسْمُ اللّٰهِ عَلَيْهِ اِنْ كُنْتُمْ بِاٰيٰتِهٖ
مُؤْمِنِيْنَ ﴿١١٨﴾

وَمَا لَكُمْ اَلَّا تَاْكُلُوْا مِمَّا ذُكِرَ اسْمُ اللّٰهِ عَلَيْهِ وَ
قَدْ فَصَّلَ لَكُمْ مَّا حَرَّمَ عَلَيْكُمْ اِلَّا مَا اضْطُرِرْتُمْ
اِلَيْهِ ۭ وَاِنَّ كَثِيْرًا لَّيُضِلُّوْنَ بِاَهْوَآئِهِمْ بِغَيْرِ عِلْمٍ ۭ
اِنَّ رَبَّكَ هُوَ اَعْلَمُ بِالْمُعْتَدِيْنَ ﴿١١٩﴾

وَذَرُوْا ظَاهِرَ الْاِثْمِ وَبَاطِنَهٗ ۭ اِنَّ الَّذِيْنَ يَكْسِبُوْنَ
الْاِثْمَ سَيُجْزَوْنَ بِمَا كَانُوْا يَقْتَرِفُوْنَ ﴿١٢٠﴾

وَلَا تَاْكُلُوْا مِمَّا لَمْ يُذْكَرِ اسْمُ اللّٰهِ عَلَيْهِ وَاِنَّهٗ
لَفِسْقٌ ۭ وَاِنَّ الشَّيٰطِيْنَ لَيُوْحُوْنَ اِلٰٓى اَوْلِيٰٓـئِهِمْ
لِيُجَادِلُوْكُمْ ۚ وَاِنْ اَطَعْتُمُوْهُمْ اِنَّكُمْ لَمُشْرِكُوْنَ ﴿١٢١﴾ ع

اَوَمَنْ كَانَ مَيْتًا فَاَحْيَيْنٰهُ وَجَعَلْنَا لَهٗ نُوْرًا
يَّمْشِيْ بِهٖ فِى النَّاسِ كَمَنْ مَّثَلُهٗ فِى الظُّلُمٰتِ لَيْسَ
بِخَارِجٍ مِّنْهَا ۭ كَذٰلِكَ زُيِّنَ لِلْكٰفِرِيْنَ مَا كَانُوْا
يَعْمَلُوْنَ ﴿١٢٢﴾

وَكَذٰلِكَ جَعَلْنَا فِىْ كُلِّ قَرْيَةٍ اَكٰبِرَ مُجْرِمِيْهَا لِيَمْكُرُوْا

115. Ĉu mi serĉus kiel juĝanton iun alian ol Allahon? Li ja sendis al vi la Libron klarigitan! Kaj tiuj, al kiuj Ni donis la Libron, scias, ke ĝi estis sendita de via Sinjoro kun la vero. Do ne estu dubanto.

116. La vorto de via Sinjoro plenumiĝis en vereco kaj justeco. Lian vorton neniu kapablos ŝanĝi. Li estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia.

117. Se vi sekvos la plej multajn el tiuj, kiuj estas sur la tero, ili deklinos vin de la vojo de Allah. Ili sekvas nur tion, kion ili divenas, kaj ili nur mensogas.

118. Vere via Sinjoro bone konas tiujn, kiuj deflankiĝas de Lia vojo, kaj Li konas la gvidatojn.

119. Manĝu do tion, super kio estis alvokita la nomo de Allah, se vi estas kredantoj je Liaj signoj.

120. Kial vi ne manĝus tion, super kio estis alvokita la nomo de Allah? Vere Li klarigis al vi, kion Li malpermesis al vi – krom se vi estas devigitaj – kaj certe multaj deturnas aliajn per siaj malbonaj deziroj kontraŭ la vera scio. Vere, via Sinjoro bone konas la ekscesantojn.

121. Evitu la malkaŝitajn kaj la kaŝitajn pekojn. Vere tiuj, kiuj gajnas pekojn, estos punitaj pro tio, kion ili estos gajnintaj.

122. Ne manĝu tion, super kio ne estis alvokita la nomo de Allah: tio vere estas malobeo. Vere la Satanoj instigas siajn amikojn, por ke ili disputu kun vi. Se vi obeos ilin, vi aldonos rivalojn al Dio.

123. Ĉu povas tiu, kiu mortis, kaj estis poste revivigita de Ni, kaj al kiu Ni donis lumon por iri inter la homoj, esti egala al

tiu, kies kondiĉo estas, ke li troviĝas en mallumo, el kiu li ne povas eliri? Tiel estis farite por la miskredantoj, ke ŝajnu bonaj iliaj agoj.

124. Tiel Ni ankaŭ igis, en ĉiuj urboj, la plej grandajn el ties pekuloj intrigi; ili tamen intrigas nur kontraŭ si mem, sed ili ne komprenas tion.

125. Kiam venas al ili signo, ili diras: "Ni neniam kredos, ĝis estos donita al ni la samo kiel al la senditoj de Allah". Allah bone scias, kiel Li donas Siajn senditaĵojn. Humiliĝo estos por tiuj, kiuj intrigas antaŭ Allah, kaj severa turmento pro ilia intrigado.

126. Tiel Allah gvidas, kiun Li volas; Li plilarĝigas lian bruston por la Islamo kaj Li devojigas, kiun Li volas, mallarĝigante kaj fermante lian bruston, kvazaŭ li suprenirus en la ĉielon. Tiel Allah punas la miskredantojn.

127. Tiu estas la vojo de via Sinjoro, la rekta. Vere Ni klarigis la signojn al la popolo admonita.

128. Por ili estas la Domo de la paco de ilia Sinjoro, kaj Li estas ilia protektanto pro tio, kion ili faris.

129. En la tago, en kiu Li kunvenigos ĉiujn, Li diros: "Ho vi, aro de Ĝinnoj! Vi vere klopodis akiri multajn homojn! ". Kaj iliaj amikoj inter la homoj diros: "Ho nia Sinjoro! Ni profitis unu de la alia kaj nun ni atingis la limtempon, kiun Vi difinis por ni". Li diros: "La fajro estu via loĝejo. Tie vi ĉiam restos, krom se Allah aliĝ volos". Vere via Sinjoro estas la Saĝa, la Cioscia.

130. Tiel Ni metis iujn el la malbonfarantoj super la aliajn pro tio, kion ili meritis.

فِيهَا ۗ وَمَا يَمْكُرُونَ إِلَّا بِأَنفُسِهِمْ وَمَا يَشْعُرُونَ ﴿١٢٣﴾
وَإِذَا جَاءَتْهُمْ آيَةٌ قَالُوا لَن نُّؤْمِنَ حَتَّىٰ نُؤْتَىٰ
مِثْلَ مَا أُوتِيَ رُسُلُ اللَّهِ ۘ اللَّهُ أَعْلَمُ حَيْثُ يَجْعَلُ
رِسَالَتَهُ ۗ سَيُصِيبُ الَّذِينَ أَجْرَمُوا صَغَارٌ عِندَ
اللَّهِ وَعَذَابٌ شَدِيدٌ بِمَا كَانُوا يَمْكُرُونَ ﴿١٢٤﴾
فَمَن يُرِدِ اللَّهُ أَن يَهْدِيَهُ يَشْرَحْ صَدْرَهُ لِلْإِسْلَامِ ۖ
وَمَن يُرِدْ أَن يُضِلَّهُ يَجْعَلْ صَدْرَهُ ضَيِّقًا حَرَجًا
كَأَنَّمَا يَصَّعَّدُ فِي السَّمَاءِ ۚ كَذَٰلِكَ يَجْعَلُ اللَّهُ الرِّجْسَ
عَلَى الَّذِينَ لَا يُؤْمِنُونَ ﴿١٢٥﴾
وَهَٰذَا صِرَاطُ رَبِّكَ مُسْتَقِيمًا ۗ قَدْ فَصَّلْنَا الْآيَاتِ
لِقَوْمٍ يَذَّكَّرُونَ ﴿١٢٦﴾
لَهُمْ دَارُ السَّلَامِ عِندَ رَبِّهِمْ وَهُوَ وَلِيُّهُم بِمَا
كَانُوا يَعْمَلُونَ ﴿١٢٧﴾
وَيَوْمَ يَحْشُرُهُمْ جَمِيعًا ۚ يَا مَعْشَرَ الْجِنِّ قَدِ
اسْتَكْثَرْتُم مِّنَ الْإِنسِ ۖ وَقَالَ أَوْلِيَاؤُهُم مِّنَ
الْإِنسِ رَبَّنَا اسْتَمْتَعَ بَعْضُنَا بِبَعْضٍ وَبَلَغْنَا
أَجَلَنَا الَّذِي أَجَّلْتَ لَنَا ۚ قَالَ النَّارُ مَثْوَاكُمْ
خَالِدِينَ فِيهَا إِلَّا مَا شَاءَ اللَّهُ ۗ إِنَّ رَبَّكَ حَكِيمٌ
عَلِيمٌ ﴿١٢٨﴾
وَكَذَٰلِكَ نُوَلِّي بَعْضَ الظَّالِمِينَ بَعْضًا بِمَا كَانُوا
يَكْسِبُونَ ﴿١٢٩﴾ ع
يَا مَعْشَرَ الْجِنِّ وَالْإِنسِ أَلَمْ يَأْتِكُمْ رُسُلٌ مِّنكُمْ

131. "Ho vi aro de Ĝinnoj kaj de Homoj! Ĉu ne venis al vi senditoj el via mezo, kiuj anoncis al vi Miajn signojn kaj admonis vin pri la renkonto de ĉi tiu tago? ". Ili diros: "Ni atestas kontraŭ ni mem". Kaj la vivo de ĉi tiu mondo trompis ilin. Kaj ili atestos kontraŭ si mem, ĉar ili estis miskredantoj.

يَقُصُّوْنَ عَلَيْكُمْ اٰيٰتِيْ وَ يُنْذِرُوْنَكُمْ لِقَآءَ يَوْمِكُمْ
هٰذَا ؕ قَالُوْا شَهِدْنَا عَلٰٓى اَنْفُسِنَا وَغَرَّتْهُمُ الْحَيٰوةُ
الدُّنْيَا وَ شَهِدُوْا عَلٰٓى اَنْفُسِهِمْ اَنَّهُمْ كَانُوْا كٰفِرِيْنَ ﴿١٣٠﴾

132. Tio estas, ĉar via Sinjoro ne volis detrui maljuste la urbojn, dum iliaj loĝantoj ankoraŭ ne estis admonitaj.

ذٰلِكَ اَنْ لَّمْ يَكُنْ رَّبُّكَ مُهْلِكَ الْقُرٰى بِظُلْمٍ وَّ
اَهْلُهَا غٰفِلُوْنَ ﴿١٣١﴾

133. Por ĉiuj rangoj estos laŭ tio, kion ili faris. Via Sinjoro ne malzorgas pri tio, kion ili faris.

وَ لِكُلٍّ دَرَجٰتٌ مِّمَّا عَمِلُوْا ؕ وَمَا رَبُّكَ بِغَافِلٍ عَمَّا
يَعْمَلُوْنَ ﴿١٣٢﴾

134. Via Sinjoro estas memsufiĉa, plena je graco. Li povus neniigi vin, se Li volus, kaj estigi post vi, kion Li volus, kiel Li estigis vin el idaro de alia popolo.

وَ رَبُّكَ الْغَنِيُّ ذُو الرَّحْمَةِ ؕ اِنْ يَّشَاْ يُذْهِبْكُمْ
وَيَسْتَخْلِفْ مِنْۢ بَعْدِكُمْ مَّا يَشَآءُ كَمَآ اَنْشَاَكُمْ
مِّنْ ذُرِّيَّةِ قَوْمٍ اٰخَرِيْنَ ﴿١٣٣﴾

135. Certe, tio, kio estis promesita al vi, okazos, kaj vi ne povas malhelpi ĝin.

اِنَّ مَا تُوْعَدُوْنَ لَاٰتٍ ۙ وَّ مَآ اَنْتُمْ بِمُعْجِزِيْنَ ﴿١٣٤﴾

136. Diru: "Agu, kiel eble plej bone vi povas. Mi vere same agas. Baldaŭ vi scios, al kiu apartenos la rekompenco de la Restadejo". Certe la malbonfarantoj ne prosperos.

قُلْ يٰقَوْمِ اعْمَلُوْا عَلٰى مَكَانَتِكُمْ اِنِّيْ عَامِلٌ ۚ فَسَوْفَ
تَعْلَمُوْنَ ۙ مَنْ تَكُوْنُ لَهٗ عَاقِبَةُ الدَّارِ ؕ اِنَّهٗ لَا يُفْلِحُ
الظّٰلِمُوْنَ ﴿١٣٥﴾

137. Ili asignis al Allah iom el tio, kion Li estigas el la kamparo kaj el la gregoj, kaj ili diris: "Tio estas por Allah" – tiel ili imagas – kaj: "Tio estas por niaj idoloj". Tamen tio, kio estas por la idoloj, ne atingas Allahon, sed tio, kio estas por Allah, atingas la idolojn. Malbone estas, kiel ili juĝas!

وَجَعَلُوْا لِلّٰهِ مِمَّا ذَرَاَ مِنَ الْحَرْثِ وَالْاَنْعَامِ نَصِيْبًا
فَقَالُوْا هٰذَا لِلّٰهِ بِزَعْمِهِمْ وَ هٰذَا لِشُرَكَآئِنَا ۚ فَمَا
كَانَ لِشُرَكَآئِهِمْ فَلَا يَصِلُ اِلَى اللّٰهِ ۚ وَ مَا كَانَ
لِلّٰهِ فَهُوَ يَصِلُ اِلٰى شُرَكَآئِهِمْ ؕ سَآءَ مَا يَحْكُمُوْنَ ﴿١٣٦﴾

138. Tiel la idoloj igis la mortigon de la idoj ŝajni bela al la idolanoj, por ruinigi ilin kaj por konfuzi ilin pri la religio. Se Allah volus, ili ne farus tion; do lasu ilin ĉe iliaj elpensaĵoj.

وَكَذٰلِكَ زَيَّنَ لِكَثِيْرٍ مِّنَ الْمُشْرِكِيْنَ قَتْلَ اَوْلَادِهِمْ
شُرَكَآؤُهُمْ لِيُرْدُوْهُمْ وَلِيَلْبِسُوْا عَلَيْهِمْ دِيْنَهُمْ ؕ
وَلَوْ شَآءَ اللّٰهُ مَا فَعَلُوْهُ فَذَرْهُمْ وَمَا يَفْتَرُوْنَ ﴿١٣٧﴾

وَ قَالُوْا هٰذِهٖۤ اَنْعَامٌ وَّحَرْثٌ حِجْرٌ ۖ۫ لَّا يَطْعَمُهَآ اِلَّا

مَنْ نَّشَآءُ بِزَعْمِهِمْ وَ اَنْعَامٌ حُرِّمَتْ ظُهُوْرُهَا وَاَنْعَامٌ
لَّا يَذْكُرُوْنَ اسْمَ اللّٰهِ عَلَيْهَا افْتِرَآءً عَلَيْهِ سَيَجْزِيْهِمْ
بِمَا كَانُوْا يَفْتَرُوْنَ ﴿١٣٩﴾

139. Ili diras: "Ĉi tiuj rikolto kaj gregoj estas malpermesitaj. Neniu devas manĝi el ili krom tion, kion ni volas" – tiel ili imagas – kaj estas bestaro, kies dorsoj estas malpermesitaj, kaj bestaro, super kiu la nomo de Allah ne estas alvokita, elpensante mensogon kontraŭ Li. Li postulos de ili pravigon pro tio, kion ili elpensis.

وَقَالُوْا مَا فِيْ بُطُوْنِ هٰذِهِ الْاَنْعَامِ خَالِصَةٌ لِّذُكُوْرِنَا
وَمُحَرَّمٌ عَلٰٓى اَزْوَاجِنَا ۚ وَاِنْ يَّكُنْ مَّيْتَةً فَهُمْ فِيْهِ
شُرَكَآءُ ۚ سَيَجْزِيْهِمْ وَصْفَهُمْ ۚ اِنَّهٗ حَكِيْمٌ عَلِيْمٌ ﴿١٤٠﴾

140. Ili diras: "Kio estas en la ventroj de ĉi tiuj bestoj, tio estas rezervita por niaj viroj kaj malpermesita al niaj virinoj". Se ĝi tamen naskiĝas mortinta, ili ĉiuj partoprenas. Li punos ilin pro ilia aserto. Li vere estas la Saĝa, la Ĉioscia.

قَدْ خَسِرَ الَّذِيْنَ قَتَلُوْٓا اَوْلَادَهُمْ سَفَهًا بِغَيْرِ عِلْمٍ
وَّحَرَّمُوْا مَا رَزَقَهُمُ اللّٰهُ افْتِرَآءً عَلَى اللّٰهِ ۚ قَدْ ضَلُّوْا
وَمَا كَانُوْا مُهْتَدِيْنَ ﴿١٤١﴾ ع ٢٠

141. Vere estas perdantoj tiuj, kiuj malsaĝe mortigas siajn idojn kontraŭ la vera scio, kaj malpermesas, kion Allah konsentis al ili, elpensante mensogon kontraŭ Allah. Ili vere devojiĝis kaj ne estas gvidataj.

وَهُوَ الَّذِيْٓ اَنْشَاَ جَنّٰتٍ مَّعْرُوْشٰتٍ وَّغَيْرَ مَعْرُوْشٰتٍ
وَّالنَّخْلَ وَالزَّرْعَ مُخْتَلِفًا اُكُلُهٗ وَالزَّيْتُوْنَ وَالرُّمَّانَ
مُتَشَابِهًا وَّغَيْرَ مُتَشَابِهٍ ۚ كُلُوْا مِنْ ثَمَرِهٖٓ اِذَآ اَثْمَرَ
وَاٰتُوْا حَقَّهٗ يَوْمَ حَصَادِهٖ ۖ وَلَا تُسْرِفُوْا ۚ اِنَّهٗ لَا يُحِبُّ
الْمُسْرِفِيْنَ ﴿١٤٢﴾

142. Estas Li Tiu, kiu estigas ĝardenojn, murzonitajn kaj nemurzonitajn, kaj daktilpalmojn kaj grenkampojn, kies fruktoj estas diversspecaj, kaj olivarbon kaj granatarbon, similajn kaj malsimilajn. Manĝu el la fruktoj de ĉiu, kiam ĝi fruktas, sed pagu Lian rajton* en la tago de la rikolto kaj ne transpaŝu la limojn. Vere Li ne amas la transpaŝantojn.

وَمِنَ الْاَنْعَامِ حَمُوْلَةً وَّفَرْشًا ۚ كُلُوْا مِمَّا رَزَقَكُمُ اللّٰهُ
وَلَا تَتَّبِعُوْا خُطُوٰتِ الشَّيْطٰنِ ۚ اِنَّهٗ لَكُمْ عَدُوٌّ
مُّبِيْنٌ ۙ ﴿١٤٣﴾

143. El la gregoj Li kreis iujn por ŝarĝo kaj aliajn por buĉado. Manĝu el tio, kion Allah donis al vi, kaj ne sekvu la piedsignojn de Satano. Li vere estas via evidenta malamiko.

ثَمٰنِيَةَ اَزْوَاجٍ ۚ مِنَ الضَّاْنِ اثْنَيْنِ وَمِنَ الْمَعْزِ
اثْنَيْنِ ۗ قُلْ ءٰٓالذَّكَرَيْنِ حَرَّمَ اَمِ الْاُنْثَيَيْنِ اَمَّا
اشْتَمَلَتْ عَلَيْهِ اَرْحَامُ الْاُنْثَيَيْنِ ۗ نَبِّئُوْنِيْ بِعِلْمٍ
اِنْ كُنْتُمْ صٰدِقِيْنَ ﴿١٤٤﴾

144. El la gregoj Li kreis ok parojn: du ŝafajn, du kaprajn. Diru: "Ĉu Li malpermesis ambaŭ virajn aŭ virinajn aŭ tion, kio troviĝas en la ventroj de la virinaj? Informu min per via scio, se vi estas sinceraj".

وَمِنَ الْاِبِلِ اثْنَيْنِ وَمِنَ الْبَقَرِ اثْنَيْنِ ۗ قُلْ ءٰٓالذَّكَرَيْنِ

* la parton por la malriĉuloj

حَرَّمَ اَمِ الْاُنْثَيَيْنِ اَمَّا اشْتَمَلَتْ عَلَيْهِ اَرْحَامُ
الْاُنْثَيَيْنِ اَمْ كُنْتُمْ شُهَدَآءَ اِذْ وَصّٰكُمُ اللّٰهُ بِهٰذَا ۚ
فَمَنْ اَظْلَمُ مِمَّنِ افْتَرٰى عَلَى اللّٰهِ كَذِبًا لِّيُضِلَّ النَّاسَ
بِغَيْرِ عِلْمٍ ۗ اِنَّ اللّٰهَ لَا يَهْدِى الْقَوْمَ الظّٰلِمِيْنَ ﴿١٤٤﴾

145. Du kamelajn kaj du bovajn. Diru: "Ĉu Li malpermesis ambaŭ virajn aŭ ambaŭ virinajn aŭ tion, kio troviĝas en la ventroj de la virinaj? Ĉu vi ĉeestis, kiam Allah dekretis tion? ". Kiu estas pli maljusta ol tiu, kiu peke elpensas mensogon kontraŭ Allah, por devojigi la homojn kontraŭ la vera scio? Vere Allah ne gvidas la popolon malbonfarantan.

قُلْ لَّآ اَجِدُ فِىْ مَآ اُوْحِىَ اِلَىَّ مُحَرَّمًا عَلٰى طَاعِمٍ يَّطْعَمُهٗٓ
اِلَّآ اَنْ يَّكُوْنَ مَيْتَةً اَوْ دَمًا مَّسْفُوْحًا اَوْ لَحْمَ خِنْزِيْرٍ
فَاِنَّهٗ رِجْسٌ اَوْ فِسْقًا اُهِلَّ لِغَيْرِ اللّٰهِ بِهٖ ۚ فَمَنِ اضْطُرَّ
غَيْرَ بَاغٍ وَّلَا عَادٍ فَاِنَّ رَبَّكَ غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ﴿١٤٥﴾

146. Diru: "Mi ne trovas en tio, kio estis revelaciita al mi, iun manĝaĵon malpermesitan por manĝanto, krom ĉia mortintaĵo aŭ verŝita sango aŭ karno porka – fakte tio estas malpura – aŭ profanaĵo, super kiu alia nomo estis alvokita ol tiu de Allah. Kiu tamen estas devigata de la neceso – ne pro malobeo kaj ne ekscesante – tiam tiu sciu: via Sinjoro estas la Senkulpigema, la Pardonema.

وَعَلَى الَّذِيْنَ هَادُوْا حَرَّمْنَا كُلَّ ذِىْ ظُفُرٍ ۚ وَمِنَ
الْبَقَرِ وَالْغَنَمِ حَرَّمْنَا عَلَيْهِمْ شُحُوْمَهُمَآ اِلَّا مَا
حَمَلَتْ ظُهُوْرُهُمَآ اَوِ الْحَوَايَآ اَوْ مَا اخْتَلَطَ بِعَظْمٍ ۗ ذٰلِكَ
جَزَيْنٰهُمْ بِبَغْيِهِمْ ۖ وَاِنَّا لَصٰدِقُوْنَ ﴿١٤٦﴾

147. Al la Judoj Ni malpermesis ĉiun beston havantan ungegojn; kaj de la bovoj kaj ŝafoj kaj kaproj Ni malpermesis al ili la grasaĵon – krom tiu, kiu troviĝas en iliaj dorsoj – aŭ la internaĵojn aŭ tion, kio estas miksita kun ostoj. Tiu estis la puno pro ilia ribelemo. Vere Ni estas verama.

فَاِنْ كَذَّبُوْكَ فَقُلْ رَّبُّكُمْ ذُوْ رَحْمَةٍ وَّاسِعَةٍ ۚ وَلَا
يُرَدُّ بَاْسُهٗ عَنِ الْقَوْمِ الْمُجْرِمِيْنَ ﴿١٤٧﴾

148. Se ili kulpigas vin pri mensogo, vi diru: "Via Sinjoro estas plena je kompato ampleksega, tamen Lia kolero ne estos deturnita for de la kulpa popolo.

سَيَقُوْلُ الَّذِيْنَ اَشْرَكُوْا لَوْ شَآءَ اللّٰهُ مَآ اَشْرَكْنَا وَ
لَآ اٰبَآؤُنَا وَلَا حَرَّمْنَا مِنْ شَىْءٍ ۗ كَذٰلِكَ كَذَّبَ الَّذِيْنَ
مِنْ قَبْلِهِمْ حَتّٰى ذَاقُوْا بَاْسَنَا ۗ قُلْ هَلْ عِنْدَكُمْ
مِّنْ عِلْمٍ فَتُخْرِجُوْهُ لَنَا ۗ اِنْ تَتَّبِعُوْنَ اِلَّا الظَّنَّ وَ
اِنْ اَنْتُمْ اِلَّا تَخْرُصُوْنَ ﴿١٤٨﴾

149. Tiuj, kiuj aldonas rivalojn al Dio, diros: "Se Allah estus volinta, ni ne aldonus rivalojn al Li, nek niaj prapatroj estus farintaj tion, nek ni malpermesus ion ajn". Tiel kulpigis pri mensogo tiuj, kiuj estis antaŭe, ĝis ili gustumis Nian koleron. Diru: "Ĉu vi havas iun ajn scion? Tiam montru ĝin al ni. Vi sekvas nur supozojn kaj vi nur mensogadas".

قُلْ فَلِلّٰهِ الْحُجَّةُ الْبَالِغَةُ ۚ فَلَوْ شَآءَ لَهَدٰىكُمْ
اَجْمَعِيْنَ ﴿١٤٩﴾

قُلْ هَلُمَّ شُهَدَآءَكُمُ الَّذِيْنَ يَشْهَدُوْنَ اَنَّ اللّٰهَ

150. Diru: "De Allah estas la argumento, kiu trafas la celon. Se Li estus volinta, Li estus gvidinta vin ĉiujn".

حَرَّمَ هٰذَا ۚ فَإِنْ شَهِدُوْا فَلَا تَشْهَدْ مَعَهُمْ ۚ وَلَا
تَتَّبِعْ أَهْوَآءَ الَّذِيْنَ كَذَّبُوْا بِأٰيٰتِنَا وَالَّذِيْنَ لَا يُؤْمِنُوْنَ
بِالْأٰخِرَةِ وَهُمْ بِرَبِّهِمْ يَعْدِلُوْنَ ﴿١٥٠﴾

151. Diru: "Alportu viajn atestantojn, kiuj atestu, ke Allah malpermesis ĉi tion". Se ili atestas, ne atestu vi kun ili, nek sekvu la malbonajn inklinojn de tiuj, kiuj negas Niajn signojn, kaj de tiuj, kiuj ne kredas al la vivo venonta kaj aldonas rivalojn al sia Sinjoro.

قُلْ تَعَالَوْا أَتْلُ مَا حَرَّمَ رَبُّكُمْ عَلَيْكُمْ ۖ أَلَّا تُشْرِكُوْا
بِهٖ شَيْئًا ۖ وَبِالْوَالِدَيْنِ إِحْسَانًا ۚ وَلَا تَقْتُلُوْٓا أَوْلَادَكُمْ
مِّنْ إِمْلَاقٍ ۖ نَّحْنُ نَرْزُقُكُمْ وَإِيَّاهُمْ ۚ وَلَا تَقْرَبُوا
الْفَوَاحِشَ مَا ظَهَرَ مِنْهَا وَمَا بَطَنَ ۚ وَلَا تَقْتُلُوا
النَّفْسَ الَّتِيْ حَرَّمَ اللّٰهُ إِلَّا بِالْحَقِّ ۚ ذٰلِكُمْ وَصّٰكُمْ
بِهٖ لَعَلَّكُمْ تَعْقِلُوْنَ ﴿١٥١﴾

152. Diru: "Mi rediros al vi, kion via Sinjoro malpermesis al vi; ke vi aldonu ion ajn kiel rivalon al Li, kaj ke vi ne estu afablaj al viaj gepatroj, kaj ke vi mortigu viajn idojn pro timo de mizero. Estas Ni, kiu provizas por vi kaj por ili. Ne alproksimiĝu al malbonaj agoj, malkaŝitaj aŭ kaŝitaj, kaj ne mortigu la vivon, kiun Allah sanktigis, krom laŭrajte*. Tion Li dekretis por vi, por ke vi komprenu.

وَلَا تَقْرَبُوْا مَالَ الْيَتِيْمِ إِلَّا بِالَّتِيْ هِيَ أَحْسَنُ حَتّٰى يَبْلُغَ
أَشُدَّهٗ ۚ وَأَوْفُوا الْكَيْلَ وَالْمِيْزَانَ بِالْقِسْطِ ۚ لَا نُكَلِّفُ
نَفْسًا إِلَّا وُسْعَهَا ۚ وَإِذَا قُلْتُمْ فَاعْدِلُوْا وَلَوْ كَانَ ذَا
قُرْبٰى ۚ وَبِعَهْدِ اللّٰهِ أَوْفُوْا ۚ ذٰلِكُمْ وَصّٰكُمْ بِهٖ لَعَلَّكُمْ
تَذَكَّرُوْنَ ﴿١٥٢﴾

153. Ne alproksimiĝu al la propraĵoj de orfo, escepte juste, ĝis li atingos plenkreskan aĝon. Donu ĝustan mezuron kaj pezon laŭrajte. Ni nur ŝarĝas ĉiun animon laŭ ĝia kapablo. Kiam vi parolas, estu justaj, eĉ se temas pri parencoj. Plenumu la aliancon kun Allah. Tion Li dekretis por vi, por ke vi memoru".

وَأَنَّ هٰذَا صِرَاطِيْ مُسْتَقِيْمًا فَاتَّبِعُوْهُ ۚ وَلَا تَتَّبِعُوا
السُّبُلَ فَتَفَرَّقَ بِكُمْ عَنْ سَبِيْلِهٖ ۚ ذٰلِكُمْ وَصّٰكُمْ بِهٖ
لَعَلَّكُمْ تَتَّقُوْنَ ﴿١٥٣﴾

154. Kaj: "Tiu estas mia vojo, la rekta, do sekvu ĝin, kaj ne sekvu aliajn vojojn, por ke ili ne devojigu vin el Lia vojo. Tion Li dekretis por vi, por ke vi estu sekuraj".

ثُمَّ اٰتَيْنَا مُوْسَى الْكِتٰبَ تَمَامًا عَلَى الَّذِيْٓ أَحْسَنَ وَ
تَفْصِيْلًا لِّكُلِّ شَيْءٍ وَّهُدًى وَّرَحْمَةً لَّعَلَّهُمْ بِلِقَآءِ
رَبِّهِمْ يُؤْمِنُوْنَ ﴿١٥٤﴾

155. Poste Ni donis al Moseo la Skribon – plenumante la favoron al li, kiu bonfaris, kaj la klarigon de ĉiuj aferoj kaj la gvidadon kaj la gracon – por ke ili kredu al la renkonto kun sia Sinjoro.

وَهٰذَا كِتٰبٌ أَنْزَلْنٰهُ مُبٰرَكٌ فَاتَّبِعُوْهُ وَاتَّقُوْا لَعَلَّكُمْ
تُرْحَمُوْنَ ﴿١٥٥﴾

156. Tiu ĉi estas la Libro, kiun Ni sendis, plena de benoj, do sekvu ĝin kaj estu singardemaj por ke estu kompato por vi,

* Laŭ la leĝo de la lando.

157. por ke vi ne diru: "Vere la Libro estis sendita nur por du popoloj antaŭ ni, kaj ni nesciis, kiel ili ĝin studis",

158. aŭ por ke vi ne diru: "Se la Libro estus sendita al ni, ni estus certe pli bone gvidataj ol ili". Tiam vere venis al vi evidentaj signoj de via Sinjoro kaj gvidado kaj graco. Kiu do estas pli malbonfaranta ol tiu, kiu rifuzas la signojn de Allah kaj turnas sin for de ili? Ni repagos tiujn, kiuj turnas sin for de Niaj signoj, per terura turmento, ĉar ili turnis sin for.

159. Ĉu ili atendas ion alian ol, ke anĝeloj venu al ili, aŭ ke via Sinjoro venu, aŭ ke iuj el la signoj de via Sinjoro venu? En la tago, en kiu iuj signoj de via Sinjoro venos, neniom utilos al iu ajn animo kredi je ili, se ĝi ne estos kredinta antaŭe aŭ meritinta ion bonan per sia kredo. Diru: "Atendu, ni ankaŭ atendas! ".

160. Vere tiuj, kiuj estigis skismojn en sia religio, kaj dividiĝis en sektojn, vi nenion komunan havas kun ili. Certe ilia afero venos antaŭ Allahon, tiam Li sciigos al ili, kion ili faris.

161. Kiu faros bonan agon, tiu ricevos la dekoblon, kaj kiu faros malbonan agon, tiu ricevos nur similan repagon, kaj al ili ne estos farita maljusteco.

162. Diru: "Rilate al mi, mia Sinjoro gvidis min al la rekta vojo, al la vera religio, al la religio de Abraham la justulo. Li ne estis idolano".

163. Diru: "Vere mia preĝo kaj mia ofero kaj miaj vivo kaj morto apartenas al Allah, la Sinjoro de l' Universo.

164. Li ne havas rivalojn. Tiel al mi estas ordonite kaj mi estas la unua submetiĝinto".

أَنْ تَقُولُوٓا۟ إِنَّمَآ أُنزِلَ ٱلْكِتَٰبُ عَلَىٰ طَآئِفَتَيْنِ مِن قَبْلِنَا وَإِن كُنَّا عَن دِرَاسَتِهِمْ لَغَٰفِلِينَ ﴿١٥٦﴾

أَوْ تَقُولُوا۟ لَوْ أَنَّآ أُنزِلَ عَلَيْنَا ٱلْكِتَٰبُ لَكُنَّآ أَهْدَىٰ مِنْهُمْ ۚ فَقَدْ جَآءَكُم بَيِّنَةٌ مِّن رَّبِّكُمْ وَهُدًى وَرَحْمَةٌ ۚ فَمَنْ أَظْلَمُ مِمَّن كَذَّبَ بِـَٔايَٰتِ ٱللَّهِ وَصَدَفَ عَنْهَا ۗ سَنَجْزِى ٱلَّذِينَ يَصْدِفُونَ عَنْ ءَايَٰتِنَا سُوٓءَ ٱلْعَذَابِ بِمَا كَانُوا۟ يَصْدِفُونَ ﴿١٥٧﴾

هَلْ يَنظُرُونَ إِلَّآ أَن تَأْتِيَهُمُ ٱلْمَلَٰٓئِكَةُ أَوْ يَأْتِىَ رَبُّكَ أَوْ يَأْتِىَ بَعْضُ ءَايَٰتِ رَبِّكَ ۗ يَوْمَ يَأْتِى بَعْضُ ءَايَٰتِ رَبِّكَ لَا يَنفَعُ نَفْسًا إِيمَٰنُهَا لَمْ تَكُنْ ءَامَنَتْ مِن قَبْلُ أَوْ كَسَبَتْ فِىٓ إِيمَٰنِهَا خَيْرًا ۗ قُلِ ٱنتَظِرُوٓا۟ إِنَّا مُنتَظِرُونَ ﴿١٥٨﴾

إِنَّ ٱلَّذِينَ فَرَّقُوا۟ دِينَهُمْ وَكَانُوا۟ شِيَعًا لَّسْتَ مِنْهُمْ فِى شَىْءٍ ۚ إِنَّمَآ أَمْرُهُمْ إِلَى ٱللَّهِ ثُمَّ يُنَبِّئُهُم بِمَا كَانُوا۟ يَفْعَلُونَ ﴿١٥٩﴾

مَن جَآءَ بِٱلْحَسَنَةِ فَلَهُۥ عَشْرُ أَمْثَالِهَا ۖ وَمَن جَآءَ بِٱلسَّيِّئَةِ فَلَا يُجْزَىٰٓ إِلَّا مِثْلَهَا وَهُمْ لَا يُظْلَمُونَ ﴿١٦٠﴾

قُلْ إِنَّنِى هَدَىٰنِى رَبِّىٓ إِلَىٰ صِرَٰطٍ مُّسْتَقِيمٍ ۚ دِينًا قِيَمًا مِّلَّةَ إِبْرَٰهِيمَ حَنِيفًا ۖ وَمَا كَانَ مِنَ ٱلْمُشْرِكِينَ ﴿١٦١﴾

قُلْ إِنَّ صَلَاتِى وَنُسُكِى وَمَحْيَاىَ وَمَمَاتِى لِلَّهِ رَبِّ ٱلْعَٰلَمِينَ ﴿١٦٢﴾

لَا شَرِيكَ لَهُۥ ۖ وَبِذَٰلِكَ أُمِرْتُ وَأَنَا۠ أَوَّلُ ٱلْمُسْلِمِينَ ﴿١٦٣﴾

قُلْ أَغَيْرَ اللَّهِ أَبْغِي رَبًّا وَهُوَ رَبُّ كُلِّ شَيْءٍ وَلَا تَكْسِبُ
كُلُّ نَفْسٍ إِلَّا عَلَيْهَا ۚ وَلَا تَزِرُ وَازِرَةٌ وِزْرَ أُخْرَىٰ ۚ
ثُمَّ إِلَىٰ رَبِّكُمْ مَرْجِعُكُمْ فَيُنَبِّئُكُمْ بِمَا كُنْتُمْ فِيهِ
تَخْتَلِفُونَ ﴿١٦٤﴾

165. Diru: "Ĉu mi serĉu alian Sinjoron ol Allahon? Li estas la Sinjoro de ĉiuj ajoj. Ĉiu animo povas peki nur kontraŭ si mem kaj neniu animo ŝarĝita povas porti la ŝarĝon de alia. Poste al via Sinjoro estos via reveno kaj Li sciigos al vi tion, pri kio vi kutimis disputi.

وَهُوَ الَّذِي جَعَلَكُمْ خَلَائِفَ الْأَرْضِ وَرَفَعَ بَعْضَكُمْ
فَوْقَ بَعْضٍ دَرَجَاتٍ لِيَبْلُوَكُمْ فِي مَا آتَاكُمْ ۗ إِنَّ رَبَّكَ
لَسَرِيعُ الْعِقَابِ ۖ وَإِنَّهُ لَغَفُورٌ رَحِيمٌ ﴿١٦٥﴾

166. Estas Li Tiu, kiu igis iujn el vi sekvantoj de aliaj sur la tero kaj plialtigis je rango iujn el vi super la aliajn, por elprovi vin per tio, kion Li donis al vi. Vere via Sinjoro estas rapida je l' puno kaj certe Li estas la Senkulpigema, la Pardonema.

سُوْرَةُ الْاَعْرَافِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

الٓمٓصٓ ②

2. Alef Lām Mīm Sŭād**.

كِتٰبٌ اُنْزِلَ اِلَيْكَ فَلَا يَكُنْ فِيْ صَدْرِكَ حَرَجٌ مِّنْهُ
لِتُنْذِرَ بِهٖ وَ ذِكْرٰى لِلْمُؤْمِنِيْنَ ③

3. Ĉi tio estas Libro sendita al vi – do ne estu en via brusto hezito pri ĝi – por ke vi admonu per ĝi, kaj ĝi estu incitilo por la kredantoj.

اِتَّبِعُوْا مَآ اُنْزِلَ اِلَيْكُمْ مِّنْ رَّبِّكُمْ وَلَا تَتَّبِعُوْا مِنْ دُوْنِهٖٓ
اَوْلِيَآءَ ؕ قَلِيْلًا مَّا تَذَكَّرُوْنَ ④

4. Sekvu tion, kio estis sendita al vi de via Sinjoro kaj ne sekvu alian protektanton ol Lin. Kiom malmulte vi memoras!

وَكَمْ مِّنْ قَرْيَةٍ اَهْلَكْنٰهَا فَجَآءَهَا بَاْسُنَا بَيَاتًا اَوْهُمْ قَآئِلُوْنَ ⑤

5. Kiom multajn urbojn Ni detruis! Nia puno venis sur ilin nokte, aŭ kiam ili dormis tagmeze.

فَمَا كَانَ دَعْوٰىهُمْ اِذْ جَآءَهُمْ بَاْسُنَآ اِلَّآ اَنْ قَالُوْٓا اِنَّا
كُنَّا ظٰلِمِيْنَ ⑥

6. Tiel, kiam Nia puno venis sur ilin, ili nur kriis: "Ni vere estis malbonfarantoj! ".

فَلَنَسْـَٔلَنَّ الَّذِيْنَ اُرْسِلَ اِلَيْهِمْ وَ لَنَسْـَٔلَنَّ الْمُرْسَلِيْنَ ⑦

7. Ni certe demandos tiujn, al kiuj tiaj estis senditaj, kaj Ni certe demandos la senditojn,

فَلَنَقُصَّنَّ عَلَيْهِمْ بِعِلْمٍ وَّمَا كُنَّا غَآئِبِيْنَ ⑧

8. kaj certe Ni informos ilin laŭ la scio, ĉar Ni neniam forestis.

وَالْوَزْنُ يَوْمَئِذِ ِالْحَقُّ ۚ فَمَنْ ثَقُلَتْ مَوَازِيْنُهٗ فَاُولٰٓئِكَ
هُمُ الْمُفْلِحُوْنَ ⑨

9. La pesado en tiu tago estos vera; kaj tiuj, kiuj pezos multe, estos sukcesaj;

وَمَنْ خَفَّتْ مَوَازِيْنُهٗ فَاُولٰٓئِكَ الَّذِيْنَ خَسِرُوْٓا اَنْفُسَهُمْ
بِمَا كَانُوْا بِاٰيٰتِنَا يَظْلِمُوْنَ ⑩

10. tiuj, kiuj pezos malmulte, estos ruinigintaj siajn animojn, ĉar ili estis malpiegaj kontraŭ Niaj signoj.

وَلَقَدْ مَكَّنّٰكُمْ فِى الْاَرْضِ وَجَعَلْنَا لَكُمْ فِيْهَا مَعَايِشَ ؕ
قَلِيْلًا مَّا تَشْكُرُوْنَ ⑪

11. Vere Ni vin metis sur la teron kaj estigis sur ĝi la provizaĵojn por vi. Kiom malmulte vi dankas!

وَلَقَدْ خَلَقْنٰكُمْ ثُمَّ صَوَّرْنٰكُمْ ثُمَّ قُلْنَا لِلْمَلٰٓئِكَةِ اسْجُدُوْا
لِاٰدَمَ ۖ فَسَجَدُوْٓا اِلَّآ اِبْلِيْسَ ؕ لَمْ يَكُنْ مِّنَ السّٰجِدِيْنَ ⑫

---

* v. la verson 47an k.sekv.
** Mi, Allah, Ĉioscia, Verama

قَالَ مَا مَنَعَكَ اَلَّا تَسْجُدَ اِذْ اَمَرْتُكَ ۭ قَالَ اَنَا خَيْرٌ مِّنْهُ ۚ
خَلَقْتَنِيْ مِنْ نَّارٍ وَّخَلَقْتَهٗ مِنْ طِيْنٍ ⑫

12. Vere Ni kreis vin, poste Ni formis vin, poste Ni diris al la anĝeloj: "Surgenuiĝu antaŭ Adam! ". Kaj ili surgenuiĝis, krom Iblîs. Li ne volis esti unu el la submetiĝantoj.

قَالَ فَاهْبِطْ مِنْهَا فَمَا يَكُوْنُ لَكَ اَنْ تَتَكَبَّرَ فِيْهَا فَاخْرُجْ
اِنَّكَ مِنَ الصّٰغِرِيْنَ ⑬

13. Dio diris: "Kio malhelpis vin submetiĝi, kiam Ni ordonis tion al vi? ". Li respondis: "Mi estas supera al li. Vi kreis min el fajro kaj Vi kreis lin el argilo".

قَالَ اَنْظِرْنِيْٓ اِلٰى يَوْمِ يُبْعَثُوْنَ ⑭

قَالَ اِنَّكَ مِنَ الْمُنْظَرِيْنَ ⑮

14. Dio diris: "Eliru for de ĉi tie! Ne konvenas al vi fieriĝi ĉi tie. Eliru! Vi certe estas unu el la malsuperegaj! ".

قَالَ فَبِمَآ اَغْوَيْتَنِيْ لَاَقْعُدَنَّ لَهُمْ صِرَاطَكَ
الْمُسْتَقِيْمَ ⑯

15. Li diris: "Konsentu al mi prokraston ĝis la tago, kiam ili estos starigitaj! ".

ثُمَّ لَاٰتِيَنَّهُمْ مِّنْۢ بَيْنِ اَيْدِيْهِمْ وَمِنْ خَلْفِهِمْ
وَعَنْ اَيْمَانِهِمْ وَعَنْ شَمَاۗىِٕلِهِمْ ۭ وَلَا تَجِدُ اَكْثَرَهُمْ
شٰكِرِيْنَ ⑰

16. Dio diris: "Vere vi estos unu el tiuj, al kiuj estas konsentita prokrasto".

قَالَ اخْرُجْ مِنْهَا مَذْءُوْمًا مَّدْحُوْرًا ۭ لَمَنْ تَبِعَكَ
مِنْهُمْ لَاَمْلَــَٔنَّ جَهَنَّمَ مِنْكُمْ اَجْمَعِيْنَ ⑱

17. Li diris: "Ĉar Vi dekretis, ke mi estu pereonta, mi embuskos kontraŭ ili sur Via rekta vojo.

وَيٰٓاٰدَمُ اسْكُنْ اَنْتَ وَزَوْجُكَ الْجَنَّةَ فَكُلَا مِنْ حَيْثُ
شِئْتُمَا وَلَا تَقْرَبَا هٰذِهِ الشَّجَرَةَ فَتَكُوْنَا مِنَ
الظّٰلِمِيْنَ ⑲

18. Poste mi venos sur ilin de antaŭe kaj de malantaŭe kaj de ilia dekstra kaj de ilia maldekstra flanko, kaj Vi ne trovos multajn el ili dankaj.

فَوَسْوَسَ لَهُمَا الشَّيْطٰنُ لِيُبْدِيَ لَهُمَا مَا وٗرِيَ
عَنْهُمَا مِنْ سَوْاٰتِهِمَا وَقَالَ مَا نَهٰىكُمَا رَبُّكُمَا عَنْ
هٰذِهِ الشَّجَرَةِ اِلَّآ اَنْ تَكُوْنَا مَلَكَيْنِ اَوْ تَكُوْنَا مِنَ
الْخٰلِدِيْنَ ⑳

19. Dio diris: "Eliru for de ĉi tie, malŝatata kaj ekzilita! Kiu ajn sekvos vin el ili, Ni certe plenigos la inferon per vi ĉiuj.

وَقَاسَمَهُمَآ اِنِّيْ لَكُمَا لَمِنَ النّٰصِحِيْنَ ㉑

فَدَلّٰىهُمَا بِغُرُوْرٍ ۚ فَلَمَّا ذَاقَا الشَّجَرَةَ بَدَتْ لَهُمَا

20. Kaj, ho vi, Adam! Loĝu vi kaj via edzino en la ĝardeno kaj manĝu, kie ajn vi ambaŭ volas, sed ne alproksimiĝu al tiu arbo, por ke vi ne fariĝu pekantoj".

21. Satano tamen flustris al ili malbonajn sugestojn por sciigi al ili tion, kio estis kaŝita el ilia honto, kaj diris: "Via Sinjoro malpermesis al vi tiun arbon nur por ke vi ne fariĝu anĝeloj aŭ por ke vi ne vivu eterne".

22. Kaj li ĵuris al ili: "Vere mi estas sincera konsilanto por vi".

سَوْاٰتِهِمَا وَقَالَ مَا نَهٰكُمَا رَبُّكُمَا عَنْ هٰذِهِ الشَّجَرَةِ إِلَّا أَنْ تَكُونَا مَلَكَيْنِ أَوْ تَكُونَا مِنَ الْخَالِدِينَ ﴿٢٠﴾

23. Tiel li ruze igis ilin malobeemaj kaj, kiam ili gustumis el la arbo, ilia honto evidentiĝis al ili kaj ili komencis kolekti la foliojn de la ĝardenoj sur sin mem, kaj ilia Sinjoro vokis ilin: "Ĉu mi ne malpermesis al vi tiun arbon kaj diris al vi: Satano estas via evidenta malamiko? ".

وَقَاسَمَهُمَا إِنِّي لَكُمَا لَمِنَ النَّاصِحِينَ ﴿٢١﴾

فَدَلَّاهُمَا بِغُرُورٍ فَلَمَّا ذَاقَا الشَّجَرَةَ بَدَتْ لَهُمَا سَوْاٰتُهُمَا وَطَفِقَا يَخْصِفَانِ عَلَيْهِمَا مِنْ وَرَقِ الْجَنَّةِ وَنَادَاهُمَا رَبُّهُمَا أَلَمْ أَنْهَكُمَا عَنْ تِلْكُمَا الشَّجَرَةِ وَأَقُلْ لَكُمَا إِنَّ الشَّيْطَانَ لَكُمَا عَدُوٌّ مُبِينٌ ﴿٢٢﴾

24. Ili ambaŭ diris: "Nia Sinjoro, ni pekis kontraŭ ni mem; se vi ne pardonas nin kaj ne havas kompaton por ni, ni certe estos el la perdantoj".

قَالَا رَبَّنَا ظَلَمْنَا أَنْفُسَنَا وَإِنْ لَمْ تَغْفِرْ لَنَا وَتَرْحَمْنَا لَنَكُونَنَّ مِنَ الْخَاسِرِينَ ﴿٢٣﴾

25. Li diris: "Eliru! Iuj el vi estos malamikoj de la aliaj, kaj por vi estos sur la tero restadejo kaj provizaĵo por kelke da tempo".

قَالَ اهْبِطُوا بَعْضُكُمْ لِبَعْضٍ عَدُوٌّ وَلَكُمْ فِي الْأَرْضِ مُسْتَقَرٌّ وَمَتَاعٌ إِلَىٰ حِينٍ ﴿٢٤﴾

26. Li diris: "Tie vi vivos kaj tie vi mortos kaj de tie vi estos forportitaj".

قَالَ فِيهَا تَحْيَوْنَ وَفِيهَا تَمُوتُونَ وَمِنْهَا تُخْرَجُونَ ﴿٢٥﴾ ع ٩

يَا بَنِي آدَمَ قَدْ أَنْزَلْنَا عَلَيْكُمْ لِبَاسًا يُوَارِي سَوْاٰتِكُمْ وَرِيشًا وَلِبَاسُ التَّقْوَىٰ ذَٰلِكَ خَيْرٌ ذَٰلِكَ مِنْ آيَاتِ اللَّهِ لَعَلَّهُمْ يَذَّكَّرُونَ ﴿٢٦﴾

27. Ho idoj de Adam! Vere Ni sendis al vi vestojn por kovri vian honton kaj por ornami vin, sed la vesto de la virto estas la plej bona. Tio estas unu el la signoj de Allah por ke ili memoru.

يَا بَنِي آدَمَ لَا يَفْتِنَنَّكُمُ الشَّيْطَانُ كَمَا أَخْرَجَ أَبَوَيْكُمْ مِنَ الْجَنَّةِ يَنْزِعُ عَنْهُمَا لِبَاسَهُمَا لِيُرِيَهُمَا سَوْاٰتِهِمَا إِنَّهُ يَرَاكُمْ هُوَ وَقَبِيلُهُ مِنْ حَيْثُ لَا تَرَوْنَهُمْ إِنَّا جَعَلْنَا الشَّيَاطِينَ أَوْلِيَاءَ لِلَّذِينَ لَا يُؤْمِنُونَ ﴿٢٧﴾

28. Ho idoj de Adam! Ne lasu Satanon devojigi vin, kiel li forpelis viajn prapatrojn for de la ĝardeno, senigante ilin je iliaj vestoj por montri al ili ilian honton. Vere li vidas vin, li kaj lia tribo, de kie vi ne vidas ilin. Ni igis la Satanojn esti amikoj de la miskredantoj.

وَإِذَا فَعَلُوا فَاحِشَةً قَالُوا وَجَدْنَا عَلَيْهَا آبَاءَنَا وَاللَّهُ أَمَرَنَا بِهَا قُلْ إِنَّ اللَّهَ لَا يَأْمُرُ بِالْفَحْشَاءِ أَتَقُولُونَ عَلَى اللَّهِ مَا لَا تَعْلَمُونَ ﴿٢٨﴾

29. Kiam ili faras abomenindaĵon, ili diras: "Ni trovis niajn prapatrojn ĉe ĝi, kaj Allah ordonis ĝin al ni". Diru: "Neniam Allah ordonas abomenindaĵojn. Do, ĉu vi volas diri pri Allah, kion vi ne scias? ".

قُلْ أَمَرَ رَبِّي بِالْقِسْطِ وَأَقِيمُوا وُجُوهَكُمْ عِنْدَ كُلِّ

30. Diru: "Mia Sinjoro ordonis la justecon. Fiksu vian atenton al ĉiu moskeo kaj alvoku Lin sincere en la kredo. Kiel Li vin kreis, tiel vi revenos.

مَسْجِدٍ وَّادْعُوْهُ مُخْلِصِيْنَ لَهُ الدِّيْنَ ۚ كَمَا بَدَاَكُمْ
تَعُوْدُوْنَ ﴿٢٩﴾

فَرِيْقًا هَدٰى وَفَرِيْقًا حَقَّ عَلَيْهِمُ الضَّلٰلَةُ ۗ اِنَّهُمُ
اتَّخَذُوا الشَّيٰطِيْنَ اَوْلِيَآءَ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ وَيَحْسَبُوْنَ
اَنَّهُمْ مُّهْتَدُوْنَ ﴿٣٠﴾

يٰبَنِيْٓ اٰدَمَ خُذُوْا زِيْنَتَكُمْ عِنْدَ كُلِّ مَسْجِدٍ وَّكُلُوْا
وَاشْرَبُوْا وَلَا تُسْرِفُوْا ۚ اِنَّهٗ لَا يُحِبُّ الْمُسْرِفِيْنَ ﴿٣١﴾ ع

قُلْ مَنْ حَرَّمَ زِيْنَةَ اللّٰهِ الَّتِيْٓ اَخْرَجَ لِعِبَادِهٖ وَالطَّيِّبٰتِ
مِنَ الرِّزْقِ ۗ قُلْ هِيَ لِلَّذِيْنَ اٰمَنُوْا فِي الْحَيٰوةِ الدُّنْيَا
خَالِصَةً يَّوْمَ الْقِيٰمَةِ ۗ كَذٰلِكَ نُفَصِّلُ الْاٰيٰتِ لِقَوْمٍ
يَّعْلَمُوْنَ ﴿٣٢﴾

قُلْ اِنَّمَا حَرَّمَ رَبِّيَ الْفَوَاحِشَ مَا ظَهَرَ مِنْهَا وَمَا بَطَنَ
وَالْاِثْمَ وَالْبَغْيَ بِغَيْرِ الْحَقِّ وَاَنْ تُشْرِكُوْا بِاللّٰهِ مَا لَمْ
يُنَزِّلْ بِهٖ سُلْطٰنًا وَّاَنْ تَقُوْلُوْا عَلَى اللّٰهِ مَا لَا تَعْلَمُوْنَ ﴿٣٣﴾
وَلِكُلِّ اُمَّةٍ اَجَلٌ ۚ فَاِذَا جَآءَ اَجَلُهُمْ لَا يَسْتَاْخِرُوْنَ
سَاعَةً وَّلَا يَسْتَقْدِمُوْنَ ﴿٣٤﴾

يٰبَنِيْٓ اٰدَمَ اِمَّا يَاْتِيَنَّكُمْ رُسُلٌ مِّنْكُمْ يَقُصُّوْنَ عَلَيْكُمْ
اٰيٰتِيْ ۙ فَمَنِ اتَّقٰى وَاَصْلَحَ فَلَا خَوْفٌ عَلَيْهِمْ وَلَا
هُمْ يَحْزَنُوْنَ ﴿٣٥﴾

وَالَّذِيْنَ كَذَّبُوْا بِاٰيٰتِنَا وَاسْتَكْبَرُوْا عَنْهَآ اُولٰٓئِكَ
اَصْحٰبُ النَّارِ ۚ هُمْ فِيْهَا خٰلِدُوْنَ ﴿٣٦﴾

فَمَنْ اَظْلَمُ مِمَّنِ افْتَرٰى عَلَى اللّٰهِ كَذِبًا اَوْ كَذَّبَ

31. Iujn Li gvidis, kaj por aliaj la erarado fariĝis normo. Vere ili prenis Satanojn kiel amikojn krom Allahon kaj ili imagas,ke ili estas gvidataj.

32. Ho idoj de Adam! Atentu pri viaj ornamaĵoj en ĉiu moskeo kaj manĝu kaj trinku sed ne transpasu la limojn. Li vere ne amas la transpasantojn.

33. Diru: "Kiu malpermesis la ornamaĵojn, kiujn Allah estigis por Siaj servantoj kaj la bonajn aĵojn, kiujn Li provizis? ". Diru: "Tio estas por la kredantoj en ĉi tiu vivo, kaj eksklluzive por ili en la tago de la revivigo". Tiel Ni klarigas la signojn por la popolo scianta.

34. Diru: "Vere mia Sinjoro malpermesis la malbonajn agojn, ĉu publikajn, ĉu kaŝitajn, kaj la pekon kaj la maljustajn transpasojn kaj, ke estu aldonita al Allah kiel rivalo tio, por kio ne estis sendita iu ajn rajtigo, kaj ke vi diru pri Allah, kion vi ne scias".

35. Por ĉiu popolo estas difinita limtempo; kiam venos ilia limtempo ili ne povos malfrui eĉ unu momenton kaj ili ankaŭ ne povos akceli ĝin.

36. Ho idoj de Adam! Se venas al vi senditoj el via mezo, klarigante al vi Miajn signojn, por tiuj, kiuj respektegas Dion kaj bonfaras, ne estos plu timo, nek malgajeco.

37. Tiuj, kiuj rifuzas Niajn signojn kaj turnas sin for de ili, estos loĝantoj de l' fajro, kaj tie ili ĉiam restos.

38. Kiu do estas pli maljusta, ol tiu, kiu elpensas mensogon kontraŭ Allah aŭ rifuzas Liajn signojn? Por ili estos la sorto dekretita de Ni laŭ la Libro, ĝis venos al ili Niaj senditoj* por forpreni iliajn animojn

* Anĝeloj

kaj diros: "Kie estas tio, kion vi kutimis alvoki krom Allahon? ". Ili respondos: "Ili foriris de ni", kaj ili atestos kontraŭ si mem, ĉar ili estis miskredantoj.

39. Li diros: "Eniru la fajron kun la nacioj de la Ginnoj kaj de la homoj, kiuj jam pasis antaŭ vi". Ciufoje, kiam popolo eniras, ili malbenas siajn kunulojn, ĝis ĉiuj estas enirintaj; kaj diras la lasta el ili pri la unua: "Nia Sinjoro, tiuj devojigis nin, donu do al ili la duoblan turmenton de la fajro". Li diros: "Por ĉiuj estos duoblo, sed vi ne scias".

40. Tiam diros la unuaj al la lastaj: "Vi do neniel estas superaj al ni je la graco; gustumu do la turmenton pro tio, kion vi meritis".

41. Por tiuj, kiuj rifuzas Niajn signojn kaj turnas sin for de ili, ne malfermiĝos la pordoj de la ĉielo, kaj ili ne eniros la Paradizon, antaŭ ol kamelo eniros kudriltruon. Tiel Ni repagos la ofendintojn.

42. Por ili estos kuŝejo en la infero, kaj super ili estos simila kovrilo. Tiel Ni repagos la malbonfarintojn.

43. La kredantoj kaj la bonfarantoj – kaj Ni ne ŝarĝas iun animon trans ĝia kapablo – estos loĝantoj de l' Paradizo kaj tie ili restos por ĉiam.

44. Kaj Ni forprenos de iliaj brustoj ĉiun ajn malamon. Sub ili fluos riveroj, kaj ili diros: "Estu laŭdegata Allah, kiu nin gvidis al ĉi tio; kaj ni ne estus trovintaj gvidadon, se Allah ne gvidus nin. Vere venis la senditoj de nia Sinjoro kun la vero! " kaj al ili estos anoncite: "Tio ĉi estas la Paradizo, kiu estas konsentita al vi pro tio, kion vi faris".

بِاٰيٰتِنَآ اُولٰٓئِكَ يَنَالُهُمْ نَصِيبُهُمْ مِّنَ الْكِتٰبِ ۭ حَتّٰٓى
اِذَا جَاۗءَتْهُمْ رُسُلُنَا يَتَوَفَّوْنَهُمْ ۙ قَالُوْٓا اَيْنَ مَا كُنْتُمْ
تَدْعُوْنَ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ ۭ قَالُوْا ضَلُّوْا عَنَّا وَشَهِدُوْا
عَلٰٓي اَنْفُسِهِمْ اَنَّهُمْ كَانُوْا كٰفِرِيْنَ ۝۳۷
قَالَ ادْخُلُوْا فِيْٓ اُمَمٍ قَدْ خَلَتْ مِنْ قَبْلِكُمْ مِّنَ الْجِنِّ
وَالْاِنْسِ فِي النَّارِ ۭ كُلَّمَا دَخَلَتْ اُمَّةٌ لَّعَنَتْ اُخْتَهَا ۭ
حَتّٰٓى اِذَا ادَّارَكُوْا فِيْهَا جَمِيْعًا ۙ قَالَتْ اُخْرٰىهُمْ لِاُوْلٰىهُمْ
رَبَّنَا هٰٓؤُلَاۗءِ اَضَلُّوْنَا فَاٰتِهِمْ عَذَابًا ضِعْفًا مِّنَ النَّارِ ۭ
قَالَ لِكُلٍّ ضِعْفٌ وَّلٰكِنْ لَّا تَعْلَمُوْنَ ۝۳۸
وَقَالَتْ اُوْلٰىهُمْ لِاُخْرٰىهُمْ فَمَا كَانَ لَكُمْ عَلَيْنَا مِنْ
فَضْلٍ فَذُوْقُوا الْعَذَابَ بِمَا كُنْتُمْ تَكْسِبُوْنَ ۝۳۹ ع
اِنَّ الَّذِيْنَ كَذَّبُوْا بِاٰيٰتِنَا وَاسْتَكْبَرُوْا عَنْهَا لَا تُفَتَّحُ
لَهُمْ اَبْوَابُ السَّمَاۗءِ وَلَا يَدْخُلُوْنَ الْجَنَّةَ حَتّٰى يَلِجَ
الْجَمَلُ فِيْ سَمِّ الْخِيَاطِ ۭ وَكَذٰلِكَ نَجْزِي الْمُجْرِمِيْنَ ۝۴۰
لَهُمْ مِّنْ جَهَنَّمَ مِهَادٌ وَّمِنْ فَوْقِهِمْ غَوَاشٍ ۭ وَ
كَذٰلِكَ نَجْزِي الظّٰلِمِيْنَ ۝۴۱
وَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ لَا نُكَلِّفُ نَفْسًا اِلَّا
وُسْعَهَآ ۡ اُولٰۗىِٕكَ اَصْحٰبُ الْجَنَّةِ ۚ هُمْ فِيْهَا خٰلِدُوْنَ ۝۴۲
وَنَزَعْنَا مَا فِيْ صُدُوْرِهِمْ مِّنْ غِلٍّ تَجْرِيْ مِنْ تَحْتِهِمُ
الْاَنْهٰرُ ۚ وَقَالُوا الْحَمْدُ لِلّٰهِ الَّذِيْ هَدٰىنَا لِهٰذَا ۤ وَمَا
كُنَّا لِنَهْتَدِيَ لَوْلَآ اَنْ هَدٰىنَا اللّٰهُ ۚ لَقَدْ جَاۗءَتْ
رُسُلُ رَبِّنَا بِالْحَقِّ ۭ وَنُوْدُوْٓا اَنْ تِلْكُمُ الْجَنَّةُ اُوْرِثْتُمُوْهَا

بِمَا كُنْتُمْ تَعْمَلُوْنَ ﴿٤٣﴾

45. Kaj la loĝantoj de l' Paradizo krios al la loĝantoj de l' fajro: "Jen, ni trovis la veron, kiun nia Sinjoro promesis al ni. Ĉu ankaŭ vi trovis la veron, kiun via Sinjoro promesis al vi? ". Ili diros: "Jes". Tiam krios inter ili anoncanto: "La malbeno de Allah sur la malbonfarantojn,

وَنَادٰٓى اَصْحٰبُ الْجَنَّةِ اَصْحٰبَ النَّارِ اَنْ قَدْ وَجَدْنَا
مَا وَعَدَنَا رَبُّنَا حَقًّا فَهَلْ وَجَدْتُّمْ مَّا وَعَدَ رَبُّكُمْ
حَقًّا ؕ قَالُوْا نَعَمْ ۚ فَاَذَّنَ مُؤَذِّنٌ ۢ بَيْنَهُمْ اَنْ لَّعْنَةُ اللّٰهِ
عَلَى الظّٰلِمِيْنَ ۙ ﴿٤٤﴾

46. kiuj deklinis de la vojo de Allah kaj provis distordi ĝin kaj ne kredis al la vivo venonta! ".

الَّذِيْنَ يَصُدُّوْنَ عَنْ سَبِيْلِ اللّٰهِ وَيَبْغُوْنَهَا عِوَجًا ۚ
وَهُمْ بِالْاٰخِرَةِ كٰفِرُوْنَ ﴿٤٥﴾

47. Inter ambaŭ grupoj estos dividilo, kaj sur la altrando estos homoj, kiujn ĉiuj rekonos pro iliaj distingiloj*. Ili vokos la loĝantojn de l' Paradizo, dirante: "La paco estu kun vi! ". Ĉi tiuj ankoraŭ ne eniris la Paradizon, kvankam ili tion esperas.

وَبَيْنَهُمَا حِجَابٌ ۚ وَعَلَى الْاَعْرَافِ رِجَالٌ يَّعْرِفُوْنَ كُلًّا
بِسِيْمٰهُمْ ۚ وَنَادَوْا اَصْحٰبَ الْجَنَّةِ اَنْ سَلٰمٌ عَلَيْكُمْ ۖ
لَمْ يَدْخُلُوْهَا وَهُمْ يَطْمَعُوْنَ ﴿٤٦﴾

48. Kiam ili turnos sian rigardon al la loĝantoj de l' fajro, ili diros: "Nia Sinjoro, ne aligu nin al la popolo malbonfarinta! ".

وَاِذَا صُرِفَتْ اَبْصَارُهُمْ تِلْقَآءَ اَصْحٰبِ النَّارِ قَالُوْا رَبَّنَا
لَا تَجْعَلْنَا مَعَ الْقَوْمِ الظّٰلِمِيْنَ ﴿٤٧﴾ ع ١٣

49. kaj la loĝantoj de la altrando vokos la homojn, kiujn ili rekonos pro iliaj distingiloj, kaj diros: "Via multenombro neniom utilis al vi kaj neniom utilis al vi via fiereco.

وَنَادٰٓى اَصْحٰبُ الْاَعْرَافِ رِجَالًا يَّعْرِفُوْنَهُمْ بِسِيْمٰهُمْ
قَالُوْا مَآ اَغْنٰى عَنْكُمْ جَمْعُكُمْ وَمَا كُنْتُمْ تَسْتَكْبِرُوْنَ ﴿٤٨﴾

50. Ĉu estas ili tiuj, pri kiuj vi ĵuris, ke Allah ne konsentis al ili gracon? Eniru la Paradizon; por vi plu ne estos timo nek malgajeco".

اَهٰٓؤُلَآءِ الَّذِيْنَ اَقْسَمْتُمْ لَا يَنَالُهُمُ اللّٰهُ بِرَحْمَةٍ ؕ
اُدْخُلُوا الْجَنَّةَ لَا خَوْفٌ عَلَيْكُمْ وَلَآ اَنْتُمْ تَحْزَنُوْنَ ﴿٤٩﴾

51. Kaj la loĝantoj de l' fajro vokos la loĝantojn de l' Paradizo, dirante: "Verŝu sur nin iom da akvo aŭ el tio, kion Allah donis al vi", kaj ili respondos: "Vere Allah malpermesis ambaŭ al la miskredantoj,

وَنَادٰٓى اَصْحٰبُ النَّارِ اَصْحٰبَ الْجَنَّةِ اَنْ اَفِيْضُوْا عَلَيْنَا
مِنَ الْمَآءِ اَوْ مِمَّا رَزَقَكُمُ اللّٰهُ ؕ قَالُوْٓا اِنَّ اللّٰهَ حَرَّمَهُمَا
عَلَى الْكٰفِرِيْنَ ۙ ﴿٥٠﴾

52. kiuj prenis sian religion kiel ludilon kaj amuzaĵon, kaj kiujn la vivo de ĉi tiu mondo

الَّذِيْنَ اتَّخَذُوْا دِيْنَهُمْ لَهْوًا وَّلَعِبًا وَّغَرَّتْهُمُ الْحَيٰوةُ
الدُّنْيَا ۚ فَالْيَوْمَ نَنْسٰىهُمْ كَمَا نَسُوْا لِقَآءَ يَوْمِهِمْ هٰذَا ۙ
وَمَا كَانُوْا بِاٰيٰتِنَا يَجْحَدُوْنَ ﴿٥١﴾

* Laŭ la tradicio, temas pri la Profetoj, kiuj ĝuos apartan rangon en la vivo venonta.

malsaĝigis". Kaj en tiu tago Ni forgesos ilin, kiel ili forgesis en ĉi tiu tago la renkonton, kaj kiel ili kutimis negi Niajn signojn.

وَلَقَدْ جِئْنٰهُمْ بِكِتٰبٍ فَصَّلْنٰهُ عَلٰى عِلْمٍ هُدًى وَّ
رَحْمَةً لِّقَوْمٍ يُّؤْمِنُوْنَ ﴿٥٢﴾

53. Kaj Ni vere donis al ili Libron, kiun Ni deklaris – scie – gvidilo kaj graco por la popolo kredanta.

هَلْ يَنْظُرُوْنَ اِلَّا تَاْوِيْلَهٗ ؕ يَوْمَ يَاْتِىْ تَاْوِيْلُهٗ يَقُوْلُ
الَّذِيْنَ نَسُوْهُ مِنْ قَبْلُ قَدْ جَآءَتْ رُسُلُ رَبِّنَا بِالْحَقِّ ۚ
فَهَلْ لَّنَا مِنْ شُفَعَآءَ فَيَشْفَعُوْا لَنَآ اَوْ نُرَدُّ فَنَعْمَلَ
غَيْرَ الَّذِىْ كُنَّا نَعْمَلُ ؕ قَدْ خَسِرُوْٓا اَنْفُسَهُمْ وَضَلَّ
عَنْهُمْ مَّا كَانُوْا يَفْتَرُوْنَ ﴿٥٣﴾ ع

54. Ĉu ili atendas ion alian ol ĝian plenumiĝon? En la tago, kiam venos ĝia plenumiĝo, diros tiuj, kiuj antaŭe ĝin forgesis: "La sendoj de nia Sinjoro vere venis kun la vero. Ĉu ni havas propetantojn, kiuj propetas por ni? Aŭ ĉu ni povus esti resenditaj, por agi alie ol ni kutimis agi? ". Vere ili ruinigis siajn animojn, kaj ilin forlasis tio, kion ili elpensis.

اِنَّ رَبَّكُمُ اللّٰهُ الَّذِىْ خَلَقَ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ فِىْ
سِتَّةِ اَيَّامٍ ثُمَّ اسْتَوٰى عَلَى الْعَرْشِ ۖ يُغْشِى الَّيْلَ النَّهَارَ
يَطْلُبُهٗ حَثِيْثًا ۙ وَّالشَّمْسَ وَالْقَمَرَ وَالنُّجُوْمَ مُسَخَّرٰتٍ
بِاَمْرِهٖ ؕ اَلَا لَهُ الْخَلْقُ وَالْاَمْرُ ؕ تَبٰرَكَ اللّٰهُ رَبُّ
الْعٰلَمِيْنَ ﴿٥٤﴾

55. Jen, via Sinjoro estas Allah, kiu kreis en ses tagoj la ĉielojn kaj la teron, poste sidiĝis sur la tronon; li ĵetas la vualon de la nokto sur la tagon, kiun ĝi sekvas rapide. Kaj Li kreis la sunon kaj la lunon kaj la stelojn, kiuj servas laŭ Lia ordono. Ĉu ne apartenas al Li la kreo kaj la leĝo? Benata estu Allah, la Sinjoro de l' Universo!

اُدْعُوْا رَبَّكُمْ تَضَرُّعًا وَّخُفْيَةً ؕ اِنَّهٗ لَا يُحِبُّ
الْمُعْتَدِيْنَ ﴿٥٥﴾

56. Voku vian Sinjoron humile kaj kaŝe. Li ne amas la ekscesantojn.

وَلَا تُفْسِدُوْا فِى الْاَرْضِ بَعْدَ اِصْلَاحِهَا وَادْعُوْهُ
خَوْفًا وَّطَمَعًا ؕ اِنَّ رَحْمَتَ اللّٰهِ قَرِيْبٌ مِّنَ الْمُحْسِنِيْنَ ﴿٥٦﴾

57. Ne estigu malpacon sur la tero post ĝia ordiĝo, kaj voku Lin respektege kaj esperante. Vere la graco de Allah estas proksima al la pacemuloj.

وَهُوَ الَّذِىْ يُرْسِلُ الرِّيٰحَ بُشْرًا ۢ بَيْنَ يَدَىْ رَحْمَتِهٖ ؕ
حَتّٰٓى اِذَآ اَقَلَّتْ سَحَابًا ثِقَالًا سُقْنٰهُ لِبَلَدٍ مَّيِّتٍ فَاَنْزَلْنَا
بِهِ الْمَآءَ فَاَخْرَجْنَا بِهٖ مِنْ كُلِّ الثَّمَرٰتِ ؕ كَذٰلِكَ نُخْرِجُ
الْمَوْتٰى لَعَلَّكُمْ تَذَكَّرُوْنَ ﴿٥٧﴾

58. Estas Li Tiu, kiu sendas antaŭ Sia favoro la ventojn kiel portantojn de la bona novaĵo, ĝis Ni puŝas ilin, kiam ili portas pluvoplenajn nubojn, al mortinta regiono; poste Ni sendas sur ĝin la akvon kaj tiel Ni estigas el ĝi ĉiuspecajn fruktojn. Tiel Ni elirigos la mortintojn, por ke vi memoru.

وَالْبَلَدُ الطَّيِّبُ يَخْرُجُ نَبَاتُهٗ بِاِذْنِ رَبِّهٖ ۚ وَالَّذِىْ
خَبُثَ لَا يَخْرُجُ اِلَّا نَكِدًا ؕ كَذٰلِكَ نُصَرِّفُ الْاٰيٰتِ

59. Kaj pri la bona tero sciu: ĝiaj kreskaĵoj kreskas laŭ la dekreto de ĝia Sinjoro. Se ĝi tamen estas malbona, la kreskaĵoj burĝonas nur mizere. Tiel Ni variigas la signojn por la popolo dankema.

لِقَوْمٍ يَّشْكُرُوْنَ ﴿٥٨﴾ ع ١٢

60. Vere Ni sendis Noan al lia popolo, kaj li diris: "Ho mia popolo! Adoru Allahon; vi ne havas alian Dion ol Lin. Vere mi timas por vi la punon de la tago terura".

لَقَدْ اَرْسَلْنَا نُوْحًا اِلٰى قَوْمِهٖ فَقَالَ يٰقَوْمِ اعْبُدُوا اللّٰهَ مَا لَكُمْ مِّنْ اِلٰهٍ غَيْرُهٗ ؕ اِنِّيْٓ اَخَافُ عَلَيْكُمْ عَذَابَ يَوْمٍ عَظِيْمٍ ﴿٥٩﴾

61. Diris la estroj de lia popolo: "Vere ni vidas vin en evidenta eraro".

قَالَ الْمَلَاُ مِنْ قَوْمِهٖٓ اِنَّا لَنَرٰىكَ فِيْ ضَلٰلٍ مُّبِيْنٍ ﴿٦٠﴾

62. Li respondis: "Ho mia popolo! En mi ne estas eraro; kontraŭe, mi estas sendito de la Sinjoro de l' Universo.

قَالَ يٰقَوْمِ لَيْسَ بِيْ ضَلٰلَةٌ وَّلٰكِنِّيْ رَسُوْلٌ مِّنْ رَّبِّ الْعٰلَمِيْنَ ﴿٦١﴾

63. Mi portas al vi la senditaĵojn de mia Sinjoro kaj mi konsilas vin sincere, kaj mi scias pere de Allah tion, kion vi ne scias.

اُبَلِّغُكُمْ رِسٰلٰتِ رَبِّيْ وَاَنْصَحُ لَكُمْ وَاَعْلَمُ مِنَ اللّٰهِ مَا لَا تَعْلَمُوْنَ ﴿٦٢﴾

64. Ĉu vi miras, ĉar venis al vi la admono de via Sinjoro pere de homo el via mezo, por ke li admonu vin, kaj por ke vi fariĝu justuloj, kaj por ke vi trovu kompaton? ".

اَوَعَجِبْتُمْ اَنْ جَآءَكُمْ ذِكْرٌ مِّنْ رَّبِّكُمْ عَلٰى رَجُلٍ مِّنْكُمْ لِيُنْذِرَكُمْ وَلِتَتَّقُوْا وَلَعَلَّكُمْ تُرْحَمُوْنَ ﴿٦٣﴾

65. Tamen ili kulpigis lin pri mensogo, tiam Ni savis lin kaj tiujn, kiuj estis kun li en la arkeo kaj Ni dronigis tiujn, kiuj rifuzis Niajn signojn. Vere ili estis blinda popolo.

فَكَذَّبُوْهُ فَاَنْجَيْنٰهُ وَالَّذِيْنَ مَعَهٗ فِي الْفُلْكِ وَاَغْرَقْنَا الَّذِيْنَ كَذَّبُوْا بِاٰيٰتِنَا ؕ اِنَّهُمْ كَانُوْا قَوْمًا عَمِيْنَ ﴿٦٤﴾ ع ١٣

66. Al la Aadanoj Ni sendis ilian fraton Hūdon. Li diris: "Ho mia popolo, adoru Allahon. Vi havas neniun alian Dion ol Lin. Ĉu vi ne volas esti justaj? ".

وَاِلٰى عَادٍ اَخَاهُمْ هُوْدًا ؕ قَالَ يٰقَوْمِ اعْبُدُوا اللّٰهَ مَا لَكُمْ مِّنْ اِلٰهٍ غَيْرُهٗ ؕ اَفَلَا تَتَّقُوْنَ ﴿٦٥﴾

67. Diris la estroj miskredantaj de lia popolo: "Vere ni vidas vin trempita en malsaĝeco, kaj vere ni juĝas vin mensogulo".

قَالَ الْمَلَاُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا مِنْ قَوْمِهٖٓ اِنَّا لَنَرٰىكَ فِيْ سَفَاهَةٍ وَّاِنَّا لَنَظُنُّكَ مِنَ الْكٰذِبِيْنَ ﴿٦٦﴾

68. Li respondis: "Ho mia popolo, ne estas malsaĝeco en mi; kontraŭe, mi estas sendito de la Sinjoro de l' Universo.

قَالَ يٰقَوْمِ لَيْسَ بِيْ سَفَاهَةٌ وَّلٰكِنِّيْ رَسُوْلٌ مِّنْ رَّبِّ الْعٰلَمِيْنَ ﴿٦٧﴾

اُبَلِّغُكُمْ رِسٰلٰتِ رَبِّيْ وَاَنَا لَكُمْ نَاصِحٌ اَمِيْنٌ ﴿٦٨﴾

اَوَعَجِبْتُمْ اَنْ جَآءَكُمْ ذِكْرٌ مِّنْ رَّبِّكُمْ عَلٰى رَجُلٍ مِّنْكُمْ لِيُنْذِرَكُمْ ؕ وَاذْكُرُوْٓا اِذْ جَعَلَكُمْ خُلَفَآءَ مِنْ

بَعْدِ قَوْمِ نُوحٍ وَّزَادَكُمْ فِي الْخَلْقِ بَصْۜطَةً ۚ فَاذْكُرُوٓا
اٰلَآءَ اللّٰهِ لَعَلَّكُمْ تُفْلِحُوْنَ ﴿٦٩﴾

69. Mi alportas al vi la bonan novaĵon de mia Sinjoro, kaj por vi mi estas sincera konsilanto.

قَالُوْٓا اَجِئْتَنَا لِنَعْبُدَ اللّٰهَ وَحْدَهٗ وَنَذَرَ مَا كَانَ
يَعْبُدُ اٰبَآؤُنَا ۚ فَاْتِنَا بِمَا تَعِدُنَآ اِنْ كُنْتَ مِنَ
الصّٰدِقِيْنَ ﴿٧٠﴾

70. Ĉu vi miras, ĉar venis al vi la admono de via Sinjoro pere de homo el via mezo, por ke li admonu vin? Memoru, kiam Li igis vin heredantoj de la popolo de Noa, kaj igis vin pli grandaj je staturo. Memoru la bonfarojn de Allah, por ke vi estu sukcesaj".

قَالَ قَدْ وَقَعَ عَلَيْكُمْ مِّنْ رَّبِّكُمْ رِجْسٌ وَّغَضَبٌ ۜ
اَتُجَادِلُوْنَنِيْ فِيْٓ اَسْمَآءٍ سَمَّيْتُمُوْهَآ اَنْتُمْ وَاٰبَآؤُكُمْ
مَّا نَزَّلَ اللّٰهُ بِهَا مِنْ سُلْطٰنٍ ۚ فَانْتَظِرُوْٓا اِنِّيْ مَعَكُمْ
مِّنَ الْمُنْتَظِرِيْنَ ﴿٧١﴾

71. Ili diris: "Ĉu vi venis al ni, por ke ni adoru Allahon, nur Lin, kaj forlasu tion, kion kutimis adori niaj prapatroj? Alportu tion, pri kio vi minacas, se vi estas verama! ".

فَاَنْجَيْنٰهُ وَالَّذِيْنَ مَعَهٗ بِرَحْمَةٍ مِّنَّا وَقَطَعْنَا دَابِرَ
الَّذِيْنَ كَذَّبُوْا بِاٰيٰتِنَا ۖ وَمَا كَانُوْا مُؤْمِنِيْنَ ﴿٧٢﴾

72. Li respondis: "Vere jam falis sur vin la puno kaj la kolero de via Sinjoro. Ĉu vi volas disputi kun mi pri nomoj, kiujn vi nomis – vi kaj viaj prapatroj –, por kiuj Allah ne sendis iun pravigon? Atendu do, mi vere ankaŭ atendos kun vi".

وَاِلٰى ثَمُوْدَ اَخَاهُمْ صٰلِحًا ۘ قَالَ يٰقَوْمِ اعْبُدُوا اللّٰهَ مَا
لَكُمْ مِّنْ اِلٰهٍ غَيْرُهٗ ۜ قَدْ جَآءَتْكُمْ بَيِّنَةٌ مِّنْ رَّبِّكُمْ ۜ
هٰذِهٖ نَاقَةُ اللّٰهِ لَكُمْ اٰيَةً فَذَرُوْهَا تَاْكُلْ فِيْٓ اَرْضِ
اللّٰهِ وَلَا تَمَسُّوْهَا بِسُوْٓءٍ فَيَاْخُذَكُمْ عَذَابٌ اَلِيْمٌ ﴿٧٣﴾

73. Poste Ni savis lin kaj tiujn, kiuj estis kun li, pro Nia kompato, kaj Ni fortrancis la lastan restaĵon de tiuj, kiuj rifuzis Niajn signojn kaj ne estis kredantoj.

وَاذْكُرُوْٓا اِذْ جَعَلَكُمْ خُلَفَآءَ مِنْۢ بَعْدِ عَادٍ وَّبَوَّاَكُمْ
فِي الْاَرْضِ تَتَّخِذُوْنَ مِنْ سُهُوْلِهَا قُصُوْرًا وَّتَنْحِتُوْنَ
الْجِبَالَ بُيُوْتًا ۚ فَاذْكُرُوْٓا اٰلَآءَ اللّٰهِ وَلَا تَعْثَوْا فِي
الْاَرْضِ مُفْسِدِيْنَ ﴿٧٤﴾

74. Al la Tamŭdoj Ni sendis ilian fraton Sŭâlehon. Li diris: "Ho mia popolo, adoru Allahon, vi ne havas alian Dion ol Lin. Vere venis al vi evidenta signo de via Sinjoro – tiu kamelino de Allah, signo por vi. Lasu ĝin paŝti sur la tero de Allah kaj neniel malutilu al ĝi, alie trafus vin dolora puno.

قَالَ الْمَلَاُ الَّذِيْنَ اسْتَكْبَرُوْا مِنْ قَوْمِهٖ لِلَّذِيْنَ
اسْتُضْعِفُوْا لِمَنْ اٰمَنَ مِنْهُمْ اَتَعْلَمُوْنَ اَنَّ صٰلِحًا
مُّرْسَلٌ مِّنْ رَّبِّهٖ ۭ قَالُوْٓا اِنَّا بِمَآ اُرْسِلَ بِهٖ مُؤْمِنُوْنَ ﴿٧٥﴾

75. Kaj memoru, kiam Li igis vin heredantoj de la Aadanoj, kaj Li asignis al vi restadejon en la lando; vi konstruas palacojn en ĝiaj ebenaĵoj kaj elfosas loĝejojn en la montoj. Memoru la bonfarojn de Allah kaj ne estigu krime malfeliĉon sur la tero".

قَالَ الَّذِيْنَ اسْتَكْبَرُوْٓا اِنَّا بِالَّذِيْٓ اٰمَنْتُمْ بِهٖ كٰفِرُوْنَ ﴿٧٦﴾

76. Diris la estroj fieregaj de lia popolo al tiuj, kiuj estis rigardataj kiel malfortaj – tiuj estis la kredantoj –: "Ĉu vi opinias, ke Sŭ-

āleh estas sendito de lia Sinjoro? ". Ili respondis: "Vere ni kredas je tio, kun kio li estas sendita".

77. Tiam diris la fieruloj: "Ni ne kredas je tio, je kio vi kredas".

78. Poste ili buĉis la kamelinon, ribelante kontraŭ la ordono de sia Sinjoro kaj diris: "Ho Sŭāleh, alportu al ni tion, pri kio vi minacas, se vi estas unu el la senditoj".

79. Poste ekkaptis ilin la tertremo, kaj la matenon sekvantan ili kuŝis mortintaj sur la plankoj en siaj domoj.

80. Tiam li turnis sin for de ili kaj diris: "Ho mia popolo, mi vere portis al vi la senditaĵon de mia Sinjoro kaj proponis al vi sinceran konsilon, sed vi ne amas la sincerajn konsilantojn".

30. Ho vi, kredantoj! Se vi respektegas Allahon, Li donos al vi distingilon, kaj forprenos de vi vian malbonecon kaj pardonos al vi. Allah estas la Posedanto de grandega graco.

31. Memoru, kiam la miskredantoj intrigis kontraŭ vi, por kapti aŭ mortigi vin aŭ forpeli vin. Ili projektis kaj Allah ankaŭ projektis, sed Allah estas la pli bona Projektanto.

32. Kiam Niaj signoj estas proklamataj al ili, ili diras: "Certe ni aŭdas, kaj, se ni volus, ni certe povus diri la samon. Tio ja nur estas la fabeloj de la praavoj".

33. Memoru, kiam ili diris: "Ho Allah! Se vere tio estas la vero venanta de Vi, pluvigu sur nin ŝtonojn el la ĉielo, aŭ donu al ni doloran turmenton".

34. Allah tamen ne volis puni ilin, ĉar vi estis inter ili, kaj Allah ne volis puni ilin, ĉar ili serĉis pardonon.

35. Kiun senkulpigon ili nun havas, por ke Allah ne punu ilin, ĉar ili malhelpas aliajn ĉe la sankta moskeo, kvankam ili ne estas ĝiaj kultantoj? Ĝiaj kultantoj estas nur la justuloj, sed la plej multaj el ili ne scias tion,

36. kaj ilia preĝo antaŭ la domo estas nenio alia ol fumi kaj aplaŭdi: "Gustumu do la turmenton, ĉar vi estis miskredantoj! ".

37. Vere la miskredantoj disdonas siajn proprajojn, por deklini de la afero de Allah. Ili

فُرْقَانًا وَّيُكَفِّرْ عَنْكُمْ سَيِّاٰتِكُمْ وَيَغْفِرْ لَكُمْ ۗ وَاللّٰهُ
ذُو الْفَضْلِ الْعَظِيْمِ ﴿٢٩﴾
وَاِذْ يَمْكُرُ بِكَ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا لِيُثْبِتُوْكَ اَوْ يَقْتُلُوْكَ اَوْ
يُخْرِجُوْكَ ۗ وَيَمْكُرُوْنَ وَيَمْكُرُ اللّٰهُ ۗ وَاللّٰهُ خَيْرُ
الْمٰكِرِيْنَ ﴿٣٠﴾
وَاِذَا تُتْلٰى عَلَيْهِمْ اٰيٰتُنَا قَالُوْا قَدْ سَمِعْنَا لَوْ نَشَآءُ
لَقُلْنَا مِثْلَ هٰذَآ ۙ اِنْ هٰذَآ اِلَّآ اَسَاطِيْرُ الْاَوَّلِيْنَ ﴿٣١﴾
وَاِذْ قَالُوا اللّٰهُمَّ اِنْ كَانَ هٰذَا هُوَ الْحَقَّ مِنْ عِنْدِكَ
فَاَمْطِرْ عَلَيْنَا حِجَارَةً مِّنَ السَّمَآءِ اَوِ ائْتِنَا بِعَذَابٍ
اَلِيْمٍ ﴿٣٢﴾
وَمَا كَانَ اللّٰهُ لِيُعَذِّبَهُمْ وَاَنْتَ فِيْهِمْ ۚ وَمَا كَانَ
اللّٰهُ مُعَذِّبَهُمْ وَهُمْ يَسْتَغْفِرُوْنَ ﴿٣٣﴾
وَمَا لَهُمْ اَلَّا يُعَذِّبَهُمُ اللّٰهُ وَهُمْ يَصُدُّوْنَ عَنِ
الْمَسْجِدِ الْحَرَامِ وَمَا كَانُوْٓا اَوْلِيَآءَهٗ ۗ اِنْ اَوْلِيَآؤُهٗٓ
اِلَّا الْمُتَّقُوْنَ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَهُمْ لَا يَعْلَمُوْنَ ﴿٣٤﴾
وَمَا كَانَ صَلَاتُهُمْ عِنْدَ الْبَيْتِ اِلَّا مُكَآءً وَّتَصْدِيَةً ۗ
فَذُوْقُوا الْعَذَابَ بِمَا كُنْتُمْ تَكْفُرُوْنَ ﴿٣٥﴾
اِنَّ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا يُنْفِقُوْنَ اَمْوَالَهُمْ لِيَصُدُّوْا عَنْ
سَبِيْلِ اللّٰهِ ۗ فَسَيُنْفِقُوْنَهَا ثُمَّ تَكُوْنُ عَلَيْهِمْ حَسْرَةً
ثُمَّ يُغْلَبُوْنَ ۗ وَالَّذِيْنَ كَفَرُوْٓا اِلٰى جَهَنَّمَ يُحْشَرُوْنَ ﴿٣٦﴾
لِيَمِيْزَ اللّٰهُ الْخَبِيْثَ مِنَ الطَّيِّبِ وَيَجْعَلَ الْخَبِيْثَ
بَعْضَهٗ عَلٰى بَعْضٍ فَيَرْكُمَهٗ جَمِيْعًا فَيَجْعَلَهٗ فِيْ جَهَنَّمَ

أُولَٰئِكَ هُمُ الْخَاسِرُونَ ﴿٣٧﴾

certe plue disdonas ilin, poste ili pentas pro tio, poste ili estos venkitaj. La miskredantoj estos kunvenigitaj en la inferon,

قُل لِّلَّذِينَ كَفَرُوا إِن يَنتَهُوا يُغْفَرْ لَهُم مَّا قَدْ سَلَفَ ۖ وَإِن يَعُودُوا فَقَدْ مَضَتْ سُنَّتُ الْأَوَّلِينَ ﴿٣٨﴾

38. por ke Allah disigu la malbonulojn disde la bonuloj, kaj kunigu la malbonulojn unu kun la alia, kaj amasigu ilin ĉiujn kune, kaj ĵetu ilin en la inferon. Vere ili estos la perdantoj.

وَقَاتِلُوهُمْ حَتَّىٰ لَا تَكُونَ فِتْنَةٌ وَيَكُونَ الدِّينُ كُلُّهُ لِلَّهِ ۚ فَإِنِ انتَهَوْا فَإِنَّ اللَّهَ بِمَا يَعْمَلُونَ بَصِيرٌ ﴿٣٩﴾

39. Parolu al la miskredantoj: se ili forlasos, al ili estos pardonitaj la pasintaĵoj. Se ili tamen returne iros, tiam ili sciu, ke al la praavoj jam estis donita ekzemplo.

وَإِن تَوَلَّوْا فَاعْلَمُوا أَنَّ اللَّهَ مَوْلَاكُمْ ۚ نِعْمَ الْمَوْلَىٰ وَنِعْمَ النَّصِيرُ ﴿٤٠﴾

40. Batalu kontraŭ ili, ĝis ne plu estos persekuto, kaj la religio de ĉiuj estos tiu de Allah. Se ili tamen forlasos, sciu, ke Allah bone vidas, kion ili faras.

وَاعْلَمُوا أَنَّمَا غَنِمْتُم مِّن شَيْءٍ فَأَنَّ لِلَّهِ خُمُسَهُ وَلِلرَّسُولِ وَلِذِي الْقُرْبَىٰ وَالْيَتَامَىٰ وَالْمَسَاكِينِ وَابْنِ السَّبِيلِ ۙ إِن كُنتُمْ آمَنتُم بِاللَّهِ وَمَا أَنزَلْنَا عَلَىٰ عَبْدِنَا يَوْمَ الْفُرْقَانِ يَوْمَ الْتَقَى الْجَمْعَانِ ۗ وَاللَّهُ عَلَىٰ كُلِّ شَيْءٍ قَدِيرٌ ﴿٤١﴾

41. Se ili turnas sin for, sciu, ke Allah estas via protektanto; kiel bonega protektanto kaj kiel bonega helpanto!

* Fino de la 9-a parto

إِذْ أَنتُم بِالْعُدْوَةِ الدُّنْيَا وَهُم بِالْعُدْوَةِ الْقُصْوَىٰ وَالرَّكْبُ أَسْفَلَ مِنكُمْ ۚ وَلَوْ تَوَاعَدتُّمْ لَاخْتَلَفْتُمْ فِي الْمِيعَادِ ۙ وَلَٰكِن لِّيَقْضِيَ اللَّهُ أَمْرًا كَانَ مَفْعُولًا لِّيَهْلِكَ مَنْ هَلَكَ عَن بَيِّنَةٍ وَيَحْيَىٰ مَنْ حَيَّ عَن بَيِّنَةٍ ۗ وَإِنَّ اللَّهَ لَسَمِيعٌ عَلِيمٌ ﴿٤٢﴾

42. Kaj sciu, ke el ĉio, kion vi akiras en batalo, kvinono apartenas al Allah kaj al la sendito kaj al la parencoj kaj al la orfoj kaj al la malriĉuloj kaj al la vojiranto, se vi kredas je Allah kaj je tio, kion Ni sendis al Nia servanto en la tago de la decido, en la tago, en kiu la du armeoj renkontiĝis* – Allah havas povon super ĉiuj aferoj –,

إِذْ يُرِيكَهُمُ اللَّهُ فِي مَنَامِكَ قَلِيلًا ۖ وَلَوْ أَرَاكَهُمْ كَثِيرًا لَّفَشِلْتُمْ وَلَتَنَازَعْتُمْ فِي الْأَمْرِ وَلَٰكِنَّ اللَّهَ سَلَّمَ ۗ إِنَّهُ عَلِيمٌ بِذَاتِ الصُّدُورِ ﴿٤٣﴾

43. kiam vi estis ĉi-flanke kaj ili estis tiuflanke de la valo, kaj la karavano estis sub vi kaj, se vi estus volintaj konsenti pri io, vi certe estus malkonsentintaj pri la tempo. Tamen okazis, kiel estis necese, por ke Allah okazigu tion, kio devis okazi; kaj por ke mortu, kiu jam mortis per signo evidenta, kaj por ke vivu, kiu jam vivis, per signo evidenta. Vere Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

وَإِذْ يُرِيكُمُوهُمْ إِذِ الْتَقَيْتُمْ فِي أَعْيُنِكُمْ قَلِيلًا وَيُقَلِّلُكُمْ فِي أَعْيُنِهِمْ لِيَقْضِيَ اللَّهُ أَمْرًا كَانَ مَفْعُولًا

* Batalo apud Badr

وَإِلَى اللَّهِ تُرْجَعُ الْأُمُورُ ﴿٤٤﴾

44. Memoru, kiam Allah montris al vi la malamikojn malmultaj en sonĝo. Se Li estus montrinta ilin multaj, vi estus malkuraĝiĝintaj kaj disputintaj pri la afero; sed Allah savis vin. Vere Li bone konas la internon de la brustoj.

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا إِذَا لَقِيتُمْ فِئَةً فَاثْبُتُوا وَاذْكُرُوا اللَّهَ كَثِيرًا لَعَلَّكُمْ تُفْلِحُونَ ﴿٤٥﴾

45. Kaj memoru, kiam, en la tempo de la renkonto, Li montris ilin al vi malmultaj por viaj okuloj, kaj montris vin al ili malmultaj por iliaj okuloj, por ke Allah okazigu aferon, kiu devis okazi. Al Allah revenas ĉiuj aferoj.

وَأَطِيعُوا اللَّهَ وَرَسُولَهُ وَلَا تَنَازَعُوا فَتَفْشَلُوا وَتَذْهَبَ رِيحُكُمْ وَاصْبِرُوا إِنَّ اللَّهَ مَعَ الصَّابِرِينَ ﴿٤٦﴾

46. Ho vi, kredantoj! Kiam vi renkontas armeon, estu persistaj kaj memoru Allahon ofte, por ke vi estu sukcesaj.

وَلَا تَكُونُوا كَالَّذِينَ خَرَجُوا مِن دِيَارِهِم بَطَرًا وَرِئَاءَ النَّاسِ وَيَصُدُّونَ عَن سَبِيلِ اللَّهِ وَاللَّهُ بِمَا يَعْمَلُونَ مُحِيطٌ ﴿٤٧﴾

47. Obeu Allahon kaj Lian senditon kaj ne disputu unu kun la alia, por ke vi ne malkuraĝiĝu, kaj por ke la forto ne forlasu vin. Estu persistaj. Vere Allah estas kun la persistemuloj.

وَإِذْ زَيَّنَ لَهُمُ الشَّيْطَانُ أَعْمَالَهُمْ وَقَالَ لَا غَالِبَ لَكُمُ الْيَوْمَ مِنَ النَّاسِ وَإِنِّي جَارٌ لَّكُمْ فَلَمَّا تَرَاءَتِ الْفِئَتَانِ نَكَصَ عَلَىٰ عَقِبَيْهِ وَقَالَ إِنِّي بَرِيءٌ مِّنكُمْ إِنِّي أَرَىٰ مَا لَا تَرَوْنَ إِنِّي أَخَافُ اللَّهَ وَاللَّهُ شَدِيدُ الْعِقَابِ ﴿٤٨﴾

48. Ne estu kiel tiuj, kiuj eliris fanfarone el siaj domoj, por esti vidataj de la gentoj, kaj deflankigas de la afero de Allah. Allah ĉirkaŭas ĉion, kion ili faras.

إِذْ يَقُولُ الْمُنَافِقُونَ وَالَّذِينَ فِي قُلُوبِهِم مَّرَضٌ غَرَّ هَٰؤُلَاءِ دِينُهُمْ وَمَن يَتَوَكَّلْ عَلَى اللَّهِ فَإِنَّ اللَّهَ عَزِيزٌ حَكِيمٌ ﴿٤٩﴾

49. Kiam Satano igis iliajn agojn ŝajni bonaj al ili kaj diris: "En ĉi tiu tago neniu povas fari ion ajn kontraŭ vi, ĉar mi estas via subtenanto". Sed kiam la du armeoj vidis unu la alian, li turnis sin malantaŭen sur siaj kalkanoj kaj diris: "Mi nenion havas por fari kun vi. Mi vidas, kion vi ne vidas. Mi timas Allahon. Allah estas severa je l' puno! ".

وَلَوْ تَرَىٰ إِذْ يَتَوَفَّى الَّذِينَ كَفَرُوا الْمَلَائِكَةُ يَضْرِبُونَ وُجُوهَهُمْ وَأَدْبَارَهُمْ وَذُوقُوا عَذَابَ الْحَرِيقِ ﴿٥٠﴾

50. Kiam diris la hipokrituloj kaj tiuj, en kies koroj estas malsano: "Ilia religio trompis ilin! ". Kiu tamen konfidas je Allah, sciu: vere Allah estas ĉiopova, saĝa.

ذَٰلِكَ بِمَا قَدَّمَتْ أَيْدِيكُمْ وَأَنَّ اللَّهَ لَيْسَ بِظَلَّامٍ لِّلْعَبِيدِ ﴿٥١﴾

51. Se vi povus vidi, kiel la anĝeloj forprenas la animojn de la miskredantoj, batante

كَدَأْبِ آلِ فِرْعَوْنَ وَالَّذِينَ مِن قَبْلِهِمْ كَفَرُوا بِآيَاتِ اللَّهِ فَأَخَذَهُمُ اللَّهُ بِذُنُوبِهِمْ إِنَّ اللَّهَ

iliajn vizaĝojn kaj dorsojn, kaj dirante: "Gustumu do la punon de la brulado! ".

52. Tio estas pro la faroj de iliaj manoj. Sciu, ke Allah neniam estas maljusta kontraŭ la servantoj.

53. Kiel estis la popolo de Faraono kaj tiuj antaŭ ili: ili rifuzis la signojn de Allah. Tial Allah punis ilin pro iliaj pekoj. Vere Allah estas ĉiopova, severa je l' puno.

54. Tio estas, ĉar Allah neniam ŝanĝus gracon, kiun Li sendis al iu popolo – krom se ili ŝanĝas siajn proprajn animojn – kaj ĉar Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

55. Kiel estis la popolo de Faraono kaj tiuj antaŭ ili. Ili rifuzis la signojn de sia Sinjoro. Tial Ni neniigis ilin pro iliaj pekoj kaj Ni dronigis la popolon de Faraono. Ili ĉiuj estis malbonfarantoj.

56. Vere la plej malbonaj estaĵoj antaŭ Allah estas la miskredantoj, ĉar ili miskredas;

57. tiuj, kun kiuj vi faris aliancon; poste ili rompas sian aliancon ĉiufoje, kaj ili ne respektegas Dion.

58. Tial, kiam vi kaptas ilin en batalo, dispelu kun ili ankaŭ iliajn sekvantojn, por ke ili estu admonitaj.

59. Kiam vi timas perfidon de iu popolo, reĵetu al ili ilian aliancon. Vere Allah ne amas la perfidulojn.

60. Ne lasu la miskredantojn supozi, ke ili superis Nin. Vere ili ne venkos.

61. Armu vin kontraŭ ili kaj kolektu, kion ajn vi kapablas rilate al batalantoj kaj rajdistaro, tiel ke tiuj teruru la malamikon de

قَوِيٌّ شَدِيدُ الْعِقَابِ ﴿٥٢﴾

ذٰلِكَ بِأَنَّ اللّٰهَ لَمْ يَكُ مُغَيِّرًا نِّعْمَةً أَنْعَمَهَا عَلٰى قَوْمٍ
حَتّٰى يُغَيِّرُوا مَا بِأَنْفُسِهِمْ ۙ وَأَنَّ اللّٰهَ سَمِيعٌ عَلِيمٌ ﴿٥٣﴾

كَدَأْبِ اٰلِ فِرْعَوْنَ ۙ وَالَّذِينَ مِنْ قَبْلِهِمْ ۚ كَذَّبُوا
بِاٰيٰتِ رَبِّهِمْ فَأَهْلَكْنٰهُمْ بِذُنُوبِهِمْ وَأَغْرَقْنَا اٰلَ
فِرْعَوْنَ ۚ وَكُلٌّ كَانُوا ظٰلِمِينَ ﴿٥٤﴾

إِنَّ شَرَّ الدَّوَابِّ عِنْدَ اللّٰهِ الَّذِينَ كَفَرُوا فَهُمْ لَا
يُؤْمِنُونَ ﴿٥٥﴾

الَّذِينَ عٰهَدْتَ مِنْهُمْ ثُمَّ يَنْقُضُونَ عَهْدَهُمْ
فِي كُلِّ مَرَّةٍ وَهُمْ لَا يَتَّقُونَ ﴿٥٦﴾

فَإِمَّا تَثْقَفَنَّهُمْ فِي الْحَرْبِ فَشَرِّدْ بِهِمْ مَنْ خَلْفَهُمْ
لَعَلَّهُمْ يَذَّكَّرُونَ ﴿٥٧﴾

وَإِمَّا تَخَافَنَّ مِنْ قَوْمٍ خِيَانَةً فَانْبِذْ إِلَيْهِمْ عَلٰى
سَوَاءٍ ۗ إِنَّ اللّٰهَ لَا يُحِبُّ الْخَائِنِينَ ﴿٥٨﴾ ع

وَلَا يَحْسَبَنَّ الَّذِينَ كَفَرُوا سَبَقُوا ۗ إِنَّهُمْ لَا
يُعْجِزُونَ ﴿٥٩﴾

وَأَعِدُّوا لَهُمْ مَا اسْتَطَعْتُمْ مِنْ قُوَّةٍ وَمِنْ رِبَاطِ
الْخَيْلِ تُرْهِبُونَ بِهِ عَدُوَّ اللّٰهِ وَعَدُوَّكُمْ وَاٰخَرِينَ
مِنْ دُونِهِمْ ۚ لَا تَعْلَمُونَهُمْ ۚ اللّٰهُ يَعْلَمُهُمْ ۚ وَمَا
تُنْفِقُوا مِنْ شَيْءٍ فِي سَبِيلِ اللّٰهِ يُوَفَّ إِلَيْكُمْ وَأَنْتُمْ
لَا تُظْلَمُونَ ﴿٦٠﴾

وَإِنْ جَنَحُوا لِلسَّلْمِ فَاجْنَحْ لَهَا وَتَوَكَّلْ عَلَى اللّٰهِ ۚ

إِنَّهُ هُوَ السَّمِيعُ الْعَلِيمُ ﴿٦٢﴾

Allah kaj vian malamikon kaj krom ili ankaŭ aliajn, kiujn vi ne konas; Allah konas ilin. Ĉio, kion vi disdonas por la afero de Allah, estos redonita al vi, kaj vi ne suferos maljustecon.

وَإِن يُرِيدُوٓا أَن يَخْدَعُوكَ فَإِنَّ حَسْبَكَ ٱللَّهُ ۚ هُوَ
ٱلَّذِىٓ أَيَّدَكَ بِنَصْرِهِۦ وَبِٱلْمُؤْمِنِينَ ﴿٦٣﴾

62. Se ili inklinigas al la paco, faru la samon kaj konfidu je Allah. Vere Li estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia.

وَأَلَّفَ بَيْنَ قُلُوبِهِمْ ۚ لَوْ أَنفَقْتَ مَا فِى ٱلْأَرْضِ جَمِيعًا
مَّآ أَلَّفْتَ بَيْنَ قُلُوبِهِمْ وَلَٰكِنَّ ٱللَّهَ أَلَّفَ بَيْنَهُمْ ۚ إِنَّهُۥ
عَزِيزٌ حَكِيمٌ ﴿٦٤﴾

63. Se ili tamen intencas trompi vin, vere Allah sufiĉas al vi. Estas Li Tiu, kiu subtenas vin per Sia helpo kaj per la kredantoj.

يَٰٓأَيُّهَا ٱلنَّبِىُّ حَسْبُكَ ٱللَّهُ وَمَنِ ٱتَّبَعَكَ مِنَ ٱلْمُؤْمِنِينَ ﴿٦٥﴾

64. Kaj Li unuigis iliajn korojn. Eĉ se vi uzus ĉion sur la tero, vi ne estus sukcesinta unuigi iliajn korojn, sed Allah unuigis ilin. Vere Li estas ĉiopova, saĝa.

يَٰٓأَيُّهَا ٱلنَّبِىُّ حَرِّضِ ٱلْمُؤْمِنِينَ عَلَى ٱلْقِتَالِ ۚ إِن يَكُن
مِّنكُمْ عِشْرُونَ صَٰبِرُونَ يَغْلِبُوا۟ مِاْئَتَيْنِ ۚ وَإِن
يَكُن مِّنكُم مِّاْئَةٌ يَغْلِبُوٓا۟ أَلْفًا مِّنَ ٱلَّذِينَ كَفَرُوا۟
بِأَنَّهُمْ قَوْمٌ لَّا يَفْقَهُونَ ﴿٦٦﴾

65. Ho vi, Profeto! Allah sufiĉas por vi kaj por tiuj kredantoj, kiuj sekvas vin.

ٱلْـَٰٔنَ خَفَّفَ ٱللَّهُ عَنكُمْ وَعَلِمَ أَنَّ فِيكُمْ ضَعْفًا ۚ فَإِن
يَكُن مِّنكُم مِّاْئَةٌ صَابِرَةٌ يَغْلِبُوا۟ مِاْئَتَيْنِ ۚ وَإِن يَكُن مِّنكُمْ
أَلْفٌ يَغْلِبُوٓا۟ أَلْفَيْنِ بِإِذْنِ ٱللَّهِ ۗ وَٱللَّهُ مَعَ ٱلصَّٰبِرِينَ ﴿٦٧﴾

66. Ho vi, Profeto! Incitu la kredantojn al la batalo. Eĉ se estas nur dudek persistemaj inter ili, ili venkos ducent, kaj se estas nur cent, ili venkos mil miskredantojn, ĉar tiuj estas popolo, kiu ne komprenas.

مَا كَانَ لِنَبِىٍّ أَن يَكُونَ لَهُۥٓ أَسْرَىٰ حَتَّىٰ يُثْخِنَ فِى
ٱلْأَرْضِ ۚ تُرِيدُونَ عَرَضَ ٱلدُّنْيَا ۖ وَٱللَّهُ يُرِيدُ ٱلْءَاخِرَةَ ۗ
وَٱللَّهُ عَزِيزٌ حَكِيمٌ ﴿٦٨﴾

67. Sed nun Allah plifaciligis vian taskon, ĉar Li scias, ke en vi estas malforto. Do se inter vi estas cent persistemuloj, ili venkos du cent, kaj se estas inter vi mil, ili venkos du mil per la permeso de Allah. Allah estas kun la persistemuloj.

لَّوْلَا كِتَٰبٌ مِّنَ ٱللَّهِ سَبَقَ لَمَسَّكُمْ فِيمَآ أَخَذْتُمْ
عَذَابٌ عَظِيمٌ ﴿٦٩﴾

68. Ne konvenas al profeto posedi militkaptitojn, antaŭ ol li devos batali en la lando. Vi volas la proprajojn de ĉi tiu mondo, Allah tamen volas por vi la vivon venontan. Allah estas ĉiopova, saĝa.

فَكُلُوا۟ مِمَّا غَنِمْتُمْ حَلَٰلًا طَيِّبًا ۖ وَٱتَّقُوا۟ ٱللَّهَ ۚ إِنَّ ٱللَّهَ
غَفُورٌ رَّحِيمٌ ﴿٧٠﴾

69. Se ne estus leĝo de Allah, tiam grava malfeliĉo estus trafinta vin pro tio, kion vi prenis.

يَٰٓأَيُّهَا ٱلنَّبِىُّ قُل لِّمَن فِىٓ أَيْدِيكُم مِّنَ ٱلْأَسْرَىٰٓ

إِن يَعْلَمِ اللَّهُ فِي قُلُوبِكُمْ خَيْرًا يُؤْتِكُمْ خَيْرًا مِّمَّا أُخِذَ
مِنكُمْ وَيَغْفِرْ لَكُمْ ۚ وَاللَّهُ غَفُورٌ رَّحِيمٌ ﴿٧٠﴾
وَإِن يُرِيدُوا خِيَانَتَكَ فَقَدْ خَانُوا اللَّهَ مِن قَبْلُ
فَأَمْكَنَ مِنْهُمْ ۗ وَاللَّهُ عَلِيمٌ حَكِيمٌ ﴿٧١﴾
إِنَّ الَّذِينَ آمَنُوا وَهَاجَرُوا وَجَاهَدُوا بِأَمْوَالِهِمْ وَ
أَنفُسِهِمْ فِي سَبِيلِ اللَّهِ وَالَّذِينَ آوَوا وَّنَصَرُوا
أُولَٰئِكَ بَعْضُهُمْ أَوْلِيَاءُ بَعْضٍ ۚ وَالَّذِينَ آمَنُوا وَ
لَمْ يُهَاجِرُوا مَا لَكُم مِّن وَلَايَتِهِم مِّن شَيْءٍ حَتَّىٰ
يُهَاجِرُوا ۚ وَإِنِ اسْتَنصَرُوكُمْ فِي الدِّينِ فَعَلَيْكُمُ
النَّصْرُ إِلَّا عَلَىٰ قَوْمٍ بَيْنَكُمْ وَبَيْنَهُم مِّيثَاقٌ ۗ وَاللَّهُ
بِمَا تَعْمَلُونَ بَصِيرٌ ﴿٧٢﴾
وَالَّذِينَ كَفَرُوا بَعْضُهُمْ أَوْلِيَاءُ بَعْضٍ ۚ إِلَّا تَفْعَلُوهُ
تَكُن فِتْنَةٌ فِي الْأَرْضِ وَفَسَادٌ كَبِيرٌ ﴿٧٣﴾
وَالَّذِينَ آمَنُوا وَهَاجَرُوا وَجَاهَدُوا فِي سَبِيلِ اللَّهِ
وَالَّذِينَ آوَوا وَّنَصَرُوا أُولَٰئِكَ هُمُ الْمُؤْمِنُونَ حَقًّا ۚ
لَّهُم مَّغْفِرَةٌ وَرِزْقٌ كَرِيمٌ ﴿٧٤﴾
وَالَّذِينَ آمَنُوا مِن بَعْدُ وَهَاجَرُوا وَجَاهَدُوا مَعَكُمْ
فَأُولَٰئِكَ مِنكُمْ ۚ وَأُولُو الْأَرْحَامِ بَعْضُهُمْ أَوْلَىٰ بِبَعْضٍ
فِي كِتَابِ اللَّهِ ۗ إِنَّ اللَّهَ بِكُلِّ شَيْءٍ عَلِيمٌ ﴿٧٥﴾ ع

70. Mangu tion, kion vi kaptis, kiel estas permesite kaj bone, kaj respektegu Allahon. Vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

71. Ho vi, Profeto! Diru al tiuj militkaptitoj, kiuj estas en viaj manoj: "Se Allah vidas bonon en viaj koroj, Li donos al vi ion pli bonan ol tio, kio estas forprenita de vi, kaj Li pardonos vin. Allah estas senkulpigema, pardonema".

72. Se ili tamen intencas perfidon kontraŭ vi, vere ili jam perfidis antaŭe kontraŭ Allah. Li donis al vi povon super ili, kaj Allah estas ĉioscia, saĝa.

73. Vere la kredantoj, kiuj elmigris kaj batalis per siaj proprafoj kaj per sia tuta animo por la afero de Allah kaj gastigis kaj helpis, tiuj estas amikoj unu de la alia. Tamen la kredantoj, kiuj ne elmigris, vi neniel devos respondi pri iliaj proprafoj, ĝis ili elmigros. Se ili tamen serĉas vian helpon je la religio, tiam via devo estas helpi, krom kontraŭ iu popolo, kun kiu vi havas aliancon. Allah vidas, kion vi faras.

74. La miskredantoj, ili estas ankaŭ amikoj unu de la alia. Se vi ne faros tion, estos grava malfeliĉo kaj granda malpaco en la lando.

75. La kredantoj, kiuj elmigris kaj batalis por la afero de Allah kaj gastigis kaj helpis, tiuj estas veraj kredantoj. Por ili estos pardono kaj honora provizafo.

76. Tiuj, kiuj poste kredas kaj elmigras kaj batalas kaj estas kun vi, ili estas el vi. La samsanguloj estas pli proksimaj unu al la alia en la Libro de Allah, ol la aliaj. Vere Allah scias ĉiujn aferojn.

سُوْرَةُ التَّوْبَةِ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino

1. Tio estas liberigo venanta de Allah kaj de Lia sendito, rilate al tiuj idolanoj, kun kiuj vi konkludis aliancon.

2. Tial vojaĝu en la lando kvar monatojn, kaj sciu, ke vi ne povas neniigi la projekton de Allah, kaj ke Li, Allah, humiligos la miskredantojn.

3. Kaj jen proklamaĵo de Allah kaj de Lia sendito al la homoj – en la tago de la granda pilgrimo – ke Allah liberiĝis de la idolanoj kaj same Lia sendito. Se vi do pentos, tio estas pli bona por vi. Se vi tamen forturnas vin, tiam sciu, ke vi ne povas neniigi la projekton de Allah. Kaj anoncu al la miskredantoj doloran turmenton.

4. Krom tiuj el la idolanoj, kiuj konkludis aliancon kun vi kaj neniam perfidis vin kaj neniam subtenis iun ajn kontraŭ vi. Observu la aliancon kun ili. Al tiuj estu fidelaj ĝis la fino de la limtempo. Vere Allah amas la justulojn.

5. Kiam estos pasintaj la monatoj malpermesitaj, mortigu la idolanojn, kie ajn vi trovos ilin kaj kaptu ilin kaj kontraŭstaru ilin, embuskante. Se ili tamen pentos kaj levos la pregon kaj disdonos almozojn, tiam lasu al ili ilian vojon libera. Vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

بَرَآءَةٌ مِّنَ اللّٰهِ وَرَسُوْلِهٖٓ اِلَى الَّذِيْنَ عٰهَدْتُّمْ مِّنَ
الْمُشْرِكِيْنَ ①

فَسِيْحُوْا فِي الْاَرْضِ اَرْبَعَةَ اَشْهُرٍ وَّاعْلَمُوْٓا اَنَّكُمْ
غَيْرُ مُعْجِزِي اللّٰهِ ۙ وَاَنَّ اللّٰهَ مُخْزِي الْكٰفِرِيْنَ ②

وَاَذَانٌ مِّنَ اللّٰهِ وَرَسُوْلِهٖٓ اِلَى النَّاسِ يَوْمَ الْحَجِّ
الْاَكْبَرِ اَنَّ اللّٰهَ بَرِيْٓءٌ مِّنَ الْمُشْرِكِيْنَ ۙ وَرَسُوْلُهٗ ۭ
فَاِنْ تُبْتُمْ فَهُوَ خَيْرٌ لَّكُمْ ۚ وَاِنْ تَوَلَّيْتُمْ فَاعْلَمُوْٓا
اَنَّكُمْ غَيْرُ مُعْجِزِي اللّٰهِ ۭ وَبَشِّرِ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا
بِعَذَابٍ اَلِيْمٍ ۙ ③

اِلَّا الَّذِيْنَ عٰهَدْتُّمْ مِّنَ الْمُشْرِكِيْنَ ثُمَّ لَمْ يَنْقُصُوْكُمْ
شَيْـــًٔا وَّلَمْ يُظَاهِرُوْا عَلَيْكُمْ اَحَدًا فَاَتِمُّوْٓا اِلَيْهِمْ
عَهْدَهُمْ اِلٰى مُدَّتِهِمْ ۭ اِنَّ اللّٰهَ يُحِبُّ الْمُتَّقِيْنَ ④

فَاِذَا انْسَلَخَ الْاَشْهُرُ الْحُرُمُ فَاقْتُلُوا الْمُشْرِكِيْنَ
حَيْثُ وَجَدْتُّمُوْهُمْ وَخُذُوْهُمْ وَاحْصُرُوْهُمْ وَاقْعُدُوْا
لَهُمْ كُلَّ مَرْصَدٍ ۚ فَاِنْ تَابُوْا وَاَقَامُوا الصَّلٰوةَ وَاٰتَوُا
الزَّكٰوةَ فَخَلُّوْا سَبِيْلَهُمْ ۭ اِنَّ اللّٰهَ غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ⑤

وَاِنْ اَحَدٌ مِّنَ الْمُشْرِكِيْنَ اسْتَجَارَكَ فَاَجِرْهُ حَتّٰى يَسْمَعَ
كَلٰمَ اللّٰهِ ثُمَّ اَبْلِغْهُ مَاْمَنَهٗ ۭ ذٰلِكَ بِاَنَّهُمْ قَوْمٌ لَّا
يَعْلَمُوْنَ ⑥ ع

---

* v. la verson 104an; notu, ke ĉi tiu ĉapitro ne komenciĝas per la kutima alvoko (Je la nomo...). Tio estas interpretita per la klarigo, ke ne temas pri memstara ĉapitro, sed nur pri la daŭrigo de la ĉapitro "Al-Anfâl". Laŭ aliaj tradicioj, la nomo de ĉi tiu ĉapitro ankaŭ estas "Al Barâ'a" (la liberigo) (el verso 1a).

كَيْفَ يَكُونُ لِلْمُشْرِكِينَ عَهْدٌ عِنْدَ اللَّهِ وَعِنْدَ رَسُولِهِ
إِلَّا الَّذِينَ عَاهَدْتُمْ عِنْدَ الْمَسْجِدِ الْحَرَامِ ۖ فَمَا
اسْتَقَامُوا لَكُمْ فَاسْتَقِيمُوا لَهُمْ ۚ إِنَّ اللَّهَ يُحِبُّ
الْمُتَّقِينَ ﴿٤﴾

6. Se unu el la idolanoj petas de vi protekton, ricevu lin, ĝis li kapablos ekkompreni la vorton de Allah, poste lasu lin atingi sian celon de sekureco. Tio estas, ĉar ili estas popolo nescianta.

كَيْفَ وَإِنْ يَظْهَرُوا عَلَيْكُمْ لَا يَرْقُبُوا فِيكُمْ إِلًّا
وَلَا ذِمَّةً ۚ يُرْضُونَكُمْ بِأَفْوَاهِهِمْ وَتَأْبَىٰ قُلُوبُهُمْ
وَأَكْثَرُهُمْ فَاسِقُونَ ﴿٨﴾

7. Kiel povas esti alianco inter la miskredantoj kaj Allah kaj Lia sendito, krom por tiuj, kun kiuj vi konkludis aliancon apud la sankta moskeo? Se ili estas fidelaj al vi, vi estu fidelaj al ili. Vere Allah amas la justulojn.

اشْتَرَوْا بِآيَاتِ اللَّهِ ثَمَنًا قَلِيلًا فَصَدُّوا عَنْ سَبِيلِهِ ۚ
إِنَّهُمْ سَاءَ مَا كَانُوا يَعْمَلُونَ ﴿٩﴾

8. Kiel? Ja, se ili venkus vin, ili ne respektus interkonsenton nek parencecon. Ili estus afablaj kun vi per sia buŝo, sed iliaj koroj estus kontraŭ vi. La plej multaj el ili estas perfidaj.

لَا يَرْقُبُونَ فِي مُؤْمِنٍ إِلًّا وَلَا ذِمَّةً ۚ وَأُولَٰئِكَ هُمُ
الْمُعْتَدُونَ ﴿١٠﴾

9. Ili vendas la signojn de Allah por malalta prezo kaj devojigas de Lia afero. Vere malbonega estas tio, kion ili faras.

فَإِنْ تَابُوا وَأَقَامُوا الصَّلَاةَ وَآتَوُا الزَّكَاةَ فَإِخْوَانُكُمْ
فِي الدِّينِ ۗ وَنُفَصِّلُ الْآيَاتِ لِقَوْمٍ يَعْلَمُونَ ﴿١١﴾

10. Ili respektas, rilate al tiu, kiu konfidas je ili, nek aliancon nek parencecon. Ili vere estas transpaŝantoj.

وَإِنْ نَكَثُوا أَيْمَانَهُمْ مِنْ بَعْدِ عَهْدِهِمْ وَطَعَنُوا
فِي دِينِكُمْ فَقَاتِلُوا أَئِمَّةَ الْكُفْرِ ۙ إِنَّهُمْ لَا أَيْمَانَ
لَهُمْ لَعَلَّهُمْ يَنْتَهُونَ ﴿١٢﴾

11. Se ili tamen pentos kaj levos la preĝon kaj disdonos almozojn, tiam vi estu iliaj fratoj en la kredo. Ni klarigas la signojn por popolo scianta.

أَلَا تُقَاتِلُونَ قَوْمًا نَكَثُوا أَيْمَانَهُمْ وَهَمُّوا بِإِخْرَاجِ
الرَّسُولِ وَهُمْ بَدَءُوكُمْ أَوَّلَ مَرَّةٍ ۚ أَتَخْشَوْنَهُمْ ۚ فَاللَّهُ
أَحَقُّ أَنْ تَخْشَوْهُ إِنْ كُنْتُمْ مُؤْمِنِينَ ﴿١٣﴾

12. Se ili tamen rompos siajn ĵurojn, kvankam ili havas aliancon, kaj atakas vian kredon, tiam batalu kontraŭ la estroj de la miskredo – fakte ili ne respektas la ĵuron –, por ke ili forlasu.

قَاتِلُوهُمْ يُعَذِّبْهُمُ اللَّهُ بِأَيْدِيكُمْ وَيُخْزِهِمْ وَيَنْصُرْكُمْ
عَلَيْهِمْ وَيَشْفِ صُدُورَ قَوْمٍ مُؤْمِنِينَ ﴿١٤﴾
وَيُذْهِبْ غَيْظَ قُلُوبِهِمْ ۗ وَيَتُوبُ اللَّهُ عَلَىٰ مَنْ يَشَاءُ ۗ

13. Ĉu vi ne volas batali kontraŭ popolo, kiu rompis siajn ĵurojn kaj volis forpeli la senditon, kvankam estis ili tiuj, kiuj unue komencis agi kontraŭ vi? Ĉu vi timas ilin? Tamen Allah estas pli inda je respektego, se vi estas kredantoj.

14. Batalu kontraŭ ili: Allah punos ilin per viaj manoj kaj humiligos ilin kaj helpos vin

kontraŭ ili kaj resanigos la korojn de la popolo kredanta.

15. Li forigos la koleron el iliaj koroj. Allah turnas Sin favore al tiu, al kiu Li volas. Allah estas ĉioscia, saĝa.

16. Ĉu vi imagas, ke vi estas forlasitaj, kvankam Allah ankoraŭ ne distingis tiujn el vi, kiuj batalis por Lia afero kaj kiuj ne prenis ion ajn kiel amikon krom Allahon kaj Lian senditon kaj la kredantojn? Allah bone scias, kion vi faras.

17. Ne konvenas al idolanoj konservi la moskeojn de Allah, dum ili ankoraŭ atestas kontraŭ si mem la miskredon. Estas ili tiuj, kies verkoj estos vanaj kaj ili restos por ĉiam en la fajro.

18. Konvenas, ke konservu la moskeojn nur tiu, kiu kredas je Allah kaj al la tago venonta kaj levas la preĝon kaj disdonas almozojn kaj neniun timas, krom Allahon. Estas ili tiuj, kiuj estos gvidataj.

19. Ĉu vi rigardas la trinkigon de la pilgrimuloj kaj la zorgon pri la sankta moskeo samvaloraj kiel la kredon je Allah kaj al la vivo venonta kaj la bataladon por la afero de Allah? Tiuj aferoj ne estas samvaloraj antaŭ Allah. Allah ne gvidas la popolon malbonfarantan.

20. Tiuj, kiuj kredas, elmigras kaj batalas por la afero de Allah per siaj propraĵoj kaj per sia animo, ili okupos la plej altan rangon apud Allah, kaj ili estos sukcesaj.

21. Ilia Sinjoro anoncas al ili Sian gracon kaj Sian bonvolon kaj la Paradizon, kie estos porĉiama ĝojo.

22. Tie ili restos eterne. Vere, apud Allah estos grandega rekompenco.

وَاللّٰهُ عَلِيْمٌ حَكِيْمٌ ﴿١٥﴾

اَمْ حَسِبْتُمْ اَنْ تُتْرَكُوْا وَلَمَّا يَعْلَمِ اللّٰهُ الَّذِيْنَ جٰهَدُوْا
مِنْكُمْ وَلَمْ يَتَّخِذُوْا مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ وَلَا رَسُوْلِهٖ وَ
لَا الْمُؤْمِنِيْنَ وَلِيْجَةً ۗ وَاللّٰهُ خَبِيْرٌۢ بِمَا تَعْمَلُوْنَ ﴿١٦﴾

مَا كَانَ لِلْمُشْرِكِيْنَ اَنْ يَّعْمُرُوْا مَسٰجِدَ اللّٰهِ شٰهِدِيْنَ
عَلٰٓى اَنْفُسِهِمْ بِالْكُفْرِ ۗ اُولٰٓئِكَ حَبِطَتْ اَعْمَالُهُمْ ۚ وَ
فِى النَّارِ هُمْ خٰلِدُوْنَ ﴿١٧﴾

اِنَّمَا يَعْمُرُ مَسٰجِدَ اللّٰهِ مَنْ اٰمَنَ بِاللّٰهِ وَالْيَوْمِ الْاٰخِرِ
وَاَقَامَ الصَّلٰوةَ وَاٰتَى الزَّكٰوةَ وَلَمْ يَخْشَ اِلَّا اللّٰهَ فَعَسٰٓى
اُولٰٓئِكَ اَنْ يَّكُوْنُوْا مِنَ الْمُهْتَدِيْنَ ﴿١٨﴾

اَجَعَلْتُمْ سِقَايَةَ الْحَآجِّ وَعِمَارَةَ الْمَسْجِدِ الْحَرَامِ
كَمَنْ اٰمَنَ بِاللّٰهِ وَالْيَوْمِ الْاٰخِرِ وَجٰهَدَ فِىْ سَبِيْلِ
اللّٰهِ ۗ لَا يَسْتَوٗنَ عِنْدَ اللّٰهِ ۗ وَاللّٰهُ لَا يَهْدِى الْقَوْمَ
الظّٰلِمِيْنَ ﴿١٩﴾

اَلَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَهَاجَرُوْا وَجٰهَدُوْا فِىْ سَبِيْلِ اللّٰهِ
بِاَمْوَالِهِمْ وَاَنْفُسِهِمْ ۙ اَعْظَمُ دَرَجَةً عِنْدَ اللّٰهِ ۗ وَ
اُولٰٓئِكَ هُمُ الْفَآئِزُوْنَ ﴿٢٠﴾

يُبَشِّرُهُمْ رَبُّهُمْ بِرَحْمَةٍ مِّنْهُ وَرِضْوَانٍ وَّجَنّٰتٍ لَّهُمْ
فِيْهَا نَعِيْمٌ مُّقِيْمٌ ﴿٢١﴾

خٰلِدِيْنَ فِيْهَآ اَبَدًا ۗ اِنَّ اللّٰهَ عِنْدَهٗٓ اَجْرٌ عَظِيْمٌ ﴿٢٢﴾

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا لَا تَتَّخِذُوْٓا اٰبَآءَكُمْ وَاِخْوَانَكُمْ
اَوْلِيَآءَ اِنِ اسْتَحَبُّوا الْكُفْرَ عَلَى الْاِيْمَانِ ۚ وَمَنْ يَّتَوَلَّهُمْ

مِنكُمْ فَأُولَٰئِكَ هُمُ الظَّالِمُونَ ﴿٢٣﴾

23. Ho vi, kredantoj! Ne prenu viajn patrojn kaj fratojn kiel amikojn, se ili preferas la miskredon al la kredo. Kiu el vi tion faras, tiu estas malbonfaranto.

قُلْ إِن كَانَ آبَاؤُكُمْ وَأَبْنَاؤُكُمْ وَإِخْوَانُكُمْ وَأَزْوَاجُكُمْ
وَعَشِيرَتُكُمْ وَأَمْوَالٌ اقْتَرَفْتُمُوهَا وَتِجَارَةٌ تَخْشَوْنَ
كَسَادَهَا وَمَسَاكِنُ تَرْضَوْنَهَا أَحَبَّ إِلَيْكُم مِّنَ اللَّهِ
وَرَسُولِهِ وَجِهَادٍ فِي سَبِيلِهِ فَتَرَبَّصُوا حَتَّىٰ يَأْتِيَ

ع اللَّهُ بِأَمْرِهِ ۗ وَاللَّهُ لَا يَهْدِي الْقَوْمَ الْفَاسِقِينَ ﴿٢٤﴾

24. Diru: "Se viaj patroj kaj filoj kaj fratoj kaj edzinoj kaj parencoj kaj proprafoj, kiujn vi kolektis, kaj la negoco, kies pereon vi timas, kaj la hejmoj, kiujn vi amas, estas pli karaj al vi ol Allah kaj Lia sendito kaj la batalo por Lia afero, tiam atendu, ĝis Allah venos kun Sia juĝo. Allah ne gvidas la popolon malobeeman.

لَقَدْ نَصَرَكُمُ اللَّهُ فِي مَوَاطِنَ كَثِيرَةٍ ۙ وَيَوْمَ حُنَيْنٍ ۙ
إِذْ أَعْجَبَتْكُمْ كَثْرَتُكُمْ فَلَمْ تُغْنِ عَنكُمْ شَيْئًا وَ
ضَاقَتْ عَلَيْكُمُ الْأَرْضُ بِمَا رَحُبَتْ ثُمَّ وَلَّيْتُم
مُّدْبِرِينَ ﴿٢٥﴾

25. Vere Allah jam helpis vin en multaj batalkampoj kaj en la tago de Hunajn, kiam via granda nombro igis vin tromemfidaj – tamen ĝi neniel helpis vin – kaj la lando, malgraŭ sia amplekso, fariĝis mallarĝa por vi, kaj vi tiam turnis vin for fuĝante.

ثُمَّ أَنزَلَ اللَّهُ سَكِينَتَهُ عَلَىٰ رَسُولِهِ وَعَلَى الْمُؤْمِنِينَ
وَأَنزَلَ جُنُودًا لَّمْ تَرَوْهَا وَعَذَّبَ الَّذِينَ كَفَرُوا
وَذَٰلِكَ جَزَاءُ الْكَافِرِينَ ﴿٢٦﴾

26. Tiam Allah sendis Sian pacon al Sia sendito kaj al la kredantoj kaj Li sendis armeojn, kiujn vi ne vidis*, kaj punis la miskredantojn.

ثُمَّ يَتُوبُ اللَّهُ مِن بَعْدِ ذَٰلِكَ عَلَىٰ مَن يَشَاءُ ۗ وَاللَّهُ
غَفُورٌ رَّحِيمٌ ﴿٢٧﴾

27. Poste Allah turnas Sin favore al kiu Li volas. Allah estas senkulpigema, pardonema.

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا إِنَّمَا الْمُشْرِكُونَ نَجَسٌ فَلَا يَقْرَبُوا
الْمَسْجِدَ الْحَرَامَ بَعْدَ عَامِهِمْ هَٰذَا ۚ وَإِنْ خِفْتُمْ
عَيْلَةً فَسَوْفَ يُغْنِيكُمُ اللَّهُ مِن فَضْلِهِ إِن شَاءَ ۚ
إِنَّ اللَّهَ عَلِيمٌ حَكِيمٌ ﴿٢٨﴾

28. Ho vi, kredantoj! Vere la miskredantoj estas malpuraj. Tial ili ne alproksimiĝu post ĉi tiu jaro al la sankta moskeo. Se vi timas la malriĉecon, sciu, ke Allah vin riĉigos per Sia graco, se Li volas. Vere Allah estas ĉioscia, saĝa.

قَاتِلُوا الَّذِينَ لَا يُؤْمِنُونَ بِاللَّهِ وَلَا بِالْيَوْمِ الْآخِرِ
وَلَا يُحَرِّمُونَ مَا حَرَّمَ اللَّهُ وَرَسُولُهُ وَلَا يَدِينُونَ
دِينَ الْحَقِّ مِنَ الَّذِينَ أُوتُوا الْكِتَابَ حَتَّىٰ يُعْطُوا الْجِزْيَةَ

29. Batalu kontraŭ tiuj el la popolo de la Skribo, kiuj ne kredas je Allah kaj al la vivo venonta, kaj ne rigardas malpermesita tion, kion Allah kaj Lia sendito malpermesis, kaj ne sekvas la veran religion, ĝis ili donos la tributon libervole kaj humile.

* de anĝeloj

30. Diras la Judoj, ke 'Uzajr* estas la filo de Allah, kaj la Kristanoj diras, ke la Mesio estas la filo de Allah. Tia estas la vorto de iliaj buŝoj. Ili imitas la vorton de tiuj, kiuj miskredis antaŭe. La malbeno de Allah falu sur ilin! Kiel ili estas misgvidataj!

31. Ili prenis siajn klerulojn kaj monaĥojn kiel Sinjorojn apud Allah, kaj la Mesion, la filon de Maria. Tamen estis ordonite al ili adori nur la ununuran Dion. Ne ekzistas alia Dio, ol Li. Li estas tro sankta kompare kun tio, kio estas aldonita al Li kiel rivalo!

32. Ili dezirus estingi la lumon de Allah per siaj buŝoj, tamen Allah nur volas perfektigi Sian lumon, eĉ se tio ne plaĉas al la miskredantoj.

33. Estas Li Tiu, kiu sendis Sian senditon kun la gvidilo kaj kun la vera kredo, por igi ĝin venki super ĉiuj aliaj religioj, eĉ se tio ne plaĉas al la idolanoj.

34. Ho vi kredantoj! Vere la plej multaj el la kleruloj kaj el la monaĥoj formanĝas la propraĵojn de la homoj per la falso, kaj devojigas de la afero de Allah. Al tiuj, kiuj amasigas oron kaj arĝenton, sed tion ne uzas por la afero de Allah, vi anoncu doloran turmenton.

35. En la tago, en kiu ĉio ĉi estos bruligata en la fajro de l' infero, kaj iliaj fruntoj kaj iliaj flankoj kaj iliaj dorsoj estos brulmarkitaj: "Tio estas, kion vi amasigis por vi mem, do gustumu, kion vi amasigis! ".

36. Vere la nombro de la monatoj ĉe Allah estas dekdu laŭ la leĝo de Allah ekde la tago, kiam Li kreis la ĉielojn kaj la teron. Kvar el ili estas sanktaj. Tiu estas la ĉiama religio. Do ne peku je tio, kaj batalu kontraŭ la idolanoj ĉiuj kune, kiel ili batalas kontraŭ vi ĉiuj kune, kaj sciu, ke Allah estas kun la justuloj.

* Ezra

عَنْ يَدٍ وَّهُمْ صٰغِرُوْنَ ﴿٢٩﴾

وَقَالَتِ الْيَهُوْدُ عُزَيْرُ ۨ ابْنُ اللّٰهِ وَقَالَتِ النَّصٰرَى الْمَسِيْحُ
ابْنُ اللّٰهِ ۭ ذٰلِكَ قَوْلُهُمْ بِاَفْوَاهِهِمْ ۚ يُضَاهِـُٔوْنَ قَوْلَ
الَّذِيْنَ كَفَرُوْا مِنْ قَبْلُ ۭ قٰتَلَهُمُ اللّٰهُ ۚ اَنّٰى يُؤْفَكُوْنَ ﴿٣٠﴾
اِتَّخَذُوْٓا اَحْبَارَهُمْ وَرُهْبَانَهُمْ اَرْبَابًا مِّنْ دُوْنِ
اللّٰهِ وَالْمَسِيْحَ ابْنَ مَرْيَمَ ۚ وَمَآ اُمِرُوْٓا اِلَّا لِيَعْبُدُوْٓا
اِلٰهًا وَّاحِدًا ۚ لَآ اِلٰهَ اِلَّا هُوَ ۭ سُبْحٰنَهٗ عَمَّا يُشْرِكُوْنَ ﴿٣١﴾
يُرِيْدُوْنَ اَنْ يُّطْفِـُٔوْا نُوْرَ اللّٰهِ بِاَفْوَاهِهِمْ وَيَاْبَى اللّٰهُ
اِلَّآ اَنْ يُّتِمَّ نُوْرَهٗ وَلَوْ كَرِهَ الْكٰفِرُوْنَ ﴿٣٢﴾
هُوَ الَّذِيْٓ اَرْسَلَ رَسُوْلَهٗ بِالْهُدٰى وَدِيْنِ الْحَقِّ لِيُظْهِرَهٗ
عَلَى الدِّيْنِ كُلِّهٖ ۙ وَلَوْ كَرِهَ الْمُشْرِكُوْنَ ﴿٣٣﴾
يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اِنَّ كَثِيْرًا مِّنَ الْاَحْبَارِ وَالرُّهْبَانِ
لَيَاْكُلُوْنَ اَمْوَالَ النَّاسِ بِالْبَاطِلِ وَيَصُدُّوْنَ عَنْ
سَبِيْلِ اللّٰهِ ۭ وَالَّذِيْنَ يَكْنِزُوْنَ الذَّهَبَ وَالْفِضَّةَ
وَلَا يُنْفِقُوْنَهَا فِيْ سَبِيْلِ اللّٰهِ ۙ فَبَشِّرْهُمْ بِعَذَابٍ
اَلِيْمٍ ﴿٣٤﴾
يَّوْمَ يُحْمٰى عَلَيْهَا فِيْ نَارِ جَهَنَّمَ فَتُكْوٰى بِهَا جِبَاهُهُمْ
وَجُنُوْبُهُمْ وَظُهُوْرُهُمْ ۭ هٰذَا مَا كَنَزْتُمْ لِاَنْفُسِكُمْ
فَذُوْقُوْا مَا كُنْتُمْ تَكْنِزُوْنَ ﴿٣٥﴾
اِنَّ عِدَّةَ الشُّهُوْرِ عِنْدَ اللّٰهِ اثْنَا عَشَرَ شَهْرًا فِيْ كِتٰبِ
اللّٰهِ يَوْمَ خَلَقَ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ مِنْهَآ اَرْبَعَةٌ حُرُمٌ ۭ
ذٰلِكَ الدِّيْنُ الْقَيِّمُ ۙ فَلَا تَظْلِمُوْا فِيْهِنَّ اَنْفُسَكُمْ

وَقَاتِلُوا الْمُشْرِكِينَ كَآفَّةً كَمَا يُقَاتِلُونَكُمْ كَآفَّةً ۚ
وَاعْلَمُوا أَنَّ اللَّهَ مَعَ الْمُتَّقِينَ ﴿٣٦﴾

37. Vere enmeti krommonaton estas pliigo de la miskredo. Pro tio la miskredantoj eraras. Ili permesas tion en iu jaro kaj malpermesas ĝin en alia jaro, por konkordi je la nombro de la monatoj, kaj ili permesas, kion Allah malpermesis. La malboneco de iliaj agoj fariĝas bela laŭ ili. Allah ne gvidas la popolon miskredantan.

إِنَّمَا النَّسِيءُ زِيَادَةٌ فِي الْكُفْرِ يُضَلُّ بِهِ الَّذِينَ كَفَرُوا
يُحِلُّونَهُ عَامًا وَيُحَرِّمُونَهُ عَامًا لِّيُوَاطِئُوا عِدَّةَ مَا
حَرَّمَ اللَّهُ فَيُحِلُّوا مَا حَرَّمَ اللَّهُ ۚ زُيِّنَ لَهُمْ سُوءُ
أَعْمَالِهِمْ ۗ وَاللَّهُ لَا يَهْدِي الْقَوْمَ الْكَافِرِينَ ﴿٣٧﴾ ع

38. Ho vi, kredantoj! Kio okazas al vi? Vi ja falas peze sur la teron, kiam estas dirite al vi: "Eliru por la afero de Allah! ". Ĉu vi kontentiĝus per ĉi tiu vivo anstataŭ per la vivo venonta? Tamen la ĝojo de ĉi tiu vivo, kompare kun la vivo venonta, vere estas malgranda.

يَا أَيُّهَا الَّذِينَ آمَنُوا مَا لَكُمْ إِذَا قِيلَ لَكُمُ انفِرُوا
فِي سَبِيلِ اللَّهِ اثَّاقَلْتُمْ إِلَى الْأَرْضِ ۚ أَرَضِيتُم بِالْحَيَاةِ
الدُّنْيَا مِنَ الْآخِرَةِ ۚ فَمَا مَتَاعُ الْحَيَاةِ الدُّنْيَا فِي
الْآخِرَةِ إِلَّا قَلِيلٌ ﴿٣٨﴾

39. Se vi ne eliras, Li trafos vin per dolora puno, kaj Li elektos alian popolon anstataŭ elekti vin, kaj vi certe ne malutilos al Li. Allah havas povon super ĉiuj aferoj.

إِلَّا تَنفِرُوا يُعَذِّبْكُمْ عَذَابًا أَلِيمًا وَيَسْتَبْدِلْ قَوْمًا
غَيْرَكُمْ وَلَا تَضُرُّوهُ شَيْئًا ۗ وَاللَّهُ عَلَىٰ كُلِّ شَيْءٍ قَدِيرٌ ﴿٣٩﴾

40. Se vi ne helpas lin, sciu, ke Allah lin helpis tiam, kiam la miskredantoj lin forpelis kaj kun li unu solan kunulon, kiam ambaŭ estis en groto kaj li diris al sia kunulo: "Ne malĝoju. Allah vere estas kun ni". Allah sendis Sian pacon sur lin, kaj plifortigis lin per armeoj, kiujn vi ne vidis, kaj Li humiligis la vorton de la miskredantoj. La vorto de Allah estas la eminenta. Allah estas ĉiopova, saĝa.

إِلَّا تَنصُرُوهُ فَقَدْ نَصَرَهُ اللَّهُ إِذْ أَخْرَجَهُ الَّذِينَ كَفَرُوا
ثَانِيَ اثْنَيْنِ إِذْ هُمَا فِي الْغَارِ إِذْ يَقُولُ لِصَاحِبِهِ
لَا تَحْزَنْ إِنَّ اللَّهَ مَعَنَا ۖ فَأَنزَلَ اللَّهُ سَكِينَتَهُ عَلَيْهِ
وَأَيَّدَهُ بِجُنُودٍ لَّمْ تَرَوْهَا وَجَعَلَ كَلِمَةَ الَّذِينَ
كَفَرُوا السُّفْلَىٰ ۚ وَكَلِمَةُ اللَّهِ هِيَ الْعُلْيَا ۗ وَاللَّهُ عَزِيزٌ
حَكِيمٌ ﴿٤٠﴾

41. Eliru, ĉu peze aŭ malpeze armitaj, kaj batalu per viaj propraĵoj kaj per viaj animoj por la afero de Allah. Tio estas plej bona por vi; ho, se vi nur scius!

انفِرُوا خِفَافًا وَثِقَالًا وَجَاهِدُوا بِأَمْوَالِكُمْ وَأَنفُسِكُمْ
فِي سَبِيلِ اللَّهِ ۚ ذَٰلِكُمْ خَيْرٌ لَّكُمْ إِن كُنتُمْ تَعْلَمُونَ ﴿٤١﴾

42. Se temus pri proksima gajno kaj mallonga vojaĝo, ili certe estus sekvintaj vin, sed la laciga vojaĝo ŝajnis al ili tro longa. Tamen ili ĵuros per Allah: "Se ni povus, ni estus elirintaj kun Vi". Ili pereigas siajn animojn, kaj Allah scias, ke ili estas mensoguloj.

لَوْ كَانَ عَرَضًا قَرِيبًا وَسَفَرًا قَاصِدًا لَّاتَّبَعُوكَ وَلَٰكِن
بَعُدَتْ عَلَيْهِمُ الشُّقَّةُ ۚ وَسَيَحْلِفُونَ بِاللَّهِ

43. Allah forprenu de vi viajn zorgojn! Kial vi permesis al ili resti malantaŭe, ĝis tiuj, kiuj estis sinceraj, estis konataj de vi, kaj vi ekkonis la mensogulojn?

44. La kredantoj je Allah kaj al la vivo venonta ne petas vian permeson por batali per siaj proprajoj kaj per siaj animoj. Allah bone konas la justulojn.

45. Petas vian permeson nur tiuj, kiuj ne kredas je Allah kaj al la vivo venonta. Iliaj koroj dubas kaj ili ŝanceliĝas en sia dubo.

46. Se ili intencus eliri, ili certe estus armintaj sin konvene, sed al Allah ne plaĉis ilia eliro: tial Li retenis ilin, kaj estis dirite: "Sidu kun la sidantaj! ".

47. Se ili elirus kun vi, ili nur estus pliigintaj viajn zorgojn kaj estus kurintaj tien kaj reen en via mezo, kaj inter vi estas iuj, kiuj estus atentintaj pri ili. Allah bone konas la malbonfarantojn.

48. Vere ili jam antaŭe klopodis estigi malpacon kaj intrigi kontraŭ vi, ĝis venis la vero kaj venkis la intenco de Allah, kvankam tio ne plaĉis al ili.

49. Inter ili estas iuj, kiuj diras: "Lasu nin malantaŭe, kaj ne tentu nin". Aŭskultu! La elprovo jam atingis ilin. Vere la infero ĉirkaŭas la miskredantojn.

50. Se vin trafas feliĉo, tio malĝojigas ilin, kaj se vin trafas malfeliĉo, ili diras: "Vere ni jam antaŭe prenis la antaŭrimedojn", kaj ili turnas sin for kaj ĝojas.

51. Diru: "Nenio povas trafi nin ol tio, kion Allah dekretis por ni. Li estas nia protektanto kaj je Allah fidu la kredantoj".

52. Diru: "Vi atendas por vi nur unu el la du bonegaj afoj; ni kontraŭe nur atendas, ke Allah trafu vin per puno per si mem aŭ

لَوِ اسْتَطَعْنَا لَخَرَجْنَا مَعَكُمْ يُهْلِكُونَ أَنْفُسَهُمْ ۚ
وَاللَّهُ يَعْلَمُ إِنَّهُمْ لَكَاذِبُونَ ﴿٤٢﴾ ع ١٢
عَفَا اللَّهُ عَنْكَ لِمَ أَذِنْتَ لَهُمْ حَتَّىٰ يَتَبَيَّنَ لَكَ
الَّذِينَ صَدَقُوا وَتَعْلَمَ الْكَاذِبِينَ ﴿٤٣﴾
لَا يَسْتَأْذِنُكَ الَّذِينَ يُؤْمِنُونَ بِاللَّهِ وَالْيَوْمِ الْآخِرِ
أَنْ يُجَاهِدُوا بِأَمْوَالِهِمْ وَأَنْفُسِهِمْ ۗ وَاللَّهُ عَلِيمٌ
بِالْمُتَّقِينَ ﴿٤٤﴾
إِنَّمَا يَسْتَأْذِنُكَ الَّذِينَ لَا يُؤْمِنُونَ بِاللَّهِ وَالْيَوْمِ
الْآخِرِ وَارْتَابَتْ قُلُوبُهُمْ فَهُمْ فِي رَيْبِهِمْ يَتَرَدَّدُونَ ﴿٤٥﴾
وَلَوْ أَرَادُوا الْخُرُوجَ لَأَعَدُّوا لَهُ عُدَّةً وَلَٰكِنْ كَرِهَ
اللَّهُ انْبِعَاثَهُمْ فَثَبَّطَهُمْ وَقِيلَ اقْعُدُوا مَعَ
الْقَاعِدِينَ ﴿٤٦﴾
لَوْ خَرَجُوا فِيكُمْ مَا زَادُوكُمْ إِلَّا خَبَالًا وَلَأَوْضَعُوا
خِلَالَكُمْ يَبْغُونَكُمُ الْفِتْنَةَ ۖ وَفِيكُمْ سَمَّاعُونَ لَهُمْ ۗ
وَاللَّهُ عَلِيمٌ بِالظَّالِمِينَ ﴿٤٧﴾
لَقَدِ ابْتَغَوُا الْفِتْنَةَ مِنْ قَبْلُ وَقَلَّبُوا لَكَ الْأُمُورَ
حَتَّىٰ جَاءَ الْحَقُّ وَظَهَرَ أَمْرُ اللَّهِ وَهُمْ كَارِهُونَ ﴿٤٨﴾
وَمِنْهُمْ مَنْ يَقُولُ ائْذَنْ لِي وَلَا تَفْتِنِّي ۚ أَلَا فِي
الْفِتْنَةِ سَقَطُوا ۗ وَإِنَّ جَهَنَّمَ لَمُحِيطَةٌ بِالْكَافِرِينَ ﴿٤٩﴾
إِنْ تُصِبْكَ حَسَنَةٌ تَسُؤْهُمْ ۖ وَإِنْ تُصِبْكَ مُصِيبَةٌ
يَقُولُوا قَدْ أَخَذْنَا أَمْرَنَا مِنْ قَبْلُ وَيَتَوَلَّوْا وَهُمْ
فَرِحُونَ ﴿٥٠﴾

per niaj manoj. Do atendu: ni atendas kun vi".

قُلْ لَنْ يُّصِيْبَنَآ اِلَّا مَا كَتَبَ اللّٰهُ لَنَا ۚ هُوَ مَوْلٰىنَا ۚ
وَعَلَى اللّٰهِ فَلْيَتَوَكَّلِ الْمُؤْمِنُوْنَ ﴿٥١﴾

53. Diru: "Disdonu do, volonte aŭ nevolonte, de vi nenio estos akceptita, ĉar vi vere estas popolo malobeema".

قُلْ هَلْ تَرَبَّصُوْنَ بِنَآ اِلَّآ اِحْدَى الْحُسْنَيَيْنِ ۭ
وَنَحْنُ نَتَرَبَّصُ بِكُمْ اَنْ يُّصِيْبَكُمُ اللّٰهُ بِعَذَابٍ
مِّنْ عِنْدِهٖٓ اَوْ بِاَيْدِيْنَا ۚ فَتَرَبَّصُوْٓا اِنَّا مَعَكُمْ
مُّتَرَبِّصُوْنَ ﴿٥٢﴾

54. La akcepto de iliaj donacoj estas malhelpata nur, ĉar ili ne kredas je Allah kaj al Lia sendito kaj ili nur malfervore venas al la preĝo kaj ili nur malvolonte disdonas siajn almozojn.

قُلْ اَنْفِقُوْا طَوْعًا اَوْ كَرْهًا لَّنْ يُّتَقَبَّلَ مِنْكُمْ ۭ اِنَّكُمْ
كُنْتُمْ قَوْمًا فٰسِقِيْنَ ﴿٥٣﴾

55. Ne miru pri iliaj propraĵoj aŭ iliaj idoj. Allah volas nur puni ilin en ĉi tiu vivo, kaj Li volas, ke iliaj animoj foriru, dum ili ankoraŭ estas miskredantoj.

وَمَا مَنَعَهُمْ اَنْ تُقْبَلَ مِنْهُمْ نَفَقٰتُهُمْ اِلَّآ اَنَّهُمْ
كَفَرُوْا بِاللّٰهِ وَبِرَسُوْلِهٖ وَلَا يَاْتُوْنَ الصَّلٰوةَ اِلَّا وَهُمْ
كُسَالٰى وَلَا يُنْفِقُوْنَ اِلَّا وَهُمْ كٰرِهُوْنَ ﴿٥٤﴾

56. Ili ĵuras per Allah, ke ili vere apartenas al vi, tamen ili ne apartenas al vi, sed ili estas popolo timema.

فَلَا تُعْجِبْكَ اَمْوَالُهُمْ وَلَآ اَوْلَادُهُمْ ۭ اِنَّمَا يُرِيْدُ
اللّٰهُ لِيُعَذِّبَهُمْ بِهَا فِي الْحَيٰوةِ الدُّنْيَا وَتَزْهَقَ
اَنْفُسُهُمْ وَهُمْ كٰفِرُوْنَ ﴿٥٥﴾

57. Se ili trovus rifuĝejon aŭ grotojn aŭ neston, ili certe kurus tien avide.

وَيَحْلِفُوْنَ بِاللّٰهِ اِنَّهُمْ لَمِنْكُمْ ۭ وَمَا هُمْ مِّنْكُمْ وَ
لٰكِنَّهُمْ قَوْمٌ يَّفْرَقُوْنَ ﴿٥٦﴾

58. Inter ili estas iuj, kiuj riproĉas vin pro la almozoj. Se ili ricevus ilin, ili estus kontentaj, sed ĉar ili ne ricevas ilin, jen, ili estas ĉagrenitaj.

لَوْ يَجِدُوْنَ مَلْجَاً اَوْ مَغٰرٰتٍ اَوْ مُدَّخَلًا لَّوَلَّوْا
اِلَيْهِ وَهُمْ يَجْمَحُوْنَ ﴿٥٧﴾

59. Se ili almenaŭ estus kontentaj pro tio, kion donas al ili Allah kaj Lia sendito! Kaj se ili almenaŭ dirus: "Al ni sufiĉas Allah. Allah donas al ni el Sia graco kaj same Lia sendito. Vere al Allah ni nin turnas, petegante".

وَمِنْهُمْ مَّنْ يَّلْمِزُكَ فِي الصَّدَقٰتِ ۚ فَاِنْ اُعْطُوْا
مِنْهَا رَضُوْا وَاِنْ لَّمْ يُعْطَوْا مِنْهَآ اِذَا هُمْ يَسْخَطُوْنَ ﴿٥٨﴾
وَلَوْ اَنَّهُمْ رَضُوْا مَآ اٰتٰىهُمُ اللّٰهُ وَرَسُوْلُهٗ ۙ وَقَالُوْا
حَسْبُنَا اللّٰهُ سَيُؤْتِيْنَا اللّٰهُ مِنْ فَضْلِهٖ وَرَسُوْلُهٗٓ ۚ

60. La almozoj estas nur por la malriĉuloj kaj por la mizeruloj, por la oficistoj okupitaj per sia administrado kaj por tiuj, kies koroj devas esti konkeritaj, kaj por la liberigo de sklavoj, kaj por la ŝuldantoj, kaj por la afero de Allah, kaj por la vojirantoj: tio estas dekreto de Allah. Allah estas ĉioscia, saĝa.

61. Inter ili estas iuj, kiuj ofendas la Profeton kaj diras: "Li estas nur orelo"*. Diru: "Ja, orelo por via bono; li kredas je Allah kaj li kredas al la kredantoj kaj estas pardono por la kredantoj inter vi". Por tiuj, kiuj ofendas la senditon de Allah, estos dolora puno.

62. Ili ĵuras al vi per Allah por plaĉi al vi; tamen Allah kaj Lia sendito estas superaj al tio. Tial ili plaĉus al Li, se ili estus kredantoj.

63. Ĉu ili ne scias, ke por tiu, kiu ofendas Allahon kaj Lian senditon, estos la fajro de l' infero, en kiu li restos por ĉiam? Tio estas la plej granda humiligo.

64. La hipokrituloj timas, ke estos sendita al ili ĉapitro por anonci al ili, kio estas en iliaj koroj. Diru: "Moku do! Allah vere evidentigas ĉion, kion vi timas".

65. Se vi demandas ilin, certe ili diras: "Vere ni nur babilis kaj ŝercis". Diru: "Ĉu pri Allah kaj Liaj signoj kaj Lia sendito vi ŝercis? ".

66. Ne provu senkulpigi vin pri tio, ke vi fariĝis nekredantoj, post kiam vi estis kredantoj. Se Ni pardonas al iuj el vi kaj punas aliajn, tio okazas, ĉar ili estis kulpaj.

67. La hipokrituloj kaj la hipokritulinoj, imitante unu la alian, ordonas la malbonon kaj malpermesas la bonon kaj fermas siajn manojn; ili forgesis Allahon kaj Li forgesis ilin. Vere la hipokrituloj estas malobeemaj.

68. Allah promesis al la hipokrituloj kaj al la hipokritulinoj kaj al la miskredantoj la fajron de l' infero, kie ili restos por ĉiam. Tio sufiĉos por ili. Allah malbenis ilin. Por ili estos porĉiama turmento,

* t.e.: li spionas

إِنَّآ إِلَى اللَّهِ رَٰغِبُونَ ﴿٥٩﴾ ع ١٣

إِنَّمَا الصَّدَقَٰتُ لِلْفُقَرَآءِ وَالْمَسَٰكِينِ وَالْعَٰمِلِينَ
عَلَيْهَا وَالْمُؤَلَّفَةِ قُلُوبُهُمْ وَفِى الرِّقَابِ وَالْغَٰرِمِينَ
وَفِى سَبِيلِ اللَّهِ وَابْنِ السَّبِيلِ ۖ فَرِيضَةً مِّنَ اللَّهِ
وَاللَّهُ عَلِيمٌ حَكِيمٌ ﴿٦٠﴾

وَمِنْهُمُ الَّذِينَ يُؤْذُونَ النَّبِىَّ وَيَقُولُونَ هُوَ أُذُنٌ ۚ
قُلْ أُذُنُ خَيْرٍ لَّكُمْ يُؤْمِنُ بِاللَّهِ وَيُؤْمِنُ لِلْمُؤْمِنِينَ
وَرَحْمَةٌ لِّلَّذِينَ ءَامَنُوا مِنكُمْ ۚ وَالَّذِينَ يُؤْذُونَ رَسُولَ
اللَّهِ لَهُمْ عَذَابٌ أَلِيمٌ ﴿٦١﴾

يَحْلِفُونَ بِاللَّهِ لَكُمْ لِيُرْضُوكُمْ ۚ وَاللَّهُ وَرَسُولُهُۥٓ أَحَقُّ
أَن يُرْضُوهُ إِن كَانُوا مُؤْمِنِينَ ﴿٦٢﴾

أَلَمْ يَعْلَمُوٓا۟ أَنَّهُۥ مَن يُحَادِدِ اللَّهَ وَرَسُولَهُۥ فَأَنَّ
لَهُۥ نَارَ جَهَنَّمَ خَٰلِدًا فِيهَا ۚ ذَٰلِكَ ٱلْخِزْىُ ٱلْعَظِيمُ ﴿٦٣﴾

يَحْذَرُ الْمُنَٰفِقُونَ أَن تُنَزَّلَ عَلَيْهِمْ سُورَةٌ تُنَبِّئُهُم
بِمَا فِى قُلُوبِهِمْ ۚ قُلِ اسْتَهْزِءُوٓا۟ ۖ إِنَّ اللَّهَ مُخْرِجٌ
مَّا تَحْذَرُونَ ﴿٦٤﴾

وَلَئِن سَأَلْتَهُمْ لَيَقُولُنَّ إِنَّمَا كُنَّا نَخُوضُ وَنَلْعَبُ ۚ
قُلْ أَبِاللَّهِ وَءَايَٰتِهِۦ وَرَسُولِهِۦ كُنتُمْ تَسْتَهْزِءُونَ ﴿٦٥﴾

لَا تَعْتَذِرُوا۟ قَدْ كَفَرْتُم بَعْدَ إِيمَٰنِكُمْ ۚ إِن نَّعْفُ عَن
طَآئِفَةٍ مِّنكُمْ نُعَذِّبْ طَآئِفَةً بِأَنَّهُمْ كَانُوا۟ مُجْرِمِينَ ﴿٦٦﴾ ع ١٤

ٱلْمُنَٰفِقُونَ وَالْمُنَٰفِقَٰتُ بَعْضُهُم مِّنۢ بَعْضٍ ۘ يَأْمُرُونَ
بِالْمُنكَرِ وَيَنْهَوْنَ عَنِ الْمَعْرُوفِ وَيَقْبِضُونَ أَيْدِيَهُمْ

نَسُوا اللّٰهَ فَنَسِيَهُمْ ؕ اِنَّ الْمُنٰفِقِيْنَ هُمُ الْفٰسِقُوْنَ ﴿٦٧﴾
وَعَدَ اللّٰهُ الْمُنٰفِقِيْنَ وَالْمُنٰفِقٰتِ وَالْكُفَّارَ نَارَ جَهَنَّمَ
خٰلِدِيْنَ فِيْهَا ؕ هِيَ حَسْبُهُمْ ۚ وَلَعَنَهُمُ اللّٰهُ ۚ وَلَهُمْ
عَذَابٌ مُّقِيْمٌ ﴿٦٨﴾
كَالَّذِيْنَ مِنْ قَبْلِكُمْ كَانُوْٓا اَشَدَّ مِنْكُمْ قُوَّةً وَّاَكْثَرَ
اَمْوَالًا وَّاَوْلَادًا ؕ فَاسْتَمْتَعُوْا بِخَلَاقِهِمْ فَاسْتَمْتَعْتُمْ
بِخَلَاقِكُمْ كَمَا اسْتَمْتَعَ الَّذِيْنَ مِنْ قَبْلِكُمْ بِخَلَاقِهِمْ
وَخُضْتُمْ كَالَّذِيْ خَاضُوْا ؕ اُولٰٓئِكَ حَبِطَتْ اَعْمَالُهُمْ
فِي الدُّنْيَا وَالْاٰخِرَةِ ۚ وَاُولٰٓئِكَ هُمُ الْخٰسِرُوْنَ ﴿٦٩﴾
اَلَمْ يَاْتِهِمْ نَبَاُ الَّذِيْنَ مِنْ قَبْلِهِمْ قَوْمِ نُوْحٍ وَّعَادٍ
وَّثَمُوْدَ ۙ وَقَوْمِ اِبْرٰهِيْمَ وَاَصْحٰبِ مَدْيَنَ وَالْمُؤْتَفِكٰتِ ؕ
اَتَتْهُمْ رُسُلُهُمْ بِالْبَيِّنٰتِ ۚ فَمَا كَانَ اللّٰهُ لِيَظْلِمَهُمْ
وَلٰكِنْ كَانُوْٓا اَنْفُسَهُمْ يَظْلِمُوْنَ ﴿٧٠﴾
وَالْمُؤْمِنُوْنَ وَالْمُؤْمِنٰتُ بَعْضُهُمْ اَوْلِيَآءُ بَعْضٍ ۘ
يَاْمُرُوْنَ بِالْمَعْرُوْفِ وَيَنْهَوْنَ عَنِ الْمُنْكَرِ وَ
يُقِيْمُوْنَ الصَّلٰوةَ وَيُؤْتُوْنَ الزَّكٰوةَ وَيُطِيْعُوْنَ اللّٰهَ
وَرَسُوْلَهٗ ؕ اُولٰٓئِكَ سَيَرْحَمُهُمُ اللّٰهُ ؕ اِنَّ اللّٰهَ عَزِيْزٌ
حَكِيْمٌ ﴿٧١﴾
وَعَدَ اللّٰهُ الْمُؤْمِنِيْنَ وَالْمُؤْمِنٰتِ جَنّٰتٍ تَجْرِيْ مِنْ
تَحْتِهَا الْاَنْهٰرُ خٰلِدِيْنَ فِيْهَا وَمَسٰكِنَ طَيِّبَةً فِيْ
جَنّٰتِ عَدْنٍ ؕ وَرِضْوَانٌ مِّنَ اللّٰهِ اَكْبَرُ ؕ ذٰلِكَ هُوَ
الْفَوْزُ الْعَظِيْمُ ﴿٧٢﴾ ع ١٥

69. kiel por tiuj, kiuj estis antaŭ vi. Ili estis pli fortaj ol vi kaj pli riĉaj je propraĵoj kaj idoj. Ili ĝojis pro sia sorto, ĝuste kiel ĝojis pro sia sorto tiuj antaŭ vi, kaj vi babilas, kiel ili kutimis babili. Estas ili tiuj, kies verkoj estos vanaj en ĉi tiu kaj en la venonta vivo. Ili estos la perdantoj.

70. Ĉu ne atingis la novaĵo tiujn, kiuj estis antaŭ ili – la popolon de Noa kaj de Aad, kaj la Tamŭdojn kaj la popolon de Abraham kaj la loĝantojn de Madjan kaj de la urboj detruitaj? Al ili venis senditoj kun evidentaj pruvoj. Allah do ne volis fari al ili maljustaĵon, tamen ili faris al si mem maljustaĵon.

71. La kredantoj kaj la kredantinoj estas amikoj unu de la alia. Ili ordonas la bonon kaj malpermesas la malbonon kaj levas la preĝon kaj disdonas almozojn kaj obeas Allahon kaj Lian senditon. Estas ili tiuj, al kiuj Allah estos kompatema. Allah estas ĉiopova, saĝa.

72. Allah promesis al la kredantoj kaj al la kredantinoj ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj – ili tie restos por ĉiam – kaj belegajn loĝejojn en la Paradizo eterna. La bonvolo de Allah estas grandega. Tio estas la plej granda feliĉo.

73. Ho vi, Profeto! Batalu kontraŭ la miskredantoj kaj la hipokrituloj. Estu severa kontraŭ ili. Ilia restadejo estos la infero. Malbonega estas la destino!

74. Ili ĵuras per Allah, ke ili nenion diris; sed kontraŭe ili diris vorton de miskredo, kaj ili fariĝis ree miskredantoj, post kiam ili akceptis la Islamon. Ili provis atingi, kion ili ne estis atingintaj, kaj ili tial nutris sian malamon nur, ĉar Allah (kaj Lia sendi-

يَٰٓأَيُّهَا ٱلنَّبِيُّ جَٰهِدِ ٱلْكُفَّارَ وَٱلْمُنَٰفِقِينَ وَٱغْلُظْ
عَلَيْهِمْ ۚ وَمَأْوَىٰهُمْ جَهَنَّمُ ۖ وَبِئْسَ ٱلْمَصِيرُ ﴿٧٣﴾
يَحْلِفُونَ بِٱللَّهِ مَا قَالُوا۟ ۚ وَلَقَدْ قَالُوا۟ كَلِمَةَ ٱلْكُفْرِ وَ
كَفَرُوا۟ بَعْدَ إِسْلَٰمِهِمْ وَهَمُّوا۟ بِمَا لَمْ يَنَالُوا۟ ۚ وَمَا
نَقَمُوٓا۟ إِلَّآ أَنْ أَغْنَىٰهُمُ ٱللَّهُ وَرَسُولُهُۥ مِن فَضْلِهِۦ ۚ
فَإِن يَتُوبُوا۟ يَكُ خَيْرًا لَّهُمْ ۖ وَإِن يَتَوَلَّوْا۟ يُعَذِّبْهُمُ ٱللَّهُ
عَذَابًا أَلِيمًا فِى ٱلدُّنْيَا وَٱلْءَاخِرَةِ ۚ وَمَا لَهُمْ فِى ٱلْأَرْضِ
مِن وَلِىٍّ وَلَا نَصِيرٍ ﴿٧٤﴾
وَمِنْهُم مَّنْ عَٰهَدَ ٱللَّهَ لَئِنْ ءَاتَىٰنَا مِن فَضْلِهِۦ لَنَصَّدَّقَنَّ
وَلَنَكُونَنَّ مِنَ ٱلصَّٰلِحِينَ ﴿٧٥﴾
فَلَمَّآ ءَاتَىٰهُم مِّن فَضْلِهِۦ بَخِلُوا۟ بِهِۦ وَتَوَلَّوا۟ وَّهُم مُّعْرِضُونَ ﴿٧٦﴾
فَأَعْقَبَهُمْ نِفَاقًا فِى قُلُوبِهِمْ إِلَىٰ يَوْمِ يَلْقَوْنَهُۥ بِمَآ أَخْلَفُوا۟
ٱللَّهَ مَا وَعَدُوهُ وَبِمَا كَانُوا۟ يَكْذِبُونَ ﴿٧٧﴾
أَلَمْ يَعْلَمُوٓا۟ أَنَّ ٱللَّهَ يَعْلَمُ سِرَّهُمْ وَنَجْوَىٰهُمْ وَأَنَّ
ٱللَّهَ عَلَّٰمُ ٱلْغُيُوبِ ﴿٧٨﴾
ٱلَّذِينَ يَلْمِزُونَ ٱلْمُطَّوِّعِينَ مِنَ ٱلْمُؤْمِنِينَ فِى
ٱلصَّدَقَٰتِ وَٱلَّذِينَ لَا يَجِدُونَ إِلَّا جُهْدَهُمْ فَيَسْخَرُونَ
مِنْهُمْ ۙ سَخِرَ ٱللَّهُ مِنْهُمْ ۖ وَلَهُمْ عَذَابٌ أَلِيمٌ ﴿٧٩﴾
ٱسْتَغْفِرْ لَهُمْ أَوْ لَا تَسْتَغْفِرْ لَهُمْ ۖ إِن تَسْتَغْفِرْ لَهُمْ
سَبْعِينَ مَرَّةً فَلَن يَغْفِرَ ٱللَّهُ لَهُمْ ۚ ذَٰلِكَ بِأَنَّهُمْ كَفَرُوا۟
بِٱللَّهِ وَرَسُولِهِۦ ۗ وَٱللَّهُ لَا يَهْدِى ٱلْقَوْمَ ٱلْفَٰسِقِينَ ﴿٨٠﴾
فَرِحَ ٱلْمُخَلَّفُونَ بِمَقْعَدِهِمْ خِلَٰفَ رَسُولِ ٱللَّهِ وَ

to) igis ilin riĉaj per Sia graco. Se ili nun pentos, estos pli bone por ili; se ili tamen poste turnos sin for, tiam Allah punos ilin per dolora turmento en ĉi tiu kaj en la venonta vivo, kaj por ili ne estos sur la tero protektanto nek helpanto.

75. Inter ili estas iuj, kiuj promesis al Allah: "Se Li donus al ni iom el Sia graco, ni certe disdonus almozojn kaj estus justuloj".

76. Sed kiam Li donis al ili Sian gracon, ili fariĝis avaraj je tio kaj sin turnis for malŝatante.

77. Tiel Li repagis ilin per hipokriteco, kiu restas en iliaj koroj ĝis la tago, en kiu ili renkontos Lin, ĉar ili ne plenumis por Allah tion, kion ili promesis al Li, kaj ĉar ili mensogadis.

78. Ĉu ili ne scias, ke Allah konas iliajn sekretojn kaj iliajn konfidencajn interparolojn, kaj ke Allah estas la plej bona konanto de la Nevideblaĵoj?

79. Pri tiuj, kiuj riproĉas tiujn el la kredantoj, kiuj disdonas libervole la almozojn, kaj tiujn, kiuj nenion trovas por disdoni ol sian salajron, – kaj tial ili mokas ilin –, sciu: Allah repagos ilin pro ilia mokado kaj por ili estos dolora puno,

80. ĉu vi petas pardonon por ili, ĉu vi ne petas pardonon por ili; eĉ se vi petos pardonon por ili sepdekfoje, Allah ne pardonos ilin. Tio estas, ĉar ili rifuzis la kredon je Allah kaj al Lia sendito. Allah ne gvidas la popolon malpiegan.

81. Tiuj, kiuj restis malantaŭe, ĝojis pro sia sidado hejme malantaŭ la sendito de Allah kaj ne inklinis al la batalo per siaj propraĵoj

nek per siaj animoj por la afero de Allah, kaj ili diris: "Ne eliru en ĉi tiu varmego! ". Diru: "La fajro de l' infero estas eĉ pli varma". Se ili nur komprenus!

82. Ili havas malmulton por ridi kaj multon por plori kiel repagon por tio, kion ili meritis.

83. Se Allah igas vin reiri hejmen al iuj el ili, kaj ili petas de vi permeson eliri, diru: "Neniam vi eliros kun mi kaj neniam vi batalos kun mi kontraŭ iu ajn malamiko. Al vi plaĉis sidi hejme la unuan fojon, do sidu nun kun la sidantoj".

84. Ne preĝu por iu el ili, kiu mortas, kaj ne staru apud lia tombo. Vere ili rifuzis la kredon je Allah kaj al Lia sendito, kaj ili mortis malobeemaj.

85. Ne miru pri iliaj proprajoj aŭ idoj. Allah deziras nur puni ilin per tiaj ajoj en ĉi tiu vivo, kaj iliaj animoj foriros dum ili ankoraŭ estas miskredantoj.

86. Se estas sendata ĉapitro, kiu anoncas: "Kredu je Allah kaj batalu kun Lia sendito", tiam petas de vi la riĉuloj inter ili permeson, dirante: "Lasu nin kun tiuj, kiuj sidas hejme".

87. Ili estas kontentaj, ĉar ili estas kun tiuj, kiuj restas malantaŭe, kaj iliaj koroj estas sigelitaj, kaj ili ne komprenas.

88. Tamen la sendito kaj la kredantoj kun li batalis per siaj proprajoj kaj per siaj animoj; estas ili tiuj, por kiuj estos bono, kaj ili estos sukcesaj.

89. Por ili Allah pretigis ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj; tie ili restos ĉiam. Tio estas la plej granda feliĉo.

كَرِهُوٓا۟ أَن يُجَٰهِدُوا۟ بِأَمْوَٰلِهِمْ وَأَنفُسِهِمْ فِى سَبِيلِ
ٱللَّهِ وَقَالُوا۟ لَا تَنفِرُوا۟ فِى ٱلْحَرِّ ۗ قُلْ نَارُ جَهَنَّمَ أَشَدُّ
حَرًّا ۚ لَّوْ كَانُوا۟ يَفْقَهُونَ ﴿٨١﴾
101. Ne estas donite al iu ajn kredi krom per la permeso de Allah. Li sendas Sian koleron sur tiujn, kiuj ne volas rezoni.

فَهَلْ يَنْتَظِرُوْنَ اِلَّا مِثْلَ اَيَّامِ الَّذِيْنَ خَلَوْا مِنْ
قَبْلِهِمْ ۭ قُلْ فَانْتَظِرُوْا اِنِّيْ مَعَكُمْ مِّنَ الْمُنْتَظِرِيْنَ ﴿١٠٢﴾

102. Diru: "Rigardu do tion, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero! Neniom utilas la signoj kaj la admonoj al la popolo miskredanta.

ثُمَّ نُنَجِّيْ رُسُلَنَا وَ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا كَذٰلِكَ ۚ حَقًّا عَلَيْنَا
نُنْجِ الْمُؤْمِنِيْنَ ﴿١٠٣﴾ ع ١٥

قُلْ يٰٓاَيُّهَا النَّاسُ اِنْ كُنْتُمْ فِيْ شَكٍّ مِّنْ دِيْنِيْ
فَلَآ اَعْبُدُ الَّذِيْنَ تَعْبُدُوْنَ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ وَ لٰكِنْ
اَعْبُدُ اللّٰهَ الَّذِيْ يَتَوَفّٰىكُمْ ۖ وَ اُمِرْتُ اَنْ اَكُوْنَ
مِنَ الْمُؤْمِنِيْنَ ﴿١٠٤﴾

103. Ĉu ili atendas ion alian ol la tagojn de tiuj, kiuj venis antaŭ ili? Diru: "Atendu do! Mi estas kun vi unu el la atendantoj".

وَ اَنْ اَقِمْ وَجْهَكَ لِلدِّيْنِ حَنِيْفًا ۚ وَ لَا تَكُوْنَنَّ مِنَ
الْمُشْرِكِيْنَ ﴿١٠٥﴾

104. Poste Ni savos Niajn senditojn kaj la kredantojn. Tiel konvenas al Ni savi la kredantojn.

وَ لَا تَدْعُ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ مَا لَا يَنْفَعُكَ وَ لَا يَضُرُّكَ ۚ
فَاِنْ فَعَلْتَ فَاِنَّكَ اِذًا مِّنَ الظّٰلِمِيْنَ ﴿١٠٦﴾

105. Diru: "Ho vi, homoj! Se vi estas en dubo pri mia religio, sciu: mi ne adoras tiujn, kiujn vi adoras apud Allah, sed mi adoras Allahon, kiu forprenos vin. Al mi estis ordonite esti kredanto,

وَ اِنْ يَّمْسَسْكَ اللّٰهُ بِضُرٍّ فَلَا كَاشِفَ لَهٗٓ اِلَّا هُوَ ۚ وَ
اِنْ يُّرِدْكَ بِخَيْرٍ فَلَا رَآدَّ لِفَضْلِهٖ ۚ يُصِيْبُ بِهٖ مَنْ
يَّشَآءُ مِنْ عِبَادِهٖ ۚ وَ هُوَ الْغَفُوْرُ الرَّحِيْمُ ﴿١٠٧﴾

106. kaj diri: "Turnu vian atenton al la religio en justeco, kaj ne estu unu el la idolanoj,

قُلْ يٰٓاَيُّهَا النَّاسُ قَدْ جَآءَكُمُ الْحَقُّ مِنْ رَّبِّكُمْ ۚ فَمَنِ
اهْتَدٰى فَاِنَّمَا يَهْتَدِيْ لِنَفْسِهٖ ۚ وَ مَنْ ضَلَّ فَاِنَّمَا
يَضِلُّ عَلَيْهَا ۚ وَ مَآ اَنَا عَلَيْكُمْ بِوَكِيْلٍ ﴿١٠٨﴾

107. kaj ne voku apud Allah tion, kio povas nek utili nek malutili al vi. Se vi tion farus, vi certe estus malpiegulo".

وَ اتَّبِعْ مَا يُوْحٰٓى اِلَيْكَ وَ اصْبِرْ حَتّٰى يَحْكُمَ اللّٰهُ ۚ وَ هُوَ
خَيْرُ الْحٰكِمِيْنَ ﴿١٠٩﴾ ع ١٢

108. Se Allah trafas vin per malfeliĉo, tiam neniu povas forpreni ĝin krom Li sola. Se Li volas la bonon por vi, neniu kapablas repeli Lian gracon. Ĝi Siaj servantoj Li venigas al Si, kiun Li volas. Li estas la Senkulpigema, la Pardonema.

109. Diru: "Ho vi, homoj! Vere venis al vi la vero de via Sinjoro. Kiu do sekvas la gvidadon, tiu sekvas ĝin por la bono de sia propra animo, kaj kiu eraradas, tiu nur por sia propra malutilo eraradas. Mi ne estas gardanto super vi".

110. Sekvu tion, kio estis revelaciita al vi, kaj persistu, ĝis Allah donos Sian verdikton. Li estas la plej bona Juĝanto.

سُوْرَة هُوْد مَكِّيَّة

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

الٓرٰ تِلْكَ اٰيٰتُ الْكِتٰبِ الْحَكِيْمِ ② اَلَّا تَعْبُدُوْٓا اِلَّا اللّٰهَ ؕ اِنَّنِيْ لَكُمْ مِّنْهُ نَذِيْرٌ وَّبَشِيْرٌ ③ وَّاَنِ اسْتَغْفِرُوْا رَبَّكُمْ ثُمَّ تُوْبُوْٓا اِلَيْهِ يُمَتِّعْكُمْ مَّتَاعًا حَسَنًا اِلٰٓى اَجَلٍ مُّسَمًّى وَّيُؤْتِ كُلَّ ذِيْ فَضْلٍ فَضْلَهٗ ؕ وَاِنْ تَوَلَّوْا فَاِنِّيْٓ اَخَافُ عَلَيْكُمْ عَذَابَ يَوْمٍ كَبِيْرٍ ④ اِلَى اللّٰهِ مَرْجِعُكُمْ ۚ وَهُوَ عَلٰى كُلِّ شَيْءٍ قَدِيْرٌ ⑤ اَلَآ اِنَّهُمْ يَثْنُوْنَ صُدُوْرَهُمْ لِيَسْتَخْفُوْا مِنْهُ ؕ اَلَا حِيْنَ يَسْتَغْشُوْنَ ثِيَابَهُمْ ۙ يَعْلَمُ مَا يُسِرُّوْنَ وَمَا يُعْلِنُوْنَ ۚ اِنَّهٗ عَلِيْمٌۢ بِذَاتِ الصُّدُوْرِ ⑥ وَمَا مِنْ دَآبَّةٍ فِي الْاَرْضِ اِلَّا عَلَى اللّٰهِ رِزْقُهَا وَيَعْلَمُ مُسْتَقَرَّهَا وَمُسْتَوْدَعَهَا ؕ كُلٌّ فِيْ كِتٰبٍ مُّبِيْنٍ ⑦ وَهُوَ الَّذِيْ خَلَقَ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ فِيْ سِتَّةِ اَيَّامٍ وَّكَانَ عَرْشُهٗ عَلَى الْمَآءِ لِيَبْلُوَكُمْ اَيُّكُمْ اَحْسَنُ عَمَلًا ؕ وَلَئِنْ قُلْتَ اِنَّكُمْ مَّبْعُوْثُوْنَ مِنْ بَعْدِ الْمَوْتِ لَيَقُوْلَنَّ الَّذِيْنَ كَفَرُوْٓا اِنْ هٰذَآ اِلَّا سِحْرٌ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Alef, Lām, Rā**. Libro, kies versoj estis kreitaj nesanĝeblaj, poste klarigitaj fare de la Saĝa, de la Ĉiokona.

3. Por ke vi ne adoru iun ajn krom Allahon. Mi vere estas por vi de Li admonanto kaj portanto de la bona novaĵo,

4. kaj por ke vi petegu pardonon de via Sinjoro kaj poste konvertiĝu al Li. Li donos al vi bonegan provizaĵon ĝis la fino de la fiksita limtempo. Sian gracon Li konsentos al ĉiu, kiu ĝin meritas. Se vi tamen poste turnos vin for, tiam mi timas por vi la punon de la Tago timenda.

5. Al Allah estos via reveno; Li havas povon super ĉiuj aferoj.

6. Aŭskultu! Ili fermas siajn brustojn por kaŝi sin de Li. Jen! Eĉ se ili kovras sin per siaj vestaĵoj, Li scias, kion ili kaŝas, kaj kion ili malkaŝas. Vere Li bone konas la internon de la brustoj.

* Fino de la 11-a parto

7. Ne ekzistas kreitaĵo sur la tero, kies vivteno ne koncernus Allahon; ĉio ĉi estas en klara Libro.

8. Estas Li Tiu, kiu kreis la ĉielojn kaj la teron en ses tagoj – Lia trono staras sur la akvo – por elprovi vin kaj por ekscii, kiu

* v. la verson 51an k.sekv.
** Mi, Allah, Ĉiovida

el vi estas plej bona je la faroj. Kiam vi diros: "Vi vere estos vekitaj post la morto" tiam certe diros la miskredantoj: "Tio ĉi nur estas evidenta magio".

9. Se Ni tamen prokrastus ilian punon ĝis limtempo kalkulita, ili certe dirus: "Kio prokrastas ĝin? ". Aŭskultu! En la tago, kiam la puno venos, neniu malhelpos ĝin for de ili, kaj ilin ĉirkaŭos tio, kion ili mokis.

10. Se Ni igas homon gustumi Nian kompaton kaj poste forprenas ĝin de li, vere li tiam estas malesperanta kaj sendanka.

11. Se Ni male igas lin gustumi felicon, post kiam lin trafis malfelicо, tiam li certe diras: "La malfelicо estas for de mi" kaj li fariĝas gaja, fanfaronema,

12. krom la persistemuloj kaj la bonfarantoj. Por ili estos pardono kaj granda rekompenco.

13. Ili imagas, ke vi nun eble forĵetos porcion de tio, kio estis revelaciita al vi, kaj via brusto mallarĝiĝas pro ilia diro: "Kial ne estis sendita al li trezoro, aŭ ne venis kun li anĝelo? ". Vi tamen nur estas admonanto kaj Allah estas Gardanto super ĉiuj aferoj.

14. Ĉu eble ili diros: "Li elpensis ĝin? ". Diru: "Alportu do dek ĉapitrojn similajn, elpensitajn, kaj voku, kiun vi volas, krom Allah, se vi estas sinceraj! ".

15. Kaj se ili ne respondos al vi, tiam sciu: tio estis revelaciita per la sçio de Allah, kaj ne ekzistas alia Dio ol Li. Ĉu vi nun volas submetiĝi?

16. Tiujn, kiuj deziras ĉi tiun vivon kaj ĝian gloron, Ni volas elpagi pro iliaj verkoj ĉi tie kaj en ĝi ili ne suferos maljustecon.

مُّبِينٌ ﴿٨﴾
وَلَئِنْ أَخَّرْنَا عَنْهُمُ الْعَذَابَ إِلَىٰ أُمَّةٍ مَّعْدُودَةٍ
لَّيَقُولُنَّ مَا يَحْبِسُهُ ۗ أَلَا يَوْمَ يَأْتِيهِمْ لَيْسَ مَصْرُوفًا
عَنْهُمْ وَحَاقَ بِهِم مَّا كَانُوا بِهِ يَسْتَهْزِئُونَ ﴿٩﴾
وَلَئِنْ أَذَقْنَا الْإِنسَانَ مِنَّا رَحْمَةً ثُمَّ نَزَعْنَاهَا مِنْهُ
إِنَّهُ لَيَئُوسٌ كَفُورٌ ﴿١٠﴾
وَلَئِنْ أَذَقْنَاهُ نَعْمَاءَ بَعْدَ ضَرَّاءَ مَسَّتْهُ لَيَقُولَنَّ
ذَهَبَ السَّيِّئَاتُ عَنِّي ۚ إِنَّهُ لَفَرِحٌ فَخُورٌ ﴿١١﴾
إِلَّا الَّذِينَ صَبَرُوا وَعَمِلُوا الصَّالِحَاتِ ۚ أُولَٰئِكَ لَهُم
مَّغْفِرَةٌ وَأَجْرٌ كَبِيرٌ ﴿١٢﴾
فَلَعَلَّكَ تَارِكٌ بَعْضَ مَا يُوحَىٰ إِلَيْكَ وَضَائِقٌ بِهِ
صَدْرُكَ أَن يَقُولُوا لَوْلَا أُنزِلَ عَلَيْهِ كَنزٌ أَوْ جَاءَ
مَعَهُ مَلَكٌ ۚ إِنَّمَا أَنتَ نَذِيرٌ ۚ وَاللَّهُ عَلَىٰ كُلِّ شَيْءٍ
وَكِيلٌ ﴿١٣﴾
أَمْ يَقُولُونَ افْتَرَاهُ ۖ قُلْ فَأْتُوا بِعَشْرِ سُوَرٍ مِّثْلِهِ
مُفْتَرَيَاتٍ وَادْعُوا مَنِ اسْتَطَعْتُم مِّن دُونِ اللَّهِ إِن
كُنتُمْ صَادِقِينَ ﴿١٤﴾
فَإِلَّمْ يَسْتَجِيبُوا لَكُمْ فَاعْلَمُوا أَنَّمَا أُنزِلَ بِعِلْمِ اللَّهِ
وَأَن لَّا إِلَٰهَ إِلَّا هُوَ ۖ فَهَلْ أَنتُم مُّسْلِمُونَ ﴿١٥﴾
مَن كَانَ يُرِيدُ الْحَيَاةَ الدُّنْيَا وَزِينَتَهَا نُوَفِّ
إِلَيْهِمْ أَعْمَالَهُمْ فِيهَا وَهُمْ فِيهَا لَا يُبْخَسُونَ ﴿١٦﴾
أُولَٰئِكَ الَّذِينَ لَيْسَ لَهُمْ فِي الْآخِرَةِ إِلَّا النَّارُ ۖ

17. Estas ili tiuj, por kiuj en la vivo venonta estos nur fajro, kaj tio, kion ili faris en ĉi tiu vivo, estos senvalora, kaj iliaj agoj estos vanaj.

18. Ĉu povas esti trompisto tiu, kiu posedas evidentan pruvon de sia Sinjoro kaj kiun sekvas atestanto de Li kaj kiun antaŭiris la Skribo de Moseo kiel gvidilo kaj graco? Ili kredos al li kaj por tiuj el la partio malamika, kiuj rifuzos, estos sola restadejo la fajro. Do ne estu dubanta pri tio. Tio certe estas la vero de via Sinjoro, sed la plej multaj el la homoj ne kredas.

19. Kiu estas pli malbona ol tiu, kiu elpensas mensogon kontraŭ Allah? Ili estos kondukitaj antaŭ sian Sinjoron kaj la atestantoj diros: "Ĉi tiuj estas tiuj, kiuj mensogis kontraŭ sia Sinjoro". Aŭskultu! La malbeno de Allah falu sur la malpiegulojn.

20. kiuj devojigas de la afero de Allah kaj volas distordi ĝin. Estas ili tiuj, kiuj ne kredas al la vivo venonta.

21. Ili neniam kapablos venki en la lando kaj por ili neniam estos patronoj krom Allah. Estos duobligita la turmento por ili kaj ili ne kapablos aŭdi nek vidi.

22. Estas ili tiuj, kiuj pereigas siajn animojn, kaj neniom utilos al ili tio, kion ili elpensis.

23. Ne estas dubo, ke en la vivo venonta ili estos la plej grandaj perdantoj.

24. Vere la kredantoj kaj la bonfarantoj, kiuj humiligas antaŭ sia Sinjoro: tiuj estos la loĝantoj de l' Paradizo kaj tie ili restos por ĉiam.

25. La du partioj similas al la blindulo kaj surdulo kaj al la vidanta kaj aŭdanta. Ĉu ili estas similaj inter si? Ĉu vi do ne volas kompreni?

وَحَبِطَ مَا صَنَعُوا فِيهَا وَبٰطِلٌ مَّا كَانُوا يَعْمَلُونَ ﴿١٦﴾

أَفَمَن كَانَ عَلَىٰ بَيِّنَةٍ مِّن رَّبِّهِ وَيَتْلُوهُ شَاهِدٌ مِّنْهُ
وَمِن قَبْلِهِ كِتٰبُ مُوسَىٰٓ إِمَامًا وَرَحْمَةً ۚ أُولٰٓئِكَ
يُؤْمِنُونَ بِهِ ۚ وَمَن يَكْفُرْ بِهِ مِنَ الْأَحْزَابِ فَالنَّارُ
مَوْعِدُهُ ۚ فَلَا تَكُ فِي مِرْيَةٍ مِّنْهُ ۖ إِنَّهُ الْحَقُّ مِن رَّبِّكَ
وَلٰكِنَّ أَكْثَرَ النَّاسِ لَا يُؤْمِنُونَ ﴿١٧﴾

وَمَنْ أَظْلَمُ مِمَّنِ افْتَرَىٰ عَلَى اللَّهِ كَذِبًا ۚ أُولٰٓئِكَ
يُعْرَضُونَ عَلَىٰ رَبِّهِمْ وَيَقُولُ الْأَشْهَادُ هٰٓؤُلَاءِ
الَّذِينَ كَذَبُوا عَلَىٰ رَبِّهِمْ ۚ أَلَا لَعْنَةُ اللَّهِ عَلَى
الظّٰلِمِينَ ﴿١٨﴾

الَّذِينَ يَصُدُّونَ عَن سَبِيلِ اللَّهِ وَيَبْغُونَهَا عِوَجًا
وَهُم بِالْآخِرَةِ هُمْ كٰفِرُونَ ﴿١٩﴾

أُولٰٓئِكَ لَمْ يَكُونُوا مُعْجِزِينَ فِي الْأَرْضِ وَمَا كَانَ
لَهُم مِّن دُونِ اللَّهِ مِنْ أَوْلِيَاءَ ۘ يُضٰعَفُ لَهُمُ
الْعَذَابُ ۚ مَا كَانُوا يَسْتَطِيعُونَ السَّمْعَ وَمَا كَانُوا
يُبْصِرُونَ ﴿٢٠﴾

أُولٰٓئِكَ الَّذِينَ خَسِرُوٓا أَنفُسَهُمْ وَضَلَّ عَنْهُم مَّا
كَانُوا يَفْتَرُونَ ﴿٢١﴾

لَا جَرَمَ أَنَّهُمْ فِي الْآخِرَةِ هُمُ الْأَخْسَرُونَ ﴿٢٢﴾

إِنَّ الَّذِينَ آمَنُوا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ وَأَخْبَتُوٓا إِلَىٰ
رَبِّهِمْ ۙ أُولٰٓئِكَ أَصْحٰبُ الْجَنَّةِ ۖ هُمْ فِيهَا خٰلِدُونَ ﴿٢٣﴾

مَثَلُ الْفَرِيقَيْنِ كَالْأَعْمَىٰ وَالْأَصَمِّ وَالْبَصِيرِ وَ

26. Vere Ni sendis Noan al lia popolo kaj li diris: "Vere mi estas por vi evidenta admonanto,

27. por ke vi adoru nur Allahon. Vere mi timas por vi la punon de la tago dolora".

28. Diris la estroj de la miskredantoj el lia popolo: "Ni vidas en vi nur viron similan al ni, kaj ni vidas nur, ke sekvis vin la plej malindaj el ni, kaj ni ne vidas en vi iun ajn kaŭzon de supereco kompare kun ni. Ne! Ni rigardas vin kiel mensogulon".

29. Li diris: "Ho mia popolo! Se mi havas pruvon evidentan de mia Sinjoro kaj Li donis al mi Sian favoron, kiu tamen mallumiĝis por vi, ĉu mi devas altrudi ĝin al vi, kvankam vi ĝin malŝatas?

30. Ho mia popolo! Mi ne volas iun ajn repagon pro tio. Mia repago estas nur ĉe Allah, kaj mi certe ne repuŝos la kredantojn. Ili certe renkontos sian Sinjoron. Mi tamen rigardas vin kiel popolon agantan nescie.

31. Ho mia popolo! Kiu helpoş min kontraŭ Allah, se mi repuŝos ilin? Ĉu vi ne volas kompreni?

32. Mi ne diras al vi: "Mi posedas la trezorojn de Allah", kaj mi ne konas la Nevideblaĵon, kaj mi ne diras: "Mi estas anĝelo", kaj mi ne diras pri tiuj, kiujn vi malŝatas: "Neniam Allah konsentos al ili bonon". Allah plej bone scias, kio estas en iliaj animoj; certe, alie mi estus malbonfaranto".

33. Ili diris: "Ho Noa! Vere vi disputis kun ni longe kaj ofte, do alportu al ni tion, pri kio vi nin minacas, se vi estas sincera".

34. Li respondis: "Vere ĝin alportos al vi Allah, se Li volas, kaj vi ne kapablos malhelpi tion.

35. Mia konsilo ne utilos al vi – eĉ se mi volus konsili – se Allah deziros neniigi

السَّمِيعِ هَلْ يَسْتَوِيَانِ مَثَلًا أَفَلَا تَذَكَّرُونَ ﴿٢٤﴾
وَلَقَدْ أَرْسَلْنَا نُوحًا إِلَىٰ قَوْمِهِ إِنِّي لَكُمْ نَذِيرٌ
مُّبِينٌ ﴿٢٥﴾
أَنْ لَّا تَعْبُدُوا إِلَّا اللَّهَ إِنِّي أَخَافُ عَلَيْكُمْ عَذَابَ
يَوْمٍ أَلِيمٍ ﴿٢٦﴾
فَقَالَ الْمَلَأُ الَّذِينَ كَفَرُوا مِن قَوْمِهِ مَا نَرَاكَ إِلَّا
بَشَرًا مِّثْلَنَا وَمَا نَرَاكَ اتَّبَعَكَ إِلَّا الَّذِينَ هُمْ
أَرَاذِلُنَا بَادِيَ الرَّأْيِ ۖ وَمَا نَرَىٰ لَكُمْ عَلَيْنَا مِن فَضْلٍ
بَلْ نَظُنُّكُمْ كَاذِبِينَ ﴿٢٧﴾
قَالَ يَا قَوْمِ أَرَأَيْتُمْ إِن كُنتُ عَلَىٰ بَيِّنَةٍ مِّن رَّبِّي
وَآتَانِي رَحْمَةً مِّنْ عِندِهِ فَعُمِّيَتْ عَلَيْكُمْ ۚ
أَنُلْزِمُكُمُوهَا وَأَنتُمْ لَهَا كَارِهُونَ ﴿٢٨﴾
وَيَا قَوْمِ لَا أَسْأَلُكُمْ عَلَيْهِ مَالًا ۖ إِنْ أَجْرِيَ إِلَّا
عَلَى اللَّهِ وَمَا أَنَا بِطَارِدِ الَّذِينَ آمَنُوا ۚ إِنَّهُم مُّلَاقُو
رَبِّهِمْ وَلَٰكِنِّي أَرَاكُمْ قَوْمًا تَجْهَلُونَ ﴿٢٩﴾
وَيَا قَوْمِ مَن يَنصُرُنِي مِنَ اللَّهِ إِن طَرَدتُّهُمْ ۚ أَفَلَا
تَذَكَّرُونَ ﴿٣٠﴾
وَلَا أَقُولُ لَكُمْ عِندِي خَزَائِنُ اللَّهِ وَلَا أَعْلَمُ
الْغَيْبَ وَلَا أَقُولُ إِنِّي مَلَكٌ وَلَا أَقُولُ لِلَّذِينَ
تَزْدَرِي أَعْيُنُكُمْ لَن يُؤْتِيَهُمُ اللَّهُ خَيْرًا ۖ اللَّهُ
أَعْلَمُ بِمَا فِي أَنفُسِهِمْ ۖ إِنِّي إِذًا لَّمِنَ الظَّالِمِينَ ﴿٣١﴾
قَالُوا يَا نُوحُ قَدْ جَادَلْتَنَا فَأَكْثَرْتَ جِدَالَنَا فَأْتِنَا

بِمَا تَعِدُنَآ إِن كُنتَ مِنَ ٱلصَّٰدِقِينَ ﴿٣٢﴾

vin. Li estas via Sinjoro kaj al Li vi revenos".

قَالَ إِنَّمَا يَأْتِيكُم بِهِ ٱللَّهُ إِن شَآءَ وَمَآ أَنتُم

36. Ĉu ili diras: "Li elpensis tion? ". Diru: "Se mi elpensis tion, sur min falu mia peko, kaj mi tamen ne devos responsi pri viaj pekoj".

بِمُعْجِزِينَ ﴿٣٣﴾

وَلَا يَنفَعُكُمْ نُصْحِىٓ إِنْ أَرَدتُّ أَنْ أَنصَحَ لَكُمْ

إِن كَانَ ٱللَّهُ يُرِيدُ أَن يُغْوِيَكُمْ ۖ هُوَ رَبُّكُمْ ۖ

وَإِلَيْهِ تُرْجَعُونَ ﴿٣٤﴾

أَمْ يَقُولُونَ ٱفْتَرَىٰهُ ۖ قُلْ إِنِ ٱفْتَرَيْتُهُۥ فَعَلَىَّ إِجْرَامِى

وَأَنَا۠ بَرِىٓءٌ مِّمَّا تُجْرِمُونَ ﴿٣٥﴾ ع

37. Estis revelaciite al Noa: "Neniu el via popolo kredos krom tiuj, kiuj jam kredis. Ne ĉagreniĝu do pro iliaj faroj.

وَأُوحِىَ إِلَىٰ نُوحٍ أَنَّهُۥ لَن يُؤْمِنَ مِن قَوْمِكَ إِلَّا

مَن قَدْ ءَامَنَ فَلَا تَبْتَئِسْ بِمَا كَانُوا۟ يَفْعَلُونَ ﴿٣٦﴾

38. Konstruu la arkeon antaŭ Niaj okuloj laŭ Nia revelacio, kaj ne parolu al Ni, propetante por la malbonfarantoj. Ili certe dronos".

وَٱصْنَعِ ٱلْفُلْكَ بِأَعْيُنِنَا وَوَحْيِنَا وَلَا تُخَٰطِبْنِى فِى

ٱلَّذِينَ ظَلَمُوٓا۟ ۖ إِنَّهُم مُّغْرَقُونَ ﴿٣٧﴾

39. Li konstruis la arkeon. Ĉiam, kiam la estroj de lia popolo preterpasis ĝin, ili mokis lin. Li diris: "Se vi min mokas, ankaŭ mi mokos vin, kiel vi mokas.

وَيَصْنَعُ ٱلْفُلْكَ وَكُلَّمَا مَرَّ عَلَيْهِ مَلَأٌ مِّن قَوْمِهِۦ

سَخِرُوا۟ مِنْهُ ۚ قَالَ إِن تَسْخَرُوا۟ مِنَّا فَإِنَّا نَسْخَرُ مِنكُمْ

كَمَا تَسْخَرُونَ ﴿٣٨﴾

40. Tiam vi ekscios, sur kiun venos la puno, kiu kovros lin per honto, kaj sur kiun falos daŭra turmento".

فَسَوْفَ تَعْلَمُونَ مَن يَأْتِيهِ عَذَابٌ يُخْزِيهِ وَ

يَحِلُّ عَلَيْهِ عَذَابٌ مُّقِيمٌ ﴿٣٩﴾

41. Ĝis Nia ordono venis kaj la fontoj elŝprucis. Tiam Ni diris: "Enirigu en ĝin du el ĉiu, unu paron, kaj vian familion, krom tiuj, kontraŭ kiuj jam estis eldirita la verdikto, kaj enirigu en ĝin la kredantojn". Malmultaj tamen kredis kun li.

حَتَّىٰٓ إِذَا جَآءَ أَمْرُنَا وَفَارَ ٱلتَّنُّورُ ۖ قُلْنَا ٱحْمِلْ فِيهَا

مِن كُلٍّ زَوْجَيْنِ ٱثْنَيْنِ وَأَهْلَكَ إِلَّا مَن سَبَقَ

عَلَيْهِ ٱلْقَوْلُ وَمَنْ ءَامَنَ ۚ وَمَآ ءَامَنَ مَعَهُۥٓ إِلَّا قَلِيلٌ ﴿٤٠﴾

42. Li diris: "Eniru en ĝin! Je la nomo de Allah ĝi levos kaj ĵetos la ankrojn. Vere mia Sinjoro estas senkulpigema, pardonema".

وَقَالَ ٱرْكَبُوا۟ فِيهَا بِسْمِ ٱللَّهِ مَجْرٖىٰهَا وَمُرْسَىٰهَآ ۚ

إِنَّ رَبِّى لَغَفُورٌ رَّحِيمٌ ﴿٤١﴾

43. Kaj ĝi forveturis kun ili sur la ondoj, kiuj estis kiel montoj, kaj vokis Noa sian filon, kiu staris aparte: "Ho mia filo, eniru kun ni kaj ne restu kun la miskredantoj! ".

44. Li respondis: "Mi tuj iros sur monton, kiu protektos min de la akvo". Li diris: "Hodiaŭ ne estos protekto kontraŭ la ordono de Allah krom por tiuj, por kiuj Li havas kompaton". Kaj inter ilin ŝprucis la ondo, kaj tiel li estis unu el la dronantoj.

وَهِيَ تَجْرِي بِهِمْ فِي مَوْجٍ كَالْجِبَالِ وَنَادَىٰ نُوحٌ ابْنَهُ وَكَانَ فِي مَعْزِلٍ يَا بُنَيَّ ارْكَب مَّعَنَا وَلَا تَكُن مَّعَ الْكَافِرِينَ ﴿٤٢﴾

45. Estis dirite: "Ho tero! Eltrinku vian akvon" kaj: "Ho ĉielo! Ĉesu pluvi". Kaj la akvo malpliiĝis kaj la afero estis decidita kaj la arkeo haltis sur Al-Gūdī* kaj estis dirite: "For, la popolo malpiega! ".

قَالَ سَآوِي إِلَىٰ جَبَلٍ يَعْصِمُنِي مِنَ الْمَاءِ ۚ قَالَ لَا عَاصِمَ الْيَوْمَ مِنْ أَمْرِ اللَّهِ إِلَّا مَن رَّحِمَ ۚ وَحَالَ بَيْنَهُمَا الْمَوْجُ فَكَانَ مِنَ الْمُغْرَقِينَ ﴿٤٣﴾

46. Vokis Noa sian Sinjoron kaj diris: "Ho mia Sinjoro, mia filo apartenas al mia familio, kaj certe Via promeso estas vera, kaj Vi estas la plej justa juĝanto".

وَقِيلَ يَا أَرْضُ ابْلَعِي مَاءَكِ وَيَا سَمَاءُ أَقْلِعِي وَغِيضَ الْمَاءُ وَقُضِيَ الْأَمْرُ وَاسْتَوَتْ عَلَى الْجُودِيِّ وَقِيلَ بُعْدًا لِّلْقَوْمِ الظَّالِمِينَ ﴿٤٤﴾

47. Li diris: "Ho Noa, li vere ne apartenas al via familio. Lia konduto ne estis bona, do ne demandu tion, pri kio vi nenion scias. Mi admonas vin, por ke vi ne fariĝu malsaĝa".

وَنَادَىٰ نُوحٌ رَّبَّهُ فَقَالَ رَبِّ إِنَّ ابْنِي مِنْ أَهْلِي وَإِنَّ وَعْدَكَ الْحَقُّ وَأَنتَ أَحْكَمُ الْحَاكِمِينَ ﴿٤٥﴾

48. Li diris: "Ho mia Sinjoro, mi vere serĉas rifuĝon ĉe vi, por ke mi ne demandu tion, pri kio mi ne scias, kaj se Vi ne pardonus min kaj ne havus kompaton al mi, vere mi estus el la perdantoj".

قَالَ يَا نُوحُ إِنَّهُ لَيْسَ مِنْ أَهْلِكَ ۖ إِنَّهُ عَمَلٌ غَيْرُ صَالِحٍ ۖ فَلَا تَسْأَلْنِ مَا لَيْسَ لَكَ بِهِ عِلْمٌ ۖ إِنِّي أَعِظُكَ أَن تَكُونَ مِنَ الْجَاهِلِينَ ﴿٤٦﴾

49. Estis dirite: "Ho Noa! Forveturu kun Nia paco kaj estu beno super vi kaj super la gentoj, kiuj estas kun vi. Kaj estos aliaj gentoj, al kiuj Ni konsentos provizon por iom da tempo, sed poste ilin trafos dolora puno venanta de Ni".

قَالَ رَبِّ إِنِّي أَعُوذُ بِكَ أَنْ أَسْأَلَكَ مَا لَيْسَ لِي بِهِ عِلْمٌ ۖ وَإِلَّا تَغْفِرْ لِي وَتَرْحَمْنِي أَكُن مِّنَ الْخَاسِرِينَ ﴿٤٧﴾

50. Tiu ĉi estas unu el la rakontoj de la Nevideblaĵo, kiujn Ni revelacias al vi. Antaŭe nek vi nek via popolo sciis ilin; persistu do: la fina feliĉo estas por la justuloj.

قِيلَ يَا نُوحُ اهْبِطْ بِسَلَامٍ مِّنَّا وَبَرَكَاتٍ عَلَيْكَ وَعَلَىٰ أُمَمٍ مِّمَّن مَّعَكَ ۚ وَأُمَمٌ سَنُمَتِّعُهُمْ ثُمَّ يَمَسُّهُم مِّنَّا عَذَابٌ أَلِيمٌ ﴿٤٨﴾

تِلْكَ مِنْ أَنبَاءِ الْغَيْبِ نُوحِيهَا إِلَيْكَ ۖ مَا كُنتَ تَعْلَمُهَا أَنتَ وَلَا قَوْمُكَ مِن قَبْلِ هَٰذَا ۖ فَاصْبِرْ ۖ

---

* Monto en Armenujo

إِنَّ الْعَاقِبَةَ لِلْمُتَّقِينَ ﴿٥١﴾

51. Al la Aadanoj Ni sendis ilian fraton Hudon. Li diris: "Ho mia popolo, adoru Allahon. Vi ne havas alian Dion ol Lin. Vi estas nur elpensantoj.

وَإِلَىٰ عَادٍ أَخَاهُمْ هُودًا ۚ قَالَ يَا قَوْمِ اعْبُدُوا اللَّهَ
مَا لَكُمْ مِنْ إِلَٰهٍ غَيْرُهُ ۖ إِنْ أَنْتُمْ إِلَّا مُفْتَرُونَ ﴿٥٠﴾
يَا قَوْمِ لَا أَسْأَلُكُمْ عَلَيْهِ أَجْرًا ۖ إِنْ أَجْرِيَ إِلَّا عَلَى
الَّذِي فَطَرَنِي ۚ أَفَلَا تَعْقِلُونَ ﴿٥١﴾

52. Ho mia popolo, mi ne volas iun ajn rekompencon pro tio. Jen, mia rekompenco estas jam ĉe Tiu, kiu min kreis. Ĉu vi do ne volas kompreni?

وَيَا قَوْمِ اسْتَغْفِرُوا رَبَّكُمْ ثُمَّ تُوبُوا إِلَيْهِ يُرْسِلِ
السَّمَاءَ عَلَيْكُمْ مِدْرَارًا وَيَزِدْكُمْ قُوَّةً إِلَىٰ قُوَّتِكُمْ
وَلَا تَتَوَلَّوْا مُجْرِمِينَ ﴿٥٢﴾

53. Ho mia popolo, petegu pardonon de via Sinjoro, poste konvertiĝu al Li; Li sendos nubojn por vi kun abundaj pluvoj kaj Li plifortigos vin per Sia povo; ne turnu vin for, kiel la kulpuloj".

قَالُوا يَا هُودُ مَا جِئْتَنَا بِبَيِّنَةٍ وَمَا نَحْنُ بِتَارِكِي
آلِهَتِنَا عَنْ قَوْلِكَ وَمَا نَحْنُ لَكَ بِمُؤْمِنِينَ ﴿٥٣﴾
إِنْ نَقُولُ إِلَّا اعْتَرَاكَ بَعْضُ آلِهَتِنَا بِسُوءٍ ۗ قَالَ إِنِّي
أُشْهِدُ اللَّهَ وَاشْهَدُوا أَنِّي بَرِيءٌ مِمَّا تُشْرِكُونَ ﴿٥٤﴾
مِنْ دُونِهِ فَكِيدُونِي جَمِيعًا ثُمَّ لَا تُنْظِرُونِ ﴿٥٥﴾
إِنِّي تَوَكَّلْتُ عَلَى اللَّهِ رَبِّي وَرَبِّكُمْ ۚ مَا مِنْ دَابَّةٍ
إِلَّا هُوَ آخِذٌ بِنَاصِيَتِهَا ۚ إِنَّ رَبِّي عَلَىٰ صِرَاطٍ
مُسْتَقِيمٍ ﴿٥٦﴾

54. Ili diris: "Ho Hud! Vi ne alportis iun ajn evidentan pruvon kaj ni ne forlasos niajn Diojn pro via vorto kaj ni ne kredos al vi.

55. Ni povas nur diri, ke iuj el niaj Dioj vin trafis per malfeliĉo". Li respondis: "Mi vokas Allahon kiel atestanton, kaj atestu ankaŭ vi, ke mi ne partoprenas je tio, kion vi adoras

56. anstataŭ Lin; do intrigu vi ĉiuj kontraŭ mi kaj ne konsentu al mi prokraston.

57. Mi vere fidas je Allah, mia Sinjoro kaj via Sinjoro. Ne ekzistas estaĵo, kiun Li ne tenas je ĝia hartufo. Vere mia Sinjoro estas sur la rekta vojo.

فَإِنْ تَوَلَّوْا فَقَدْ أَبْلَغْتُكُمْ مَا أُرْسِلْتُ بِهِ إِلَيْكُمْ ۚ
وَيَسْتَخْلِفُ رَبِّي قَوْمًا غَيْرَكُمْ وَلَا تَضُرُّونَهُ شَيْئًا ۚ إِنَّ
رَبِّي عَلَىٰ كُلِّ شَيْءٍ حَفِيظٌ ﴿٥٧﴾

58. Se vi nun turnos vin for, jen, vere mi jam transdonis al vi tion, kio estis donita al mi por vi, kaj mia Sinjoro metos alian popolon sur vian postenon. Vi neniel povas malutili al Li. Vere mia Sinjoro estas Gardanto super ĉiuj aferoj".

وَلَمَّا جَاءَ أَمْرُنَا نَجَّيْنَا هُودًا وَالَّذِينَ آمَنُوا مَعَهُ
بِرَحْمَةٍ مِنَّا وَنَجَّيْنَاهُمْ مِنْ عَذَابٍ غَلِيظٍ ﴿٥٨﴾
وَتِلْكَ عَادٌ ۖ جَحَدُوا بِآيَاتِ رَبِّهِمْ وَعَصَوْا رُسُلَهُ

59. Kiam venis Nia ordono, Ni savis Hudon kaj la kredantojn kun li per Nia kompato. Ni savis ilin de grava turmento.

60. Tiuj estis la Aadanoj. Ili pridubis la signojn de sia Sinjoro, malobeis Liajn sendi-

tojn kaj sekvis la inviton de la fierega malamiko.

وَاتَّبَعُوٓا۟ أَمْرَ كُلِّ جَبَّارٍ عَنِيدٍ ﴿٥٩﴾

61. Malbeno persekutis ilin en ĉi tiu vivo, kaj en la tago de la reviviĝo estos dirite: "Aŭskultu! Vere la Aadanoj rifuzis sian Sinjoron. Jen! for do de ĉi tie la Aadanoj, popolo de Hud! ".

وَأُتْبِعُوا۟ فِى هَٰذِهِ ٱلدُّنْيَا لَعْنَةً وَيَوْمَ ٱلْقِيَٰمَةِ ۗ أَلَآ إِنَّ عَادًا كَفَرُوا۟ رَبَّهُمْ ۗ أَلَا بُعْدًا لِّعَادٍ قَوْمِ هُودٍ ﴿٦٠﴾

62. Kaj al la Tamudoj Ni sendis ilian fraton Sŭălehon. Li diris: "Ho mia popolo, adoru Allahon. Vi ne havas alian Dion ol Lin. Li kreis vin el la tero kaj donis al vi loĝejon sur ĝi, do petegu pardonon de Li, poste konvertiĝu al Li. Vere mia Sinjoro estas proksima kaj elaŭdema".

وَإِلَىٰ ثَمُودَ أَخَاهُمْ صَٰلِحًا ۚ قَالَ يَٰقَوْمِ ٱعْبُدُوا۟ ٱللَّهَ مَا لَكُم مِّنْ إِلَٰهٍ غَيْرُهُۥ ۖ هُوَ أَنشَأَكُم مِّنَ ٱلْأَرْضِ وَٱسْتَعْمَرَكُمْ فِيهَا فَٱسْتَغْفِرُوهُ ثُمَّ تُوبُوٓا۟ إِلَيْهِ ۚ إِنَّ رَبِّى قَرِيبٌ مُّجِيبٌ ﴿٦١﴾

63. Ili diris: "Ho Sŭăleh, vi estis ĝis nun inter ni fonto de espero. Ĉu vi volas malpermesi al ni adori tion, kion adoris niaj patroj? Ni vere estas en grava dubo pri tio, kion vi ordonas al ni".

قَالُوا۟ يَٰصَٰلِحُ قَدْ كُنتَ فِينَا مَرْجُوًّا قَبْلَ هَٰذَآ ۖ أَتَنْهَىٰنَآ أَن نَّعْبُدَ مَا يَعْبُدُ ءَابَآؤُنَا ۖ وَإِنَّنَا لَفِى شَكٍّ مِّمَّا تَدْعُونَآ إِلَيْهِ مُرِيبٍ ﴿٦٢﴾

64. Li respondis: "Ho mia popolo, kion vi pensas? Se mi staras sur pruvo evidenta de mia Sinjoro kaj Li donis al mi Sian favoron, kiu do helpos min kontraŭ Allah, se mi estos malobeema al Li? Tiel vi povus nur pliigi mian pereon.

قَالَ يَٰقَوْمِ أَرَءَيْتُمْ إِن كُنتُ عَلَىٰ بَيِّنَةٍ مِّن رَّبِّى وَءَاتَىٰنِى مِنْهُ رَحْمَةً فَمَن يَنصُرُنِى مِنَ ٱللَّهِ إِنْ عَصَيْتُهُۥ ۖ فَمَا تَزِيدُونَنِى غَيْرَ تَخْسِيرٍ ﴿٦٣﴾

65. Ho mia popolo, jen estas – kiel signo por vi – la kamelino de Allah, do lasu ĝin paŝti sur la tero de Allah kaj ne tuŝu ĝin malutile, alie vin trafos baldaŭa puno".

وَيَٰقَوْمِ هَٰذِهِۦ نَاقَةُ ٱللَّهِ لَكُمْ ءَايَةً ۖ فَذَرُوهَا تَأْكُلْ فِىٓ أَرْضِ ٱللَّهِ ۖ وَلَا تَمَسُّوهَا بِسُوٓءٍ فَيَأْخُذَكُمْ عَذَابٌ قَرِيبٌ ﴿٦٤﴾

66. Ili tamen foroferis ĝin kaj tiam li diris: "Goju en viaj domoj ankoraŭ tri tagojn. Tio ĉi estas promeso, nenegebla".

فَعَقَرُوهَا ۖ فَقَالَ تَمَتَّعُوا۟ فِى دَارِكُمْ ثَلَٰثَةَ أَيَّامٍ ۖ ذَٰلِكَ وَعْدٌ غَيْرُ مَكْذُوبٍ ﴿٦٥﴾

67. Kiam nun Nia ordono alvenis, Ni savis Sŭălehon kaj la kredantojn kun li per Nia favoro kaj Ni savis ilin de la honto de tiu tago. Vere via Sinjoro estas la Forta, la Ciopova.

فَلَمَّا جَآءَ أَمْرُنَا نَجَّيْنَا صَٰلِحًا وَٱلَّذِينَ ءَامَنُوا۟ مَعَهُۥ بِرَحْمَةٍ مِّنَّا وَمِنْ خِزْىِ يَوْمِئِذٍ ۗ إِنَّ رَبَّكَ هُوَ ٱلْقَوِىُّ ٱلْعَزِيزُ ﴿٦٦﴾

وَأَخَذَ ٱلَّذِينَ ظَلَمُوا۟ ٱلصَّيْحَةُ فَأَصْبَحُوا۟ فِى دِيَٰرِهِمْ

جٰثِمِيْنَ ﴿٦٧﴾

كَاَنْ لَّمْ يَغْنَوْا فِيْهَا ۗ اَلَآ اِنَّ ثَمُوْدَا كَفَرُوْا رَبَّهُمْ ۗ
اَلَا بُعْدًا لِّثَمُوْدَ ﴿٦٨﴾

وَلَقَدْ جَآءَتْ رُسُلُنَآ اِبْرٰهِيْمَ بِالْبُشْرٰى قَالُوْا سَلٰمًا ۗ
قَالَ سَلٰمٌ فَمَا لَبِثَ اَنْ جَآءَ بِعِجْلٍ حَنِيْذٍ ﴿٦٩﴾
فَلَمَّا رَآٰ اَيْدِيَهُمْ لَا تَصِلُ اِلَيْهِ نَكِرَهُمْ وَاَوْجَسَ
مِنْهُمْ خِيْفَةً ۗ قَالُوْا لَا تَخَفْ اِنَّآ اُرْسِلْنَآ اِلٰى
قَوْمِ لُوْطٍ ﴿٧٠﴾
وَامْرَاَتُهٗ قَآئِمَةٌ فَضَحِكَتْ فَبَشَّرْنٰهَا بِاِسْحٰقَ ۙ وَ
مِنْ وَّرَآءِ اِسْحٰقَ يَعْقُوْبَ ﴿٧١﴾
قَالَتْ يٰوَيْلَتٰٓى ءَاَلِدُ وَاَنَا عَجُوْزٌ وَّهٰذَا بَعْلِىْ شَيْخًا ۗ
اِنَّ هٰذَا لَشَيْءٌ عَجِيْبٌ ﴿٧٢﴾
قَالُوْٓا اَتَعْجَبِيْنَ مِنْ اَمْرِ اللّٰهِ ۗ رَحْمَتُ اللّٰهِ وَبَرَكٰتُهٗ
عَلَيْكُمْ اَهْلَ الْبَيْتِ ۗ اِنَّهٗ حَمِيْدٌ مَّجِيْدٌ ﴿٧٣﴾
فَلَمَّا ذَهَبَ عَنْ اِبْرٰهِيْمَ الرَّوْعُ وَجَآءَتْهُ الْبُشْرٰى
يُجَادِلُنَا فِىْ قَوْمِ لُوْطٍ ﴿٧٤﴾
اِنَّ اِبْرٰهِيْمَ لَحَلِيْمٌ اَوَّاهٌ مُّنِيْبٌ ﴿٧٥﴾
يٰٓاِبْرٰهِيْمُ اَعْرِضْ عَنْ هٰذَا ۚ اِنَّهٗ قَدْ جَآءَ اَمْرُ
رَبِّكَ ۚ وَاِنَّهُمْ اٰتِيْهِمْ عَذَابٌ غَيْرُ مَرْدُوْدٍ ﴿٧٦﴾
وَلَمَّا جَآءَتْ رُسُلُنَا لُوْطًا سِيْٓءَ بِهِمْ وَضَاقَ بِهِمْ
ذَرْعًا وَّقَالَ هٰذَا يَوْمٌ عَصِيْبٌ ﴿٧٧﴾
وَجَآءَهٗ قَوْمُهٗ يُهْرَعُوْنَ اِلَيْهِ ۗ وَمِنْ قَبْلُ كَانُوْا

68. La malbonfarantojn atingis la puno kaj ili kuŝis en siaj domoj sur siaj brustoj,

69. kvazaŭ ili ne estus loĝintaj en ili. Jen! La Tamudoj rifuzis sian Sinjoron; jen! For de ĉi tie, la Tamudoj!

70. Vere Niaj senditoj venis al Abraham kun la bona novaĵo. Ili diris: "Pacon! " kaj li respondis: "Pacon! " kaj li ne malfruis kaj alportis rostitan bovidon.

71. Kiam li vidis, ke ili ne etendis al ĝi siajn manojn, li suspektis kaj ektimis ilin. Ili tamen diris: "Ne timu, ni vere estas senditaj al la popolo de Lot".

72. Lia edzino staris tie kaj ŝi timegis kaj Ni tiam sciigis al ŝi la bonan novaĵon de Isaak kaj post Isaak tiun de Jakob.

73. Ŝi diris: "Ho ve al mi! Ĉu mi naskos idon, kvankam mi estas maljuna, kaj mia edzo estas maljunulo? Tio certe estas stranga afero".

74. Ili diris: "Ĉu vi miras pri la ordono de Allah? La favoro de Allah kaj Liaj benoj estu sur vi, loĝantoj de la hejmo. Li estas vere laŭdinda, sankta".

75. Kiam foriris de Abraham la teruro kaj venis la bona novaĵo, li komencis argumenti kun Ni pri la popolo de Lot.

76. Vere Abraham estis milda, kompatema, virta.

77. "Ho Abraham, ĉesu do propeti! Jen, jam estas donita la ordono de via Sinjoro kaj plej certe ilin atingos neevitebla puno.

78. Kiam Niaj senditoj venis al Lot, li afliktiĝis pro tio kaj fartis malforta pro ili kaj li diris: "Jen malfeliĉa tago".

79. Venis lia popolo, kurante al li kaj kolere, kaj ankaŭ antaŭe ili malbonfaradis. Li diris: "Ho mia popolo! Jen miaj filinoj, ili estas puraj antaŭ vi, do respektegu Allahon kaj ne humiligu min antaŭ miaj gastoj. Ĉu ne estas inter vi klerulo? ".

يَعْمَلُونَ السَّيِّاٰتِ ۚ قَالَ يٰقَوْمِ هٰٓؤُلَآءِ بَنَاتِي هُنَّ
اَطْهَرُ لَكُمْ فَاتَّقُوا اللّٰهَ وَلَا تُخْزُونِ فِي ضَيْفِي ۖ اَلَيْسَ
مِنْكُمْ رَجُلٌ رَّشِيدٌ ﴿٧٩﴾

80. Ili respondis: "Vi certe tre bone scias, ke ni ne havas iun ajn rajton rilate al viaj filinoj, kaj vi bone scias, kion ni deziras".

قَالُوا لَقَدْ عَلِمْتَ مَا لَنَا فِي بَنٰتِكَ مِنْ حَقٍّ ۖ وَاِنَّكَ
لَتَعْلَمُ مَا نُرِيدُ ﴿٨٠﴾

81. Li diris: "Se mi nur havus la povon haltigi vin, aŭ se mi povus turni min al iu ajn forta apogilo! ".

قَالَ لَوْ اَنَّ لِي بِكُمْ قُوَّةً اَوْ اٰوِي اِلٰى رُكْنٍ شَدِيدٍ ﴿٨١﴾
قَالُوا يٰلُوطُ اِنَّا رُسُلُ رَبِّكَ لَنْ يَّصِلُوٓا اِلَيْكَ فَاَسْرِ
بِاَهْلِكَ بِقِطْعٍ مِّنَ الَّيْلِ وَلَا يَلْتَفِتْ مِنْكُمْ اَحَدٌ
اِلَّا امْرَاَتَكَ ۖ اِنَّهٗ مُصِيبُهَا مَآ اَصَابَهُمْ ۖ اِنَّ مَوْعِدَهُمُ
الصُّبْحُ ۖ اَلَيْسَ الصُّبْحُ بِقَرِيبٍ ﴿٨٢﴾

82. Ili diris: "Ho Lot! Ni vere estas senditoj de via Sinjoro. Ili neniam atingos vin, do foriru kun via gento dum la nokto, kaj neniu turnu sin malantaŭen, krom via edzino. Vere io ajn, kio tie trafos ilin, ĝi trafos ilin. Jen, la mateno estas ilia fiksita limtempo. Ĉu la mateno ne estas proksima? ".

فَلَمَّا جَآءَ اَمْرُنَا جَعَلْنَا عَالِيَهَا سَافِلَهَا وَاَمْطَرْنَا
عَلَيْهَا حِجَارَةً مِّنْ سِجِّيلٍ ۙ مَّنْضُودٍ ﴿٨٣﴾

83. Kiam alvenis Nia ordono, Ni en tiu urbo metis la suprajojn malsupren kaj Ni pluvigis sur ilin ŝtonojn el argilo, tavolon sur tavolon,

مُّسَوَّمَةً عِنْدَ رَبِّكَ ۖ وَمَا هِيَ مِنَ الظّٰلِمِينَ
بِبَعِيدٍ ﴿٨٤﴾ ع

84. markitajn de via Sinjoro; tiu puno ne estas malproksima de la malpieguloj.

وَاِلٰى مَدْيَنَ اَخَاهُمْ شُعَيْبًا ۚ قَالَ يٰقَوْمِ اعْبُدُوا
اللّٰهَ مَا لَكُمْ مِّنْ اِلٰهٍ غَيْرُهٗ ۖ وَلَا تَنْقُصُوا الْمِكْيَالَ
وَالْمِيزَانَ اِنِّي اَرٰىكُمْ بِخَيْرٍ وَّاِنِّي اَخَافُ عَلَيْكُمْ
عَذَابَ يَوْمٍ مُّحِيطٍ ﴿٨٥﴾

85. Al Madjan Ni sendis ilian fraton Ŝu'ajbon kaj li diris: "Ho mia popolo! Adoru Allahon; vi ne havas alian Dion ol Lin; ne trompu pri la mezuro kaj la pezo. Mi vere vidas vin en bonstato, sed mi timas por vi la punon de la tago de la detruo.

وَيٰقَوْمِ اَوْفُوا الْمِكْيَالَ وَالْمِيزَانَ بِالْقِسْطِ وَلَا
تَبْخَسُوا النَّاسَ اَشْيَآءَهُمْ وَلَا تَعْثَوْا فِي الْاَرْضِ
مُفْسِدِينَ ﴿٨٦﴾

86. Ho mia popolo, donu plenan mezuron kaj pezon laŭ justeco kaj ne trompu la homojn je iliaj proprajoj kaj ne estigu krime malpacon en la lando.

بَقِيَّتُ اللّٰهِ خَيْرٌ لَّكُمْ اِنْ كُنْتُمْ مُّؤْمِنِينَ ۚ وَمَآ اَنَا

87. Tio, kion Allah lasis ĉe vi, estos pli bona por vi, se vi estos kredantoj, kaj mi ne estas gardanto super vi".

88. Ili respondis: "Ho Ŝu'ajb! Ĉu via preĝo ordonas vin, ke ni forlasu tion, kion niaj patroj adoris, aŭ ke ni ĉesu agi pri niaj propraĵoj, kiel ni volas? Vere vi estas saĝa kaj klera! ".

89. Li diris: "Ho mia popolo, kion vi pensas? Se mi staras sur pruvo evidenta de mia Sinjoro kaj Li pretigis por mi per Si mem bonegajn provizaĵojn, kion do? Mi ne volas fari al vi ĝuste tion, pri kio mi provas dekonvinki vin. Mi nur deziras plibonigon, kiel plej eble. En mi ne estas povo, krom tiu venanta de Allah. Je Li mi fidas kaj al Li mi turnas min.

90. Ho mia popolo! Ne logu vin via malamikeco kontraŭ mi kun tiu sekvo, ke vin trafu la samo, kio trafis la popolon de Noa aŭ la popolon de Hud aŭ la popolon de Sŭāleh; ankaŭ la popolo de Lot ne estas tro malproksima de vi.

91. Petegu pardonon de via Sinjoro kaj poste konvertiĝu al Li. Vere mia Sinjoro estas pardonema, amema".

92. Ili respondis: "Ho Ŝu'ajb, ni ne komprenas multon el tio, kion vi diras, kaj ni vidaş, ke vi estas malforta inter ni. Se ne estus via deveno, ni ŝtonmortigus vin. Vi ne havas fortan pozicion ĉe ni".

93. Li diris: "Ho mia popolo! Ĉu miạ deveno estas pli ŝatata de vi, ol Allah? Cu vi Lin rigardas kiel aferon, kiun vi lasu post viaj dorsoj? Vere mia Sinjoro ĉirkaŭas ĉion, kion vi faras.

94. Ho mia popolo! Agu tamen laŭ via povo, ankaŭ mi agos. Baldaŭ vi ekscios, sur kiun falos la puno, kiu humiligas, kaj kiu estas mensogulo. Atendu do, mi ankaŭ atendos kun vi".

عَلَيْكُمْ بِحَفِيظٍ ﴿٨٦﴾

قَالُوا يٰشُعَيْبُ اَصَلٰوتُكَ تَاْمُرُكَ اَنْ نَّتْرُكَ مَا
يَعْبُدُ اٰبَآؤُنَآ اَوْ اَنْ نَّفْعَلَ فِيْٓ اَمْوَالِنَا مَا نَشٰٓؤُا ۭ
اِنَّكَ لَاَنْتَ الْحَلِيْمُ الرَّشِيْدُ ﴿٨٧﴾

قَالَ يٰقَوْمِ اَرَءَيْتُمْ اِنْ كُنْتُ عَلٰي بَيِّنَةٍ مِّنْ
رَّبِّيْ وَرَزَقَنِيْ مِنْهُ رِزْقًا حَسَنًا ۭ وَمَآ اُرِيْدُ اَنْ
اُخَالِفَكُمْ اِلٰي مَآ اَنْهٰىكُمْ عَنْهُ ۭ اِنْ اُرِيْدُ اِلَّا
الْاِصْلَاحَ مَا اسْتَطَعْتُ ۭ وَمَا تَوْفِيْقِيْٓ اِلَّا بِاللّٰهِ ۭ
عَلَيْهِ تَوَكَّلْتُ وَاِلَيْهِ اُنِيْبُ ﴿٨٨﴾

وَيٰقَوْمِ لَا يَجْرِمَنَّكُمْ شِقَاقِيْٓ اَنْ يُّصِيْبَكُمْ مِّثْلُ
مَآ اَصَابَ قَوْمَ نُوْحٍ اَوْ قَوْمَ هُوْدٍ اَوْ قَوْمَ صٰلِحٍ ۭ
وَمَا قَوْمُ لُوْطٍ مِّنْكُمْ بِبَعِيْدٍ ﴿٨٩﴾

وَاسْتَغْفِرُوْا رَبَّكُمْ ثُمَّ تُوْبُوْٓا اِلَيْهِ ۭ اِنَّ رَبِّيْ رَحِيْمٌ
وَدُوْدٌ ﴿٩٠﴾

قَالُوْا يٰشُعَيْبُ مَا نَفْقَهُ كَثِيْرًا مِّمَّا تَقُوْلُ وَاِنَّا
لَنَرٰىكَ فِيْنَا ضَعِيْفًا ۚ وَلَوْلَا رَهْطُكَ لَرَجَمْنٰكَ ۡ وَ
مَآ اَنْتَ عَلَيْنَا بِعَزِيْزٍ ﴿٩١﴾

قَالَ يٰقَوْمِ اَرَهْطِيْٓ اَعَزُّ عَلَيْكُمْ مِّنَ اللّٰهِ ۭ وَاتَّخَذْتُمُوْهُ
وَرَاۗءَكُمْ ظِهْرِيًّا ۭ اِنَّ رَبِّيْ بِمَا تَعْمَلُوْنَ مُحِيْطٌ ﴿٩٢﴾

وَيٰقَوْمِ اعْمَلُوْا عَلٰي مَكَانَتِكُمْ اِنِّىْ عَامِلٌ ۭ سَوْفَ
تَعْلَمُوْنَ ۙ مَنْ يَّاْتِيْهِ عَذَابٌ يُّخْزِيْهِ وَمَنْ هُوَ كَاذِبٌ ۭ
وَارْتَقِبُوْٓا اِنِّىْ مَعَكُمْ رَقِيْبٌ ﴿٩٣﴾

95. Kiam venis Nia ordono, Ni savis Ŝu'ajbon kaj la kredantojn kun li per Nia kompato, kaj la puno trafis la malbonfarantojn kaj ili kuŝis sur siaj brustoj en siaj domoj,

وَلَمَّا جَآءَ أَمْرُنَا نَجَّيْنَا شُعَيْبًا وَّالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا مَعَهٗ
بِرَحْمَةٍ مِّنَّا وَاَخَذَتِ الَّذِيْنَ ظَلَمُوا الصَّيْحَةُ فَاَصْبَحُوْا
فِيْ دِيَارِهِمْ جٰثِمِيْنَ ﴿٩٤﴾

96. kvazaŭ ili neniam estus loĝintaj en ili. Jen, repuŝita estis Madjan, kiel repuŝita estis Tamûd.

كَاَنْ لَّمْ يَغْنَوْا فِيْهَا ؕ اَلَا بُعْدًا لِّمَدْيَنَ كَمَا بَعِدَتْ
ثَمُوْدُ ﴿٩٥﴾ ع ١٢ ٨

97. Vere Ni sendis Moseon kun Niaj signoj kaj kun aŭtoritato evidenta

وَلَقَدْ اَرْسَلْنَا مُوْسٰى بِاٰيٰتِنَا وَسُلْطٰنٍ مُّبِيْنٍ ﴿٩٦﴾

98. al Faraono kaj al liaj estroj; tiuj tamen sekvis la ordonon de Faraono, sed la ordono de Faraono ne estis justa.

اِلٰى فِرْعَوْنَ وَمَلَا۟ئِهٖ فَاتَّبَعُوْۤا اَمْرَ فِرْعَوْنَ ۚ وَمَاۤ
اَمْرُ فِرْعَوْنَ بِرَشِيْدٍ ﴿٩٧﴾

99. Li devos antaŭiri sian popolon en la tago de la reviviĝo kaj ĝin konduki en la fajron. Malbonega estas ilia trinkejo, kien ili venos!

يَقْدُمُ قَوْمَهٗ يَوْمَ الْقِيٰمَةِ فَاَوْرَدَهُمُ النَّارَ ؕ وَبِئْسَ
الْوِرْدُ الْمَوْرُوْدُ ﴿٩٨﴾

100. Malbeno komencis sekvi ilin en ĉi tiu vivo, kaj daŭros en la tago de la reviviĝo. Malbonega estas la donaco, kiu estos donita al ili!

وَاُتْبِعُوْا فِيْ هٰذِهٖ لَعْنَةً وَّيَوْمَ الْقِيٰمَةِ ؕ بِئْسَ الرِّفْدُ
الْمَرْفُوْدُ ﴿٩٩﴾

101. Tiu estas unu el la novaĵoj de la urboj, kiujn Ni rakontas al vi. Iuj ankoraŭ staras kaj aliaj estas detruitaj.

ذٰلِكَ مِنْ اَنْۢبَآءِ الْقُرٰى نَقُصُّهٗ عَلَيْكَ مِنْهَا قَآئِمٌ
وَّحَصِيْدٌ ﴿١٠٠﴾

102. Ne estis Ni Tiu, kiu faris maljustecon al ili, sed ili al si mem; kaj neniom utilis al ili iliaj Dioj, kiujn ili vokis apud Allah, kiam venis la ordono de via Sinjoro, kaj ili nenion alian pliigis, ol sian pereon.

وَمَا ظَلَمْنٰهُمْ وَلٰكِنْ ظَلَمُوْۤا اَنْفُسَهُمْ فَمَاۤ اَغْنَتْ
عَنْهُمْ اٰلِهَتُهُمُ الَّتِيْ يَدْعُوْنَ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ مِنْ
شَيْءٍ لَّمَّا جَآءَ اَمْرُ رَبِّكَ ؕ وَمَا زَادُوْهُمْ غَيْرَ تَتْبِيْبٍ ﴿١٠١﴾

103. Tia estas la pugnopreno de via Sinjoro, kiam Li trafas la urbojn, ĉar ili pekegis. Vere Lia pugnopreno estas dolora, severa.

وَكَذٰلِكَ اَخْذُ رَبِّكَ اِذَاۤ اَخَذَ الْقُرٰى وَهِيَ ظَالِمَةٌ ؕ
اِنَّ اَخْذَهٗۤ اَلِيْمٌ شَدِيْدٌ ﴿١٠٢﴾

104. Vere en tio estas signo por tiu, kiu timas la punon de la vivo venonta. Tiu estas tago, en kiu estos kunvenigitaj la homoj, kaj tiu estas tago, pri kiu ili estos atestantoj.

اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيَةً لِّمَنْ خَافَ عَذَابَ الْاٰخِرَةِ ؕ ذٰلِكَ
يَوْمٌ مَّجْمُوْعٌ ۙ لَّهُ النَّاسُ وَذٰلِكَ يَوْمٌ مَّشْهُوْدٌ ﴿١٠٣﴾

105. Ni nur prokrastas ĝin ĝis fiksita limtempo.

وَمَا نُؤَخِّرُهٗۤ اِلَّا لِاَجَلٍ مَّعْدُوْدٍ ﴿١٠٤﴾

يَوْمَ يَأْتِ لَا تَكَلَّمُ نَفْسٌ إِلَّا بِإِذْنِهِۦ ۚ فَمِنْهُمْ شَقِيٌّ
وَسَعِيدٌ ﴿١٠٥﴾

106. Kiam venos tiu tago, neniu animo parolos krom per Lia permeso, kaj tiam iuj estos malfeliĉaj kaj aliaj feliĉaj.

فَأَمَّا الَّذِينَ شَقُوا۟ فَفِى ٱلنَّارِ لَهُمْ فِيهَا زَفِيرٌ وَشَهِيقٌ ﴿١٠٦﴾

107. Pri tiuj, kiuj estos malfeliĉaj: ili venos en la fajron, kie por ili estos ekĝemado kaj ploregado.

خَٰلِدِينَ فِيهَا مَا دَامَتِ ٱلسَّمَٰوَٰتُ وَٱلْأَرْضُ إِلَّا مَا شَآءَ رَبُّكَ ۖ إِنَّ رَبَّكَ فَعَّالٌ لِّمَا يُرِيدُ ﴿١٠٧﴾

108. Tie ili ĉiam restos, dum la daŭro de la ĉieloj kaj de la tero, krom se via Sinjoro volos alie. Vere via Sinjoro efektivigas, kion Li volas.

وَأَمَّا ٱلَّذِينَ سُعِدُوا۟ فَفِى ٱلْجَنَّةِ خَٰلِدِينَ فِيهَا مَا دَامَتِ ٱلسَّمَٰوَٰتُ وَٱلْأَرْضُ إِلَّا مَا شَآءَ رَبُّكَ عَطَآءً غَيْرَ مَجْذُوذٍ ﴿١٠٨﴾

109. Pri tiuj, kiuj estos feliĉaj: ili venos en la Paradizon; tie ili ĉiam restos, dum la daŭro de la ĉieloj kaj de la tero, krom se via Sinjoro volos alie – donaco, kiu ne interrompiĝos.

فَلَا تَكُ فِى مِرْيَةٍ مِّمَّا يَعْبُدُ هَٰٓؤُلَآءِ ۚ مَا يَعْبُدُونَ إِلَّا كَمَا يَعْبُدُ ءَابَآؤُهُم مِّن قَبْلُ ۚ وَإِنَّا لَمُوَفُّوهُمْ نَصِيبَهُمْ غَيْرَ مَنقُوصٍ ﴿١٠٩﴾

110. Do ne estu dubanta pri tio, kion ĉi tiuj adoras; ili nur adoras, kion antaŭe adoris iliaj patroj; vere Ni repagos al ili ilian plenan porcion sen malpliigo.

وَلَقَدْ ءَاتَيْنَا مُوسَى ٱلْكِتَٰبَ فَٱخْتُلِفَ فِيهِ ۚ وَلَوْلَا كَلِمَةٌ سَبَقَتْ مِن رَّبِّكَ لَقُضِىَ بَيْنَهُمْ ۚ وَإِنَّهُمْ لَفِى شَكٍّ مِّنْهُ مُرِيبٍ ﴿١١٠﴾

111. Certe Ni donis al Moseo la Libron, tamen estiĝis malkonsento pri ĝi, kaj se ne estus veninta antaŭe la vorto de via Sinjoro, jam estus juĝite inter ili, kaj nun vere ili estas en maltrankviliga dubo pri ĝi.

وَإِنَّ كُلًّا لَّمَّا لَيُوَفِّيَنَّهُمْ رَبُّكَ أَعْمَٰلَهُمْ ۚ إِنَّهُۥ بِمَا يَعْمَلُونَ خَبِيرٌ ﴿١١١﴾

112. Kaj vere, kvankam tio ankoraŭ ne okazis, via Sinjoro repagos iliajn agojn. Vere Li scias, kion ili faras.

فَٱسْتَقِمْ كَمَآ أُمِرْتَ وَمَن تَابَ مَعَكَ وَلَا تَطْغَوْا ۚ إِنَّهُۥ بِمَا تَعْمَلُونَ بَصِيرٌ ﴿١١٢﴾

113. Staru do vi, kiel estis ordonite al vi, kaj staru tiu, kiu kun vi konvertiĝis kaj ne transpaŝis la limojn. Vere Li vidas, kion vi faras.

وَلَا تَرْكَنُوٓا۟ إِلَى ٱلَّذِينَ ظَلَمُوا۟ فَتَمَسَّكُمُ ٱلنَّارُ ۖ وَمَا لَكُم مِّن دُونِ ٱللَّهِ مِنْ أَوْلِيَآءَ ثُمَّ لَا تُنصَرُونَ ﴿١١٣﴾

114. Ne inklinu al la malbonfarantoj, por ke vin ne atingu la fajro, kaj vi ne havos aliajn patronojn ol Allahon, poste al vi ne estos helpite.

وَأَقِمِ ٱلصَّلَوٰةَ طَرَفَىِ ٱلنَّهَارِ وَزُلَفًا مِّنَ ٱلَّيْلِ ۚ إِنَّ

الْحَسَنٰتِ يُذْهِبْنَ السَّيِّاٰتِ ۭ ذٰلِكَ ذِكْرٰى لِلذّٰكِرِيْنَ ﴿١١٥﴾

115. Levu la preĝon je ambaŭ finoj de la tago kaj en la komencaj horoj de la nokto. Vere la bonaj agoj forpelas la malbonajn. Tio estas admono por la pripensemuloj.

وَاصْبِرْ فَاِنَّ اللّٰهَ لَا يُضِيْعُ اَجْرَ الْمُحْسِنِيْنَ ﴿١١٦﴾

116. Estu persistema, ĉar vere Allah ne permesos, ke la rekompenco de la justuloj vaniĝu.

فَلَوْلَا كَانَ مِنَ الْقُرُوْنِ مِنْ قَبْلِكُمْ اُولُوْا بَقِيَّةٍ يَّنْهَوْنَ عَنِ الْفَسَادِ فِي الْاَرْضِ اِلَّا قَلِيْلًا مِّمَّنْ اَنْجَيْنَا مِنْهُمْ ۚ وَاتَّبَعَ الَّذِيْنَ ظَلَمُوْا مَآ اُتْرِفُوْا فِيْهِ وَكَانُوْا مُجْرِمِيْنَ ﴿١١٧﴾

117. Kiel do ne estis inter la generacioj antaŭ vi homoj saĝaj, kiuj malhelpis la malpacon sur la tero – krom malmultaj el tiuj, kiujn Ni savis el via mezo? Tamen la malbonfarantoj sekvis siajn pasiojn kaj tiel ili fariĝis kulpaj.

وَمَا كَانَ رَبُّكَ لِيُهْلِكَ الْقُرٰى بِظُلْمٍ وَّاَهْلُهَا مُصْلِحُوْنَ ﴿١١٨﴾

118. Via Sinjoro ne kutimas detrui maljuste la urbojn, se iliaj loĝantoj estas pacemuloj.

وَلَوْ شَاۗءَ رَبُّكَ لَجَعَلَ النَّاسَ اُمَّةً وَّاحِدَةً وَّلَا يَزَالُوْنَ مُخْتَلِفِيْنَ ﴿١١٩﴾

119. Se via Sinjoro volus, Li farus la homaron unu sola socio, sed ili ne volas ĉesi malkonsenti,

اِلَّا مَنْ رَّحِمَ رَبُّكَ ۭ وَلِذٰلِكَ خَلَقَهُمْ ۭ وَتَمَّتْ كَلِمَةُ رَبِّكَ لَاَمْلَــَٔنَّ جَهَنَّمَ مِنَ الْجِنَّةِ وَالنَّاسِ اَجْمَعِيْنَ ﴿١٢٠﴾

120. krom tiuj, al kiuj via Sinjoro donis Sian favoron, kaj por tio Li kreis ilin, kaj plenumiĝos la vorto de via Sinjoro: "Vere Mi replenigos la inferon per Ginnoj kaj homoj, ĉiuj kune".

وَكُلًّا نَّقُصُّ عَلَيْكَ مِنْ اَنْۢبَاۗءِ الرُّسُلِ مَا نُثَبِّتُ بِهٖ فُؤَادَكَ ۚ وَجَاۗءَكَ فِيْ هٰذِهِ الْحَقُّ وَمَوْعِظَةٌ وَّذِكْرٰى لِلْمُؤْمِنِيْنَ ﴿١٢١﴾

121. Ĉiu novaĵo, el tiuj pri la senditoj, kiun Ni rakontas al vi, estas por firmigi vian koron per ĝi. En ĝi venis al vi la vero, admono kaj memorigaĵo por la kredantoj.

وَقُلْ لِّلَّذِيْنَ لَا يُؤْمِنُوْنَ اعْمَلُوْا عَلٰي مَكَانَتِكُمْ ۭ اِنَّا عٰمِلُوْنَ ﴿١٢٢﴾

122. Diru al la nekredantoj: "Agu laŭ viaj kapabloj, ankaŭ mi agos,

وَانْتَظِرُوْا ۚ اِنَّا مُنْتَظِرُوْنَ ﴿١٢٣﴾

123. kaj atendu, ankaŭ mi atendos".

وَلِلّٰهِ غَيْبُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ وَاِلَيْهِ يُرْجَعُ الْاَمْرُ كُلُّهٗ فَاعْبُدْهُ وَتَوَكَّلْ عَلَيْهِ ۭ وَمَا رَبُّكَ بِغَافِلٍ عَمَّا تَعْمَلُوْنَ ﴿١٢٣﴾

124. Al Allah apartenas la Nevideblaĵoj de la ĉieloj kaj de la tero kaj al Li revenos la tuta afero; do adoru Lin kaj fidu je Li; via Sinjoro ne ignoras, kion vi faras.

سُوْرَةُ يُوْسُفَ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

الٓرٰ ۚ تِلْكَ اٰيٰتُ الْكِتٰبِ الْمُبِيْنِ ②

اِنَّآ اَنْزَلْنٰهُ قُرْءٰنًا عَرَبِيًّا لَّعَلَّكُمْ تَعْقِلُوْنَ ③

نَحْنُ نَقُصُّ عَلَيْكَ اَحْسَنَ الْقَصَصِ بِمَآ اَوْحَيْنَآ
اِلَيْكَ هٰذَا الْقُرْاٰنَ ۖ وَاِنْ كُنْتَ مِنْ قَبْلِهٖ لَمِنَ
الْغٰفِلِيْنَ ④

اِذْ قَالَ يُوْسُفُ لِاَبِيْهِ يٰٓاَبَتِ اِنِّيْ رَاَيْتُ اَحَدَ عَشَرَ
كَوْكَبًا وَّالشَّمْسَ وَالْقَمَرَ رَاَيْتُهُمْ لِيْ سٰجِدِيْنَ ⑤

قَالَ يٰبُنَيَّ لَا تَقْصُصْ رُءْيَاكَ عَلٰٓى اِخْوَتِكَ فَيَكِيْدُوْا
لَكَ كَيْدًا ۖ اِنَّ الشَّيْطٰنَ لِلْاِنْسَانِ عَدُوٌّ مُّبِيْنٌ ⑥

وَكَذٰلِكَ يَجْتَبِيْكَ رَبُّكَ وَيُعَلِّمُكَ مِنْ تَاْوِيْلِ
الْاَحَادِيْثِ وَيُتِمُّ نِعْمَتَهٗ عَلَيْكَ وَعَلٰٓى اٰلِ يَعْقُوْبَ
كَمَآ اَتَمَّهَا عَلٰٓى اَبَوَيْكَ مِنْ قَبْلُ اِبْرٰهِيْمَ وَاِسْحٰقَ ۗ ع
اِنَّ رَبَّكَ عَلِيْمٌ حَكِيْمٌ ⑦

لَقَدْ كَانَ فِيْ يُوْسُفَ وَاِخْوَتِهٖٓ اٰيٰتٌ لِّلسَّآئِلِيْنَ ⑧

اِذْ قَالُوْا لَيُوْسُفُ وَاَخُوْهُ اَحَبُّ اِلٰٓى اَبِيْنَا مِنَّا وَ
نَحْنُ عُصْبَةٌ ۗ اِنَّ اَبَانَا لَفِيْ ضَلٰلٍ مُّبِيْنٍ ۚ ⑨

اِقْتُلُوْا يُوْسُفَ اَوِ اطْرَحُوْهُ اَرْضًا يَّخْلُ لَكُمْ وَجْهُ
اَبِيْكُمْ وَتَكُوْنُوْا مِنْۢ بَعْدِهٖ قَوْمًا صٰلِحِيْنَ ⑩

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Alef Lām Rā*. Ĉi tiuj estas la versoj de la klara Libro.

3. Vere Ni sendis ĝin – la Koranon arablingvan –, por ke vi komprenu.

4. Ni volas rakonti al vi (ho sendito) la plej belan rakonton, revelaciante al vi ĉi tiun Koranon, kvankam vi antaŭe estis unu el la nesciantoj.

5. Memoru, kiam Jozef diris al sia patro: "Ho mia patro, mi vidis dekunu stelojn kaj la sunon kaj la lunon, mi vidis ilin kliniĝi antaŭ mi".

6. Li respondis: "Ho mia fileto, ne rakontu vian sonĝon al viaj fratoj, alie ili elpensos atakon kontraŭ vi, ĉar Satano estas evidenta malamiko de la homo.

7. Tiel via Sinjoro elektos vin kaj Li instruos al vi la interpretadon de la paroloj kaj Li plenumos Sian gracon por vi kaj por la popolo de Jakob, kiel Li plenumis ĝin por viaj prapatroj antaŭe, por Abraham kaj Isaak. Vere via Sinjoro estas ĉioscia, saĝa.

8. Vere en Jozef kaj liaj fratoj estas signoj por la serĉantoj.

9. Kiam ili diris: "Vere Jozef kaj lia frato estas pli karaj ol ĉiu alia al nia patro, kvan-

* Mi, Allah, Ĉiovida.

kam ni estas granda partio. Certe nia patro estas en evidenta eraro.

10. Mortigu Jozefon aŭ forpelu lin al malproksima lando. Poste vi ĝuos la atenton de via patro kaj vi ŝajnos poste popolo justa",

11. tiam diris unu el ili: "Ne mortigu Jozefon, ĵetu lin prefere en la profundaĵon de puto; iu el la karavano elirigos lin, se vi tion faros".

12. Ili diris: "Ho nia patro! Kial vi ne konfidas al ni Jozefon? Ni vere havas bonajn intencojn pri li!

13. Sendu lin morgaŭ kun ni, por ke li sin amuzu kaj ludu; ni vere gardos lin sekure".

14. Li diris: "Min maltrankviligas, ke vi volas konduki lin for, kaj mi timas, ke lupo manĝos lin, dum vi ne prigardos lin".

15. Ili diris: "Se lupo manĝus lin, kvankam ni estas granda partio, tiam ni vere estus perdantoj".

16. Kiam ili kondukis lin for, kaj akordiĝis por ĵeti lin en la profundaĵon de puto, Ni sendis al li la revelacion: "Vere vi sciigos al ili ĉi tiun ilian agon, sed ili ne komprenos".

17. Vespere ili venis plorante al sia patro.

18. Ili diris: "Ho nia patro! Ni konkuris unu kun la alia kaj lasis Jozefon ĉe niaj vestaĵoj kaj lupo manĝis lin. Vi certe ne kredos al ni, kvankam ni estas sinceraj".

19. Ili venis kun falsa sango sur lia tuniko. Li diris: "Ne! Via fantazio trompis vin. Mi do nur devas pacienci konvene. Allah devas esti alvokata, por ke Li helpu kontraŭ tio, kion vi rakontas".

قَالَ قَآئِلٌ مِّنْهُمْ لَا تَقْتُلُوْا يُوْسُفَ وَاَلْقُوْهُ فِيْ
غَيٰبَتِ الْجُبِّ يَلْتَقِطْهُ بَعْضُ السَّيَّارَةِ اِنْ كُنْتُمْ
فٰعِلِيْنَ ⑩
قَالُوْا يٰٓاَبَانَا مَالَكَ لَا تَاْمَنَّا عَلٰى يُوْسُفَ وَاِنَّا
لَهٗ لَنٰصِحُوْنَ ⑪
اَرْسِلْهُ مَعَنَا غَدًا يَّرْتَعْ وَيَلْعَبْ وَاِنَّا لَهٗ لَحٰفِظُوْنَ ⑫
قَالَ اِنِّيْ لَيَحْزُنُنِيْٓ اَنْ تَذْهَبُوْا بِهٖ وَاَخَافُ اَنْ
يَّاْكُلَهُ الذِّئْبُ وَاَنْتُمْ عَنْهُ غٰفِلُوْنَ ⑬
قَالُوْا لَئِنْ اَكَلَهُ الذِّئْبُ وَنَحْنُ عُصْبَةٌ اِنَّآ اِذًا
لَّخٰسِرُوْنَ ⑭
فَلَمَّا ذَهَبُوْا بِهٖ وَاَجْمَعُوْٓا اَنْ يَّجْعَلُوْهُ فِيْ غَيٰبَتِ الْجُبِّ
وَاَوْحَيْنَآ اِلَيْهِ لَتُنَبِّئَنَّهُمْ بِاَمْرِهِمْ هٰذَا وَهُمْ
لَا يَشْعُرُوْنَ ⑮
وَجَآءُوْٓ اَبَاهُمْ عِشَآءً يَّبْكُوْنَ ⑯
قَالُوْا يٰٓاَبَانَآ اِنَّا ذَهَبْنَا نَسْتَبِقُ وَتَرَكْنَا يُوْسُفَ
عِنْدَ مَتَاعِنَا فَاَكَلَهُ الذِّئْبُ وَمَآ اَنْتَ بِمُؤْمِنٍ لَّنَا
وَلَوْ كُنَّا صٰدِقِيْنَ ⑰
وَجَآءُوْ عَلٰى قَمِيْصِهٖ بِدَمٍ كَذِبٍ قَالَ بَلْ سَوَّلَتْ
لَكُمْ اَنْفُسُكُمْ اَمْرًا فَصَبْرٌ جَمِيْلٌ وَاللّٰهُ الْمُسْتَعَانُ
عَلٰى مَا تَصِفُوْنَ ⑱
وَجَآءَتْ سَيَّارَةٌ فَاَرْسَلُوْا وَارِدَهُمْ فَاَدْلٰى دَلْوَهٗ
قَالَ يٰبُشْرٰى هٰذَا غُلٰمٌ وَاَسَرُّوْهُ بِضَاعَةً وَاللّٰهُ

20. Venis karavano de vojaĝantoj, kaj ili sendis sian akvoprovizanton antaŭen, kaj li malsuprenigis sian sitelon. Li diris: "Ho feliĉa novaĵo! Jen junulo! ". Kaj ili kaŝis lin, kiel varpecon. Allah tamen bone sciis, kion ili faras.

21. Ili vendis lin kontraŭ malalta prezo, paro da dramoj, kaj pri tio ili estis malavidaj.

22. Diris tiu, kiu aĉetis lin, viro el Egiptujo, al sia edzino: "Faru lian loĝadon ĉe ni honora. Eble li iam fariĝos utila por ni, aŭ ni prenos lin kiel filon". Tiel Ni establis Jozefon en la lando por instrui al li la interpretadon de la paroloj. Allah havas povon super Siaj dekretoj, sed la plej multaj el la homoj ne scias tion.

23. Kiam li atingis sian plenaĝon, Ni donis al li saĝon kaj scion. Tiel Ni rekompencas la bonfarantojn.

24. Kaj ŝi, en kies domo li estis, provis delogi lin kontraŭ lia volo: ŝi fermis la pordojn kaj diris: "Venu! ". Sed li diris: "Mi serĉas rifuĝon ĉe Allah; vere Li estas mia Sinjoro, Li faris mian restadejon honora. Vere la malbonfarantoj neniam prosperos".

25. Ŝi tamen deziregis lin, kaj ankaŭ li estus dezireginta ŝin, se li ne vidus klaran signon de sia Sinjoro. Tio okazis, por ke Ni forprenu de li malbonecon kaj hontindecon. Vere li estis unu el Niaj elektitaj servantoj.

26. Ili ambaŭ kuris al la pordo, kaj ŝi deŝiris lian tunikon malantaŭe kaj ili renkontis ŝian edzon ĉe la pordo. Ŝi diris: "Kiun alian repagon meritas tiu, kiu volis malbonfari kontraŭ via edzino, ol malliberejon aŭ doloran punon? ".

27. Li diris: "Estas ŝi, kiu volis delogi min kontraŭ mia volo". Atestanto el ŝia tami-

عَلِيْمٌ ۝٢٠ بِمَا يَعْمَلُوْنَ

وَشَرَوْهُ بِثَمَنٍۢ بَخْسٍ دَرَاهِمَ مَعْدُوْدَةٍ ۚ وَكَانُوْا

فِيْهِ مِنَ الزّٰهِدِيْنَ ۝٢١ ع ٢ ١٢

وَقَالَ الَّذِي اشْتَرٰىهُ مِنْ مِّصْرَ لِامْرَاَتِهٖٓ اَكْرِمِيْ

مَثْوٰىهُ عَسٰٓى اَنْ يَّنْفَعَنَآ اَوْ نَتَّخِذَهٗ وَلَدًا ۭ وَكَذٰلِكَ

مَكَّنَّا لِيُوْسُفَ فِي الْاَرْضِ ۚ وَلِنُعَلِّمَهٗ مِنْ تَاْوِيْلِ

الْاَحَادِيْثِ ۭ وَاللّٰهُ غَالِبٌ عَلٰٓى اَمْرِهٖ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَ

النَّاسِ لَا يَعْلَمُوْنَ ۝٢٢

وَلَمَّا بَلَغَ اَشُدَّهٗٓ اٰتَيْنٰهُ حُكْمًا وَّعِلْمًا ۭ وَكَذٰلِكَ

نَجْزِي الْمُحْسِنِيْنَ ۝٢٣

وَرَاوَدَتْهُ الَّتِيْ هُوَ فِيْ بَيْتِهَا عَنْ نَّفْسِهٖ وَغَلَّقَتِ

الْاَبْوَابَ وَقَالَتْ هَيْتَ لَكَ ۭ قَالَ مَعَاذَ اللّٰهِ اِنَّهٗ

رَبِّيْٓ اَحْسَنَ مَثْوَايَ ۭ اِنَّهٗ لَا يُفْلِحُ الظّٰلِمُوْنَ ۝٢٤

وَلَقَدْ هَمَّتْ بِهٖ ۚ وَهَمَّ بِهَا لَوْلَآ اَنْ رَّاٰ بُرْهَانَ رَبِّهٖ ۭ

كَذٰلِكَ لِنَصْرِفَ عَنْهُ السُّوْۗءَ وَالْفَحْشَاۗءَ ۭ اِنَّهٗ مِنْ

عِبَادِنَا الْمُخْلَصِيْنَ ۝٢٥

وَاسْتَبَقَا الْبَابَ وَقَدَّتْ قَمِيْصَهٗ مِنْ دُبُرٍ وَّاَلْفَيَا

سَيِّدَهَا لَدَا الْبَابِ ۭ قَالَتْ مَا جَزَاۗءُ مَنْ اَرَادَ

بِاَهْلِكَ سُوْۗءًا اِلَّآ اَنْ يُّسْجَنَ اَوْ عَذَابٌ اَلِيْمٌ ۝٢٦

قَالَ هِيَ رَاوَدَتْنِيْ عَنْ نَّفْسِيْ ۚ وَشَهِدَ شَاهِدٌ مِّنْ

اَهْلِهَا ۚ اِنْ كَانَ قَمِيْصُهٗ قُدَّ مِنْ قُبُلٍ فَصَدَقَتْ

وَهُوَ مِنَ الْكٰذِبِيْنَ ۝٢٧

lio certigis: "Se lia tuniko estas deŝirita antaŭe, tiam ŝi asertis la veron kaj li estas mensogulo,

28. se tamen lia tuniko estas deŝirita malantaŭe, tiam ŝi mensogis kaj li estas sincera".

29. Kiam li do vidis lian tunikon deŝiritan malantaŭe, li diris: "Vere tio estas via virina ruzo kaj via virina ruzo estas granda;

30. Jozef, turnu vin for de ĉi tio, kaj vi, petegu pardonon pro via peko, vere vi estas pekulino".

وَإِنْ كَانَ قَمِيصُهُ قُدَّ مِن دُبُرٍ فَكَذَبَتْ وَهُوَ
مِنَ الصَّادِقِينَ ﴿٢٧﴾
فَلَمَّا رَأَىٰ قَمِيصَهُ قُدَّ مِن دُبُرٍ قَالَ إِنَّهُ مِن كَيْدِكُنَّ
إِنَّ كَيْدَكُنَّ عَظِيمٌ ﴿٢٨﴾
يُوسُفُ أَعْرِضْ عَنْ هَٰذَا ۖ وَاسْتَغْفِرِي لِذَنبِكِ
إِنَّكِ كُنتِ مِنَ الْخَاطِئِينَ ﴿٢٩﴾

31. La virinoj en la urbo diris: "La virino de la Potenculo provis delogi sian junan sklavon kontraŭ lia volo. Vere li igis ŝin ardi pro amo. Ni vere vidas ŝin en evidenta eraro".

32. Kiam ŝi aŭdis pri ilia malico, ŝi sendis inviti ilin, kaj ŝi pretigis festenon kaj donis al ĉiu el ili tranĉilon kaj diris al Jozef: "Eliru al ili"; sed kiam ili vidis lin, ili admiris lin kaj tranĉetis al si la manojn kaj diris: "Estu glorata Allah! Ĉi tiu ne estas homo, ĉi tiu vere estas nobla anĝelo! ".

33. Ŝi tiam diris: "Jen do tiu, pri kiu vi riproĉis min. Vere mi provis delogi lin kontraŭ lia volo, li tamen detenis sin. Se nun li ne faras, kion mi ordonas al li, tiam li estos malliberigita kaj humiligita".

34. Li diris: "Ho mia Sinjoro, la malliberejo estas preferinda por mi al tio, al kio ili instigas min; sed se Vi ne forklinas de mi ilian ruzon, eble mi inklinos al ili kaj estos stultulo".

وَ قَالَ نِسْوَةٌ فِي الْمَدِينَةِ امْرَأَتُ الْعَزِيزِ تُرَاوِدُ
فَتَاهَا عَن نَّفْسِهِ ۖ قَدْ شَغَفَهَا حُبًّا ۖ إِنَّا لَنَرَاهَا
فِي ضَلَالٍ مُّبِينٍ ﴿٣٠﴾
فَلَمَّا سَمِعَتْ بِمَكْرِهِنَّ أَرْسَلَتْ إِلَيْهِنَّ وَأَعْتَدَتْ
لَهُنَّ مُتَّكَأً وَآتَتْ كُلَّ وَاحِدَةٍ مِّنْهُنَّ سِكِّينًا وَقَالَتِ
اخْرُجْ عَلَيْهِنَّ ۖ فَلَمَّا رَأَيْنَهُ أَكْبَرْنَهُ وَقَطَّعْنَ
أَيْدِيَهُنَّ وَقُلْنَ حَاشَ لِلَّهِ مَا هَٰذَا بَشَرًا ۚ إِنْ هَٰذَا
إِلَّا مَلَكٌ كَرِيمٌ ﴿٣١﴾
قَالَتْ فَذَٰلِكُنَّ الَّذِي لُمْتُنَّنِي فِيهِ ۖ وَلَقَدْ رَاوَدتُّهُ
عَن نَّفْسِهِ فَاسْتَعْصَمَ ۖ وَلَئِن لَّمْ يَفْعَلْ مَا آمُرُهُ
41. Kiam via fratino venis kaj diris: "Ĉu vi volas, ke mi montru al vi iun homon, kiu vartu lin? ". Tiel Ni redonis vin al via patrino, por ke refreŝiĝu ŝia okulo, kaj por ke ŝi ne ĉagreniĝu, kaj vi mortigis homon, sed Ni savis vin de la malfeliĉo, kaj tiam Ni provis vin per diversaj provoj, kaj vi restis kelkajn jarojn ĉe la popolo de Madjan, poste vi atingis la celon, ho Moseo!

اِذْهَبْ اَنْتَ وَاَخُوْكَ بِاٰيٰتِيْ وَلَا تَنِيَا فِيْ ذِكْرِيْ ﴿٤٢﴾
اِذْهَبَآ اِلٰى فِرْعَوْنَ اِنَّهٗ طَغٰى ﴿٤٣﴾

42. Tiel Mi elektis vin por Mi.

فَقُوْلَا لَهٗ قَوْلًا لَّيِّنًا لَّعَلَّهٗ يَتَذَكَّرُ اَوْ يَخْشٰى ﴿٤٤﴾
قَالَا رَبَّنَآ اِنَّنَا نَخَافُ اَنْ يَّفْرُطَ عَلَيْنَآ اَوْ اَنْ
يَّطْغٰى ﴿٤٥﴾

43. Iru do, vi kaj via frato, kun Miaj signoj, kaj ne laciĝu je Mia memoro.

44. Iru al Faraono, ĉar li ekscesis.

45. Parolu tamen al li paroladon malseveran, eble vi povos konverti lin, aŭ eble li timos".

قَالَ لَا تَخَافَآ اِنَّنِيْ مَعَكُمَآ اَسْمَعُ وَاَرٰى ﴿٤٦﴾
فَاْتِيٰهُ فَقُوْلَآ اِنَّا رَسُوْلَا رَبِّكَ فَاَرْسِلْ مَعَنَا بَنِيْٓ

46. Ili ambaŭ respondis: "Ho nia Sinjoro, ni vere timas, ke li perfortos nin, aŭ ke li eĉ plie ekscesos".

47. Li diris: "Ne timu. Vere Mi estas kun vi ambaŭ. Mi aŭdas kaj vidas.

48. Do iru al li kaj diru: "Ni estas du senditoj de via Sinjoro, do permesu al la idoj de Izrael foriri kaj ne afliktu ilin. Ni vere portis al vi signon de via Sinjoro: la paco estu kun tiu, kiu sekvas la gvidadon!

49. Vere estis revelaciite al ni, ke la puno trafos tiun, kiu nekredas kaj turnas sin for".

50. Li diris: "Kiu estas la Sinjoro de vi ambaŭ, ho Moseo? ".

51. Li respondis: "Nia Sinjoro estas Tiu, kiu donis al ĉiuj aĵoj iliajn ecojn kaj poste gvidis ilin".

52. Faraono diris: "Kiu do estas la stato de la pasintaj generacioj? ".

53. Li respondis: "La scio pri tio estas ĉe mia Sinjoro en Libro. Mia Sinjoro ne eraras kaj ne forgesas".

54. Estas Li Tiu, kiu faris por vi la teron lulilo, kaj igas la vojojn etendiĝi por vi sur ĝi, kaj sendas el la ĉielo akvon. Per ĝi Ni estigas diversspecajn kreskaĵojn.

55. Manĝu kaj paŝtu vian brutaron. Vere en tio estas signoj por popolo prudenta.

56. El ĝi Ni kreis vin kaj en ĝin Ni reirigos vin kaj el ĝi Ni ankoraŭfoje elirigos vin.

57. Ni igis lin vidi Niajn signojn ĉiujn kune; Li tamen negis ilin kaj rifuzis kredi.

58. Li diris: "Ĉu vi venis al ni por elirigi nin el nia lando, ho Moseo, per via magio?

59. Ni tamen portos magion similan al tiu ĉi; fiksu do renkonton inter ni kaj vi, kiun ni ne malobservos – nek ni nek vi – en loko meza".

إِسْرَآءِيلَ ۙ وَلَا تُعَذِّبْهُمْ ۖ قَدْ جِئْنٰكَ بِاٰيَةٍ مِّنْ
رَّبِّكَ ۖ وَالسَّلٰمُ عَلٰى مَنِ اتَّبَعَ الْهُدٰى ﴿٤٧﴾
إِنَّا قَدْ أُوحِيَ إِلَيْنَآ أَنَّ الْعَذَابَ عَلٰى مَنْ كَذَّبَ
وَتَوَلّٰى ﴿٤٨﴾
قَالَ فَمَنْ رَّبُّكُمَا يٰمُوسٰى ﴿٤٩﴾
قَالَ رَبُّنَا الَّذِيٓ أَعْطٰى كُلَّ شَيْءٍ خَلْقَهٗ ثُمَّ هَدٰى ﴿٥٠﴾
قَالَ فَمَا بَالُ الْقُرُوْنِ الْأُوْلٰى ﴿٥١﴾
قَالَ عِلْمُهَا عِنْدَ رَبِّيْ فِيْ كِتٰبٍ ۖ لَّا يَضِلُّ رَبِّيْ وَ
لَا يَنْسَى ﴿٥٢﴾
الَّذِيْ جَعَلَ لَكُمُ الْأَرْضَ مَهْدًا وَّسَلَكَ لَكُمْ
فِيْهَا سُبُلًا وَّأَنْزَلَ مِنَ السَّمَآءِ مَآءً ۚ فَأَخْرَجْنَا
بِهٖٓ أَزْوَاجًا مِّنْ نَّبَاتٍ شَتّٰى ﴿٥٣﴾
كُلُوْا وَارْعَوْا أَنْعَامَكُمْ ۗ إِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّأُولِي
النُّهٰى ﴿٥٤﴾
مِنْهَا خَلَقْنٰكُمْ وَفِيْهَا نُعِيْدُكُمْ وَمِنْهَا نُخْرِجُكُمْ
تَارَةً أُخْرٰى ﴿٥٥﴾
وَلَقَدْ أَرَيْنٰهُ اٰيٰتِنَا كُلَّهَا فَكَذَّبَ وَأَبٰى ﴿٥٦﴾
قَالَ أَجِئْتَنَا لِتُخْرِجَنَا مِنْ أَرْضِنَا بِسِحْرِكَ
يٰمُوْسٰى ﴿٥٧﴾
فَلَنَأْتِيَنَّكَ بِسِحْرٍ مِّثْلِهٖ فَاجْعَلْ بَيْنَنَا وَبَيْنَكَ
مَوْعِدًا لَّا نُخْلِفُهٗ نَحْنُ وَلَآ أَنْتَ مَكَانًا
سُوًى ﴿٥٨﴾

60. Li diris: "Via kunveno estu en la tago de la soleno kaj la homoj kunvenu dumtage".

61. Tiam Faraono foriris, preparis sian militruzon, poste li venis.

62. Moseo diris al ili: Ve al vi! Ne elpensu mensogon kontraŭ Allah, por ke Li ne neniigu vin per Sia puno. Kiu elpensas mensogojn, tiu humiliĝos".

63. Tiam ili disputis pri siaj aferoj kaj ili interparolis sekrete.

64. Ili diris: "Certe tiuj ĉi ambaŭ estas sorĉistoj, kiuj volas forpeli vin el via lando per siaj magioj kaj forpreni viajn plej belajn tradiciojn.

65. Pretigu do vian atakon, poste venu bone ordigitaj antaŭen, kaj certe sukcesos tiu, kiu hodiaŭ venkas".

66. Ili diris: "Ho Moseo, aŭ vi ĵetu, aŭ ni estos la unuaj je l' ĵeto".

67. Li respondis: "Ne! Ĵetu vi! ". Kaj jen, iliaj ŝnuroj kaj iliaj bastonoj ŝajnis al li, per ilia magio, kvazaŭ ili kurus ĉirkaŭe.

68. Moseo sentis timon en si.

69. Ni diris: "Ne timu, vere vi venkos.

70. Ĵetu tion, kio estas en via dekstra mano; ĝi neniigos, kion ili faris, ĉar tio, kion ili faris, estas nur ruzo de sorĉisto, kaj sorĉisto ne sukcesos, de kie ajn li venas".

71. Tiam la sorĉistoj falis teren, surgenuiĝante. Ili diris: "Ni kredas je la Sinjoro de Aaron kaj de Moseo".

72. Faraono diris: "Ĉu vi kredas je Li, antaŭ ol mi tion permesas al vi? Vere estas via majstro tiu, kiu instruis al vi la magion. Vere pro via malobeo mi fortranĉigos vi-

قَالَ مَوْعِدُكُمْ يَوْمُ الزِّينَةِ وَأَنْ يُحْشَرَ النَّاسُ
ضُحًى ﴿٥٩﴾
فَتَوَلَّىٰ فِرْعَوْنُ فَجَمَعَ كَيْدَهُ ثُمَّ أَتَىٰ ﴿٦٠﴾
قَالَ لَهُمْ مُوسَىٰ وَيْلَكُمْ لَا تَفْتَرُوا عَلَى اللَّهِ كَذِبًا
فَيُسْحِتَكُمْ بِعَذَابٍ ۖ وَقَدْ خَابَ مَنِ افْتَرَىٰ ﴿٦١﴾
فَتَنَازَعُوا أَمْرَهُمْ بَيْنَهُمْ وَأَسَرُّوا النَّجْوَىٰ ﴿٦٢﴾
قَالُوا إِنْ هَٰذَانِ لَسَاحِرَانِ يُرِيدَانِ أَنْ يُخْرِجَاكُمْ
مِنْ أَرْضِكُمْ بِسِحْرِهِمَا وَيَذْهَبَا بِطَرِيقَتِكُمُ الْمُثْلَىٰ ﴿٦٣﴾
فَأَجْمِعُوا كَيْدَكُمْ ثُمَّ ائْتُوا صَفًّا ۚ وَقَدْ أَفْلَحَ
الْيَوْمَ مَنِ اسْتَعْلَىٰ ﴿٦٤﴾
قَالُوا يَا مُوسَىٰ إِمَّا أَنْ تُلْقِيَ وَإِمَّا أَنْ نَكُونَ أَوَّلَ
مَنْ أَلْقَىٰ ﴿٦٥﴾
قَالَ بَلْ أَلْقُوا ۖ فَإِذَا حِبَالُهُمْ وَعِصِيُّهُمْ يُخَيَّلُ
إِلَيْهِ مِنْ سِحْرِهِمْ أَنَّهَا تَسْعَىٰ ﴿٦٦﴾
فَأَوْجَسَ فِي نَفْسِهِ خِيفَةً مُوسَىٰ ﴿٦٧﴾
قُلْنَا لَا تَخَفْ إِنَّكَ أَنْتَ الْأَعْلَىٰ ﴿٦٨﴾
وَأَلْقِ مَا فِي يَمِينِكَ تَلْقَفْ مَا صَنَعُوا ۖ إِنَّمَا صَنَعُوا
كَيْدُ سَاحِرٍ ۖ وَلَا يُفْلِحُ السَّاحِرُ حَيْثُ أَتَىٰ ﴿٦٩﴾
فَأُلْقِيَ السَّحَرَةُ سُجَّدًا قَالُوا آمَنَّا بِرَبِّ هَارُونَ
وَمُوسَىٰ ﴿٧٠﴾
قَالَ آمَنْتُمْ لَهُ قَبْلَ أَنْ آذَنَ لَكُمْ ۖ إِنَّهُ لَكَبِيرُكُمُ
الَّذِي عَلَّمَكُمُ السِّحْرَ ۖ فَلَأُقَطِّعَنَّ أَيْدِيَكُمْ وَ

ajn manojn kaj piedojn, kaj mi vere vin krucumigos al trunkoj de palmoj. Tiam vi ekscios, kiu el ni estas pli severa kaj persista je l' puno".

73. Ili diris: "Ni ne preferos vin al la evidentaj signoj, kiuj venis al ni, kaj al Tiu, kiu kreis nin, do ordonu, kion vi volas ordoni; certe tio, kion vi ordonas, validas nur por ĉi tiu vivo.

74. Ni kredas je nia Sinjoro, por ke Li pardonu al ni niajn pekojn, kaj la magion, al kiu vi devigis nin. Allah estas plej bona, kaj plej firme persistas".

75. Vere tiu, kiu venas al sia Sinjoro en peko, por li vere estas la infero; en ĝi li nek mortos nek vivos.

76. Tiuj tamen, kiuj venas al Li kredante, kiuj bonfaris, por ili estos la plej altaj rangoj –

77. ĝardenoj de la eterneco, sub kiuj fluas riveroj; tie ili restos ĉiam. Tia estos la rekompenco por la puriĝintoj.

78. Vere Ni sendis al Moseo la revelacion: "Konduku Niajn servantojn kaj elbatu por ili sekan vojon tra la maro. Vi ne timos esti atingita kaj vi ne havos zorgojn".

79. Faraono tamen persekutis ilin kun siaj trupoj, sed la ondoj de la maro kovris ilin.

80. Faraono erarigis sian popolon anstataŭ gvidi ĝin.

81. "Ho idoj de Izrael, vere Ni savis vin de via malamiko, kaj Ni faris aliancon je la dekstra flanko de la monto, kaj Ni sendis al vi la manaon kaj la koturnojn.

أَرْجُلَكُمْ مِّنْ خِلَافٍ وَّلَأُصَلِّبَنَّكُمْ فِي جُذُوعِ
النَّخْلِ وَلَتَعْلَمُنَّ أَيُّنَآ أَشَدُّ عَذَابًا وَّأَبْقَىٰ ﴿٧١﴾
قَالُوا لَن نُّؤْثِرَكَ عَلَىٰ مَا جَآءَنَا مِنَ الْبَيِّنَٰتِ وَ
الَّذِي فَطَرَنَا فَاقْضِ مَآ أَنتَ قَاضٍ إِنَّمَا تَقْضِي
هَٰذِهِ الْحَيَوٰةَ الدُّنْيَا ﴿٧٢﴾
إِنَّآ ءَامَنَّا بِرَبِّنَا لِيَغْفِرَ لَنَا خَطَٰيَٰنَا وَمَآ أَكْرَهْتَنَا
عَلَيْهِ مِنَ السِّحْرِ وَاللَّهُ خَيْرٌ وَّأَبْقَىٰ ﴿٧٣﴾
إِنَّهُۥ مَن يَأْتِ رَبَّهُۥ مُجْرِمًا فَإِنَّ لَهُۥ جَهَنَّمَ لَا
يَمُوتُ فِيهَا وَلَا يَحْيَىٰ ﴿٧٤﴾
وَمَن يَأْتِهِۦ مُؤْمِنًا قَدْ عَمِلَ الصَّٰلِحَٰتِ فَأُو۟لَٰٓئِكَ
لَهُمُ الدَّرَجَٰتُ الْعُلَىٰ ﴿٧٥﴾
جَنَّٰتُ عَدْنٍ تَجْرِي مِن تَحْتِهَا الْأَنْهَٰرُ خَٰلِدِينَ
فِيهَا وَذَٰلِكَ جَزَٰٓؤُا مَن تَزَكَّىٰ ﴿٧٦﴾
وَلَقَدْ أَوْحَيْنَآ إِلَىٰ مُوسَىٰٓ أَنْ أَسْرِ بِعِبَادِي فَاضْرِبْ
لَهُمْ طَرِيقًا فِي الْبَحْرِ يَبَسًا لَّا تَخَٰفُ دَرَكًا وَلَا
تَخْشَىٰ ﴿٧٧﴾
فَأَتْبَعَهُمْ فِرْعَوْنُ بِجُنُودِهِۦ فَغَشِيَهُم مِّنَ الْيَمِّ
مَا غَشِيَهُمْ ﴿٧٨﴾
وَأَضَلَّ فِرْعَوْنُ قَوْمَهُۥ وَمَا هَدَىٰ ﴿٧٩﴾
يَٰبَنِىٓ إِسْرَٰٓءِيلَ قَدْ أَنجَيْنَٰكُم مِّنْ عَدُوِّكُمْ وَ
وَٰعَدْنَٰكُمْ جَانِبَ الطُّورِ الْأَيْمَنَ وَنَزَّلْنَا عَلَيْكُمُ
الْمَنَّ وَالسَّلْوَىٰ ﴿٨٠﴾

كُلُوا مِنْ طَيِّبٰتِ مَا رَزَقْنٰكُمْ وَلَا تَطْغَوْا فِيهِ فَيَحِلَّ
عَلَيْكُمْ غَضَبِي ۚ وَمَنْ يَحْلِلْ عَلَيْهِ غَضَبِي فَقَدْ
هَوٰى ﴿٨١﴾
وَإِنِّي لَغَفَّارٌ لِمَنْ تَابَ وَآمَنَ وَعَمِلَ صَالِحًا ثُمَّ
اهْتَدٰى ﴿٨٢﴾
وَمَا أَعْجَلَكَ عَنْ قَوْمِكَ يٰمُوسٰى ﴿٨٣﴾
قَالَ هُمْ أُولَاءِ عَلٰى أَثَرِي وَعَجِلْتُ إِلَيْكَ رَبِّ
لِتَرْضٰى ﴿٨٤﴾
قَالَ فَإِنَّا قَدْ فَتَنَّا قَوْمَكَ مِنْ بَعْدِكَ وَأَضَلَّهُمُ
السَّامِرِيُّ ﴿٨٥﴾
فَرَجَعَ مُوسٰى إِلٰى قَوْمِهِ غَضْبَانَ أَسِفًا ۚ قَالَ
يٰقَوْمِ أَلَمْ يَعِدْكُمْ رَبُّكُمْ وَعْدًا حَسَنًا ۚ أَفَطَالَ
عَلَيْكُمُ الْعَهْدُ أَمْ أَرَدْتُمْ أَنْ يَحِلَّ عَلَيْكُمْ غَضَبٌ
مِنْ رَبِّكُمْ فَأَخْلَفْتُمْ مَوْعِدِي ﴿٨٦﴾
قَالُوا مَا أَخْلَفْنَا مَوْعِدَكَ بِمَلْكِنَا وَلٰكِنَّا حُمِّلْنَا
أَوْزَارًا مِنْ زِينَةِ الْقَوْمِ فَقَذَفْنٰهَا فَكَذٰلِكَ أَلْقَى
السَّامِرِيُّ ﴿٨٧﴾
فَأَخْرَجَ لَهُمْ عِجْلًا جَسَدًا لَهُ خُوَارٌ فَقَالُوا هٰذَا إِلٰهُكُمْ
وَإِلٰهُ مُوسٰى ۖ فَنَسِيَ ﴿٨٨﴾
أَفَلَا يَرَوْنَ أَلَّا يَرْجِعُ إِلَيْهِمْ قَوْلًا ۙ وَلَا يَمْلِكُ لَهُمْ
ضَرًّا وَلَا نَفْعًا ﴿٨٩﴾
وَلَقَدْ قَالَ لَهُمْ هٰرُونُ مِنْ قَبْلُ يٰقَوْمِ إِنَّمَا

82. Manĝu la bonajn aĵojn, kiujn Ni donis al vi, tamen ne ekscesu, por ke Mia kolero ne venu sur vin; fakte tiu, kiun trafas Mia kolero, tiu falos.

83. Tamen vidu: Mi estas senkulpigema al tiu, kiu pentas kaj kredas kaj bonfaras kaj poste sekvas la gvidadon.

84. Kio forpelis vin tiel rapide de via popolo, ho Moseo? ".

85. Li respondis: "Ili sekvas min proksime kaj mi rapidas al Vi, mia Sinjoro, por ke Vi estu kontenta".

86. Dio diris: "Ni elprovis vian popolon dum via foresto, kaj Samiri erarigis ilin".

87. Moseo do reiris al sia popolo, kolera kaj zorgoplena kaj diris: "Ho mia popolo! Ĉu via Sinjoro ne donis al vi belan promeson? Ĉu ŝajnis al vi tro longa la atendo, aŭ ĉu vi volas, ke la kolero de via Sinjoro venu sur vin, ĉar vi rompis vian promeson al mi? ".

88. Ili respondis: "Ni ne rompis libervole nian promeson al vi, sed ni estis ŝarĝitaj per la juveloj de la popolo. Ni ĵetis ilin en la fajron kaj same faris Samiri".

89. Poste li formis por ili bovidon blekantan, bildon, kaj ili diris: "Tiu estas via Dio kaj la Dio de Moseo; li nur forgesis".

90. Ĉu ili do ne vidis, ke ĝi ne donas al ili respondon, kaj ke ĝi ne havas la povon utili al ili nek malutili?

91. Tamen Aaron antaŭe diris al ili: "Ho mia popolo! Per tio vi estis nur elprovitaj. Vere via Sinjoro estas la Donema, tial sekvu min kaj obeu mian ordonon".

92. Ili respondis: "Ni neniam ĉesos esti sindonaj al ĝi, ĝis revenos Moseo al ni".

93. Moseo diris: "Ho Aaron, kio malhelpis vin, kiam vi vidis ilin erari,

94. sekvi min? Ĉu vi malobeis mian ordonon? ".

95. Li respondis: "Ho filo de mia patrino! Ne ekkaptu mian barbon aŭ mian kapharon; mi timis, ke vi diros: "Vi estigis skismon inter la idoj de Izrael kaj vi ne atentis pri mia vorto".

96. Moseo diris: "Kion vi do havas por diri, ho Samiri? ".

97. Tiu respondis: "Mi ekvidis, kion ili ne ekvidis; mi akceptis nur malmulte el la instruo de la sendito, sed poste mi ankaŭ forigis ĝin de mi, ĉar tiel min devigis agi mia animo".

98. Moseo tiam diris: "Foriru! Vi devos diri dum via tuta vivo: "Ne tuŝu min! ". Tiam estas minaco de puno por vi, el kiu vi ne povos forflugi. Rigardu do vian "Dion", kies sindona adoranto vi fariĝis. Ni certe bruligos ĝin, poste ni disŝutos ĝin en la maron".

99. Vere via Dio estas Allah, krom kiu ne ekzistas Dio. Per Sia scio Li ĉirkaŭas ĉiujn aĵojn.

100. Tiel Ni rakontis al vi iujn historiojn pri tio, kio okazis, kaj Ni donis al vi admonon de Ni.

101. Kiu turnas sin for de ĝi, tiu vere portos ŝarĝon en la tago de la reviviĝo,

102. restante ĉiam en ĝi; peza estos por ili la ŝarĝo en la tago de la reviviĝo –

103. la tago, en kiu estos blovite en la trumpeton. En tiu tago Ni kunvenigos la kulpulojn, kaj ili estos blindaj.

فُتِنتُم بِهِۦ ۖ وَإِنَّ رَبَّكُمُ ٱلرَّحْمَٰنُ فَٱتَّبِعُونِى وَأَطِيعُوٓا۟ أَمْرِى ﴿٩٠﴾

قَالُوا۟ لَن نَّبْرَحَ عَلَيْهِ عَٰكِفِينَ حَتَّىٰ يَرْجِعَ إِلَيْنَا مُوسَىٰ ﴿٩١﴾

قَالَ يَٰهَٰرُونُ مَا مَنَعَكَ إِذْ رَأَيْتَهُمْ ضَلُّوٓا۟ ﴿٩٢﴾

أَلَّا تَتَّبِعَنِ ۖ أَفَعَصَيْتَ أَمْرِى ﴿٩٣﴾

قَالَ يَبْنَؤُمَّ لَا تَأْخُذْ بِلِحْيَتِى وَلَا بِرَأْسِىٓ ۖ إِنِّى خَشِيتُ أَن تَقُولَ فَرَّقْتَ بَيْنَ بَنِىٓ إِسْرَٰٓءِيلَ وَلَمْ تَرْقُبْ قَوْلِى ﴿٩٤﴾

قَالَ فَمَا خَطْبُكَ يَٰسَٰمِرِىُّ ﴿٩٥﴾

قَالَ بَصُرْتُ بِمَا لَمْ يَبْصُرُوا۟ بِهِۦ فَقَبَضْتُ قَبْضَةً مِّنْ أَثَرِ ٱلرَّسُولِ فَنَبَذْتُهَا وَكَذَٰلِكَ سَوَّلَتْ لِى نَفْسِى ﴿٩٦﴾

قَالَ فَٱذْهَبْ فَإِنَّ لَكَ فِى ٱلْحَيَوٰةِ أَن تَقُولَ لَا مِسَاسَ ۖ وَإِنَّ لَكَ مَوْعِدًا لَّن تُخْلَفَهُۥ ۖ وَٱنظُرْ إِلَىٰٓ إِلَٰهِكَ ٱلَّذِى ظَلْتَ عَلَيْهِ عَاكِفًا ۖ لَّنُحَرِّقَنَّهُۥ ثُمَّ لَنَنسِفَنَّهُۥ فِى ٱلْيَمِّ نَسْفًا ﴿٩٧﴾

إِنَّمَآ إِلَٰهُكُمُ ٱللَّهُ ٱلَّذِى لَآ إِلَٰهَ إِلَّا هُوَ ۖ وَسِعَ كُلَّ شَىْءٍ عِلْمًا ﴿٩٨﴾

كَذَٰلِكَ نَقُصُّ عَلَيْكَ مِنْ أَنۢبَآءِ مَا قَدْ سَبَقَ ۚ وَقَدْ ءَاتَيْنَٰكَ مِن لَّدُنَّا ذِكْرًا ﴿٩٩﴾

مَّنْ أَعْرَضَ عَنْهُ فَإِنَّهُۥ يَحْمِلُ يَوْمَ ٱلْقِيَٰمَةِ وِزْرًا ﴿١٠٠﴾

خَٰلِدِينَ فِيهِ ۖ وَسَآءَ لَهُمْ يَوْمَ ٱلْقِيَٰمَةِ حِمْلًا ﴿١٠١﴾

يَوْمَ يُنْفَخُ فِي الصُّوْرِ وَنَحْشُرُ الْمُجْرِمِيْنَ يَوْمَئِذٍ زُرْقًا ﴿١٠٢﴾

يَّتَخَافَتُوْنَ بَيْنَهُمْ اِنْ لَّبِثْتُمْ اِلَّا عَشْرًا ﴿١٠٣﴾

نَحْنُ اَعْلَمُ بِمَا يَقُوْلُوْنَ اِذْ يَقُوْلُ اَمْثَلُهُمْ طَرِيْقَةً اِنْ لَّبِثْتُمْ اِلَّا يَوْمًا ﴿١٠٤﴾

وَيَسْـَٔلُوْنَكَ عَنِ الْجِبَالِ فَقُلْ يَنْسِفُهَا رَبِّيْ نَسْفًا ﴿١٠٥﴾

فَيَذَرُهَا قَاعًا صَفْصَفًا ﴿١٠٦﴾

لَّا تَرٰى فِيْهَا عِوَجًا وَّلَآ اَمْتًا ﴿١٠٧﴾

يَوْمَئِذٍ يَّتَّبِعُوْنَ الدَّاعِيَ لَا عِوَجَ لَهٗ وَخَشَعَتِ الْاَصْوَاتُ لِلرَّحْمٰنِ فَلَا تَسْمَعُ اِلَّا هَمْسًا ﴿١٠٨﴾

يَوْمَئِذٍ لَّا تَنْفَعُ الشَّفَاعَةُ اِلَّا مَنْ اَذِنَ لَهُ الرَّحْمٰنُ وَرَضِيَ لَهٗ قَوْلًا ﴿١٠٩﴾

يَعْلَمُ مَا بَيْنَ اَيْدِيْهِمْ وَمَا خَلْفَهُمْ وَلَا يُحِيْطُوْنَ بِهٖ عِلْمًا ﴿١١٠﴾

وَعَنَتِ الْوُجُوْهُ لِلْحَيِّ الْقَيُّوْمِ وَقَدْ خَابَ مَنْ حَمَلَ ظُلْمًا ﴿١١١﴾

وَمَنْ يَّعْمَلْ مِنَ الصّٰلِحٰتِ وَهُوَ مُؤْمِنٌ فَلَا يَخٰفُ ظُلْمًا وَّلَا هَضْمًا ﴿١١٢﴾

وَكَذٰلِكَ اَنْزَلْنٰهُ قُرْاٰنًا عَرَبِيًّا وَّصَرَّفْنَا فِيْهِ مِنَ الْوَعِيْدِ لَعَلَّهُمْ يَتَّقُوْنَ اَوْ يُحْدِثُ لَهُمْ ذِكْرًا ﴿١١٣﴾

فَتَعٰلَى اللّٰهُ الْمَلِكُ الْحَقُّ وَلَا تَعْجَلْ بِالْقُرْاٰنِ مِنْ قَبْلِ اَنْ يُّقْضٰٓى اِلَيْكَ وَحْيُهٗ وَقُلْ رَّبِّ زِدْنِيْ

104. Ili flustros unu al la alia sekrete: "Vi restis nur dek tagojn".

105. Ni bone scias, kion ili diros. Tiam diros la plej pia el ili: "Nur unu tagon vi restis".

106. Ili demandos vin pri la montoj; diru: "Mia Sinjoro faros el ili polvon kaj disŝutos ilin,

107. kaj Li postlasos ilin kiel platan ebenaĵon,

108. en kiu vi ne vidos altaĵon nek profundaĵon".

109. En tiu tago ili sekvos la vokanton, kiu ne faras eraron, kaj ĉiuj voĉoj mallaŭtiĝos antaŭ la Donema, kaj vi nenion aŭdos krom mallaŭtan paŝbrueton.

110. En tiu tago neniom utilos propeto krom de tiu, al kiu la Donema donos la permeson kaj kies vorto plaĉas al Li.

111. Li scias ĉion, kio estas antaŭ ili kaj post ili; ili tamen ne kapablas ĉirkaŭi ĝin per sia scio.

112. Ĉiuj vizaĝoj riverencos antaŭ la Vivanta, la Eterna, kaj Li certe pereigos tiun, kiu portas la ŝarĝon de la maljusteco.

113. Tiu tamen, kiu bonfaras kaj estas kredanto, ne timos la malbonecon nek la perdon.

114. Tiel Ni sendis ĝin kiel araban Koranon, kaj Ni klarigis en ĝi iujn admonojn, por ke ili respektegu Dion aŭ por ke ĝi estu por ili admono.

115. Eminenta Li estas, Allah, la vera reĝo! Ne trorapidu je la legado de la Korano, antaŭ ol vi estas ricevinta ĝian tutan revelacion, sed diru: "Ho mia Sinjoro, pliigu mian scion! ".

عِلْمًا ﴿١١٤﴾

وَلَقَدْ عَهِدْنَآ إِلَىٰٓ ءَادَمَ مِن قَبْلُ فَنَسِيَ وَلَمْ نَجِدْ

لَهُۥ عَزْمًا ﴿١١٥﴾

وَإِذْ قُلْنَا لِلْمَلَٰٓئِكَةِ ٱسْجُدُوا۟ لِـَٔادَمَ فَسَجَدُوٓا۟ إِلَّآ إِبْلِيسَ

أَبَىٰ ﴿١١٦﴾

فَقُلْنَا يَٰٓـَٔادَمُ إِنَّ هَٰذَا عَدُوٌّ لَّكَ وَلِزَوْجِكَ فَلَا

يُخْرِجَنَّكُمَا مِنَ ٱلْجَنَّةِ فَتَشْقَىٰٓ ﴿١١٧﴾

إِنَّ لَكَ أَلَّا تَجُوعَ فِيهَا وَلَا تَعْرَىٰ ﴿١١٨﴾

وَأَنَّكَ لَا تَظْمَؤُا۟ فِيهَا وَلَا تَضْحَىٰ ﴿١١٩﴾

فَوَسْوَسَ إِلَيْهِ ٱلشَّيْطَٰنُ قَالَ يَٰٓـَٔادَمُ هَلْ أَدُلُّكَ عَلَىٰ

شَجَرَةِ ٱلْخُلْدِ وَمُلْكٍ لَّا يَبْلَىٰ ﴿١٢٠﴾

فَأَكَلَا مِنْهَا فَبَدَتْ لَهُمَا سَوْءَٰتُهُمَا وَطَفِقَا يَخْصِفَانِ

عَلَيْهِمَا مِن وَرَقِ ٱلْجَنَّةِ ۚ وَعَصَىٰٓ ءَادَمُ رَبَّهُۥ فَغَوَىٰ ﴿١٢١﴾

ثُمَّ ٱجْتَبَٰهُ رَبُّهُۥ فَتَابَ عَلَيْهِ وَهَدَىٰ ﴿١٢٢﴾

قَالَ ٱهْبِطَا مِنْهَا جَمِيعًۢا بَعْضُكُمْ لِبَعْضٍ عَدُوٌّ ۖ فَإِمَّا

يَأْتِيَنَّكُم مِّنِّى هُدًى فَمَنِ ٱتَّبَعَ هُدَاىَ فَلَا

يَضِلُّ وَلَا يَشْقَىٰ ﴿١٢٣﴾

وَمَنْ أَعْرَضَ عَن ذِكْرِى فَإِنَّ لَهُۥ مَعِيشَةً ضَنكًا

وَنَحْشُرُهُۥ يَوْمَ ٱلْقِيَٰمَةِ أَعْمَىٰ ﴿١٢٤﴾

قَالَ رَبِّ لِمَ حَشَرْتَنِىٓ أَعْمَىٰ وَقَدْ كُنتُ بَصِيرًا ﴿١٢٥﴾

قَالَ كَذَٰلِكَ أَتَتْكَ ءَايَٰتُنَا فَنَسِيتَهَا ۖ وَكَذَٰلِكَ ٱلْيَوْمَ

تُنسَىٰ ﴿١٢٦﴾

116. Vere Ni antaŭe faris aliancon kun Adam, sed li forgesis; Ni tamen ne trovis en li malbonan intencon.

117. Kiam Ni diris al la anĝeloj: "Surgenuiĝu antaŭ Adam" ili surgenuiĝis krom Iblis. Li rifuzis.

118. Tial Ni diris: "Ho Adam, tiu ĉi vere estas malamiko de vi kaj de via edzino. Li ne forpelu vin ambaŭ el la ĝardeno, por ke vi ne fariĝu malfeliĉaj.

119. Por vi estis provizite, por ke vi ne estu malsata en ĝi, nek nuda,

120. kaj por ke vi ne soifu en ĝi kaj ne suferu la varmegon de la suno".

121. Satano tamen flustris al li kaj diris: "Ho Adam, ĉu mi devas konduki vin al la arbo de la eterneco kaj al regno, kiu ne pereas? ".

122. Tiam ili ambaŭ manĝis el ĝi kaj ili fariĝis konsciaj pri sia nudeco, kaj ili komencis kolekti sur sin la foliojn de la ĝardeno, kaj Adam malobeis sian Sinjoron kaj Li fariĝis malfeliĉa.

123. Poste elektis lin lia Sinjoro, kaj Li turnis Sin al li kaj gvidis lin.

124. Li diris: "Eliru el ĉi tie ĉiuj! Vi estos malamikoj unu de la alia. Kiam venos al vi gvidado de Mi, tiu, kiu sekvos Mian gvidadon, ne eraros kaj ne fariĝos malfeliĉa.

125. Kiu tamen turnos sin for de Mia admono, tiu havos vivon malfeliĉan kaj Ni vekos lin blinda en la tago de la revivigo".

126. Tiu diros: "Kial Vi vekis min blinda, mia Sinjoro, kvankam mi antaŭe estis vidanta? ".

127. Li diros: "Same kiel venis al vi Miaj

signoj kaj vi ignoris ilin, tiel hodiaŭ vi estas ignorata".

وَكَذٰلِكَ نَجْزِيْ مَنْ اَسْرَفَ وَلَمْ يُؤْمِنْ بِاٰيٰتِ رَبِّهٖ ۭ وَلَعَذَابُ الْاٰخِرَةِ اَشَدُّ وَاَبْقٰى ۱۲۷

128. Tiel Ni repagas ankaŭ tiun, kiu ekscesas kaj ne kredas al la signoj de sia Sinjoro, kaj vere la turmento en la vivo venonta estos severa kaj daŭra.

اَفَلَمْ يَهْدِ لَهُمْ كَمْ اَهْلَكْنَا قَبْلَهُمْ مِّنَ الْقُرُوْنِ يَمْشُوْنَ فِيْ مَسٰكِنِهِمْ ۭ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّاُولِي النُّهٰى ۱۲۸

129. Ĉu ili ne komprenas, kiom da generacioj Ni pereigis antaŭ ili, en kies domoj ili nun estas? Vere en tio estas signoj por popolo prudenta.

وَلَوْلَا كَلِمَةٌ سَبَقَتْ مِنْ رَّبِّكَ لَكَانَ لِزَامًا وَّاَجَلٌ مُّسَمًّى ۱۲۹

130. Se ne estus antaŭe elparolita vorto de via Sinjoro, kaj fiksita tempolimo, la puno estus neevitebla.

فَاصْبِرْ عَلٰي مَا يَقُوْلُوْنَ وَسَبِّحْ بِحَمْدِ رَبِّكَ قَبْلَ طُلُوْعِ الشَّمْسِ وَقَبْلَ غُرُوْبِهَا ۚ وَمِنْ اٰنَاۗئِ الَّيْلِ فَسَبِّحْ وَاَطْرَافَ النَّهَارِ لَعَلَّكَ تَرْضٰى ۱۳۰

131. Toleru do pacience, kion ili diras, kaj gloru vian Sinjoron antaŭ la sunleviĝo kaj antaŭ ĝia subiro kaj laŭdegu Lin en la horoj de la nokto kaj je la fino de la tago, por ke vi fariĝu feliĉa.

وَلَا تَمُدَّنَّ عَيْنَيْكَ اِلٰى مَا مَتَّعْنَا بِهٖٓ اَزْوَاجًا مِّنْهُمْ زَهْرَةَ الْحَيٰوةِ الدُّنْيَا ۙ لِنَفْتِنَهُمْ فِيْهِ ۭ وَرِزْقُ رَبِّكَ خَيْرٌ وَّاَبْقٰى ۱۳۱

132. Ne direktu vian rigardon al tio, kion Ni donis al iuj el ili – la brilegon de ĉi tiu vivo – kiel ĝuadon por elprovi ilin. La provizo de via Sinjoro estas pli bona kaj daŭra.

وَاْمُرْ اَهْلَكَ بِالصَّلٰوةِ وَاصْطَبِرْ عَلَيْهَا ۭ لَا نَسْـَٔـلُكَ رِزْقًا ۭ نَحْنُ نَرْزُقُكَ ۭ وَالْعَاقِبَةُ لِلتَّقْوٰى ۱۳۲

133. Ordonu al via familio la preĝon kaj vi mem persistu en ĝi. Ni ne devigas vin provizi, Ni mem provizos por vi. La bona sukceso apartenas al la justeco.

وَقَالُوْا لَوْلَا يَاْتِيْنَا بِاٰيَةٍ مِّنْ رَّبِّهٖ ۭ اَوَلَمْ تَاْتِهِمْ بَيِّنَةُ مَا فِي الصُّحُفِ الْاُوْلٰى ۱۳۳

134. Ili diris: "Kial li ne portas al ni signon de sia Sinjoro? ". Ĉu al ili do ne venis la pruvo evidenta pri tio, kio troviĝas en la antaŭaj Skriboj?

وَلَوْ اَنَّآ اَهْلَكْنٰهُمْ بِعَذَابٍ مِّنْ قَبْلِهٖ لَقَالُوْا رَبَّنَا لَوْلَآ اَرْسَلْتَ اِلَيْنَا رَسُوْلًا فَنَتَّبِعَ اٰيٰتِكَ مِنْ قَبْلِ اَنْ نَّذِلَّ وَنَخْزٰى ۱۳۴

135. Se Ni ne estus neniiginta ilin antaŭ li per puno, ili certe estus dirintaj: "Ho nia Sinjoro, kial Vi ne sendis Vian senditon al ni, tiel ke ni estus povintaj sekvi Viajn revelaciojn, antaŭ ol ni humiliĝis kaj hontiĝis? ".

قُلْ كُلٌّ مُّتَرَبِّصٌ فَتَرَبَّصُوْا ۚ فَسَتَعْلَمُوْنَ مَنْ اَصْحٰبُ الصِّرَاطِ السَّوِيِّ وَمَنِ اهْتَدٰى ۱۳۵

136. Diru: "Ĉiuj atendas, do ankaŭ vi atendu; tiam vi ekscios, kiuj estas la irantoj sur la ebena vojo, kaj kiuj estas la gvidatoj".

* Fino de la 16-a parto

سُوْرَةُ الْاَنْبِيَآءِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

اِقْتَرَبَ لِلنَّاسِ حِسَابُهُمْ وَ هُمْ فِيْ غَفْلَةٍ مُّعْرِضُوْنَ ②

2. Alproksimiĝas por la homoj ilia juĝo, tamen ili turnas sin for senzorge.

مَا يَاْتِيْهِمْ مِّنْ ذِكْرٍ مِّنْ رَّبِّهِمْ مُّحْدَثٍ اِلَّا اسْتَمَعُوْهُ وَ هُمْ يَلْعَبُوْنَ ③

3. Ĉiun novan admonon, kiu venas al ili de ilia Sinjoro, ili aŭskultas mokante.

لَاهِيَةً قُلُوْبُهُمْ وَ اَسَرُّوا النَّجْوَى الَّذِيْنَ ظَلَمُوْا هَلْ هٰذَآ اِلَّا بَشَرٌ مِّثْلُكُمْ اَفَتَاْتُوْنَ السِّحْرَ وَ اَنْتُمْ تُبْصِرُوْنَ ④

4. Iliaj koroj estas forgesemaj; ili interparolas sekrete – la malbonfarantoj –: "Ĉu ĉi tiu estas alio, ol homo kiel ni? Ĉu vi volas cedi al la efikoj de la magio, kvankam vi vidas, ke ĝi estas tia? ".

قٰلَ رَبِّيْ يَعْلَمُ الْقَوْلَ فِي السَّمَآءِ وَ الْاَرْضِ وَ هُوَ السَّمِيْعُ الْعَلِيْمُ ⑤

5. Li diris: "Mia Sonjoro bone scias ĉiun vorton diritan en la ĉielo kaj sur la tero. Li estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia".

بَلْ قَالُوْٓا اَضْغَاثُ اَحْلَامٍ بَلِ افْتَرٰىهُ بَلْ هُوَ شَاعِرٌ فَلْيَاْتِنَا بِاٰيَةٍ كَمَآ اُرْسِلَ الْاَوَّلُوْنَ ⑥

6. "Ne" ili diras "tio estas nur aro da konfuzaj sonĝoj; ne, li nur elpensis ĝin; ne, li estas nur poeto; li alportu al ni signon, kiel la antaŭaj profetoj, kiuj estis senditaj".

مَآ اٰمَنَتْ قَبْلَهُمْ مِّنْ قَرْيَةٍ اَهْلَكْنٰهَا اَفَهُمْ يُؤْمِنُوْنَ ⑦

7. Antaŭ ili neniam kredis iu ajn urbo el tiuj, kiujn Ni detruis. Ĉu ili iam kredos?

وَ مَآ اَرْسَلْنَا قَبْلَكَ اِلَّا رِجَالًا نُّوْحِيْٓ اِلَيْهِمْ فَسْـَٔلُوْٓا اَهْلَ الذِّكْرِ اِنْ كُنْتُمْ لَا تَعْلَمُوْنَ ⑧

8. Antaŭ vi Ni sendis nur virojn, al kiuj Ni donis la revelacion – vi demandu la popolon de la Admono, se vi mem ne scias –,

وَ مَا جَعَلْنٰهُمْ جَسَدًا لَّا يَاْكُلُوْنَ الطَّعَامَ وَ مَا كَانُوْا خٰلِدِيْنَ ⑨

9. kaj Ni ne kreis ilin kun korpo, kiu ne bezonas manĝi, kaj ili ne vivis eterne.

ثُمَّ صَدَقْنٰهُمُ الْوَعْدَ فَاَنْجَيْنٰهُمْ وَ مَنْ نَّشَآءُ وَ اَهْلَكْنَا الْمُسْرِفِيْنَ ⑩

10. Poste Ni plenumis la promeson al ili kaj Ni savis ilin kaj tiun, kiun Ni volis, kaj Ni neniigis la pekulojn.

11. Vere Ni sendis al vi Libron, en kiu estas admono por vi. Ĉu vi ne volas kompreni?

12. Kiom da urboj, kiuj malbonfaris, Ni detruis kaj Ni vekis post ili alian popolon anstataŭe!

13. Kiam ili sentis Nian koleron alproksimiĝi, jen! ili fuĝis el la urboj.

14. Ne fuĝu, sed revenu al tio, kion vi ĝuis, kaj al viaj loĝejoj, por esti demanditaj.

15. Ili diris: "Ho ve al ni! Vere ni estis malpieguloj! ".

16. Tiu ĉi ilia alvoko ne ĉesis, ĝis Ni falĉis ilin, farante ilin cindro.

17. Ne por ludi Ni kreis la ĉielon kaj la teron kaj tion, kio estas inter ili ambaŭ.

18. Se Ni estus volinta havi amuzaĵon, Ni povus havi ĝin ĉe Ni, se Ni estus volinta.

19. Ne! Ni ĵetas la veron kontraŭ la mensogon por neniigi ĝin, kaj jen tiu malaperas. Ve al vi pro tio, kion vi diras!

20. Al Li apartenas ĉio, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Kiu estas ĉe Li, ne estas tro fierega por servi Lin, kaj li ne laciĝas.

21. Ili laŭdegas Lin nokte kaj tage. Ili ne ĉesas.

22. Ĉu ili prenis al si el la tero Diojn, kiuj povas revivigi?

23. Se ekzistus Dioj krom Allah en la ĉielo kaj sur la tero, tiuj ambaŭ certe ruiniĝus. Sankta do estas Allah, la Sinjoro de la Trono, eminenta super tio, kion ili asertas!

24. Oni ne povas demandi Lin pri tio, kion Li faras, ilin tamen oni demandos.

25. Ĉu ili prenis al si Diojn krom Lin? Diru: "Alportu vian pruvon. Ĉi tio estas admono por tiuj, kiuj estis kun mi, kaj admono por

لَقَدْ أَنزَلْنَا إِلَيْكُمْ كِتَابًا فِيهِ ذِكْرُكُمْ ۖ أَفَلَا تَعْقِلُونَ ﴿١٠﴾
وَكَمْ قَصَمْنَا مِن قَرْيَةٍ كَانَتْ ظَالِمَةً وَأَنشَأْنَا
بَعْدَهَا قَوْمًا آخَرِينَ ﴿١١﴾
فَلَمَّا أَحَسُّوا بَأْسَنَا إِذَا هُم مِّنْهَا يَرْكُضُونَ ﴿١٢﴾
لَا تَرْكُضُوا وَارْجِعُوا إِلَىٰ مَا أُتْرِفْتُمْ فِيهِ وَمَسَاكِنِكُمْ
لَعَلَّكُمْ تُسْأَلُونَ ﴿١٣﴾
قَالُوا يَا وَيْلَنَا إِنَّا كُنَّا ظَالِمِينَ ﴿١٤﴾
فَمَا زَالَت تِّلْكَ دَعْوَاهُمْ حَتَّىٰ جَعَلْنَاهُمْ حَصِيدًا
خَامِدِينَ ﴿١٥﴾
وَمَا خَلَقْنَا السَّمَاءَ وَالْأَرْضَ وَمَا بَيْنَهُمَا لَاعِبِينَ ﴿١٦﴾
لَوْ أَرَدْنَا أَن نَّتَّخِذَ لَهْوًا لَّاتَّخَذْنَاهُ مِن لَّدُنَّا
إِن كُنَّا فَاعِلِينَ ﴿١٧﴾
بَلْ نَقْذِفُ بِالْحَقِّ عَلَى الْبَاطِلِ فَيَدْمَغُهُ فَإِذَا
هُوَ زَاهِقٌ ۚ وَلَكُمُ الْوَيْلُ مِمَّا تَصِفُونَ ﴿١٨﴾
وَلَهُ مَن فِي السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۚ وَمَنْ عِندَهُ
لَا يَسْتَكْبِرُونَ عَنْ عِبَادَتِهِ وَلَا يَسْتَحْسِرُونَ ﴿١٩﴾
يُسَبِّحُونَ اللَّيْلَ وَالنَّهَارَ لَا يَفْتُرُونَ ﴿٢٠﴾
أَمِ اتَّخَذُوا آلِهَةً مِّنَ الْأَرْضِ هُمْ يُنشِرُونَ ﴿٢١﴾
لَوْ كَانَ فِيهِمَا آلِهَةٌ إِلَّا اللَّهُ لَفَسَدَتَا ۚ فَسُبْحَانَ اللَّهِ
رَبِّ الْعَرْشِ عَمَّا يَصِفُونَ ﴿٢٢﴾
لَا يُسْأَلُ عَمَّا يَفْعَلُ وَهُمْ يُسْأَلُونَ ﴿٢٣﴾
أَمِ اتَّخَذُوا مِن دُونِهِ آلِهَةً ۖ قُلْ هَاتُوا بُرْهَانَكُمْ

هٰذَا ذِكْرُ مَنْ مَّعِيَ وَذِكْرُ مَنْ قَبْلِيْ ۭ بَلْ اَكْثَرُهُمْ
لَا يَعْلَمُوْنَ ۙ الْحَقَّ فَهُمْ مُّعْرِضُوْنَ ﴿٢٤﴾

tiuj, kiuj estis antaŭ mi". Ne, la plej multaj el ili ne scias la veron, tial ili turnas sin for.

وَمَآ اَرْسَلْنَا مِنْ قَبْلِكَ مِنْ رَّسُوْلٍ اِلَّا نُوْحِيْٓ اِلَيْهِ
اَنَّهٗ لَآ اِلٰهَ اِلَّآ اَنَا فَاعْبُدُوْنِ ﴿٢٥﴾

26. Al ĉiuj senditoj, kiujn Ni sendis antaŭ vi, Ni revelaciis, ke ne ekzistas alia Dio ol Mi, do adoru nur Min.

وَقَالُوا اتَّخَذَ الرَّحْمٰنُ وَلَدًا سُبْحٰنَهٗ ۭ بَلْ عِبَادٌ
مُّكْرَمُوْنَ ۙ ﴿٢٦﴾

27. Ili diras: "La Donema prenis al Si filon". Sankta Li estas! Ne! Ili estas nur honorigitaj servantoj.

لَا يَسْبِقُوْنَهٗ بِالْقَوْلِ وَهُمْ بِاَمْرِهٖ يَعْمَلُوْنَ ﴿٢٧﴾

28. Ili ne elparolas antaŭ Li eĉ unu vorton, kaj ili agas nur laŭ Lia ordono.

يَعْلَمُ مَا بَيْنَ اَيْدِيْهِمْ وَمَا خَلْفَهُمْ وَلَا يَشْفَعُوْنَ ۙ
اِلَّا لِمَنِ ارْتَضٰى وَهُمْ مِّنْ خَشْيَتِهٖ مُشْفِقُوْنَ ﴿٢٨﴾

29. Li scias, kio estas antaŭ ili kaj malantaŭ ili, kaj ili prezentas nur propeton por tiu, kiu estas agrabla al Li, kaj ili tremas pro timo antaŭ Li.

وَمَنْ يَّقُلْ مِنْهُمْ اِنِّىْٓ اِلٰهٌ مِّنْ دُوْنِهٖ فَذٰلِكَ نَجْزِيْهِ
جَهَنَّمَ ۭ كَذٰلِكَ نَجْزِي الظّٰلِمِيْنَ ﴿٢٩﴾ ع ٢

30. Tiun el ili, kiu volus diri: "Mi estas Dio apud Li", Ni repagos per la Infero. Tiel Ni repagas la malpiegulojn.

اَوَلَمْ يَرَ الَّذِيْنَ كَفَرُوْٓا اَنَّ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ كَانَتَا
رَتْقًا فَفَتَقْنٰهُمَا ۭ وَجَعَلْنَا مِنَ الْمَاۗءِ كُلَّ شَيْءٍ حَيٍّ ۭ
اَفَلَا يُؤْمِنُوْنَ ﴿٣٠﴾

31. Ĉu ne vidis la miskredantoj, ke la ĉieloj kaj la tero estis unu maso, kaj ke Ni poste disigis ilin? Ni poŝte kreis el la akvo ĉiun estaĵon vivantan. Ĉu ili ne volas kredi?

وَجَعَلْنَا فِي الْاَرْضِ رَوَاسِيَ اَنْ تَمِيْدَ بِهِمْ ۠ وَجَعَلْنَا
فِيْهَا فِجَاجًا سُبُلًا لَّعَلَّهُمْ يَهْتَدُوْنَ ﴿٣١﴾

32. Sur la tero Ni kreis montojn firmajn, por ke ĝi ne skuiĝu kun ili, kaj Ni kreis sur ĝi larĝajn vojojn, por ke ili estu gvidataj,

وَجَعَلْنَا السَّمَاۗءَ سَقْفًا مَّحْفُوْظًا ۚ وَهُمْ عَنْ
اٰيٰتِهَا مُعْرِضُوْنَ ﴿٣٢﴾

33. kaj Ni faris la ĉielon sekura tegmento. Ili tamen turnas sin for de ĝiaj signoj.

وَهُوَ الَّذِيْ خَلَقَ الَّيْلَ وَالنَّهَارَ وَالشَّمْسَ وَ
الْقَمَرَ ۭ كُلٌّ فِيْ فَلَكٍ يَّسْبَحُوْنَ ﴿٣٣﴾

34. Estas Li Tiu, kiu kreis la nokŝon kaj la tagon kaj la sunon kaj la lunon. Ĉiu el ili ambaŭ ŝvebas en sia sfero.

وَمَا جَعَلْنَا لِبَشَرٍ مِّنْ قَبْلِكَ الْخُلْدَ ۭ اَفَاْىِٕنْ مِّتَّ
فَهُمُ الْخٰلِدُوْنَ ﴿٣٤﴾

35. Antaŭ vi Ni ne donis al iu ajn homo eternan vivon. Tiel, se vi devas morti, ĉu ili povus vivi eterne?

36. Ĉiu homo devas gustumi la morton. Tial Ni elprovas vin per la malbono kaj per la bono kiel provo; kaj al Ni vi revenos.

كُلُّ نَفْسٍ ذَآئِقَةُ الْمَوْتِ ۗ وَنَبْلُوكُم بِالشَّرِّ وَ
الْخَيْرِ فِتْنَةً ۖ وَإِلَيْنَا تُرْجَعُونَ ﴿٣٥﴾

37. Kiam la miskredantoj vidas vin, ili nur mokas vin: "Ĉu estas ĉi tiu, kiu mencias malŝate viajn Diojn? ". Estas ili tiuj, kiuj evitas mencii la Doneman.

وَإِذَا رَآكَ الَّذِينَ كَفَرُوٓا إِن يَتَّخِذُونَكَ إِلَّا هُزُوًا
أَهَٰذَا الَّذِي يَذْكُرُ آلِهَتَكُمْ ۖ وَهُم بِذِكْرِ الرَّحْمَٰنِ
هُمْ كَٰفِرُونَ ﴿٣٦﴾

38. La homo konsistas el malpacienco. Mi montros al vi Miajn signojn, sed ne petu Min rapidi.

خُلِقَ الْإِنسَانُ مِنْ عَجَلٍ ۚ سَأُورِيكُمْ آيَاتِي فَلَا
تَسْتَعْجِلُونِ ﴿٣٧﴾

39. Ili diras: "Kiam plenumiĝos ĉi tiu promeso, se vi estas sinceraj? ".

وَيَقُولُونَ مَتَىٰ هَٰذَا الْوَعْدُ إِن كُنتُمْ صَٰدِقِينَ ﴿٣٨﴾

40. Se la miskredantoj nur scius la tempon, en kiu ili ne kapablos forpuŝi la fajron de siaj vizaĝoj kaj de siaj dorsoj! Nenia helpo estos por ili!

لَوْ يَعْلَمُ الَّذِينَ كَفَرُوا حِينَ لَا يَكُفُّونَ عَن وُجُوهِهِمُ
النَّارَ وَلَا عَن ظُهُورِهِمْ وَلَا هُمْ يُنصَرُونَ ﴿٣٩﴾

41. Ne! Ĝi venos sur ilin neatendite kaj ĝi konfuzos ilin, kaj ili ne kapablos malproksimigi ĝin, kaj al ili ne estos konsentita prokrasto.

بَلْ تَأْتِيهِم بَغْتَةً فَتَبْهَتُهُمْ فَلَا يَسْتَطِيعُونَ رَدَّهَا
وَلَا هُمْ يُنظَرُونَ ﴿٤٠﴾

42. Vere estis mokataj antaŭ vi ankaŭ aliaj Senditoj. Poste tamen trafis la mokintojn el inter ili, tio mem, kion ili mokis.

وَلَقَدِ اسْتُهْزِئَ بِرُسُلٍ مِّن قَبْلِكَ فَحَاقَ بِالَّذِينَ
سَخِرُوا مِنْهُم مَّا كَانُوا بِهِ يَسْتَهْزِءُونَ ﴿٤١﴾

43. Diru: "Kiu defendos vin nokte kaj tage kontraŭ la Donema? ". Jen! Ili turnas sin for de la admono de sia Sinjoro!

قُلْ مَن يَكْلَؤُكُم بِاللَّيْلِ وَالنَّهَارِ مِنَ الرَّحْمَٰنِ ۚ
بَلْ هُمْ عَن ذِكْرِ رَبِّهِم مُّعْرِضُونَ ﴿٤٢﴾

44. Ĉu ili havas Diojn, kiuj povas defendi ilin kontraŭ Ni? Ili ne kapablas defendi sin mem, kaj ili ne povas esti helpataj kontraŭ Ni.

أَمْ لَهُمْ آلِهَةٌ تَمْنَعُهُم مِّن دُونِنَا ۚ لَا يَسْتَطِيعُونَ
نَصْرَ أَنفُسِهِمْ وَلَا هُم مِّنَّا يُصْحَبُونَ ﴿٤٣﴾

45. Ne! Ni lasis vivi ilin kaj iliajn patrojn, ĝis la vivo fariĝis por ili tro longa. Ĉu ili ne vidas, ke Ni venas en la landon kaj mallarĝigas ĝiajn finojn? Ĉu ili do povas venki?

بَلْ مَتَّعْنَا هَٰؤُلَآءِ وَآبَآءَهُمْ حَتَّىٰ طَالَ عَلَيْهِمُ
الْعُمُرُ ۗ أَفَلَا يَرَوْنَ أَنَّا نَأْتِي الْأَرْضَ نَنقُصُهَا
مِنْ أَطْرَافِهَا ۚ أَفَهُمُ الْغَٰلِبُونَ ﴿٤٤﴾

46. Diru: "Vere mi admonas vin per la revelacio". La surduloj tamen ne aŭdas la vokon, kiam ili estas admonataj.

قُلْ إِنَّمَآ أُنذِرُكُم بِالْوَحْيِ ۖ وَلَا يَسْمَعُ الصُّمُّ

الدُّعَآءَ إِذَا مَا يُنذَرُونَ ﴿٤٥﴾

47. Kiam tuŝas ilin bloveto el la puno de via Sinjoro, ili certe diras: "Ho ve al ni, ni vere estis malpieguloj! ".

وَلَئِن مَّسَّتْهُمْ نَفْحَةٌ مِّنْ عَذَابِ رَبِّكَ لَيَقُولُنَّ

يَٰوَيْلَنَآ إِنَّا كُنَّا ظَٰلِمِينَ ﴿٤٦﴾

48. Ni starigos pesilojn de justeco en la tago de la reviviĝo, por ke neniu animo suferu maljustecon, eĉ ne la pezon de sinapa semeto. Ni evidentigos ĝin. Kaj Ni sufiĉas kiel Pesanto.

وَنَضَعُ ٱلْمَوَٰزِينَ ٱلْقِسْطَ لِيَوْمِ ٱلْقِيَٰمَةِ فَلَا تُظْلَمُ

نَفْسٌ شَيْـًٔا ۖ وَإِن كَانَ مِثْقَالَ حَبَّةٍ مِّنْ خَرْدَلٍ

أَتَيْنَا بِهَا ۗ وَكَفَىٰ بِنَا حَٰسِبِينَ ﴿٤٧﴾

49. Ni donis la ekkonigilon al Moseo kaj al Aaron, kaj la lumon kaj la admonon por la justuloj,

وَلَقَدْ ءَاتَيْنَا مُوسَىٰ وَهَٰرُونَ ٱلْفُرْقَانَ وَضِيَآءً

وَذِكْرًا لِّلْمُتَّقِينَ ﴿٤٨﴾

50. por tiuj, kiuj respektegas sekrete sian Sinjoron kaj timegas la Horon.

ٱلَّذِينَ يَخْشَوْنَ رَبَّهُم بِٱلْغَيْبِ وَهُم مِّنَ ٱلسَّاعَةِ

مُشْفِقُونَ ﴿٤٩﴾

51. Tio ĉi estaş admono, plena je benoj, kiun Ni sendis. Ĉu vi nun volas rifuzi ĝin?

ع وَهَٰذَا ذِكْرٌ مُّبَارَكٌ أَنزَلْنَٰهُ ۚ أَفَأَنتُمْ لَهُۥ مُنكِرُونَ ﴿٥٠﴾

52. Antaŭ vi Ni vere donis al Abraham lian gvidilon, ĉar Ni bone konis lin.

وَلَقَدْ ءَاتَيْنَآ إِبْرَٰهِيمَ رُشْدَهُۥ مِن قَبْلُ وَكُنَّا

بِهِۦ عَٰلِمِينَ ﴿٥١﴾

53. Kiam li diris al sia patro kaj al sia gento: "Kio estas tiuj bildoj, al kiuj vi estas tiel sindonaj? ".

إِذْ قَالَ لِأَبِيهِ وَقَوْمِهِۦ مَا هَٰذِهِ ٱلتَّمَاثِيلُ ٱلَّتِىٓ

أَنتُمْ لَهَا عَٰكِفُونَ ﴿٥٢﴾

54. Ili respondis: "Vere ni trovis niajn patrojn adorantaj ilin".

قَالُوا۟ وَجَدْنَآ ءَابَآءَنَا لَهَا عَٰبِدِينَ ﴿٥٣﴾

55. Li diris: "Certe vi mem kaj viaj patroj troviĝas en eraro evidenta".

قَالَ لَقَدْ كُنتُمْ أَنتُمْ وَءَابَآؤُكُمْ فِى ضَلَٰلٍ مُّبِينٍ ﴿٥٤﴾

56. Ili diris: "Ĉu vi venas al ni kun la vero, aŭ ĉu vi ŝercas? ".

قَالُوٓا۟ أَجِئْتَنَا بِٱلْحَقِّ أَمْ أَنتَ مِنَ ٱللَّٰعِبِينَ ﴿٥٥﴾

57. Li respondis: "Ne! Via Sinjoro estas la Sinjoro de la ĉieloj kaj de la tero, kiu kreis ilin. Mi tamen nur estas unu el la atestantoj pri tio,

قَالَ بَل رَّبُّكُمْ رَبُّ ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَٱلْأَرْضِ ٱلَّذِى

فَطَرَهُنَّ ۖ وَأَنَا۠ عَلَىٰ ذَٰلِكُم مِّنَ ٱلشَّٰهِدِينَ ﴿٥٦﴾

58. kaj – per Allah! – mi elpensos ion kontraŭ viaj idoloj, kiam vi turnos vin kaj foriros".

وَتَٱللَّهِ لَأَكِيدَنَّ أَصْنَٰمَكُم بَعْدَ أَن تُوَلُّوا۟

مُدْبِرِينَ ﴿٥٧﴾

59. Li rompis ilin en pecojn, krom la plej granda el ili, por ke ili povu turni sin al ĝi.

60. Ili demandis: "Kiu faris tion al niaj Dioj? Tiu certe estas malpiegulo! ".

61. Ili diris: "Ni aŭdis junulon paroli malbone pri ili; li estas nomata Abraham".

62. Ili diris: "Konduku lin antaŭ la okulojn de la popolo, por ke oni jugu".

63. Ili demandis: "Ĉu estas vi tiu, kiu faris tion al niaj Dioj, ho Abraham? ".

64. Li respondis: "Jen! Iu faris tion. Ĉi tie estas la plej granda el ili. Demandu ilin, se ili povas paroli".

65. Ili tiam ekvidis sian eraron kaj diris inter si mem: "Vi vere estas la malpieguloj! ".

66. Poste ili mallevis siajn kapojn pro honto: "Vi bone scias, ke tiuj ne kapablas paroli! ".

67. Li respondis: "Ĉu vi do adoras anstataŭ Allahon tion, kio neniom povas utili al vi, nek povas malutili al vi?

68. Fi al vi kaj al tio, kion vi adoras anstataŭ Allahon! Ĉu vi do ne volas kompreni? ".

69. Ili diris: "Bruligu lin kaj helpu viajn Diojn, se vi volas fari ion utilan".

70. Ni tiam diris: "Ho fajro, estu malvarma kaj estu savilo por Abraham! ".

71. Kaj ili provis suferigi lin, sed Ni faris ilin perdantoj,

72. kaj Ni savis lin kaj Loton al la lando, kiun Ni benis por ĉiuj gentoj,

73. kaj Ni donis al li Isaakon, kaj kiel nepon Jakobon, kaj Ni faris ilin ĉiujn justuloj,

74. kaj Ni faris ilin estroj, por ke ili gvidu

فَجَعَلَهُمْ جُذٰذًا إِلَّا كَبِيرًا لَّهُمْ لَعَلَّهُمْ إِلَيْهِ يَرْجِعُونَ ﴿٥٨﴾
قَالُوا مَنْ فَعَلَ هٰذَا بِآلِهَتِنَا إِنَّهُ لَمِنَ الظّٰلِمِينَ ﴿٥٩﴾
قَالُوا سَمِعْنَا فَتًى يَذْكُرُهُمْ يُقَالُ لَهُ إِبْرٰهِيمُ ﴿٦٠﴾
قَالُوا فَأْتُوا بِهِ عَلٰى أَعْيُنِ النَّاسِ لَعَلَّهُمْ يَشْهَدُونَ ﴿٦١﴾
قَالُوا ءَأَنْتَ فَعَلْتَ هٰذَا بِآلِهَتِنَا يٰإِبْرٰهِيمُ ﴿٦٢﴾
قَالَ بَلْ فَعَلَهُ كَبِيرُهُمْ هٰذَا فَسْـَٔلُوهُمْ إِنْ
كَانُوا يَنْطِقُونَ ﴿٦٣﴾
فَرَجَعُوا إِلٰى أَنْفُسِهِمْ فَقَالُوا إِنَّكُمْ أَنْتُمُ الظّٰلِمُونَ ﴿٦٤﴾
ثُمَّ نُكِسُوا عَلٰى رُءُوسِهِمْ لَقَدْ عَلِمْتَ مَا هٰؤُلَاءِ
يَنْطِقُونَ ﴿٦٥﴾
قَالَ أَفَتَعْبُدُونَ مِنْ دُونِ اللّٰهِ مَا لَا يَنْفَعُكُمْ
شَيْـًٔا وَلَا يَضُرُّكُمْ ﴿٦٦﴾
أُفٍّ لَّكُمْ وَلِمَا تَعْبُدُونَ مِنْ دُونِ اللّٰهِ أَفَلَا
تَعْقِلُونَ ﴿٦٧﴾
قَالُوا حَرِّقُوهُ وَانْصُرُوا آلِهَتَكُمْ إِنْ كُنْتُمْ فٰعِلِينَ ﴿٦٨﴾
قُلْنَا يٰنَارُ كُونِي بَرْدًا وَسَلٰمًا عَلٰى إِبْرٰهِيمَ ﴿٦٩﴾
وَأَرَادُوا بِهِ كَيْدًا فَجَعَلْنٰهُمُ الْأَخْسَرِينَ ﴿٧٠﴾
وَنَجَّيْنٰهُ وَلُوطًا إِلَى الْأَرْضِ الَّتِي بٰرَكْنَا فِيهَا
لِلْعٰلَمِينَ ﴿٧١﴾
وَوَهَبْنَا لَهُ إِسْحٰقَ وَيَعْقُوبَ نَافِلَةً وَكُلًّا
جَعَلْنَا صٰلِحِينَ ﴿٧٢﴾
وَجَعَلْنٰهُمْ أَئِمَّةً يَهْدُونَ بِأَمْرِنَا وَأَوْحَيْنَا

laŭ Nia ordono, kaj Ni sendis al ili la revelacion, ke ili agu bone kaj levu la preĝon kaj donu almozojn kaj adoru nur Nin;

إِلَيْهِمْ فِعْلَ الْخَيْرٰتِ وَإِقَامَ الصَّلٰوةِ وَإِيتَآءَ
الزَّكٰوةِ ۚ وَكَانُوا لَنَا عٰبِدِينَ ﴿٧٣﴾

75. kaj Ni donis al Lot la saĝon kaj la scion, kaj Ni savis lin el la urbo, kiu plenumis hontindaĵojn. Vere ili estis popolo malpiega kaj ribelema;

وَلُوطًا اٰتَيْنٰهُ حُكْمًا وَّعِلْمًا وَّنَجَّيْنٰهُ مِنَ الْقَرْيَةِ
الَّتِي كَانَتْ تَّعْمَلُ الْخَبٰٓئِثَ ۗ إِنَّهُمْ كَانُوا قَوْمَ سَوْءٍ
فٰسِقِينَ ﴿٧٤﴾

76. kaj Ni igis lin eniri en Nian gracon, ĉar vere li estis justulo.

وَأَدْخَلْنٰهُ فِي رَحْمَتِنَا ۖ إِنَّهُ مِنَ الصّٰلِحِينَ ﴿٧٥﴾

77. Memoru Noan, kiu antaŭe vokis Nin. Ni aŭdis kaj savis lin kaj lian genton el granda malfeliĉo,

وَنُوحًا إِذْ نَادٰى مِنْ قَبْلُ فَاسْتَجَبْنَا لَهُ فَنَجَّيْنٰهُ
وَأَهْلَهُ مِنَ الْكَرْبِ الْعَظِيمِ ﴿٧٦﴾

78. kaj Ni helpis lin kontraŭ la popolo, kiu rifuzis Nian revelacion; vere ili estis popolo malpiega, kaj Ni dronigis ilin ĉiujn.

وَنَصَرْنٰهُ مِنَ الْقَوْمِ الَّذِينَ كَذَّبُوا بِاٰيٰتِنَا ۚ
إِنَّهُمْ كَانُوا قَوْمَ سَوْءٍ فَأَغْرَقْنٰهُمْ أَجْمَعِينَ ﴿٧٧﴾

79. Memoru Davidon kaj Salomonon, kiam ili juĝis pri la kampo, en kiun vagadis nokte la ŝafoj de iu gento; kaj Ni estis atestanto ĉe ilia juĝo.

وَدَاوٗدَ وَسُلَيْمٰنَ إِذْ يَحْكُمٰنِ فِي الْحَرْثِ إِذْ
نَفَشَتْ فِيهِ غَنَمُ الْقَوْمِ ۚ وَكُنَّا لِحُكْمِهِمْ شٰهِدِينَ ﴿٧٨﴾

80. Ni komprenigis ĝin al Salomono, kaj al ĉiu el ili Ni donis saĝon kaj scion, kaj Ni igis la montojn kaj la birdojn servadi, gloregi Dion kun David. Ni tion faris,

فَفَهَّمْنٰهَا سُلَيْمٰنَ ۚ وَكُلًّا اٰتَيْنَا حُكْمًا وَّعِلْمًا ۚ وَ
سَخَّرْنَا مَعَ دَاوٗدَ الْجِبَالَ يُسَبِّحْنَ وَالطَّيْرَ ۚ وَكُنَّا
فٰعِلِينَ ﴿٧٩﴾

81. kaj Ni instruis al li elfari maŝkirasojn por vi, por ke tiuj defendu vin en viaj militoj. Ĉu vi ne volas esti dankaj?

وَعَلَّمْنٰهُ صَنْعَةَ لَبُوسٍ لَّكُمْ لِتُحْصِنَكُمْ مِّنْ
بَأْسِكُمْ ۖ فَهَلْ أَنْتُمْ شٰكِرُونَ ﴿٨٠﴾

82. Kaj Ni servutigis al Salomono la ventegon, kiu blovis laŭ lia ordono en la landon, kiun Ni benis. Ni ja bone konas ĉiujn aĵojn;

وَلِسُلَيْمٰنَ الرِّيحَ عَاصِفَةً تَجْرِي بِأَمْرِهِ إِلَى
الْأَرْضِ الَّتِي بٰرَكْنَا فِيهَا ۚ وَكُنَّا بِكُلِّ شَيْءٍ
عٰلِمِينَ ﴿٨١﴾

83. kaj Ni servutigis al li la Satanojn, kiuj plonĝis por li kaj faris ankaŭ aliajn taskojn; Ni mem gardis ilin.

وَمِنَ الشَّيٰطِينِ مَنْ يَّغُوصُونَ لَهُ وَيَعْمَلُونَ
عَمَلًا دُونَ ذٰلِكَ ۖ وَكُنَّا لَهُمْ حٰفِظِينَ ﴿٨٢﴾

84. Memoru Ijobon, kiam li vokis sian Sinjoron: "Vere min trafis malfeliĉo, sed Vi estas la plej kompatema el la kompatemuloj".

85. Ni plenumis lian peton kaj Ni forprenis de li la malfeliĉon kaj Ni redonis al li lian familion kaj ankoraŭfoje la samon, kiel gracon de Ni kaj kiel admonon por la adorantoj.

86. Memoru Iŝmaelon kaj Idriŝon kaj Zul-Kifl (Jeĥezkelon). Ili ĉiuj estis persistemuloj.

87. Ni lasis ilin ĉiujn eniri Nian gracon, ĉar ili estis justuloj.

88. Memoru Zul-Nun (Jonaon) kiam li foriris kolere kaj certe opiniis, ke Ni neniam afliktos lin, kaj li vokis en la mallumego: "Ne ekzistas alia Dio ol Vi! Sankta estas Vi! Vere mi estis malpiegulo! ".

89. Tiam Ni plenumis lian peton kaj Ni savis lin de la aflikto; tiel Ni savis la kredantojn.

90. Memoru Zeĥarjan, kiam li vokis sian Sinjoron: "Mia Sinjoro, ne lasu min sen idoj! Vi tamen estas la plej bona Heredanto".

91. Ni plenumis tiam lian peton kaj Ni donis al li Jahjan kaj Ni resanigis por li lian edzinon. Vere ili konkuris pri la bonaj agoj, kaj ili vokis Nin esperante kaj timegante, kaj ili estis humilaj antaŭ Ni.

92. Memoru tiun virinon, kiu gardis sian ĉastecon – Ni blovis en ŝin iom da Nia spirito kaj Ni faris ŝin kaj ŝian filon signo por ĉiuj popoloj.

93. Ĉi tiu via religio estas la ununura religio kaj Mi estas via Sinjoro, do adoru Min.

94. Ili tamen malkonsentis reciproke pri siaj aferoj; ĉiuj revenos al Ni.

وَأَيُّوبَ إِذْ نَادَىٰ رَبَّهُ أَنِّي مَسَّنِيَ الضُّرُّ وَأَنتَ
أَرْحَمُ الرَّاحِمِينَ ﴿٨٣﴾

فَاسْتَجَبْنَا لَهُ فَكَشَفْنَا مَا بِهِ مِن ضُرٍّ ۖ وَآتَيْنَاهُ أَهْلَهُ
وَمِثْلَهُم مَّعَهُمْ رَحْمَةً مِّنْ عِندِنَا وَذِكْرَىٰ
لِلْعَابِدِينَ ﴿٨٤﴾

وَإِسْمَاعِيلَ وَإِدْرِيسَ وَذَا الْكِفْلِ ۖ كُلٌّ مِّنَ
الصَّابِرِينَ ﴿٨٥﴾

وَأَدْخَلْنَاهُمْ فِي رَحْمَتِنَا ۖ إِنَّهُم مِّنَ الصَّالِحِينَ ﴿٨٦﴾

وَذَا النُّونِ إِذ ذَّهَبَ مُغَاضِبًا فَظَنَّ أَن لَّن نَّقْدِرَ
عَلَيْهِ فَنَادَىٰ فِي الظُّلُمَاتِ أَن لَّا إِلَٰهَ إِلَّا أَنتَ
سُبْحَانَكَ ۖ إِنِّي كُنتُ مِنَ الظَّالِمِينَ ﴿٨٧﴾

فَاسْتَجَبْنَا لَهُ وَنَجَّيْنَاهُ مِنَ الْغَمِّ ۚ وَكَذَٰلِكَ
نُنجِي الْمُؤْمِنِينَ ﴿٨٨﴾

وَزَكَرِيَّا إِذْ نَادَىٰ رَبَّهُ رَبِّ لَا تَذَرْنِي فَرْدًا
وَأَنتَ خَيْرُ الْوَارِثِينَ ﴿٨٩﴾

فَاسْتَجَبْنَا لَهُ وَوَهَبْنَا لَهُ يَحْيَىٰ وَأَصْلَحْنَا لَهُ
زَوْجَهُ ۚ إِنَّهُمْ كَانُوا يُسَارِعُونَ فِي الْخَيْرَاتِ وَ
يَدْعُونَنَا رَغَبًا وَرَهَبًا ۖ وَكَانُوا لَنَا خَاشِعِينَ ﴿٩٠﴾

وَالَّتِي أَحْصَنَتْ فَرْجَهَا فَنَفَخْنَا فِيهَا مِن رُّوحِنَا
وَجَعَلْنَاهَا وَابْنَهَا آيَةً لِّلْعَالَمِينَ ﴿٩١﴾

إِنَّ هَٰذِهِ أُمَّتُكُمْ أُمَّةً وَاحِدَةً ۖ وَأَنَا رَبُّكُمْ
فَاعْبُدُونِ ﴿٩٢﴾

وَتَقَطَّعُوٓا۟ أَمْرَهُم بَيْنَهُمْ ۖ كُلٌّ إِلَيْنَا رَٰجِعُونَ ﴿٩٣﴾

95. Kiu do bonfaras kaj estas kredanto, liaj klopodoj ne restos nerekompencitaj; Ni certe registras tion.

فَمَن يَعْمَلْ مِنَ ٱلصَّٰلِحَٰتِ وَهُوَ مُؤْمِنٌ فَلَا

كُفْرَانَ لِسَعْيِهِۦ ۖ وَإِنَّا لَهُۥ كَٰتِبُونَ ﴿٩٤﴾

96. Estas nenuligebla la dekreto super urbo, kiun Ni detruis, ke ili ne revenos,

وَحَرَٰمٌ عَلَىٰ قَرْيَةٍ أَهْلَكْنَٰهَآ أَنَّهُمْ لَا يَرْجِعُونَ ﴿٩٥﴾

97. antaŭ ol liberiĝos Gog kaj Magog, kaj ili alkuregos el ĉiuj altaĵoj.

حَتَّىٰٓ إِذَا فُتِحَتْ يَأْجُوجُ وَمَأْجُوجُ وَهُم مِّن كُلِّ

حَدَبٍ يَنسِلُونَ ﴿٩٦﴾

98. Alproksimiĝas la vera promeso; tiam, jen, fiksiĝos la rigardo de la miskredantoj: "Ho ve al ni! Ni vere nezorgis pri tio; ja, ni estis malpieguloj! ".

وَٱقْتَرَبَ ٱلْوَعْدُ ٱلْحَقُّ فَإِذَا هِىَ شَٰخِصَةٌ أَبْصَٰرُ

ٱلَّذِينَ كَفَرُوا۟ يَٰوَيْلَنَا قَدْ كُنَّا فِى غَفْلَةٍ مِّنْ هَٰذَا

بَلْ كُنَّا ظَٰلِمِينَ ﴿٩٧﴾

99. Vere vi, kaj tio, kion vi adoris anstataŭ Allahon, estas brulaĵo por la infero. Tien vi estos kunvenigitaj.

إِنَّكُمْ وَمَا تَعْبُدُونَ مِن دُونِ ٱللَّهِ حَصَبُ جَهَنَّمَ ۖ

أَنتُمْ لَهَا وَٰرِدُونَ ﴿٩٨﴾

100. Se ĉi tiuj estus Dioj, ili ne estus irintaj tien; ili ĉiuj restos en ĝi por ĉiam.

لَوْ كَانَ هَٰٓؤُلَآءِ ءَالِهَةً مَّا وَرَدُوهَا ۖ وَكُلٌّ فِيهَا

خَٰلِدُونَ ﴿٩٩﴾

101. En ĝi estos ilia destino ploregi, kaj en ĝi ili ne aŭdos.

لَهُمْ فِيهَا زَفِيرٌ وَهُمْ فِيهَا لَا يَسْمَعُونَ ﴿١٠٠﴾

102. Tiuj tamen, al kiuj iris la promeso de belega rekompenco, estos malproksimaj de ĝi.

إِنَّ ٱلَّذِينَ سَبَقَتْ لَهُم مِّنَّا ٱلْحُسْنَىٰٓ أُو۟لَٰٓئِكَ

عَنْهَا مُبْعَدُونَ ﴿١٠١﴾

103. Ili ne aŭdos eĉ la plej mallaŭtan sonon el ĝi, dum ili restos eterne en tio, kion iliaj animoj deziregis.

لَا يَسْمَعُونَ حَسِيسَهَا ۖ وَهُمْ فِى مَا ٱشْتَهَتْ

أَنفُسُهُمْ خَٰلِدُونَ ﴿١٠٢﴾

104. Ilin ne ĉagrenos la granda teruro, kaj ilin renkontos la anĝeloj: "Tiu ĉi estas via Tago, kiu estis promesita al vi".

لَا يَحْزُنُهُمُ ٱلْفَزَعُ ٱلْأَكْبَرُ وَتَتَلَقَّىٰهُمُ ٱلْمَلَٰٓئِكَةُ ۚ

هَٰذَا يَوْمُكُمُ ٱلَّذِى كُنتُمْ تُوعَدُونَ ﴿١٠٣﴾

105. En la tago, en kiu Ni kunrulos la ĉielojn kiel kunruliĝas la skribvolvaĵoj. Kiel Ni komencis la unuan kreon, Ni renovigos ĝin. Deviga estas por Ni la promeso: vere Ni plenumos ĝin.

يَوْمَ نَطْوِى ٱلسَّمَآءَ كَطَىِّ ٱلسِّجِلِّ لِلْكُتُبِ ۚ كَمَا

بَدَأْنَآ أَوَّلَ خَلْقٍ نُّعِيدُهُۥ ۚ وَعْدًا عَلَيْنَآ ۚ إِنَّا كُنَّا

106. Vere Ni jam skribis en la Psalmoj, post la admono, ke Miaj justaj servantoj heredos la landon.

فٰعِلِيْنَ ﴿١٠٣﴾

وَلَقَدْ كَتَبْنَا فِي الزَّبُوْرِ مِنْۢ بَعْدِ الذِّكْرِ
اَنَّ الْاَرْضَ يَرِثُهَا عِبَادِيَ الصّٰلِحُوْنَ ﴿١٠٤﴾
اِنَّ فِيْ هٰذَا لَبَلٰغًا لِّقَوْمٍ عٰبِدِيْنَ ﴿١٠٥﴾
وَمَآ اَرْسَلْنٰكَ اِلَّا رَحْمَةً لِّلْعٰلَمِيْنَ ﴿١٠٦﴾
قُلْ اِنَّمَا يُوْحٰٓى اِلَيَّ اَنَّمَآ اِلٰهُكُمْ اِلٰهٌ وَّاحِدٌ ۚ
فَهَلْ اَنْتُمْ مُّسْلِمُوْنَ ﴿١٠٨﴾
فَاِنْ تَوَلَّوْا فَقُلْ اٰذَنْتُكُمْ عَلٰى سَوَآءٍ ۭ وَاِنْ اَدْرِيْٓ
اَقَرِيْبٌ اَمْ بَعِيْدٌ مَّا تُوْعَدُوْنَ ﴿١٠٩﴾
اِنَّهٗ يَعْلَمُ الْجَهْرَ مِنَ الْقَوْلِ وَيَعْلَمُ مَا تَكْتُمُوْنَ ﴿١١٠﴾
وَاِنْ اَدْرِيْ لَعَلَّهٗ فِتْنَةٌ لَّكُمْ وَمَتَاعٌ اِلٰى
حِيْنٍ ﴿١١١﴾
قٰلَ رَبِّ احْكُمْ بِالْحَقِّ ۭ وَرَبُّنَا الرَّحْمٰنُ الْمُسْتَعَانُ
عَلٰي مَا تَصِفُوْنَ ﴿١١٢﴾

107. Vere en tio estas senditaĵo por popolo adoranta.

108. Ni sendis vin nur kiel kompaton por ĉiuj popoloj.

109. Diru: "Vere al mi estis revelaciite nur, ke via Dio estas Dio ununura. Ĉu vi do ne volas submetiĝi? ".

110. Tamen, kiam ili turnas siajn dorsojn, vi diru: "Mi admonis vin ĉiujn egale, kaj mi ne scias, ĉu tio, kio estas promesita al vi, estas proksima aŭ malproksima.

111. Vere Li scias, kio estas malkaŝita en la parolo kaj Li scias, kio estas kaŝita.

112. Mi ne scias, ĉu eble tio ne estas nur provo por vi kaj provizaĵo por kelke da tempo".

113. Li diris: "Ho mia Sinjoro, jugu Vi juste. Nia Sinjoro estas la Donema, kies helpo estas petegenda kontraŭ tio, kion vi asertas".

سُوْرَةُ الْحَجِّ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

يٰٓاَيُّهَا النَّاسُ اتَّقُوْا رَبَّكُمْ ۚ اِنَّ زَلْزَلَةَ السَّاعَةِ
شَيْءٌ عَظِيْمٌ ②

يَوْمَ تَرَوْنَهَا تَذْهَلُ كُلُّ مُرْضِعَةٍ عَمَّآ اَرْضَعَتْ
وَتَضَعُ كُلُّ ذَاتِ حَمْلٍ حَمْلَهَا وَتَرَى النَّاسَ
سُكٰرٰى وَمَا هُمْ بِسُكٰرٰى وَلٰكِنَّ عَذَابَ اللّٰهِ
شَدِيْدٌ ③

وَمِنَ النَّاسِ مَنْ يُّجَادِلُ فِى اللّٰهِ بِغَيْرِ عِلْمٍ وَّ
يَتَّبِعُ كُلَّ شَيْطٰنٍ مَّرِيْدٍ ۙ ④

كُتِبَ عَلَيْهِ اَنَّهٗ مَنْ تَوَلَّاهُ فَاَنَّهٗ يُضِلُّهٗ وَيَهْدِيْهِ
اِلٰى عَذَابِ السَّعِيْرِ ⑤

يٰٓاَيُّهَا النَّاسُ اِنْ كُنْتُمْ فِىْ رَيْبٍ مِّنَ الْبَعْثِ فَاِنَّا
خَلَقْنٰكُمْ مِّنْ تُرَابٍ ثُمَّ مِنْ نُّطْفَةٍ ثُمَّ مِنْ عَلَقَةٍ
ثُمَّ مِنْ مُّضْغَةٍ مُّخَلَّقَةٍ وَّغَيْرِ مُخَلَّقَةٍ لِّنُبَيِّنَ
لَكُمْ ۭ وَنُقِرُّ فِى الْاَرْحَامِ مَا نَشَآءُ اِلٰٓى اَجَلٍ مُّسَمًّى
ثُمَّ نُخْرِجُكُمْ طِفْلًا ثُمَّ لِتَبْلُغُوْٓا اَشُدَّكُمْ ۚ وَمِنْكُمْ
مَّنْ يُّتَوَفّٰى وَمِنْكُمْ مَّنْ يُّرَدُّ اِلٰٓى اَرْذَلِ الْعُمُرِ لِكَيْلَا
يَعْلَمَ مِنْۢ بَعْدِ عِلْمٍ شَيْـًٔا ۭ وَتَرَى الْاَرْضَ هَامِدَةً
فَاِذَآ اَنْزَلْنَا عَلَيْهَا الْمَآءَ اهْتَزَّتْ وَرَبَتْ وَاَنْۢبَتَتْ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ho homoj, respektegu vian Sinjoron, ĉar la tertremo de la "Horo" estas terurajo.

3. En la tago, en kiu vi vidos ĝin, forgesos ĉiu suĉigantino sian suĉinfanon, kaj ĉiu gravedulino liberiĝos de sia ŝarĝo, kaj vi vidos la homojn kvazaŭ ebriaj, kvankam ili ne estas ebriaj: nur la puno de Allah estas severa.

4. Inter la homoj estas iu, kiu disputas pri Allah sen vera scio kaj sekvas ĉiun obstine ribeleman Satanon.

5. Pri li estas dekretite, ke li erarigos kaj kondukos al la puno de la fajro ĉiun, kiu lin prenas kiel amikon.

6. Ho vi homoj, se vi estas en dubo pri la revivigo, pensu, ke Ni kreis vin el polvo, poste el spermoguto, poste el buleto da sango, poste el peco da karno, parte formita kaj parte neformita, por klarigi tion al vi. Kaj Ni lasas resti en la utero, kion Ni volas, ĝis fiksita tempo; poste Ni estigas vin kiel infanojn, poste Ni kreskigas vin ĝis la matura aĝo. Iuj el vi estas forprenitaj, aliaj atingas la maljunecon, tiel ke ili nenion plu scias, kion ili kutimis scii. Kaj vi vidas la teron senviva, tamen, kiam Ni sendas sur ĝin la akvon, ĝi moviĝas kaj ŝvelas kaj kreskigas ĉion belegan.

7. Tio estas, ĉar Allah estas la vero kaj Tiu, kiu revivigas la mortintojn, kaj vere Li havas povon super ĉiuj aferoj,

---

* v. la verson 28an

مِنْ كُلِّ زَوْجٍۭ بَهِيجٍ ۝٦

8. kaj ĉar la "Horo" venos – pri tio ne ekzistas dubo – kaj ĉar vere Allah revivigos tiujn, kiuj estas en la tomboj.

ذٰلِكَ بِأَنَّ اللّٰهَ هُوَ الْحَقُّ وَأَنَّهُۥ يُحْىِ الْمَوْتٰى وَأَنَّهُۥ عَلٰى كُلِّ شَىْءٍ قَدِيرٌ ۝٧

وَأَنَّ السَّاعَةَ ءَاتِيَةٌ لَّا رَيْبَ فِيهَا وَأَنَّ اللّٰهَ يَبْعَثُ مَن فِى الْقُبُورِ ۝٨

9. Inter la homoj estas iu, kiu disputas pri Allah sen vera scio aŭ gvidado aŭ klariganta Libro,

وَمِنَ النَّاسِ مَن يُجَٰدِلُ فِى اللّٰهِ بِغَيْرِ عِلْمٍ وَلَا هُدًى وَلَا كِتٰبٍ مُّنِيرٍ ۝٩

10. mallevante malŝate sian kapon por devojigi la aliajn disde la afero de Allah. Por li certe estas honto en ĉi tiu vivo kaj Ni igos lin gustumi la punon de la brulado en la tago de la revivigo:

ثَانِىَ عِطْفِهِۦ لِيُضِلَّ عَن سَبِيلِ اللّٰهِ ۚ لَهُۥ فِى الدُّنْيَا خِزْىٌ وَنُذِيقُهُۥ يَوْمَ الْقِيٰمَةِ عَذَابَ الْحَرِيقِ ۝١٠

11. "Tio okazas pro tio, kion faris viaj manoj; Allah ja ne estas maljusta al la servantoj".

ذٰلِكَ بِمَا قَدَّمَتْ يَدٰكَ وَأَنَّ اللّٰهَ لَيْسَ بِظَلَّٰمٍ لِّلْعَبِيدِ ۝١١

12. Inter la homoj estas iu, kiu adoras Allahon nur kondiĉe: se lin trafas bonaĵo, li estas kontenta, sed, se lin trafas elprovo, li turnas sian vizaĝon. Li perdas ĉi tiun vivon kaj la vivon venontan. Tio estas evidenta perdo.

وَمِنَ النَّاسِ مَن يَعْبُدُ اللّٰهَ عَلٰى حَرْفٍ ۖ فَإِنْ أَصَابَهُۥ خَيْرٌ ٱطْمَأَنَّ بِهِۦ ۖ وَإِنْ أَصَابَتْهُ فِتْنَةٌ ٱنقَلَبَ عَلٰى وَجْهِهِۦ ۚ خَسِرَ الدُّنْيَا وَالْءَاخِرَةَ ۚ ذٰلِكَ هُوَ الْخُسْرَانُ الْمُبِينُ ۝١٢

13. Li vokas anstataŭ Allahon tion, kio ne povas malutili nek utili al li. Tio signifas eraradi malproksimen!

يَدْعُوا مِن دُونِ اللّٰهِ مَا لَا يَضُرُّهُۥ وَمَا لَا يَنفَعُهُۥ ۚ ذٰلِكَ هُوَ الضَّلٰلُ الْبَعِيدُ ۝١٣

14. Li vokas tiun, kies malutilo estas pli ebla ol la utilo. Malbonega ja estas la majstro, kaj malbonega estas la disĉiplo!

يَدْعُوا لَمَن ضَرُّهُۥٓ أَقْرَبُ مِن نَّفْعِهِۦ ۚ لَبِئْسَ الْمَوْلٰى وَلَبِئْسَ الْعَشِيرُ ۝١٤

15. Vere Allah kondukos la kredantojn kaj la bonfarantojn en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj. Vere Allah faras, kion Li volas.

114. Ilia juĝo estas nur ĉe mia Sinjoro. Se vi nur komprenus!

وَإِنَّ رَبَّكَ لَهُوَ ٱلْعَزِيزُ ٱلرَّحِيمُ ﴿١٢٢﴾

115. Mi ne forpelas la kredantojn,

كَذَّبَتْ عَادٌ ٱلْمُرْسَلِينَ ﴿١٢٣﴾

116. mi estas nur klariganta admonanto".

إِذْ قَالَ لَهُمْ أَخُوهُمْ هُودٌ أَلَا تَتَّقُونَ ﴿١٢٤﴾

117. Ili diris: "Se vi ne forlasos, ho Noa, ni certe ŝtonmortigos vin".

إِنِّى لَكُمْ رَسُولٌ أَمِينٌ ﴿١٢٥﴾

118. Li diris: "Ho mia Sinjoro, mia popolo vere rifuzis min.

فَٱتَّقُوا۟ ٱللَّهَ وَأَطِيعُونِ ﴿١٢٦﴾

119. Tial Vi do juĝu inter mi kaj ili decide, kaj savu min kaj la kredantojn, kiuj estas kun mi".

وَمَآ أَسْـَٔلُكُمْ عَلَيْهِ مِنْ أَجْرٍ ۖ إِنْ أَجْرِىَ إِلَّا عَلَىٰ رَبِّ ٱلْعَٰلَمِينَ ﴿١٢٧﴾

120. Tiel Ni savis lin kaj tiujn, kiuj estis kun li en la arkeo ŝarĝita.

أَتَبْنُونَ بِكُلِّ رِيعٍ ءَايَةً تَعْبَثُونَ ﴿١٢٨﴾

121. Poste Ni dronigis tiujn, kiuj restis malantaŭe.

وَتَتَّخِذُونَ مَصَانِعَ لَعَلَّكُمْ تَخْلُدُونَ ﴿١٢٩﴾

122. Vere en tio estas signo, sed la plej multaj el ili ne kredas.

وَإِذَا بَطَشْتُم بَطَشْتُمْ جَبَّارِينَ ﴿١٣٠﴾

123. Vere estas via Sinjoro Tiu, kiu estas la Ĉiopova, la Pardonema.

فَٱتَّقُوا۟ ٱللَّهَ وَأَطِيعُونِ ﴿١٣١﴾

124. La Aadanoj rifuzis la senditojn,

وَٱتَّقُوا۟ ٱلَّذِىٓ أَمَدَّكُم بِمَا تَعْلَمُونَ ﴿١٣٢﴾

125. kiam ilia frato Hūd diris al ili: "Ĉu vi ne volas esti justuloj?

أَمَدَّكُم بِأَنْعَٰمٍ وَبَنِينَ ﴿١٣٣﴾

126. Vere mi estas por vi fidela sendito,

وَجَنَّٰتٍ وَعُيُونٍ ﴿١٣٤﴾

127. do respektegu Allahon kaj obeu min.

إِنِّىٓ أَخَافُ عَلَيْكُمْ عَذَابَ يَوْمٍ عَظِيمٍ ﴿١٣٥﴾

128. Mi ne volas de vi rekompencon pro tio. Vere mia rekompenco estas nur ĉe la Sinjoro de l' Universo.

قَالُوا۟ سَوَآءٌ عَلَيْنَآ أَوَعَظْتَ أَمْ لَمْ تَكُن مِّنَ ٱلْوَٰعِظِينَ ﴿١٣٦﴾

إِنْ هَٰذَآ إِلَّا خُلُقُ ٱلْأَوَّلِينَ ﴿١٣٧﴾

وَمَا نَحْنُ بِمُعَذَّبِينَ ﴿١٣٨﴾

فَكَذَّبُوهُ فَأَهْلَكْنَٰهُمْ ۗ إِنَّ فِى ذَٰلِكَ لَءَايَةً ۖ وَمَا كَانَ
أَكْثَرُهُم مُّؤْمِنِينَ ﴿١٣٩﴾
وَإِنَّ رَبَّكَ لَهُوَ ٱلْعَزِيزُ ٱلرَّحِيمُ ﴿١٤٠﴾

129. Ĉu vi konstruas monumentojn sur ĉiu altaĵo por amuzi vin?

130. Ĉu vi starigas fortikaĵojn, kvazaŭ vi volus vivi ĉiam?

131. Kiam vi ekkaptas iun ajn, vi tion faras kiel tiranoj;

132. do respektegu Allahon kaj obeu min.

133. Respektegu Tiun, kiu vin helpis per tio, kion vi scias.

134. Li helpis vin per gregoj kaj filoj,

135. per ĝardenoj kaj fontoj.

136. Vere mi timas por vi la punon de terura tago".

كَذَّبَتْ ثَمُودُ ٱلْمُرْسَلِينَ ﴿١٤١﴾
إِذْ قَالَ لَهُمْ أَخُوهُمْ صَٰلِحٌ أَلَا تَتَّقُونَ ﴿١٤٢﴾
إِنِّى لَكُمْ رَسُولٌ أَمِينٌ ﴿١٤٣﴾
فَٱتَّقُوا۟ ٱللَّهَ وَأَطِيعُونِ ﴿١٤٤﴾
وَمَآ أَسْـَٔلُكُمْ عَلَيْهِ مِنْ أَجْرٍ ۖ إِنْ أَجْرِىَ إِلَّا عَلَىٰ
رَبِّ ٱلْعَٰلَمِينَ ﴿١٤٥﴾
أَتُتْرَكُونَ فِى مَا هَٰهُنَآ ءَامِنِينَ ﴿١٤٦﴾
فِى جَنَّٰتٍ وَعُيُونٍ ﴿١٤٧﴾
وَزُرُوعٍ وَنَخْلٍ طَلْعُهَا هَضِيمٌ ﴿١٤٨﴾
وَتَنْحِتُونَ مِنَ ٱلْجِبَالِ بُيُوتًا فَٰرِهِينَ ﴿١٤٩﴾
فَٱتَّقُوا۟ ٱللَّهَ وَأَطِيعُونِ ﴿١٥٠﴾
وَلَا تُطِيعُوٓا۟ أَمْرَ ٱلْمُسْرِفِينَ ﴿١٥١﴾

137. Ili diris: "Por ni estas egale, ĉu vi predikas aŭ ne predikas.

138. Tio estas nur kutimo de la prapatroj,

139. kaj ni ne estos punitaj".

140. Tiel ili rifuzis lin kaj Ni neniigis ilin. Vere en tio estas signo, tamen la plej multaj el ili ne kredas.

141. Vere estas via Sinjoro Tiu, kiu estas la Ĉiopova, la Pardonema.

142. La Tamudoj rifuzis la senditojn,

143. kiam diris al ili ilia frato Sŭāleh: "Ĉu vi ne volas esti justuloj?

144. Vere mi estas por vi fidela sendito,

145. do respektegu Allahon kaj obeu min.

146. Mi ne volas de vi rekompencon pro tio; vere mia rekompenco estas nur ĉe la Sinjoro de l' Universo.

الَّذِيْنَ يُفْسِدُوْنَ فِي الْاَرْضِ وَلَا يُصْلِحُوْنَ ﴿١٥٢﴾

147. Ĉu vi pensas, ke vi restos sekuraj inter tiuj aĵoj, kiuj estas ĉi tie,

قَالُوْٓا اِنَّمَآ اَنْتَ مِنَ الْمُسَحَّرِيْنَ ﴿١٥٣﴾

148. inter ĝardenoj kaj fontoj

مَآ اَنْتَ اِلَّا بَشَرٌ مِّثْلُنَا ۙ فَاْتِ بِاٰيَةٍ اِنْ كُنْتَ

149. kaj grenkampoj kaj daktilpalmoj kun pezaj brancoj, kiuj preskaŭ rompiĝas?

مِنَ الصّٰدِقِيْنَ ﴿١٥٤﴾

150. Ĉu vi fosos ĉiam loĝejojn en la montojn fariĝante fieregaj?

قَالَ هٰذِهٖ نَاقَةٌ لَّهَا شِرْبٌ وَّلَكُمْ شِرْبُ يَوْمٍ

151. Do respektegu Allahon kaj obeu min,

مَّعْلُوْمٍ ﴿١٥٥﴾

152. kaj ne obeu la ordonon de la ekscesantoj,

وَلَا تَمَسُّوْهَا بِسُوْٓءٍ فَيَاْخُذَكُمْ عَذَابُ يَوْمٍ عَظِيْمٍ ﴿١٥٦﴾

153. kiuj estigas malpacon sur la tero kaj ne pliboniĝas".

فَعَقَرُوْهَا فَاَصْبَحُوْا نٰدِمِيْنَ ﴿١٥٧﴾

154. Ili respondis: "Vi certe estas ensorĉita,

فَاَخَذَهُمُ الْعَذَابُ ۗ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيَةً ۗ وَمَا كَانَ

155. vi estas nur homo kiel ni, alportu do signon, se vi estas sincera".

اَكْثَرُهُمْ مُّؤْمِنِيْنَ ﴿١٥٨﴾

وَاِنَّ رَبَّكَ لَهُوَ الْعَزِيْزُ الرَّحِيْمُ ﴿١٥٩﴾

156. Li respondis: "Tiu ĉi estas kamelino; ĝi havas sian tempon por trinki kaj vi havas vian tempon por trinki en tago fiksita;

157. ne afliktu ĝin, por ke vin ne trafu la puno de tago terura".

158. Ili tamen buĉis ĝin, kaj poste ili pentis,

كَذَّبَتْ قَوْمُ لُوْطِ ِۨالْمُرْسَلِيْنَ ﴿١٦٠﴾

159. sed la puno trafis ilin. Vere en tio estas signo sed la plej multaj el ili ne estas kredantoj.

اِذْ قَالَ لَهُمْ اَخُوْهُمْ لُوْطٌ اَلَا تَتَّقُوْنَ ﴿١٦١﴾

160. Vere estas via Sinjoro Tiu, kiu estas la Ĉiopova, la Pardonema.

اِنِّيْ لَكُمْ رَسُوْلٌ اَمِيْنٌ ﴿١٦٢﴾

فَاتَّقُوا اللّٰهَ وَاَطِيْعُوْنِ ﴿١٦٣﴾

161. La popolo de Lot rifuzis la senditojn,

وَمَآ اَسْـَٔلُكُمْ عَلَيْهِ مِنْ اَجْرٍ ۚ اِنْ اَجْرِيَ اِلَّا عَلٰى

162. kiam ilia frato Lot diris al ili: "Ĉu vi ne volas esti justuloj?

رَبِّ الْعٰلَمِيْنَ ﴿١٦٤﴾

163. Mi vere estas nur fidela sendito por vi,

اَتَاْتُوْنَ الذُّكْرَانَ مِنَ الْعٰلَمِيْنَ ﴿١٦٥﴾

164. do respektegu Allahon kaj obeu min.

165. Mi ne volas de vi iun ajn rekompencon pro tio. Mia rekompenco estas nur ĉe la Sinjoro de l' Universo.

166. Ĉu vi volas alproksimiĝi, el ĉiuj kreitaĵoj, ĝuste al viroj,

167. kaj forlasi viajn virinojn, kiujn via Sinjoro kreis por vi? Ne! Vi estas popolo pekema! ".

168. Ili respondis: "Se vi ne forlasos tion, ho Lot, ni vin certe ekzilos".

169. Li diris: "Vere mi abomenas vian agadon.

170. Mia Sinjoro, savu min kaj mian familion de tio, kion ili faras".

171. Kaj Ni savis lin kaj lian tutan familion,

172. krom maljunulino, kiu restis malantaŭe,

173. poste Ni neniigis la aliajn

174. kaj Ni faligis pluvon sur ilin. Malbonega estis la pluvo por la admonitoj!

175. Vere en tio estas signo, sed la plej multaj el ili ne kredas.

176. Vere estas via Sinjoro Tiu, kiu estas la Ĉiopova, la Pardonema.

وَتَذَرُونَ مَا خَلَقَ لَكُمْ رَبُّكُم مِّنْ أَزْوَاجِكُمْ ۚ
بَلْ أَنتُمْ قَوْمٌ عَادُونَ ﴿١٦٥﴾
قَالُوا لَئِن لَّمْ تَنتَهِ يَا لُوطُ لَتَكُونَنَّ مِنَ الْمُخْرَجِينَ ﴿١٦٦﴾
قَالَ إِنِّي لِعَمَلِكُم مِّنَ الْقَالِينَ ﴿١٦٧﴾
رَبِّ نَجِّنِي وَأَهْلِي مِمَّا يَعْمَلُونَ ﴿١٦٨﴾
فَنَجَّيْنَاهُ وَأَهْلَهُ أَجْمَعِينَ ﴿١٦٩﴾
إِلَّا عَجُوزًا فِي الْغَابِرِينَ ﴿١٧٠﴾
ثُمَّ دَمَّرْنَا الْآخَرِينَ ﴿١٧١﴾
وَأَمْطَرْنَا عَلَيْهِم مَّطَرًا ۖ فَسَاءَ مَطَرُ الْمُنذَرِينَ ﴿١٧٢﴾
إِنَّ فِي ذَٰلِكَ لَآيَةً ۖ وَمَا كَانَ أَكْثَرُهُم مُّؤْمِنِينَ ﴿١٧٣﴾
وَإِنَّ رَبَّكَ لَهُوَ الْعَزِيزُ الرَّحِيمُ ﴿١٧٤﴾

177. La popolo de la arbarego rifuzis la senditojn,

178. kiam diris al ili ilia frato Ŝu'ajb: "Ĉu vi ne volas esti justuloj?

179. Vere mi estas fidela sendito por vi,

180. do respektegu Allahon kaj obeu min.

كَذَّبَ أَصْحَابُ لْأَيْكَةِ الْمُرْسَلِينَ ﴿١٧٦﴾
إِذْ قَالَ لَهُمْ شُعَيْبٌ أَلَا تَتَّقُونَ ﴿١٧٧﴾
إِنِّي لَكُمْ رَسُولٌ أَمِينٌ ﴿١٧٨﴾
فَاتَّقُوا اللَّهَ وَأَطِيعُونِ ﴿١٧٩﴾

181. Mi ne volas de vi iun ajn rekompencon pro tio, ĉar mia rekompenco estas nur ĉe la Sinjoro de l' Universo.

وَمَآ أَسْـَٔلُكُمْ عَلَيْهِ مِنْ أَجْرٍ ۖ إِنْ أَجْرِيَ إِلَّا عَلَىٰ رَبِّ الْعَٰلَمِينَ ﴿١٨١﴾

182. Donu plenan mezuron kaj ne estu kiel tiuj, kiuj trompas je la mezuro,

أَوْفُوا الْكَيْلَ وَلَا تَكُونُوا مِنَ الْمُخْسِرِينَ ﴿١٨٢﴾

183. kaj pesu per rekta pesilo.

وَزِنُوا بِالْقِسْطَاسِ الْمُسْتَقِيمِ ﴿١٨٣﴾

184. Ne malpliigu la propraĵojn de la homoj kaj ne estu krimuloj sur la tero, estigante malpacon.

وَلَا تَبْخَسُوا النَّاسَ أَشْيَآءَهُمْ وَلَا تَعْثَوْا فِي الْأَرْضِ مُفْسِدِينَ ﴿١٨٤﴾

185. Respektegu Tiun, kiu kreis vin kaj la antaŭajn generaciojn".

وَاتَّقُوا الَّذِي خَلَقَكُمْ وَالْجِبِلَّةَ الْأَوَّلِينَ ﴿١٨٥﴾

186. Ili respondis: "Vi certe nur estas ensorĉita,

قَالُوٓا إِنَّمَآ أَنتَ مِنَ الْمُسَحَّرِينَ ﴿١٨٦﴾

187. kaj vi estas nur homo kiel ni, kaj ni rigardas vin mensogulo.

وَمَآ أَنتَ إِلَّا بَشَرٌ مِّثْلُنَا وَإِن نَّظُنُّكَ لَمِنَ الْكَٰذِبِينَ ﴿١٨٧﴾

188. Faligu do sur nin pecon da ĉielo, se vi estas sincera".

فَأَسْقِطْ عَلَيْنَا كِسَفًا مِّنَ السَّمَآءِ إِن كُنتَ مِنَ الصَّٰدِقِينَ ﴿١٨٨﴾

189. Li diris: "Mia Sinjoro bone scias, kion vi faras".

قَالَ رَبِّي أَعْلَمُ بِمَا تَعْمَلُونَ ﴿١٨٩﴾

190. Ili tamen kulpigis lin pri mensogo, kaj ilin trafis la puno en la tago de la nubo ombranta. Vere tiu estis la puno de terura tago.

فَكَذَّبُوهُ فَأَخَذَهُمْ عَذَابُ يَوْمِ الظُّلَّةِ ۚ إِنَّهُۥ كَانَ عَذَابَ يَوْمٍ عَظِيمٍ ﴿١٩٠﴾

191. Vere en tio estas signo, sed la plej multaj el ili ne kredas.

إِنَّ فِي ذَٰلِكَ لَءَايَةً ۖ وَمَا كَانَ أَكْثَرُهُم مُّؤْمِنِينَ ﴿١٩١﴾

192. Vere estas via Sinjoro Tiu, kiu estas la Ĉiopova, la Pardonema.

ع ١٢ وَإِنَّ رَبَّكَ لَهُوَ الْعَزِيزُ الرَّحِيمُ ﴿١٩٢﴾

193. Jen, ĉi tiu estas la revelacio de la Sinjoro de l' Universo.

وَإِنَّهُۥ لَتَنزِيلُ رَبِّ الْعَٰلَمِينَ ﴿١٩٣﴾

194. Kun ĝi malsupreniris la spirito fidela

نَزَلَ بِهِ الرُّوحُ الْأَمِينُ ﴿١٩٤﴾

195. sur vian koron, por ke vi estu unu el la admonantoj,

عَلَىٰ قَلْبِكَ لِتَكُونَ مِنَ الْمُنذِرِينَ ﴿١٩٥﴾

196. en klara araba lingvo,

بِلِسَانٍ عَرَبِيٍّ مُّبِينٍ ﴿١٩٦﴾

وَإِنَّهُۥ لَفِي زُبُرِ الْأَوَّلِينَ ﴿١٩٦﴾

197. kaj certe tio troviĝas ankaŭ en la Skriboj de la antaŭuloj.

198. Ĉu do ne estas por ili signo, kiun konas la kleruloj el la idoj de Izrael?

199. Se Ni estus sendinta ĝin al iu fremdulo

200. kaj li estus leginta ĝin al ili, ili ne estus kredintaj al ĝi.

201. Tial Ni igis ĝin eniri en la korojn de la pekuloj.

202. Ili ne kredos al ĝi, antaŭ ol ili vidos la doloran punon.

203. Ĝi tamen venos sur ilin subite, kaj ili ne perceptos tion.

204. Kaj tiam ili diros: "Ĉu ne estos konsentita prokrasto al ni? ".

205. Ĉu estas Nia puno, kiun ili volas akceli?

206. Ĉu vi ne vidas? Se Ni permesos al ili ĝui por jaroj,

207. poste tamen venos al ili tio, pri kio estis minacite al ili,

208. kiel utilus al ili ĉio, kion ili povis ĝui?

209. Ni neniam detruis iun ajn urbon, kiu antaŭe ne estis ricevinta admonantojn

210. kiel admonon; neniam Ni estis maljusta.

211. La Satanoj ne sendas ĝin,

212. tio ne konvenus al ili kaj ili eĉ ne kapablus fari tion.

213. Ili ja estas esceptitaj de la aŭdado.

214. Ne alvoku do iun ajn Dion krom Allah,

أَوَلَمْ يَكُن لَّهُمْ آيَةً أَن يَعْلَمَهُ عُلَمَاءُ بَنِي
إِسْرَائِيلَ ﴿١٩٧﴾
وَلَوْ نَزَّلْنَاهُ عَلَىٰ بَعْضِ الْأَعْجَمِينَ ﴿١٩٨﴾
فَقَرَأَهُ عَلَيْهِم مَّا كَانُوا بِهِ مُؤْمِنِينَ ﴿١٩٩﴾
كَذَٰلِكَ سَلَكْنَاهُ فِي قُلُوبِ الْمُجْرِمِينَ ﴿٢٠٠﴾
لَا يُؤْمِنُونَ بِهِ حَتَّىٰ يَرَوُا الْعَذَابَ الْأَلِيمَ ﴿٢٠١﴾
فَيَأْتِيَهُم بَغْتَةً وَهُمْ لَا يَشْعُرُونَ ﴿٢٠٢﴾
فَيَقُولُوا هَلْ نَحْنُ مُنظَرُونَ ﴿٢٠٣﴾
أَفَبِعَذَابِنَا يَسْتَعْجِلُونَ ﴿٢٠٤﴾
أَفَرَأَيْتَ إِن مَّتَّعْنَاهُمْ سِنِينَ ﴿٢٠٥﴾
ثُمَّ جَاءَهُم مَّا كَانُوا يُوعَدُونَ ﴿٢٠٦﴾
مَا أَغْنَىٰ عَنْهُم مَّا كَانُوا يُمَتَّعُونَ ﴿٢٠٧﴾
وَمَا أَهْلَكْنَا مِن قَرْيَةٍ إِلَّا لَهَا مُنذِرُونَ ﴿٢٠٨﴾
ذِكْرَىٰ وَمَا كُنَّا ظَالِمِينَ ﴿٢٠٩﴾
وَمَا تَنَزَّلَتْ بِهِ الشَّيَاطِينُ ﴿٢١٠﴾
وَمَا يَنبَغِي لَهُمْ وَمَا يَسْتَطِيعُونَ ﴿٢١١﴾
إِنَّهُمْ عَنِ السَّمْعِ لَمَعْزُولُونَ ﴿٢١٢﴾
فَلَا تَدْعُ مَعَ اللَّهِ إِلَٰهًا آخَرَ فَتَكُونَ مِنَ الْمُعَذَّبِينَ ﴿٢١٣﴾
وَأَنذِرْ عَشِيرَتَكَ الْأَقْرَبِينَ ﴿٢١٤﴾
وَاخْفِضْ جَنَاحَكَ لِمَنِ اتَّبَعَكَ مِنَ الْمُؤْمِنِينَ ﴿٢١٥﴾
فَإِنْ عَصَوْكَ فَقُلْ إِنِّي بَرِيءٌ مِّمَّا تَعْمَلُونَ ﴿٢١٦﴾
وَتَوَكَّلْ عَلَى الْعَزِيزِ الرَّحِيمِ ﴿٢١٧﴾

الَّذِىْ يَرٰىكَ حِيْنَ تَقُوْمُ ﴿٢١٩﴾

por ke vi ne estu inter tiuj, kiuj estas punendaj,

وَ تَقَلُّبَكَ فِى السّٰجِدِيْنَ ﴿٢٢٠﴾

215. kaj admonu viajn plej proksimajn parencojn,

اِنَّهٗ هُوَ السَّمِيْعُ الْعَلِيْمُ ﴿٢٢١﴾

216. kaj mallevu viajn flugilojn sur la kredantojn, kiuj vin sekvas.

هَلْ اُنَبِّئُكُمْ عَلٰى مَنْ تَنَزَّلُ الشَّيٰطِيْنُ ﴿٢٢٢﴾

217. Se ili tamen estas malobeemaj, diru: "Mi ne estas kulpa pri tio, kion vi faras",

تَنَزَّلُ عَلٰى كُلِّ اَفَّاكٍ اَثِيْمٍ ﴿٢٢٣﴾

218. kaj konfidu je la Ĉiopova, la Pardonema,

يُّلْقُوْنَ السَّمْعَ وَ اَكْثَرُهُمْ كٰذِبُوْنَ ﴿٢٢٤﴾

219. kiu vidas vin, kiam vi staras preĝante,

وَ الشُّعَرَآءُ يَتَّبِعُهُمُ الْغَاوٗنَ ﴿٢٢٥﴾

220. kaj viajn movojn inter la surgenuiĝantoj.

اَلَمْ تَرَ اَنَّهُمْ فِىْ كُلِّ وَادٍ يَّهِيْمُوْنَ ﴿٢٢٦﴾

221. Vere estas Li Tiu, kiu estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia .

وَ اَنَّهُمْ يَقُوْلُوْنَ مَا لَا يَفْعَلُوْنَ ﴿٢٢٧﴾

222. Ĉu Mi devas anonci al vi, sur kiun malsupreniros la Satanoj?

اِلَّا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَ عَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ وَ ذَكَرُوا اللّٰهَ كَثِيْرًا وَّ انْتَصَرُوْا مِنْۢ بَعْدِ مَا ظُلِمُوْا ؕ وَ سَيَعْلَمُ الَّذِيْنَ ظَلَمُوْۤا اَىَّ مُنْقَلَبٍ يَّنْقَلِبُوْنَ ﴿٢٢٨﴾ ع ١٥

223. Ili malsupreniros sur ĉiun mensogulon kaj pekulon,

224. redirante, kion ili aŭdas, kaj la plej multaj el ili estas mensoguloj.

225. Kaj pri la poetoj, kiujn sekvas la erarantoj,

226. ĉu vi ne vidis, kiel ili vagadas en ĉiu valo,

227. kaj kiel ili diras, kion ili ne faras?

228. krom tiuj, kiuj kredas kaj bonfaras kaj ofte memoras Allahon kaj sin defendas nur, kiam ilin trafas maljusteco. La malpieguloj baldaŭ ekscios, al kiu fina celo ili revenos.

سُوْرَةُ النَّمْلِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

طٰسٓ ۚ تِلْكَ اٰيٰتُ الْقُرْاٰنِ وَكِتَابٍ مُّبِيْنٍ ۙ ②

هُدًى وَّبُشْرٰى لِلْمُؤْمِنِيْنَ ۙ ③

الَّذِيْنَ يُقِيْمُوْنَ الصَّلٰوةَ وَيُؤْتُوْنَ الزَّكٰوةَ وَهُمْ

بِالْاٰخِرَةِ هُمْ يُوْقِنُوْنَ ④

اِنَّ الَّذِيْنَ لَا يُؤْمِنُوْنَ بِالْاٰخِرَةِ زَيَّنَّا لَهُمْ اَعْمَالَهُمْ

فَهُمْ يَعْمَهُوْنَ ۭ ⑤

اُولٰٓئِكَ الَّذِيْنَ لَهُمْ سُوْٓءُ الْعَذَابِ وَهُمْ فِي الْاٰخِرَةِ

هُمُ الْاَخْسَرُوْنَ ⑥

وَاِنَّكَ لَتُلَقَّى الْقُرْاٰنَ مِنْ لَّدُنْ حَكِيْمٍ عَلِيْمٍ ⑦

اِذْ قَالَ مُوْسٰى لِاَهْلِهٖٓ اِنِّيْٓ اٰنَسْتُ نَارًا ۭ سَاٰتِيْكُمْ

مِّنْهَا بِخَبَرٍ اَوْ اٰتِيْكُمْ بِشِهَابٍ قَبَسٍ لَّعَلَّكُمْ

تَصْطَلُوْنَ ⑧

فَلَمَّا جَاۗءَهَا نُوْدِيَ اَنْۢ بُوْرِكَ مَنْ فِي النَّارِ وَ

مَنْ حَوْلَهَا ۭ وَسُبْحٰنَ اللّٰهِ رَبِّ الْعٰلَمِيْنَ ⑨

يٰمُوْسٰٓى اِنَّهٗٓ اَنَا اللّٰهُ الْعَزِيْزُ الْحَكِيْمُ ۙ ⑩

وَاَلْقِ عَصَاكَ ۭ فَلَمَّا رَاٰهَا تَهْتَزُّ كَاَنَّهَا جَاۗنٌّ وَّلّٰى

مُدْبِرًا وَّلَمْ يُعَقِّبْ ۭ يٰمُوْسٰى لَا تَخَفْ ڰ اِنِّىْ لَا يَخَافُ

لَدَيَّ الْمُرْسَلُوْنَ ⑪

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Tŭă, Sin**. Jen la versoj de la Korano kaj de klara Libro,

3. gvidilo kaj bona novaĵo por la kredantoj,

4. kiuj levas la preĝon kaj disdonas almozojn kaj firme fidas je la vivo venonta.

5. Tiuj tamen, kiuj ne kredas al la vivo venonta – Ni igis iliajn agojn ŝajni belaj al ili – ili certe nur vagadas kiel blinduloj.

6. Estas ili tiuj, por kiuj estos terura puno kaj kiuj estos perdantoj en la vivo venonta.

7. Vere vi ricevas la Koranon de Iu, kiu estas saĝa, ĉioscia.

8. Memoru, kiam Moseo diris al sia familio: "Vere mi ekvidas fajron. Mi alportos al vi novaĵon aŭ mi alportos flamon, fajregon, por ke vi varmiĝu".

9. Kiam li venis al ĝi, li estis vokita: "Benata estu Tiu, kiu estas en la fajro kaj ĉirkaŭ ĝi; sankta estas Allah, la Sinjoro de l' Universo!

10. Ho Moseo, vere Mi estas Allah, la Ĉiopova, la Saĝa.

11. Ĵetu vian bastonon". Kiam li tamen vidis ĝin moviĝi, kvazaŭ ĝi estus serpento, li turnis sin por fuĝi kaj ne plu rigardis malan-

* v. la verson 19an k.sekv.

** Puriganta, Ĉioaŭda!

taŭen. "Ho Moseo, ne timu, vere en Mia ĉeesto ne timu la senditoj;

12. timu nur tiu, kiu malbonfaras kaj poste ŝanĝas bonon en malbonon. Vere Mi estas senkulpigema, pardonema.

13. Metu vian manon en vian bruston: vi eltiros ĝin blanka sen makulo. Tiu estas unu el la naŭ signoj por Faraono kaj lia popolo. Ili vere estas popolo malpiega".

14. Kiam venis al ili Niaj lumigantaj signoj, ili diris: "Tio estas evidenta magio".

15. Ili rifuzis ĝin maljuste kaj fierege, kvankam iliaj animoj estis konvinkitaj. Vidu do, kiel estis la fino de la malpacemuloj!

16. Vere Ni donis la veran scion al David kaj al Salomono kaj ambaŭ diris: "Estu laŭdegata Allah, kiu nin altigis super multaj el Siaj kredantaj servantoj".

17. Salomono fariĝis heredanto de David kaj diris: "Ho vi homoj! Al ni estis instruita la lingvo de la birdoj, kaj al ni ĉio estas donita. Tio vere estas graco evidenta".

18. De Salomono estis tie kunigitaj la armeoj de la Ginnoj kaj de la homoj kaj de la birdoj, kaj ili estis ordigitaj en trupojn,

19. ĝis ili venis en la valon de Naml.* Diris virino de Naml: "Ho vi popolo de Naml, iru en viajn loĝejojn, por ke Salomono kaj liaj trupoj ne surtretu vin pro neatento! ".

20. Li ridetis gaje pro tiaj vortoj kaj diris: "Mia Sinjoro, faru min danka pro Via favoro, kiun Vi donis al mi kaj al miaj gepatroj, kaj igu min fari bonajn agojn, kiuj plaĉas al Vi, kaj faru min per Via graco Via sindonema servanto".

إِلَّا مَنْ ظَلَمَ ثُمَّ بَدَّلَ حُسْنًا بَعْدَ سُوٓءٍ فَإِنِّي
غَفُورٌ رَّحِيمٌ ﴿١٢﴾
وَأَدْخِلْ يَدَكَ فِي جَيْبِكَ تَخْرُجْ بَيْضَآءَ مِنْ غَيْرِ
سُوٓءٍ ۖ فِي تِسْعِ ءَايَٰتٍ إِلَىٰ فِرْعَوْنَ وَقَوْمِهِۦٓ ۚ إِنَّهُمْ
كَانُوا۟ قَوْمًا فَٰسِقِينَ ﴿١٣﴾
فَلَمَّا جَآءَتْهُمْ ءَايَٰتُنَا مُبْصِرَةً قَالُوا۟ هَٰذَا سِحْرٌ مُّبِينٌ ﴿١٤﴾
وَجَحَدُوا۟ بِهَا وَٱسْتَيْقَنَتْهَآ أَنفُسُهُمْ ظُلْمًا وَعُلُوًّا ۚ
فَٱنظُرْ كَيْفَ كَانَ عَٰقِبَةُ ٱلْمُفْسِدِينَ ﴿١٥﴾ ع ١٥
وَلَقَدْ ءَاتَيْنَا دَاوُۥدَ وَسُلَيْمَٰنَ عِلْمًا ۖ وَقَالَا ٱلْحَمْدُ
لِلَّهِ ٱلَّذِى فَضَّلَنَا عَلَىٰ كَثِيرٍ مِّنْ عِبَادِهِ
ٱلْمُؤْمِنِينَ ﴿١٦﴾
وَوَرِثَ سُلَيْمَٰنُ دَاوُۥدَ ۖ وَقَالَ يَٰٓأَيُّهَا ٱلنَّاسُ عُلِّمْنَا
مَنطِقَ ٱلطَّيْرِ وَأُوتِينَا مِن كُلِّ شَىْءٍ ۖ إِنَّ هَٰذَا لَهُوَ
ٱلْفَضْلُ ٱلْمُبِينُ ﴿١٧﴾
وَحُشِرَ لِسُلَيْمَٰنَ جُنُودُهُۥ مِنَ ٱلْجِنِّ وَٱلْإِنسِ
وَٱلطَّيْرِ فَهُمْ يُوزَعُونَ ﴿١٨﴾
حَتَّىٰٓ إِذَآ أَتَوْا۟ عَلَىٰ وَادِ ٱلنَّمْلِ قَالَتْ نَمْلَةٌ يَٰٓأَيُّهَا
ٱلنَّمْلُ ٱدْخُلُوا۟ مَسَٰكِنَكُمْ لَا يَحْطِمَنَّكُمْ سُلَيْمَٰنُ
وَجُنُودُهُۥ ۙ وَهُمْ لَا يَشْعُرُونَ ﴿١٩﴾
فَتَبَسَّمَ ضَاحِكًا مِّن قَوْلِهَا وَقَالَ رَبِّ أَوْزِعْنِىٓ
أَنْ أَشْكُرَ نِعْمَتَكَ ٱلَّتِىٓ أَنْعَمْتَ عَلَىَّ وَعَلَىٰ وَٰلِدَىَّ
وَأَنْ أَعْمَلَ صَٰلِحًا تَرْضَىٰهُ وَأَدْخِلْنِى بِرَحْمَتِكَ

21. Li rigardis la birdojn kaj diris: "Kiel okazas, ke mi ne vidas Hud-hud-on*? Ĉu li estas inter la forestantoj?

22. Mi certe punos lin per severa puno, aŭ mi tranĉos lian gorĝon, se li ne revenos kun konvinka senkulpiĝo".

23. Tiu tamen ne malfruis longe kaj diris: "Mi eksciis, kion vi ne eksciis, kaj mi venis al vi el Seba kun certa novaĵo.

24. Mi vere trovis virinon regantan super ili, kaj al ŝi estas konsentitaj ĉiuj aĵoj, kaj ŝi havas belegan tronon.

25. Mi trovis ŝin kaj ŝian popolon adorantaj la sunon anstataŭ Allahon, kaj Satano igis iliajn agojn ŝajni belaj al ili kaj devojigis ilin el la vojo – kaj tiel ili ne estas gvidataj –

26. por ke ili ne adoru Allahon, kiu evidentigas ĉion, kio estas kaŝita en la ĉieloj kaj sur la tero, kaj kiu scias, kion vi kaŝas kaj kion vi malkaŝas".

27. Allah! Ne ekzistas alia Dio ol Li, la Sinjoro de la impona trono.

28. Li diris: "Ni vidos, ĉu vi estas sincera aŭ ĉu vi mensogas.

---

* Ĉi tiu kaj la sekvantaj versoj, kiel cetere la tuta ĉapitro "An-Naml", estas inter la plej malfacile komprenebłaj kaj plej ofte pridiskutitaj el la Korano. Iuj modernaj ekzegezistoj asertas, substrekante la fakton, ke la intenco de la libro ne povas esti prezenti nekredindajn fabelojn, sed peri seriozajn temojn, ke "Naml"ne estas vorto tradukenda laŭlitere(formikoj), kiel troviĝas en iuj Korantradukoj, sed nomo de iu popolo, kiel ofte okazis en la Araba duoninsulo (ekzemple:Banī Kalb, kiun oni neniam tradukus per "idoj de la hundo"!). Simile "birdoj" havas, laŭ la samaj interpretistoj,alian signifon ol la laŭliteran, eble temis pri rapidaj trupoj kiel ekz. ĉevalrajdistoj. Ankaŭ la vorto Hud-Hud ofte troviĝas en la traduko "upupo", sed same estas eble ke temas pri nomo de persono, verŝajne de iu superulo, al kiu Salomono konfidis la malfacilan taskon de senditaĵo al Ŝeba, kiu estis ribelinta.

فِيْ عِبَادِكَ الصّٰلِحِيْنَ ﴿٢٠﴾
وَ تَفَقَّدَ الطَّيْرَ فَقَالَ مَالِيَ لَآ اَرَى الْهُدْهُدَ
اَمْ كَانَ مِنَ الْغَآئِبِيْنَ ﴿٢١﴾
لَاُعَذِّبَنَّهٗ عَذَابًا شَدِيْدًا اَوْ لَاَاْذْبَحَنَّهٗٓ اَوْ
لَيَاْتِيَنِّيْ بِسُلْطٰنٍ مُّبِيْنٍ ﴿٢٢﴾
فَمَكَثَ غَيْرَ بَعِيْدٍ فَقَالَ اَحَطْتُّ بِمَا لَمْ تُحِطْ بِهٖ
وَجِئْتُكَ مِنْ سَبَاٍ بِنَبَاٍ يَّقِيْنٍ ﴿٢٣﴾
اِنِّيْ وَجَدْتُّ امْرَاَةً تَمْلِكُهُمْ وَ اُوْتِيَتْ مِنْ كُلِّ
شَيْءٍ وَّ لَهَا عَرْشٌ عَظِيْمٌ ﴿٢٤﴾
وَجَدْتُّهَا وَ قَوْمَهَا يَسْجُدُوْنَ لِلشَّمْسِ مِنْ دُوْنِ
اللّٰهِ وَ زَيَّنَ لَهُمُ الشَّيْطٰنُ اَعْمَالَهُمْ فَصَدَّهُمْ عَنِ
السَّبِيْلِ فَهُمْ لَا يَهْتَدُوْنَ ﴿٢٥﴾
اَلَّا يَسْجُدُوْا لِلّٰهِ الَّذِيْ يُخْرِجُ الْخَبْءَ فِي السَّمٰوٰتِ
وَ الْاَرْضِ وَ يَعْلَمُ مَا تُخْفُوْنَ وَ مَا تُعْلِنُوْنَ ﴿٢٦﴾
اَللّٰهُ لَآ اِلٰهَ اِلَّا هُوَ رَبُّ الْعَرْشِ الْعَظِيْمِ ﴿٢٦﴾ السجدة
قَالَ سَنَنْظُرُ اَصَدَقْتَ اَمْ كُنْتَ مِنَ الْكٰذِبِيْنَ ﴿٢٧﴾

29. Iru kun ĉi tiu letero kaj donu ĝin al ili, poste revenu de ili kaj atentu, kion ili respondos".

30. Ŝi diris: "Ho vi, estroj, vere al mi estas donita nobla letero.

31. Ĝi estas de Salomono kaj ĝi diras la jenon: 'Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

32. Ne ribelu kontraŭ mi, sed venu al mi submetiĝante."

33. Ŝi diris: "Ho vi estroj, konsilu min pri mia afero. Mi neniam decidas pri iu afero sen via alesto".

34. Ili respondis: "Ni posedas fortecon kaj ni posedas fortan militistaron, sed vi havas la komandon. Vidu vi, kion vi volas ordoni".

35. Ŝi diris: "Vere, la reĝoj, kiam ili eniras urbon, detruas ĝin, kaj faras la superajn loĝantojn malsuperaj. Tiel ili agas.

36. Mi tamen sendos al ili donacon kaj atendos, kion la senditoj reportos".

37. Kiam ŝia sendito venis al Salomono, diris ĉi tiu: "Ĉu vi volas helpi min per proprajoj? Tamen tio, kion Allah donis al mi, estas pli bona ol tio, kion Li donis al vi. Ne! Estas vi tiuj, kiuj ĝojas pro via donaco.

38. Reiru al ili, ĉar ni venos certe kun armeoj, kontraŭ kiuj ili ne havos povon, kaj ni forpelos ilin de tie kun honto, kaj ili estos humiligitaj".

39. Li diris: "Ho vi, estroj! Kiu alportos al mi ŝian tronon, antaŭ ol ili venos al mi submetiĝante? ".

40. Tiam diris fortulo el la Ĝinnoj: "Mi portos ĝin al vi, antaŭ ol vi ekstaros el via sidilo.

اِذْهَبْ بِّكِتٰبِيْ هٰذَا فَاَلْقِهْ اِلَيْهِمْ ثُمَّ تَوَلَّ عَنْهُمْ
فَانْظُرْ مَاذَا يَرْجِعُوْنَ ﴿٢٨﴾
قَالَتْ يٰٓاَيُّهَا الْمَلَؤُا اِنِّيْٓ اُلْقِيَ اِلَيَّ كِتٰبٌ كَرِيْمٌ ﴿٢٩﴾
اِنَّهٗ مِنْ سُلَيْمٰنَ وَاِنَّهٗ بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ﴿٣٠﴾
اَلَّا تَعْلُوْا عَلَيَّ وَاْتُوْنِيْ مُسْلِمِيْنَ ﴿٣١﴾
قَالَتْ يٰٓاَيُّهَا الْمَلَؤُا اَفْتُوْنِيْ فِيْٓ اَمْرِيْ مَا كُنْتُ

Mi ja havas la forton por tio, kaj mi estas fidela".

41. Tiam parolis iu, kiu konis la Skribon: "Mi alportos ĝin al vi, antaŭ ol revenos al vi via rigardo". Kiam li vidis ĝin staranta antaŭ si, li diris: "Tio estas per la graco de mia Sinjoro, por ke Li jugu min, ĉu mi estas danka aŭ sendanka. Kiu estas danka, tiu estas danka por sia propra animo, kaj kiu estas sendanka – vidu, mia Sinjoro estas memsufiĉa, grandanima".

42. Li diris: "Faru, ke ŝia trono ŝajnu malbela al ŝi: ni volas vidi, ĉu ŝi estas gvidata aŭ ĉu ŝi estas unu el la negvidatoj".

43. Kiam ŝi venis, oni demandis ŝin: "Ĉu via trono estas kiel tiu ĉi? ". Ŝi respondis: "Ŝajnas, ke estas ĝi, kaj jam antaŭe venis al ni la scio, kaj ni jam submetiĝis".

44. Li malproksimigis ŝin de tio, kion ŝi kutimis adori anstataŭ Allahon, ĉar ŝi apartenis al popolo miskredanta.

45. Estis dirite al ŝi: "Eniru la palacon". Kiam ŝi vidis ĝin, ŝi kredis, ke estas akvujo kaj nudigis siajn krurojn. Salomono diris: "Estas korto, pavimita per vitro". Ŝi respondis: "Mia Sinjoro, mi vere pekis kontraŭ mia animo, sed mi submetiĝas kun Salomono al Allah, la Sinjoro de l' Universo".

46. Ni vere sendis al la Tamudoj ilian fraton Sŭāleh: "Adoru Allahon! ". Tamen jen, ili dividiĝis en du partiojn disputantajn.

47. Li diris: "Ho mia popolo! Kial vi volas akceli la malbonon anstataŭ la bono? Kial vi ne petas pardonon de Allah, por kę estu kompato por vi? ".

48. Ili diris: "Ni antaŭvidas malbonon de vi kaj de tiuj, kiuj estas kun vi". Li respondis: "Via malfeliĉo jam estas ĉe Allah. Ne! Vi estas popolo, kiu estos elprovata".

فَاطِعَةً أَمْرًا حَتَّىٰ تَشْهَدُونِ ﴿٣٢﴾

قَالُوا نَحْنُ أُولُوا قُوَّةٍ وَأُولُوا بَأْسٍ شَدِيدٍ ۖ وَالْأَمْرُ إِلَيْكِ فَانظُرِي مَاذَا تَأْمُرِينَ ﴿٣٣﴾

قَالَتْ إِنَّ الْمُلُوكَ إِذَا دَخَلُوا قَرْيَةً أَفْسَدُوهَا وَجَعَلُوا أَعِزَّةَ أَهْلِهَا أَذِلَّةً ۖ وَكَذَٰلِكَ يَفْعَلُونَ ﴿٣٤﴾

وَإِنِّي مُرْسِلَةٌ إِلَيْهِم بِهَدِيَّةٍ فَنَاظِرَةٌ بِمَ يَرْجِعُ الْمُرْسَلُونَ ﴿٣٥﴾

فَلَمَّا جَاءَ سُلَيْمَانَ قَالَ أَتُمِدُّونَنِ بِمَالٍ فَمَا آتَانِيَ اللَّهُ خَيْرٌ مِّمَّا آتَاكُم ۖ بَلْ أَنتُم بِهَدِيَّتِكُمْ تَفْرَحُونَ ﴿٣٦﴾

ارْجِعْ إِلَيْهِمْ فَلَنَأْتِيَنَّهُمْ بِجُنُودٍ لَّا قِبَلَ لَهُم بِهَا وَلَنُخْرِجَنَّهُم مِّنْهَا أَذِلَّةً وَهُمْ صَاغِرُونَ ﴿٣٧﴾

قَالَ يَا أَيُّهَا الْمَلَؤُا أَيُّكُمْ يَأْتِينِي بِعَرْشِهَا قَبْلَ أَن يَأْتُونِي مُسْلِمِينَ ﴿٣٨﴾

قَالَ عِفْرِيتٌ مِّنَ الْجِنِّ أَنَا آتِيكَ بِهِ قَبْلَ أَن تَقُومَ مِن مَّقَامِكَ ۖ وَإِنِّي عَلَيْهِ لَقَوِيٌّ أَمِينٌ ﴿٣٩﴾

قَالَ الَّذِي عِندَهُ عِلْمٌ مِّنَ الْكِتَابِ أَنَا آتِيكَ بِهِ قَبْلَ أَن يَرْتَدَّ إِلَيْكَ طَرْفُكَ ۚ فَلَمَّا رَآهُ مُسْتَقِرًّا عِندَهُ قَالَ هَٰذَا مِن فَضْلِ رَبِّي لِيَبْلُوَنِي أَأَشْكُرُ أَمْ أَكْفُرُ ۖ وَمَن شَكَرَ فَإِنَّمَا يَشْكُرُ لِنَفْسِهِ ۖ وَمَن كَفَرَ فَإِنَّ رَبِّي غَنِيٌّ كَرِيمٌ ﴿٤٠﴾

قَالَ نَكِّرُوا لَهَا عَرْشَهَا نَنظُرْ أَتَهْتَدِي أَمْ تَكُونُ مِنَ الَّذِينَ لَا يَهْتَدُونَ ﴿٤١﴾

فَلَمَّا جَآءَتْ قِيْلَ اَهٰكَذَا عَرْشُكِ ؕ قَالَتْ كَاَنَّهٗ هُوَ ۚ
وَ اُوْتِيْنَا الْعِلْمَ مِنْ قَبْلِهَا وَكُنَّا مُسْلِمِيْنَ ﴿۴۲﴾
وَ صَدَّهَا مَا كَانَتْ تَّعْبُدُ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ ؕ اِنَّهَا
كَانَتْ مِنْ قَوْمٍ كٰفِرِيْنَ ﴿۴۳﴾
قِيْلَ لَهَا ادْخُلِي الصَّرْحَ ۚ فَلَمَّا رَاَتْهُ حَسِبَتْهُ لُجَّةً
وَّ كَشَفَتْ عَنْ سَاقَيْهَا ؕ قَالَ اِنَّهٗ صَرْحٌ مُّمَرَّدٌ
مِّنْ قَوَارِيْرَ ؕ قَالَتْ رَبِّ اِنِّيْ ظَلَمْتُ نَفْسِيْ وَاَسْلَمْتُ
ع مَعَ سُلَيْمٰنَ لِلّٰهِ رَبِّ الْعٰلَمِيْنَ ﴿۴۴﴾
وَ لَقَدْ اَرْسَلْنَاۤ اِلٰى ثَمُوْدَ اَخَاهُمْ صٰلِحًا اَنِ اعْبُدُوا
اللّٰهَ فَاِذَا هُمْ فَرِيْقٰنِ يَخْتَصِمُوْنَ ﴿۴۵﴾
قَالَ يٰقَوْمِ لِمَ تَسْتَعْجِلُوْنَ بِالسَّيِّئَةِ قَبْلَ الْحَسَنَةِ ۚ
لَوْ لَا تَسْتَغْفِرُوْنَ اللّٰهَ لَعَلَّكُمْ تُرْحَمُوْنَ ﴿۴۶﴾
قَالُوا اطَّيَّرْنَا بِكَ وَ بِمَنْ مَّعَكَ ؕ قَالَ طٰٓئِرُكُمْ عِنْدَ
اللّٰهِ بَلْ اَنْتُمْ قَوْمٌ تُفْتَنُوْنَ ﴿۴۷﴾
وَ كَانَ فِي الْمَدِيْنَةِ تِسْعَةُ رَهْطٍ يُّفْسِدُوْنَ فِي
الْاَرْضِ وَ لَا يُصْلِحُوْنَ ﴿۴۸﴾
قَالُوْا تَقَاسَمُوْا بِاللّٰهِ لَنُبَيِّتَنَّهٗ وَ اَهْلَهٗ ثُمَّ لَنَقُوْلَنَّ
لِوَلِيِّهٖ مَا شَهِدْنَا مَهْلِكَ اَهْلِهٖ وَ اِنَّا لَصٰدِقُوْنَ ﴿۴۹﴾
وَ مَكَرُوْا مَكْرًا وَّ مَكَرْنَا مَكْرًا وَّ هُمْ لَا يَشْعُرُوْنَ ﴿۵۰﴾
فَانْظُرْ كَيْفَ كَانَ عَاقِبَةُ مَكْرِهِمْ ۙ اَنَّا دَمَّرْنٰهُمْ
وَ قَوْمَهُمْ اَجْمَعِيْنَ ﴿۵۱﴾
فَتِلْكَ بُيُوْتُهُمْ خَاوِيَةً ۢ بِمَا ظَلَمُوْا ؕ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ

49. Estis en la urbo naŭ uloj, kiuj estigis malpacon en la lando, kaj ne volis pliboniĝi.

50. Ili diris: "Ĵuru reciproke per Allah, ke ni atakos Sŭălehon kaj lian familion nokte,, poste ni diros al liaj postvivantoj: "Ni ne ĉeestis al la pereo de lia familio, kaj ni vere estas sinceraj"."

51. Ili faris komploton kaj ankaŭ Ni faris komploton, sed ili ne suspektis tion.

52. Rigardu, kiel finiĝis ilia komploto: Ni detruis ilin kaj ilian tutan popolon!

53. Tiuj estas iliaj domoj, detruitaj pro ilia pekemo. Vere en tio estas signo por popolo scianta.

54. Ni savis la kredantojn kaj la justulojn.

55. Memoru Loton, kiam li diris al sia popolo: "Ĉu vi volas intence fari hontindaĵojn?

56. Ĉu vi volas vere alproksimiĝi volupte al viroj anstataŭ al virinoj? Ne! Vi estas popolo nescianta".

57. Lia popolo tamen nur respondis: "Forpelu la familion de Lot el via urbo, ĉar ili estas homoj, kiuj volas esti puraj".

58. Ni tamen savis lin kaj lian familion krom lia edzino; ŝin Ni lasis inter tiuj, kiuj restis malantaŭe;

59. kaj Ni faligis pluvon sur ilin; malbonega estis la pluvo por la admonitoj!

60. Diru: "Estu laŭdegata Allah, kaj pacon al Liaj servantoj, kiujn Li elektis! Ĉu estas pli bona Allah aŭ tio, kion ili adoras? ".

* Fino de la 19-a parto

لَاٰيَةً لِّقَوْمٍ يَّعْلَمُوْنَ ﴿٥٣﴾

وَاَنْجَيْنَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَكَانُوْا يَتَّقُوْنَ ﴿٥٤﴾

وَلُوْطًا اِذْ قَالَ لِقَوْمِهٖٓ اَتَاْتُوْنَ الْفَاحِشَةَ وَاَنْتُمْ

تُبْصِرُوْنَ ﴿٥٥﴾

اَئِنَّكُمْ لَتَاْتُوْنَ الرِّجَالَ شَهْوَةً مِّنْ دُوْنِ النِّسَآءِ ؕ

بَلْ اَنْتُمْ قَوْمٌ تَجْهَلُوْنَ ﴿٥٦﴾

فَمَا كَانَ جَوَابَ قَوْمِهٖٓ اِلَّآ اَنْ قَالُوْٓا اَخْرِجُوْٓا اٰلَ

لُوْطٍ مِّنْ قَرْيَتِكُمْ ۚ اِنَّهُمْ اُنَاسٌ يَّتَطَهَّرُوْنَ ﴿٥٧﴾

فَاَنْجَيْنٰهُ وَاَهْلَهٗٓ اِلَّا امْرَاَتَهٗ قَدَّرْنٰهَا مِنَ الْغٰبِرِيْنَ ﴿٥٨﴾

وَاَمْطَرْنَا عَلَيْهِمْ مَّطَرًا ۚ فَسَآءَ مَطَرُ الْمُنْذَرِيْنَ ﴿٥٩﴾

قُلِ الْحَمْدُ لِلّٰهِ وَسَلٰمٌ عَلٰى عِبَادِهِ الَّذِيْنَ اصْطَفٰى ؕ

آٰللّٰهُ خَيْرٌ اَمَّا يُشْرِكُوْنَ ﴿٦٠﴾

اَمَّنْ خَلَقَ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ وَاَنْزَلَ لَكُمْ مِّنَ

السَّمَآءِ مَآءً ۚ فَاَنْۢبَتْنَا بِهٖ حَدَآئِقَ ذَاتَ بَهْجَةٍ ۚ

مَا كَانَ لَكُمْ اَنْ تُنْۢبِتُوْا شَجَرَهَا ؕ ءَاِلٰهٌ مَّعَ اللّٰهِ ؕ

بَلْ هُمْ قَوْمٌ يَّعْدِلُوْنَ ﴿٦١﴾

اَمَّنْ جَعَلَ الْاَرْضَ قَرَارًا وَّجَعَلَ خِلٰلَهَآ اَنْهٰرًا

وَّجَعَلَ لَهَا رَوَاسِيَ وَجَعَلَ بَيْنَ الْبَحْرَيْنِ حَاجِزًا ؕ

ءَاِلٰهٌ مَّعَ اللّٰهِ ؕ بَلْ اَكْثَرُهُمْ لَا يَعْلَمُوْنَ ﴿٦٢﴾

اَمَّنْ يُّجِيْبُ الْمُضْطَرَّ اِذَا دَعَاهُ وَيَكْشِفُ السُّوْٓءَ

وَيَجْعَلُكُمْ خُلَفَآءَ الْاَرْضِ ؕ ءَاِلٰهٌ مَّعَ اللّٰهِ ؕ قَلِيْلًا

مَّا تَذَكَّرُوْنَ ﴿٦٣﴾

61. Kiu kreis la ĉielojn kaj la teron kaj sendis akvon al vi el la nuboj, per kiu Ni burĝonigas ĝardenojn en beleco? Vi ne povas kreskigi ĝiajn arbojn. Ĉu tion faris alia Dio kune kun Allah? Ne! Ili estas popolo idolana.

62. Kiu faris la teron ripozejo kaj kondukis tra ĝi riverojn kaj estigis sur ĝi firmajn montojn kaj metis inter la du maroj barilon? Ĉu tion faris alia Dio kune kun Allah? Ne! La plej multaj el ili ne scias tion.

63. Kiu respondas al la subpremita, kiam li vokas Lin, kaj forprenas la malbonon kaj faras vin heredantoj sur la tero? Ĉu tion faras alia Dio kune kun Allah? Malmulte estas, kion vi memoras!

64. Kiu gvidas vin en la mallumego sur la tero kaj sur la maro, kaj kiu sendas la ventojn kiel portantojn de la bona novaĵo de Lia kompato? Ĉu tion faras alia Dio kune kun Allah? Eminenta estas Allah super tio, kion ili aldonas al Li kiel rivalon!

65. Kiu estigas la kreon, poste denove estigas ĝin, kaj kiu provizas vin el la ĉielo kaj el la tero? Ĉu tion faras alia Dio kune kun Allah? Diru: "Alportu vian pruvon, se vi estas veramaj! ".

66. Diru: "Neniu krom Allah konas la Nevideblajojn en la ĉieloj kaj sur la tero, kaj ili ne scias, kiam ili estos vekitaj".

67. Ne! Eraris tute ilia scio pri la vivo venonta. Ne! Pri ĝi ili estas en dubo. Ne! Pri ĝi ili estas blindaj.

68. La miskredantoj diras: "Kiel? Ĉu ni kaj niaj patroj vere revenos, post kiam ni estos fariĝintaj polvo?

69. Vere tio estis promesita antaŭe – al ni kaj al niaj patroj; tio estas ja nur fabeloj de la antikvuloj".

70. Diru: "Vojaĝu sur la tero kaj rigardu, kiel finiĝis la pekuloj! ".

71. Ne ĉagreniĝu pri ili kaj ne estu malgaja, ĉar ili intrigas.

72. Ili diras: "Kiam plenumiĝos tiu promeso, se vi estas sinceraj? ".

73. Diru: "Eble parto de tio, kion vi volus akceli, jam alproksimiĝis al vi".

74. Kaj vere via Sinjoro estas favora al la homoj, sed la plej multaj el ili ne estas dankaj.

75. Via Sinjoro vere bone scias, kion iliaj koroj kaŝas, kaj kion ili malkaŝas.

76. Ne ekzistas sekretoj en la ĉieloj kaj sur la tero, kiuj ne troviĝas jam en klara Libro.

77. Vere ĉi tiu Korano klarigas al la idoj de Izrael la plejmulton el tio, pri kio ili malkonsentas.

78. Kaj ĝi vere estas gvidilo kaj graco por la kredantoj.

79. Vere via Sinjoro decidos inter ili per Sia juĝo. Li estas la Ciopova, la Cioscia.

80. Konfidu do je Allah, ĉar vi posedas la veron evidentan.

81. Vi ne povas aŭdigi la mortintojn kaj vi ne povas igi la surdulojn aŭdi la alvokon, kiam ili turnas siajn dorsojn;

82. kaj vi ne povas gvidi la blindulojn for de ilia erarado. Vi povas nur igi aŭdantaj tiujn, kiuj kredas je Niaj revelacioj kaj submetiĝas.

83. Kiam estos falinta la juĝo kontraŭ ili, Ni estigos el la tero iun, kiu parolos al ili, ĉar la homoj ne kredas al Niaj revelacioj.

أَمَّنْ يَهْدِيكُمْ فِي ظُلُمَاتِ الْبَرِّ وَالْبَحْرِ وَمَنْ يُرْسِلُ
الرِّيَاحَ بُشْرًا بَيْنَ يَدَيْ رَحْمَتِهِ ۗ أَإِلَٰهٌ مَعَ اللَّهِ ۚ
تَعَالَى اللَّهُ عَمَّا يُشْرِكُونَ ﴿٦٣﴾
أَمَّنْ يَبْدَؤُا الْخَلْقَ ثُمَّ يُعِيدُهُ وَمَنْ يَرْزُقُكُمْ
مِنَ السَّمَاءِ وَالْأَرْضِ ۗ أَإِلَٰهٌ مَعَ اللَّهِ ۚ قُلْ هَاتُوا بُرْهَانَكُمْ
إِنْ كُنْتُمْ صَادِقِينَ ﴿٦٤﴾
قُلْ لَا يَعْلَمُ مَنْ فِي السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ الْغَيْبَ
إِلَّا اللَّهُ ۚ وَمَا يَشْعُرُونَ أَيَّانَ يُبْعَثُونَ ﴿٦٥﴾
بَلِ ادَّارَكَ عِلْمُهُمْ فِي الْآخِرَةِ ۚ بَلْ هُمْ فِي شَكٍّ
مِنْهَا ۖ بَلْ هُمْ مِنْهَا عَمُونَ ﴿٦٦﴾
وَقَالَ الَّذِينَ كَفَرُوا أَإِذَا كُنَّا تُرَابًا وَآبَاؤُنَا أَئِنَّا
لَمُخْرَجُونَ ﴿٦٧﴾
لَقَدْ وُعِدْنَا هَٰذَا نَحْنُ وَآبَاؤُنَا مِنْ قَبْلُ ۖ إِنْ
هَٰذَا إِلَّا أَسَاطِيرُ الْأَوَّلِينَ ﴿٦٨﴾
قُلْ سِيرُوا فِي الْأَرْضِ فَانْظُرُوا كَيْفَ كَانَ عَاقِبَةُ
الْمُجْرِمِينَ ﴿٦٩﴾
وَلَا تَحْزَنْ عَلَيْهِمْ وَلَا تَكُنْ فِي ضَيْقٍ مِمَّا يَمْكُرُونَ ﴿٧٠﴾
وَيَقُولُونَ مَتَىٰ هَٰذَا الْوَعْدُ إِنْ كُنْتُمْ صَادِقِينَ ﴿٧١﴾
قُلْ عَسَىٰ أَنْ يَكُونَ رَدِفَ لَكُمْ بَعْضُ الَّذِي
تَسْتَعْجِلُونَ ﴿٧٢﴾
وَإِنَّ رَبَّكَ لَذُو فَضْلٍ عَلَى النَّاسِ وَلَٰكِنَّ أَكْثَرَهُمْ
لَا يَشْكُرُونَ ﴿٧٣﴾

وَإِنَّ رَبَّكَ لَيَعْلَمُ مَا تُكِنُّ صُدُورُهُمْ وَمَا يُعْلِنُونَ ﴿٧٤﴾

وَمَا مِنْ غَائِبَةٍ فِي السَّمَاءِ وَالْأَرْضِ إِلَّا فِي كِتَابٍ

مُبِينٍ ﴿٧٥﴾

إِنَّ هَٰذَا الْقُرْآنَ يَقُصُّ عَلَىٰ بَنِي إِسْرَائِيلَ أَكْثَرَ

الَّذِي هُمْ فِيهِ يَخْتَلِفُونَ ﴿٧٦﴾

وَإِنَّهُ لَهُدًى وَرَحْمَةٌ لِلْمُؤْمِنِينَ ﴿٧٧﴾

إِنَّ رَبَّكَ يَقْضِي بَيْنَهُمْ بِحُكْمِهِ ۚ وَهُوَ الْعَزِيزُ

الْعَلِيمُ ﴿٧٨﴾

فَتَوَكَّلْ عَلَى اللَّهِ ۖ إِنَّكَ عَلَى الْحَقِّ الْمُبِينِ ﴿٧٩﴾

إِنَّكَ لَا تُسْمِعُ الْمَوْتَىٰ وَلَا تُسْمِعُ الصُّمَّ الدُّعَاءَ إِذَا

وَلَّوْا مُدْبِرِينَ ﴿٨٠﴾

وَمَا أَنْتَ بِهَادِي الْعُمْيِ عَنْ ضَلَالَتِهِمْ ۖ إِنْ تُسْمِعُ

إِلَّا مَنْ يُؤْمِنُ بِآيَاتِنَا فَهُمْ مُسْلِمُونَ ﴿٨١﴾

وَإِذَا وَقَعَ الْقَوْلُ عَلَيْهِمْ أَخْرَجْنَا لَهُمْ دَابَّةً مِنَ

الْأَرْضِ تُكَلِّمُهُمْ أَنَّ النَّاسَ كَانُوا بِآيَاتِنَا

لَا يُوقِنُونَ ﴿٨٢﴾

وَيَوْمَ نَحْشُرُ مِنْ كُلِّ أُمَّةٍ فَوْجًا مِمَّنْ يُكَذِّبُ بِآيَاتِنَا

فَهُمْ يُوزَعُونَ ﴿٨٣﴾

حَتَّىٰ إِذَا جَاءُوا قَالَ أَكَذَّبْتُمْ بِآيَاتِي وَلَمْ تُحِيطُوا بِهَا

عِلْمًا أَمَّاذَا كُنْتُمْ تَعْمَلُونَ ﴿٨٤﴾

وَوَقَعَ الْقَوْلُ عَلَيْهِمْ بِمَا ظَلَمُوا فَهُمْ لَا يَنْطِقُونَ ﴿٨٥﴾

أَلَمْ يَرَوْا أَنَّا جَعَلْنَا اللَّيْلَ لِيَسْكُنُوا فِيهِ وَالنَّهَارَ

84. Admonu ilin pri la tago, en kiu Ni kunvenigos el ĉiu popolo grupon de tiuj, kiuj rifuzis Niajn signojn, kaj ili marŝos malkune

85. ĝis, post ilia alveno, Li diros: "Ĉu vi rifuzis Miajn signojn, kvankam vi ne komprenis ilin per via scio? Kio estas tio, kion vi faris? ".

86. La jugo falos kontraŭ ili pro iliaj pekoj, kaj ili ne parolos.

87. Ĉu ili ne vidis, ke Ni kreis la nokton, por ke ili ripozu en ĝi, kaj la tagon por vidi? Vere en tio estas signoj por popolo kredanta.

88. En la tago, en kiu estos blovite en la trumpeton, la teruro frapos ĉiun, kiu estas en la ĉieloj, kaj ĉiun, kiu estas sur la tero, krom tiu, kiun Allah volas. Ĉiuj venos humile al Li.

89. Vi vidas la montojn – vi opinias ilin firmaj, tamen ili movigas kiel la movado de la nuboj: tio estas verko de Allah, kiu kreis ĉion. Vere Li bone scias, kion vi faras.

90. Kiu faras bonon, tiu ricevos eĉ pli bonajn afojn ol tiujn ĉi; kaj ili estos sekuraj, en tiu tago, kontraŭ la teruro.

91. Kiu tamen faras malbonon, tiu estos jetita sur sian vizagon en la fajron: "Ĉu vi ne estas rekompencitaj laŭ tio, kion vi faris? ".

92. "Vere al mi estas ordonite servi nur la Sinjoron de ĉi tiu urbo, kiun Li sanktigis, kaj al Li apartenas ĉio; kaj al mi estas ordonite esti unu el la submetigantoj,

93. kaj proklami la Koranon". Kiu do sekvas la rektan vojon, tiu faras tion por sia propra animo. Al tiu tamen, kiu eraradas, vi diru: "Vere mi estas nur admonanto".

مُبْصِرًا ۭ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّقَوْمٍ يُّؤْمِنُوْنَ ۝۸۶

وَيَوْمَ يُنْفَخُ فِي الصُّوْرِ فَفَزِعَ مَنْ فِي السَّمٰوٰتِ وَ

مَنْ فِي الْاَرْضِ اِلَّا مَنْ شَاۗءَ اللّٰهُ ۭ وَكُلٌّ اَتَوْهُ دٰخِرِيْنَ ۝۸۷

وَتَرَى الْجِبَالَ تَحْسَبُهَا جَامِدَةً وَّهِيَ تَمُرُّ مَرَّ

السَّحَابِ ۭ صُنْعَ اللّٰهِ الَّذِيْٓ اَتْقَنَ كُلَّ شَيْءٍ ۭ اِنَّهٗ خَبِيْرٌۢ

بِمَا تَفْعَلُوْنَ ۝۸۸

مَنْ جَاۗءَ بِالْحَسَنَةِ فَلَهٗ خَيْرٌ مِّنْهَا ۚ وَهُمْ مِّنْ فَزَعٍ

يَّوْمَىِٕذٍ اٰمِنُوْنَ ۝۸۹

وَمَنْ جَاۗءَ بِالسَّيِّئَةِ فَكُبَّتْ وُجُوْهُهُمْ فِي النَّارِ ۭ هَلْ

تُجْزَوْنَ اِلَّا مَا كُنْتُمْ تَعْمَلُوْنَ ۝۹۰

اِنَّمَآ اُمِرْتُ اَنْ اَعْبُدَ رَبَّ هٰذِهِ الْبَلْدَةِ الَّذِيْ

حَرَّمَهَا وَلَهٗ كُلُّ شَيْءٍ ۡ وَّاُمِرْتُ اَنْ اَكُوْنَ مِنَ الْمُسْلِمِيْنَ ۝۹۱

وَاَنْ اَتْلُوَا الْقُرْاٰنَ ۚ فَمَنِ اهْتَدٰى فَاِنَّمَا يَهْتَدِيْ

لِنَفْسِهٖ ۚ وَمَنْ ضَلَّ فَقُلْ اِنَّمَآ اَنَا مِنَ

الْمُنْذِرِيْنَ ۝۹۲

وَقُلِ الْحَمْدُ لِلّٰهِ سَيُرِيْكُمْ اٰيٰتِهٖ فَتَعْرِفُوْنَهَا ۭ وَمَا

رَبُّكَ بِغَافِلٍ عَمَّا تَعْمَلُوْنَ ۝۹۳

94. Diru: "Estu laŭdegata Allah; Li montros al vi Siajn signojn kaj vi rekonos ilin. Via Sinjoro ne ignoras, kion vi faras".

سُوْرَةُ الْقَصَصِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

طٰسٓمٓ ②

تِلْكَ اٰيٰتُ الْكِتٰبِ الْمُبِيْنِ ③

نَتْلُوْا عَلَيْكَ مِنْ نَّبَاِ مُوْسٰى وَفِرْعَوْنَ بِالْحَقِّ
لِقَوْمٍ يُّؤْمِنُوْنَ ④

اِنَّ فِرْعَوْنَ عَلَا فِى الْاَرْضِ وَجَعَلَ اَهْلَهَا شِيَعًا
يَّسْتَضْعِفُ طَآئِفَةً مِّنْهُمْ يُذَبِّحُ اَبْنَآءَهُمْ وَيَسْتَحْىٖ
نِسَآءَهُمْ ؕ اِنَّهٗ كَانَ مِنَ الْمُفْسِدِيْنَ ⑤

وَنُرِيْدُ اَنْ نَّمُنَّ عَلَى الَّذِيْنَ اسْتُضْعِفُوْا فِى الْاَرْضِ
وَنَجْعَلَهُمْ اَئِمَّةً وَّنَجْعَلَهُمُ الْوٰرِثِيْنَ ⑥

وَنُمَكِّنَ لَهُمْ فِى الْاَرْضِ وَنُرِىَ فِرْعَوْنَ وَهَامٰنَ
وَجُنُوْدَهُمَا مِنْهُمْ مَّا كَانُوْا يَحْذَرُوْنَ ⑦

وَاَوْحَيْنَآ اِلٰٓى اُمِّ مُوْسٰٓى اَنْ اَرْضِعِيْهِ ۚ فَاِذَا خِفْتِ
عَلَيْهِ فَاَلْقِيْهِ فِى الْيَمِّ وَلَا تَخَافِىْ وَلَا تَحْزَنِىْ ۚ اِنَّا
رَآدُّوْهُ اِلَيْكِ وَجَاعِلُوْهُ مِنَ الْمُرْسَلِيْنَ ⑧

فَالْتَقَطَهٗٓ اٰلُ فِرْعَوْنَ لِيَكُوْنَ لَهُمْ عَدُوًّا وَّحَزَنًا ؕ
اِنَّ فِرْعَوْنَ وَهَامٰنَ وَجُنُوْدَهُمَا كَانُوْا خٰطِئِيْنَ ⑨

وَقَالَتِ امْرَاَتُ فِرْعَوْنَ قُرَّتُ عَيْنٍ لِّىْ وَلَكَ ؕ لَا
تَقْتُلُوْهُ ۖ عَسٰٓى اَنْ يَّنْفَعَنَآ اَوْ نَتَّخِذَهٗ وَلَدًا وَّهُمْ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Tŭă Sĭn Mĭm.**

3. Jen la versoj de la klara Libro.

4. Ni volas proklami al vi ion el la historio de Moseo kaj de Faraono, laŭvere, por popolo kredanta.

5. Vere Faraono kondutis fierege en la lando kaj dividis la popolon en grupojn; parton de ĝi li klopodis malfortigi, mortigante iliajn idojn kaj kaptante iliajn virinojn. Li vere estis malpacemulo.

6. Ni tamen volis kompati al tiuj, kiuj estis rigardataj kiel malfortaj kaj fari ilin estroj kaj fari ilin heredantoj,

7. kaj establi ilin en la lando, kaj igi ilin montri al Faraono kaj al Hâmân kaj al iliaj trupoj tion, kion ili timis.

8. Ni revelaciis al la patrino de Moseo: "Nutru lin, kaj kiam vi timos por li, ĵetu lin en la riveron, kaj ne timu plu kaj ne ĉagreniĝu; Ni redonos lin al vi kaj faros lin unu el la senditoj".

9. La familio de Faraono kolektis lin, por ke li fariĝu ilia malamiko kaj ilia ĉagreno; vere Faraono kaj Hâmân kaj iliaj trupoj estis malbonfarantoj.

10. La edzino de Faraono diris: "Ĝojo por la okuloj por mi kaj por vi! Ne mortigu

* v. la verson 26an

** Puriganta, Ĉioaŭda, Ĉioscia!

لَا يَشْعُرُوْنَ ⑩

lin! Eble li estos utila al ni aŭ ni prenos lin kiel filon". Ili tamen ne antaŭsentis ion ajn.

وَ اَصْبَحَ فُؤَادُ اُمِّ مُوْسٰى فٰرِغًا ؕ اِنْ كَادَتْ لَتُبْدِيْ
بِهٖ لَوْلَاۤ اَنْ رَّبَطْنَا عَلٰى قَلْبِهَا لِتَكُوْنَ مِنَ الْمُؤْمِنِيْنَ ⑪

11. Senŝarĝiĝis la koro de la patrino de Moseo; ŝi preskaŭ estus malkaŝinta lian identecon, se Ni ne estus fortikiginta ŝian koron, por ke ŝi estu kredantino.

وَ قَالَتْ لِاُخْتِهٖ قُصِّيْهِ ۚ فَبَصُرَتْ بِهٖ عَنْ جُنُبٍ وَّ هُمْ
لَا يَشْعُرُوْنَ ⑫

12. Ŝi diris al lia fratino: "Sekvu lin! ", kaj ŝi observis lin el malproksime, kaj ili ne suspektis ion ajn.

وَ حَرَّمْنَا عَلَيْهِ الْمَرَاضِعَ مِنْ قَبْلُ فَقَالَتْ هَلْ اَدُلُّكُمْ
عَلٰۤى اَهْلِ بَيْتٍ يَّكْفُلُوْنَهٗ لَكُمْ وَ هُمْ لَهٗ نٰصِحُوْنَ ⑬

13. Antaŭe Ni jam malpermesis la nutristinojn, kaj tiam diris la fratino: "Ĉu mi devas montri al vi familion, kie oni vartos lin por vi, kaj kiuj bone zorgos pri li? ".

فَرَدَدْنٰهُ اِلٰۤى اُمِّهٖ كَيْ تَقَرَّ عَيْنُهَا وَ لَا تَحْزَنَ وَ لِتَعْلَمَ
اَنَّ وَعْدَ اللّٰهِ حَقٌّ وَّ لٰكِنَّ اَكْثَرَهُمْ لَا يَعْلَمُوْنَ ⑬ ع

14. Tiel Ni redonis lin al lia patrino, por ke refreŝiĝu ŝiaj okuloj kaj ŝi ne afliktiĝu kaj sciu, ke la promeso de Allah estas vera. La plej multaj el ili tamen ne scias tion.

وَ لَمَّا بَلَغَ اَشُدَّهٗ وَ اسْتَوٰۤى اٰتَيْنٰهُ حُكْمًا وَّ عِلْمًا ؕ
وَ كَذٰلِكَ نَجْزِي الْمُحْسِنِيْنَ ⑭

وَ دَخَلَ الْمَدِيْنَةَ عَلٰى حِيْنِ غَفْلَةٍ مِّنْ اَهْلِهَا
فَوَجَدَ فِيْهَا رَجُلَيْنِ يَقْتَتِلٰنِ ۖ هٰذَا مِنْ شِيْعَتِهٖ
وَ هٰذَا مِنْ عَدُوِّهٖ ۚ فَاسْتَغَاثَهُ الَّذِيْ مِنْ شِيْعَتِهٖ
عَلَى الَّذِيْ مِنْ عَدُوِّهٖ ۙ فَوَكَزَهٗ مُوْسٰى فَقَضٰى عَلَيْهِ ۫
قَالَ هٰذَا مِنْ عَمَلِ الشَّيْطٰنِ ؕ اِنَّهٗ عَدُوٌّ مُّضِلٌّ مُّبِيْنٌ ⑮

15. Kiam li atingis la plenaĝecon kaj fariĝis matura, Ni donis al li la saĝon kaj la veran scion; tiel Ni rekompencas la bonfarantojn.

16. Li eniris la urbon je tempo, kiam ĝiaj loĝantoj ne priatentis, kaj li trovis en ĝi du virojn, kiuj batalis unu kontraŭ la alia, unu el lia partio kaj la alia el liaj malamikoj. Tiu, kiu estis de lia partio, vokis lin, por ke li helpu lin kontraŭ tiu de la partio malamika; tiel Moseo pugnobatis lin, sed tio kaŭzis ties morton. Li diris: "Tio ĉi estas faro de Satano: li vere estas malamiko, evidenta delogisto".

قَالَ رَبِّ اِنِّيْ ظَلَمْتُ نَفْسِيْ فَاغْفِرْ لِيْ فَغَفَرَ لَهٗ ؕ
اِنَّهٗ هُوَ الْغَفُوْرُ الرَّحِيْمُ ⑯

17. Li diris: "Mia Sinjoro, mi vere pekis kontraŭ mia propra animo, do pardonu al mi". Li do pardonis al li. Vere Li estas la Senkulpigema, la Pardonema.

قَالَ رَبِّ بِمَاۤ اَنْعَمْتَ عَلَيَّ فَلَنْ اَكُوْنَ ظَهِيْرًا
لِّلْمُجْرِمِيْنَ ⑰

18. Li diris: "Mia Sinjoro, ĉar Vi kompatis al mi, mi neniam pli volas esti helpanto de la pekuloj".

فَاَصْبَحَ فِي الْمَدِيْنَةِ خَآئِفًا يَّتَرَقَّبُ فَاِذَا الَّذِي
اسْتَنْصَرَهٗ بِالْاَمْسِ يَسْتَصْرِخُهٗ ؕ قَالَ لَهٗ مُوْسٰۤى

إِنَّكَ لَغَوِيٌّ مُّبِينٌ ﴿١٨﴾

19. Tiam li fariĝis, en la urbo, timanta kaj singarda kaj jen, tiu, kiu la antaŭan tagon petis lian helpon, ankoraŭfoje alvokis lin, por ke li helpu. Tiam diris al li Moseo: "Vere vi estas eraranto evidenta".

فَلَمَّآ أَنْ أَرَادَ أَنْ يَبْطِشَ بِالَّذِي هُوَ عَدُوٌّ لَّهُمَا
قَالَ يَٰمُوسَىٰٓ أَتُرِيدُ أَنْ تَقْتُلَنِي كَمَا قَتَلْتَ نَفْسًۢا
بِالْأَمْسِ ۖ إِن تُرِيدُ إِلَّآ أَن تَكُونَ جَبَّارًا فِي الْأَرْضِ
وَمَا تُرِيدُ أَن تَكُونَ مِنَ الْمُصْلِحِينَ ﴿١٩﴾

20. Kiam li volis ekkapti tiun, kiu estis malamiko de ili ambaŭ, diris tiu ĉi: "Ho Moseo, ĉu vi volas mortigi min, kiel vi mortigis tiun hieraŭ? Vi volas nur fariĝi tirano en la lando, kaj vi ne volas fariĝi pacemulo".

وَجَآءَ رَجُلٌ مِّنْ أَقْصَا ٱلْمَدِينَةِ يَسْعَىٰ قَالَ يَٰمُوسَىٰٓ
إِنَّ ٱلْمَلَأَ يَأْتَمِرُونَ بِكَ لِيَقْتُلُوكَ فَٱخْرُجْ إِنِّي لَكَ
مِنَ ٱلنَّٰصِحِينَ ﴿٢٠﴾

21. Tiam alvenis kurante viro el la parto plej malproksima de la urbo, kaj diris: "Ho Moseo, la estroj konsiliĝas inter si pri vi por mortigi vin. Fuĝu do, mi vere estas nur via konsilanto".

فَخَرَجَ مِنْهَا خَآئِفًا يَتَرَقَّبُ ۖ قَالَ رَبِّ نَجِّنِي مِنَ
ٱلْقَوْمِ ٱلظَّٰلِمِينَ ﴿٢١﴾ ع ٤

22. Li do fuĝis de tie, timante, singarda. Li diris: "Mia Sinjoro, savu min de la popolo malpiega".

وَلَمَّا تَوَجَّهَ تِلْقَآءَ مَدْيَنَ قَالَ عَسَىٰ رَبِّيٓ أَن
يَهْدِيَنِي سَوَآءَ ٱلسَّبِيلِ ﴿٢٢﴾

23. Kiam li turnis sin al Madjan, li diris: "Mi esperas, ke mia Sinjoro gvidos min al la rekta vojo".

وَلَمَّا وَرَدَ مَآءَ مَدْيَنَ وَجَدَ عَلَيْهِ أُمَّةً مِّنَ
ٱلنَّاسِ يَسْقُونَ ۖ وَوَجَدَ مِن دُونِهِمُ ٱمْرَأَتَيْنِ
تَذُودَانِ ۖ قَالَ مَا خَطْبُكُمَا ۖ قَالَتَا لَا نَسْقِي حَتَّىٰ
يُصْدِرَ ٱلرِّعَآءُ ۖ وَأَبُونَا شَيْخٌ كَبِيرٌ ﴿٢٣﴾

24. Kaj kiam li alvenis al la akvo de Madjan, li trovis apud ĝi homamason, kiu trinkigis siajn gregojn, kaj ĉe ili li trovis du virinojn, kiuj haltigis sian gregon malproksime. Li demandis: "Kio estas pri vi? ". Ili respondis: "Ni ne trinkigos, antaŭ ol la paŝtistoj estos forpelintaj siajn gregojn. Nia patro estas maljunulo, grandaĝa".

فَسَقَىٰ لَهُمَا ثُمَّ تَوَلَّىٰٓ إِلَى ٱلظِّلِّ فَقَالَ رَبِّ إِنِّي لِمَآ
أَنزَلْتَ إِلَيَّ مِنْ خَيْرٍ فَقِيرٌ ﴿٢٤﴾

25. Li tiam trinkigis por ili, poste li foriris en ombron kaj diris: "Mia Sinjoro, mi certe bezonas ĉion bonan, kion vi sendis al mi".

فَجَآءَتْهُ إِحْدَىٰهُمَا تَمْشِي عَلَى ٱسْتِحْيَآءٍ ۖ قَالَتْ إِنَّ
أَبِي يَدْعُوكَ لِيَجْزِيَكَ أَجْرَ مَا سَقَيْتَ لَنَا ۚ فَلَمَّا
جَآءَهُ وَقَصَّ عَلَيْهِ ٱلْقَصَصَ ۙ قَالَ لَا تَخَفْ ۖ نَجَوْتَ
مِنَ ٱلْقَوْمِ ٱلظَّٰلِمِينَ ﴿٢٥﴾

26. Tiam venis al li unu el la du virinoj, modeste, kaj diris: "Mia patro vokas vin por doni al vi la rekompencon, ĉar vi trinkigis por ni". Kiam li venis al ilia patro kaj rakontis al li la historion, tiu diris: "Ne timu, vi fuĝis de popolo malpiega".

قَالَتْ إِحْدٰىهُمَا يٰٓأَبَتِ اسْتَـْٔجِرْهُ ۖ إِنَّ خَيْرَ مَنِ
اسْتَـْٔجَرْتَ الْقَوِيُّ الْأَمِينُ ﴿٢٦﴾

27. Diris unu el la du virinoj: "Ho mia patro, dungu lin, ĉar la plej bona viro, kiun vi povas dungi, estas tiu, kiu estas forta, honesta".

قَالَ إِنِّيٓ أُرِيدُ أَنْ أُنكِحَكَ إِحْدَى ابْنَتَيَّ هَاتَيْنِ
عَلٰٓى أَن تَأْجُرَنِي ثَمٰنِيَ حِجَجٍ ۖ فَإِنْ أَتْمَمْتَ عَشْرًا
فَمِنْ عِندِكَ ۖ وَمَآ أُرِيدُ أَنْ أَشُقَّ عَلَيْكَ ۚ سَتَجِدُنِيٓ
إِن شَآءَ اللَّهُ مِنَ الصَّٰلِحِينَ ﴿٢٧﴾

28. Li diris: "Mi deziras doni al vi unu el ĉi tiuj miaj filinoj kiel edzinon, se vi promesas servi min ok jarojn; se vi poste plenumos dek, tio estos via decido; mi tamen ne deziras perforti vin: vi trovos min, se Allah volas, justulo".

قَالَ ذٰلِكَ بَيْنِي وَبَيْنَكَ ۖ أَيَّمَا الْأَجَلَيْنِ قَضَيْتُ فَلَا
عُدْوَانَ عَلَيَّ ۖ وَاللَّهُ عَلٰى مَا نَقُولُ وَكِيلٌ ﴿٢٨﴾

29. Li respondis: "Tiel estu konsentite inter mi kaj vi. Kiun ajn el la du tempolimoj mi plenumos, ne trafos min riproĉo. Allah estu atestanto pri tio, kion ni diras".

فَلَمَّا قَضٰى مُوسَى الْأَجَلَ وَسَارَ بِأَهْلِهِۦٓ ءَانَسَ مِن
جَانِبِ الطُّورِ نَارًا ۖ قَالَ لِأَهْلِهِ امْكُثُوٓا إِنِّيٓ ءَانَسْتُ
نَارًا لَّعَلِّيٓ ءَاتِيكُم مِّنْهَا بِخَبَرٍ أَوْ جَذْوَةٍ مِّنَ النَّارِ
لَعَلَّكُمْ تَصْطَلُونَ ﴿٢٩﴾

30. Kiam nun Moseo plenumis sian tempon kaj forvojaĝis kun sia familio, li rimarkis fajron en la direkto de iu monto. Li diris al sia familio: "Restu malantaŭe, mi vere rimarkis fajron, eble mi portos al vi novaĵon aŭ fajregon, el la fajro, por ke vi varmiĝu".

فَلَمَّآ أَتٰىهَا نُودِيَ مِن شَاطِئِ الْوَادِ الْأَيْمَنِ فِي الْبُقْعَةِ
الْمُبٰرَكَةِ مِنَ الشَّجَرَةِ أَن يٰمُوسَىٰٓ إِنِّيٓ أَنَا اللَّهُ رَبُّ
الْعٰلَمِينَ ﴿٣٠﴾

31. Kiam li alvenis al ĝi, li estis vokita el la dekstra flanko de la valo, ĉe la benata loko, el la arbo: "Ho Moseo, vere Mi estas Allah, la Sinjoro de l' Universo.

وَأَنْ أَلْقِ عَصَاكَ ۖ فَلَمَّا رَءَاهَا تَهْتَزُّ كَأَنَّهَا جَآنٌّ وَلّٰى
مُدْبِرًا وَلَمْ يُعَقِّبْ ۚ يٰمُوسَىٰٓ أَقْبِلْ وَلَا تَخَفْ ۖ إِنَّكَ
مِنَ الْءَامِنِينَ ﴿٣١﴾

32. Ĵetu vian bastonon". Kiam li vidis ĝin moviĝi, kvazaŭ ĝi estus serpento, tiam li turnis sin por fuĝi kaj ne plu rigardis malantaŭen: "Ho Moseo, alproksimiĝu kaj ne timu, vi certe estas sekura.

اسْلُكْ يَدَكَ فِي جَيْبِكَ تَخْرُجْ بَيْضَآءَ مِنْ غَيْرِ سُوٓءٍ ۖ
وَاضْمُمْ إِلَيْكَ جَنَاحَكَ مِنَ الرَّهْبِ ۖ فَذٰنِكَ بُرْهَانَانِ
مِن رَّبِّكَ إِلٰى فِرْعَوْنَ وَمَلَإِيْهِ ۚ إِنَّهُمْ كَانُوا قَوْمًا
فٰسِقِينَ ﴿٣٢﴾

33. Metu vian manon en vian bruston, vi eltiros ĝin blanka, sen makulo. Retiru vian brakon al vi sen timo. Tiuj ĉi estas du pruvoj de via Sinjoro por Faraono kaj liaj estroj, ĉar ili estas popolo pekema".

قَالَ رَبِّ إِنِّي قَتَلْتُ مِنْهُمْ نَفْسًا فَأَخَافُ أَن يَقْتُلُونِ

34. Li diris: "Mia Sinjoro, mi mortigis unu el ili kaj mi timas, ke ili mortigos min.

قَالَ رَبِّ إِنِّي قَتَلْتُ مِنْهُمْ نَفْسًا فَأَخَافُ أَنْ
يَقْتُلُونِ ﴿٣٣﴾

35. Mia frato Aaron estas pli elokventa ol mi per sia langoj, do sendu lin kun mi kiel helpanton, por ke li apogu min, ĉar mi timas, ke ili kulpigos min je mensogo".

وَأَخِي هَارُونُ هُوَ أَفْصَحُ مِنِّي لِسَانًا فَأَرْسِلْهُ مَعِيَ
رِدْءًا يُصَدِّقُنِي إِنِّي أَخَافُ أَنْ يُكَذِّبُونِ ﴿٣٤﴾

36. Li diris: "Ni volas plifortigi vian brakon per via frato kaj Ni donos al vi ambaŭ la povon, tiel ke ili ne atingos vin. Iru do kun Niaj signoj; vi ambaŭ kaj tiuj, kiuj estas kun vi, estos la venkantoj".

قَالَ سَنَشُدُّ عَضُدَكَ بِأَخِيكَ وَنَجْعَلُ لَكُمَا سُلْطَانًا
فَلَا يَصِلُونَ إِلَيْكُمَا ۚ بِآيَاتِنَا ۚ أَنْتُمَا وَمَنِ اتَّبَعَكُمَا
الْغَالِبُونَ ﴿٣٥﴾

37. Kiam Moseo venis al ili kun Niaj klaraj signoj, ili diris: "Kio alia estas tio, ol magia trompo? Ni ne aŭdis de niaj prapatroj ion similan".

فَلَمَّا جَاءَهُمْ مُوسَىٰ بِآيَاتِنَا بَيِّنَاتٍ قَالُوا مَا هَٰذَا
إِلَّا سِحْرٌ مُفْتَرًى وَمَا سَمِعْنَا بِهَٰذَا فِي آبَائِنَا
الْأَوَّلِينَ ﴿٣٦﴾

38. Diris Moseo: "Mia Sinjoro scias, kiu alportis la gvidadon de Li, kaj kiu ricevos la rekompencon de la loĝejo eterna; vere la malpieguloj ne sukcesos".

وَقَالَ مُوسَىٰ رَبِّي أَعْلَمُ بِمَنْ جَاءَ بِالْهُدَىٰ مِنْ
عِنْدِهِ وَمَنْ تَكُونُ لَهُ عَاقِبَةُ الدَّارِ ۖ إِنَّهُ لَا يُفْلِحُ
الظَّالِمُونَ ﴿٣٧﴾

39. Diris Faraono: "Ho vi, estroj, mi ne konas alian Dion por vi ol Min mem; tial baku por mi, ho Hāmān, brikojn el argilo kaj konstruu por mi turon, por ke mi vidu la Dion de Moseo; mi volas ekscii, ĉu mi devas kredi, ke li estas mensogulo".

وَقَالَ فِرْعَوْنُ يَا أَيُّهَا الْمَلَأُ مَا عَلِمْتُ لَكُمْ مِنْ
إِلَٰهٍ غَيْرِي ۖ فَأَوْقِدْ لِي يَا هَامَانُ عَلَى الطِّينِ فَاجْعَلْ
لِي صَرْحًا لَعَلِّي أَطَّلِعُ إِلَىٰ إِلَٰهِ مُوسَىٰ وَإِنِّي لَأَظُنُّهُ
مِنَ الْكَاذِبِينَ ﴿٣٨﴾

40. Li kaj liaj trupoj kondutis fierege en la lando, maljuste, kaj ili imagis, ke ili ne revenos al Ni.

وَاسْتَكْبَرَ هُوَ وَجُنُودُهُ فِي الْأَرْضِ بِغَيْرِ الْحَقِّ وَ
ظَنُّوا أَنَّهُمْ إِلَيْنَا لَا يُرْجَعُونَ ﴿٣٩﴾

41. Ni tiam ekkaptis lin kaj liajn trupojn kaj ĵetis lin en la mezon de la maro. Vidu do, kiel estas la fino de la malpieguloj!

فَأَخَذْنَاهُ وَجُنُودَهُ فَنَبَذْنَاهُمْ فِي الْيَمِّ ۖ فَانْظُرْ
كَيْفَ كَانَ عَاقِبَةُ الظَّالِمِينَ ﴿٤٠﴾

42. Ni faris ilin gvidantoj, kiuj vokas la homojn al la fajro, kaj en la tago de la reviviĝo ili ne trovos iun ajn helpanton.

وَجَعَلْنَاهُمْ أَئِمَّةً يَدْعُونَ إِلَى النَّارِ ۖ وَيَوْمَ الْقِيَامَةِ

43. Ni trafis ilin per malbeno en ĉi tiu vivo kaj en la tago de la reviviĝo ili estos inter la abomenatoj.

44. Ni vere donis al Moseo la Libron, post kiam Ni neniigis la antaŭajn generaciojn, kiel ilon por la instruo de la homaro kaj gvidilon kaj favoron, por ke ili estu admonataj.

45. Vi ne estis je la dekstra flanko, kiam Ni donis al Moseo la taskon, kaj vi ankaŭ ne estis inter la ĉeestantoj.

46. Ni tamen estigis generaciojn kaj ili vivis tre longe; kaj vi ne estis inter la popolo de Madjan por proklami al ili Niajn revelaciojn, Ni tamen sendis senditojn.

47. Vi ankaŭ ne estis sur la flanko de la monto, kiam Ni vokis. Ni tamen sendis vin kiel favoron de via Sinjoro, por ke vi admonu popolon, al kiu ne venis admonanto antaŭ vi por ke ili estu admonataj.

48. Ni ne estus sendinta vin, se ne estus, ke ili, kiam malfeliĉo trafas ilin pro tio, kion faris iliaj manoj, diras: "Ho nia Sinjoro, kial vi ne sendis al ni senditon, tiel ke ni povus sekvi Viajn revelaciojn kaj esti kredantoj? "

49. kiam tamen venis al ili la vero de Ni, ili diris: "Kial ne estas donita al li la samo kiel al Moseo? ". Ĉu ili do ne rifuzis jam tion, kio estis donita al Moseo antaŭe? . Tiam ili diris: "Du magioj, kiuj subtenas unu la alian" kaj tiam ili diris: "Ni rifuzas ambaŭ".

50. Diru: "Alportu do Libron de Allah, kiu estu pli bona gvidilo ol ĉi tiuj du*, por ke mi sekvu ĝin, se vi estas sinceraj".

51. Se ili tamen ne respondas al vi, tiam sciu, ke ili nur sekvas siajn malbonajn pasiojn. Kiu do estas pli eraranta ol tiu, kiu sekvas siajn pasiojn sen la gvidado de Allah? Vere Allah ne gvidas la popolon malpiegan.

لَا يُنْصَرُوْنَ ﴿٤٤﴾

وَاَتْبَعْنٰهُمْ فِيْ هٰذِهِ الدُّنْيَا لَعْنَةً ۚ وَيَوْمَ الْقِيٰمَةِ هُمْ
مِّنَ الْمَقْبُوْحِيْنَ ﴿٤٢﴾ ع

وَلَقَدْ اٰتَيْنَا مُوْسَى الْكِتٰبَ مِنْۢ بَعْدِ مَآ اَهْلَكْنَا الْقُرُوْنَ
الْاُوْلٰى بَصَآئِرَ لِلنَّاسِ وَهُدًى وَّرَحْمَةً لَّعَلَّهُمْ
يَتَذَكَّرُوْنَ ﴿٤٣﴾

وَمَا كُنْتَ بِجَانِبِ الْغَرْبِيِّ اِذْ قَضَيْنَآ اِلٰى مُوْسَى
الْاَمْرَ وَمَا كُنْتَ مِنَ الشّٰهِدِيْنَ ﴿٤٤﴾

وَلٰكِنَّآ اَنْشَاْنَا قُرُوْنًا فَتَطَاوَلَ عَلَيْهِمُ الْعُمُرُ ۚ وَمَا
كُنْتَ ثَاوِيًا فِيْٓ اَهْلِ مَدْيَنَ تَتْلُوْا عَلَيْهِمْ اٰيٰتِنَا ۙ
وَلٰكِنَّا كُنَّا مُرْسِلِيْنَ ﴿٤٥﴾

وَمَا كُنْتَ بِجَانِبِ الطُّوْرِ اِذْ نَادَيْنَا وَلٰكِنْ رَّحْمَةً
مِّنْ رَّبِّكَ لِتُنْذِرَ قَوْمًا مَّآ اَتٰىهُمْ مِّنْ نَّذِيْرٍ
مِّنْ قَبْلِكَ لَعَلَّهُمْ يَتَذَكَّرُوْنَ ﴿٤٦﴾

وَلَوْلَآ اَنْ تُصِيْبَهُمْ مُّصِيْبَةٌ ۢ بِمَا قَدَّمَتْ اَيْدِيْهِمْ
فَيَقُوْلُوْا رَبَّنَا لَوْلَآ اَرْسَلْتَ اِلَيْنَا رَسُوْلًا فَنَتَّبِعَ اٰيٰتِكَ
وَنَكُوْنَ مِنَ الْمُؤْمِنِيْنَ ﴿٤٧﴾

فَلَمَّا جَآءَهُمُ الْحَقُّ مِنْ عِنْدِنَا قَالُوْا لَوْلَآ اُوْتِيَ
مِثْلَ مَآ اُوْتِيَ مُوْسٰى ۭ اَوَلَمْ يَكْفُرُوْا بِمَآ اُوْتِيَ مُوْسٰى
مِنْ قَبْلُ ۚ قَالُوْا سِحْرٰنِ تَظٰهَرَا ۡ وَقَالُوْٓا اِنَّا بِكُلٍّ
كٰفِرُوْنَ ﴿٤٨﴾

قُلْ فَاْتُوْا بِكِتٰبٍ مِّنْ عِنْدِ اللّٰهِ هُوَ اَهْدٰى مِنْهُمَآ

---

* Torao kaj Korano

52. Ni vere venigis al ili Nian vorton, por ke ili estu admonataj.

53. Tiuj, al kiuj Ni donis la Libron antaŭe, kredas al ĝi,

54. kaj, kiam ĝi estas proklamata al ili, ili diras: "Ni kredas al ĝi. Vere ĝi estas la vero de nia Sinjoro; jam antaŭe ni submetiĝis".

55. Tiuj ricevos sian rekompencon dufoje, ĉar ili estis persistaj kaj forpelis la malbonon per la bono, kaj disdonas el tio, kion Ni donis al ili.

56. Kiam ili aŭdas vanajn paroladojn, ili turnas sin aliloken kaj diras: "Ni havas niajn farojn kaj vi havas viajn farojn. Pacon al vi! Ni ne serĉas la malklerulojn".

57. Vi ne povas gvidi, kiun vi amas, sed Allah gvidas, kiun Li volas, kaj Liplej bone konas tiujn, kiuj akceptas la gvidadon.

58. Ili diras: "Se ni sekvus la gvidadon kun vi, ni estus forpelitaj el nia lando". Ĉu Ni do ne estigis por ili sekuran restadejon, al kiu estas portataj la fruktoj de ĉiuj aĵoj, kiel provizaĵo de Ni? La plej multaj el ili tamen ne scias tion.

59. Kiom multajn urbojn Ni detruis, pri kies abundo da provizaĵoj ili fanfaronis! Tie estas iliaj loĝejoj, kiuj ne estis loĝitaj post ili, krom malmulte, kaj Ni estas la heredanto.

60. Via Sinjoro ne estus detruinta la urbojn antaŭ ol veki en ilia ĉefurbo senditon, kiu proklamu al ili Niajn revelaciojn, kaj Ni neniam detruis urbojn, se iliaj loĝantoj ne estis plenaj je malpiegeco.

61. Kio estis donita al vi el ĉiuj aĵoj, estas nur provizaĵo por ĉi tiu vivo kaj ĝia ornamaĵo. Tio tamen, kio estas ĉe Allah, estas pli bona kaj daŭra. Ĉu vi do ne volas kompreni?

اَتَّبِعْهُ اِنْ كُنْتُمْ صٰدِقِيْنَ ﴿٥٢﴾

فَاِنْ لَّمْ يَسْتَجِيْبُوْا لَكَ فَاعْلَمْ اَنَّمَا يَتَّبِعُوْنَ اَهْوَآءَهُمْ

وَمَنْ اَضَلُّ مِمَّنِ اتَّبَعَ هَوٰىهُ بِغَيْرِ هُدًى مِّنَ اللّٰهِ

اِنَّ اللّٰهَ لَا يَهْدِى الْقَوْمَ الظّٰلِمِيْنَ ﴿٥٣﴾

وَلَقَدْ وَصَّلْنَا لَهُمُ الْقَوْلَ لَعَلَّهُمْ يَتَذَكَّرُوْنَ ﴿٥٤﴾

اَلَّذِيْنَ اٰتَيْنٰهُمُ الْكِتٰبَ مِنْ قَبْلِهٖ هُمْ بِهٖ يُؤْمِنُوْنَ ﴿٥٥﴾

وَاِذَا يُتْلٰى عَلَيْهِمْ قَالُوْٓا اٰمَنَّا بِهٖٓ اِنَّهُ الْحَقُّ مِنْ رَّبِّنَآ

اِنَّا كُنَّا مِنْ قَبْلِهٖ مُسْلِمِيْنَ ﴿٥٦﴾

اُولٰٓئِكَ يُؤْتَوْنَ اَجْرَهُمْ مَّرَّتَيْنِ بِمَا صَبَرُوْا وَ

يَدْرَءُوْنَ بِالْحَسَنَةِ السَّيِّئَةَ وَمِمَّا رَزَقْنٰهُمْ يُنْفِقُوْنَ ﴿٥٧﴾

وَاِذَا سَمِعُوا اللَّغْوَ اَعْرَضُوْا عَنْهُ وَقَالُوْا لَنَآ اَعْمَالُنَا

وَلَكُمْ اَعْمَالُكُمْ سَلٰمٌ عَلَيْكُمْ لَا نَبْتَغِى الْجٰهِلِيْنَ ﴿٥٨﴾

اِنَّكَ لَا تَهْدِىْ مَنْ اَحْبَبْتَ وَلٰكِنَّ اللّٰهَ يَهْدِىْ مَنْ

يَّشَآءُ ۚ وَهُوَ اَعْلَمُ بِالْمُهْتَدِيْنَ ﴿٥٩﴾

وَقَالُوْٓا اِنْ نَّتَّبِعِ الْهُدٰى مَعَكَ نُتَخَطَّفْ مِنْ اَرْضِنَا ؕ

اَوَلَمْ نُمَكِّنْ لَّهُمْ حَرَمًا اٰمِنًا يُّجْبٰٓى اِلَيْهِ ثَمَرٰتُ

كُلِّ شَىْءٍ رِّزْقًا مِّنْ لَّدُنَّا وَلٰكِنَّ اَكْثَرَهُمْ لَا يَعْلَمُوْنَ ﴿٦٠﴾

وَكَمْ اَهْلَكْنَا مِنْ قَرْيَةٍ بَطِرَتْ مَعِيْشَتَهَا ۚ فَتِلْكَ

مَسٰكِنُهُمْ لَمْ تُسْكَنْ مِّنْۢ بَعْدِهِمْ اِلَّا قَلِيْلًا ؕ وَ

كُنَّا نَحْنُ الْوٰرِثِيْنَ ﴿٦١﴾

وَمَا كَانَ رَبُّكَ مُهْلِكَ الْقُرٰى حَتّٰى يَبْعَثَ فِىْٓ اُمِّهَا

رَسُوْلًا يَّتْلُوْا عَلَيْهِمْ اٰيٰتِنَا ۚ وَمَا كُنَّا مُهْلِكِى الْقُرٰٓى

إِلَّا وَجْهَهُ لَهُ الْحُكْمُ وَإِلَيْهِ تُرْجَعُونَ ﴿٨٨﴾

62. Ĉu tiu, al kiu Ni donis belegan promeson, kiun li atingos, estas kiel tiu, kiun Ni provizis per la bonaĵoj de ĉi tiu vivo? Poste tamen, en la tago de la reviviĝo, li estos inter la invititoj.

63. En tiu tago Li vokos ilin kaj diros: "Kie estas Miaj rivaloj, tiuj, kiujn vi imagis? ".

64. Tiuj, kiujn trafos la vorto, diros: "Nia Sinjoro, estas ili tiuj, kiujn ni devojigis. Ni devojigis ilin, kiel ni mem devojiĝis. Nun tamen ni liberiĝas antaŭ Vi. Ne estas ni tiuj, kiujn ili adoris, sed iliaj pasioj".

65. Estos dirite: "Alvoku viajn Diojn! " kaj ili vokos, sed al ili ne estos respondite, kaj ili vidos la punon. Ho, se ili estus sekvintaj la rektan vojon!

66. En tiu tago Li vokos ilin kaj demandos: "Kion vi respondis al la senditoj? ".

67. Tiam, en tiu tago, malklariĝos por ili ĉiuj paroladoj, kaj ili ne kapablos demandi unu la alian.

68. Tiu tamen, kiu pentas kaj kredas kaj bonfaras, – verŝajne li estos sukcesa.

69. Via Sinjoro kreas kaj elektas, kion Li volas. Ne koncernas ilin la elekto. Sankta estas Allah kaj eminenta super tio, kion ili adoras anstataŭ Lin!

70. Via Sinjoro scias, kion kaŝas iliaj brustoj, kaj kion ili malkaŝas.

71. Li estas Allah, ne ekzistas alia Dio ol Li. Al Li apartenas la laŭdego je la komenco kaj je la fino kaj al Li apartenas la juĝo kaj al Li vi revenos.

72. Diru: "Kion vi pensas? Se Allah igus la nokton super vi daŭri ĝis la tago de la reviviĝo, kiu Dio krom Allah kapablus alporti al vi la lumon? Ĉu vi do ne volas aŭdi? ".

إِلَىٰ يَوْمِ الْقِيٰمَةِ مَنْ إِلٰهٌ غَيْرُ اللّٰهِ يَأْتِيكُمْ بِضِيَآءٍ ۖ
أَفَلَا تَسْمَعُونَ ﴿٧٢﴾

73. Diru: "Kion vi pensas? Se Allah igus la tagon super vi daŭri ĝis la tago de la reviviĝo, kiu Dio krom Allah kapablus alporti al vi la nokton, por ke vi ripozu en ĝi? Ĉu vi do ne volas vidi? ".

قُلْ أَرَءَيْتُمْ إِنْ جَعَلَ اللّٰهُ عَلَيْكُمُ النَّهَارَ سَرْمَدًا
إِلَىٰ يَوْمِ الْقِيٰمَةِ مَنْ إِلٰهٌ غَيْرُ اللّٰهِ يَأْتِيكُمْ بِلَيْلٍ
تَسْكُنُونَ فِيهِ ۖ أَفَلَا تُبْصِرُونَ ﴿٧٣﴾

74. Pro Sia graco Li kreis por vi la nokton kaj la tagon, por ke vi ripozu en ĝi kaj por ke vi strebu al Lia graco kaj por ke vi estu dankaj.

وَمِن رَّحْمَتِهِ جَعَلَ لَكُمُ الَّيْلَ وَالنَّهَارَ لِتَسْكُنُوا
فِيهِ وَلِتَبْتَغُوا مِن فَضْلِهِ وَلَعَلَّكُمْ تَشْكُرُونَ ﴿٧٣﴾

75. En tiu tago Li vokos ilin kaj diros: "Kie estas Miaj rivaloj, kiujn vi imagis? ".

وَيَوْمَ يُنَادِيهِمْ فَيَقُولُ أَيْنَ شُرَكَآءِيَ الَّذِينَ كُنتُمْ
تَزْعُمُونَ ﴿٧٤﴾

76. Ni elektos el ĉiu popolo unu atestanton kaj diros: "Alportu vian pruvon". Tiam ili ekscios, ke la vero apartenas al Allah kaj perdiĝos por ili tio, kion ili elpensis.

وَنَزَعْنَا مِن كُلِّ أُمَّةٍ شَهِيدًا فَقُلْنَا هَاتُوا بُرْهَانَكُمْ
فَعَلِمُوٓا أَنَّ الْحَقَّ لِلّٰهِ وَضَلَّ عَنْهُم مَّا كَانُوا يَفْتَرُونَ ﴿٧٥﴾

77. Vere Kārūn estis unu el la popolo de Moseo, sed li subpremis ilin, kaj Ni estis doninta al li tiom multe da trezoroj, ke iliaj ŝlosiloj estus peza ŝarĝo por grupo de fortuloj. Kiam lia popolo diris al li: "Ne troigu je ĝojo, ĉar Allah ne amas la troigantojn,

إِنَّ قَٰرُونَ كَانَ مِن قَوْمِ مُوسَىٰ فَبَغَىٰ عَلَيْهِمْ ۖ وَءَاتَيْنَٰهُ
مِنَ الْكُنُوزِ مَآ إِنَّ مَفَاتِحَهُۥ لَتَنُوٓأُ بِالْعُصْبَةِ أُو۟لِى
الْقُوَّةِ ۖ إِذْ قَالَ لَهُۥ قَوْمُهُۥ لَا تَفْرَحْ ۖ إِنَّ اللّٰهَ لَا يُحِبُّ
الْفَرِحِينَ ﴿٧٦﴾

78. sed serĉu en tio, kion Allah donis al vi, la restadejon por la vivo venonta; ne malŝatu tamen vian parton en ĉi tiu vivo, kaj bonfaru kiel Allah bonfaras al vi, kaj ne deziregu la malpacon sur la tero, ĉar vere Allah ne amas la malpacemulojn"

وَٱبْتَغِ فِيمَآ ءَاتَىٰكَ اللّٰهُ الدَّارَ الْءَاخِرَةَ ۖ وَلَا تَنسَ
نَصِيبَكَ مِنَ الدُّنْيَا ۖ وَأَحْسِن كَمَآ أَحْسَنَ اللّٰهُ
إِلَيْكَ ۖ وَلَا تَبْغِ الْفَسَادَ فِى الْأَرْضِ ۖ إِنَّ اللّٰهَ لَا يُحِبُّ
الْمُفْسِدِينَ ﴿٧٧﴾

79. li respondis: "Tio estis donita al mi pro la scio, kiun mi posedas". Ĉu li do ne sciis, ke Allah jam antaŭe pereigis generaciojn, kiuj estis pli fortaj ol li je povo kaj pli grandaj je riĉeco? Kaj la kulpuloj ne estos demanditaj pri siaj pekoj.

قَالَ إِنَّمَآ أُوتِيتُهُۥ عَلَىٰ عِلْمٍ عِندِىٓ ۚ أَوَلَمْ يَعْلَمْ أَنَّ
اللّٰهَ قَدْ أَهْلَكَ مِن قَبْلِهِ مِنَ الْقُرُونِ مَنْ هُوَ أَشَدُّ
مِنْهُ قُوَّةً وَأَكْثَرُ جَمْعًا ۚ وَلَا يُسْـَٔلُ عَن ذُنُوبِهِمُ

80. Li do eliris al sia popolo en siaj ornamaĵoj, kaj diris tiuj, kiuj strebis al ĉi tiu vivo: "Ho, se ni posedus tion, kio estis donita al Kārūn! Vere li estas posedanto de grandega feliĉo! ".

الْمُجْرِمُونَ ﴿٧٨﴾

81. Tiuj tamen, al kiuj estis donita la vera scio, diris: "Ve al vi! La rekompenco de Allah estas pli bona por tiu, kiu kredas kaj bonfaras. Ĝin tamen nur atingos la persistemuloj".

فَخَرَجَ عَلَىٰ قَوْمِهِ فِي زِينَتِهِ ۖ قَالَ الَّذِينَ يُرِيدُونَ
الْحَيَاةَ الدُّنْيَا يَا لَيْتَ لَنَا مِثْلَ مَا أُوتِيَ قَارُونُ ۙ
إِنَّهُ لَذُو حَظٍّ عَظِيمٍ ﴿٧٩﴾

82. Ni tiam igis la teron engluti lin kaj lian domon, kaj li havis neniun trupon por helpi lin kontraŭ Allah, kaj li ne kapablis savi sin.

وَقَالَ الَّذِينَ أُوتُوا الْعِلْمَ وَيْلَكُمْ ثَوَابُ اللَّهِ خَيْرٌ
لِّمَنْ آمَنَ وَعَمِلَ صَالِحًا ۚ وَلَا يُلَقَّاهَا إِلَّا الصَّابِرُونَ ﴿٨٠﴾
فَخَسَفْنَا بِهِ وَبِدَارِهِ الْأَرْضَ ۖ فَمَا كَانَ لَهُ مِن فِئَةٍ
يَنصُرُونَهُ مِن دُونِ اللَّهِ وَمَا كَانَ مِنَ الْمُنتَصِرِينَ ﴿٨١﴾

83. La sekvantan matenon, tiuj, kiuj la antaŭan tagon deziris esti kiel li, diris: "Ho vidu! Estas vere Allah, kiu pliigas kaj malpliigas la provizaĵojn, por kiu Li volas el Siaj servantoj. Se Allah ne estus kompatema al ni, Li estus iginta la teron engluti nin. Ho vidu! La miskredantoj ne sukcesos! ".

وَأَصْبَحَ الَّذِينَ تَمَنَّوْا مَكَانَهُ بِالْأَمْسِ يَقُولُونَ وَيْكَأَنَّ
اللَّهَ يَبْسُطُ الرِّزْقَ لِمَن يَشَاءُ مِنْ عِبَادِهِ وَيَقْدِرُ ۖ
لَوْلَا أَن مَّنَّ اللَّهُ عَلَيْنَا لَخَسَفَ بِنَا ۖ وَيْكَأَنَّهُ لَا يُفْلِحُ
الْكَافِرُونَ ﴿٨٢﴾

84. Tiu hejmo en la vivo venonta! Ni donas ĝin al tiuj, kiuj ne volas plialtigi sin sur la tero, kaj ne volas malbonon. La feliĉa fino estas por la justuloj.

تِلْكَ الدَّارُ الْآخِرَةُ نَجْعَلُهَا لِلَّذِينَ لَا يُرِيدُونَ عُلُوًّا
فِي الْأَرْضِ وَلَا فَسَادًا ۚ وَالْعَاقِبَةُ لِلْمُتَّقِينَ ﴿٨٣﴾

85. Kiu plenumas bonon, tiu ricevos eĉ pli bonan rekompencon ol tion, sed kiu plenumas malbonon! Ne estos donita al tiuj, kiuj malbonfaras alia repago ol pro tio, kion ili faris.

مَن جَاءَ بِالْحَسَنَةِ فَلَهُ خَيْرٌ مِّنْهَا ۖ وَمَن جَاءَ بِالسَّيِّئَةِ
فَلَا يُجْزَى الَّذِينَ عَمِلُوا السَّيِّئَاتِ إِلَّا مَا كَانُوا يَعْمَلُونَ ﴿٨٤﴾

86. Vere Tiu, kiu faris la Koranon deviga por vi, rekondukos vin al la loko destinita por la reveno. Diru: "Mia Sinjoro scias plej bone, kiu estas sur la rekta vojo, kaj kiu troviĝas en evidenta eraro".

إِنَّ الَّذِي فَرَضَ عَلَيْكَ الْقُرْآنَ لَرَادُّكَ إِلَىٰ مَعَادٍ ۚ
قُل رَّبِّي أَعْلَمُ مَن جَاءَ بِالْهُدَىٰ وَمَنْ هُوَ فِي
ضَلَالٍ مُّبِينٍ ﴿٨٥﴾

87. Vi mem ne kuraĝis esperi, ke estos revelaciita al vi la Libro; estis ja graco de via Sinjoro, tial neniam estos subteno por la miskredantoj.

وَمَا كُنتَ تَرْجُو أَن يُلْقَىٰ إِلَيْكَ الْكِتَابُ إِلَّا رَحْمَةً
مِّن رَّبِّكَ فَلَا تَكُونَنَّ ظَهِيرًا لِّلْكَافِرِينَ ﴿٨٦﴾
وَلَا يَصُدُّنَّكَ عَنْ آيَاتِ اللَّهِ بَعْدَ إِذْ أُنزِلَتْ إِلَيْكَ

وَادْعُ إِلَىٰ رَبِّكَ وَلَا تَكُونَنَّ مِنَ الْمُشْرِكِينَ ﴿٨٧﴾
وَلَا تَدْعُ مَعَ اللَّهِ إِلَٰهًا آخَرَ ۘ لَا إِلَٰهَ إِلَّا هُوَ ۚ كُلُّ
شَيْءٍ هَالِكٌ إِلَّا وَجْهَهُ ۚ لَهُ الْحُكْمُ وَإِلَيْهِ تُرْجَعُونَ ﴿٨٨﴾

88. Ne lasu iun ajn devojigi vin de la revelacioj de Allah, post kiam ili estas senditaj al vi, kaj voku vian Sinjoron kaj ne estu idolano.

89. Ne voku anstataŭ Allahon alian Dion. Ne ekzistas alia Dio ol Li. Ciuj aĵoj estas pasemaj, krom Li. Al Li apartenas la juĝo, kaj al Li vi revenos.

سُورَةُ العَنكَبُوتِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيمِ ①

الٓمٓ ②

أَحَسِبَ النَّاسُ أَنْ يُتْرَكُوٓا أَنْ يَقُولُوٓا ءَامَنَّا وَهُمْ لَا يُفْتَنُونَ ③

وَلَقَدْ فَتَنَّا الَّذِينَ مِنْ قَبْلِهِمْ فَلَيَعْلَمَنَّ اللّٰهُ الَّذِينَ صَدَقُوا وَلَيَعْلَمَنَّ الْكَٰذِبِينَ ④

أَمْ حَسِبَ الَّذِينَ يَعْمَلُونَ السَّيِّـَٔاتِ أَنْ يَسْبِقُونَا ۚ سَآءَ مَا يَحْكُمُونَ ⑤

مَنْ كَانَ يَرْجُوا لِقَآءَ اللّٰهِ فَإِنَّ أَجَلَ اللّٰهِ لَآتٍ ۚ وَهُوَ السَّمِيعُ الْعَلِيمُ ⑥

وَمَنْ جَٰهَدَ فَإِنَّمَا يُجَٰهِدُ لِنَفْسِهِۦٓ ۚ إِنَّ اللّٰهَ لَغَنِىٌّ عَنِ الْعَٰلَمِينَ ⑦

وَالَّذِينَ ءَامَنُوا وَعَمِلُوا الصَّٰلِحَٰتِ لَنُكَفِّرَنَّ عَنْهُمْ سَيِّـَٔاتِهِمْ وَلَنَجْزِيَنَّهُمْ أَحْسَنَ الَّذِى كَانُوا يَعْمَلُونَ ⑧

وَوَصَّيْنَا الْإِنسَٰنَ بِوَٰلِدَيْهِ حُسْنًا ۖ وَإِنْ جَٰهَدَاكَ لِتُشْرِكَ بِى مَا لَيْسَ لَكَ بِهِۦ عِلْمٌ فَلَا تُطِعْهُمَا ۚ إِلَىَّ مَرْجِعُكُمْ فَأُنَبِّئُكُم بِمَا كُنتُمْ تَعْمَلُونَ ⑨

وَالَّذِينَ ءَامَنُوا وَعَمِلُوا الصَّٰلِحَٰتِ لَنُدْخِلَنَّهُمْ فِى الصَّٰلِحِينَ ⑩

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Alef Lâm Mîm.**

3. Ĉu la homoj imagas, ke oni lasos ilin en paco, se ili nur diras: "Ni kredas" kaj ke ili ne estos elprovitaj?

4. Ni tamen elprovis tiujn, kiuj estis antaŭe, tial Allah certe distingos la sincerulojn kaj Li certe distingos la mensogulojn.

5. Ĉu imagas tiuj, kiuj malbonfaras, ke ili fuĝos de Ni? Malbone estas, kiel ili juĝas!

6. Kiu esperas je la renkonto kun Allah, tiu sciu, ke la templimo fiksita de Allah alvenos. Li estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia.

7. Kiu strebas, tiu faras tion por si mem. Vere Allah estas sendependa de l' Universo.

8. Tiuj, kiuj kredas kaj bonfaras – vere Ni forprenos de ili iliajn pekojn kaj Ni bonege rekompencos ilin pro tio, kion ili faris.

9. Ni ordonis al la homoj konduti bone al siaj gepatroj. Se ili tamen volus instigi vin aldoni al Mi kiel rivalon ion, pri kio vi ne havas scion, tiam ne obeu ilin. Al Mi estos via reveno kaj Mi volas anonci al vi, kion vi faris.

10. Tiuj, kiuj kredas kaj bonfaras, Ni kondukos ilin al la socio de la justuloj.

---

* v. la verson 42an

** Mi, Allah, Ĉioscia

وَمِنَ النَّاسِ مَنْ يَّقُوْلُ اٰمَنَّا بِاللّٰهِ فَاِذَآ اُوْذِيَ فِي
اللّٰهِ جَعَلَ فِتْنَةَ النَّاسِ كَعَذَابِ اللّٰهِ ۭ وَلَىِٕنْ جَاۗءَ
نَصْرٌ مِّنْ رَّبِّكَ لَيَقُوْلُنَّ اِنَّا كُنَّا مَعَكُمْ ۭ اَوَلَيْسَ اللّٰهُ
بِاَعْلَمَ بِمَا فِيْ صُدُوْرِ الْعٰلَمِيْنَ ⑩

11. Inter la homoj estas iuj, kiuj diras: "Ni kredas je Allah", sed kiam ili devas suferi pro la afero de Allah, ili rigardas la persekuton de la homoj kiel punon de Allah. Kiam tamen venas helpo de via Sinjoro, ili certe diras: "Ni vere estas kun vi". Ĉu do Allah ne scias plej bone, kio estas en la brustoj de ĉiuj kreitaĵoj?

وَلَيَعْلَمَنَّ اللّٰهُ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَلَيَعْلَمَنَّ الْمُنٰفِقِيْنَ ⑪

12. Allah certe distingos la kredantojn, kaj Li certe distingos la hipokritulojn.

وَقَالَ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا لِلَّذِيْنَ اٰمَنُوا اتَّبِعُوْا سَبِيْلَنَا
وَلْنَحْمِلْ خَطٰيٰكُمْ وَمَا هُمْ بِحٰمِلِيْنَ مِنْ خَطٰيٰهُمْ
مِّنْ شَيْءٍ ۭ اِنَّهُمْ لَكٰذِبُوْنَ ⑫

13. La miskredantoj diras al la kredantoj: "Sekvu nian vojon kaj ni portos viajn pekojn". Ili tamen nenion kapablas porti el iliaj pekoj. Ili vere estas mensoguloj.

وَلَيَحْمِلُنَّ اَثْقَالَهُمْ وَاَثْقَالًا مَّعَ اَثْقَالِهِمْ ۡ وَلَيُسْـَٔلُنَّ
يَوْمَ الْقِيٰمَةِ عَمَّا كَانُوْا يَفْتَرُوْنَ ⑬ ع

14. Ili certe devos porti siajn proprajn ŝarĝojn kaj ankaŭ aliajn ŝarĝojn aldone al siaj ŝarĝoj, kaj certe estos demandite en la tago de la reviviĝo pri tio, kion ili elpensis.

وَلَقَدْ اَرْسَلْنَا نُوْحًا اِلٰى قَوْمِهٖ فَلَبِثَ فِيْهِمْ اَلْفَ
سَنَةٍ اِلَّا خَمْسِيْنَ عَامًا ۭ فَاَخَذَهُمُ الطُّوْفَانُ وَ
هُمْ ظٰلِمُوْنَ ⑭

15. Ni certe sendis Noan al lia popolo kaj li vivis inter ili mil jarojn minus kvindek jaroj. Tiam trafis ilin la diluvo, ĉar ili estis pekeguloj.

فَاَنْجَيْنٰهُ وَاَصْحٰبَ السَّفِيْنَةِ وَجَعَلْنٰهَآ اٰيَةً لِّلْعٰلَمِيْنَ ⑮

16. Lin tamen Ni savis kaj ankaŭ la loĝantojn de la arkeo kaj Ni faris ĝin signo por la tuta homaro.

وَاِبْرٰهِيْمَ اِذْ قَالَ لِقَوْمِهِ اعْبُدُوا اللّٰهَ وَاتَّقُوْهُ ۭ
ذٰلِكُمْ خَيْرٌ لَّكُمْ اِنْ كُنْتُمْ تَعْلَمُوْنَ ⑯

17. Kaj Ni sendis Abrahamon, kiam li diris al sia popolo: "Adoru Allahon kaj respektegu Lin. Tio estas pli bona por vi. Se vi nur scius!

اِنَّمَا تَعْبُدُوْنَ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ اَوْثَانًا وَّتَخْلُقُوْنَ
اِفْكًا ۭ اِنَّ الَّذِيْنَ تَعْبُدُوْنَ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ لَا يَمْلِكُوْنَ
لَكُمْ رِزْقًا فَابْتَغُوْا عِنْدَ اللّٰهِ الرِّزْقَ وَاعْبُدُوْهُ
وَاشْكُرُوْا لَهٗ ۭ اِلَيْهِ تُرْجَعُوْنَ ⑰

18. Vi vere adoras, anstataŭ Allahon, idolojn, kaj vi elpensas mensogojn. Tiuj, kiujn vi adoras anstataŭ Allahon, ne kapablas provizi vian vivtenon. Serĉu do provizaĵojn ĉe Allah kaj adoru Lin kaj estu dankaj al Li. Al Li vi revenos.

وَاِنْ تُكَذِّبُوْا فَقَدْ كَذَّبَ اُمَمٌ مِّنْ قَبْلِكُمْ ۭ وَمَا
عَلَى الرَّسُوْلِ اِلَّا الْبَلٰغُ الْمُبِيْنُ ⑱

19. Se vi tamen rifuzas, tiel ankaŭ rifuzis generacioj antaŭ vi. La senditon nur koncernas la klara anonco".

20. Ĉu ili ne vidas, kiel Allah estigas la kreon, kaj poste denove estigas ĝin? Vere tio estas facila por Allah.

21. Diru: "Vojaĝu sur la tero kaj vidu, kiel Li unuafoje estigis la kreon. Poste Allah estigos la sekvantan kreon". Vere Allah havas povon super ĉiuj aferoj.

22. Li punas, kiun Li volas, kaj Li kompatas al kiu Li volas, kaj al Li vi devos turni vin.

23. Vi neniam kapablos vanigi sur la tero nek en la ĉielo Lian povon kaj vi ne havas protektanton aŭ helpanton krom Allah.

24. Tiuj, kiuj rifuzas la revelaciojn de Allah kaj ne kredas al la renkonto kun Li, malesperas je Mia kompato kaj por ili estos dolora puno.

25. La respondo de lia popolo estis nur, ke ili diris: "Mortigu lin aŭ bruligu lin". Allah tamen savis lin de la fajro. En tio vere estas signo por popolo kredanta.

26. Li diris: "Vere vi prenis al vi idolojn anstataŭ Allah pro amo reciproka en ĉi tiu vivo. Poste en la tago de la reviviĝo vi malkonfesos unu la alian kaj vi malbenos unu la alian. Via restadejo estos la fajro kaj vi ne havos iujn ajn helpantojn".

27. Lot kredis al li kaj Abraham diris: "Vere mi fuĝas al mia Sinjoro. Li vere estas la Ĉiopova, la Saĝa".

28. Ni donacis al li Isaakon kaj Jakobon kaj Ni donis al liaj idoj la donacon de la profetado kaj la Libron kaj Ni donis al li lian rekompencon en ĉi tiu vivo kaj li certe en la vivo venonta estos inter la virtuloj.

أَوَلَمْ يَرَوْا كَيْفَ يُبْدِئُ اللّٰهُ الْخَلْقَ ثُمَّ يُعِيدُهُ ۚ
إِنَّ ذٰلِكَ عَلَى اللّٰهِ يَسِيرٌ ﴿٢٠﴾

قُلْ سِيرُوا فِي الْأَرْضِ فَانْظُرُوا كَيْفَ بَدَأَ الْخَلْقَ
ثُمَّ اللّٰهُ يُنْشِئُ النَّشْأَةَ الْآخِرَةَ ۚ إِنَّ اللّٰهَ عَلَىٰ كُلِّ
شَيْءٍ قَدِيرٌ ﴿٢١﴾

يُعَذِّبُ مَنْ يَشَاءُ وَيَرْحَمُ مَنْ يَشَاءُ ۖ وَإِلَيْهِ تُقْلَبُونَ ﴿٢٢﴾
وَمَا أَنْتُمْ بِمُعْجِزِينَ فِي الْأَرْضِ وَلَا فِي السَّمَاءِ وَ
مَا لَكُمْ مِنْ دُونِ اللّٰهِ مِنْ وَلِيٍّ وَلَا نَصِيرٍ ﴿٢٣﴾ ع ١٤
وَالَّذِينَ كَفَرُوا بِآيَاتِ اللّٰهِ وَلِقَائِهِ أُولَٰئِكَ
يَئِسُوا مِنْ رَحْمَتِي وَأُولَٰئِكَ لَهُمْ عَذَابٌ
أَلِيمٌ ﴿٢٤﴾

فَمَا كَانَ جَوَابَ قَوْمِهِ إِلَّا أَنْ قَالُوا اقْتُلُوهُ أَوْ حَرِّقُوهُ
فَأَنْجَاهُ اللّٰهُ مِنَ النَّارِ ۚ إِنَّ فِي ذٰلِكَ لَآيَاتٍ لِقَوْمٍ
يُؤْمِنُونَ ﴿٢٥﴾

وَقَالَ إِنَّمَا اتَّخَذْتُمْ مِنْ دُونِ اللّٰهِ أَوْثَانًا ۖ مَوَدَّةَ
بَيْنِكُمْ فِي الْحَيَاةِ الدُّنْيَا ۖ ثُمَّ يَوْمَ الْقِيَامَةِ يَكْفُرُ
بَعْضُكُمْ بِبَعْضٍ وَيَلْعَنُ بَعْضُكُمْ بَعْضًا وَمَأْوَاكُمُ
النَّارُ وَمَا لَكُمْ مِنْ نَاصِرِينَ ﴿٢٦﴾

فَآمَنَ لَهُ لُوطٌ ۘ وَقَالَ إِنِّي مُهَاجِرٌ إِلَىٰ رَبِّي ۖ إِنَّهُ
هُوَ الْعَزِيزُ الْحَكِيمُ ﴿٢٦﴾

وَوَهَبْنَا لَهُ إِسْحَٰقَ وَيَعْقُوبَ وَجَعَلْنَا فِي ذُرِّيَّتِهِ
النُّبُوَّةَ وَالْكِتَابَ وَآتَيْنَاهُ أَجْرَهُ فِي الدُّنْيَا ۖ وَإِنَّهُ فِي

29. Kaj Ni sendis Loton, kiam li diris al sia popolo: "Vere vi faras hontindaĵon, kiun neniu, el la tuta homaro, antaŭe faris.

30. Ĉu vi vere volas alproksimiĝi volupte al viroj kaj rabadi sur la vojoj? Kaj en viaj kunvenoj vi plenumas abomenindaĵojn". La respondo de lia popolo tamen estis nur, ke ili diris: "Alvoku la punon de Allah sur nin, se vi estas sincera! ".

31. Li diris: "Mia Sinjoro, helpu min kontraŭ la popolo de la skandalfarantoj! ".

32. Kiam Niaj senditoj venis al Abraham kaj portis al li la bonan novaĵon, ili diris: "Ni vere detruos la loĝantojn de ĉi tiu urbo, ĉar ĝiaj loĝantoj estas malpieguloj".

33. Li diris: "En ĝi tamen estas Lot", kaj ili respondis: "Ni bone scias, kiu estas en ĝi. Certe ni savos lin kaj lian familion krom lia edzino; ŝi apartenas al tiuj, kiuj restos malantaŭe".

34. Kiam venis Niaj senditoj al Lot, li zorgis pri ili kaj sentis sin senhelpa pri ili. Ili diris: "Ne timu kaj ne ĉagreniĝu. Ni vere volas savi vin kaj vian familion krom via edzino, ĉar ŝi apartenas al tiuj, kiuj restos malantaŭe.

35. Ni vere volas sendi sur la loĝantojn de ĉi tiu urbo juĝon el la ĉielo, ĉar ili estis ribelemaj".

36. Ni postlasis vere klaran signon de tio por popolo komprenanta.

37. Al Madjan Ni sendis ilian fraton Ŝu'ajb, kaj li diris: "Ho mia popolo! Adoru Allahon kaj timu la lastan Juĝon kaj ne fariĝu krimuloj, estigante skandalon sur la tero".

38. Ili tamen kulpigis lin je mensogo, kaj ilin trafis tertremo, kaj ili kuŝis sur la tero en siaj domoj:

الْاٰخِرَةِ لَيَنَ الصّٰلِحِيْنَ ﴿٢٧﴾

وَلُوْطًا اِذْ قَالَ لِقَوْمِهٖٓ اِنَّكُمْ لَتَاْتُوْنَ الْفَاحِشَةَ ۡ مَا

سَبَقَكُمْ بِهَا مِنْ اَحَدٍ مِّنَ الْعٰلَمِيْنَ ﴿٢٨﴾

اَئِنَّكُمْ لَتَاْتُوْنَ الرِّجَالَ وَتَقْطَعُوْنَ السَّبِيْلَ ۙ وَ

تَاْتُوْنَ فِيْ نَادِيْكُمُ الْمُنْكَرَ ۭ فَمَا كَانَ جَوَابَ قَوْمِهٖٓ

اِلَّآ اَنْ قَالُوا ائْتِنَا بِعَذَابِ اللّٰهِ اِنْ كُنْتَ مِنَ

الصّٰدِقِيْنَ ﴿٢٩﴾

قَالَ رَبِّ انْصُرْنِيْ عَلَى الْقَوْمِ الْمُفْسِدِيْنَ ﴿٣٠﴾ ع

وَلَمَّا جَاۗءَتْ رُسُلُنَآ اِبْرٰهِيْمَ بِالْبُشْرٰى ۙ قَالُوْٓا اِنَّا

مُهْلِكُوْٓا اَهْلِ هٰذِهِ الْقَرْيَةِ ۚ اِنَّ اَهْلَهَا كَانُوْا

ظٰلِمِيْنَ ﴿٣١﴾

قَالَ اِنَّ فِيْهَا لُوْطًا ۭ قَالُوْا نَحْنُ اَعْلَمُ بِمَنْ فِيْهَا ۡ لَنُنَجِّيَنَّهٗ وَاَهْلَهٗٓ اِلَّا امْرَاَتَهٗ ۡ كَانَتْ مِنَ

الْغٰبِرِيْنَ ﴿٣٢﴾

وَلَمَّآ اَنْ جَاۗءَتْ رُسُلُنَا لُوْطًا سِيْۗءَ بِهِمْ وَضَاقَ بِهِمْ

ذَرْعًا وَّقَالُوْا لَا تَخَفْ وَلَا تَحْزَنْ ڰ اِنَّا مُنَجُّوْكَ وَاَهْلَكَ

اِلَّا امْرَاَتَكَ كَانَتْ مِنَ الْغٰبِرِيْنَ ﴿٣٣﴾

اِنَّا مُنْزِلُوْنَ عَلٰٓى اَهْلِ هٰذِهِ الْقَرْيَةِ رِجْزًا مِّنَ السَّمَاۗءِ

بِمَا كَانُوْا يَفْسُقُوْنَ ﴿٣٤﴾

وَلَقَدْ تَّرَكْنَا مِنْهَآ اٰيَةًۢ بَيِّنَةً لِّقَوْمٍ يَّعْقِلُوْنَ ﴿٣٥﴾

وَاِلٰى مَدْيَنَ اَخَاهُمْ شُعَيْبًا ۙ فَقَالَ يٰقَوْمِ اعْبُدُوا اللّٰهَ

وَارْجُوا الْيَوْمَ الْاٰخِرَ وَلَا تَعْثَوْا فِي الْاَرْضِ مُفْسِدِيْنَ ﴿٣٦﴾

فَكَذَّبُوْهُ فَاَخَذَتْهُمُ الرَّجْفَةُ فَاَصْبَحُوْا فِيْ دَارِهِمْ
جٰثِمِيْنَ ﴿٣٧﴾

39. kaj Ni detruis la Aadanojn kaj Tamudon, kaj tio estas evidenta por vi ĉe iliaj loĝejoj; Satano igis iliajn agojn ŝajni belaj al ili, kaj li devojigis ilin de la rekta vojo, kvankam ili tre bone vidis.

وَعَادًا وَّثَمُوْدَا۠ وَقَدْ تَّبَيَّنَ لَكُمْ مِّنْ مَّسٰكِنِهِمْ ۫ وَزَيَّنَ
لَهُمُ الشَّيْطٰنُ اَعْمَالَهُمْ فَصَدَّهُمْ عَنِ السَّبِيْلِ وَ
كَانُوْا مُسْتَبْصِرِيْنَ ﴿٣٨﴾

40. Ni detruis ankaŭ Kārūnon kaj Faraonon kaj Hāmānon. Moseo vere venis al ili kun evidentaj signoj, sed ili kondutis fierege en la lando. Ili tamen ne kapablis fuĝi.

وَقَارُوْنَ وَفِرْعَوْنَ وَهَامٰنَ ۫ وَلَقَدْ جَآءَهُمْ مُّوْسٰى
بِالْبَيِّنٰتِ فَاسْتَكْبَرُوْا فِي الْاَرْضِ وَمَا كَانُوْا سٰبِقِيْنَ ﴿٣٩﴾
فَكُلًّا اَخَذْنَا بِذَنْۢبِهٖ ۚ فَمِنْهُمْ مَّنْ اَرْسَلْنَا عَلَيْهِ حَاصِبًا ۚ
وَمِنْهُمْ مَّنْ اَخَذَتْهُ الصَّيْحَةُ ۚ وَمِنْهُمْ مَّنْ خَسَفْنَا
بِهِ الْاَرْضَ ۚ وَمِنْهُمْ مَّنْ اَغْرَقْنَا ۚ وَمَا كَانَ اللّٰهُ
لِيَظْلِمَهُمْ وَلٰكِنْ كَانُوْۤا اَنْفُسَهُمْ يَظْلِمُوْنَ ﴿٤٠﴾

41. Ĉiun pekulon Ni ekkaptis en lia peko, kaj inter ili estis iuj, al kiuj Ni sendis hajlon el ŝtonoj, kaj iuj, kiujn trafis la kriego, kaj iuj, kiujn Ni englutigis per la tero, kaj iuj, kiujn Ni dronigis. Allah ne volis agi maljuste al ili, sed ili agis maljuste kontraŭ si mem.

مَثَلُ الَّذِيْنَ اتَّخَذُوْا مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ اَوْلِيَآءَ كَمَثَلِ
الْعَنْكَبُوْتِ ۚ اتَّخَذَتْ بَيْتًا ۭ وَاِنَّ اَوْهَنَ الْبُيُوْتِ لَبَيْتُ
الْعَنْكَبُوْتِ ۘ لَوْ كَانُوْا يَعْلَمُوْنَ ﴿٤١﴾

42. La similaĵo de tiuj, kiuj prenas al si protektantojn anstataŭ Allah, estas kiel la similaĵo de la araneo, kiu konstruas domon; vere la plej facilrompa el ĉiuj domoj estas la domo de la araneo. Se ili nur scius!

اِنَّ اللّٰهَ يَعْلَمُ مَا يَدْعُوْنَ مِنْ دُوْنِهٖ مِنْ شَيْءٍ ۭ وَهُوَ
الْعَزِيْزُ الْحَكِيْمُ ﴿٤٢﴾

43. Vere Allah bone scias ĉion, kion ili alvokas anstataŭLin,kaj Li estas la Ĉiopova, la Saĝa.

وَتِلْكَ الْاَمْثَالُ نَضْرِبُهَا لِلنَّاسِ ۚ وَمَا يَعْقِلُهَآ اِلَّا
الْعٰلِمُوْنَ ﴿٤٣﴾

44. Tiuj estas la similaĵoj, kiujn Ni estigas por la homaro, sed ili ne komprenas ilin, krom tiuj, kiuj vere scias.

خَلَقَ اللّٰهُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ بِالْحَقِّ ۭ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ
لَاٰيَةً لِّلْمُؤْمِنِيْنَ ﴿٤٤﴾ ع

45. Allah kreis la ĉielojn kaj la teron per Sia vero. Vere en tio estas signo por la kredantoj!

اُتْلُ مَآ اُوْحِيَ اِلَيْكَ مِنَ الْكِتٰبِ وَاَقِمِ الصَّلٰوةَ ۭ اِنَّ
الصَّلٰوةَ تَنْهٰى عَنِ الْفَحْشَآءِ وَالْمُنْكَرِ ۭ وَلَذِكْرُ اللّٰهِ

*

Fino de la 20-a parto

أَكْبَرُ ۗ وَاللَّهُ يَعْلَمُ مَا تَصْنَعُونَ ﴿٤٥﴾

46. Proklamu tion, kio estis revelaciita al vi el la Libro, kaj levu la preĝon; vere la preĝo malhelpas la hontindaĵojn kaj la maljustecon. La penso pri Allah estas la plej granda virto kaj Allah scias, kion vi faras.

وَلَا تُجَادِلُوٓا۟ أَهْلَ ٱلْكِتَٰبِ إِلَّا بِٱلَّتِى هِىَ أَحْسَنُ إِلَّا ٱلَّذِينَ ظَلَمُوا۟ مِنْهُمْ ۖ وَقُولُوٓا۟ ءَامَنَّا بِٱلَّذِىٓ أُنزِلَ إِلَيْنَا وَأُنزِلَ إِلَيْكُمْ وَإِلَٰهُنَا وَإِلَٰهُكُمْ وَٰحِدٌ وَنَحْنُ لَهُۥ مُسْلِمُونَ ﴿٤٦﴾

47. Ne disputu kun la popolo de la Skribo, krom bonmaniere; kun la maljustuloj el ili vi tute ne disputu. Diru: "Ni kredas je tio, kio estis sendita al ni, kaj je tio, kio estis sendita al vi; nia Dio kaj via Dio estas Unu kaj ni submetiĝis al Li".

وَكَذَٰلِكَ أَنزَلْنَآ إِلَيْكَ ٱلْكِتَٰبَ ۚ فَٱلَّذِينَ ءَاتَيْنَٰهُمُ ٱلْكِتَٰبَ يُؤْمِنُونَ بِهِۦ ۚ وَمِنْ هَٰٓؤُلَآءِ مَن يُؤْمِنُ بِهِۦ ۚ وَمَا يَجْحَدُ بِـَٔايَٰتِنَآ إِلَّا ٱلْكَٰفِرُونَ ﴿٤٧﴾

48. Tiel Ni sendis al vi la Libron kaj tiuj, al kiuj Ni donis la Libron, kredas al ĝi. Ankaŭ inter tiuj ĉi estas iuj, kiuj kredas al ĝi. Niajn signojn rifuzas nur la miskredantoj.

وَمَا كُنتَ تَتْلُوا۟ مِن قَبْلِهِۦ مِن كِتَٰبٍ وَلَا تَخُطُّهُۥ بِيَمِينِكَ ۖ إِذًا لَّٱرْتَابَ ٱلْمُبْطِلُونَ ﴿٤٨﴾

49. Antaŭ tio vi neniam recitis el Libro, kaj vi ankaŭ ne povis skribi ĝin per via dekstra mano; alie la negantoj povus dubi.

بَلْ هُوَ ءَايَٰتٌۢ بَيِّنَٰتٌ فِى صُدُورِ ٱلَّذِينَ أُوتُوا۟ ٱلْعِلْمَ ۚ وَمَا يَجْحَدُ بِـَٔايَٰتِنَآ إِلَّا ٱلظَّٰلِمُونَ ﴿٤٩﴾

50. Ne! Estas klaraj signoj en la brustoj de tiuj, al kiuj estis donita la vera scio, kaj nur la maljustuloj rifuzus Niajn signojn.

وَقَالُوا۟ لَوْلَآ أُنزِلَ عَلَيْهِ ءَايَٰتٌ مِّن رَّبِّهِۦ ۖ قُلْ إِنَّمَا ٱلْـَٔايَٰتُ عِندَ ٱللَّهِ ۖ وَإِنَّمَآ أَنَا۠ نَذِيرٌ مُّبِينٌ ﴿٥٠﴾

51. Ili diras: "Kial ne estis senditaj al li la signoj de lia Sinjoro? ". Diru: "Vere la signoj estas nur ĉe Allah, kaj mi estas nur klariga admonanto".

أَوَلَمْ يَكْفِهِمْ أَنَّآ أَنزَلْنَا عَلَيْكَ ٱلْكِتَٰبَ يُتْلَىٰ عَلَيْهِمْ ۚ إِنَّ فِى ذَٰلِكَ لَرَحْمَةً وَذِكْرَىٰ لِقَوْمٍ يُؤْمِنُونَ ﴿٥١﴾

52. Ĉu ne sufiĉas al ili, ke Ni sendis al vi la Libron, kiu estas proklamata al ili? Vere en tio estas kompato kaj admono por popolo kredanta.

قُلْ كَفَىٰ بِٱللَّهِ بَيْنِى وَبَيْنَكُمْ شَهِيدًا ۖ يَعْلَمُ مَا فِى ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَٱلْأَرْضِ ۗ وَٱلَّذِينَ ءَامَنُوا۟ بِٱلْبَٰطِلِ وَكَفَرُوا۟ بِٱللَّهِ ۙ أُو۟لَٰٓئِكَ هُمُ ٱلْخَٰسِرُونَ ﴿٥٢﴾

53. Diru: "Allah sufiĉas kiel atestanto inter mi kaj vi. Li scias, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Tiuj, kiuj akceptas la falson kaj ne kredas je Allah, tiuj estas la perdantoj".

وَيَسْتَعْجِلُونَكَ بِٱلْعَذَابِ ۚ وَلَوْلَآ أَجَلٌ مُّسَمًّى لَّجَآءَهُمُ ٱلْعَذَابُ ۚ وَلَيَأْتِيَنَّهُم بَغْتَةً وَهُمْ لَا يَشْعُرُونَ ﴿٥٣﴾

54. Ili petas vin, ke vi akcelu la punon. Se ne estus fiksita limtempo, la puno estus jam trafinta ilin, kaj ĝi venos sur ilin neatendita, kaj ili ne antaŭsentos ĝin.

يَسْتَعْجِلُونَكَ بِٱلْعَذَابِ ۖ وَإِنَّ جَهَنَّمَ لَمُحِيطَةٌۢ بِٱلْكَٰفِرِينَ ﴿٥٤﴾

55. Ili petas vin, ke vi akcelu la punon, kaj vere la infero ĉirkaŭos la miskredantojn

يَوْمَ يَغْشَىٰهُمُ ٱلْعَذَابُ مِن فَوْقِهِمْ وَمِن تَحْتِ

56. en la tago, en kiu la puno renversos ilin de supre kaj de sube de iliaj piedoj, kaj Li diros: "Gustumu nun, kion vi faris! ".

57. Ho Miaj servantoj, vi kiuj kredas, vere vastega estas Mia lando, do adoru nur Min.

58. Ĉiu kreitaĵo gustumos la morton, poste vi revenos al Ni.

59. Kaj tiujn, kiuj kredas kaj bonfaras, Ni levos en la suprajn spacojn de la Paradizo, sub kiuj fluas riveroj. Tie ili restos por ĉiam. Belega estos la rekompenco por la bonfarantoj,

60. kiuj estas paciencaj kaj konfidas je sia Sinjoro.

61. Estas iu besto, kiu ne kapablas zorgi pri sia vivteno, Allah tamen provizaŝ ĝin kaj ankaŭ vin. Li estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia.

62. Se vi demandas ilin: "Kiu kreis la ĉielojn kaj la teron kaj faris la sunon kaj la lunon utilaj? ", ili certe respondos: "Allah! ". Kial do ili turnas sin for?

63. Allah pliigas kaj malpliigas la provizaĵojn por tiu el Siaj servantoj, kiun Li volas. Vere Allah scias ĉion.

64. Se vi demandas ilin: "Kiu sendas akvon el la nuboj kaj revivigas per ĝi la teron, post kiam ĝi mortis? " certe ili respondos: "Allah! ". Diru: "Estu laŭdegata Allah". Ne! La plej multaj el ili ne komprenas!

65. Ĉi tiu vivo estas nur vana amuzado kaj ludo, sed vere la hejmo de la vivo venonta – tiu vere estas vivo! Se ili nur scius!

66. Kiam ili enŝipiĝas, ili alvokas Allahon en sincera obeemo al Li, sed kiam Li portis ilin save al la marbordo, jen, ili aldonas al Li rivalojn,

اَرْجُلِهِمْ وَيَقُوْلُ ذُوْقُوْا مَا كُنْتُمْ تَعْمَلُوْنَ ﴿٥٦﴾

يٰعِبَادِيَ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اِنَّ اَرْضِيْ وَاسِعَةٌ فَاِيَّايَ

فَاعْبُدُوْنِ ﴿٥٧﴾

كُلُّ نَفْسٍ ذَآئِقَةُ الْمَوْتِ ثُمَّ اِلَيْنَا تُرْجَعُوْنَ ﴿٥٨﴾

وَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ لَنُبَوِّئَنَّهُمْ مِّنَ

الْجَنَّةِ غُرَفًا تَجْرِيْ مِنْ تَحْتِهَا الْاَنْهٰرُ خٰلِدِيْنَ فِيْهَا

نِعْمَ اَجْرُ الْعٰمِلِيْنَ ﴿٥٩﴾

الَّذِيْنَ صَبَرُوْا وَعَلٰى رَبِّهِمْ يَتَوَكَّلُوْنَ ﴿٦٠﴾

وَكَاَيِّنْ مِّنْ دَآبَّةٍ لَّا تَحْمِلُ رِزْقَهَا ۖ اَللّٰهُ يَرْزُقُهَا

وَاِيَّاكُمْ ۖ وَهُوَ السَّمِيْعُ الْعَلِيْمُ ﴿٦١﴾

وَلَئِنْ سَاَلْتَهُمْ مَّنْ خَلَقَ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ وَسَخَّرَ

الشَّمْسَ وَالْقَمَرَ لَيَقُوْلُنَّ اللّٰهُ ۚ فَاَنّٰى يُؤْفَكُوْنَ ﴿٦٢﴾

اَللّٰهُ يَبْسُطُ الرِّزْقَ لِمَنْ يَّشَآءُ مِنْ عِبَادِهٖ وَيَقْدِرُ

لَهٗ ۚ اِنَّ اللّٰهَ بِكُلِّ شَيْءٍ عَلِيْمٌ ﴿٦٣﴾

وَلَئِنْ سَاَلْتَهُمْ مَّنْ نَّزَّلَ مِنَ السَّمَآءِ مَآءً فَاَحْيَا بِهِ

الْاَرْضَ مِنْۢ بَعْدِ مَوْتِهَا لَيَقُوْلُنَّ اللّٰهُ ۚ قُلِ الْحَمْدُ

لِلّٰهِ ۚ بَلْ اَكْثَرُهُمْ لَا يَعْقِلُوْنَ ﴿٦٣﴾ ع

وَمَا هٰذِهِ الْحَيٰوةُ الدُّنْيَآ اِلَّا لَهْوٌ وَّلَعِبٌ ۚ وَاِنَّ

الدَّارَ الْاٰخِرَةَ لَهِيَ الْحَيَوَانُ ۘ لَوْ كَانُوْا يَعْلَمُوْنَ ﴿٦٤﴾

فَاِذَا رَكِبُوْا فِي الْفُلْكِ دَعَوُا اللّٰهَ مُخْلِصِيْنَ لَهُ الدِّيْنَ ۖ

فَلَمَّا نَجّٰىهُمْ اِلَى الْبَرِّ اِذَا هُمْ يُشْرِكُوْنَ ﴿٦٥﴾

لِيَكْفُرُوْا بِمَآ اٰتَيْنٰهُمْ ۙ وَلِيَتَمَتَّعُوْا ۚ فَسَوْفَ يَعْلَمُوْنَ ﴿٦٦﴾

67. por negi tion, kion Ni donis al ili, kaj por ĝui. Baldaŭ ili tamen ekscios!

68. Ĉu ili ne vidis, ke Ni faris sekura por ili la Sanktan Lokon, dum la homoj ĉirkaŭ ili estas forprenitaj? Ĉu ili ankoraŭ volas kredi la falson kaj rifuzi la favoron de Allah?

69. Kiu estas pli malpiega ol tiu, kiu elpensas mensogojn kontraŭ Allaĥ, aŭ rifuzas la veron, kiam ĝi venas al li? Ĉu ne estas restadejo en la infero por la miskredantoj?

70. Tiujn, kiuj strebas por Nia afero, Ni gvidos sur Niajn vojojn. Vere Allah estas kun tiuj, kiuj bonfaras.

أَوَلَمْ يَرَوْا أَنَّا جَعَلْنَا حَرَمًا آمِنًا وَيُتَخَطَّفُ النَّاسُ مِنْ
حَوْلِهِمْ ۚ أَفَبِالْبَاطِلِ يُؤْمِنُونَ وَبِنِعْمَةِ اللَّهِ يَكْفُرُونَ ﴿٦٧﴾
وَمَنْ أَظْلَمُ مِمَّنِ افْتَرَىٰ عَلَى اللَّهِ كَذِبًا أَوْ كَذَّبَ
بِالْحَقِّ لَمَّا جَاءَهُ ۚ أَلَيْسَ فِي جَهَنَّمَ مَثْوًى لِّلْكَافِرِينَ ﴿٦٨﴾
وَالَّذِينَ جَاهَدُوا فِينَا لَنَهْدِيَنَّهُمْ سُبُلَنَا ۚ وَإِنَّ اللَّهَ
لَمَعَ الْمُحْسِنِينَ ﴿٦٩﴾ ع

سُوْرَةُ الرُّوْمِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

الٓمّٓ ②

غُلِبَتِ الرُّوْمُ ③

فِيْٓ اَدْنَى الْاَرْضِ وَهُمْ مِّنْۢ بَعْدِ غَلَبِهِمْ سَيَغْلِبُوْنَ ④

فِيْ بِضْعِ سِنِيْنَ ۭ لِلّٰهِ الْاَمْرُ مِنْ قَبْلُ وَمِنْۢ بَعْدُ ۭ وَيَوْمَىِٕذٍ يَّفْرَحُ الْمُؤْمِنُوْنَ ⑤

بِنَصْرِ اللّٰهِ ۭ يَنْصُرُ مَنْ يَّشَاۗءُ ۭ وَهُوَ الْعَزِيْزُ الرَّحِيْمُ ⑥

وَعْدَ اللّٰهِ ۭ لَا يُخْلِفُ اللّٰهُ وَعْدَهٗ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَ النَّاسِ لَا يَعْلَمُوْنَ ⑦

يَعْلَمُوْنَ ظَاهِرًا مِّنَ الْحَيٰوةِ الدُّنْيَا ۚ وَهُمْ عَنِ الْاٰخِرَةِ هُمْ غٰفِلُوْنَ ⑧

اَوَلَمْ يَتَفَكَّرُوْا فِيْٓ اَنْفُسِهِمْ ۭ مَا خَلَقَ اللّٰهُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ وَمَا بَيْنَهُمَآ اِلَّا بِالْحَقِّ وَاَجَلٍ مُّسَمًّى ۭ وَاِنَّ كَثِيْرًا مِّنَ النَّاسِ بِلِقَاۗيِٕ رَبِّهِمْ لَكٰفِرُوْنَ ⑨

اَوَلَمْ يَسِيْرُوْا فِي الْاَرْضِ فَيَنْظُرُوْا كَيْفَ كَانَ عَاقِبَةُ الَّذِيْنَ مِنْ قَبْلِهِمْ ۭ كَانُوْٓا اَشَدَّ مِنْهُمْ قُوَّةً وَّاَثَارُوا الْاَرْضَ وَعَمَرُوْهَآ اَكْثَرَ مِمَّا عَمَرُوْهَا وَجَاۗءَتْهُمْ رُسُلُهُمْ بِالْبَيِّنٰتِ ۭ فَمَا كَانَ اللّٰهُ لِيَظْلِمَهُمْ وَلٰكِنْ كَانُوْٓا اَنْفُسَهُمْ يَظْلِمُوْنَ ⑩

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Alef Lām Mīm.*

3. Venkitaj estas la Romanoj**

4. en la lando samlima, sed post ilia malvenko ili venkos

5. post malmultaj jaroj – la suvereneco, antaŭe kaj poste, apartenas al Allah – kaj en tiu tago la kredantoj ĝojegos

6. per la helpo de Allah. Li helpas, kiun Li volas. Li estas la Ĉiopova, la Pardonema.

7. Allah donis Sian promeson. Allah ne rompas Sian promeson, sed la plej multaj homoj ne scias tion.

8. Ili konas nur la eksteran aspekton de ĉi tiu vivo, sed ili tute ignoras la vivon venontan.

9. Ĉu ili ne pripensis en sia interno, ke Allah kreis la ĉielojn kaj la teron kaj tion, kio estas inter ambaŭ, nur en Sia vero kaj por difinita tempo? Vere multaj inter la homoj ne volas kredi al la renkonto kun sia Sinjoro.

10. Ĉu ili do ne vojaĝis sur la tero por vidi, kiel estis la fino de tiuj, kiuj estis antaŭ ili? Tiuj estis pli fortaj ol ili je povo, kaj ili fosis la teron kaj ili kulturigis ĝin pli bone, ol ili faris, kaj al ili venis senditoj kun evidentaj signoj. Allah ne estis maljusta kontraŭ ili, sed ili estis maljustaj kontraŭ si mem.

---

* Mi, Allah, Ĉioscia

** Bizancanoj

ثُمَّ كَانَ عَاقِبَةَ الَّذِيْنَ اَسَآءُوا السُّوْٓاٰى اَنْ كَذَّبُوْا
بِاٰيٰتِ اللّٰهِ وَكَانُوْا بِهَا يَسْتَهْزِءُوْنَ ﴿١١﴾ ع
اَللّٰهُ يَبْدَؤُا الْخَلْقَ ثُمَّ يُعِيْدُهٗ ثُمَّ اِلَيْهِ تُرْجَعُوْنَ ﴿١٢﴾
وَيَوْمَ تَقُوْمُ السَّاعَةُ يُبْلِسُ الْمُجْرِمُوْنَ ﴿١٣﴾
وَلَمْ يَكُنْ لَّهُمْ مِّنْ شُرَكَآئِهِمْ شُفَعٰٓؤُا وَكَانُوْا
بِشُرَكَآئِهِمْ كٰفِرِيْنَ ﴿١٤﴾
وَيَوْمَ تَقُوْمُ السَّاعَةُ يَوْمَئِذٍ يَّتَفَرَّقُوْنَ ﴿١٥﴾
فَاَمَّا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ فَهُمْ فِيْ رَوْضَةٍ
يُّحْبَرُوْنَ ﴿١٦﴾
وَاَمَّا الَّذِيْنَ كَفَرُوْا وَكَذَّبُوْا بِاٰيٰتِنَا وَلِقَآءِ الْاٰخِرَةِ
فَاُولٰٓئِكَ فِي الْعَذَابِ مُحْضَرُوْنَ ﴿١٧﴾
فَسُبْحٰنَ اللّٰهِ حِيْنَ تُمْسُوْنَ وَحِيْنَ تُصْبِحُوْنَ ﴿١٨﴾
وَلَهُ الْحَمْدُ فِي السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ وَعَشِيًّا وَّحِيْنَ
تُظْهِرُوْنَ ﴿١٩﴾
يُخْرِجُ الْحَيَّ مِنَ الْمَيِّتِ وَيُخْرِجُ الْمَيِّتَ مِنَ
الْحَيِّ وَيُحْيِ الْاَرْضَ بَعْدَ مَوْتِهَا وَكَذٰلِكَ
تُخْرَجُوْنَ ﴿٢٠﴾ ع
وَمِنْ اٰيٰتِهٖٓ اَنْ خَلَقَكُمْ مِّنْ تُرَابٍ ثُمَّ اِذَآ اَنْتُمْ
بَشَرٌ تَنْتَشِرُوْنَ ﴿٢١﴾
وَمِنْ اٰيٰتِهٖٓ اَنْ خَلَقَ لَكُمْ مِّنْ اَنْفُسِكُمْ اَزْوَاجًا
لِّتَسْكُنُوْٓا اِلَيْهَا وَجَعَلَ بَيْنَكُمْ مَّوَدَّةً وَّرَحْمَةً
اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّقَوْمٍ يَّتَفَكَّرُوْنَ ﴿٢٢﴾

11. Poste malbonega estis la fino de tiuj, kiuj malbonfaris, ĉar ili rifuzis la signojn de Allah kaj kutimis moki pri ili.

12. Allah estigas la kreon, poste daŭrigas ĝian estigon. Al Li ili revenos.

13. En la tago, en kiu venos la "Horo", malesperos la kulpuloj.

14. Neniu el iliaj Dioj estos ilia propetanto kaj ili negos siajn Diojn.

15. En la tago, en kiu venos la "Horo", en tiu tago ili estos dividitaj.

16. Pri tiuj, kiuj kredis kaj bonfaris, sciu, ke ili estos feliĉaj en rava ĝardeno.

17. Pri tiuj, kiuj nekredis kaj negis Niajn signojn kaj la renkonton en la vivo venonta, sciu, ke ili estos forportitaj en la punon.

18. Estu do laŭdegata Allah, kiam vi eniras vespere kaj kiam vi eliras matene.

19. Al Li apartenas la laŭdego en la ĉieloj kaj sur la tero, posttagmeze, kaj kiam vi vidas la sunsubiron.

20. Li estigas vivantojn el la mortintoj kaj estigas mortintojn el la vivantoj, kaj Li revivigas la teron, post kiam ĝi mortis. Tiel vi revenos.

21. Unu el Liaj signoj estas, ke Li kreis vin el polvo, poste – jen – vi estas homoj multiĝantaj.

22. Unu el Liaj signoj estas, ke Li kreis por vi edzinojn el vi mem, por ke vi konfidu je ili, kaj Li estigis inter vi amon kaj kompaton. Vere en tio estas signo por popolo pripensema.

وَمِنْ اٰيٰتِهٖ خَلْقُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ وَاخْتِلَافُ
اَلْسِنَتِكُمْ وَاَلْوَانِكُمْ ۭ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّلْعٰلِمِيْنَ ﴿٢٢﴾

23. Unu el Liaj signoj estas la kreo de la ĉieloj kaj de la tero, kaj la diverseco de viaj lingvoj kaj haŭtkoloroj. Vere en tio estas signo por la kreitaĵoj.

وَمِنْ اٰيٰتِهٖ مَنَامُكُمْ بِالَّيْلِ وَالنَّهَارِ وَابْتِغَاۗؤُكُمْ
مِّنْ فَضْلِهٖ ۭ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّقَوْمٍ يَّسْمَعُوْنَ ﴿٢٣﴾

24. Unu el Liaj signoj estas via dormo, nokte kaj tage, kaj via strebado al Lia graco. Vere en tio estas signo por popolo aŭdanta.

وَمِنْ اٰيٰتِهٖ يُرِيْكُمُ الْبَرْقَ خَوْفًا وَّطَمَعًا وَّيُنَزِّلُ
مِنَ السَّمَاۗءِ مَاۗءً فَيُحْيٖ بِهِ الْاَرْضَ بَعْدَ مَوْتِهَا ۭ
اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّقَوْمٍ يَّعْقِلُوْنَ ﴿٢٤﴾

25. Unu el Liaj signoj estas, ke Li montras al vi la fulmon kiel timindaĵon kaj esperindaĵon, kaj sendas el la nuboj akvon kaj revivigas per ĝi la teron, post kiam ĝi mortis. Vere en tio estas signo por popolo, kiu komprenas.

وَمِنْ اٰيٰتِهٖٓ اَنْ تَقُوْمَ السَّمَاۗءُ وَالْاَرْضُ بِاَمْرِهٖ ۭ ثُمَّ
اِذَا دَعَاكُمْ دَعْوَةً ۡ مِّنَ الْاَرْضِ ۡ اِذَآ اَنْتُمْ
تَخْرُجُوْنَ ﴿٢٥﴾

26. Unu el Liaj signoj estas, ke la ĉielo kaj la tero staras firme pro Lia ordono. Poste, kiam Li per voko vokos vin el la tero, jen vi eliros.

وَلَهٗ مَنْ فِي السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ۭ كُلٌّ لَّهٗ قٰنِتُوْنَ ﴿٢٦﴾

27. Al Li apartenas, kiu estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Ĉiuj estas obeaj al Li.

وَهُوَ الَّذِيْ يَبْدَؤُا الْخَلْقَ ثُمَّ يُعِيْدُهٗ وَهُوَ اَهْوَنُ
عَلَيْهِ ۭ وَلَهُ الْمَثَلُ الْاَعْلٰى فِي السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ۚ
وَهُوَ الْعَزِيْزُ الْحَكِيْمُ ﴿٢٧﴾ ع

28. Estas Li Tiu, kiu estigas la kreon, poste reestigas ĝin, kaj tio estas plej facila por Li. Al Li apartenas la plej eminenta similaĵo en la ĉieloj kaj sur la tero. Li estas la Ĉiopova, la Saĝa.

ضَرَبَ لَكُمْ مَّثَلًا مِّنْ اَنْفُسِكُمْ ۭ هَلْ لَكُمْ مِّنْ مَّا
مَلَكَتْ اَيْمَانُكُمْ مِّنْ شُرَكَاۗءَ فِيْ مَا رَزَقْنٰكُمْ فَاَنْتُمْ
فِيْهِ سَوَاۗءٌ تَخَافُوْنَهُمْ كَخِيْفَتِكُمْ اَنْفُسَكُمْ ۭ كَذٰلِكَ
نُفَصِّلُ الْاٰيٰتِ لِقَوْمٍ يَّعْقِلُوْنَ ﴿٢٨﴾

29. Li prezentas al vi similaĵon pri vi mem, Ĉu vi havas inter tiuj, kiujn posedas via dekstra mano, kunulojn je tio, kion Ni donis al vi, tiel ke ili estas egalaj al vi, kaj ke vi timas ilin, kiel vi timas unu la alian? Tiel Ni klarigas la signojn por popolo, kiu komprenas.*

بَلِ اتَّبَعَ الَّذِيْنَ ظَلَمُوْٓا اَهْوَاۗءَهُمْ بِغَيْرِ عِلْمٍ ۚ فَمَنْ
يَّهْدِيْ مَنْ اَضَلَّ اللّٰهُ ۭ وَمَا لَهُمْ مِّنْ نّٰصِرِيْنَ ﴿٢٩﴾

30. Ne! La malpieguloj sekvas siajn malbonajn pasiojn sen scio. Kiu do povas gvidi tiun, kiun Allah lasas erari? Por ili ne estas helpantoj.

فَاَقِمْ وَجْهَكَ لِلدِّيْنِ حَنِيْفًا ۭ فِطْرَتَ اللّٰهِ الَّتِيْ فَطَرَ
النَّاسَ عَلَيْهَا ۭ لَا تَبْدِيْلَ لِخَلْقِ اللّٰهِ ۭ ذٰلِكَ الدِّيْنُ

* Interpreto: Se estas evidente, ke estro kaj sklavo ne estas egalaj, kvankam ambaŭ estas homoj, kiel vi povas supozi, ke Allah estas egala al la idoloj el ligno aŭ ŝtono, kiujn la idolanoj adoras?

الْقَيِّمُ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَ النَّاسِ لَا يَعْلَمُوْنَ ﴿٣٠﴾

31. Turnu vian vizaĝon al la religio kiel justulo kaj al la naturo kreita de Allah, en kiu Li kreis la homaron. Ne estas ŝanĝo en la kreo de Allah. Tiu estas la ĉiama religio, la plej multaj homoj tamen ne scias.

مُنِيْبِيْنَ اِلَيْهِ وَاتَّقُوْهُ وَاَقِيْمُوا الصَّلٰوةَ وَلَا تَكُوْنُوْا مِنَ الْمُشْرِكِيْنَ ﴿٣١﴾

32. Turnu vin al Li kaj respektegu Lin kaj levu la preĝon kaj ne estu idolanoj,

مِنَ الَّذِيْنَ فَرَّقُوْا دِيْنَهُمْ وَكَانُوْا شِيَعًا ۭ كُلُّ حِزْبٍۢ بِمَا لَدَيْهِمْ فَرِحُوْنَ ﴿٣٢﴾

33. kiel tiuj, kiuj dividas sian kredon kaj dividiĝas en partiojn – ĉiu partio ĝojas pro tio, kion ĝi posedas.

وَاِذَا مَسَّ النَّاسَ ضُرٌّ دَعَوْا رَبَّهُمْ مُّنِيْبِيْنَ اِلَيْهِ ثُمَّ اِذَآ اَذَاقَهُمْ مِّنْهُ رَحْمَةً اِذَا فَرِيْقٌ مِّنْهُمْ بِرَبِّهِمْ يُشْرِكُوْنَ ﴿٣٣﴾

34. Kiam malfeliĉo trafas la homojn, ili vokas sian Sinjoron turnante sin al Li, poste tamen, kiam Li gustumigas al ili Sian favoron, jen iuj el ili aldonas rivalojn al Li,

لِيَكْفُرُوْا بِمَآ اٰتَيْنٰهُمْ ۭ فَتَمَتَّعُوْا ۣ فَسَوْفَ تَعْلَمُوْنَ ﴿٣٤﴾

35. por negi tion, kion Ni donis al ili. Ĝojegu do iome, baldaŭ vi ekscios!

اَمْ اَنْزَلْنَا عَلَيْهِمْ سُلْطٰنًا فَهُوَ يَتَكَلَّمُ بِمَا كَانُوْا بِهٖ يُشْرِكُوْنَ ﴿٣٥﴾

36. Ĉu Ni sendis al ili aŭtoritaton, kiu garantius tion, kion ili aldonis al Li kiel rivalon?

وَاِذَآ اَذَقْنَا النَّاسَ رَحْمَةً فَرِحُوْا بِهَا ۚ وَاِنْ تُصِبْهُمْ سَيِّئَةٌۢ بِمَا قَدَّمَتْ اَيْدِيْهِمْ اِذَا هُمْ يَقْنَطُوْنَ ﴿٣٦﴾

37. Kiam Ni gustumigas al la homoj la favoron, ili ĝojas pro ĝi. Se ilin tamen trafas malfeliĉo pro tio, kion faris iliaj manoj, tiam ili malesperas.

اَوَلَمْ يَرَوْا اَنَّ اللّٰهَ يَبْسُطُ الرِّزْقَ لِمَنْ يَّشَاۗءُ وَيَقْدِرُ ۭ اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّقَوْمٍ يُّؤْمِنُوْنَ ﴿٣٧﴾

38. Ĉu ili do ne vidis, ke Allah pliigas kaj malpliigas la rimedojn por la vivteno, de kiu Li volas? Vere en tio estas signo por popolo kredanta.

فَاٰتِ ذَا الْقُرْبٰى حَقَّهٗ وَالْمِسْكِيْنَ وَابْنَ السَّبِيْلِ ۭ ذٰلِكَ خَيْرٌ لِّلَّذِيْنَ يُرِيْدُوْنَ وَجْهَ اللّٰهِ ۡ وَاُولٰۗىِٕكَ هُمُ الْمُفْلِحُوْنَ ﴿٣٨﴾

39. Donu do al la parenco tion, kio apartenas al li, kaj ankaŭ al la malriĉuloj kaj al la vojiranto. Tio estas plej bona por tiuj, kiuj deziregas vidi la vizaĝon de Allah. Tiuj estos sukcesaj.

وَمَآ اٰتَيْتُمْ مِّنْ رِّبًا لِّيَرْبُوَا۟ فِيْٓ اَمْوَالِ النَّاسِ فَلَا يَرْبُوْا عِنْدَ اللّٰهِ ۚ وَمَآ اٰتَيْتُمْ مِّنْ زَكٰوةٍ تُرِيْدُوْنَ وَجْهَ اللّٰهِ فَاُولٰۗىِٕكَ هُمُ الْمُضْعِفُوْنَ ﴿٣٩﴾

40. Tio, kion vi pruntedonas kun procentego, por ke ĝi pliiĝu en la proprajoj de la homoj, ne pliiĝos antaŭ Allah; tio tamen, kion vi donas kiel almozon, strebante al la ĉeesto de Allah – estas ili tiuj, kiuj ricevos pliigon multoblan.

اَللّٰهُ الَّذِيْ خَلَقَكُمْ ثُمَّ رَزَقَكُمْ ثُمَّ يُمِيْتُكُمْ ثُمَّ

41. Estas Allah Tiu, kiu kreis kaj poste provizis vin, poste lasis vin morti, poste revivi-

gos vin. Ĉu estas inter viaj Dioj iu, kiu povus fari ion tian? Sankta Li estas kaj eminenta super tio, kion ili aldonas al Li kiel rivalon!

42. Malpuriĝo aperis en la lando kaj sur la maro pro tio, kion faris la manoj de la homoj, por ke Li gustumigu al ili la sekvojn de kelkaj el iliaj agoj kaj por ke ili pentu.

43. Diru: "Vojaĝu en la lando kaj rigardu, kiel estis la fino de tiuj antaŭe! La plej multaj el ili estis idolanoj".

44. Turnu vian vizaĝon al la religio daŭra, antaŭ ol venos la tago, pri kiu ne ekzistas defendo kontraŭ Allah. En tiu tago ili estos dividitaj.

45. Sur tiun, kiu miskredis, falos lia miskredo! Kaj la bonfarantoj pretigas la bonon por si mem.

46. Li rekompencu la kredantojn kaj la bonfarantojn per Sia graco. Vere Allah ne amas la miskredantojn.

47. Unu el Liaj signoj estas, ke Li sendis la ventojn kun la bona novaĵo, por ke Li gustumigu al vi Sian favoron, kaj irigu la ŝipojn laŭ Sia ordono, kaj por ke vi strebu al Lia graco, kaj por ke vi estu dankaj.

48. Vere Ni sendis senditojn antaŭ vi al iliaj popoloj – kaj ili venis kun evidentaj signoj – poste Ni punis la kulpulojn, kaj estis Nia koncerno helpi la kredantojn.

49. Estas Allah Tiu, kiu sendas la ventojn, kiuj levas la nubojn, poste Li disvastigas ĉi tiujn en la ĉielo, kiel Li volas, kaj Li amasigas ilin, tavolo super tavolon; tiam vi vidas la pluvon eliri el ilia mezo. Kiam Li faligas ĝin sur tiun el Siaj servantoj, kiun Li volas, jen ili ĝojegas,

يُحْيِيكُمْ ۖ هَلْ مِن شُرَكَآئِكُم مَّن يَفْعَلُ مِن ذَٰلِكُم
مِّن شَيْءٍ ۚ سُبْحَٰنَهُۥ وَتَعَٰلَىٰ عَمَّا يُشْرِكُونَ ﴿٤٠﴾
ظَهَرَ ٱلْفَسَادُ فِى ٱلْبَرِّ وَٱلْبَحْرِ بِمَا كَسَبَتْ أَيْدِى
ٱلنَّاسِ لِيُذِيقَهُم بَعْضَ ٱلَّذِى عَمِلُوا۟ لَعَلَّهُمْ
يَرْجِعُونَ ﴿٤١﴾
قُلْ سِيرُوا۟ فِى ٱلْأَرْضِ فَٱنظُرُوا۟ كَيْفَ كَانَ عَٰقِبَةُ
ٱلَّذِينَ مِن قَبْلُ ۚ كَانَ أَكْثَرُهُم مُّشْرِكِينَ ﴿٤٢﴾
فَأَقِمْ وَجْهَكَ لِلدِّينِ ٱلْقَيِّمِ مِن قَبْلِ أَن يَأْتِىَ
يَوْمٌ لَّا مَرَدَّ لَهُۥ مِنَ ٱللَّهِ يَوْمَئِذٍ يَصَّدَّعُونَ ﴿٤٣﴾
مَن كَفَرَ فَعَلَيْهِ كُفْرُهُۥ ۖ وَمَنْ عَمِلَ صَٰلِحًا فَلِأَنفُسِهِمْ
يَمْهَدُونَ ﴿٤٤﴾
لِيَجْزِىَ ٱلَّذِينَ ءَامَنُوا۟ وَعَمِلُوا۟ ٱلصَّٰلِحَٰتِ مِن فَضْلِهِۦٓ ۚ
إِنَّهُۥ لَا يُحِبُّ ٱلْكَٰفِرِينَ ﴿٤٥﴾
وَمِنْ ءَايَٰتِهِۦٓ أَن يُرْسِلَ ٱلرِّيَاحَ مُبَشِّرَٰتٍ وَلِيُذِيقَكُم
مِّن رَّحْمَتِهِۦ وَلِتَجْرِىَ ٱلْفُلْكُ بِأَمْرِهِۦ وَلِتَبْتَغُوا۟ مِن
فَضْلِهِۦ وَلَعَلَّكُمْ تَشْكُرُونَ ﴿٤٦﴾
وَلَقَدْ أَرْسَلْنَا مِن قَبْلِكَ رُسُلًا إِلَىٰ قَوْمِهِمْ فَجَآءُوهُم
بِٱلْبَيِّنَٰتِ فَٱنتَقَمْنَا مِنَ ٱلَّذِينَ أَجْرَمُوا۟ ۖ وَكَانَ حَقًّا
عَلَيْنَا نَصْرُ ٱلْمُؤْمِنِينَ ﴿٤٧﴾
ٱللَّهُ ٱلَّذِى يُرْسِلُ ٱلرِّيَٰحَ فَتُثِيرُ سَحَابًا فَيَبْسُطُهُۥ
فِى ٱلسَّمَآءِ كَيْفَ يَشَآءُ وَيَجْعَلُهُۥ كِسَفًا فَتَرَى ٱلْوَدْقَ
يَخْرُجُ مِنْ خِلَٰلِهِۦ ۖ فَإِذَآ أَصَابَ بِهِۦ مَن يَشَآءُ مِنْ

عِبَادِهٖٓ إِذَا هُمْ يَسْتَبْشِرُونَ ﴿٤٨﴾

50. kvankam ili malĝojegis antaŭe, antaŭ ol ĝi falis sur ilin.

وَإِنْ كَانُوا مِنْ قَبْلِ أَنْ يُنَزَّلَ عَلَيْهِمْ مِنْ قَبْلِهِ

لَمُبْلِسِينَ ﴿٤٩﴾

51. Rigardu do la postsignojn de la kompato de Allah, kiel ĝi revivigas la teron, post kiam ĝi mortis. Vere Li ankaŭ revivigos la mortintojn. Li havas povon super ĉiuj aferoj.

فَانْظُرْ إِلَىٰٓ آثَارِ رَحْمَتِ اللَّهِ كَيْفَ يُحْيِ الْأَرْضَ بَعْدَ

مَوْتِهَا ۚ إِنَّ ذَٰلِكَ لَمُحْيِ الْمَوْتَىٰ ۖ وَهُوَ عَلَىٰ كُلِّ شَيْءٍ

قَدِيرٌ ﴿٥٠﴾

52. Se Ni sendus venton kaj ili vidus sian rikolton flaviĝi, ili certe persistus en sia miskredo.

وَلَئِنْ أَرْسَلْنَا رِيحًا فَرَأَوْهُ مُصْفَرًّا لَظَلُّوا مِنْ بَعْدِهِ

يَكْفُرُونَ ﴿٥١﴾

53. Vi ne povus igi la mortintojn aŭdi kaj la surdulojn aŭdi la vokon, kiam ili turnas siajn dorsojn,

فَإِنَّكَ لَا تُسْمِعُ الْمَوْتَىٰ وَلَا تُسْمِعُ الصُّمَّ الدُّعَاءَ إِذَا

وَلَّوْا مُدْبِرِينَ ﴿٥٢﴾

54. kaj vi ne povus gvidi la blindulojn for de ilia erarado. Vi povus nur fari aŭdantaj tiujn, kiuj kredas je Niaj signoj kaj submetiĝas.

وَمَا أَنْتَ بِهَادِ الْعُمْيِ عَنْ ضَلَالَتِهِمْ ۖ إِنْ تُسْمِعُ إِلَّا

مَنْ يُؤْمِنُ بِآيَاتِنَا فَهُمْ مُسْلِمُونَ ﴿٥٣﴾ ع

55. Estas Allah Tiu, kiu kreis vin en malforteco, poste tamen post la malforteco Li donis al vi la fortecon, poste tamen post la forteco Li donis denove al vi la malfortecon kaj grizan hararon. Li kreas, kion Li volas. Li estas la Ĉioscia, la Ĉiopova.

اللَّهُ الَّذِي خَلَقَكُمْ مِنْ ضَعْفٍ ثُمَّ جَعَلَ مِنْ بَعْدِ

ضَعْفٍ قُوَّةً ثُمَّ جَعَلَ مِنْ بَعْدِ قُوَّةٍ ضَعْفًا وَشَيْبَةً ۚ

يَخْلُقُ مَا يَشَاءُ ۖ وَهُوَ الْعَلِيمُ الْقَدِيرُ ﴿٥٤﴾

56. En la tago, en kiu venos la "Horo", la pekuloj ĵuros, ke ili ne restis pli ol unu horon. Tiel ili ĉiam mensogis.

وَيَوْمَ تَقُومُ السَّاعَةُ يُقْسِمُ الْمُجْرِمُونَ ۙ مَا لَبِثُوا

غَيْرَ سَاعَةٍ ۚ كَذَٰلِكَ كَانُوا يُؤْفَكُونَ ﴿٥٥﴾

57. Tiuj tamen, al kiuj estis donita la vera scio laŭ la kredo, diros: "Vi certe restis, laŭ la Libro de Allah, ĝis la tago de la revivigo, sed vi ne sciis tion".

وَقَالَ الَّذِينَ أُوتُوا الْعِلْمَ وَالْإِيمَانَ لَقَدْ لَبِثْتُمْ

فِي كِتَابِ اللَّهِ إِلَىٰ يَوْمِ الْبَعْثِ ۖ فَهَٰذَا يَوْمُ الْبَعْثِ وَ

لَٰكِنَّكُمْ كُنْتُمْ لَا تَعْلَمُونَ ﴿٥٦﴾

لَهٗ فِي الْاٰخِرَةِ مِنْ نَّصِيْبٍ ﴿٢٠﴾

21. Kiu deziras la rikolton de la vivo venonta, al tiu Ni pliigas lian rikolton, kaj, kiu deziras la rikolton de ĉi tiu vivo, al tiu Ni donas iom da ĝi, sed li ne partoprenos en la vivo venonta.

اَمْ لَهُمْ شُرَكٰٓؤُا شَرَعُوْا لَهُمْ مِّنَ الدِّيْنِ مَا لَمْ يَاْذَنْۢ

بِهِ اللّٰهُ ۭ وَلَوْلَا كَلِمَةُ الْفَصْلِ لَقُضِيَ بَيْنَهُمْ ۭ وَ

اِنَّ الظّٰلِمِيْنَ لَهُمْ عَذَابٌ اَلِيْمٌ ﴿٢١﴾

22. Ĉu ili havas idolojn, kiuj dekretis por ili iun ajn kredon, kiun Allah ne ordonis? Se ne estus eldirita la vorto, inter ili jam estus juĝite, kaj certe por la malpieguloj estos dolora puno.

تَرَى الظّٰلِمِيْنَ مُشْفِقِيْنَ مِمَّا كَسَبُوْا وَهُوَ وَاقِعٌۢ

بِهِمْ ۭ وَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ فِيْ رَوْضٰتِ

الْجَنّٰتِ ۚ لَهُمْ مَّا يَشَاۗءُوْنَ عِنْدَ رَبِّهِمْ ۭ ذٰلِكَ هُوَ

الْفَضْلُ الْكَبِيْرُ ﴿٢٢﴾

23. Vi vidos la malpiegulojn timi pro tio, kion ili meritis, kaj ĝi certe refalos sur ilin, sed tiuj, kiuj kredis kaj bonfaris, eniros en la herbejojn de la Paradizo. Ili posedos ĉion, kion ili deziras, apud sia Sinjoro. Tio estas la granda graco.

ذٰلِكَ الَّذِيْ يُبَشِّرُ اللّٰهُ عِبَادَهُ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا

24. Estas tio, pri kio Allah donas la bonan novaĵon al Siaj servantoj, kiuj kredas kaj bonfaras. Diru: "Mi ne volas iun ajn rekompencon pro tio, krom la amo al la parencoj".

الصّٰلِحٰتِ ۗ قُلْ لَّآ اَسْـَٔلُكُمْ عَلَيْهِ اَجْرًا اِلَّا الْمَوَدَّةَ
فِى الْقُرْبٰى ۗ وَمَنْ يَّقْتَرِفْ حَسَنَةً نَّزِدْ لَهٗ فِيْهَا
حُسْنًا ۗ اِنَّ اللّٰهَ غَفُوْرٌ شَكُوْرٌ ﴿٢٣﴾

Kiu plenumas bonan agon, por tiu Ni faras ĝin eĉ pli bona. Vere Allah estas senkulpigema, indulgema.

اَمْ يَقُوْلُوْنَ افْتَرٰى عَلَى اللّٰهِ كَذِبًا ۚ فَاِنْ يَّشَاِ اللّٰهُ
يَخْتِمْ عَلٰى قَلْبِكَ ۗ وَيَمْحُ اللّٰهُ الْبَاطِلَ وَيُحِقُّ الْحَقَّ
بِكَلِمٰتِهٖ ۗ اِنَّهٗ عَلِيْمٌۢ بِذَاتِ الصُّدُوْرِ ﴿٢٤﴾

25. Ĉu ili diras: "Li elpensis mensogon kontraŭ Allah"? Se Allah volus Li povus sigeli vian koron. Allah tamen forigas la falson kaj gardas la veron per Sia vorto. Vere Li konas la internon de la brustoj.

وَهُوَ الَّذِىْ يَقْبَلُ التَّوْبَةَ عَنْ عِبَادِهٖ وَيَعْفُوْا
عَنِ السَّيِّاٰتِ وَيَعْلَمُ مَا تَفْعَلُوْنَ ﴿٢٥﴾

26. Estas Li Tiu, kiu akceptas la penton de Siaj servantoj kaj pardonas la pekojn kaj scias, kion vi faras.

وَيَسْتَجِيْبُ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ وَيَزِيْدُهُمْ
مِّنْ فَضْلِهٖ ۗ وَالْكٰفِرُوْنَ لَهُمْ عَذَابٌ شَدِيْدٌ ﴿٢٦﴾

27. Li plenumas la peton de tiuj, kiuj kredas kaj bonfaras, kaj Li plialtigas ilin per Sia graco. Por la miskredantoj estos severa puno.

وَلَوْ بَسَطَ اللّٰهُ الرِّزْقَ لِعِبَادِهٖ لَبَغَوْا فِى الْاَرْضِ
وَلٰكِنْ يُّنَزِّلُ بِقَدَرٍ مَّا يَشَآءُ ۗ اِنَّهٗ بِعِبَادِهٖ خَبِيْرٌۢ
بَصِيْرٌ ﴿٢٧﴾

28. Se Allah pliigus por Siaj servantoj la vivtenon, ili malhumiliĝus sur la tero; Li tamen sendas ĝin moderece, kiel Li volas. Li vere bone konas kaj vidas Siajn servantojn.

وَهُوَ الَّذِىْ يُنَزِّلُ الْغَيْثَ مِنْۢ بَعْدِ مَا قَنَطُوْا
وَيَنْشُرُ رَحْمَتَهٗ ۗ وَهُوَ الْوَلِىُّ الْحَمِيْدُ ﴿٢٨﴾

29. Estas Li Tiu, kiu sendas la pluvon, post kiam ili malesperis, kaj kiu disdonas Sian favoron. Li estas la Protektanto, la Laŭdegenda.

وَمِنْ اٰيٰتِهٖ خَلْقُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ وَمَا بَثَّ
فِيْهِمَا مِنْ دَآبَّةٍ ۗ وَهُوَ عَلٰى جَمْعِهِمْ اِذَا يَشَآءُ
قَدِيْرٌ ﴿٢٩﴾ ع

30. Unu el Liaj signoj estas la kreo de la ĉieloj kaj de la tero kaj de ĉiuj vivantaj estaĵoj, kiujn Li dissendis en ilin ambaŭ. Li havas la povon por kunvenigi ilin, kiam Li volas.

وَمَآ اَصَابَكُمْ مِّنْ مُّصِيْبَةٍ فَبِمَا كَسَبَتْ اَيْدِيْكُمْ
وَيَعْفُوْا عَنْ كَثِيْرٍ ﴿٣٠﴾

31. Kio ajn trafas vin el la malfeliĉoj, tio okazas pro la faroj de viaj manoj. Li pardonas multe.

وَمَآ اَنْتُمْ بِمُعْجِزِيْنَ فِى الْاَرْضِ ۚ وَمَا لَكُمْ
مِّنْ دُوْنِ اللّٰهِ مِنْ وَّلِىٍّ وَّلَا نَصِيْرٍ ﴿٣١﴾

32. Vi ne povas venki sur la tero. Krom Allah ne ekzistas por vi protektanto nek helpanto.

33. Unu el Liaj signoj estas ankaŭ la ŝipoj, kiuj sulkas la maron kiel pintoj de montoj.

34. Se Li volas, Li povas moderigi la venton, por ke ili kuŝu senmovaj sur ĝia dorso – vere en tio estas signoj por ĉiu persistemulo, dankemulo –

35. aŭ Li povas dronigi ilin pro tio, kion la homoj meritis – Li pardonas multe –

36. kaj por ke tiuj, kiuj disputas pri Niaj revelacioj, komprenu, ke por ili ne estos rifuĝo.

37. Ĉio, kio estis donita al vi, estas nur nedaŭra ĝuado de ĉi tiu vivo. Kio troviĝas ĉe Allah estas pli bona kaj daŭra por tiuj, kiuj kredas kaj konfidas je sia Sinjoro,

38. kaj evitas la gravajn pekojn kaj la hontindaĵon kaj pardonas, kiam ili koleris,

39. kaj obeas sian Sinjoron kaj levas la preĝon, kaj kies agado estas objekto de reciproka konsiliĝo, kaj kiuj almozdonas el tio, kion Ni donis al ili,

40. kaj defendas sin nur, kiam trafas ilin malfeliĉo.

41. La repago por malbono estu egala malbono; por tiu tamen, kiu pardonas kaj estigas pliboniĝon, la rekompenco estas certa ĉe Allah. Vere Li ne amas la malbonfarantojn.

42. Kontraŭ tiu, kiu sin venĝas, kiam li ricevis maljustaĵon, ne estas kaŭzo por riproĉo,

43. tiu ĉi nur trafas tiujn, kiuj agas maljuste kontraŭ la homoj, kaj estas malpiegaj sur la tero kontraŭ la vero. Por ili estos dolora puno.

44. Kaj pri tiu, kiu paciencas kaj pardonas, sciu: tiuj estas signoj de forta spirito.

وَمِنْ اٰيٰتِهِ الْجَوَارِ فِي الْبَحْرِ كَالْاَعْلَامِ ﴿٣٢﴾
اِنْ يَّشَاْ يُسْكِنِ الرِّيْحَ فَيَظْلَلْنَ رَوَاكِدَ عَلٰى ظَهْرِهٖ ؕ
اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَاٰيٰتٍ لِّكُلِّ صَبَّارٍ شَكُوْرٍ ﴿٣٣﴾
اَوْ يُوْبِقْهُنَّ بِمَا كَسَبُوْا وَيَعْفُ عَنْ كَثِيْرٍ ﴿٣٤﴾
وَّيَعْلَمَ الَّذِيْنَ يُجَادِلُوْنَ فِيْٓ اٰيٰتِنَا ؕ مَا لَهُمْ مِّنْ
مَّحِيْصٍ ﴿٣٥﴾
فَمَآ اُوْتِيْتُمْ مِّنْ شَيْءٍ فَمَتَاعُ الْحَيٰوةِ الدُّنْيَا ۚ
وَمَا عِنْدَ اللّٰهِ خَيْرٌ وَّاَبْقٰى لِلَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَلٰى
رَبِّهِمْ يَتَوَكَّلُوْنَ ﴿٣٦﴾ ۚ
وَالَّذِيْنَ يَجْتَنِبُوْنَ كَبٰٓئِرَ الْاِثْمِ وَالْفَوَاحِشَ وَاِذَا
مَا غَضِبُوْا هُمْ يَغْفِرُوْنَ ﴿٣٧﴾ ۚ
وَالَّذِيْنَ اسْتَجَابُوْا لِرَبِّهِمْ وَاَقَامُوا الصَّلٰوةَ ۪ وَاَمْرُهُمْ
شُوْرٰى بَيْنَهُمْ ۪ وَمِمَّا رَزَقْنٰهُمْ يُنْفِقُوْنَ ﴿٣٨﴾ ۚ
وَالَّذِيْنَ اِذَآ اَصَابَهُمُ الْبَغْيُ هُمْ يَنْتَصِرُوْنَ ﴿٣٩﴾
وَجَزٰٓؤُا سَيِّئَةٍ سَيِّئَةٌ مِّثْلُهَا ۚ فَمَنْ عَفَا وَاَصْلَحَ
فَاَجْرُهٗ عَلَى اللّٰهِ ؕ اِنَّهٗ لَا يُحِبُّ الظّٰلِمِيْنَ ﴿٤٠﴾
وَلَمَنِ انْتَصَرَ بَعْدَ ظُلْمِهٖ فَاُولٰٓئِكَ مَا عَلَيْهِمْ مِّنْ
سَبِيْلٍ ﴿٤١﴾ ؕ
اِنَّمَا السَّبِيْلُ عَلَى الَّذِيْنَ يَظْلِمُوْنَ النَّاسَ وَيَبْغُوْنَ
فِي الْاَرْضِ بِغَيْرِ الْحَقِّ ؕ اُولٰٓئِكَ لَهُمْ عَذَابٌ اَلِيْمٌ ﴿٤٢﴾
وَلَمَنْ صَبَرَ وَغَفَرَ اِنَّ ذٰلِكَ لَمِنْ عَزْمِ الْاُمُوْرِ ﴿٤٣﴾ ع
وَمَنْ يُّضْلِلِ اللّٰهُ فَمَا لَهٗ مِنْ وَّلِيٍّ مِّنْ بَعْدِهٖ ؕ

45. Por tiu, kiun Allah lasas erari, ne estas protektanto post Li, kaj vi vidos la malpiegulojn diri, vidinte la punon: "Ĉu do ne ekzistas vojo por la reveno? "

وَتَرَى الظّٰلِمِيْنَ لَمَّا رَاَوُا الْعَذَابَ يَقُوْلُوْنَ هَلْ
اِلٰى مَرَدٍّ مِّنْ سَبِيْلٍ ﴿٤٥﴾

46. kaj vi vidos ilin destinitaj al la fajro, humiligitaj pro la honto, rigardantaj per kaŝita rigardo. La kredantoj tamen diros: "Malgajnantoj vere estas tiuj, kiuj perdas sin mem kaj siajn familiojn en la tago de la reviviĝo". Aŭskultu! Vere la malpieguloj estas en daŭra turmento,

وَتَرٰىهُمْ يُعْرَضُوْنَ عَلَيْهَا خٰشِعِيْنَ مِنَ الذُّلِّ
يَنْظُرُوْنَ مِنْ طَرْفٍ خَفِيٍّ ؕ وَقَالَ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا
اِنَّ الْخٰسِرِيْنَ الَّذِيْنَ خَسِرُوْٓا اَنْفُسَهُمْ وَاَهْلِيْهِمْ
يَوْمَ الْقِيٰمَةِ ؕ اَلَآ اِنَّ الظّٰلِمِيْنَ فِيْ عَذَابٍ مُّقِيْمٍ ﴿٤٦﴾

47. kaj por ili ne estas subtenantoj, kiuj povus helpi ilin kontraŭ Allah. Por tiu, kiun Allah lasas erari, ne ekzistas vojoj.

وَمَا كَانَ لَهُمْ مِّنْ اَوْلِيَآءَ يَنْصُرُوْنَهُمْ مِّنْ دُوْنِ
اللّٰهِ ؕ وَمَنْ يُّضْلِلِ اللّٰهُ فَمَا لَهٗ مِنْ سَبِيْلٍ ؕ ﴿٤٧﴾

48. Obeu vian Sinjoron, antaŭ ol venos la tago, de kiu ne eblas fuĝi kontraŭ Allah. En tiu tago ne estos por vi rifuĝejo kaj ne estos eble negi.

اِسْتَجِيْبُوْا لِرَبِّكُمْ مِّنْ قَبْلِ اَنْ يَّاْتِيَ يَوْمٌ لَّا مَرَدَّ
لَهٗ مِنَ اللّٰهِ ؕ مَا لَكُمْ مِّنْ مَّلْجَاٍ يَّوْمَئِذٍ وَّمَا لَكُمْ
مِّنْ نَّكِيْرٍ ﴿٤٨﴾

49. Se ili tamen turnas sin for, sciu: vere Ni ne sendis vin kiel gardanton super ili. Vi nur havas la taskon de la proklamado. Kiam do Ni al la homoj gustumigas Nian kompaton, ili ĝojas pro tio. Kiam ilin tamen trafas malfeliĉo pro tio, kion iliaj manoj faris, tiam la homo estas sendanka.

فَاِنْ اَعْرَضُوْا فَمَآ اَرْسَلْنٰكَ عَلَيْهِمْ حَفِيْظًا ؕ اِنْ عَلَيْكَ
اِلَّا الْبَلٰغُ ؕ وَاِنَّآ اِذَآ اَذَقْنَا الْاِنْسَانَ مِنَّا رَحْمَةً فَرِحَ
بِهَا ۚ وَاِنْ تُصِبْهُمْ سَيِّئَةٌ ۢ بِمَا قَدَّمَتْ اَيْدِيْهِمْ
فَاِنَّ الْاِنْسَانَ كَفُوْرٌ ﴿٤٩﴾

50. Al Allah apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero. Li kreas, kion Li volas. Li donas knabinojn, al kiu Li volas, kaj Li donas knabojn, al kiu Li volas,

لِلّٰهِ مُلْكُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ؕ يَخْلُقُ مَا يَشَآءُ ؕ
يَهَبُ لِمَنْ يَّشَآءُ اِنَاثًا وَّيَهَبُ لِمَنْ يَّشَآءُ
الذُّكُوْرَ ﴿٥٠﴾

51. kaj Li donas ambaŭ, knabojn kaj knabinojn, kaj Li faras nefekunda, kiun Li volas; Li vere estas ĉioscia, ĉiopova.

اَوْ يُزَوِّجُهُمْ ذُكْرَانًا وَّاِنَاثًا ۚ وَيَجْعَلُ مَنْ يَّشَآءُ
عَقِيْمًا ؕ اِنَّهٗ عَلِيْمٌ قَدِيْرٌ ﴿٥١﴾

52. Neniu homo havas iun ajn rajton, ke Allah parolu al li, krom en revelacio aŭ malantaŭ kurteno aŭ per la sendo de sendito*, por ke ĉi tiu malkaŝu per Lia ordono, kion Li volas. Vere Li estas eminenta, saĝa.

وَمَا كَانَ لِبَشَرٍ اَنْ يُّكَلِّمَهُ اللّٰهُ اِلَّا وَحْيًا اَوْ مِنْ
وَّرَآئِ حِجَابٍ اَوْ يُرْسِلَ رَسُوْلًا فَيُوْحِيَ بِاِذْنِهٖ

---

* Anĝelo

مَا يَشَآءُ ۚ إِنَّهُۥ عَلِيٌّ حَكِيمٌ ﴿٥٢﴾

53. Tiel Ni revelaciis al vi la spiriton per Nia dekreto. Vi ankoraŭ ne sciis, kio estas la Libro kaj kio estas la kredo, kaj Ni faris ĝin lumo, per kiu Ni gvidas, el Niaj servantoj, kiun Ni volas. Vere vi certe gvidos ilin sur la rektan vojon,

وَكَذَٰلِكَ أَوْحَيْنَآ إِلَيْكَ رُوحًا مِّنْ أَمْرِنَا ۚ مَا كُنتَ
تَدْرِى مَا ٱلْكِتَٰبُ وَلَا ٱلْإِيمَٰنُ وَلَٰكِن جَعَلْنَٰهُ
نُورًا نَّهْدِى بِهِۦ مَن نَّشَآءُ مِنْ عِبَادِنَا ۚ وَإِنَّكَ
لَتَهْدِىٓ إِلَىٰ صِرَٰطٍ مُّسْتَقِيمٍ ﴿٥٣﴾

54. sur la vojon de Allah, al kiu apartenas ĉio, kio estas en la ĉieloj kaj kio estas sur la tero. Aŭskultu! Al Allah revenos ĉiuj aferoj.

صِرَٰطِ ٱللَّهِ ٱلَّذِى لَهُۥ مَا فِى ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَمَا فِى ٱلْأَرْضِ ۗ
أَلَآ إِلَى ٱللَّهِ تَصِيرُ ٱلْأُمُورُ ﴿٥٤﴾

سُوْرَةُ الزُّخْرُفِ مَكِّيَّةٌ (٤٣)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

حٰمٓ ②

وَالْكِتٰبِ الْمُبِيْنِ ③

إِنَّا جَعَلْنٰهُ قُرْءٰنًا عَرَبِيًّا لَّعَلَّكُمْ تَعْقِلُوْنَ ④

وَإِنَّهٗ فِيْٓ أُمِّ الْكِتٰبِ لَدَيْنَا لَعَلِيٌّ حَكِيْمٌ ⑤

أَفَنَضْرِبُ عَنْكُمُ الذِّكْرَ صَفْحًا أَنْ كُنْتُمْ قَوْمًا مُّسْرِفِيْنَ ⑥

وَكَمْ أَرْسَلْنَا مِنْ نَّبِيٍّ فِي الْأَوَّلِيْنَ ⑦

وَمَا يَأْتِيْهِمْ مِّنْ نَّبِيٍّ إِلَّا كَانُوْا بِهٖ يَسْتَهْزِءُوْنَ ⑧

فَأَهْلَكْنَآ أَشَدَّ مِنْهُمْ بَطْشًا وَّمَضٰى مَثَلُ الْأَوَّلِيْنَ ⑨

وَلَئِنْ سَأَلْتَهُمْ مَّنْ خَلَقَ السَّمٰوٰتِ وَالْأَرْضَ
لَيَقُوْلُنَّ خَلَقَهُنَّ الْعَزِيْزُ الْعَلِيْمُ ⑩

الَّذِيْ جَعَلَ لَكُمُ الْأَرْضَ مَهْدًا وَّجَعَلَ لَكُمْ
فِيْهَا سُبُلًا لَّعَلَّكُمْ تَهْتَدُوْنَ ⑪

وَالَّذِيْ نَزَّلَ مِنَ السَّمَآءِ مَآءً بِقَدَرٍ فَأَنْشَرْنَا
بِهٖ بَلْدَةً مَّيْتًا كَذٰلِكَ تُخْرَجُوْنَ ⑫

وَالَّذِيْ خَلَقَ الْأَزْوَاجَ كُلَّهَا وَجَعَلَ لَكُمْ مِّنَ
الْفُلْكِ وَالْأَنْعَامِ مَا تَرْكَبُوْنَ ⑬

لِتَسْتَوٗا عَلٰى ظُهُوْرِهٖ ثُمَّ تَذْكُرُوْا نِعْمَةَ رَبِّكُمْ
إِذَا اسْتَوَيْتُمْ عَلَيْهِ وَتَقُوْلُوْا سُبْحٰنَ الَّذِيْ سَخَّرَ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Hā Mīm.**

3. Per la klara Libro!

4. Vere Ni faris ĝin Skribo ofte legata en lingvo araba, por ke vi komprenu.

5. Vere ĝi estas, en la originalo de la Libro, kiu estas ĉe Ni, eminenta, plena de saĝeco.

6. Ĉu Ni devas tute forigi de vi la admonon, ĉar vi estas popolo ekscesanta?

7. Kiom da profetoj Ni sendis al la antaŭaj nacioj!

8. Ĉiam, kiam venis al ili profeto, ili kutimis moki lin,

9. tial Ni neniigis tiujn, kiuj estis pli fortaj ol ĉi tiuj je povo. La ekzemplo por la prapatroj jam estiĝis.

10. Se vi demandas ilin: "Kiu kreis la ĉielojn kaj la teron? ", ili certe diros: "Ilin kreis la Ĉiopova, la Ĉioscia".

11. Tiu, kiu faris por vi el la tero kvazaŭ lulilon kaj estigis sur ĝi vojojn, por ke vi estu gvidataj,

12. kaj sendas el la nuboj akvon, laŭ mezuro, per kiu Ni revekas al la vivo senvivan teron – tiel ankaŭ vi revekiĝos –

---

* v. la verson 36an

** Laŭdegenda, Ĉioscia!

لَنَا هٰذَا وَمَا كُنَّا لَهُ مُقْرِنِينَ ﴿١٣﴾

13. kaj kiu kreis el ĉiuj specoj parojn, kaj kreis por vi ŝipojn kaj brutojn por ke vi vojaĝu sur ili,

وَإِنَّا إِلَىٰ رَبِّنَا لَمُنقَلِبُونَ ﴿١٤﴾

وَجَعَلُوا لَهُ مِنْ عِبَادِهِ جُزْءًا ۚ إِنَّ الْإِنسَانَ لَكَفُورٌ
مُّبِينٌ ﴿١٥﴾ ع

14. por ke vi eksidu firme sur iliaj dorsoj, poste memoru la favoron de via Sinjoro, kiam vi eksidis sur ili kaj diru: "Sankta estas Tiu, kiu faris utila por ni ĉi tion, ĉar ni mem ne kapablus regi ĝin,

15. kaj al nia Sinjoro ni certe revenos".

أَمِ اتَّخَذَ مِمَّا يَخْلُقُ بَنَاتٍ وَأَصْفَاكُم بِالْبَنِينَ ﴿١٦﴾

وَإِذَا بُشِّرَ أَحَدُهُم بِمَا ضَرَبَ لِلرَّحْمَٰنِ مَثَلًا
ظَلَّ وَجْهُهُ مُسْوَدًّا وَهُوَ كَظِيمٌ ﴿١٧﴾

16. Ili poste tamen aldonas al Li Liajn servantojn kiel idojn. Vere la homo estas evidenta sendankulo.

أَوَمَن يُنَشَّأُ فِي الْحِلْيَةِ وَهُوَ فِي الْخِصَامِ غَيْرُ
مُبِينٍ ﴿١٨﴾

17. Ĉu Li prenis al si filinojn el tio, kion Li kreis, ĉu Li distingis vin per filoj?

وَجَعَلُوا الْمَلَائِكَةَ الَّذِينَ هُمْ عِبَادُ الرَّحْمَٰنِ إِنَاثًا ۚ
أَشَهِدُوا خَلْقَهُمْ ۚ سَتُكْتَبُ شَهَادَتُهُمْ وَيُسْأَلُونَ ﴿١٩﴾

18. Se al iu el ili estas sciigata tio, kion li atribuis al la Donema kiel similaĵon,* tiam lia vizaĝo fariĝas nigra, kaj li estas subpremata de aflikto.

وَقَالُوا لَوْ شَاءَ الرَّحْمَٰنُ مَا عَبَدْنَاهُمْ ۗ مَا لَهُم
بِذَٰلِكَ مِنْ عِلْمٍ ۖ إِنْ هُمْ إِلَّا يَخْرُصُونَ ﴿٢٠﴾

19. Ĉu iu, kiu kreskis inter la luksaĵetoj kaj estas ĉiam en disputoj sen iu ajn tialo, povas esti atribuita al Dio?

أَمْ آتَيْنَاهُمْ كِتَابًا مِّن قَبْلِهِ فَهُم بِهِ مُسْتَمْسِكُونَ ﴿٢١﴾

بَلْ قَالُوا إِنَّا وَجَدْنَا آبَاءَنَا عَلَىٰ أُمَّةٍ وَإِنَّا عَلَىٰ آثَارِهِم
مُّهْتَدُونَ ﴿٢٢﴾

20. Ili kredas la anĝelojn, kiuj estas servantoj de la Donema, inaj estaĵoj. Ĉu ili eble ĉeestis okaze de ilia kreo? Ilia atesto estas enskribita kaj ili estos pridemanditaj.

وَكَذَٰلِكَ مَا أَرْسَلْنَا مِن قَبْلِكَ فِي قَرْيَةٍ مِّن نَّذِيرٍ
إِلَّا قَالَ مُتْرَفُوهَا إِنَّا وَجَدْنَا آبَاءَنَا عَلَىٰ أُمَّةٍ وَإِنَّا
عَلَىٰ آثَارِهِم مُّقْتَدُونَ ﴿٢٣﴾

21. Ili diras: "Se la Donema estus volinta, ni ne adorus ilin". Pri tio ili ne havas iun ajn scion: ili nur supozas.

قَالَ أَوَلَوْ جِئْتُكُم بِأَهْدَىٰ مِمَّا وَجَدتُّمْ عَلَيْهِ
آبَاءَكُمْ ۖ قَالُوا إِنَّا بِمَا أُرْسِلْتُم بِهِ كَافِرُونَ ﴿٢٤﴾

22. Ĉu Ni donis antaŭ tiu ĉi alian Libron, je kiu ili sin tenas?

فَانتَقَمْنَا مِنْهُمْ ۖ فَانظُرْ كَيْفَ كَانَ عَاقِبَةُ

23. Ne! Ili diras: "Ni vere trovis niajn patrojn en religio kaj ni volas esti gvidataj per iliaj piedsignoj".

---

* t.e.: naskiĝo de filino

الْمُكَذِّبِينَ ﴿٢٥﴾ ع

وَإِذْ قَالَ إِبْرَٰهِيمُ لِأَبِيهِ وَقَوْمِهِۦٓ إِنَّنِى بَرَآءٌ
مِّمَّا تَعْبُدُونَ ﴿٢٦﴾

إِلَّا ٱلَّذِى فَطَرَنِى فَإِنَّهُۥ سَيَهْدِينِ ﴿٢٧﴾

وَجَعَلَهَا كَلِمَةًۢ بَاقِيَةً فِى عَقِبِهِۦ لَعَلَّهُمْ يَرْجِعُونَ ﴿٢٨﴾

بَلْ مَتَّعْتُ هَٰٓؤُلَآءِ وَءَابَآءَهُمْ حَتَّىٰ جَآءَهُمُ ٱلْحَقُّ
وَرَسُولٌ مُّبِينٌ ﴿٢٩﴾

وَلَمَّا جَآءَهُمُ ٱلْحَقُّ قَالُوا۟ هَٰذَا سِحْرٌ وَإِنَّا بِهِۦ
كَٰفِرُونَ ﴿٣٠﴾

وَقَالُوا۟ لَوْلَا نُزِّلَ هَٰذَا ٱلْقُرْءَانُ عَلَىٰ رَجُلٍ مِّنَ ٱلْقَرْيَتَيْنِ
عَظِيمٍ ﴿٣١﴾

أَهُمْ يَقْسِمُونَ رَحْمَتَ رَبِّكَ ۚ نَحْنُ قَسَمْنَا بَيْنَهُم
مَّعِيشَتَهُمْ فِى ٱلْحَيَوٰةِ ٱلدُّنْيَا ۚ وَرَفَعْنَا بَعْضَهُمْ
فَوْقَ بَعْضٍ دَرَجَٰتٍ لِّيَتَّخِذَ بَعْضُهُم بَعْضًا سُخْرِيًّا ۗ
وَرَحْمَتُ رَبِّكَ خَيْرٌ مِّمَّا يَجْمَعُونَ ﴿٣٢﴾

وَلَوْلَآ أَن يَكُونَ ٱلنَّاسُ أُمَّةً وَٰحِدَةً لَّجَعَلْنَا لِمَن
يَكْفُرُ بِٱلرَّحْمَٰنِ لِبُيُوتِهِمْ سُقُفًا مِّن فِضَّةٍ وَمَعَارِجَ
عَلَيْهَا يَظْهَرُونَ ﴿٣٣﴾

وَلِبُيُوتِهِمْ أَبْوَٰبًا وَسُرُرًا عَلَيْهَا يَتَّكِـُٔونَ ﴿٣٤﴾

وَزُخْرُفًا ۚ وَإِن كُلُّ ذَٰلِكَ لَمَّا مَتَٰعُ ٱلْحَيَوٰةِ ٱلدُّنْيَا ۚ
وَٱلْءَاخِرَةُ عِندَ رَبِّكَ لِلْمُتَّقِينَ ﴿٣٥﴾ ع

وَمَن يَعْشُ عَن ذِكْرِ ٱلرَّحْمَٰنِ نُقَيِّضْ لَهُۥ شَيْطَٰنًا

24. Tiel, kiam Ni sendis antaŭe en iun ajn urbon admonanton, ĉiam diris la riĉuloj en ĝi: "Ni vere trovis niajn patrojn en religio kaj ni certe sekvas iliajn piedsignojn".

25. Ilia gardanto diris: "Kiel? Eĉ se ĝi alportas pli bonan gvidilon ol tiu, en kiu vi trovis viajn patrojn? ". Ili diras: "Ni certe rifuzas tion, kun kio vi estas senditaj".

26. Tial Ni repagis ilin. Vidu nun, kiel estis la puno de la negantoj!

27. Memoru, kiam Abraham diris al sia patro kaj al sia popolo: "Vere mi ne akceptas tion, kion vi adoras

28. anstataŭ Tiun, kiu kreis min. Li vere gvidos min"

29. kaj li faris tion daŭra leĝo por sia idaro, por ke ili konvertiĝu.

30. Ne! Malgraŭ tio Mi lasis ilin kaj iliajn patrojn ĝui la vivon, ĝis venis al ili la vero per klariga sendito.

31. Kiam venis al ili la vero, ili tamen diris: "Ĉi tio estas magio, kaj ni rifuzas ĝin"

32. kaj ili diris: "Kial ĉi tiu Korano ne estis sendita al iu eminentulo el la du urboj? ".*

33. Ĉu estas ilia tasko disdoni la favoron de via Sinjoro? Ni mem disdonas inter ili ilian vivtenon en ĉi tiu vivo, kaj Ni plialtigas iujn el ili super aliaj en hierarkio, por ke la unuaj prenu la aliajn sub sian protekton, kaj la kompato de via Sinjoro estas pli bona ol tio, kion ili amasigas.

34. Se ne estus necese malhelpi la homojn fariĝi ĉiuj egalaj, Ni estus doninta al tiuj, kiuj ne kredas je la Donema, arĝentajn tegmentojn por iliaj domoj kaj ŝtuparojn por supreniri al ili

* Tā'if kaj Mekko

فَهُوَ لَهُۥ قَرِينٌ ﴿٣٦﴾

35. kaj pordojn por iliaj domoj kaj litojn por ripozi sur ili,

وَإِنَّهُمْ لَيَصُدُّونَهُمْ عَنِ ٱلسَّبِيلِ وَيَحْسَبُونَ أَنَّهُم مُّهْتَدُونَ ﴿٣٧﴾

36. kaj ornamaĵojn el oro. Ĉio ĉi tamen estas nur ĝuado dum ĉi tiu vivo, sed la vivo venonta apud via Sinjoro estas por la justuloj.

حَتَّىٰٓ إِذَا جَآءَنَا قَالَ يَٰلَيْتَ بَيْنِى وَبَيْنَكَ بُعْدَ ٱلْمَشْرِقَيْنِ فَبِئْسَ ٱلْقَرِينُ ﴿٣٨﴾

37. Kiu tamen turnas sin for de la admono de la Donema, por tiu Ni destinis Satanon, por ke li estu lia kunulo.

وَلَن يَنفَعَكُمُ ٱلْيَوْمَ إِذ ظَّلَمْتُمْ أَنَّكُمْ فِى ٱلْعَذَابِ مُشْتَرِكُونَ ﴿٣٩﴾

38. Ili vere devojiĝas de la rekta vojo, sed ili opinias, ke ili estas rekte gvidataj,

أَفَأَنتَ تُسْمِعُ ٱلصُّمَّ أَوْ تَهْدِى ٱلْعُمْىَ وَمَن كَانَ فِى ضَلَٰلٍ مُّبِينٍ ﴿٤٠﴾

39. ĝis iu tia venas al Ni kaj diras al sia kunulo: "Ho! se inter mi kaj vi estus la distanco, kiu estas inter Oriento kaj Okcidento!". Malbona kunulo li estas!

فَإِمَّا نَذْهَبَنَّ بِكَ فَإِنَّا مِنْهُم مُّنتَقِمُونَ ﴿٤١﴾

40. "En tiu tago neniom helpos, ke vi estas kunuloj en la puno, ĉar vi malbonfaris".

أَوْ نُرِيَنَّكَ ٱلَّذِى وَعَدْنَٰهُمْ فَإِنَّا عَلَيْهِم مُّقْتَدِرُونَ ﴿٤٢﴾

41. Ĉu vi eble kapablas igi la surdulojn aŭdi? Ĉu vi kapablas gvidi la blindulojn aŭ tiujn, kiuj troviĝas en evidenta eraro?

فَٱسْتَمْسِكْ بِٱلَّذِىٓ أُوحِىَ إِلَيْكَ ۖ إِنَّكَ عَلَىٰ صِرَٰطٍ مُّسْتَقِيمٍ ﴿٤٣﴾

42. Se Ni forprenos vin, Ni certe repagos ilin,

وَإِنَّهُۥ لَذِكْرٌ لَّكَ وَلِقَوْمِكَ ۖ وَسَوْفَ تُسْـَٔلُونَ ﴿٤٤﴾

43. aŭ Ni montros al vi tion, per kio Ni minacis ilin, ĉar Ni havas senliman povon super ili.

وَسْـَٔلْ مَنْ أَرْسَلْنَا مِن قَبْلِكَ مِن رُّسُلِنَآ أَجَعَلْنَا مِن دُونِ ٱلرَّحْمَٰنِ ءَالِهَةً يُعْبَدُونَ ﴿٤٥﴾ ع

44. Tenu vin tial je tio, kio estis revelaciita al vi. Vi vere estas sur la rekta vojo.

وَلَقَدْ أَرْسَلْنَا مُوسَىٰ بِـَٔايَٰتِنَآ إِلَىٰ فِرْعَوْنَ وَمَلَإِيْهِ فَقَالَ إِنِّى رَسُولُ رَبِّ ٱلْعَٰلَمِينَ ﴿٤٦﴾

45. Tio vere estas granda honoro por vi kaj por via popolo. Baldaŭ vi estos pridemanditaj.

فَلَمَّا جَآءَهُم بِـَٔايَٰتِنَآ إِذَا هُم مِّنْهَا يَضْحَكُونَ ﴿٤٧﴾

46. Demandu tiujn el Niaj senditoj, kiujn Ni sendis antaŭ vi, ĉu Ni estigis aliajn Diojn anstataŭ la Donema, por ke oni adoru ilin.

وَمَا نُرِيهِم مِّنْ ءَايَةٍ إِلَّا هِىَ أَكْبَرُ مِنْ أُخْتِهَا ۖ وَأَخَذْنَٰهُم بِٱلْعَذَابِ لَعَلَّهُمْ يَرْجِعُونَ ﴿٤٨﴾

47. Ni vere sendis Moseon kun Niaj signoj al Faraono kaj al liaj estroj, kaj li diris: "Mi vere estas sendito de la Sinjoro de l' Universo";

وَقَالُوا۟ يَٰٓأَيُّهَ ٱلسَّٰحِرُ ٱدْعُ لَنَا رَبَّكَ بِمَا عَهِدَ عِندَكَ

إِنَّا لَمُهْتَدُونَ ﴿٥٠﴾

48. kiam li tamen venis al ili kun Niaj signoj, ili ridis pri li.

فَلَمَّا كَشَفْنَا عَنْهُمُ الْعَذَابَ إِذَا هُمْ يَنْكُثُونَ ﴿٥١﴾

49. Ni nur montris Niajn signojn, kiuj estis ĉiam pli grandaj ol la antaŭaj, kaj Ni trafis ilin per turmentoj, por ke ili konvertiĝu,

وَنَادَىٰ فِرْعَوْنُ فِي قَوْمِهِ قَالَ يَا قَوْمِ أَلَيْسَ لِي

مُلْكُ مِصْرَ وَهَٰذِهِ الْأَنْهَارُ تَجْرِي مِن تَحْتِي ۖ أَفَلَا

تُبْصِرُونَ ﴿٥٢﴾

50. sed ili diris: "Ho vi sorĉisto! Preĝu por ni al via Sinjoro laŭ tio, kion Li ordonis al vi, ĉar tiel ni estos gvidataj".

أَمْ أَنَا خَيْرٌ مِّنْ هَٰذَا الَّذِي هُوَ مَهِينٌ ۖ وَلَا يَكَادُ

يُبِينُ ﴿٥٣﴾

51. Kiam Ni poste forprenis de ili la turmentojn, ili tamen rompis sian promeson.

فَلَوْلَا أُلْقِيَ عَلَيْهِ أَسْوِرَةٌ مِّن ذَهَبٍ أَوْ جَاءَ مَعَهُ

الْمَلَائِكَةُ مُقْتَرِنِينَ ﴿٥٤﴾

52. Faraono anoncis al sia popolo: "Ho mia popolo! ĉu ne apartenas al mi la suvereneco de Egiptujo kaj de ĉi tiuj riveroj, kiuj fluas sub mi? Ĉu vi do ne vidas?

فَاسْتَخَفَّ قَوْمَهُ فَأَطَاعُوهُ ۚ إِنَّهُمْ كَانُوا قَوْمًا فَاسِقِينَ ﴿٥٥﴾

فَلَمَّا آسَفُونَا انتَقَمْنَا مِنْهُمْ فَأَغْرَقْنَاهُمْ أَجْمَعِينَ ﴿٥٦﴾

فَجَعَلْنَاهُمْ سَلَفًا وَمَثَلًا لِّلْآخِرِينَ ﴿٥٦﴾

53. Ĉu mi do ne estas supera al tiu ĉi, kiu estas malŝatinda kaj preskaŭ ne kapablas esprimi sin kompreneble?

وَلَمَّا ضُرِبَ ابْنُ مَرْيَمَ مَثَلًا إِذَا قَوْمُكَ مِنْهُ

يَصِدُّونَ ﴿٥٧﴾

54. Kial do ne estas ĉirkaŭ liaj brakoj braceletoj el oro, aŭ ne venis anĝeloj kun li por akompani lin? ".

وَقَالُوا أَآلِهَتُنَا خَيْرٌ أَمْ هُوَ ۚ مَا ضَرَبُوهُ لَكَ إِلَّا جَدَلًا ۚ

بَلْ هُمْ قَوْمٌ خَصِمُونَ ﴿٥٨﴾

55. Tiel li instigis sian popolon al la malsaĝeco, kaj ili obeis lin. Vere ili estis malobeema popolo.

إِنْ هُوَ إِلَّا عَبْدٌ أَنْعَمْنَا عَلَيْهِ وَجَعَلْنَاهُ مَثَلًا لِّبَنِي

إِسْرَائِيلَ ﴿٥٩﴾

56. Tial Ni repagis ilin, kiam ili kolerigis Nin, kaj Ni dronigis ilin ĉiujn,

وَلَوْ نَشَاءُ لَجَعَلْنَا مِنكُم مَّلَائِكَةً فِي الْأَرْضِ

يَخْلُفُونَ ﴿٦٠﴾

57. kaj Ni faris ilin pasintaĵo kaj ekzemplo por la posteuloj.

وَإِنَّهُ لَعِلْمٌ لِّلسَّاعَةِ فَلَا تَمْتَرُنَّ بِهَا وَاتَّبِعُونِ ۚ

هَٰذَا صِرَاطٌ مُّسْتَقِيمٌ ﴿٦١﴾

58. Kiam la filo de Maria estas priparolata kiel ekzemplo, jen! via popolo kriegas,

59. dirante: "Ĉu estas pli bonaj niaj Dioj aŭ li? ". Ili lin mencias al vi nur pro kontraŭdiremo. Ne! ili estas popolo disputema.

60. Li estis nur servanto, al kiu Ni kompatis, kaj Ni faris lin ekzemplo por la idoj de Izrael.

61. Se Ni volus, Ni povus estigi anĝelojn el via mezo por anstataŭi vin sur la tero.

62. Ĝi vere estas vera scio pri la Horo, do ne dubu pri ĝi, sed sekvu min. Tiu ĉi estas la rekta vojo.

63. Ne lasu Satanon devojigi vin. Li vere estas evidenta malamiko.

64. Kiam venis Jesuo kun evidentaj pruvoj, li diris: "Vere mi venas al vi kun la saĝo kaj por klarigi al vi tion, pri kio vi malkonsentas, do respektegu Allahon kaj obeu min.

65. Vere Allah estas mia Sinjoro kaj via Sinjoro, do adoru Lin. Tiu ĉi estas la rekta vojo".

66. La konfederacianoj tamen disiĝis en skismon inter si. Ve do al la malpieguloj pro la puno de la dolora tago!

67. Ili nur atendas, ĝis la Horo venos sur ilin neatendite kaj neperceptite.

68. La amikoj fariĝos en tiu tago malamikoj unu de la alia, krom la justuloj.

69. "Ho Miaj servantoj, en tiu tago ne estos timo por vi nek malgajeco,

70. por vi, kiuj kredis al Niaj revelacioj kaj submetiĝis!

71. Eniru en la Paradizon, vi kaj viaj edzinoj, feliĉaj! "

72. – rondiros por ili pokaloj el oro kaj kalikoj, kaj en tiuj estos ĉio, kion la animoj deziras kaj la okuloj ĝuegas – "Vi tie restos por ĉiam.

73. Tiu estas la Paradizo, de kiu vi estis faritaj heredantoj pro tio, kion vi faris,

74. en ĝi estas fruktoj abundaj por vi, por ke vi manĝu el ili".

وَلَا يَصُدَّنَّكُمُ الشَّيْطٰنُ ۚ اِنَّهٗ لَكُمْ عَدُوٌّ مُّبِيْنٌ ﴿٦٢﴾
وَلَمَّا جَآءَ عِيْسٰى بِالْبَيِّنٰتِ قَالَ قَدْ جِئْتُكُمْ بِالْحِكْمَةِ
وَلِاُبَيِّنَ لَكُمْ بَعْضَ الَّذِيْ تَخْتَلِفُوْنَ فِيْهِ ۚ
فَاتَّقُوا اللّٰهَ وَاَطِيْعُوْنِ ﴿٦٣﴾
اِنَّ اللّٰهَ هُوَ رَبِّيْ وَرَبُّكُمْ فَاعْبُدُوْهُ ۗ هٰذَا صِرَاطٌ
مُّسْتَقِيْمٌ ﴿٦٤﴾
فَاخْتَلَفَ الْاَحْزَابُ مِنْۢ بَيْنِهِمْ ۚ فَوَيْلٌ لِّلَّذِيْنَ
ظَلَمُوْا مِنْ عَذَابِ يَوْمٍ اَلِيْمٍ ﴿٦٥﴾
هَلْ يَنْظُرُوْنَ اِلَّا السَّاعَةَ اَنْ تَاْتِيَهُمْ بَغْتَةً وَّ
هُمْ لَا يَشْعُرُوْنَ ﴿٦٦﴾
اَلْاَخِلَّآءُ يَوْمَئِذٍۢ بَعْضُهُمْ لِبَعْضٍ عَدُوٌّ اِلَّا
الْمُتَّقِيْنَ ﴿٦٧﴾ ع ٦ ج ٤
يٰعِبَادِ لَا خَوْفٌ عَلَيْكُمُ الْيَوْمَ وَلَآ اَنْتُمْ تَحْزَنُوْنَ ۚ ﴿٦٨﴾
الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا بِاٰيٰتِنَا وَكَانُوْا مُسْلِمِيْنَ ۚ ﴿٦٩﴾
اُدْخُلُوا الْجَنَّةَ اَنْتُمْ وَاَزْوَاجُكُمْ تُحْبَرُوْنَ ﴿٧٠﴾
يُطَافُ عَلَيْهِمْ بِصِحَافٍ مِّنْ ذَهَبٍ وَّاَكْوَابٍ ۚ
وَفِيْهَا مَا تَشْتَهِيْهِ الْاَنْفُسُ وَتَلَذُّ الْاَعْيُنُ ۚ وَاَنْتُمْ
فِيْهَا خٰلِدُوْنَ ۚ ﴿٧١﴾
وَتِلْكَ الْجَنَّةُ الَّتِيْٓ اُوْرِثْتُمُوْهَا بِمَا كُنْتُمْ تَعْمَلُوْنَ ﴿٧٢﴾
لَكُمْ فِيْهَا فَاكِهَةٌ كَثِيْرَةٌ مِّنْهَا تَاْكُلُوْنَ ﴿٧٣﴾
اِنَّ الْمُجْرِمِيْنَ فِيْ عَذَابِ جَهَنَّمَ خٰلِدُوْنَ ﴿٧٤﴾ ۩
لَا يُفَتَّرُ عَنْهُمْ وَهُمْ فِيْهِ مُبْلِسُوْنَ ۚ ﴿٧٥﴾

وَمَا ظَلَمْنٰهُمْ وَلٰكِنْ كَانُوْا هُمُ الظّٰلِمِيْنَ ﴿٧٦﴾

75. Vere la kulpuloj restos por ĉiam en la turmento de l' Infero.

وَنَادَوْا يٰمٰلِكُ لِيَقْضِ عَلَيْنَا رَبُّكَ ۭ قَالَ اِنَّكُمْ مّٰكِثُوْنَ ﴿٧٧﴾

76. Ĝi ne estos mildigita por ili, kaj ili malesperos en ĝi.

لَقَدْ جِئْنٰكُمْ بِالْحَقِّ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَكُمْ لِلْحَقِّ كٰرِهُوْنَ ﴿٧٨﴾

77. Ni ne agis maljuste, sed ili estis maljustuloj.

اَمْ اَبْرَمُوْٓا اَمْرًا فَاِنَّا مُبْرِمُوْنَ ﴿٧٩﴾

78. Ili krios: "Ho estro, lasu vian Sinjoron neniigi nin! ", Ii tamen diros: "Vi certe devas resti,

اَمْ يَحْسَبُوْنَ اَنَّا لَا نَسْمَعُ سِرَّهُمْ وَنَجْوٰىهُمْ ۭ بَلٰى

وَرُسُلُنَا لَدَيْهِمْ يَكْتُبُوْنَ ﴿٨٠﴾

79. ni certe portis aŭ vi la veron, sed la plej multaj el vi malŝatis la veron".

قُلْ اِنْ كَانَ لِلرَّحْمٰنِ وَلَدٌ ۖ فَاَنَا اَوَّلُ الْعٰبِدِيْنَ ﴿٨١﴾

80. Ĉu ili decidis pri iu ajn projekto? Ni ja jam decidis.

سُبْحٰنَ رَبِّ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ رَبِّ الْعَرْشِ

عَمَّا يَصِفُوْنَ ﴿٨٢﴾

81. Ĉu ili do imagas, ke Ni ne aŭdas iliajn sekretojn kaj iliajn kaŝitajn paroladojn? Jes! Kaj Niaj senditoj ĉe ili ĉion registras.

فَذَرْهُمْ يَخُوْضُوْا وَيَلْعَبُوْا حَتّٰى يُلٰقُوْا يَوْمَهُمُ الَّذِيْ

يُوْعَدُوْنَ ﴿٨٣﴾

82. Diru: "Se la Donema estus havinta filon, mi ja estus la unua adoranto".

وَهُوَ الَّذِيْ فِي السَّمَاۗءِ اِلٰهٌ وَّفِي الْاَرْضِ اِلٰهٌ ۭ وَ

هُوَ الْحَكِيْمُ الْعَلِيْمُ ﴿٨٤﴾

83. Sankta estas la Sinjoro de la ĉieloj kaj de la tero, la Sinjoro de l' Trono, Li estas eminenta super tio, kion ili asertas.

وَتَبٰرَكَ الَّذِيْ لَهٗ مُلْكُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ وَ

مَا بَيْنَهُمَا ۚ وَعِنْدَهٗ عِلْمُ السَّاعَةِ ۚ وَاِلَيْهِ تُرْجَعُوْنَ ﴿٨٥﴾

84. Lasu ilin babilaĉi kaj amuziĝi, ĝis ili renkontos la tagon, pri kiu estas minacite al ili.

وَلَا يَمْلِكُ الَّذِيْنَ يَدْعُوْنَ مِنْ دُوْنِهِ الشَّفَاعَةَ

اِلَّا مَنْ شَهِدَ بِالْحَقِّ وَهُمْ يَعْلَمُوْنَ ﴿٨٦﴾

85. Li estas Dio en la ĉielo kaj Dio sur la tero, kaj Li estas la Saĝa, la Ĉioscia.

وَلَىِٕنْ سَاَلْتَهُمْ مَّنْ خَلَقَهُمْ لَيَقُوْلُنَّ اللّٰهُ فَاَنّٰى

يُؤْفَكُوْنَ ﴿٨٧﴾

86. Benata estu Tiu, al kiu apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero kaj de tio, kio estas inter ili ambaŭ; ĉe Li estas la vera scio pri la Horo kaj al Li vi revenos.

وَقِيْلِهٖ يٰرَبِّ اِنَّ هٰٓؤُلَاۗءِ قَوْمٌ لَّا يُؤْمِنُوْنَ ﴿٨٨﴾

87. Tiuj, kiujn vi alvokas anstataŭ Lin, ne havas la povon por propeti, krom tiu, kiu atestas la veron, kaj ili scias tion.

فَاصْفَحْ عَنْهُمْ وَقُلْ سَلٰمٌ ۭ فَسَوْفَ يَعْلَمُوْنَ ﴿٨٩﴾

88. Se vi demandas ilin: "Kiu kreis ilin? ", ili certe diros: "Allah! ". Kial ili do turnas sin for?

89. Per lia vorto: "Ho mia Sinjoro! Ĉi tiu certe estas popolo, kiu ne volas kredi",

90. turnu vin for de ili kaj diru: "Pacon! ". Baldaŭ ili ekscios.

سُورَةُ الدُّخَانِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ①

حٰمٓ ②

وَالْكِتَابِ الْمُبِينِ ③

إِنَّآ أَنزَلْنَٰهُ فِى لَيْلَةٍ مُّبَٰرَكَةٍ إِنَّا كُنَّا مُنذِرِينَ ④

فِيهَا يُفْرَقُ كُلُّ أَمْرٍ حَكِيمٍ ⑤

أَمْرًا مِّنْ عِندِنَآ إِنَّا كُنَّا مُرْسِلِينَ ⑥

رَحْمَةً مِّن رَّبِّكَ إِنَّهُۥ هُوَ السَّمِيعُ الْعَلِيمُ ⑦

رَبِّ السَّمَٰوَٰتِ وَالْأَرْضِ وَمَا بَيْنَهُمَآ إِن كُنتُم مُّوقِنِينَ ⑧

لَآ إِلَٰهَ إِلَّا هُوَ يُحْىِۦ وَيُمِيتُ رَبُّكُمْ وَرَبُّ ءَابَآئِكُمُ الْأَوَّلِينَ ⑨

بَلْ هُمْ فِى شَكٍّ يَلْعَبُونَ ⑩

فَارْتَقِبْ يَوْمَ تَأْتِى السَّمَآءُ بِدُخَانٍ مُّبِينٍ ⑪

يَغْشَى النَّاسَ هَٰذَا عَذَابٌ أَلِيمٌ ⑫

رَبَّنَا اكْشِفْ عَنَّا الْعَذَابَ إِنَّا مُؤْمِنُونَ ⑬

أَنَّىٰ لَهُمُ الذِّكْرَىٰ وَقَدْ جَآءَهُمْ رَسُولٌ مُّبِينٌ ⑭

ثُمَّ تَوَلَّوْا عَنْهُ وَقَالُوا مُعَلَّمٌ مَّجْنُونٌ ⑮

إِنَّا كَاشِفُوا الْعَذَابِ قَلِيلًا إِنَّكُمْ عَآئِدُونَ ⑯

يَوْمَ نَبْطِشُ الْبَطْشَةَ الْكُبْرَىٰٓ إِنَّا مُنتَقِمُونَ ⑰

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Hâ Mîm.**

3. Per la klara Libro!

4. Vere Ni sendis ĝin en sankta nokto – vere Ni ĉiam admonis –

5. kaj en ĝi estas klarigitaj detale ĉiuj saĝaj aferoj

6. laŭ Nia ordono. Ni vere ĉiam sendis senditojn

7. kiel favoron de via Sinjoro – Li vere estas la Ĉioaŭda, la Ĉioscia –

8. de la Sinjoro de la ĉieloj kaj de la tero kaj de tio, kio estas inter ili ambaŭ. Se nur vi estus firme kredintaj!

9. Ne ekzistas alia Dio ol Li. Li igas vivi kaj morti – via Sinjoro kaj la Sinjoro de viaj prapatroj –

10. Jen! Malgraŭ tio ili estas en dubo, ili amuziĝas.

11. Vi tamen atendu la tagon, en kiu la ĉielo elsendos klare videblan fumon,

12. kiu ĉirkaŭos la homojn. Tiu estos dolora turmento.

13. "Nia Sinjoro, forprenu de ni la turmenton. Ni vere kredas".

* v. la verson 11an

** Laŭdegenda, Ĉioscia!

14. Kiel ili do povas lerni, post kiam venis al ili sendito klariganta,

15. kaj ili turnis sin for de li, kaj diris: "Instigito, frenezulo! ".

16. "Ni vere forprenos la turmenton por iom da tempo, sed ili fariĝos ree kulpaj.

17. En la tago, en kiu Ni ekkaptos vin severege, Ni vere repagos al vi".

18. Ni jam elprovis, antaŭ ol ili venis, la popolon de Faraono. Al ili venis honorinda sendito.

19. "Transdonu al mi la servantojn de Allah, mi vere estas por vi sendito fidela.

20. Ne fieriĝu antaŭ Allah. Mi vere venas al vi kun evidenta aŭtoritato,

21. kaj mi serĉas rifuĝon ĉe mia Sinjoro kaj via Sinjoro, por ke vi ne ŝtonmortigu min.

22. Se vi ne kredas al mi, malproksimiĝu de mi".

23. Tiam li* preĝis al sia Sinjoro: "Tiu ĉi estas popolo pekema".

24. "Konduku Miajn servantojn for dum la nokto; certe vi estos persekutataj.

25. Forlasu la maron, kiam ĝi estas kvieta. Ili estas armeo, ili dronos".

26. Kiom multajn ĝardenojn kaj fontojn ili postlasis!

27. Kaj grenkampojn, kaj honorajn loĝejojn!

28. Kaj la favorojn, kiujn ili ĝuis!

29. Tiel estis, kaj Ni heredigis tiujn aĵojn al alia popolo.

* Moseo

وَلَقَدْ فَتَنَّا قَبْلَهُمْ قَوْمَ فِرْعَوْنَ وَجَآءَهُمْ رَسُولٌ
كَرِيمٌ ﴿١٧﴾
أَنْ أَدُّوٓا إِلَيَّ عِبَادَ اللَّهِ ۖ إِنِّي لَكُمْ رَسُولٌ أَمِينٌ ﴿١٨﴾
وَأَنْ لَّا تَعْلُوا عَلَى اللَّهِ ۖ إِنِّي آتِيكُم بِسُلْطَانٍ مُّبِينٍ ﴿١٩﴾
وَإِنِّي عُذْتُ بِرَبِّي وَرَبِّكُمْ أَن تَرْجُمُونِ ﴿٢٠﴾
وَإِن لَّمْ تُؤْمِنُوا لِي فَاعْتَزِلُونِ ﴿٢١﴾
فَدَعَا رَبَّهُ أَنَّ هَٰؤُلَآءِ قَوْمٌ مُّجْرِمُونَ ﴿٢٢﴾
فَأَسْرِ بِعِبَادِي لَيْلًا إِنَّكُم مُّتَّبَعُونَ ﴿٢٣﴾
وَاتْرُكِ الْبَحْرَ رَهْوًا ۖ إِنَّهُمْ جُندٌ مُّغْرَقُونَ ﴿٢٤﴾
كَمْ تَرَكُوا مِن جَنَّاتٍ وَعُيُونٍ ﴿٢٥﴾
وَزُرُوعٍ وَمَقَامٍ كَرِيمٍ ﴿٢٦﴾
وَنَعْمَةٍ كَانُوا فِيهَا فَاكِهِينَ ﴿٢٧﴾
كَذَٰلِكَ ۖ وَأَوْرَثْنَاهَا قَوْمًا آخَرِينَ ﴿٢٨﴾
فَمَا بَكَتْ عَلَيْهِمُ السَّمَاءُ وَالْأَرْضُ وَمَا كَانُوا
مُنظَرِينَ ﴿٢٩﴾ ع ٣
وَلَقَدْ نَجَّيْنَا بَنِي إِسْرَائِيلَ مِنَ الْعَذَابِ الْمُهِينِ ﴿٣٠﴾
مِن فِرْعَوْنَ ۚ إِنَّهُ كَانَ عَالِيًا مِّنَ الْمُسْرِفِينَ ﴿٣١﴾
وَلَقَدِ اخْتَرْنَاهُمْ عَلَىٰ عِلْمٍ عَلَى الْعَالَمِينَ ﴿٣٢﴾
وَآتَيْنَاهُم مِّنَ الْآيَاتِ مَا فِيهِ بَلَاءٌ مُّبِينٌ ﴿٣٣﴾
إِنَّ هَٰؤُلَآءِ لَيَقُولُونَ ﴿٣٤﴾
إِنْ هِيَ إِلَّا مَوْتَتُنَا الْأُولَىٰ وَمَا نَحْنُ بِمُنشَرِينَ ﴿٣٥﴾
فَأْتُوا بِآبَائِنَآ إِن كُنتُمْ صَادِقِينَ ﴿٣٦﴾

30. Ne ploris super ili la ĉielo nek la tero, kaj al ili ne estis konsentita prokrasto.

31. Certe Ni savis la idojn de Izrael de hontiga puno:

32. de Faraono – li fakte estis malhumila, ekscesanta –

33. kaj Ni elektis ilin el ĉiuj nacioj, per Nia scio.

34. Kaj Ni donis al ili signon, en kiu estis klara provo.

35. Vere tiuj diros:

36. "Ne ekzistas alia morto ol nia unua, kaj ni ne estos vekitaj,

37. rekonduku do niajn patrojn, se vi estas sinceraj".

38. Ĉu ili estas eble pli honorindaj ol la popolo de Tubba kaj ol tiuj, kiuj estis antaŭ ili? Ni neniigis ilin, ĉar ili estis pekuloj.

39. Ni ne kreis la ĉielojn kaj la teron kaj tion, kio estas inter ili ambaŭ, nur por ludi,

40. Ni vere kreis ilin en vero, sed la plej multaj el ili ne scias tion.

41. Vere la tago de la decido estas la difinita tempo por ili ĉiuj,

42. la tago, en kiu neniom utilos la amiko al la amiko, kaj ili ne trovos helpon,

43. krom tiuj, al kiuj Allah kompatos. Estas Li Tiu, kiu estas la Ĉiopova, la Pardonema.

44. Jen, la arbo Zakkūm

45. estas la manĝaĵo de la pekulo.

46. Kiel fandita ferŝtono ĝi bolos en iliaj ventroj

اَهُمْ خَيْرٌ اَمْ قَوْمُ تُبَّعٍ ۙ وَّالَّذِيْنَ مِنْ قَبْلِهِمْ ۭ اَهْلَكْنٰهُمْ
اِنَّهُمْ كَانُوْا مُجْرِمِيْنَ ۝٣٧
وَمَا خَلَقْنَا السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ وَمَا بَيْنَهُمَا لٰعِبِيْنَ ۝٣٨
مَا خَلَقْنٰهُمَآ اِلَّا بِالْحَقِّ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَهُمْ لَا يَعْلَمُوْنَ ۝٣٩
اِنَّ يَوْمَ الْفَصْلِ مِيْقَاتُهُمْ اَجْمَعِيْنَ ۝٤٠
يَوْمَ لَا يُغْنِيْ مَوْلًى عَنْ مَّوْلًى شَيْـــًٔا وَّلَا هُمْ يُنْصَرُوْنَ ۝٤١
ع اِلَّا مَنْ رَّحِمَ اللّٰهُ ۭ اِنَّهٗ هُوَ الْعَزِيْزُ الرَّحِيْمُ ۝٤٢
اِنَّ شَجَرَتَ الزَّقُّوْمِ ۝٤٣
طَعَامُ الْاَثِيْمِ ۝٤٤
كَالْمُهْلِ ۚ يَغْلِيْ فِي الْبُطُوْنِ ۝٤٥
كَغَلْيِ الْحَمِيْمِ ۝٤٦
خُذُوْهُ فَاعْتِلُوْهُ اِلٰى سَوَاۗءِ الْجَحِيْمِ ۝٤٧
ثُمَّ صُبُّوْا فَوْقَ رَاْسِهٖ مِنْ عَذَابِ الْحَمِيْمِ ۝٤٨
ذُقْ ۚ اِنَّكَ اَنْتَ الْعَزِيْزُ الْكَرِيْمُ ۝٤٩
اِنَّ هٰذَا مَا كُنْتُمْ بِهٖ تَمْتَرُوْنَ ۝٥٠
اِنَّ الْمُتَّقِيْنَ فِيْ مَقَامٍ اَمِيْنٍ ۝٥١
فِيْ جَنّٰتٍ وَّعُيُوْنٍ ۝٥٢
يَّلْبَسُوْنَ مِنْ سُنْدُسٍ وَّاِسْتَبْرَقٍ مُّتَقٰبِلِيْنَ ۝٥٣
كَذٰلِكَ ۣ وَزَوَّجْنٰهُمْ بِحُوْرٍ عِيْنٍ ۝٥٤
يَدْعُوْنَ فِيْهَا بِكُلِّ فَاكِهَةٍ اٰمِنِيْنَ ۝٥٥
لَا يَذُوْقُوْنَ فِيْهَا الْمَوْتَ اِلَّا الْمَوْتَةَ الْاُوْلٰى ۚ وَ
وَقٰىهُمْ عَذَابَ الْجَحِيْمِ ۝٥٦

فَضْلًا مِّن رَّبِّكَ ۚ ذَٰلِكَ هُوَ الْفَوْزُ الْعَظِيمُ ﴿٥٧﴾

47. kiel la bolado de bolanta akvo.

فَإِنَّمَا يَسَّرْنَاهُ بِلِسَانِكَ لَعَلَّهُمْ يَتَذَكَّرُونَ ﴿٥٨﴾

48. "Ekkaptu lin kaj trenu lin en la mezon de l' Infero!

فَارْتَقِبْ إِنَّهُم مُّرْتَقِبُونَ ﴿٥٩﴾

49. Poste versûu sur lian kapon la turmenton de la bolanta akvo.

50. Vi gustumu! Vi kredis vin la Ĉiopova, la Satenda.

51. Jen! Ĉi tio estas tio, pri kio vi kutimis dubi".

52. Vere la justuloj estas en restadejo sekura,

53. inter ĝardenoj kaj fontoj,

54. vestitaj per silko kaj orbrokato, sidante vidalvide.

55. Tiel tio estos. Ni edzigos ilin kun noblaj fraŭlinoj* grandokulaj.

56. Tie ili ricevos ĉiuspecajn fruktojn en paco kaj sekureco.

57. Tie ili ne gustumos la morton, krom la unua morto, kaj Li savos ilin de la turmento de l' Infero

58. per la graco de via Sinjoro. Tio estas la plej granda feliĉo.

59. Ni certe faris ĝin facila, en via lingvo, por ke ili estu admonataj.

60. Atendu do; ili ankaŭ atendas.

---

* Arabe: Hûr

سُوْرَةُ الْجَاثِيَةِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

حٰمٓ ②

تَنْزِيْلُ الْكِتٰبِ مِنَ اللّٰهِ الْعَزِيْزِ الْحَكِيْمِ ③

اِنَّ فِي السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ لَاٰيٰتٍ لِّلْمُؤْمِنِيْنَ ④

وَفِيْ خَلْقِكُمْ وَمَا يَبُثُّ مِنْ دَآبَّةٍ اٰيٰتٌ لِّقَوْمٍ يُّوْقِنُوْنَ ⑤

وَاخْتِلَافِ الَّيْلِ وَالنَّهَارِ وَمَآ اَنْزَلَ اللّٰهُ مِنَ السَّمَآءِ مِنْ رِّزْقٍ فَاَحْيَا بِهِ الْاَرْضَ بَعْدَ مَوْتِهَا وَتَصْرِيْفِ الرِّيٰحِ اٰيٰتٌ لِّقَوْمٍ يَّعْقِلُوْنَ ⑥

تِلْكَ اٰيٰتُ اللّٰهِ نَتْلُوْهَا عَلَيْكَ بِالْحَقِّ ۚ فَبِاَيِّ حَدِيْثٍ بَعْدَ اللّٰهِ وَاٰيٰتِهٖ يُؤْمِنُوْنَ ⑦

وَيْلٌ لِّكُلِّ اَفَّاكٍ اَثِيْمٍ ⑧

يَّسْمَعُ اٰيٰتِ اللّٰهِ تُتْلٰى عَلَيْهِ ثُمَّ يُصِرُّ مُسْتَكْبِرًا كَاَنْ لَّمْ يَسْمَعْهَا ۚ فَبَشِّرْهُ بِعَذَابٍ اَلِيْمٍ ⑨

وَاِذَا عَلِمَ مِنْ اٰيٰتِنَا شَيْـًٔا اتَّخَذَهَا هُزُوًا ۭ اُولٰٓئِكَ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Hā Mīm.**

3. La revelacio de la Libro venas de Allah, la Ĉiopova, la Saĝa.

4. Vere en la ĉieloj kaj sur la tero estas signoj por la kredantoj,

5. kaj en via kreo kaj en ĉiuj bestoj, kiun Li dissendis, estas signo por popolo firme kredanta.

6. Ankaŭ en la alternado de la nokto kaj de la tago kaj en tiu provizaĵo, kiun Allah sendas el la ĉielo, per kiu Li revivigas la teron post ĝia morto, kaj en la alternado de la ventoj, estas signoj por popolo komprenanta.

7. Tiuj ĉi estas la signoj de Allah, kiujn Ni proklamas al vi kun la vero. Al kiu vorto ili kredos post Allah kaj Liaj signoj?

8. Ve al ĉiu mensogulo kaj pekulo!

9. Al tiu, kiu aŭdas la revelaciojn de Allah, kiam ili estas proklamataj al li, poste tamen persistas je la fieregeco, kvazaŭ li neniam estus aŭdinta, vi anoncu doloran punon!

---

* v. la verson 29an

** Laŭdegenda, Ĉioscia!

لَهُمْ عَذَابٌ مُّهِينٌ ﴿١٠﴾

10. Kaj por tiu, kiu – kiam li ekscias ion el Niaj revelacioj – ridas pri ili, estos hontiga puno.

مِن وَرَآئِهِمْ جَهَنَّمُ ۖ وَلَا يُغْنِي عَنْهُم مَّا كَسَبُوا
شَيْـًٔا وَلَا مَا اتَّخَذُوا مِن دُونِ اللَّهِ أَوْلِيَآءَ ۖ وَلَهُمْ
عَذَابٌ عَظِيمٌ ﴿١١﴾

11. Antaŭ ili estas la Infero kaj al ili neniom utilos tio, kion ili meritis, nek la protektantoj, kiujn ili prenis al si anstataŭ Allah, kaj por ili estos terura turmento.

هَٰذَا هُدًى ۖ وَالَّذِينَ كَفَرُوا بِآيَاتِ رَبِّهِمْ لَهُمْ عَذَابٌ
مِّن رِّجْزٍ أَلِيمٌ ﴿١٢﴾

12. Tiu ĉi estas gvidilo, kaj por tiuj, kiuj rifuzas la revelaciojn de sia Sinjoro, estos la plej dolora puno.

اللَّهُ الَّذِي سَخَّرَ لَكُمُ الْبَحْرَ لِتَجْرِيَ الْفُلْكُ فِيهِ بِأَمْرِهِ
وَلِتَبْتَغُوا مِن فَضْلِهِ وَلَعَلَّكُمْ تَشْكُرُونَ ﴿١٣﴾

13. Estas Allah Tiu, kiu igis servi al vi la maron, por ke la ŝipoj veturu sur ĝi laŭ Lia ordono, kaj por ke vi strebu al Lia graco kaj por ke vi estu dankaj.

وَسَخَّرَ لَكُم مَّا فِي السَّمَاوَاتِ وَمَا فِي الْأَرْضِ جَمِيعًا
مِّنْهُ ۚ إِنَّ فِي ذَٰلِكَ لَآيَاتٍ لِّقَوْمٍ يَتَفَكَّرُونَ ﴿١٤﴾

14. Li igis servi al vi tion, kio estas en la ĉieloj kaj kio estas sur la tero; ĉio venas de Li. Vere en tio estas signoj por popolo pripensanta.

قُل لِّلَّذِينَ آمَنُوا يَغْفِرُوا لِلَّذِينَ لَا يَرْجُونَ أَيَّامَ اللَّهِ
لِيَجْزِيَ قَوْمًا بِمَا كَانُوا يَكْسِبُونَ ﴿١٥﴾

15. Diru al la kredantoj ke ili pardonu al tiuj, kiuj ne timas la punon de Allah, por ke Li rekompencu la popolon pro tio, kion ili meritis.

مَنْ عَمِلَ صَالِحًا فَلِنَفْسِهِ ۖ وَمَنْ أَسَاءَ فَعَلَيْهَا ۖ ثُمَّ
إِلَىٰ رَبِّكُمْ تُرْجَعُونَ ﴿١٦﴾

16. Kiu bonfaras, tiu faras tion por sia propra animo, kaj, kiu malbonfaras, sur tiun falos la malbono. Poste vi revenos al via Sinjoro.

وَلَقَدْ آتَيْنَا بَنِي إِسْرَائِيلَ الْكِتَابَ وَالْحُكْمَ وَالنُّبُوَّةَ
وَرَزَقْنَاهُم مِّنَ الطَّيِّبَاتِ وَفَضَّلْنَاهُمْ عَلَى الْعَالَمِينَ ﴿١٧﴾

17. Ni vere donis al la idoj de Izrael la Skribon kaj la saĝon kaj la profetadon, kaj Ni donis al ili bonajn aĵojn, kaj Ni preferis ilin al la aliaj nacioj.

وَآتَيْنَاهُم بَيِّنَاتٍ مِّنَ الْأَمْرِ ۖ فَمَا اخْتَلَفُوا إِلَّا مِن
بَعْدِ مَا جَاءَهُمُ الْعِلْمُ بَغْيًا بَيْنَهُمْ ۚ إِنَّ رَبَّكَ
يَقْضِي بَيْنَهُمْ يَوْمَ الْقِيَامَةِ فِيمَا كَانُوا فِيهِ
يَخْتَلِفُونَ ﴿١٨﴾

18. Ni donis al ili klarajn pruvojn pri la afero. Ili malkonsentis nur, post kiam venis al ili la vera scio, pro reciproka envio. Vere via Sinjoro juĝos inter ili en la tago de la reviviĝo pri tio, pri kio ili malkonsentis.

ثُمَّ جَعَلْنَاكَ عَلَىٰ شَرِيعَةٍ مِّنَ الْأَمْرِ فَاتَّبِعْهَا وَ
لَا تَتَّبِعْ أَهْوَاءَ الَّذِينَ لَا يَعْلَمُونَ ﴿١٩﴾

19. Poste Ni kondukis vin sur la vojon klaran en la afero de la kredo, vi do sekvu ĝin kaj ne sekvu la pasiojn de tiuj, kiuj nenion scias.

20. Vere ili neniom utilos al vi kontraŭ Allah. Pri la malpieguloj sciu: iuj el ili estas amikoj de la aliaj, sed Allah estas la amiko de la justuloj.

21. Tiuj ĉi estas la instruiloj por la homaro kaj gvidilo kaj kompato por popolo firme kredanta.

22. Ĉu la malbonfarantoj do imagas, ke Ni traktos ilin kiel la kredantojn kaj la bonfarantojn, tiel ke ilia vivo kaj ilia morto estos egalaj? Malbone estas, kiel ili juĝas!

23. Allah kreis la ĉielojn kaj la teron en vero, tial estos rekompencita ĉiu homo pro tio, kion li meritis; ili ne ricevos maljustecon.

24. Ĉu vi do vidis tiun, kiu prenas al si kiel Dion siajn pasiojn, kaj kiun Allah lasas erari en Sia scio, kaj al kiu Li sigelas la orelojn kaj la koron, kaj sur kies okulojn Li etendas dikan vualon? Kiu do kapablos gvidi lin post Allah? Ĉu vi do ne volas akcepti la admonon?

25. Ili diras: "Ne ekzistas io ajn alia ol ĉi tiu nia vivo; ni mortas kaj ni vivas, kaj nenio alia neniigas nin ol la tempo". Pri tio tamen ili ne havas iun veran scion, ili nur supozas.

26. Kiam estaş proklamataj al ili Niaj evidentaj revelacioj, ili povas alporti nur la jenan kontraŭparolon: "Rekonduku niajn patrojn, se vi estas sinceraj! ".

27. Diru: "Allah igas vin vivi, poste morti, poste Li kunvenigos vin en la tago de la revivigo, pri kiu ne ekzistas dubo, sed la plej multaj el la homoj ne scias tion".

28. Al Allah apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero kaj en la tago, en kiu estiĝos la Horo, en tiu tago la mensoguloj pereos,

إِنَّهُمْ لَنْ يُّغْنُوْا عَنْكَ مِنَ اللّٰهِ شَيْـًٔا ؕ وَاِنَّ الظّٰلِمِيْنَ
بَعْضُهُمْ اَوْلِيَآءُ بَعْضٍ ۚ وَاللّٰهُ وَلِيُّ الْمُتَّقِيْنَ ﴿٢٠﴾
هٰذَا بَصَآئِرُ لِلنَّاسِ وَهُدًى وَّرَحْمَةٌ لِّقَوْمٍ
يُّوْقِنُوْنَ ﴿٢١﴾
اَمْ حَسِبَ الَّذِيْنَ اجْتَرَحُوا السَّيِّاٰتِ اَنْ نَّجْعَلَهُمْ
كَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ ۙ سَوَآءً مَّحْيَاهُمْ
وَمَمَاتُهُمْ ؕ سَآءَ مَا يَحْكُمُوْنَ ﴿٢٢﴾ ع ٣
وَخَلَقَ اللّٰهُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ بِالْحَقِّ وَلِتُجْزٰى
كُلُّ نَفْسٍ بِمَا كَسَبَتْ وَهُمْ لَا يُظْلَمُوْنَ ﴿٢٣﴾
اَفَرَءَيْتَ مَنِ اتَّخَذَ اِلٰهَهٗ هَوٰىهُ وَاَضَلَّهُ اللّٰهُ
عَلٰى عِلْمٍ وَّخَتَمَ عَلٰى سَمْعِهٖ وَقَلْبِهٖ وَجَعَلَ عَلٰى
بَصَرِهٖ غِشٰوَةً ؕ فَمَنْ يَّهْدِيْهِ مِنْۢ بَعْدِ اللّٰهِ ؕ
اَفَلَا تَذَكَّرُوْنَ ﴿٢٤﴾
وَقَالُوْا مَا هِيَ اِلَّا حَيَاتُنَا الدُّنْيَا نَمُوْتُ وَنَحْيَا
وَمَا يُهْلِكُنَآ اِلَّا الدَّهْرُ ۚ وَمَا لَهُمْ بِذٰلِكَ مِنْ
عِلْمٍ ۚ اِنْ هُمْ اِلَّا يَظُنُّوْنَ ﴿٢٥﴾
وَاِذَا تُتْلٰى عَلَيْهِمْ اٰيٰتُنَا بَيِّنٰتٍ مَّا كَانَ حُجَّتَهُمْ
اِلَّآ اَنْ قَالُوا ائْتُوْا بِاٰبَآئِنَآ اِنْ كُنْتُمْ صٰدِقِيْنَ ﴿٢٦﴾
قُلِ اللّٰهُ يُحْيِيْكُمْ ثُمَّ يُمِيْتُكُمْ ثُمَّ يَجْمَعُكُمْ اِلٰى
يَوْمِ الْقِيٰمَةِ لَا رَيْبَ فِيْهِ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَ النَّاسِ
لَا يَعْلَمُوْنَ ﴿٢٧﴾ ع ٤
وَلِلّٰهِ مُلْكُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ؕ وَيَوْمَ تَقُوْمُ السَّاعَةُ

29. kaj vi vidos ĉiun popolon surgenuiĝi. Ĉiu popolo estos vokita al sia Skribo: "Hodiaŭ vi ricevos la rekompencon pro tio, kion vi faris.

30. Ĉi tiu estas Nia Libro, ĝi diras al vi la veron. Ni vere enskribigis ĉion, kion vi faris".

31. Pri tiuj, kiuj kredas kaj bonfaras, sciu: ilia Sinjoro kondukos ilin en Sian kompaton. Tio estas la plej granda feliĉo.

32. Pri la miskredantoj, sciu: ĉu Miaj revelacioj ne estis proklamitaj al vi? Vi tamen fariĝis fieregaj kaj vi estis popolo pekema,

33. kaj, kiam estis dirite: "La promeso de Allah estas vera, kaj pri la Horo ne ekzistas dubo", vi diris: "Ni ne scias, kio estas la Horo, ni havas pri ĝi nur malprecizan opinion kaj ni ne estas konvinkitaj".

34. La malbonaj konsekvencoj de ilia agado fariĝos evidentaj al ili kaj tio, kion ili kutimis moki, ĉirkaŭos ilin.

35. Estos dirite al ili: "Hodiaŭ Ni forgesis vin, kiel vi forgesis la venon de ĉi tiu tago. Via restadejo estas la fajro, kaj por vi ne estos iu ajn helpanto.

36. Tio estas, ĉar vi mokis pri la revelacioj de Allah, kaj vin trompis ĉi tiu vivo". Tial ili ne povos eliri de tie, kaj ili ne povos esti elaĉetitaj.

37. Estu laŭdegata Allah, la Sinjoro de la ĉieloj kaj la Sinjoro de la tero, la Sinjoro de l' Universo!

38. Al Li apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero kaj Li estas la Ĉiopova, la Saĝa!

*

Fino de la 25-a parto

يَوْمَئِذٍ يَّخْسَرُ الْمُبْطِلُوْنَ ﴿٢٨﴾

وَتَرٰى كُلَّ اُمَّةٍ جَاثِيَةً ۚ كُلُّ اُمَّةٍ تُدْعٰٓى اِلٰى
كِتٰبِهَا ۭ اَلْيَوْمَ تُجْزَوْنَ مَا كُنْتُمْ تَعْمَلُوْنَ ﴿٢٩﴾

هٰذَا كِتٰبُنَا يَنْطِقُ عَلَيْكُمْ بِالْحَقِّ ۭ اِنَّا كُنَّا نَسْتَنْسِخُ
مَا كُنْتُمْ تَعْمَلُوْنَ ﴿٣٠﴾

فَاَمَّا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ فَيُدْخِلُهُمْ
رَبُّهُمْ فِيْ رَحْمَتِهٖ ۭ ذٰلِكَ هُوَ الْفَوْزُ الْمُبِيْنُ ﴿٣١﴾

وَاَمَّا الَّذِيْنَ كَفَرُوْا ۣ اَفَلَمْ تَكُنْ اٰيٰتِيْ تُتْلٰى عَلَيْكُمْ
فَاسْتَكْبَرْتُمْ وَكُنْتُمْ قَوْمًا مُّجْرِمِيْنَ ﴿٣٢﴾

وَاِذَا قِيْلَ اِنَّ وَعْدَ اللّٰهِ حَقٌّ وَّالسَّاعَةُ لَا رَيْبَ
فِيْهَا قُلْتُمْ مَّا نَدْرِيْ مَا السَّاعَةُ ۙ اِنْ نَّظُنُّ اِلَّا ظَنًّا
وَّمَا نَحْنُ بِمُسْتَيْقِنِيْنَ ﴿٣٣﴾

وَبَدَا لَهُمْ سَيِّاٰتُ مَا عَمِلُوْا وَحَاقَ بِهِمْ مَّا كَانُوْا
بِهٖ يَسْتَهْزِءُوْنَ ﴿٣٤﴾

وَقِيْلَ الْيَوْمَ نَنْسٰىكُمْ كَمَا نَسِيْتُمْ لِقَاۗءَ يَوْمِكُمْ هٰذَا
وَمَاْوٰىكُمُ النَّارُ وَمَا لَكُمْ مِّنْ نّٰصِرِيْنَ ﴿٣٥﴾

ذٰلِكُمْ بِاَنَّكُمُ اتَّخَذْتُمْ اٰيٰتِ اللّٰهِ هُزُوًا وَّغَرَّتْكُمُ
الْحَيٰوةُ الدُّنْيَا ۚ فَالْيَوْمَ لَا يُخْرَجُوْنَ مِنْهَا وَلَا هُمْ
يُسْتَعْتَبُوْنَ ﴿٣٦﴾

فَلِلّٰهِ الْحَمْدُ رَبِّ السَّمٰوٰتِ وَرَبِّ الْاَرْضِ رَبِّ
الْعٰلَمِيْنَ ﴿٣٧﴾

وَلَهُ الْكِبْرِيَاۗءُ فِي السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ۚ وَهُوَ الْعَزِيْزُ
الْحَكِيْمُ ﴿٣٨﴾

سُوْرَةُ الْاَحْقَافِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

حٰمٓ ②

تَنْزِيْلُ الْكِتٰبِ مِنَ اللّٰهِ الْعَزِيْزِ الْحَكِيْمِ ③

مَا خَلَقْنَا السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ وَمَا بَيْنَهُمَآ اِلَّا بِالْحَقِّ وَاَجَلٍ مُّسَمًّى ؕ وَالَّذِيْنَ كَفَرُوْا عَمَّآ اُنْذِرُوْا مُعْرِضُوْنَ ④

قُلْ اَرَءَيْتُمْ مَّا تَدْعُوْنَ مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ اَرُوْنِيْ مَاذَا خَلَقُوْا مِنَ الْاَرْضِ اَمْ لَهُمْ شِرْكٌ فِي السَّمٰوٰتِ ؕ اِيْتُوْنِيْ بِكِتٰبٍ مِّنْ قَبْلِ هٰذَآ اَوْ اَثٰرَةٍ مِّنْ عِلْمٍ اِنْ كُنْتُمْ صٰدِقِيْنَ ⑤

وَمَنْ اَضَلُّ مِمَّنْ يَّدْعُوْا مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ مَنْ لَّا يَسْتَجِيْبُ لَهٗٓ اِلٰى يَوْمِ الْقِيٰمَةِ وَهُمْ عَنْ دُعَآئِهِمْ غٰفِلُوْنَ ⑥

وَاِذَا حُشِرَ النَّاسُ كَانُوْا لَهُمْ اَعْدَآءً وَّكَانُوْا بِعِبَادَتِهِمْ كٰفِرِيْنَ ⑦

وَاِذَا تُتْلٰى عَلَيْهِمْ اٰيٰتُنَا بَيِّنٰتٍ قَالَ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا لِلْحَقِّ لَمَّا جَآءَهُمْ ۙ هٰذَا سِحْرٌ مُّبِيْنٌ ⑧

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Hâ Mîm.**

3. La revelacio de la Libro venas de Allah, la Ĉiopova, la Saĝa.

4. Ni kreis la ĉielojn kaj la teron kaj tion, kio estas inter ili ambaŭ, nur per la vero kaj por difinita tempo. Tiuj tamen, kiuj ne kredas je tio, pri kio ili estas admonitaj, turnas sin for.

5. Diru: "Ĉu vi scias, kio estas tiuj, kiujn vi alvokas anstataŭ Allahon? Montru al mi, kion ili kreis el la tero. Aŭ ĉu ili partoprenas en la ĉieloj? Alportu al mi Libron, kiu estis revelaciita antaŭ ĉi tiu, aŭ iomete da vera scio, se vi estas sinceraj".

6. Kiu estas pli eraranta ol tiu, kiu alvokas anstataŭ Allah tiujn, kiuj ne aŭdos lin ĝis la tago de la revivigo kaj ignoras lian pregon?

7. Kiam la homoj estos kunigitaj, tiuj estos iliaj malamikoj kaj rifuzos ilian adoradon.

8. Kiam Niaj klaraj revelacioj estas proklamataj al ili, la miskredantoj diras pri la vero, kiam ĝi venas al ili: "Ĉi tio estas evidenta magio".

9. Ĉu ili diras: "Li elpensis ĝin"? Diru tiam: "Se mi estus elpensinta ĝin, vi neniom utilus al mi kontraŭ Allah. Li bone scias, kion vi kutimas diri; Li sufiĉas kiel atestanto inter mi kaj vi; Li estas la Senkulpigema, la Pardonema".

---

* v. la verson 22an

** Laŭdegenda, Ĉioscia!

10. Diru: "Mi ne estas novaĵo inter la senditoj, kaj mi ne scias, kio okazos pri mi aŭ pri vi. Mi sekvas nur tion, kio estis revelaciita al mi, kaj mi estas nur klariga admonanto".

11. Diru: "Kion vi opinias? Se tio venas de Allah kaj vi rifuzas ĝin, kaj iu atestanto* el la idoj de Izrael atestis pri io simila kaj kredis, vi male fieregiĝis, ĉu vi ne estas malpieguloj? ". Vere Allah ne gvidas la popolon malpiegan.

12. Diris la nekredantoj pri la kredantoj: "Se la Korano estus io bona, tiuj ne estus akceptintaj ĝin antaŭ ol ni", kaj, ĉar ili ne volas esti gvidataj de ĝi, ili diras: "Ĉi tio nur estas malnova mensogo".

13. Antaŭ ĝi jam estis la Libro de Moseo, gvidilo kaj favoro, kaj ĉi tiu estas Libro certiganta, en lingvo araba, por admoni la malpiegulojn, kaj bona novaĵo por la bonfarantoj,

14. por tiuj, kiuj diras: "Nia Sinjoro estas Allah" kaj poste persistas. Por ili ne plu estos timo nek malgajeco.

15. Ili estos loĝantoj de l' Paradizo; tie ili restos ĉiam: rekompenco pro tio, kion ili faris.

16. Ni ordonis kiel devon de la homoj la bonajn agojn kontraŭ siaj gepatroj. Lia patrino portis lin en doloro kaj en doloro naskis lin. Lin porti kaj lin demamigi daŭras tridek monatojn. Poste, kiam li atingis sian plenaĝon kaj li estas kvardekjara, li diras: "Mia Sinjoro, faru min danka pro Viaj favoroj, kiujn Vi donis al mi kaj al miaj gepatroj, kaj igu min bonfari por plaĉi al vi kaj faru miajn idojn justaj por mi.

* Moseo

أَمْ يَقُولُونَ افْتَرٰىهُ ۖ قُلْ إِنِ افْتَرَيْتُهُ فَلَا تَمْلِكُونَ
لِي مِنَ اللَّهِ شَيْـًٔا ۖ هُوَ أَعْلَمُ بِمَا تُفِيضُونَ فِيهِ ۖ
كَفٰى بِهِ شَهِيدًا بَيْنِي وَبَيْنَكُمْ ۖ وَهُوَ الْغَفُورُ
الرَّحِيمُ ⑨
قُلْ مَا كُنْتُ بِدْعًا مِنَ الرُّسُلِ وَمَا أَدْرِي مَا يُفْعَلُ
بِي وَلَا بِكُمْ ۖ إِنْ أَتَّبِعُ إِلَّا مَا يُوحٰى إِلَيَّ وَمَا أَنَا
إِلَّا نَذِيرٌ مُبِينٌ ⑩
قُلْ أَرَءَيْتُمْ إِنْ كَانَ مِنْ عِنْدِ اللَّهِ وَكَفَرْتُمْ بِهِ
وَشَهِدَ شَاهِدٌ مِنْ بَنِي إِسْرَآءِيلَ عَلٰى مِثْلِهِ
فَـَٔامَنَ وَاسْتَكْبَرْتُمْ ۖ إِنَّ اللَّهَ لَا يَهْدِي الْقَوْمَ الظّٰلِمِينَ ⑪ ع
وَقَالَ الَّذِينَ كَفَرُوا لِلَّذِينَ ءَامَنُوا لَوْ كَانَ خَيْرًا مَا
سَبَقُونَآ إِلَيْهِ ۚ وَإِذْ لَمْ يَهْتَدُوا بِهِ فَسَيَقُولُونَ
هٰذَآ إِفْكٌ قَدِيمٌ ⑫
وَمِنْ قَبْلِهِ كِتٰبُ مُوسٰٓى إِمَامًا وَرَحْمَةً ۚ وَهٰذَا
كِتٰبٌ مُصَدِّقٌ لِسَانًا عَرَبِيًّا لِيُنْذِرَ الَّذِينَ ظَلَمُوا ۖ
وَبُشْرٰى لِلْمُحْسِنِينَ ⑬
إِنَّ الَّذِينَ قَالُوا رَبُّنَا اللَّهُ ثُمَّ اسْتَقَامُوا فَلَا خَوْفٌ
عَلَيْهِمْ وَلَا هُمْ يَحْزَنُونَ ⑭
أُولٰٓئِكَ أَصْحٰبُ الْجَنَّةِ خٰلِدِينَ فِيهَا ۖ جَزَآءً بِمَا كَانُوا
يَعْمَلُونَ ⑮
وَوَصَّيْنَا الْإِنسَانَ بِوَالِدَيْهِ إِحْسٰنًا ۖ حَمَلَتْهُ
أُمُّهُ كُرْهًا وَوَضَعَتْهُ كُرْهًا ۖ وَحَمْلُهُ وَفِصٰلُهُ

Vere mi turnas min al Vi kaj mi vere estas submetiĝanto".

17. Estas ili tiuj, de kiuj Ni akceptas la bonajn agojn, kiujn ili faris, kaj de kiuj Ni pretervidas la malbonajn: ili estos inter la loĝantoj de la Paradizo. Tiu ĉi estas la sincera promeso, kiu estis farita al ili.

18. Tiu tamen, kiu diras al siaj gepatroj: "Fi al vi! Ĉu vi promesas al mi, ke mi reviviĝos, kvankam antaŭ mi jam forpasis generacioj? ", kaj tiam ili ambaŭ plorpetas helpon de Allah kaj diras: "Ve al vi, kredu! Vere la promeso de Allah estas vera! ", li tamen respondas: "Ĉio ĉi estas nenio alia ol la fabeloj de la antikvuloj".

19. Estas ili tiuj, kontraŭ kiuj veriĝos la juĝo de la puno eldirita kontraŭ popoloj, kiuj estis antaŭ ili, konsistantaj el Ginnoj kaj el homoj. Vere, ili estis la perdantoj.

20. Por ĉiuj estos rangoj laŭ tio, kion ili faris, por ke Li rekompencu tute iliajn agojn, kaj por ili ne estos maljusteco.

21. En la tago, en kiu la miskredantoj estos elmetitaj al la fajro: "Vi elĉerpis la bonajn aĵojn en via vivo kaj vi ĝuis ilin. Hodiaŭ tamen vi estos rekompencitaj per la puno de la honto, ĉar vi fieregiĝis sur la tero, maljuste, kaj ĉar vi estigis malpacon".

22. Memoru la fraton de Aad, kiam li admonis sian popolon apud la dunoj* – estis admonantoj jam antaŭ li kaj post li – kaj diris: "Adoru nur Allahon. Mi timas por vi la punon de la tago terura".

23. Ili demandis: "Ĉu vi venis al ni por malproksimigi nin de niaj Dioj? Alportu do al ni tion, pri kio vi nin minacas, se vi estas unu el la sinceruloj".

---

* Arabe: Al-Ahkāf, regiono en Hadramaut

تَلْثُوْنَ شَهْرًا ۚ حَتّٰٓى اِذَا بَلَغَ اَشُدَّهٗ وَبَلَغَ اَرْبَعِيْنَ
سَنَةً ۙ قَالَ رَبِّ اَوْزِعْنِيْٓ اَنْ اَشْكُرَ نِعْمَتَكَ الَّتِيْٓ
اَنْعَمْتَ عَلَيَّ وَعَلٰى وَالِدَيَّ وَاَنْ اَعْمَلَ صَالِحًا
تَرْضٰىهُ وَاَصْلِحْ لِيْ فِيْ ذُرِّيَّتِيْ ۚ اِنِّيْ تُبْتُ اِلَيْكَ
وَاِنِّيْ مِنَ الْمُسْلِمِيْنَ ⑮
اُولٰٓئِكَ الَّذِيْنَ نَتَقَبَّلُ عَنْهُمْ اَحْسَنَ مَا عَمِلُوْا وَ
نَتَجَاوَزُ عَنْ سَيِّاٰتِهِمْ فِيْٓ اَصْحٰبِ الْجَنَّةِ ۭ وَعْدَ
الصِّدْقِ الَّذِيْ كَانُوْا يُوْعَدُوْنَ ⑯
وَالَّذِيْ قَالَ لِوَالِدَيْهِ اُفٍّ لَّكُمَآ اَتَعِدٰنِنِيْٓ اَنْ
اُخْرَجَ وَقَدْ خَلَتِ الْقُرُوْنُ مِنْ قَبْلِيْ ۚ وَهُمَا
يَسْتَغِيْثٰنِ اللّٰهَ وَيْلَكَ اٰمِنْ ڰ اِنَّ وَعْدَ اللّٰهِ حَقٌّ ۚ
فَيَقُوْلُ مَا هٰذَآ اِلَّآ اَسَاطِيْرُ الْاَوَّلِيْنَ ⑰
اُولٰٓئِكَ الَّذِيْنَ حَقَّ عَلَيْهِمُ الْقَوْلُ فِيْٓ اُمَمٍ قَدْ
خَلَتْ مِنْ قَبْلِهِمْ مِّنَ الْجِنِّ وَالْاِنْسِ ۭ اِنَّهُمْ
كَانُوْا خٰسِرِيْنَ ⑱
وَلِكُلٍّ دَرَجٰتٌ مِّمَّا عَمِلُوْا ۚ وَلِيُوَفِّيَهُمْ اَعْمَالَهُمْ
وَهُمْ لَا يُظْلَمُوْنَ ⑲
وَيَوْمَ يُعْرَضُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا عَلَى النَّارِ ۭ اَذْهَبْتُمْ
طَيِّبٰتِكُمْ فِيْ حَيَاتِكُمُ الدُّنْيَا وَاسْتَمْتَعْتُمْ بِهَا ۚ
فَالْيَوْمَ تُجْزَوْنَ عَذَابَ الْهُوْنِ بِمَا كُنْتُمْ تَسْتَكْبِرُوْنَ
فِي الْاَرْضِ بِغَيْرِ الْحَقِّ وَبِمَا كُنْتُمْ تَفْسُقُوْنَ ⑳ ع ۲
وَاذْكُرْ اَخَا عَادٍ ۭ اِذْ اَنْذَرَ قَوْمَهٗ بِالْاَحْقَافِ وَ

24. Li respondis: "Vere la scio pri tio estas nur ĉe Allah kaj mi nur anoncas al vi tion, kun kio mi estis sendita, sed mi vidas, ke vi estas popolo nescianta".

25. Kiam ili vidis la punon alproksimiĝi kiel nubego al iliaj valoj, ili diris: "Tiu ĉi estas nubo, kiu alportas al ni pluvon." Ne! Tio estas, kion vi volis akceli, ventego, en kiu estas dolora puno,

26. ĝi detruos ĉion laŭ la ordono de sia Sinjoro. La sekvantan matenon oni ne plu vidis, pri ili, ion alian ol la loĝejojn. Tiel Ni rekompencas la popolon pekeman.

27. Ni donis al ili la povon super tio, super kio Ni ne donis al vi la povon, kaj Ni donis al ili aŭdadon kaj vidadon kaj korojn, sed al ili neniom utilis ilia aŭdado kaj ilia vidado kaj iliaj koroj, ĉar ili negis la revelaciojn de Allah. Sur ilin falis tio, kion ili kutimis moki.

28. Vere Ni jam detruis urbojn ĉirkaŭ vi, kaj Ni montris la signojn de ĉiuj flankoj, por ke ili konvertiĝu.

29. Kial do ne helpis ilin tiuj, kiujn ili prenis al si, anstataŭ Allahon, kiel Diojn, por ke ili alproksimigu ilin al Li? Ne, tiuj foriris de ili. Jen ilia mensogo kaj tio, kion ili kutimis elpensi!

30. Memoru, kiam Ni direktis al vi grupon de Ginnoj, kiuj deziris aŭdi la Koranon; kiam ili estis en ĝia ĉeesto, ili diris: "Silentu". Kiam ĝi finiĝis, ili reiris al sia popolo, admonante.

31. Ili diris: "Ho nia popolo! Ni aŭdis Libron, kiu estis sendita post Moseo kiel certigo de tio, kio estis antaŭ ĝi; ĝi gvidas al la vero kaj al la rekta vojo.

32. Ho nia popolo, sekvu la heroldon de Allah kaj kredu je Li. Li pardonos al vi viajn

قَدْ خَلَتِ النُّذُرُ مِنْۢ بَيْنِ يَدَيْهِ وَمِنْ خَلْفِهٖٓ
اَلَّا تَعْبُدُوْٓا اِلَّا اللّٰهَ ۭ اِنِّىْٓ اَخَافُ عَلَيْكُمْ عَذَابَ
يَوْمٍ عَظِيْمٍ ﴿٢٣﴾
قَالُوْٓا اَجِئْتَنَا لِتَاْفِكَنَا عَنْ اٰلِهَتِنَا ۚ فَاْتِنَا بِمَا
تَعِدُنَآ اِنْ كُنْتَ مِنَ الصّٰدِقِيْنَ ﴿٢٤﴾
قَالَ اِنَّمَا الْعِلْمُ عِنْدَ اللّٰهِ ۡ وَاُبَلِّغُكُمْ مَّآ اُرْسِلْتُ
بِهٖ وَلٰكِنِّىْٓ اَرٰىكُمْ قَوْمًا تَجْهَلُوْنَ ﴿٢٥﴾
فَلَمَّا رَاَوْهُ عَارِضًا مُّسْتَقْبِلَ اَوْدِيَتِهِمْ ۙ قَالُوْا هٰذَا
عَارِضٌ مُّمْطِرُنَا ۭ بَلْ هُوَ مَا اسْتَعْجَلْتُمْ بِهٖ ۭ رِيْحٌ
فِيْهَا عَذَابٌ اَلِيْمٌ ﴿٢٦﴾
تُدَمِّرُ كُلَّ شَيْءٍۢ بِاَمْرِ رَبِّهَا فَاَصْبَحُوْا لَا يُرٰٓى
اِلَّا مَسٰكِنُهُمْ ۭ كَذٰلِكَ نَجْزِي الْقَوْمَ الْمُجْرِمِيْنَ ﴿٢٥﴾
وَلَقَدْ مَكَّنّٰهُمْ فِيْمَآ اِنْ مَّكَّنّٰكُمْ فِيْهِ وَجَعَلْنَا
لَهُمْ سَمْعًا وَّاَبْصَارًا وَّاَفْـِٕدَةً ۡ فَمَآ اَغْنٰى عَنْهُمْ
سَمْعُهُمْ وَلَآ اَبْصَارُهُمْ وَلَآ اَفْـِٕدَتُهُمْ مِّنْ شَيْءٍ
اِذْ كَانُوْا يَجْحَدُوْنَ بِاٰيٰتِ اللّٰهِ ۙ وَحَاقَ بِهِمْ مَّا كَانُوْا
بِهٖ يَسْتَهْزِءُوْنَ ﴿٢٦﴾
وَلَقَدْ اَهْلَكْنَا مَا حَوْلَكُمْ مِّنَ الْقُرٰى وَصَرَّفْنَا
الْاٰيٰتِ لَعَلَّهُمْ يَرْجِعُوْنَ ﴿٢٧﴾
فَلَوْلَا نَصَرَهُمُ الَّذِيْنَ اتَّخَذُوْا مِنْ دُوْنِ اللّٰهِ قُرْبَانًا
اٰلِهَةً ۭ بَلْ ضَلُّوْا عَنْهُمْ ۚ وَذٰلِكَ اِفْكُهُمْ وَمَا كَانُوْا
يَفْتَرُوْنَ ﴿٢٨﴾

وَإِذْ صَرَفْنَآ إِلَيْكَ نَفَرًا مِّنَ الْجِنِّ يَسْتَمِعُونَ الْقُرْآنَ
فَلَمَّا حَضَرُوهُ قَالُوٓا أَنصِتُوا فَلَمَّا قُضِيَ وَلَّوْا إِلَىٰ
قَوْمِهِم مُّنذِرِينَ ﴿٢٩﴾
قَالُوا يَٰقَوْمَنَآ إِنَّا سَمِعْنَا كِتَٰبًا أُنزِلَ مِنۢ بَعْدِ مُوسَىٰ
مُصَدِّقًا لِّمَا بَيْنَ يَدَيْهِ يَهْدِىٓ إِلَى ٱلْحَقِّ وَإِلَىٰ
طَرِيقٍ مُّسْتَقِيمٍ ﴿٣٠﴾
يَٰقَوْمَنَآ أَجِيبُوا دَاعِىَ ٱللَّهِ وَءَامِنُوا بِهِۦ يَغْفِرْ لَكُم
مِّن ذُنُوبِكُمْ وَيُجِرْكُم مِّنْ عَذَابٍ أَلِيمٍ ﴿٣١﴾
وَمَن لَّا يُجِبْ دَاعِىَ ٱللَّهِ فَلَيْسَ بِمُعْجِزٍ فِى ٱلْأَرْضِ
وَلَيْسَ لَهُۥ مِن دُونِهِۦٓ أَوْلِيَآءُ ۚ أُو۟لَٰٓئِكَ فِى ضَلَٰلٍ مُّبِينٍ ﴿٣٢﴾
أَوَلَمْ يَرَوْا۟ أَنَّ ٱللَّهَ ٱلَّذِى خَلَقَ ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَٱلْأَرْضَ
وَلَمْ يَعْىَ بِخَلْقِهِنَّ بِقَٰدِرٍ عَلَىٰٓ أَن يُحْۦِىَ ٱلْمَوْتَىٰ ۚ
بَلَىٰٓ إِنَّهُۥ عَلَىٰ كُلِّ شَىْءٍ قَدِيرٌ ﴿٣٣﴾
وَيَوْمَ يُعْرَضُ ٱلَّذِينَ كَفَرُوا۟ عَلَى ٱلنَّارِ أَلَيْسَ هَٰذَا
بِٱلْحَقِّ ۖ قَالُوا۟ بَلَىٰ وَرَبِّنَا ۚ قَالَ فَذُوقُوا۟ ٱلْعَذَابَ
بِمَا كُنتُمْ تَكْفُرُونَ ﴿٣٤﴾
فَٱصْبِرْ كَمَا صَبَرَ أُو۟لُوا۟ ٱلْعَزْمِ مِنَ ٱلرُّسُلِ وَلَا
تَسْتَعْجِل لَّهُمْ ۚ كَأَنَّهُمْ يَوْمَ يَرَوْنَ مَا يُوعَدُونَ ۙ
لَمْ يَلْبَثُوٓا۟ إِلَّا سَاعَةً مِّن نَّهَارٍ ۚ بَلَٰغٌ ۚ فَهَلْ يُهْلَكُ
إِلَّا ٱلْقَوْمُ ٱلْفَٰسِقُونَ ﴿٣٥﴾

pekojn kaj Li protektos vin de la dolora puno.

33. Kiu ne sekvas la heroldon de Allah, tiu ne povas fuĝi sur la tero, kaj por li ne estos protektanto krom Li. Ili troviĝas en evidenta eraro".

34. Ĉu ili ne vidis, ke Allah, kiu kreis la ĉielojn kaj la teron kaj ne laciĝis pro ilia kreo, havas la povon revivigi la mortintojn? Jes! Li vere havas povon super ĉiuj aferoj.

35. En la tago, en kiu la miskredantoj estos elmetitaj al la fajro: "Ĉu ĉi tio ne estas la vero? ". Ili diros: "Jes! Per nia Sinjoro! ". Li diros: "Gustumu do la punon, ĉar vi estis miskredantaj".

36. Persistu do, kiel persistis la senditoj, dotitaj je firmeco, kaj ne rapidu pro ili. En la tago, en kiu ili vidos tion, pri kio estis minacite al ili, ŝajnos al ili, ke ili atendis nur unu horon de unu tago. Tio estas senditaĵo! Neniu alia estos neniigita ol la popolo malpia.

سُوْرَةُ مُحَمَّدٍ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

اَلَّذِيْنَ كَفَرُوْا وَصَدُّوْا عَنْ سَبِيْلِ اللّٰهِ اَضَلَّ
اَعْمَالَهُمْ ②

وَالَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ وَاٰمَنُوْا بِمَا نُزِّلَ
عَلٰى مُحَمَّدٍ وَّهُوَ الْحَقُّ مِنْ رَّبِّهِمْ ۙ كَفَّرَ عَنْهُمْ
سَيِّاٰتِهِمْ وَاَصْلَحَ بَالَهُمْ ③

ذٰلِكَ بِاَنَّ الَّذِيْنَ كَفَرُوا اتَّبَعُوا الْبَاطِلَ وَاَنَّ الَّذِيْنَ
اٰمَنُوا اتَّبَعُوا الْحَقَّ مِنْ رَّبِّهِمْ ۚ كَذٰلِكَ يَضْرِبُ اللّٰهُ
لِلنَّاسِ اَمْثَالَهُمْ ④

فَاِذَا لَقِيْتُمُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا فَضَرْبَ الرِّقَابِ ۖ حَتّٰٓى اِذَآ
اَثْخَنْتُمُوْهُمْ فَشُدُّوا الْوَثَاقَ ۙ فَاِمَّا مَنًّا بَعْدُ وَاِمَّا
فِدَآءً حَتّٰى تَضَعَ الْحَرْبُ اَوْزَارَهَا ۚ ذٰلِكَ ۛ وَلَوْ يَشَآءُ
اللّٰهُ لَانْتَصَرَ مِنْهُمْ وَلٰكِنْ لِّيَبْلُوَ بَعْضَكُمْ بِبَعْضٍ ۗ وَ
الَّذِيْنَ قُتِلُوْا فِيْ سَبِيْلِ اللّٰهِ فَلَنْ يُّضِلَّ اَعْمَالَهُمْ ⑤

سَيَهْدِيْهِمْ وَيُصْلِحُ بَالَهُمْ ⑥

وَيُدْخِلُهُمُ الْجَنَّةَ عَرَّفَهَا لَهُمْ ⑦

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اِنْ تَنْصُرُوا اللّٰهَ يَنْصُرْكُمْ وَ
يُثَبِّتْ اَقْدَامَكُمْ ⑧

وَالَّذِيْنَ كَفَرُوْا فَتَعْسًا لَّهُمْ وَاَضَلَّ اَعْمَالَهُمْ ⑨

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. De tiuj, kiuj nekredas kaj devojigas de la afero de Allah, Li neniigos la farojn.

3. kaj de tiuj, kiuj kredas kaj bonfaras kaj kredas je tio, kio estis sendita al Mahometo – tio estas la vero de ilia Sinjoro – Li forprenos la pekojn kaj Li plibonigos ilian staton.

4. Tio estas, ĉar la nekredantoj sekvas la falson kaj la kredantoj sekvas la veron de sia Sinjoro. Tiel Allah prezentas al la homoj iliajn similaĵojn.

5. Kiam vi renkontas la miskredantojn, frapu iliajn nukojn, ĝis vi venkos ilin; poste streĉu firme la katenojn de la restantoj. Poste estu aŭ pardono aŭ elaĉeto, ĝis la milito estos deponinta siajn armilojn. Tiel estas. Se Allah estus volinta, Li mem punus ilin, sed Li volis elprovi iujn el ili per la aliaj. De tiuj, kiuj estas mortigitaj por la afero de Allah, Li neniam neniigos la farojn.

6. Li ilin venkigos kaj plibonigos ilian staton,

7. kaj kondukos ilin en la Paradizon, kiun Li anoncis al ili.

8. Ho vi kredantoj, se vi helpas la aferon de Allah, ankaŭ Li helpos vin, kaj firmigos viajn paŝojn.

9. Kaj de la miskredantoj – ve al ili! – Li neniigos la farojn.

10. Tio estas, ĉar ili malamas tion, kion Allah sendis, tial Li faras iliajn agojn senfruktaj.

ذٰلِكَ بِأَنَّهُمْ كَرِهُوا مَآ أَنزَلَ اللَّهُ فَأَحْبَطَ أَعْمَالَهُمْ ﴿٩﴾

11. Ĉu ili ne vojaĝis sur la tero por vidi, kiel estis la fino de tiuj antaŭ ili? Allah pereigis ilin, kaj la sama sorto estas destinita por la miskredantoj.

أَفَلَمْ يَسِيرُوا فِي الْأَرْضِ فَيَنظُرُوا كَيْفَ كَانَ عَاقِبَةُ الَّذِينَ مِن قَبْلِهِمْ ۖ دَمَّرَ اللَّهُ عَلَيْهِمْ ۖ وَلِلْكَافِرِينَ أَمْثَالُهَا ﴿١٠﴾

12. Tio estas, ĉar Allah estas la Protektanto de la kredantoj, kaj ĉar por la miskredantoj ne ekzistas protektanto.

ذٰلِكَ بِأَنَّ اللَّهَ مَوْلَى الَّذِينَ آمَنُوا وَأَنَّ الْكَافِرِينَ لَا مَوْلَىٰ لَهُمْ ﴿١١﴾ ع

13. Allah vere kondukos la kredantojn kaj la bonfarantojn en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj, sed por la miskredantoj, kiuj ĝuas kaj manĝas, kiel manĝas la brutoj, la fajro estos loĝejo.

إِنَّ اللَّهَ يُدْخِلُ الَّذِينَ آمَنُوا وَعَمِلُوا الصَّالِحَاتِ جَنَّاتٍ تَجْرِي مِن تَحْتِهَا الْأَنْهَارُ ۖ وَالَّذِينَ كَفَرُوا يَتَمَتَّعُونَ وَيَأْكُلُونَ كَمَا تَأْكُلُ الْأَنْعَامُ وَالنَّارُ مَثْوًى لَّهُمْ ﴿١٢﴾

14. Kiom multajn urbojn Ni detruis, eĉ pli fortajn ol tiu via urbo, kiu forpelis vin (Profeto!)! Ili ne havis helpanton!

وَكَأَيِّن مِّن قَرْيَةٍ هِيَ أَشَدُّ قُوَّةً مِّن قَرْيَتِكَ الَّتِي أَخْرَجَتْكَ ۚ أَهْلَكْنَاهُمْ فَلَا نَاصِرَ لَهُمْ ﴿١٣﴾

15. Ĉu egalas tiu, kiu sin apogas al la klaraj pruvoj de sia Sinjoro, al tiu, al kiu ŝajnas bela la malbono de liaj agoj, kaj kiu sekvas siajn malbonajn pasiojn?

أَفَمَن كَانَ عَلَىٰ بَيِّنَةٍ مِّن رَّبِّهِ كَمَن زُيِّنَ لَهُ سُوءُ عَمَلِهِ وَاتَّبَعُوا أَهْوَاءَهُم ﴿١٤﴾

16. Similaĵo pri la Paradizo, kiu estas promesita al la justuloj: en ĝi estas riveroj el akvo, kiu ne putriĝas, kaj riveroj el lakto, kies gusto ne ŝanĝiĝas, kaj riveroj el vino, bongusta por la trinkantoj, kaj riveroj el pura mielo. En ĝi ili havos ĉiuspecajn fruktojn kaj la pardonon de sia Sinjoro. Ĉu ili povas egali al tiuj, kiuj estas en la fajro, kaj trinkas bolantan akvon, kiu disŝiras iliajn intestojn?

مَّثَلُ الْجَنَّةِ الَّتِي وُعِدَ الْمُتَّقُونَ ۖ فِيهَا أَنْهَارٌ مِّن مَّاءٍ غَيْرِ آسِنٍ ۖ وَأَنْهَارٌ مِّن لَّبَنٍ لَّمْ يَتَغَيَّرْ طَعْمُهُ ۚ وَأَنْهَارٌ مِّنْ خَمْرٍ لَّذَّةٍ لِّلشَّارِبِينَ ۚ وَأَنْهَارٌ مِّنْ عَسَلٍ مُّصَفًّى ۖ وَلَهُمْ فِيهَا مِن كُلِّ الثَّمَرَاتِ وَمَغْفِرَةٌ مِّن رَّبِّهِمْ ۖ كَمَنْ هُوَ خَالِدٌ فِي النَّارِ وَسُقُوا مَاءً حَمِيمًا فَقَطَّعَ أَمْعَاءَهُمْ ﴿١٥﴾

17. Inter ili estas iuj, kiuj aŭskultas vin, sed, kiam ili foriras de vi, ili diras al tiuj, al kiuj estis donita la vera scio: "Kion li ĵus diris? ". Estas ili tiuj, kies korojn Allah sigelis, kaj kiuj sekvas siajn malbonajn pasiojn.

وَمِنْهُم مَّن يَسْتَمِعُ إِلَيْكَ حَتَّىٰ إِذَا خَرَجُوا مِنْ عِندِكَ قَالُوا لِلَّذِينَ أُوتُوا الْعِلْمَ مَاذَا قَالَ آنِفًا

18. Por tiuj tamen, kiuj estas gvidataj, Li pliigas la gvidadon kaj Li donas al ili justecon.

19. Ĉu ili ion alian povas atendi, ol ke la Horo venos super ilin neatendite? Certe jam venis ĝiaj antaŭsignoj. Kiom tamen uti-

los al ili ilia memoro, kiam ĝi estos alvenin-ta?

20. Tial sciu, ke ne ekzistas alia Dio ol Allah, do petu pardonon pro viaj mankoj kaj por la kredantoj kaj por la kredantinoj. Allah konas vian fervoran agadon kaj vian ripozejon.

21. La kredantoj diras: "Kial ne estas sendita ĉapitro? ", sed kiam decidiga ĉapitro estas sendita kaj en ĝi estas menciita la batalo, tiam vi vidas tiujn, en kies koroj estas malsano, rigardi vin per rigardo kvazaŭ ili estus svenantaj pro la alveno de la morto. Pereon super ili!

22. Obeemo kaj afabla vorto estus pli bonaj por ili. Kiam la afero estas decidita, estus pli bone por ili, se ili estus fidelaj al Allah.

23. Ĉu vi do volis estigi malpacon en la lando, kaj tranĉi la ligilojn de la samsangeco, turnante vin for?

24. Estas ili tiuj, kiujn Allah malbenas, tiel ke Li faras ilin surdaj kaj blindigas iliajn okulojn.

25. Ĉu ili do ne volas pripensi pri la Korano, aŭ ĉu sur iliaj koroj estas rigliloj?

26. Tiujn, kiuj turnas siajn dorsojn, post kiam evidentiĝis por ili la gvidilo, Satano trompis, kaj li plenigis ilin per falsaj esperoj.

27. Tio estas, ĉar ili diris al tiuj, kiuj malamas, kion Allah sendis: "Ni sekvos vin en iuj aferoj". Allah tamen konas iliajn sekretojn.

28. Kiel estas tamen, kiam la anĝeloj forprenas iliajn animojn kaj frapas iliajn vizaĝojn kaj iliajn dorsojn?

أُولَٰئِكَ الَّذِينَ لَعَنَهُمُ اللَّهُ فَأَصَمَّهُمْ وَأَعْمَىٰ أَبْصَارَهُمْ ﴿٢٣﴾

أَفَلَا يَتَدَبَّرُونَ الْقُرْآنَ أَمْ عَلَىٰ قُلُوبٍ أَقْفَالُهَا ﴿٢٤﴾

إِنَّ الَّذِينَ ارْتَدُّوا عَلَىٰ أَدْبَارِهِمْ مِنْ بَعْدِ مَا

أُولَٰئِكَ الَّذِينَ طَبَعَ اللَّهُ عَلَىٰ قُلُوبِهِمْ وَاتَّبَعُوا أَهْوَاءَهُمْ ﴿١٤﴾

وَالَّذِينَ اهْتَدَوْا زَادَهُمْ هُدًى وَآتَاهُمْ تَقْوَاهُمْ ﴿١٥﴾

فَهَلْ يَنظُرُونَ إِلَّا السَّاعَةَ أَن تَأْتِيَهُم بَغْتَةً فَقَدْ جَاءَ أَشْرَاطُهَا ۚ فَأَنَّىٰ لَهُمْ إِذَا جَاءَتْهُمْ ذِكْرَاهُمْ ﴿١٦﴾

فَاعْلَمْ أَنَّهُ لَا إِلَٰهَ إِلَّا اللَّهُ وَاسْتَغْفِرْ لِذَنبِكَ وَلِلْمُؤْمِنِينَ وَالْمُؤْمِنَاتِ ۗ وَاللَّهُ يَعْلَمُ مُتَقَلَّبَكُمْ وَمَثْوَاكُمْ ﴿١٩﴾

وَيَقُولُ الَّذِينَ آمَنُوا لَوْلَا نُزِّلَتْ سُورَةٌ ۖ فَإِذَا أُنزِلَتْ سُورَةٌ مُّحْكَمَةٌ وَذُكِرَ فِيهَا الْقِتَالُ ۙ رَأَيْتَ الَّذِينَ فِي قُلُوبِهِم مَّرَضٌ يَنظُرُونَ إِلَيْكَ نَظَرَ الْمَغْشِيِّ عَلَيْهِ مِنَ الْمَوْتِ ۖ فَأَوْلَىٰ لَهُمْ ﴿٢٠﴾

طَاعَةٌ وَقَوْلٌ مَّعْرُوفٌ ۚ فَإِذَا عَزَمَ الْأَمْرُ ۚ فَلَوْ صَدَقُوا اللَّهَ لَكَانَ خَيْرًا لَّهُمْ ﴿٢١﴾

فَهَلْ عَسَيْتُمْ إِن تَوَلَّيْتُمْ أَن تُفْسِدُوا فِي الْأَرْضِ وَتُقَطِّعُوا أَرْحَامَكُمْ ﴿٢٢﴾

تَبَيَّنَ لَهُمُ الْهُدَى ۙ الشَّيْطٰنُ سَوَّلَ لَهُمْ وَاَمْلٰى
لَهُمْ ﴿٢٥﴾

29. Tio estas, ĉar ili sekvis tion, kio kolerigas Allahon, kaj malamis tion, kio plaĉas al Li. Li tial neniigis iliajn farojn.

ذٰلِكَ بِاَنَّهُمْ قَالُوْا لِلَّذِيْنَ كَرِهُوْا مَا نَزَّلَ اللّٰهُ
سَنُطِيْعُكُمْ فِيْ بَعْضِ الْاَمْرِ ۖ وَاللّٰهُ يَعْلَمُ
اِسْرَارَهُمْ ﴿٢٦﴾

30. Ĉu imagas tiuj, en kies koroj estas malsano, ke Allah neniam evidentigos ilian malbonecon?

فَكَيْفَ اِذَا تَوَفَّتْهُمُ الْمَلٰٓئِكَةُ يَضْرِبُوْنَ وُجُوْهَهُمْ
وَاَدْبَارَهُمْ ﴿٢٧﴾

31. Se Ni volus, Ni povus montri ilin al vi kaj vi povus rekoni ilin per iliaj distingiloj. Vi certe rekonos ilin per la sono de ilia voĉo. Allah konas viajn farojn.

ذٰلِكَ بِاَنَّهُمُ اتَّبَعُوْا مَآ اَسْخَطَ اللّٰهَ وَكَرِهُوْا
رِضْوَانَهٗ فَاَحْبَطَ اَعْمَالَهُمْ ﴿٢٨﴾ ع ٤

32. Ni certe volas elprovi vin por ekscii, kiuj el vi estas la batalantoj por la afero de Allah kaj la persistemuloj, kaj Ni volas evidentigi la faktojn pri vi.

اَمْ حَسِبَ الَّذِيْنَ فِيْ قُلُوْبِهِمْ مَّرَضٌ اَنْ لَّنْ يُّخْرِجَ
اللّٰهُ اَضْغَانَهُمْ ﴿٢٩﴾

33. Tiuj, kiuj nekredas kaj devojigas de la afero de Allah kaj kontraŭstaras la senditon, post kiam evidentiĝis por ili la gvidilo, neniam malutilos al Allah. Li faros iliajn agojn senfruktaj.

وَلَوْ نَشَآءُ لَاَرَيْنٰكَهُمْ فَلَعَرَفْتَهُمْ بِسِيْمٰهُمْ ۭ وَ
لَتَعْرِفَنَّهُمْ فِيْ لَحْنِ الْقَوْلِ ۭ وَاللّٰهُ يَعْلَمُ اَعْمَالَكُمْ ﴿٣٠﴾

34. Ho vi kredantoj, obeu Allahon kaj obeu la senditon kaj ne vanigu viajn agojn!

وَلَنَبْلُوَنَّكُمْ حَتّٰى نَعْلَمَ الْمُجٰهِدِيْنَ مِنْكُمْ وَ
الصّٰبِرِيْنَ ۙ وَنَبْلُوَا۟ اَخْبَارَكُمْ ﴿٣١﴾

35. Vere tiuj, kiuj nekredas kaj devojigas de la afero de Allah, poste mortas, kiam ili ankoraŭ estas miskredantoj – Allah neniam pardonos al ili.

اِنَّ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا وَصَدُّوْا عَنْ سَبِيْلِ اللّٰهِ وَ
شَآقُّوا الرَّسُوْلَ مِنْۢ بَعْدِ مَا تَبَيَّنَ لَهُمُ الْهُدٰى ۙ
لَنْ يَّضُرُّوا اللّٰهَ شَيْـًٔا ۭ وَسَيُحْبِطُ اَعْمَالَهُمْ ﴿٣٢﴾

36. Tial ne laciĝu, por ke vi ne devu peti pacon de ili. Vi devas venki. Allah estas kun vi kaj Li neniam vanigos viajn verkojn.

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اَطِيْعُوا اللّٰهَ وَاَطِيْعُوا الرَّسُوْلَ
وَلَا تُبْطِلُوْٓا اَعْمَالَكُمْ ﴿٣٣﴾

37. Vere ĉi tiu vivo estas nur ludo kaj amuzaĵo, kaj, se vi kredas kaj respektegas Dion, Li donos al vi la rekompencon kaj ne volos forpreni de vi viajn propraĵojn.

اِنَّ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا وَصَدُّوْا عَنْ سَبِيْلِ اللّٰهِ ثُمَّ
مَاتُوْا وَهُمْ كُفَّارٌ فَلَنْ يَّغْفِرَ اللّٰهُ لَهُمْ ﴿٣٤﴾

38. Se Li volus forpreni ilin de vi kaj volus devigi vin, vi fariĝus avaraj kaj Li tiam evidentigus vian malbonecon.

فَلَا تَهِنُوْا وَ تَدْعُوْٓا اِلَى السَّلْمِ ۖ وَ اَنْتُمُ الْاَعْلَوْنَ ۚ
وَاللّٰهُ مَعَكُمْ وَلَنْ يَّتِرَكُمْ اَعْمَالَكُمْ ﴿٣٥﴾
اِنَّمَا الْحَيٰوةُ الدُّنْيَا لَعِبٌ وَّ لَهْوٌ ۭ وَاِنْ تُؤْمِنُوْا
وَ تَتَّقُوْا يُؤْتِكُمْ اُجُوْرَكُمْ وَ لَا يَسْـَٔلْكُمْ اَمْوَالَكُمْ ﴿٣٦﴾
اِنْ يَّسْـَٔلْكُمُوْهَا فَيُحْفِكُمْ تَبْخَلُوْا وَ يُخْرِجْ
اَضْغَانَكُمْ ﴿٣٧﴾
هٰٓاَنْتُمْ هٰٓؤُلَآءِ تُدْعَوْنَ لِتُنْفِقُوْا فِيْ سَبِيْلِ اللّٰهِ ۚ
فَمِنْكُمْ مَّنْ يَّبْخَلُ ۚ وَ مَنْ يَّبْخَلْ فَاِنَّمَا يَبْخَلُ عَنْ
نَّفْسِهٖ ۭ وَ اللّٰهُ الْغَنِيُّ وَاَنْتُمُ الْفُقَرَآءُ ۚ وَاِنْ تَتَوَلَّوْا
يَسْتَبْدِلْ قَوْمًا غَيْرَكُمْ ۙ ثُمَّ لَا يَكُوْنُوْٓا اَمْثَالَكُمْ ﴿٣٨﴾ ع

39. Rigardu! Vi estas tiuj, kiuj estis vokitaj por almozdoni por la afero de Allah, sed inter vi estas iuj, kiuj estas avaraj; tiu tamen, kiu estas avara, agas kontraŭ si mem, ĉar Allah estas la Memsufiĉa kaj vi estas dependaj. Se vi turnos vin for, Li estigos anstataŭ vi alian popolon, kaj ili ne estos similaj al vi.

Ĉapitro 48 **Al-Fath** (La venko) 26-a parto

سُوْرَةُ الْفَتْحِ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ﴿١﴾
اِنَّا فَتَحْنَا لَكَ فَتْحًا مُّبِيْنًا ﴿٢﴾
لِّيَغْفِرَ لَكَ اللّٰهُ مَا تَقَدَّمَ مِنْ ذَنْۢبِكَ وَمَا تَاَخَّرَ
وَ يُتِمَّ نِعْمَتَهٗ عَلَيْكَ وَيَهْدِيَكَ صِرَاطًا مُّسْتَقِيْمًا ﴿٣﴾
وَّ يَنْصُرَكَ اللّٰهُ نَصْرًا عَزِيْزًا ﴿٤﴾
هُوَ الَّذِيْٓ اَنْزَلَ السَّكِيْنَةَ فِيْ قُلُوْبِ الْمُؤْمِنِيْنَ
لِيَزْدَادُوْٓا اِيْمَانًا مَّعَ اِيْمَانِهِمْ ۭ وَ لِلّٰهِ جُنُوْدُ
السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ۭ وَ كَانَ اللّٰهُ عَلِيْمًا حَكِيْمًا ﴿٥﴾

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ni vere venkis por vi evidentan venkon,

3. por ke Allah pardonu al vi viajn pekojn malnovajn kaj novajn, kaj por ke Li plenumu Sian gracon al vi, kaj gvidu vin sur la rektan vojon,

4. kaj por ke Allah helpu vin per potenca helpo.

5. Estas Li Tiu, kiu sendas pacon en la korojn de la kredantoj, por ke ili aldonu kredon al sia kredo — al Allah apartenas la armeoj de la ĉieloj kaj de la tero, Allah estas ĉioscia, saĝa —

لِّيُدْخِلَ الْمُؤْمِنِيْنَ وَالْمُؤْمِنٰتِ جَنّٰتٍ تَجْرِيْ
مِنْ تَحْتِهَا الْاَنْهٰرُ خٰلِدِيْنَ فِيْهَا وَيُكَفِّرَ عَنْهُمْ
سَيِّاٰتِهِمْ ۚ وَكَانَ ذٰلِكَ عِنْدَ اللّٰهِ فَوْزًا عَظِيْمًا ۝٥
وَّيُعَذِّبَ الْمُنٰفِقِيْنَ وَالْمُنٰفِقٰتِ وَالْمُشْرِكِيْنَ وَ
الْمُشْرِكٰتِ الظَّاۤنِّيْنَ بِاللّٰهِ ظَنَّ السَّوْءِ ۚ عَلَيْهِمْ دَاۤئِرَةُ
السَّوْءِ ۚ وَغَضِبَ اللّٰهُ عَلَيْهِمْ وَلَعَنَهُمْ وَاَعَدَّ لَهُمْ
جَهَنَّمَ ۚ وَسَاۤءَتْ مَصِيْرًا ۝٦
وَلِلّٰهِ جُنُوْدُ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ ۚ وَكَانَ اللّٰهُ عَزِيْزًا
حَكِيْمًا ۝٧
اِنَّاۤ اَرْسَلْنٰكَ شَاهِدًا وَّمُبَشِّرًا وَّنَذِيْرًا ۝٨
لِّتُؤْمِنُوْا بِاللّٰهِ وَرَسُوْلِهٖ وَتُعَزِّرُوْهُ وَتُوَقِّرُوْهُ ۚ وَ
تُسَبِّحُوْهُ بُكْرَةً وَّاَصِيْلًا ۝٩
اِنَّ الَّذِيْنَ يُبَايِعُوْنَكَ اِنَّمَا يُبَايِعُوْنَ اللّٰهَ ۚ يَدُ اللّٰهِ
فَوْقَ اَيْدِيْهِمْ ۚ فَمَنْ نَّكَثَ فَاِنَّمَا يَنْكُثُ عَلٰى
نَفْسِهٖ ۚ وَمَنْ اَوْفٰى بِمَا عٰهَدَ عَلَيْهُ اللّٰهَ فَسَيُؤْتِيْهِ
اَجْرًا عَظِيْمًا ۝١٠
سَيَقُوْلُ لَكَ الْمُخَلَّفُوْنَ مِنَ الْاَعْرَابِ شَغَلَتْنَاۤ
اَمْوَالُنَا وَاَهْلُوْنَا فَاسْتَغْفِرْ لَنَا ۚ يَقُوْلُوْنَ بِاَلْسِنَتِهِمْ
مَّا لَيْسَ فِيْ قُلُوْبِهِمْ ۚ قُلْ فَمَنْ يَّمْلِكُ لَكُمْ مِّنَ اللّٰهِ
شَيْـًٔا اِنْ اَرَادَ بِكُمْ ضَرًّا اَوْ اَرَادَ بِكُمْ نَفْعًا ۚ بَلْ
كَانَ اللّٰهُ بِمَا تَعْمَلُوْنَ خَبِيْرًا ۝١١
بَلْ ظَنَنْتُمْ اَنْ لَّنْ يَّنْقَلِبَ الرَّسُوْلُ وَالْمُؤْمِنُوْنَ

6. kaj por ke Li enirigu la kredantojn kaj la kredantinojn en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj por resti tie por ĉiam, kaj por ke Li forprenu de ili iliajn malbonajn agojn – apud Allah tio estas la plej granda triumfo –

7. kaj por ke Li punu la hipokritulojn kaj la hipokritulinojn kaj la idolanojn kaj la idolaninojn, kiuj havas malbonajn pensojn pri Allah. Sur ilin venos terura malfeliĉo. La kolero de Allah estas super ili, kaj Li malbenis ilin kaj pretigis por ili la Inferon. Malbonega estas tiu destino!

8. Al Allah apartenas la armeoj de la ĉieloj kaj de la tero. Allah estas ĉiopova, saĝa.

9. Ni vere sendis vin kiel atestanton kaj kiel portanton de la bona novaĵo kaj kiel admonanton,

10. por ke vi kredu je Allah kaj al Lia sendito, kaj helpu lin kaj honoru lin kaj gloregu Lin matene kaj vespere.

11. Vere tiuj, kiuj ĵuras fidon al vi, nur al Allah ĵuras fidon. La mano de Allah estas super iliaj manoj. Tial, kiu perfidas, tiu perfidas sin mem, sed kiu plenumas tion, kion li promesis al Allah, al tiu Li donos grandegan rekompencon.

12. Diros al vi tiuj el la Araboj de la dezerto, kiuj restis malantaŭe:* "Niaj propraĵoj kaj niaj familioj tenis nin okupitaj, do petu pardonon por ni! ". Ili parolas per siaj langoj tion, kio ne estas en iliaj koroj. Diru: "Kiu povus ricevi por vi ion ajn de Allah, se Li volus trafi vin per malfeliĉo, aŭ se Li volus konsenti al vi ĝojon? Ne! Allah bone scias, kion vi faras.

13. Ne! Vi imagas, ke la sendito kaj la kredantoj neniam revenos al siaj familioj: tiu penso ŝajnis bela al viaj koroj kaj vi pensis

* Temas pri la batalo apud Tabuk

malbonajn pensojn, kaj vi estas malpuriĝinta popolo".

14. Por tiuj, kiuj ne kredas je Allah kaj al lia Sendito, por la miskredantoj, Ni vere pretigis flamantan fajron.

15. Al Allah apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero. Li pardonas, al kiu Li volas, kaj Li punas, kiun Li volas. Allah estas senkulpigema, pardonema.

16. Diros tiuj, kiuj restis malantaŭe, kiam vi eliros al la batalakirajo por preni ĝin: "Permesu al ni, ke ni sekvu vin". Ili volus ŝanĝi la vorton de Allah. Diru: "Neniam vi sekvos min. Tiel parolis Allah antaŭe". Tiam ili diros: "Ne! Sed vi envias nin". Ne! Ili komprenas nur malmulte.

17. Diru al la Araboj de la dezerto, kiuj restis malantaŭe: "Vi estos vokataj kontraŭ popolo de fortegaj militistoj; batalu kontraŭ ili, ĝis ili submetiĝos. Se vi poste obeos, Allah donos al vi belegan rekompencon; se vi tamen turnos vin for, kiel vi antaŭe turnis vin for, Li punos vin per dolora puno".

18. Ne trafas riproĉo la blindulojn, nek trafas riproĉo la kriplulojn, nek trafas riproĉo la malsanulojn. Kiu obeas Allahon kaj Lian senditon, tiun Li kondukos en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj. Kiu tamen turnas sin for, tiun Li punos per dolora puno.

19. Certe Allah estis kontenta pri la kredantoj, kiam ili juris fidon al vi sub la arbo*, kaj Li sciis, kio estas en iliaj koroj, tial Li sendis la pacon al ili kaj Li rekompencis ilin per tuja venko,

20. kaj per abunda batalakirajo, kiun ili prenis. Allah estas ĉiopova, saĝa.

إِلَىٰٓ أَهْلِيهِمْ أَبَدًا وَزُيِّنَ ذَٰلِكَ فِي قُلُوبِكُمْ وَ
ظَنَنتُمْ ظَنَّ السَّوْءِ وَكُنتُمْ قَوْمًۢا بُورًا ﴿١٢﴾
وَمَن لَّمْ يُؤْمِنۢ بِاللَّهِ وَرَسُولِهِۦ فَإِنَّآ أَعْتَدْنَا
لِلْكَٰفِرِينَ سَعِيرًا ﴿١٣﴾
وَلِلَّهِ مُلْكُ السَّمَٰوَٰتِ وَالْأَرْضِ ۚ يَغْفِرُ لِمَن يَشَآءُ
وَيُعَذِّبُ مَن يَشَآءُ ۚ وَكَانَ اللَّهُ غَفُورًا رَّحِيمًا ﴿١٤﴾
سَيَقُولُ الْمُخَلَّفُونَ إِذَا انطَلَقْتُمْ إِلَىٰ مَغَانِمَ
لِتَأْخُذُوهَا ذَرُونَا نَتَّبِعْكُمْ ۖ يُرِيدُونَ أَن
يُبَدِّلُوا كَلَٰمَ اللَّهِ ۚ قُل لَّن تَتَّبِعُونَا كَذَٰلِكُمْ قَالَ
اللَّهُ مِن قَبْلُ ۖ فَسَيَقُولُونَ بَلْ تَحْسُدُونَنَا ۚ بَلْ
كَانُوا لَا يَفْقَهُونَ إِلَّا قَلِيلًا ﴿١٥﴾
قُل لِّلْمُخَلَّفِينَ مِنَ الْأَعْرَابِ سَتُدْعَوْنَ إِلَىٰ
قَوْمٍ أُولِي بَأْسٍ شَدِيدٍ تُقَٰتِلُونَهُمْ أَوْ يُسْلِمُونَ ۖ
فَإِن تُطِيعُوا يُؤْتِكُمُ اللَّهُ أَجْرًا حَسَنًا ۖ وَإِن
تَتَوَلَّوْا كَمَا تَوَلَّيْتُم مِّن قَبْلُ يُعَذِّبْكُمْ عَذَابًا
أَلِيمًا ﴿١٦﴾
لَّيْسَ عَلَى الْأَعْمَىٰ حَرَجٌ وَلَا عَلَى الْأَعْرَجِ حَرَجٌ
وَلَا عَلَى الْمَرِيضِ حَرَجٌ ۗ وَمَن يُطِعِ اللَّهَ وَ
رَسُولَهُۥ يُدْخِلْهُ جَنَّٰتٍ تَجْرِي مِن تَحْتِهَا
الْأَنْهَٰرُ ۖ وَمَن يَتَوَلَّ يُعَذِّبْهُ عَذَابًا أَلِيمًا ﴿١٧﴾
لَّقَدْ رَضِيَ اللَّهُ عَنِ الْمُؤْمِنِينَ إِذْ يُبَايِعُونَكَ تَحْتَ
الشَّجَرَةِ فَعَلِمَ مَا فِي قُلُوبِهِمْ فَأَنزَلَ السَّكِينَةَ

* Apud Hudajbija

عَلَيْهِمْ وَاَثَابَهُمْ فَتْحًا قَرِيْبًا ﴿١٩﴾

وَّمَغَانِمَ كَثِيْرَةً يَّاْخُذُوْنَهَا ؕ وَكَانَ اللّٰهُ عَزِيْزًا

حَكِيْمًا ﴿٢٠﴾

وَعَدَكُمُ اللّٰهُ مَغَانِمَ كَثِيْرَةً تَاْخُذُوْنَهَا فَعَجَّلَ

لَكُمْ هٰذِهٖ وَكَفَّ اَيْدِيَ النَّاسِ عَنْكُمْ ۚ وَلِتَكُوْنَ

اٰيَةً لِّلْمُؤْمِنِيْنَ وَيَهْدِيَكُمْ صِرَاطًا مُّسْتَقِيْمًا ﴿٢١﴾

وَّاُخْرٰى لَمْ تَقْدِرُوْا عَلَيْهَا ۫ قَدْ اَحَاطَ اللّٰهُ بِهَا ؕ

وَكَانَ اللّٰهُ عَلٰى كُلِّ شَيْءٍ قَدِيْرًا ﴿٢٢﴾

وَلَوْ قٰتَلَكُمُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا لَوَلَّوُا الْاَدْبَارَ ثُمَّ لَا

يَجِدُوْنَ وَلِيًّا وَّلَا نَصِيْرًا ﴿٢٣﴾

سُنَّةَ اللّٰهِ الَّتِيْ قَدْ خَلَتْ مِنْ قَبْلُ ۚۖ وَلَنْ تَجِدَ

لِسُنَّةِ اللّٰهِ تَبْدِيْلًا ﴿٢٤﴾

وَهُوَ الَّذِيْ كَفَّ اَيْدِيَهُمْ عَنْكُمْ وَاَيْدِيَكُمْ

عَنْهُمْ بِبَطْنِ مَكَّةَ مِنْۢ بَعْدِ اَنْ اَظْفَرَكُمْ عَلَيْهِمْ ؕ

وَكَانَ اللّٰهُ بِمَا تَعْمَلُوْنَ بَصِيْرًا ﴿٢٥﴾

هُمُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا وَصَدُّوْكُمْ عَنِ الْمَسْجِدِ الْحَرَامِ

وَالْهَدْيَ مَعْكُوْفًا اَنْ يَّبْلُغَ مَحِلَّهٗ ؕ وَلَوْلَا رِجَالٌ

مُّؤْمِنُوْنَ وَنِسَآءٌ مُّؤْمِنٰتٌ لَّمْ تَعْلَمُوْهُمْ اَنْ

تَطَـُٔوْهُمْ فَتُصِيْبَكُمْ مِّنْهُمْ مَّعَرَّةٌۢ بِغَيْرِ عِلْمٍ ۚ

لِيُدْخِلَ اللّٰهُ فِيْ رَحْمَتِهٖ مَنْ يَّشَآءُ ۚ لَوْ تَزَيَّلُوْا

لَعَذَّبْنَا الَّذِيْنَ كَفَرُوْا مِنْهُمْ عَذَابًا اَلِيْمًا ﴿٢٦﴾

اِذْ جَعَلَ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا فِيْ قُلُوْبِهِمُ الْحَمِيَّةَ حَمِيَّةَ

21. Allah promesis al vi abundan kaptaĵon, kiun vi prenos, kaj intertempe Li tuj donis al vi tion kaj Li tenis la manojn de la homoj for de vi, por ke tio estu signo por la kredantoj, kaj por gvidi vin sur la rektan vojon.

22. Alian venkon, kiun vi ankoraŭ ne povas atingi, vere Allah havas en Sia povo. Allah havas povon super ĉiuj aferoj.

23. Se la miskredantoj estus batalintaj kontraŭ vi, ili certe estus turnintaj siajn dorsojn, poste ili ne estus trovintaj protektanton nek helpanton.

24. Tio estas la kutimo de Allah, kiel estis antaŭe; neniam vi trovos ŝanĝon pri la kutimo de Allah.

25. Estas Li Tiu, kiu tenis iliajn manojn for de vi kaj viajn manojn for de ili en la valo de Mekko, post kiam vi superis ilin. Vere Allah vidas, kion vi faras.

26. Estas ili tiuj, kiuj nekredis kaj haltigis vin for de la Sankta Moskeo, kaj malhelpis la oferon atingi sian celon. Se ne estus la kredantaj viroj kaj la kredantaj virinoj, kiujn vi ne konis, kaj kiujn vi eble estus surtretintaj nevole – tiel, ke vin estus trafinta pro ili riproĉo de krimo, nescie – li estus permesinta vin batali. Li tamen haltigis vin, por ke Allah enirigu en Sian gracon tiun, kiun Li volas. Se ili estus disigitaj, Ni certe estus trafinta per dolora puno tiujn el ili, kiuj nekredis.

27. Kiam la miskredantoj akceptis en siajn korojn la malŝaton, la malŝaton, kiu devenas de la nescio, Allah sendis Sian pacon al Sia sendito kaj al la kredantoj kaj Li ordonis al ili la kredon de la justeco kaj ili pravis kaj meritis ĝin. Allah konas ĉiujn aferojn.

الْجَاهِلِيَّةِ فَأَنْزَلَ اللّٰهُ سَكِينَتَهُ عَلٰى رَسُولِهِ وَ
عَلَى الْمُؤْمِنِينَ وَ أَلْزَمَهُمْ كَلِمَةَ التَّقْوٰى وَكَانُوٓا
ع اَحَقَّ بِهَا وَ اَهْلَهَا ۚ وَكَانَ اللّٰهُ بِكُلِّ شَيْءٍ عَلِيمًا ﴿٢٦﴾
لَقَدْ صَدَقَ اللّٰهُ رَسُولَهُ الرُّءْيَا بِالْحَقِّ ۖ لَتَدْخُلُنَّ
الْمَسْجِدَ الْحَرَامَ اِنْ شَآءَ اللّٰهُ اٰمِنِينَ ۙ مُحَلِّقِينَ
رُءُوسَكُمْ وَمُقَصِّرِينَ ۙ لَا تَخَافُونَ ۗ فَعَلِمَ مَا لَمْ
تَعْلَمُوا فَجَعَلَ مِنْ دُونِ ذٰلِكَ فَتْحًا قَرِيبًا ﴿٢٧﴾
هُوَ الَّذِيٓ اَرْسَلَ رَسُولَهُ بِالْهُدٰى وَدِينِ الْحَقِّ
لِيُظْهِرَهُ عَلَى الدِّينِ كُلِّهِ ۚ وَكَفٰى بِاللّٰهِ شَهِيدًا ﴿٢٨﴾
مُحَمَّدٌ رَّسُولُ اللّٰهِ ۚ وَالَّذِينَ مَعَهُٓ اَشِدَّآءُ عَلَى الْكُفَّارِ
رُحَمَآءُ بَيْنَهُمْ تَرٰىهُمْ رُكَّعًا سُجَّدًا يَّبْتَغُونَ فَضْلًا
مِّنَ اللّٰهِ وَ رِضْوَانًا ۖ سِيمَاهُمْ فِي وُجُوهِهِمْ مِّنْ
اَثَرِ السُّجُودِ ۚ ذٰلِكَ مَثَلُهُمْ فِي التَّوْرٰىةِ ۚ وَمَثَلُهُمْ
فِي الْاِنْجِيلِ ۚ كَزَرْعٍ اَخْرَجَ شَطْـَٔهُ فَاٰزَرَهُ فَاسْتَغْلَظَ
فَاسْتَوٰى عَلٰى سُوقِهِ يُعْجِبُ الزُّرَّاعَ لِيَغِيظَ بِهِمُ
الْكُفَّارَ ۗ وَعَدَ اللّٰهُ الَّذِينَ اٰمَنُوا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ
ع مِنْهُمْ مَّغْفِرَةً وَّاَجْرًا عَظِيمًا ﴿٢٩﴾

28. Allah vere plenumis al Sia sendito en vero lian vizion: "Vi certe eniros en la Sankta Moskeon, se Allah volas, sekuraj, kun razitaj kapoj aŭ kun mallonga hararo. Vi ne timos, ĉar Li scias, kion vi ne scias. Krome, Li destinis tujan venkon.

29. Estas Li Tiu, kiu sendis Sian senditon kun la gvidilo kaj kun la vera religio por igi ĝin venki super ĉiu religio. Allah sufiĉas kiel atestanto.

30. Mahometo estas sendito de Allah. Tiuj, kiuj estas kun li, estas severaj kontraŭ la miskredantoj, sed afablaj inter si. Vi vidas ilin riverenci, terenkuŝiĝi, strebante al la graco de Allah kaj al Lia plezuro. Iliaj distingiloj estas sur iliaj vizaĝoj: la signoj de la terenkuŝiĝo. Jen ilia similaĵo en la Torao kaj ilia similaĵo en la Evangelio: "Ili estas kiel la semgrajno, kiu estigas sian ĝermon, poste plifortigas ĝin, poste ĝi dikiĝas kaj firme staras sur sia trunketo, ĝojigante la semistojn". Ĝi kolerigos la miskredantojn. Allah promesis al tiuj el ili, kiuj kredas kaj bonfaras, pardonon kaj grandegan rekompencon.

سُوْرَةُ الْحُجُرَاتِ مَدَنِيَّةٌ (٤٩)

revelaciita en Medino

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا لَا تُقَدِّمُوْا بَيْنَ يَدَيِ اللّٰهِ
وَرَسُوْلِهٖ وَاتَّقُوا اللّٰهَ ۭ اِنَّ اللّٰهَ سَمِيْعٌ عَلِيْمٌ ②

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا لَا تَرْفَعُوْٓا اَصْوَاتَكُمْ فَوْقَ
صَوْتِ النَّبِيِّ وَلَا تَجْهَرُوْا لَهٗ بِالْقَوْلِ كَجَهْرِ
بَعْضِكُمْ لِبَعْضٍ اَنْ تَحْبَطَ اَعْمَالُكُمْ وَاَنْتُمْ
لَا تَشْعُرُوْنَ ③

اِنَّ الَّذِيْنَ يَغُضُّوْنَ اَصْوَاتَهُمْ عِنْدَ رَسُوْلِ اللّٰهِ
اُولٰۗىِٕكَ الَّذِيْنَ امْتَحَنَ اللّٰهُ قُلُوْبَهُمْ لِلتَّقْوٰى ۭ
لَهُمْ مَّغْفِرَةٌ وَّاَجْرٌ عَظِيْمٌ ④

اِنَّ الَّذِيْنَ يُنَادُوْنَكَ مِنْ وَّرَاۗءِ الْحُجُرٰتِ
اَكْثَرُهُمْ لَا يَعْقِلُوْنَ ⑤

وَلَوْ اَنَّهُمْ صَبَرُوْا حَتّٰى تَخْرُجَ اِلَيْهِمْ لَكَانَ
خَيْرًا لَّهُمْ ۭ وَاللّٰهُ غَفُوْرٌ رَّحِيْمٌ ⑥

يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْٓا اِنْ جَاۗءَكُمْ فَاسِقٌۢ بِنَبَاٍ
فَتَبَيَّنُوْٓا اَنْ تُصِيْبُوْا قَوْمًۢا بِجَهَالَةٍ فَتُصْبِحُوْا
عَلٰي مَا فَعَلْتُمْ نٰدِمِيْنَ ⑦

وَاعْلَمُوْٓا اَنَّ فِيْكُمْ رَسُوْلَ اللّٰهِ ۭ لَوْ يُطِيْعُكُمْ فِيْ
كَثِيْرٍ مِّنَ الْاَمْرِ لَعَنِتُّمْ وَلٰكِنَّ اللّٰهَ حَبَّبَ اِلَيْكُمُ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ho vi kredantoj, ne estu provokantaj en la ĉeesto de Allah kaj de Lia sendito, sed respektegu Allahon. Vere Allah estas ĉioaŭda, ĉioscia.

3. Ho vi kredantoj, ne laŭtigu viajn voĉojn super tiun de la Profeto kaj ne parolu tiel laŭte al li, kiel vi kutimas paroli unu kun la alia, por ke ne vaniĝu viaj faroj, dum vi ne priatentas.

4. Kiuj mallaŭtigas siajn voĉojn antaŭ la sendito de Allah, estas ili tiuj, kies korojn Allah purigis en justeco. Por ili estos pardono kaj grandega rekompenco.

5. Kiuj tamen vokas vin laŭte de ekster la loĝĉambroj, la plej multaj el ili ne komprenas.

6. Se ili havus paciencon, ĝis vi eliras al ili, por ili estus pli bone. Allah estas senkulpigema, pardonema.

7. Ho vi kredantoj, se iu malbonulo venas al vi kun iu novaĵo, kontrolu ĝin, por ke vi ne faru maljustecon al gento nescianta kaj devu penti poste pro tio, kion vi faris.

8. Sciu, ke la sendito de Allah estas inter vi. Se li kondutus pri kelkaj aferoj laŭ via volo, vi pereus, sed Allah beligis la kredon por vi kaj ornamis ĝin en viaj koroj kaj Li igis vin malami la miskredon kaj la malbonfaron kaj la kontraŭstaron. Estas ili tiuj, kiuj sekvas la rektan vojon

* v. la verson 5an

الْإِيمَانَ وَ زَيَّنَهٗ فِيْ قُلُوْبِكُمْ وَكَرَّهَ اِلَيْكُمُ الْكُفْرَ
وَالْفُسُوْقَ وَالْعِصْيَانَ ؕ اُولٰٓئِكَ هُمُ الرّٰشِدُوْنَ ۙ﴿۷﴾
فَضْلًا مِّنَ اللّٰهِ وَنِعْمَةً ؕ وَاللّٰهُ عَلِيْمٌ حَكِيْمٌ ﴿۸﴾
وَاِنْ طَآئِفَتٰنِ مِنَ الْمُؤْمِنِيْنَ اقْتَتَلُوْا فَاَصْلِحُوْا
بَيْنَهُمَا ۚ فَاِنْۢ بَغَتْ اِحْدٰىهُمَا عَلَى الْاُخْرٰى فَقَاتِلُوا
الَّتِيْ تَبْغِيْ حَتّٰى تَفِيْٓءَ اِلٰٓى اَمْرِ اللّٰهِ ۚ فَاِنْ فَآءَتْ
فَاَصْلِحُوْا بَيْنَهُمَا بِالْعَدْلِ وَاَقْسِطُوْا ؕ اِنَّ اللّٰهَ
يُحِبُّ الْمُقْسِطِيْنَ ﴿۹﴾
اِنَّمَا الْمُؤْمِنُوْنَ اِخْوَةٌ فَاَصْلِحُوْا بَيْنَ اَخَوَيْكُمْ
وَاتَّقُوا اللّٰهَ لَعَلَّكُمْ تُرْحَمُوْنَ ﴿۱۰﴾ ع
يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا لَا يَسْخَرْ قَوْمٌ مِّنْ قَوْمٍ عَسٰٓى
اَنْ يَّكُوْنُوْا خَيْرًا مِّنْهُمْ وَلَا نِسَآءٌ مِّنْ نِّسَآءٍ عَسٰٓى
اَنْ يَّكُنَّ خَيْرًا مِّنْهُنَّ ۚ وَلَا تَلْمِزُوْٓا اَنْفُسَكُمْ وَلَا
تَنَابَزُوْا بِالْاَلْقَابِ ؕ بِئْسَ الِاسْمُ الْفُسُوْقُ بَعْدَ
الْاِيْمَانِ ۚ وَمَنْ لَّمْ يَتُبْ فَاُولٰٓئِكَ هُمُ الظّٰلِمُوْنَ ﴿۱۱﴾
يٰٓاَيُّهَا الَّذِيْنَ اٰمَنُوا اجْتَنِبُوْا كَثِيْرًا مِّنَ الظَّنِّ اِنَّ
بَعْضَ الظَّنِّ اِثْمٌ وَّلَا تَجَسَّسُوْا وَلَا يَغْتَبْ
بَّعْضُكُمْ بَعْضًا ؕ اَيُحِبُّ اَحَدُكُمْ اَنْ يَّاْكُلَ لَحْمَ
اَخِيْهِ مَيْتًا فَكَرِهْتُمُوْهُ ؕ وَاتَّقُوا اللّٰهَ ؕ اِنَّ اللّٰهَ
تَوَّابٌ رَّحِيْمٌ ﴿۱۲﴾
يٰٓاَيُّهَا النَّاسُ اِنَّا خَلَقْنٰكُمْ مِّنْ ذَكَرٍ وَّ اُنْثٰى
وَجَعَلْنٰكُمْ شُعُوْبًا وَّقَبَآئِلَ لِتَعَارَفُوْا ؕ اِنَّ

9. per la graco kaj la kompato de Allah. Allah estas ĉioscia, saĝa.

10. Se du partioj de kredantoj batalas unu kontraŭ la alia, pacigu ilin ambaŭ, sed se unu el ili ekscesas kontraŭ la alia, tiam batalu kontraŭ tiu, kiu ekscesis, ĝis ĝi revenos al la obeemo al Allah. Kiam ĝi revenas, pacigu ilin ambaŭ laŭ justeco kaj agu juste. Vere Allah amas tiujn, kiuj agas juste.

11. Vere la kredantoj estas fratoj, do pacigu viajn fratojn kaj respektegu Allahon, por ke estu kompato por vi.

12. Ho vi kredantoj! Ne ridu iuj el vi pri la aliaj – eble ĉi tiuj estas pli bonaj ol tiuj – nek virinoj pri aliaj virinoj – eble ĉi tiuj estas pli bonaj ol tiuj. Ne kalumniu kaj ne insultu unu la alian. Malbona estas la akuzo de malvirto post la kredo! Kiuj ne pentas, tiuj estas la malpieguloj.

13. Ho vi kredantoj, evitu la oftan suspektadon, ĉar kelkaj suspektoj estas peko, kaj ne spionu kaj ne kalumniu unu la alian. Ĉu al iu el vi plaĉus manĝi la karnon de sia frato mortinta? Vi certe abomenus tion. Respektegu do Allahon. Vere Allah estas grandanima, pardonema.

14. Ho vi homoj! Ni kreis vin el viro kaj virino kaj faris vin popoloj kaj triboj por ke vi ekkonu unu la alian. Vere antaŭ Allah la plej eminenta el vi estas tiu, kiu estas la plej justa. Vere Allah estas ĉioscia, ĉiokona.

15. La Araboj de la dezerto diras: "Ni kredas". Diru: "Vi ne kredas, vi nur diras: "Ni akceptis la Islamon", sed la kredo ankoraŭ ne eniris en viajn korojn". Se vi tamen obeos Allahon kaj Lian senditon, tiam Li malpliigos neniun el viaj faroj. Vere Allah estas senkulpigema, pardonema.

16. Vere, kredantoj estas nur tiuj, kiuj kredas je Allah kaj al Lia sendito, poste ne du-

bas, sed batalas per siaj proprafoj kaj per sia tuta animo por la afero de Allah. Tiuj estas la sinceremuloj.

17. Diru: "Ĉu vi volas instrui Allahon pri via religio, kvankam Allah scias ĉion, kio estas en la ĉieloj kaj kio estas sur la tero, kaj kvankam Allah scias ĉiujn afojn? ".

18. Ili rigardas kiel favoron faritan al vi, ke ili akceptis la Islamon. Diru: "Ne rigardu kiel favoron al mi, ke vi akceptis la Islamon. Ne! Male, Allah donis favoron al vi, ĉar Li gvidis vin al la kredo, se vi estas sinceraj".

19. Vere Allah konas la sekretojn de la ĉieloj kaj de la tero kaj Allah vidas, kion vi faras.

أَكْرَمَكُمْ عِنْدَ اللّٰهِ أَتْقٰكُمْ ۚ إِنَّ اللّٰهَ عَلِيمٌ
خَبِيرٌ ﴿١٣﴾
قَالَتِ الْأَعْرَابُ آمَنَّا ۖ قُلْ لَّمْ تُؤْمِنُوا وَلٰكِنْ
قُولُوا أَسْلَمْنَا وَلَمَّا يَدْخُلِ الْإِيمَانُ فِي قُلُوبِكُمْ ۖ
وَإِنْ تُطِيعُوا اللّٰهَ وَرَسُولَهُ لَا يَلِتْكُمْ مِّنْ أَعْمَالِكُمْ
شَيْئًا ۚ إِنَّ اللّٰهَ غَفُورٌ رَّحِيمٌ ﴿١٤﴾
إِنَّمَا الْمُؤْمِنُونَ الَّذِينَ آمَنُوا بِاللّٰهِ وَرَسُولِهِ ثُمَّ
لَمْ يَرْتَابُوا وَجٰهَدُوا بِأَمْوَالِهِمْ وَأَنْفُسِهِمْ فِي
سَبِيلِ اللّٰهِ ۚ أُولٰئِكَ هُمُ الصّٰدِقُونَ ﴿١٥﴾
قُلْ أَتُعَلِّمُونَ اللّٰهَ بِدِينِكُمْ ۖ وَاللّٰهُ يَعْلَمُ مَا فِي
السَّمٰوٰتِ وَمَا فِي الْأَرْضِ ۚ وَاللّٰهُ بِكُلِّ شَيْءٍ
عَلِيمٌ ﴿١٦﴾
يَمُنُّونَ عَلَيْكَ أَنْ أَسْلَمُوا ۖ قُلْ لَّا تَمُنُّوا عَلَيَّ إِسْلَامَكُمْ ۖ
بَلِ اللّٰهُ يَمُنُّ عَلَيْكُمْ أَنْ هَدٰكُمْ لِلْإِيمَانِ إِنْ
كُنْتُمْ صٰدِقِينَ ﴿١٧﴾
إِنَّ اللّٰهَ يَعْلَمُ غَيْبَ السَّمٰوٰتِ وَالْأَرْضِ ۚ وَاللّٰهُ
ع ١٣ بَصِيرٌ بِمَا تَعْمَلُونَ ﴿١٨﴾

سُورَةُ قٓ مَكِّيَّةٌ (٥٠)

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Kâf. Per la glora Korano!

3. Jen! Ili miras, ĉar al ili venis admonanto el ilia mezo, kaj la miskredantoj diras: "Ĉi tio estas mirindaĵo!

4. Kiel? Post kiam ni mortis kaj fariĝis polvo, ĉu ni reviviĝos? Ĉi tiu reveno estas neebla".

5. Ni certe scias, kion la tero konsumas el ili, kaj ĉe Ni estas Libro, kiu ĉion enhavas.

6. Ne! Ili rifuzis la veron, kiam ĝi venis al ili, kaj ili nun troviĝas en konfuza stato.

7. Ĉu ili ne rigardis la ĉielon supre, kiel Ni konstruis kaj ornamis ĝin, kaj kiel ĝi ne havas makulon?

8. Kaj la teron – Ni plivastigis ĝin kaj Ni estigis sur ĝi firmajn montojn kaj Ni elirigis de ĝi ĉiuspecajn belajn parojn

9. kiel klarigilon kaj admonilon por ĉiu servanto, kiu konvertiĝas,

10. kaj Ni sendis el la nuboj akvon benatan, kaj per ĝi Ni estigis ĝardenojn kaj grenon por rikolti

11. kaj altajn palmojn, sur kiuj estas fruktospikoj unu super la alia,

12. provizaĵo por la servantoj, kaj Ni revivigis per ĝi senvivan teron. Tiel estos la reviviĝo.

---

* Mallongigo: Ĉiopova!

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ①

الجزء

قٓ ۚ وَالْقُرْآنِ الْمَجِيدِ ②

بَلْ عَجِبُوا أَنْ جَاءَهُمْ مُنْذِرٌ مِنْهُمْ فَقَالَ الْكَافِرُونَ

هَٰذَا شَيْءٌ عَجِيبٌ ③

أَإِذَا مِتْنَا وَكُنَّا تُرَابًا ۖ ذَٰلِكَ رَجْعٌ بَعِيدٌ ④

قَدْ عَلِمْنَا مَا تَنْقُصُ الْأَرْضُ مِنْهُمْ ۖ وَعِنْدَنَا

كِتَابٌ حَفِيظٌ ⑤

بَلْ كَذَّبُوا بِالْحَقِّ لَمَّا جَاءَهُمْ فَهُمْ فِي أَمْرٍ

مَرِيجٍ ⑥

أَفَلَمْ يَنْظُرُوا إِلَى السَّمَاءِ فَوْقَهُمْ كَيْفَ بَنَيْنَاهَا

وَزَيَّنَّاهَا وَمَا لَهَا مِنْ فُرُوجٍ ⑦

وَالْأَرْضَ مَدَدْنَاهَا وَأَلْقَيْنَا فِيهَا رَوَاسِيَ وَأَنْبَتْنَا

فِيهَا مِنْ كُلِّ زَوْجٍ بَهِيجٍ ⑧

تَبْصِرَةً وَذِكْرَىٰ لِكُلِّ عَبْدٍ مُنِيبٍ ⑨

وَنَزَّلْنَا مِنَ السَّمَاءِ مَاءً مُبَارَكًا فَأَنْبَتْنَا بِهِ جَنَّاتٍ

وَحَبَّ الْحَصِيدِ ⑩

وَالنَّخْلَ بَاسِقَاتٍ لَهَا طَلْعٌ نَضِيدٌ ⑪

رِزْقًا لِلْعِبَادِ ۖ وَأَحْيَيْنَا بِهِ بَلْدَةً مَيْتًا ۚ كَذَٰلِكَ

الْخُرُوجُ ⑫

كَذَّبَتْ قَبْلَهُمْ قَوْمُ نُوحٍ وَّاَصْحٰبُ الرَّسِّ وَثَمُوْدُ ﴿١٣﴾

13. Jam antaŭ ili rifuzis la popolo de Noa kaj la Popolo de la Puto kaj Tamûd,

وَعَادٌ وَّفِرْعَوْنُ وَاِخْوَانُ لُوْطٍ ﴿١٤﴾

14. kaj la Aadanoj kaj Faraono kaj la fratoj de Lot,

وَّاَصْحٰبُ الْاَيْكَةِ وَقَوْمُ تُبَّعٍ كُلٌّ كَذَّبَ الرُّسُلَ فَحَقَّ وَعِيْدِ ﴿١٥﴾

15. kaj la Popolo de l' Arbaro* kaj la popolo de Tubba.** Ĉiuj kulpigis pri mensogo la senditojn, tial Mia minaco realiĝis.

اَفَعَيِيْنَا بِالْخَلْقِ الْاَوَّلِ ۚ بَلْ هُمْ فِيْ لَبْسٍ مِّنْ خَلْقٍ جَدِيْدٍ ﴿١٦﴾ ع ١٥

16. Ĉu Ni laciĝis pro la unua kreo? Ne! Tamen ili estas en dubo pri la nova kreo.

وَلَقَدْ خَلَقْنَا الْاِنْسَانَ وَنَعْلَمُ مَا تُوَسْوِسُ بِهٖ نَفْسُهٗ ۚ وَنَحْنُ اَقْرَبُ اِلَيْهِ مِنْ حَبْلِ الْوَرِيْدِ ﴿١٧﴾

17. Vere, Ni kreis la homon kaj Ni scias, kion flustras al li lia animo, ĉar Ni estas pli proksima al li ol lia gorĝvejno.

اِذْ يَتَلَقَّى الْمُتَلَقِّيٰنِ عَنِ الْيَمِيْنِ وَعَنِ الشِّمَالِ قَعِيْدٌ ﴿١٨﴾

18. Kiam la du anĝeloj registrantaj registras, sidante je la dekstra kaj je la maldekstra flanko,

مَا يَلْفِظُ مِنْ قَوْلٍ اِلَّا لَدَيْهِ رَقِيْبٌ عَتِيْدٌ ﴿١٩﴾

19. kiam li elparolas vorton, ĉiam estas apud li gardanto, ĉiam preta por registri.

وَجَآءَتْ سَكْرَةُ الْمَوْتِ بِالْحَقِّ ۭ ذٰلِكَ مَا كُنْتَ مِنْهُ تَحِيْدُ ﴿٢٠﴾

20. Certe venos la angoro de la morto, vere: "Estas tio, de kio vi provis fuĝi",

وَنُفِخَ فِي الصُّوْرِ ۭ ذٰلِكَ يَوْمُ الْوَعِيْدِ ﴿٢١﴾

21. kaj estos blovite en la trumpeton: "Ĉi tiu estas la tago de la minaco".

وَجَآءَتْ كُلُّ نَفْسٍ مَّعَهَا سَآئِقٌ وَّشَهِيْدٌ ﴿٢٢﴾

22. Ĉiu animo venos, kun ĝi unu puŝanto kaj unu atestanto:

لَقَدْ كُنْتَ فِيْ غَفْلَةٍ مِّنْ هٰذَا فَكَشَفْنَا عَنْكَ غِطَآءَكَ فَبَصَرُكَ الْيَوْمَ حَدِيْدٌ ﴿٢٣﴾

23. "Vi vere kutimis ignori tion; Ni tamen forprenis de vi vian vualon kaj via rigardo hodiaŭ estas penetranta".

وَقَالَ قَرِيْنُهٗ هٰذَا مَا لَدَيَّ عَتِيْدٌ ﴿٢٤﴾

24. Lia kunulo diros: "Ĉi tio estas preta ĉe mi por esti atestita".

اَلْقِيَا فِيْ جَهَنَّمَ كُلَّ كَفَّارٍ عَنِيْدٍ ﴿٢٥﴾

25. "Ĵetu, vi ambaŭ, en la Inferon ĉiun ribeleman miskredanton,

مَّنَّاعٍ لِّلْخَيْرِ مُعْتَدٍ مُّرِيْبِ ﴿٢٦﴾

الَّذِيْ جَعَلَ مَعَ اللّٰهِ اِلٰهًا اٰخَرَ فَاَلْقِيٰهُ فِي الْعَذَابِ الشَّدِيْدِ ﴿٢٧﴾

---

* Inter Jemen kaj Palestino, apud Madjan

** Nomo de la reĝoj de Jemen

قَالَ قَرِيْنُهٗ رَبَّنَا مَآ اَطْغَيْتُهٗ وَلٰكِنْ كَانَ فِيْ
ضَلٰلٍۢ بَعِيْدٍ ﴿٢٧﴾

26. kiu malhelpas la bonon, ĉiun ekscesanton, dubanton,

قَالَ لَا تَخْتَصِمُوْا لَدَيَّ وَقَدْ قَدَّمْتُ اِلَيْكُمْ
بِالْوَعِيْدِ ﴿٢٨﴾

27. kiu metis apud Allah alian Dion. Ĵetu lin do, vi ambaŭ, en la severan punon! ".

مَا يُبَدَّلُ الْقَوْلُ لَدَيَّ وَمَآ اَنَا بِظَلَّامٍ لِّلْعَبِيْدِ ﴿٢٩﴾

28. Lia kunulo diros: "Nia Sinjoro, mi ne delogis lin al la ribelemo, li mem iris malproksimegen en la erarado! ".

يَوْمَ نَقُوْلُ لِجَهَنَّمَ هَلِ امْتَلَاْتِ وَتَقُوْلُ هَلْ
مِنْ مَّزِيْدٍ ﴿٣٠﴾

29. Li diros: "Ne disputu en Mia ĉeesto. Mi certe sendis antaŭ vi mian minacon.

وَاُزْلِفَتِ الْجَنَّةُ لِلْمُتَّقِيْنَ غَيْرَ بَعِيْدٍ ﴿٣١﴾

30. La vorto ne ŝanĝiĝas ĉe Mi kaj Mi neniel estas maljusta kontraŭ la servantoj".

هٰذَا مَا تُوْعَدُوْنَ لِكُلِّ اَوَّابٍ حَفِيْظٍ ﴿٣٢﴾

مَّنْ خَشِيَ الرَّحْمٰنَ بِالْغَيْبِ وَجَآءَ بِقَلْبٍ مُّنِيْبٍ ﴿٣٣﴾

اُدْخُلُوْهَا بِسَلٰمٍ ذٰلِكَ يَوْمُ الْخُلُوْدِ ﴿٣٤﴾

31. En tiu tago Ni diros al la Infero: "Ĉu vi estas plena? ", kaj ĝi respondos: "Ĉu estas ankoraŭ plie? "

32. kaj la Paradizo estos alproksimigita al la justuloj, ĝi ne plu estos malproksima.

لَهُمْ مَّا يَشَآءُوْنَ فِيْهَا وَلَدَيْنَا مَزِيْدٌ ﴿٣٥﴾

وَكَمْ اَهْلَكْنَا قَبْلَهُمْ مِّنْ قَرْنٍ هُمْ اَشَدُّ مِنْهُمْ
بَطْشًا فَنَقَّبُوْا فِي الْبِلَادِ هَلْ مِنْ مَّحِيْصٍ ﴿٣٦﴾

33. "Tio estas, kio estis promesita – por ĉiu, kiu ĉiam turnas sin al Li kaj atentas,

اِنَّ فِيْ ذٰلِكَ لَذِكْرٰى لِمَنْ كَانَ لَهٗ قَلْبٌ اَوْ اَلْقَى
السَّمْعَ وَهُوَ شَهِيْدٌ ﴿٣٧﴾

34. kiu respektegis la Doneman sekrete, kaj venis al Li kun pentema koro:

وَلَقَدْ خَلَقْنَا السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضَ وَمَا بَيْنَهُمَا فِيْ
سِتَّةِ اَيَّامٍ ۖ وَّمَا مَسَّنَا مِنْ لُّغُوْبٍ ﴿٣٨﴾

35. Eniru en ĝin en paco. Tiu ĉi estas la tago de la Eterneco".

فَاصْبِرْ عَلٰى مَا يَقُوْلُوْنَ وَسَبِّحْ بِحَمْدِ رَبِّكَ قَبْلَ
طُلُوْعِ الشَّمْسِ وَقَبْلَ الْغُرُوْبِ ﴿٣٩﴾

36. En ĝi ili posedas ĉion, kion ili volas, kaj ĉe Ni estas eĉ plie da tio.

وَمِنَ الَّيْلِ فَسَبِّحْهُ وَاَدْبَارَ السُّجُوْدِ ﴿٤٠﴾

37. Kiom multajn popolojn Ni neniigis antaŭ ili! Ili estis pli fortaj ol ĉi tiuj je povo. Ili serĉis ĉie ĉirkaŭe, ĉu estas rifuĝejo.

وَاسْتَمِعْ يَوْمَ يُنَادِ الْمُنَادِ مِنْ مَّكَانٍ قَرِيْبٍ ﴿٤١﴾

38. Vere en tio estas admono por tiu, kiu posedas koron kaj aŭskultas kaj atentas.

39. Vere, Ni kreis la ĉielojn kaj la teron, kaj tion, kio estas inter ili ambaŭ, en ses tagoj kaj Nin ne tuŝis laceco.

40. Tial toleru pacience, kion ili diras, kaj

laŭdegu la gloron de via Sinjoro antaŭ la sunleviĝo kaj antaŭ la sunsubiro.

41. Ankaŭ en parto de la nokto laŭdegu Lin kaj post la deviga preĝo.

42. Aŭskultu! La tago, en kiu la vokanto vokos el proksima loko,

43. la tago, kiam ili aŭdos la sonon de la trumpeto en la vero, tiu estos la tago de la releviĝo.

44. Vere Ni igas vivi kaj morti kaj al Ni estos la hejmiro.

45. En la tago, en kiu fendiĝos la tero por ilin rapide elĵeti – tiu estos kunveno facila por Ni.

46. Ni bone scias, kion ili parolas, kaj vi ne estis sendita al ili por perforte devigi, do admonu per la Korano tiun, kiu timas Mian minacon.

يَوْمَ يَسْمَعُونَ الصَّيْحَةَ بِالْحَقِّ ۚ ذَٰلِكَ يَوْمُ الْخُرُوجِ ﴿٤٢﴾

إِنَّا نَحْنُ نُحْيِي وَنُمِيتُ وَإِلَيْنَا الْمَصِيرُ ﴿٤٣﴾

يَوْمَ تَشَقَّقُ الْأَرْضُ عَنْهُمْ سِرَاعًا ۚ ذَٰلِكَ حَشْرٌ عَلَيْنَا يَسِيرٌ ﴿٤٤﴾

نَّحْنُ أَعْلَمُ بِمَا يَقُولُونَ وَمَا أَنتَ عَلَيْهِم بِجَبَّارٍ ۖ فَذَكِّرْ بِالْقُرْآنِ مَن يَخَافُ وَعِيدِ ﴿٤٥﴾ ع

سُوْرَةُ الذّٰرِيٰتِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

وَالذّٰرِيٰتِ ذَرْوًا ②

2. Per la ventoj, kiuj dissemas ĉien,

فَالْحٰمِلٰتِ وِقْرًا ③

3. kiuj portas ŝarĝon de pluvo

فَالْجٰرِيٰتِ يُسْرًا ④

4. kaj rapidas for

فَالْمُقَسِّمٰتِ اَمْرًا ⑤

5. kaj obeas la ordonon!

اِنَّمَا تُوْعَدُوْنَ لَصَادِقٌ ⑥

6. Vere tio, kio estis promesita, estas vera,

وَّاِنَّ الدِّيْنَ لَوَاقِعٌ ⑦

7. kaj la lasta Juĝo certe venos.

وَالسَّمَآءِ ذَاتِ الْحُبُكِ ⑧

8. Per la ĉielo plena de vojoj!

اِنَّكُمْ لَفِيْ قَوْلٍ مُّخْتَلِفٍ ⑨

9. Vere vi malkonsentas en viaj paroloj.

يُّؤْفَكُ عَنْهُ مَنْ اُفِكَ ⑩

10. Estos devojigita nur tiu, kiu estis devojigenda.

قُتِلَ الْخَرّٰصُوْنَ ⑪

11. Pereu la mensoguloj!

الَّذِيْنَ هُمْ فِيْ غَمْرَةٍ سَاهُوْنَ ⑫

12. Tiuj, kiuj ignoras la veron en profunda nescio.

يَسْـَٔلُوْنَ اَيَّانَ يَوْمُ الدِّيْنِ ⑬

13. Ili demandas: "Kiam estos la Tago de la lasta Juĝo? ".

يَوْمَ هُمْ عَلَى النَّارِ يُفْتَنُوْنَ ⑭

14. Estos la tago, en kiu ili estos turmentegataj per la fajro.

ذُوْقُوْا فِتْنَتَكُمْ هٰذَا الَّذِيْ كُنْتُمْ بِهٖ تَسْتَعْجِلُوْنَ ⑮

15. "Gustumu vian turmenton. Ĝi estas tio, kion vi volis akceli".

اِنَّ الْمُتَّقِيْنَ فِيْ جَنّٰتٍ وَّعُيُوْنٍ ⑯

16. Vere la justuloj estos en ĝardenoj kaj ĉe fontoj,

17. ricevante tion, kion donos al ili ilia Sinjoro, ĉar ili antaŭe estis bonfarantoj.

18. Ili dormis nur malgrandan parton de la nokto

19. kaj je la tagiĝo ili petis pardonon;

20. el iliaj proprajoj ĉiam estis parto destinita por la almozuloj kaj por la malhelpitoj.

21. Sur la tero estas signo por la firme kredantaj,

22. kaj ankaŭ en vi mem. Ĉu vi do ne volas vidi?

23. En la ĉielo estas via provizajo kaj tio, kio estas promesita.

24. Tial, per la Sinjoro de la ĉielo kaj de la tero, tio ĉi certe estas vera, tiel kiel estas vere, ke vi parolas.

25. Ĉu ne atingis vin la rakonto de la noblaj gastoj de Abraham?

26. Kiam ili eniris en lian domon kaj diris: "Pacon! ", li respondis: "Pacon! ". Ili estis fremduloj.

27. Li iris silente al sia familio kaj alportis grasan bovidon

28. kaj metis ĝin antaŭ ilin. Li diris: "Ĉu vi ne volas manĝi? ".

29. Li tiam ektimis ilin, kaj ili diris: "Ne timu", kaj donis al li la bonan novajon pri saĝa filo.

30. Tiam venis lia edzino embarasita, ŝi frapis sian vizaĝon kaj diris: "Mi estas nefekunda maljunulino! ".

قَالَتْ عَجُوزٌ عَقِيمٌ ﴿٢٩﴾

31. Ili diris: "Tiel estas, sed via Sinjoro parolis, vere Li estas la Saĝa, la Ĉioscia".

قَالُوا كَذٰلِكِ ۙ قَالَ رَبُّكِ ۖ إِنَّهُ هُوَ الْحَكِيمُ الْعَلِيمُ ﴿٣٠﴾

* Fino de la 26-a parto

32. Li demandis: "Kia do estas via komisio, ho senditoj? ".

قَالَ فَمَا خَطْبُكُمْ أَيُّهَا الْمُرْسَلُونَ ﴿٣١﴾

33. Ili respondis: "Ni vere estas senditaj al popolo pekema,

قَالُوا إِنَّا أُرْسِلْنَا إِلَىٰ قَوْمٍ مُجْرِمِينَ ﴿٣٢﴾

34. por faligi sur ilin ŝtonojn el argilo

لِنُرْسِلَ عَلَيْهِمْ حِجَارَةً مِنْ طِينٍ ﴿٣٣﴾

35. distingitajn per signo de via Sinjoro por la ekscesantoj".

مُسَوَّمَةً عِنْدَ رَبِّكَ لِلْمُسْرِفِينَ ﴿٣٤﴾

36. Ni elirigis ĉiujn kredantojn, kiuj estis tie,

فَأَخْرَجْنَا مَنْ كَانَ فِيهَا مِنَ الْمُؤْمِنِينَ ﴿٣٥﴾

37. kaj Ni trovis tie nur unu domon de submetiĝintoj,

فَمَا وَجَدْنَا فِيهَا غَيْرَ بَيْتٍ مِنَ الْمُسْلِمِينَ ﴿٣٦﴾

38. kaj Ni postlasis en ĝi signon por tiuj, kiuj timas la doloran punon;

وَتَرَكْنَا فِيهَا آيَةً لِلَّذِينَ يَخَافُونَ الْعَذَابَ الْأَلِيمَ ﴿٣٧﴾

39. kaj ankaŭ en Moseo estis signo, ĉar Ni sendis lin al Faraono kun aŭtoritato evidenta.

وَفِي مُوسَىٰ إِذْ أَرْسَلْنَاهُ إِلَىٰ فِرْعَوْنَ بِسُلْطَانٍ مُبِينٍ ﴿٣٨﴾

40. Tiu tamen turnis sin for pro sia povo kaj diris: "Sorĉisto aŭ frenezulo".

فَتَوَلَّىٰ بِرُكْنِهِ وَقَالَ سَاحِرٌ أَوْ مَجْنُونٌ ﴿٣٩﴾

41. Ni ekkaptis lin kaj liajn trupojn kaj ĵetis lin en la maron, ĉar li estis mallaŭdinda.

فَأَخَذْنَاهُ وَجُنُودَهُ فَنَبَذْنَاهُمْ فِي الْيَمِّ وَهُوَ مُلِيمٌ ﴿٤٠﴾

42. Signo estis ankaŭ en la Aadanoj, kiam Ni sendis kontraŭ ilin detruan venton.

وَفِي عَادٍ إِذْ أَرْسَلْنَا عَلَيْهِمُ الرِّيحَ الْعَقِيمَ ﴿٤١﴾

43. Ĉion, kion ĝi trafis, ĝi postlasis nur, kiam ĝi faris ĝin kvazaŭ cindro.

مَا تَذَرُ مِنْ شَيْءٍ أَتَتْ عَلَيْهِ إِلَّا جَعَلَتْهُ كَالرَّمِيمِ ﴿٤٢﴾

44. Ankaŭ en la Tamudoj estis signo, kiam estis dirite al ili: "Ĝuu la vivon por iom da tempo".

وَفِي ثَمُودَ إِذْ قِيلَ لَهُمْ تَمَتَّعُوا حَتَّىٰ حِينٍ ﴿٤٣﴾

45. Ili tamen malŝatis la ordonon de sia Sinjoro, tial trafis ilin la fulmotondro, ĝuste kiam ili rigardis.

فَعَتَوْا عَنْ أَمْرِ رَبِّهِمْ فَأَخَذَتْهُمُ الصَّاعِقَةُ وَهُمْ يَنْظُرُونَ ﴿٤٤﴾

فَمَا اسْتَطَاعُوا مِنْ قِيَامٍ وَمَا كَانُوا مُنْتَصِرِينَ ﴿٤٥﴾

وَقَوْمَ نُوحٍ مِنْ قَبْلُ ۖ إِنَّهُمْ كَانُوا قَوْمًا فَاسِقِينَ ﴿٤٦﴾

وَالسَّمَآءَ بَنَيْنٰهَا بِاَيْىدٍ وَّاِنَّا لَمُوْسِعُوْنَ ﴿٤٧﴾

46. Ili tiam ne kapablis stariĝi denove kaj por ili ne estis helpantoj.

وَالْاَرْضَ فَرَشْنٰهَا فَنِعْمَ الْمٰهِدُوْنَ ﴿٤٨﴾

47. Antaŭe Ni neniigis la popolon de Noa. Ili vere estis popolo malpiega.

وَمِنْ كُلِّ شَىْءٍ خَلَقْنَا زَوْجَيْنِ لَعَلَّكُمْ تَذَكَّرُوْنَ ﴿٤٩﴾

48. Ni konstruis la ĉielon per Niaj manoj kaj Ni vere posedas vastan forton;

فَفِرُّوْٓا اِلَى اللّٰهِ اِنِّىْ لَكُمْ مِّنْهُ نَذِيْرٌ مُّبِيْنٌ ﴿٥٠﴾

49. kaj la teron Ni etendis; kiel bele Ni etendis ĝin!

وَلَا تَجْعَلُوْا مَعَ اللّٰهِ اِلٰهًا اٰخَرَ اِنِّىْ لَكُمْ مِّنْهُ نَذِيْرٌ مُّبِيْنٌ ﴿٥١﴾

50. De ĉiu aĵo Ni kreis parojn, por ke vi pripensu;

كَذٰلِكَ مَآ اَتَى الَّذِيْنَ مِنْ قَبْلِهِمْ مِّنْ رَّسُوْلٍ اِلَّا قَالُوْا سَاحِرٌ اَوْ مَجْنُوْنٌ ﴿٥٢﴾

51. serĉu do rifuĝon ĉe Allah; mi estas por vi klariga admonanto de Li.

اَتَوَاصَوْا بِهٖ بَلْ هُمْ قَوْمٌ طَاغُوْنَ ﴿٥٣﴾

52. Ne aldonu alian Dion al Allah; mi estas por vi klariga admonanto de Li.

فَتَوَلَّ عَنْهُمْ فَمَآ اَنْتَ بِمَلُوْمٍ ﴿٥٤﴾

53. Tiel ankaŭ antaŭe diris tiuj, al kiuj venis iu sendito: "Sorĉisto aŭ frenezulo".

وَّذَكِّرْ فَاِنَّ الذِّكْرٰى تَنْفَعُ الْمُؤْمِنِيْنَ ﴿٥٥﴾

54. Ĉu ili eble heredigis tion unu al la alia? Ne! Ili ĉiuj estas kontraŭstarema popolo.

وَمَا خَلَقْتُ الْجِنَّ وَالْاِنْسَ اِلَّا لِيَعْبُدُوْنِ ﴿٥٦﴾

55. Turnu vin do for de ili (Profeto!): pro tio vin ne trafos riproĉo.

مَآ اُرِيْدُ مِنْهُمْ مِّنْ رِّزْقٍ وَّمَآ اُرِيْدُ اَنْ يُّطْعِمُوْنِ ﴿٥٧﴾

56. Kaj daŭrigu vian admonadon, ĉar certe la admonado utilas al la kredantoj.

اِنَّ اللّٰهَ هُوَ الرَّزَّاقُ ذُو الْقُوَّةِ الْمَتِيْنُ ﴿٥٨﴾

57. Ni kreis la Ĝinnojn kaj la homojn, nur por ke ili adoru Min.

فَاِنَّ لِلَّذِيْنَ ظَلَمُوْا ذَنُوْبًا مِّثْلَ ذَنُوْبِ اَصْحٰبِهِمْ فَلَا يَسْتَعْجِلُوْنِ ﴿٥٩﴾

58. Mi ne volas de ili provizaĵon kaj Mi ne volas de ili nutraĵon.

فَوَيْلٌ لِّلَّذِيْنَ كَفَرُوْا مِنْ يَّوْمِهِمُ الَّذِىْ يُوْعَدُوْنَ ﴿٦٠﴾

59. Vere Allah estas la Provizanto, la Posedanto de la povo, la Fortega.

60. Vere por la malpieguloj estos sorto simila al tiu de iliaj kunuloj, do ili ne petu, ke ĝi estu akcelata.

61. Ve al la miskredantoj pro ilia tago, pri kiu estis minacite al ili!

سُوْرَةُ الطُّوْرِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

وَالطُّوْرِ ②

2. Per la monto!

وَكِتٰبٍ مَّسْطُوْرٍ ③

3. Per Libro skribita

فِيْ رَقٍّ مَّنْشُوْرٍ ④

4. sur elvolvita pergameno!

وَالْبَيْتِ الْمَعْمُوْرِ ⑤

5. Per la Domo ofte vizitata

وَالسَّقْفِ الْمَرْفُوْعِ ⑥

6. kaj per ĝia alta tegmento!

وَالْبَحْرِ الْمَسْجُوْرِ ⑦

7. Per la ŝvelinta maro!

إِنَّ عَذَابَ رَبِّكَ لَوَاقِعٌ ⑧

8. Certe la puno de via Sinjoro alvenos,

مَّا لَهُ مِنْ دَافِعٍ ⑨

9. ne ekzistas iu ajn, kiu povus malhelpi ĝin!

يَوْمَ تَمُوْرُ السَّمَآءُ مَوْرًا ⑩

10. En la tago, en kiu la ĉielo treege skuiĝos

وَّتَسِيْرُ الْجِبَالُ سَيْرًا ⑪

11. kaj la montoj moviĝos rapide,

فَوَيْلٌ يَّوْمَئِذٍ لِّلْمُكَذِّبِيْنَ ⑫

12. ve en tiu tago al tiuj, kiuj rifuzis la veron

الَّذِيْنَ هُمْ فِيْ خَوْضٍ يَّلْعَبُوْنَ ⑬

13. kaj amuziĝis per vanaj paroladoj!

يَوْمَ يُدَعُّوْنَ إِلٰى نَارِ جَهَنَّمَ دَعًّا ⑭

14. En la tago, en kiu ili estos puŝitaj perforte en la fajron de l' Infero:

هٰذِهِ النَّارُ الَّتِيْ كُنْتُمْ بِهَا تُكَذِّبُوْنَ ⑮

15. "Ĉi tiu estas la fajro, kiun vi kutimis negi.

أَفَسِحْرٌ هٰذَآ أَمْ أَنْتُمْ لَا تُبْصِرُوْنَ ⑯

16. Ĉu ĉi tio estas magio aŭ ĉu vi vere ne vidas?

اِصْلَوْهَا فَاصْبِرُوْٓا أَوْ لَا تَصْبِرُوْا سَوَآءٌ عَلَيْكُمْ

إِنَّمَا تُجْزَوْنَ مَا كُنْتُمْ تَعْمَلُوْنَ ⑰

17. Brulu en ĝi: ĉu vi nun estos paciencaj, ĉu malpaciencaj, estas egale, vi estos rekompencitaj nur pro tio, kion vi faris".

إِنَّ الْمُتَّقِيْنَ فِيْ جَنّٰتٍ وَّنَعِيْمٍ ⑱

18. Vere la justuloj estos en la Paradizo kaj en feliĉo,

19. ĝuante tion, kion ilia Sinjoro donis al ili, kaj ilia Sinjoro savos ilin de la puno de l' fajro.

فَٰكِهِينَ بِمَآ ءَاتَىٰهُمْ رَبُّهُمْ ۖ وَوَقَىٰهُمْ رَبُّهُمْ عَذَابَ ٱلْجَحِيمِ ﴿١٩﴾

20. "Manĝu kaj trinku kun plezuro pro tio, kion vi faris".

كُلُوا۟ وَٱشْرَبُوا۟ هَنِيٓـًٔۢا بِمَا كُنتُمْ تَعْمَلُونَ ﴿٢٠﴾

21. Ili kuŝos sur ordigitaj kusenoj kaj Ni edzigos ilin al grandokulaj fraŭlinoj.

مُتَّكِـِٔينَ عَلَىٰ سُرُرٍ مَّصْفُوفَةٍ ۖ وَزَوَّجْنَٰهُم بِحُورٍ عِينٍ ﴿٢١﴾

22. La kredantojn, kiujn iliaj idoj sekvos je la kredo, Ni unuigos kun iliaj idoj, kaj Ni neniel malpliigos iliajn farojn. Ĉiu homo estos garantiaĵo por tio, kion li meritis.

وَٱلَّذِينَ ءَامَنُوا۟ وَٱتَّبَعَتْهُمْ ذُرِّيَّتُهُم بِإِيمَٰنٍ أَلْحَقْنَا بِهِمْ ذُرِّيَّتَهُمْ وَمَآ أَلَتْنَٰهُم مِّنْ عَمَلِهِم مِّن شَىْءٍ ۚ كُلُّ ٱمْرِئٍۭ بِمَا كَسَبَ رَهِينٌ ﴿٢١﴾

23. Ni krome provizos ilin per ĉiuj fruktoj kaj viando, kiujn ili deziras.

وَأَمْدَدْنَٰهُم بِفَٰكِهَةٍ وَلَحْمٍ مِّمَّا يَشْتَهُونَ ﴿٢٢﴾

24. Tie ili transdonos unu al la alia kalikon, en kiu estas nek vanteco nek peko.

يَتَنَٰزَعُونَ فِيهَا كَأْسًا لَّا لَغْوٌ فِيهَا وَلَا تَأْثِيمٌ ﴿٢٣﴾

25. Inter ili ĉirkaŭiros junuloj zorgantaj pri ili, kiel bone gardataj perloj.

وَيَطُوفُ عَلَيْهِمْ غِلْمَٰنٌ لَّهُمْ كَأَنَّهُمْ لُؤْلُؤٌ مَّكْنُونٌ ﴿٢٤﴾

26. Ili turnos sin unu al la alia, demandante reciproke;

وَأَقْبَلَ بَعْضُهُمْ عَلَىٰ بَعْضٍ يَتَسَآءَلُونَ ﴿٢٥﴾

27. ili diros: "Antaŭe ni vere estis en zorgo pri niaj familioj,

قَالُوٓا۟ إِنَّا كُنَّا قَبْلُ فِىٓ أَهْلِنَا مُشْفِقِينَ ﴿٢٦﴾

28. Allah tamen kompatis al ni kaj savis nin de la turmento de la varmega vento.*

فَمَنَّ ٱللَّهُ عَلَيْنَا وَوَقَىٰنَا عَذَابَ ٱلسَّمُومِ ﴿٢٧﴾

29. Ni vere kutimis antaŭe preĝi al Li. Li vere estas la Bonega, la Pardonema".

إِنَّا كُنَّا مِن قَبْلُ نَدْعُوهُ ۖ إِنَّهُۥ هُوَ ٱلْبَرُّ ٱلرَّحِيمُ ﴿٢٨﴾ ع

30. Do admonu: vi vere per la graco de via Sinjoro estas nek divenisto nek frenezulo.

فَذَكِّرْ فَمَآ أَنتَ بِنِعْمَتِ رَبِّكَ بِكَاهِنٍ وَلَا مَجْنُونٍ ﴿٢٩﴾

31. Ĉu ili diras: "Li estas poeto, ni volas atendi, ke lin trafu iu malfeliĉo"?

أَمْ يَقُولُونَ شَاعِرٌ نَّتَرَبَّصُ بِهِۦ رَيْبَ ٱلْمَنُونِ ﴿٣٠﴾

32. Diru: "Atendu do! Mi estas kun vi unu el la atendantoj".

قُلْ تَرَبَّصُوا۟ فَإِنِّى مَعَكُم مِّنَ ٱلْمُتَرَبِّصِينَ ﴿٣١﴾

أَمْ تَأْمُرُهُمْ أَحْلَٰمُهُم بِهَٰذَآ ۚ أَمْ هُمْ قَوْمٌ طَاغُونَ ﴿٣٢﴾

أَمْ يَقُولُونَ تَقَوَّلَهُۥ ۚ بَل لَّا يُؤْمِنُونَ ﴿٣٣﴾

---

* Arabe: Samūm

فَلْيَأْتُوا بِحَدِيثٍ مِّثْلِهِۦٓ إِن كَانُوا صَٰدِقِينَ ﴿٣٤﴾

33. Ĉu tion ordonas al ili ilia prudento, aŭ ĉu ili estas ribelema popolo?

أَمْ خُلِقُوا مِنْ غَيْرِ شَىْءٍ أَمْ هُمُ ٱلْخَٰلِقُونَ ﴿٣٥﴾

34. Ĉu ili diras: "Li elpensis tion"? Ne! Ili ne volas kredi.

أَمْ خَلَقُوا ٱلسَّمَٰوَٰتِ وَٱلْأَرْضَ ۚ بَل لَّا يُوقِنُونَ ﴿٣٦﴾

35. Ili do alportu rakonton similan al tiu ĉi, se ili estas sinceraj!

أَمْ عِندَهُمْ خَزَآئِنُ رَبِّكَ أَمْ هُمُ ٱلْمُصَيْطِرُونَ ﴿٣٧﴾

36. Ĉu ili estis kreitaj el nenio, aŭ ĉu ili mem estas la kreintoj?

أَمْ لَهُمْ سُلَّمٌ يَسْتَمِعُونَ فِيهِ ۖ فَلْيَأْتِ مُسْتَمِعُهُم بِسُلْطَٰنٍ مُّبِينٍ ﴿٣٨﴾

37. Ĉu ili kreis la ĉielojn kaj la teron? Ne! Ili nenion firme kredas.

أَمْ لَهُ ٱلْبَنَٰتُ وَلَكُمُ ٱلْبَنُونَ ﴿٣٩﴾

38. Ĉu estas apud ili la trezoroj de via Sinjoro, aŭ ĉu ili mem estas la gardantoj?

أَمْ تَسْـَٔلُهُمْ أَجْرًا فَهُم مِّن مَّغْرَمٍ مُّثْقَلُونَ ﴿٤٠﴾

39. Ĉu ili posedas ŝtupetaron, sur kiu ili povas aŭskulti? Tiukaze do alportu al ili la aŭskultanto pruvon evidentan!

أَمْ عِندَهُمُ ٱلْغَيْبُ فَهُمْ يَكْتُبُونَ ﴿٤١﴾

40. Ĉu Li havas filinojn kaj vi havas filojn?

أَمْ يُرِيدُونَ كَيْدًا ۖ فَٱلَّذِينَ كَفَرُوا۟ هُمُ ٱلْمَكِيدُونَ ﴿٤٢﴾

41. Ĉu vi volas rekompencon de ili, tiel ke ili nun estas ŝarĝitaj per ŝarĝo de ŝuldoj?

أَمْ لَهُمْ إِلَٰهٌ غَيْرُ ٱللَّهِ ۚ سُبْحَٰنَ ٱللَّهِ عَمَّا يُشْرِكُونَ ﴿٤٣﴾

42. Ĉu ili posedas la Nevideblaĵon, tiel ke ili povas skribi ĝin?

وَإِن يَرَوْا۟ كِسْفًا مِّنَ ٱلسَّمَآءِ سَاقِطًا يَقُولُوا۟ سَحَابٌ مَّرْكُومٌ ﴿٤٤﴾

43. Ĉu ili intencas militruzon? Tamen la miskredantoj estas tiuj, kontraŭ kiuj estos la militruzo.

فَذَرْهُمْ حَتَّىٰ يُلَٰقُوا۟ يَوْمَهُمُ ٱلَّذِى فِيهِ يُصْعَقُونَ ﴿٤٥﴾

44. Ĉu ili havas alian Dion ol Allahon? Sankta estas Allah! For de Li tion, kion ili aldonas al Li kiel rivalon!

يَوْمَ لَا يُغْنِى عَنْهُمْ كَيْدُهُمْ شَيْـًٔا وَلَا هُمْ يُنصَرُونَ ﴿٤٦﴾

45. Se ili vidus pecon de ĉielo fali, ili dirus: "Tio ĉi estas nur amasigitaj nuboj".

46. Lasu ilin do, ĝis ili renkontos sian tagon, tiun, en kiu ili svenos,

47. la tagon, en kiu neniom utilos al ili iliaj ruzoj kaj por ili ne estos helpo.

48. Vere por la malpieguloj estos ankaŭ alia

puno krom tiu ĉi, sed la plej multaj el ili ne scias tion.

وَاِنَّ لِلَّذِيْنَ ظَلَمُوْا عَذَابًا دُوْنَ ذٰلِكَ وَلٰكِنَّ اَكْثَرَهُمْ لَا يَعْلَمُوْنَ ﴿٤٨﴾

49. Vi tamen atendu pacience la juĝon de via Sinjoro, ĉar vi estas antaŭ Niaj okuloj; kaj laŭdegu la gloron de via Sinjoro, kiam vi ekstaras.

وَاصْبِرْ لِحُكْمِ رَبِّكَ فَاِنَّكَ بِاَعْيُنِنَا وَسَبِّحْ بِحَمْدِ رَبِّكَ حِيْنَ تَقُوْمُ ﴿٤٩﴾

50. Ankaŭ en parto de la nokto laŭdegu Lin, kaj kiam la steloj paliĝas.

وَمِنَ الَّيْلِ فَسَبِّحْهُ وَاِدْبَارَ النُّجُوْمِ ﴿٥٠﴾ ع ٢ ٢١ ٤

Ĉapitro 53 **An-Naĝm** (La stelo) 27-a parto

سُوْرَةُ النَّجْمِ مَكِّيَّةٌ (٥٣) آياتها ٦٣ ركوعاتها

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ﴿١﴾

2. Per la stelo, kiam ĝi subiras!

وَالنَّجْمِ اِذَا هَوٰى ﴿٢﴾

3. Via samtribano nek eraras nek estas trompita

مَا ضَلَّ صَاحِبُكُمْ وَمَا غَوٰى ﴿٣﴾

4. nek parolas propravole.

وَمَا يَنْطِقُ عَنِ الْهَوٰى ﴿٤﴾

5. Ĝi estas nur revelacio, kiu estis revelaciita;

اِنْ هُوَ اِلَّا وَحْيٌ يُّوْحٰى ﴿٥﴾

6. lin instruis Tiu, kiu havas grandan povon,

عَلَّمَهٗ شَدِيْدُ الْقُوٰى ﴿٦﴾

7. kiu posedas la povon. Li nun sidas sur la Trono,

ذُوْ مِرَّةٍ فَاسْتَوٰى ﴿٧﴾

8. Li estas en la plej alta horizonto.

وَهُوَ بِالْاُفُقِ الْاَعْلٰى ﴿٨﴾

9. Poste li alproksimiĝis al Dio kaj Tiu ĉi malsupreniris al li,

ثُمَّ دَنَا فَتَدَلّٰى ﴿٩﴾

10. tiel ke li* fariĝis kvazaŭ ŝnuro de du arkoj aŭ eĉ pli proksima,

فَكَانَ قَابَ قَوْسَيْنِ اَوْ اَدْنٰى ﴿١٠﴾

فَاَوْحٰٓى اِلٰى عَبْدِهٖ مَآ اَوْحٰى ﴿١١﴾

* La Profeto. Tiu ĉi netradukebla frazo signifas intiman proksimecon de Allah kaj la Profeto. Verŝajne oni aludas al antikva kutimo de la Araboj por konkludi amikecon, per pafo de unu sago pere de du arkoj, kiujn oni tenis en unu mano.

مَا كَذَبَ الْفُؤَادُ مَا رَأٰى ﴿١١﴾

11. kaj Li revelaciis al Sia servanto, kion Li revelaciis.

أَفَتُمٰرُونَهُۥ عَلٰى مَا يَرٰى ﴿١٢﴾

12. La koro de la Profeto ne estas malfidela al tio, kion li vidis.

وَلَقَدْ رَءَاهُ نَزْلَةً أُخْرٰى ﴿١٣﴾

13. Ĉu vi do volas disputi pri tio, kion li vidis?

عِندَ سِدْرَةِ الْمُنتَهٰى ﴿١٤﴾

14. Li vere vidis ĝin malsupreniri ankaŭ alifoje,

عِندَهَا جَنَّةُ الْمَأْوٰى ﴿١٥﴾

15. apud la plej malproksima lotusarbo,

إِذْ يَغْشَى السِّدْرَةَ مَا يَغْشٰى ﴿١٦﴾

16. apud la ĝardeno de la ĉiama loĝejo;

مَا زَاغَ الْبَصَرُ وَمَا طَغٰى ﴿١٧﴾

17. kiam kovris la lotusarbon, kio ĝin kovris,

لَقَدْ رَأٰى مِنْ ءَايٰتِ رَبِّهِ الْكُبْرٰى ﴿١٨﴾

18. la rigardo nek hezitis nek deturniĝis.

أَفَرَءَيْتُمُ اللّٰتَ وَالْعُزّٰى ﴿١٩﴾

19. Vere li vidis la plej grandan signon de sia Sinjoro.

وَمَنٰوةَ الثَّالِثَةَ الْأُخْرٰى ﴿٢٠﴾

20. Vi male: ĉu vi vidis Laton kaj Uzzaon

أَلَكُمُ الذَّكَرُ وَلَهُ الْأُنثٰى ﴿٢١﴾

21. kaj Manaton,* la trian, la alian idolon?

تِلْكَ إِذًا قِسْمَةٌ ضِيزٰى ﴿٢٢﴾

22. Kiel? Ĉu vi havas la knabojn kaj Li la knabinojn?

إِنْ هِىَ إِلَّآ أَسْمَآءٌ سَمَّيْتُمُوهَآ أَنتُمْ وَءَابَآؤُكُم مَّآ أَنزَلَ اللّٰهُ بِهَا مِن سُلْطٰنٍ إِن يَتَّبِعُونَ إِلَّا الظَّنَّ وَمَا تَهْوَى الْأَنفُسُ وَلَقَدْ جَآءَهُم مِّن رَّبِّهِمُ الْهُدٰى ﴿٢٣﴾

23. Tiu vere estus maljusta divido.

24. Ili estas nur nomoj, kiujn vi elpensis – vi kaj viaj patroj –, por kiuj Allah ne sendis iun ajn aŭtoritaton. Ili sekvas nur sian supozon kaj sian deziron, kvankam jam venis al ili la gvidilo de ilia Sinjoro.

أَمْ لِلْإِنسَانِ مَا تَمَنّٰى ﴿٢٤﴾

25. Ĉu la homo povas havigi al si tion, kion li volas?

فَلِلّٰهِ الْءَاخِرَةُ وَالْأُولٰى ﴿٢٥﴾

26. Al Allah apartenas la venonta kaj la ĉi tiea vivo.

27. Ekzistas en la ĉieloj iu anĝelo, kies propeto neniom utilos, krom post kiam Allah

* Diinoj de la antaŭislama epoko

donis la permeson, por kiu Li volas kaj por kiu al Li plaĉas.

28. Vere tiuj, kiuj ne kredas al la vivo venonta, nomas la anĝelojn per virinaj nomoj,

29. sed ili ne havas iun ajn scion pri tio, ili sekvas nur sian supozon, sed ilia supozo neniom utilos al ili kontraŭ la vero.

30. Tial turnu vin for de tiu, kiu turnas sian dorson al Nia admono, kaj strebas nur al la vivo de ĉi tiu mondo.

31. Tio estas la maksimumo de ilia scio. Vere via Sinjoro estas Tiu, kiu bone konas tiun, kiu devojiĝas de Lia afero, kaj Li konas tiun, kiu estas sur la rekta vojo.

32. Al Allah apartenas, kio estas en la ĉieloj, kaj kio estas sur la tero, por ke Li repagu tiujn, kiuj malbonfaras, pro tio, kion ili faris, kaj rekompencu tiujn, kiuj bonfaras, per la plej bela rekompenco.

33. Tiuj, kiuj evitas la plej abomenindajn pekojn kaj hontindaĵojn kaj faras nur malgravajn pekojn, sciu: vere la pardonemo de via Sinjoro estas vasta. Li bone konas vin ekde la tempo, kiam Li elirigis vin de la tero, kaj ekde kiam vi estis ĝermoj en la uteroj de viaj patrinoj. Tial ne proklamu vin mem puraj. Li bone scias, kiu evitas la malbonon.

34. Ĉu vi vidas tiun, kiu turnas sin for

35. kaj donas malmulton kaj estas avara?

36. Ĉu li havas scion pri la Nevideblaĵo, tiel ke li povas vidi ĝin?

37. Ĉu male ne estis dirite al li tio, kio troviĝas en la leĝaro de Moseo

38. kaj de Abraham, kiu plenumis sian devon?

وَكَمْ مِّنْ مَّلَكٍ فِي السَّمٰوٰتِ لَا تُغْنِيْ شَفَاعَتُهُمْ
شَيْـًٔا اِلَّا مِنْۢ بَعْدِ اَنْ يَّاْذَنَ اللّٰهُ لِمَنْ يَّشَآءُ وَ
يَرْضٰى ﴿٢٦﴾
اِنَّ الَّذِيْنَ لَا يُؤْمِنُوْنَ بِالْاٰخِرَةِ لَيُسَمُّوْنَ الْمَلٰٓئِكَةَ
تَسْمِيَةَ الْاُنْثٰى ﴿٢٧﴾
وَمَا لَهُمْ بِهٖ مِنْ عِلْمٍ اِنْ يَّتَّبِعُوْنَ اِلَّا الظَّنَّ ۚ وَ
اِنَّ الظَّنَّ لَا يُغْنِيْ مِنَ الْحَقِّ شَيْـًٔا ﴿٢٨﴾
فَاَعْرِضْ عَنْ مَّنْ تَوَلّٰى ۙ عَنْ ذِكْرِنَا وَلَمْ يُرِدْ اِلَّا
الْحَيٰوةَ الدُّنْيَا ﴿٢٩﴾
ذٰلِكَ مَبْلَغُهُمْ مِّنَ الْعِلْمِ ۭ اِنَّ رَبَّكَ هُوَ اَعْلَمُ
بِمَنْ ضَلَّ عَنْ سَبِيْلِهٖ ۚ وَهُوَ اَعْلَمُ بِمَنِ اهْتَدٰى ﴿٣٠﴾
وَلِلّٰهِ مَا فِي السَّمٰوٰتِ وَمَا فِي الْاَرْضِ ۭ لِيَجْزِيَ
الَّذِيْنَ اَسَاۗءُوْا بِمَا عَمِلُوْا وَيَجْزِيَ الَّذِيْنَ اَحْسَنُوْا
بِالْحُسْنٰى ﴿٣١﴾
الَّذِيْنَ يَجْتَنِبُوْنَ كَبٰۗىِٕرَ الْاِثْمِ وَالْفَوَاحِشَ اِلَّا
اللَّمَمَ ۭ اِنَّ رَبَّكَ وَاسِعُ الْمَغْفِرَةِ ۭ هُوَ اَعْلَمُ بِكُمْ
اِذْ اَنْشَاَكُمْ مِّنَ الْاَرْضِ وَاِذْ اَنْتُمْ اَجِنَّةٌ فِيْ
بُطُوْنِ اُمَّهٰتِكُمْ ۚ فَلَا تُزَكُّوْٓا اَنْفُسَكُمْ ۭ هُوَ اَعْلَمُ
بِمَنِ اتَّقٰى ﴿٣٢﴾ ع
اَفَرَءَيْتَ الَّذِيْ تَوَلّٰى ﴿٣٣﴾
وَاَعْطٰى قَلِيْلًا وَّاَكْدٰى ﴿٣٤﴾
اَعِنْدَهٗ عِلْمُ الْغَيْبِ فَهُوَ يَرٰى ﴿٣٥﴾

39. Ke neniu animo jam ŝarĝita povas porti la ŝarĝon de la alia,

40. kaj ke al la homo nenio alia utilos ol lia propra strebado,

41. kaj ke lia strebado baldaŭ estos vidita,

42. – poste li estos rekompencita per abunda rekompenco –

43. kaj ke al via Sinjoro estos la fina reveno,

44. kaj ke estas Li Tiu, kiu igas ridi kaj plori,

45. kaj ke estas Li Tiu, kiu igas morti kaj vivi,

46. kaj ke Li kreis ambaŭ seksojn, viran kaj virinan

47. el spermoguto kiu estis elverŝita,

48. kaj ke al Li apartenas la alia kreo,

49. kaj ke estas Li Tiu, kiu faras riĉa kaj malriĉa,

50. kaj ke estas Li la Sinjoro de la stelo Sirio,

51. kaj ke Li neniigis la antaŭajn Aadanojn

52. kaj Tamudon, kaj al neniu indulgis,

53. kaj antaŭe la popolon de Noa – vere ili estis malpieguloj kaj ribelantoj.

54. Li detruis la pekemajn urbojn,

55. tiel ke ilin kovris tio, kio ilin kovris.

56. Pri kiu el la bonfaroj de via Sinjoro vi do volas dubi?

57. Ĉi tiu estas admonanto de la sama speco kiel la antaŭaj admonantoj.

58. Alproksimiĝas la Horo alproksimiĝanta,

أَمْ لَمْ يُنَبَّأْ بِمَا فِي صُحُفِ مُوسَىٰ ﴿٣٦﴾

وَإِبْرَاهِيمَ الَّذِي وَفَّىٰ ﴿٣٧﴾

أَلَّا تَزِرُ وَازِرَةٌ وِزْرَ أُخْرَىٰ ﴿٣٨﴾

وَأَن لَّيْسَ لِلْإِنسَانِ إِلَّا مَا سَعَىٰ ﴿٣٩﴾

وَأَنَّ سَعْيَهُ سَوْفَ يُرَىٰ ﴿٤٠﴾

ثُمَّ يُجْزَاهُ الْجَزَاءَ الْأَوْفَىٰ ﴿٤١﴾

وَأَنَّ إِلَىٰ رَبِّكَ الْمُنتَهَىٰ ﴿٤٢﴾

وَأَنَّهُ هُوَ أَضْحَكَ وَأَبْكَىٰ ﴿٤٣﴾

وَأَنَّهُ هُوَ أَمَاتَ وَأَحْيَا ﴿٤٤﴾

وَأَنَّهُ خَلَقَ الزَّوْجَيْنِ الذَّكَرَ وَالْأُنثَىٰ ﴿٤٥﴾

مِن نُّطْفَةٍ إِذَا تُمْنَىٰ ﴿٤٦﴾

وَأَنَّ عَلَيْهِ النَّشْأَةَ الْأُخْرَىٰ ﴿٤٧﴾

وَأَنَّهُ هُوَ أَغْنَىٰ وَأَقْنَىٰ ﴿٤٨﴾

وَأَنَّهُ هُوَ رَبُّ الشِّعْرَىٰ ﴿٤٩﴾

وَأَنَّهُ أَهْلَكَ عَادًا الْأُولَىٰ ﴿٥٠﴾

وَثَمُودَ فَمَا أَبْقَىٰ ﴿٥١﴾

وَقَوْمَ نُوحٍ مِّن قَبْلُ إِنَّهُمْ كَانُوا هُمْ أَظْلَمَ وَأَطْغَىٰ ﴿٥٢﴾

وَالْمُؤْتَفِكَةَ أَهْوَىٰ ﴿٥٣﴾

فَغَشَّاهَا مَا غَشَّىٰ ﴿٥٤﴾

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكَ تَتَمَارَىٰ ﴿٥٥﴾

هَٰذَا نَذِيرٌ مِّنَ النُّذُرِ الْأُولَىٰ ﴿٥٦﴾

أَزِفَتِ الْآزِفَةُ ﴿٥٧﴾

59. neniu alia ol Allah povas haltigi ĝin.

60. Ĉu vi miras pro tiu ĉi anonco?

61. Ĉu vi ridas kaj ne ploras?

62. Ĉu vi volas plu ignori?

63. Terenkuŝiĝu prefere antaŭ Allah, kaj adoru!

لَيْسَ لَهَا مِن دُوْنِ اللّٰهِ كَاشِفَةٌ ﴿٥٨﴾

اَفَمِنْ هٰذَا الْحَدِيْثِ تَعْجَبُوْنَ ﴿٥٩﴾

وَتَضْحَكُوْنَ وَلَا تَبْكُوْنَ ﴿٦٠﴾

وَاَنْتُمْ سٰمِدُوْنَ ﴿٦١﴾

فَاسْجُدُوْا لِلّٰهِ وَاعْبُدُوْا ﴿٦٢﴾ ع سجدة

سُوْرَةُ الْقَمَرِ مَكِّيَّةٌ

(اياتها ٥٤) (ركوعاتها)

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Alproksimiĝas la Horo kaj la luno fendiĝis,

3. kaj, se ili vidas signon, ili turnas sin for kaj diras: "Tio ĉi estas daŭra magio".

4. Ili rifuzas la veron kaj sekvas siajn proprajn pasiojn, sed ĉiu afero estis jam dekretita certe.

5. Vere venis al ili novaĵo, en kiu estas admono,

6. perfekta saĝo; sed ili ne profitas de la admono,

7. do turnu vin for de ili. En la tago, en kiu la heroldo vokos ilin al la malagrablaĵo,

8. kun rigardoj mallevitaj, ili eliros el la tomboj, kvazaŭ disigitaj akridoj,

9. kurante al la heroldo. Diros la miskredantoj: "Tiu ĉi estas terura tago! ".

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ﴿١﴾

اِقْتَرَبَتِ السَّاعَةُ وَانْشَقَّ الْقَمَرُ ﴿٢﴾

وَاِنْ يَّرَوْا اٰيَةً يُّعْرِضُوْا وَيَقُوْلُوْا سِحْرٌ مُّسْتَمِرٌّ ﴿٣﴾

وَكَذَّبُوْا وَاتَّبَعُوْٓا اَهْوَآءَهُمْ وَكُلُّ اَمْرٍ مُّسْتَقِرٌّ ﴿٤﴾

وَلَقَدْ جَآءَهُمْ مِّنَ الْاَنْۢبَآءِ مَا فِيْهِ مُزْدَجَرٌ ﴿٥﴾

حِكْمَةٌ بَالِغَةٌ فَمَا تُغْنِ النُّذُرُ ﴿٦﴾

فَتَوَلَّ عَنْهُمْ يَوْمَ يَدْعُ الدَّاعِ اِلٰى شَيْءٍ نُّكُرٍ ﴿٧﴾

خُشَّعًا اَبْصَارُهُمْ يَخْرُجُوْنَ مِنَ الْاَجْدَاثِ كَاَنَّهُمْ جَرَادٌ مُّنْتَشِرٌ ﴿٨﴾

مُّهْطِعِيْنَ اِلَى الدَّاعِ يَقُوْلُ الْكٰفِرُوْنَ هٰذَا يَوْمٌ عَسِرٌ ﴿٩﴾

كَذَّبَتْ قَبْلَهُمْ قَوْمُ نُوْحٍ فَكَذَّبُوْا عَبْدَنَا وَقَالُوْا

مَجْنُونٌ وَّازْدُجِرَ ﴿٩﴾

10. Antaŭ ili jam rifuzis la popolo de Noa, ili ja rifuzis Nian servanton kaj diris: "Frenezulo, forlasita! ".

فَدَعَا رَبَّهٗٓ اَنِّيْ مَغْلُوْبٌ فَانْتَصِرْ ﴿١٠﴾

11. Li tiam preĝis al sia Sinjoro: "Mi estas venkita, do helpu min".

فَفَتَحْنَآ اَبْوَابَ السَّمَآءِ بِمَآءٍ مُّنْهَمِرٍ ﴿١١﴾

12. Ni do malfermis la pordojn de la ĉielo por la verŝota akvo,

وَّفَجَّرْنَا الْاَرْضَ عُيُوْنًا فَالْتَقَى الْمَآءُ عَلٰٓى اَمْرٍ قَدْ قُدِرَ ﴿١٢﴾

13. kaj Ni elŝprucigis fontojn el la tero, tiel ke renkontiĝis la akvoj por dekretita celo,

وَحَمَلْنٰهُ عَلٰى ذَاتِ اَلْوَاحٍ وَّدُسُرٍ ﴿١٣﴾

14. kaj Ni portis lin sur ŝipon el tabuloj kaj najloj.

تَجْرِيْ بِاَعْيُنِنَا جَزَآءً لِّمَنْ كَانَ كُفِرَ ﴿١٤﴾

15. Ĝi naĝis sub Niaj okuloj, kiel konsolo, ĉar li estis forpuŝita.

وَلَقَدْ تَّرَكْنٰهَآ اٰيَةً فَهَلْ مِنْ مُّدَّكِرٍ ﴿١٥﴾

16. Ni vere faris ĝin signo; ĉu tamen estas iu ajn, kiu akceptas Nian admonon?

فَكَيْفَ كَانَ عَذَابِيْ وَنُذُرِ ﴿١٦﴾

17. Kia do estis Mia puno kaj Mia admono!

وَلَقَدْ يَسَّرْنَا الْقُرْاٰنَ لِلذِّكْرِ فَهَلْ مِنْ مُّدَّكِرٍ ﴿١٧﴾

18. Vere Ni faris la Koranon facila por la admono; ĉu tamen estas iu, kiu akceptas la admonon?

كَذَّبَتْ عَادٌ فَكَيْفَ كَانَ عَذَابِيْ وَنُذُرِ ﴿١٨﴾

19. La Aadanoj negis. Kia do estis Mia puno kaj Mia admono!

اِنَّآ اَرْسَلْنَا عَلَيْهِمْ رِيْحًا صَرْصَرًا فِيْ يَوْمِ نَحْسٍ مُّسْتَمِرٍّ ﴿١٩﴾

20. Ni vere sendis kontraŭ ilin detruan ventegon en tago de senfina malfeliĉo,

تَنْزِعُ النَّاسَ كَاَنَّهُمْ اَعْجَازُ نَخْلٍ مُّنْقَعِرٍ ﴿٢٠﴾

21. kiu fortrenis la homojn, kvazaŭ ili estus trunkoj de elradikigitaj palmoj.

فَكَيْفَ كَانَ عَذَابِيْ وَنُذُرِ ﴿٢١﴾

22. Jen! Kia estis Mia puno kaj Mia admono!

وَلَقَدْ يَسَّرْنَا الْقُرْاٰنَ لِلذِّكْرِ فَهَلْ مِنْ مُّدَّكِرٍ ﴿٢٢﴾

23. Vere Ni faris la Koranon facila por la admono; ĉu tamen estas iu, kiu akceptas la admonon?

كَذَّبَتْ ثَمُوْدُ بِالنُّذُرِ ﴿٢٣﴾

24. Ankaŭ la Tamudoj rifuzis la admonantojn,

فَقَالُوْٓا اَبَشَرًا مِّنَّا وَاحِدًا نَّتَّبِعُهٗٓ اِنَّآ اِذًا لَّفِيْ ضَلٰلٍ وَّسُعُرٍ ﴿٢٤﴾

ءَاُلْقِيَ الذِّكْرُ عَلَيْهِ مِنْ بَيْنِنَا بَلْ هُوَ كَذَّابٌ اَشِرٌ ﴿٢٥﴾

سَيَعْلَمُوْنَ غَدًا مَّنِ الْكَذَّابُ الْاَشِرُ ﴿٢٦﴾

إِنَّا مُرْسِلُوا النَّاقَةِ فِتْنَةً لَّهُمْ فَارْتَقِبْهُمْ
وَاصْطَبِرْ ﴿٢٧﴾

25. kaj diris: "Kiel? Viro el nia mezo, sola! Ĉu ni sekvu lin? Tiam ni vere estus en eraro kaj en frenezo.

وَنَبِّئْهُمْ أَنَّ الْمَاءَ قِسْمَةٌ بَيْنَهُمْ ۖ كُلُّ شِرْبٍ
مُّحْتَضَرٌ ﴿٢٨﴾

26. Ĉu ĝuste al li estis donita la admono el ni ĉiuj? Ne! Li estas vantema mensogulo".

فَنَادَوْا صَاحِبَهُمْ فَتَعَاطَىٰ فَعَقَرَ ﴿٢٩﴾

27. Morgaŭ ili ekscios, kiu estas la vantema mensogulo!

فَكَيْفَ كَانَ عَذَابِي وَنُذُرِ ﴿٣٠﴾

28. Ni vere sendos la kamelinon kiel provon por ili: do observu ilin kaj persistu,

إِنَّا أَرْسَلْنَا عَلَيْهِمْ صَيْحَةً وَاحِدَةً فَكَانُوا
كَهَشِيمِ الْمُحْتَظِرِ ﴿٣١﴾

29. kaj anoncu al ili, ke la akvo estu disdonita inter ili; ĉiu trinktempo do estu difinita.

وَلَقَدْ يَسَّرْنَا الْقُرْآنَ لِلذِّكْرِ فَهَلْ مِن مُّدَّكِرٍ ﴿٣٢﴾

30. Ili tamen vokis sian kunulon kaj li kaptis ĝin kaj tranĉis ĝian kolon.

كَذَّبَتْ قَوْمُ لُوطٍ بِالنُّذُرِ ﴿٣٣﴾

31. Kia do estis Mia puno kaj Mia admono!

إِنَّا أَرْسَلْنَا عَلَيْهِمْ حَاصِبًا إِلَّا آلَ لُوطٍ ۖ نَّجَّيْنَاهُم
بِسَحَرٍ ﴿٣٤﴾

32. Ni sendis al ili nur unu kriegon, kaj ili fariĝis kiel sekiĝintaj stoploj.

نِّعْمَةً مِّنْ عِندِنَا ۚ كَذَٰلِكَ نَجْزِي مَن شَكَرَ ﴿٣٥﴾

33. Vere Ni faris la Koranon facila por la admono; ĉu do estas iu, kiu akceptas la admonon?

وَلَقَدْ أَنذَرَهُم بَطْشَتَنَا فَتَمَارَوْا بِالنُّذُرِ ﴿٣٦﴾

34. Ankaŭ la popolo de Lot rifuzis la admonantojn.

وَلَقَدْ رَاوَدُوهُ عَن ضَيْفِهِ فَطَمَسْنَا أَعْيُنَهُمْ
فَذُوقُوا عَذَابِي وَنُذُرِ ﴿٣٧﴾

35. Vere Ni sendis sur ilin pluvon de ŝtonoj, krom sur la familion de Lot, kiun Ni savis je la tagiĝo,

وَلَقَدْ صَبَّحَهُم بُكْرَةً عَذَابٌ مُّسْتَقِرٌّ ﴿٣٨﴾

36. kiel favoro de Ni. Tiel Ni rekompencas tiun, kiu estas danka.

فَذُوقُوا عَذَابِي وَنُذُرِ ﴿٣٩﴾

37. Vere li admonis ilin pri la puno, ili tamen disputis kun la admonantoj.

ع وَلَقَدْ يَسَّرْنَا الْقُرْآنَ لِلذِّكْرِ فَهَلْ مِن مُّدَّكِرٍ ﴿٤٠﴾

38. Ili fakte provis perfide konduki lin for de liaj gastoj. Ni tiam blindigis iliajn okulojn kaj diris: "Gustumu do Mian punon kaj Mian admonon".

39. Vere je la tagiĝo atingis ilin daŭra puno.

وَلَقَدْ جَآءَ اٰلَ فِرْعَوْنَ النُّذُرُ ﴿٤١﴾

40. "Tial vi gustumu Mian punon kaj Mian admonon".

كَذَّبُوْا بِاٰيٰتِنَا كُلِّهَا فَاَخَذْنٰهُمْ اَخْذَ عَزِيْزٍ مُّقْتَدِرٍ ﴿٤٢﴾

41. Vere Ni faris la Koranon facila por la admono; ĉu do estas iu, kiu akceptas la admonon?

اَكُفَّارُكُمْ خَيْرٌ مِّنْ اُولٰٓئِكُمْ اَمْ لَكُمْ بَرَآءَةٌ فِى الزُّبُرِ ﴿٤٣﴾

42. Ankaŭ al la popolo de Faraono venis admonantoj,

اَمْ يَقُوْلُوْنَ نَحْنُ جَمِيْعٌ مُّنْتَصِرٌ ﴿٤٤﴾

43. ili tamen rifuzis ĉiujn Niajn signojn, kaj Ni ekkaptis ilin, kiel kapablas ekkapti nur iu ĉiopova, fortega.

سَيُهْزَمُ الْجَمْعُ وَيُوَلُّوْنَ الدُّبُرَ ﴿٤٥﴾

44. Ĉu la miskredantoj inter vi estas pli bonaj ol tiuj? Aŭ ĉu vi havas senpekigon en la Skriboj?

بَلِ السَّاعَةُ مَوْعِدُهُمْ وَالسَّاعَةُ اَدْهٰى وَاَمَرُّ ﴿٤٦﴾

45. Ĉu ili diras: "Ni estas trupo venkema"?

اِنَّ الْمُجْرِمِيْنَ فِىْ ضَلٰلٍ وَّسُعُرٍ ﴿٤٧﴾

46. La trupoj tamen estos venkitaj kaj ili turnos siajn dorsojn.

يَوْمَ يُسْحَبُوْنَ فِى النَّارِ عَلٰى وُجُوْهِهِمْ ذُوْقُوْا مَسَّ سَقَرَ ﴿٤٨﴾

47. Ne! La Horo estas la tempo, pri kiu estis minacite al ili, kaj la Horo estos terura kaj maldolĉa.

اِنَّا كُلَّ شَىْءٍ خَلَقْنٰهُ بِقَدَرٍ ﴿٤٩﴾

48. La pekuloj vere estos en eraro kaj en frenezo

وَمَآ اَمْرُنَآ اِلَّا وَاحِدَةٌ كَلَمْحٍ بِالْبَصَرِ ﴿٥٠﴾

49. en la tago, en kiu ili estos trenitaj en la fajron sur siaj vizaĝoj: "Gustumu la kontakton de l' Infero! ".

وَلَقَدْ اَهْلَكْنَآ اَشْيَاعَكُمْ فَهَلْ مِنْ مُّدَّكِرٍ ﴿٥١﴾

50. Ni vere kreis ĉion laŭ difinita mezuro,

وَكُلُّ شَىْءٍ فَعَلُوْهُ فِى الزُّبُرِ ﴿٥٢﴾

51. kaj ĉiu Nia ordono estos plenumita per unu vorto kiel palpebrumo,

وَكُلُّ صَغِيْرٍ وَّكَبِيْرٍ مُّسْتَطَرٌ ﴿٥٣﴾

52. kaj Ni certe neniigis naciojn kiel via. Ĉu estas iu, kiu akceptas la admonon?

اِنَّ الْمُتَّقِيْنَ فِىْ جَنّٰتٍ وَّنَهَرٍ ﴿٥٤﴾

53. Ĉio, kion ili faris, troviĝas en la libroj,

فِىْ مَقْعَدِ صِدْقٍ عِنْدَ مَلِيْكٍ مُّقْتَدِرٍ ﴿٥٥﴾ ع ٣

54. kaj ĉio malgranda kaj granda estas enregistrita.

55. Vere la justuloj estos en ĝardenoj kaj inter riveroj,

56. en eterna loko apud la ĉiopova Reĝo.

سُوْرَةُ الرَّحْمٰنِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

اَلرَّحْمٰنُ ②

2. La Donema

عَلَّمَ الْقُرْاٰنَ ③

3. instruis la Koranon,

خَلَقَ الْاِنْسَانَ ④

4. kreis la homon,

عَلَّمَهُ الْبَيَانَ ⑤

5. instruis al li esprimi sin kompreneble.

اَلشَّمْسُ وَالْقَمَرُ بِحُسْبَانٍ ⑥

6. La suno kaj la luno sekvas siajn vojojn laŭ mezuro,

وَّالنَّجْمُ وَالشَّجَرُ يَسْجُدٰنِ ⑦

7. la herboj kaj la arboj riverencas;

وَالسَّمَآءَ رَفَعَهَا وَوَضَعَ الْمِيْزَانَ ⑧

8. Li altigis la ĉielon konveksan kaj difinis la mezuron,

اَلَّا تَطْغَوْا فِى الْمِيْزَانِ ⑨

9. por ke vi ne ekscesu la mezuron.

وَاَقِيْمُوا الْوَزْنَ بِالْقِسْطِ وَلَا تُخْسِرُوا الْمِيْزَانَ ⑩

10. Tiel vi pesu ĉion ĝuste, kaj ne malpliigu maljuste la mezuron.

وَالْاَرْضَ وَضَعَهَا لِلْاَنَامِ ⑪

11. Li destinis la teron por la vivantaj estaĵoj;

فِيْهَا فَاكِهَةٌ ۙ وَّالنَّخْلُ ذَاتُ الْاَكْمَامِ ⑫

12. sur ĝi estas fruktoj kaj palmoj kun fruktospikoj,

وَالْحَبُّ ذُو الْعَصْفِ وَالرَّيْحَانُ ⑬

13. kaj greno en ujoj kaj bonodoraj floroj.

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ⑭

14. Kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi do volas nei, ho vi homoj kaj Ginnoj?

خَلَقَ الْاِنْسَانَ مِنْ صَلْصَالٍ كَالْفَخَّارِ ⑮

وَخَلَقَ الْجَآنَّ مِنْ مَّارِجٍ مِّنْ نَّارٍ ⑯

15. Li kreis la homon el seka argilo, kiu estas kiel poto el bakita argilo.

16. Li kreis la Ĝinnojn el la flamo de la fajro.

17. Kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi?

18. La Sinjoro de ambaŭ Orientoj kaj de ambaŭ Okcidentoj.

19. Kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi?

20. Li liberigis ambaŭ marojn, por ke ili renkontu unu la alian,

21. inter ili estas baro, kiun ili ne povas transpaŝi,

22. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

23. el ambaŭ venas perloj kaj koraloj,

24. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

25. al Li apartenas la altaj ŝipoj sur la maro, kiuj estas kiel montoj.

26. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

27. Ĉio, kio estas sur la tero estas pasema,

28. sed la vizaĝo de via Sinjoro restos – la Majstro de la majesteco kaj de la honoro.

29. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

30. Al Li preĝas ĉiu, kiu estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Ĉiumomente Li malkaŝas sin en nova brilego.

31. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبَانِ ﴿١٥﴾

رَبُّ الْمَشْرِقَيْنِ وَرَبُّ الْمَغْرِبَيْنِ ﴿١٦﴾

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبَانِ ﴿١٧﴾

مَرَجَ الْبَحْرَيْنِ يَلْتَقِيَانِ ﴿١٨﴾

بَيْنَهُمَا بَرْزَخٌ لَا يَبْغِيَانِ ﴿١٩﴾

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبَانِ ﴿٢٠﴾

يَخْرُجُ مِنْهُمَا اللُّؤْلُؤُ وَالْمَرْجَانُ ﴿٢١﴾

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبَانِ ﴿٢٢﴾

وَلَهُ الْجَوَارِ الْمُنْشَئَاتُ فِي الْبَحْرِ كَالْأَعْلَامِ ﴿٢٣﴾

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبَانِ ﴿٢٤﴾

كُلُّ مَنْ عَلَيْهَا فَانٍ ﴿٢٥﴾

وَيَبْقَى وَجْهُ رَبِّكَ ذُو الْجَلَالِ وَالْإِكْرَامِ ﴿٢٦﴾

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبَانِ ﴿٢٧﴾

يَسْأَلُهُ مَنْ فِي السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ كُلَّ يَوْمٍ هُوَ فِي شَأْنٍ ﴿٢٨﴾

فَبِأَيِّ آلَاءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبَانِ ﴿٢٩﴾

سَنَفْرُغُ لَكُمْ اَيُّهَ الثَّقَلٰنِ ﴿٣٢﴾

32. Ankaŭ pri vi baldaŭ Ni zorgos, vi ambaŭ, Ĝinnoj kaj homoj;

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٣٣﴾

33. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

يٰمَعْشَرَ الْجِنِّ وَالْاِنْسِ اِنِ اسْتَطَعْتُمْ اَنْ تَنْفُذُوْا مِنْ اَقْطَارِ السَّمٰوٰتِ وَالْاَرْضِ فَانْفُذُوْا لَا تَنْفُذُوْنَ اِلَّا بِسُلْطٰنٍ ﴿٣٤﴾

34. ho vi kunveno de Ĝinnoj kaj homoj, se vi kapablas iri trans la limojn de la ĉieloj kaj de la tero, iru! Vi ne kapablos iri sen permeso.

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٣٥﴾

35. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

يُرْسَلُ عَلَيْكُمَا شُوَاظٌ مِّنْ نَّارٍ ۙ وَّنُحَاسٌ فَلَا تَنْتَصِرٰنِ ﴿٣٦﴾

36. Estos sendita, kontraŭ vin ambaŭ, flamo el fajro kaj fumego, kaj vi ambaŭ ne venkos.

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٣٧﴾

37. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

فَاِذَا انْشَقَّتِ السَّمَآءُ فَكَانَتْ وَرْدَةً كَالدِّهَانِ ﴿٣٨﴾

38. Kiam la ĉielo fendiĝos kaj fariĝos ruĝa kiel ruĝa ledo,

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٣٩﴾

39. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

فَيَوْمَئِذٍ لَّا يُسْـَٔلُ عَنْ ذَنْۢبِهٖٓ اِنْسٌ وَّلَا جَآنٌّ ﴿٤٠﴾

40. en tiu tago neniu homo aŭ Ĝinno estos demandita pri sia peko;

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٤١﴾

41. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

يُعْرَفُ الْمُجْرِمُوْنَ بِسِيْمٰهُمْ فَيُؤْخَذُ بِالنَّوَاصِيْ وَالْاَقْدَامِ ﴿٤٢﴾

42. la kulpuloj estos rekoneblaj pro siaj distingaj signoj, kaj ili estos ekkaptitaj je la hartufoj kaj je la piedoj.

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٤٣﴾

43. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

هٰذِهٖ جَهَنَّمُ الَّتِيْ يُكَذِّبُ بِهَا الْمُجْرِمُوْنَ ﴿٤٤﴾

44. Tiu ĉi estas la Infero, kiun la kulpuloj negis.

يَطُوْفُوْنَ بَيْنَهَا وَبَيْنَ حَمِيْمٍ اٰنٍ ﴿٤٥﴾

45. Ili iros tien kaj reen inter ĝi kaj bolanta akvo.

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٤٦﴾

46. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

47. Por tiu tamen, kiu timas la ĉeeston de sia Sinjoro, estos du ĝardenoj

48. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

49. kun diversspecaj arboj,

50. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

51. en ambaŭ estos po du fluantaj fontoj,

52. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

53. en ambaŭ estos, de ĉiu frukto, paroj.

54. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

55. Ili kuŝos sur kusenoj, kies subŝtofo estos brokato, kaj la fruktoj de ambaŭ ĝardenoj estos facile atingeblaj,

56. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

57. En ambaŭ estos fraŭlinoj kun modestaj rigardoj, kiujn antaŭe nek homo nek Ginno tuŝis,

58. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

59. kvazaŭ ili estus rubenoj aŭ koraloj.

60. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

61. Ĉu la rekompenco pro la bono povas esti alia ol bono?

62. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

63. Apud ĉi tiuj estos aliaj du ĝardenoj,

64. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

وَلِمَنْ خَافَ مَقَامَ رَبِّهٖ جَنَّتٰنِ ﴿٤٦﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٤٧﴾
ذَوَاتَآ اَفْنَانٍ ﴿٤٨﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٤٩﴾
فِيْهِمَا عَيْنٰنِ تَجْرِيٰنِ ﴿٥٠﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٥١﴾
فِيْهِمَا مِنْ كُلِّ فَاكِهَةٍ زَوْجٰنِ ﴿٥٢﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٥٣﴾
مُتَّكِـِٕيْنَ عَلٰى فُرُشٍ بَطَآئِنُهَا مِنْ اِسْتَبْرَقٍ ؕ وَ
جَنَا الْجَنَّتَيْنِ دَانٍ ﴿٥٤﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٥٥﴾
فِيْهِنَّ قٰصِرٰتُ الطَّرْفِ ۙ لَمْ يَطْمِثْهُنَّ اِنْسٌ قَبْلَهُمْ
وَلَا جَآنٌّ ﴿٥٦﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٥٧﴾
كَاَنَّهُنَّ الْيَاقُوْتُ وَالْمَرْجَانُ ﴿٥٨﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٥٩﴾
هَلْ جَزَآءُ الْاِحْسَانِ اِلَّا الْاِحْسَانُ ﴿٦٠﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٦١﴾
وَمِنْ دُوْنِهِمَا جَنَّتٰنِ ﴿٦٢﴾
فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٦٣﴾

مُدْهَآمَّتٰنِ ﴿٦٤﴾

65. kun verda malhela foliaro;

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٦٥﴾

66. – kiujn el al bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

فِيْهِمَا عَيْنٰنِ نَضَّاخَتٰنِ ﴿٦٦﴾

67. en ambaŭ estos po du fontoj abunde fluantaj,

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٦٧﴾

68. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

فِيْهِمَا فَاكِهَةٌ وَّنَخْلٌ وَّرُمَّانٌ ﴿٦٨﴾

69. en ambaŭ estos fruktoj kaj daktiloj kaj granatoj –

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٦٩﴾

70. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

فِيْهِنَّ خَيْرٰتٌ حِسَانٌ ﴿٧٠﴾

71. en ili estos bonegaj, belegaj fraŭlinoj,

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٧١﴾

72. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

حُوْرٌ مَّقْصُوْرٰتٌ فِى الْخِيَامِ ﴿٧٢﴾

73. fraŭlinoj grandokulaj, en la tendoj,

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٧٣﴾

74. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

لَمْ يَطْمِثْهُنَّ اِنْسٌ قَبْلَهُمْ وَلَا جَآنٌّ ﴿٧٤﴾

75. kiujn antaŭe nek homo nek Ĝinno tuŝis,

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٧٥﴾

76. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

مُتَّكِـِٕيْنَ عَلٰى رَفْرَفٍ خُضْرٍ وَّعَبْقَرِيٍّ حِسَانٍ ﴿٧٦﴾

77. kuŝantaj sur verdaj kusenoj kaj belegaj tapiŝoj.

فَبِاَيِّ اٰلَآءِ رَبِّكُمَا تُكَذِّبٰنِ ﴿٧٧﴾

78. – kiujn el la bonfaroj de via Sinjoro vi ambaŭ do volas negi? –

تَبٰرَكَ اسْمُ رَبِّكَ ذِى الْجَلٰلِ وَالْاِكْرَامِ ﴿٧٨﴾

79. Benata estas la nomo de via Sinjoro, la Majstro de l' majesteco kaj de l' honoro.

سُورَةُ الْوَاقِعَةِ مَكِّيَّةٌ (٥٦) اياتها ركوعاتها

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

إِذَا وَقَعَتِ الْوَاقِعَةُ ②

2. Kiam okazos la okazantaĵo,

لَيْسَ لِوَقْعَتِهَا كَاذِبَةٌ ③

3. — nenio povos malhelpi ĝian realiĝon —

خَافِضَةٌ رَّافِعَةٌ ④

4. kiu altigas kaj malaltigas;

إِذَا رُجَّتِ الْأَرْضُ رَجًّا ⑤

5. kiam la tero fortege skuiĝos,

وَبُسَّتِ الْجِبَالُ بَسًّا ⑥

6. kaj la montoj estos tute pistitaj,

فَكَانَتْ هَبَاءً مُّنْبَثًّا ⑦

7. kaj fariĝos polvo, ĉien disŝutita,

وَكُنْتُمْ أَزْوَاجًا ثَلٰثَةً ⑧

8. kaj vi estos divididaj en tri grupojn:

فَأَصْحٰبُ الْمَيْمَنَةِ مَآ أَصْحٰبُ الْمَيْمَنَةِ ⑨

9. unue, tiuj je la dekstra flanko — kion vi scias pri tiuj je la dekstra flanko? —

وَأَصْحٰبُ الْمَشْئَمَةِ مَآ أَصْحٰبُ الْمَشْئَمَةِ ⑩

10. poste, tiuj je la maldekstra flanko — kion vi scias pri tiuj je la maldekstra flanko? —

وَالسّٰبِقُوْنَ السّٰبِقُوْنَ ⑪

11. kaj la antaŭirintoj estos la antaŭirantoj

أُولٰٓئِكَ الْمُقَرَّبُوْنَ ⑫

12. ili estos la plej proksimaj al Dio,

فِيْ جَنّٰتِ النَّعِيْمِ ⑬

13. en ĝardenoj de feliĉo.

ثُلَّةٌ مِّنَ الْأَوَّلِيْنَ ⑭

14. Multaj el ili estos prauloj,

وَقَلِيْلٌ مِّنَ الْآخِرِيْنَ ⑮

15. malmultaj posteuloj.

عَلٰى سُرُرٍ مَّوْضُوْنَةٍ ⑯

16. Ili sidos sur broditaj kusenoj,

مُّتَّكِئِيْنَ عَلَيْهَا مُتَقٰبِلِيْنَ ⑰

17. kuŝante sur ili, vidalvide;

يَطُوْفُ عَلَيْهِمْ وِلْدَانٌ مُّخَلَّدُوْنَ ⑱

18. zorgos pri ili junuloj, kiuj ne maljuniĝos,

19. kun krateroj, kalikoj kaj pokaloj da freŝa trinkaĵo

بِأَكْوَابٍ وَّأَبَارِيقَ ۙ وَكَأْسٍ مِّن مَّعِينٍ ﴿١٩﴾

20. – kiu kaŭzos nek kapdolorojn nek ebriecon –

لَّا يُصَدَّعُونَ عَنْهَا وَلَا يُنزِفُونَ ﴿٢٠﴾

21. kaj kun la fruktoj, kiujn ili preferas,

وَفَاكِهَةٍ مِّمَّا يَتَخَيَّرُونَ ﴿٢١﴾

22. kaj kun viando de birdoj, kiun ili deziras,

وَلَحْمِ طَيْرٍ مِّمَّا يَشْتَهُونَ ﴿٢٢﴾

وَحُورٌ عِينٌ ﴿٢٣﴾

23. kaj fraŭlinoj grandokulaj,

كَأَمْثَالِ اللُّؤْلُؤِ الْمَكْنُونِ ﴿٢٤﴾

24. kvazaŭ kaŝitaj perloj,

جَزَاءً بِمَا كَانُوا يَعْمَلُونَ ﴿٢٥﴾

25. kiel rekompenco pro tio, kion ili faris.

لَا يَسْمَعُونَ فِيهَا لَغْوًا وَلَا تَأْثِيمًا ﴿٢٦﴾

26. Tie ili aŭdos nek vanan babiladon nek pekajn parolojn,

إِلَّا قِيلًا سَلَامًا سَلَامًا ﴿٢٧﴾

27. nur la vorton: "Pacon! Pacon! ".

وَأَصْحَابُ الْيَمِينِ ۙ مَا أَصْحَابُ الْيَمِينِ ﴿٢٨﴾

28. Pri tiuj je la dekstra flanko – kion vi scias pri tiuj je la dekstra flanko? –

فِي سِدْرٍ مَّخْضُودٍ ﴿٢٩﴾

29. ili estos inter lotusarboj sen dornoj,

وَطَلْحٍ مَّنضُودٍ ﴿٣٠﴾

30. kaj fruktoplenaj bananarboj,

وَظِلٍّ مَّمْدُودٍ ﴿٣١﴾

31. kaj larĝaj ombroj,

وَمَاءٍ مَّسْكُوبٍ ﴿٣٢﴾

32. apud fluanta akvo,

وَفَاكِهَةٍ كَثِيرَةٍ ﴿٣٣﴾

33. kun abundaj fruktoj

لَّا مَقْطُوعَةٍ وَلَا مَمْنُوعَةٍ ﴿٣٤﴾

34. senfinaj, permesitaj,

وَفُرُشٍ مَّرْفُوعَةٍ ﴿٣٥﴾

35. sur altaj litoj.

إِنَّا أَنشَأْنَاهُنَّ إِنشَاءً ﴿٣٦﴾

36. Ni vere faris iliajn edzinojn miriga kreo,

فَجَعَلْنَاهُنَّ أَبْكَارًا ﴿٣٧﴾

37. Ni faris ilin virgulinoj,

عُرُبًا أَتْرَابًا ﴿٣٨﴾

38. amemaj, samaĝaj,

لِّأَصْحَابِ الْيَمِينِ ﴿٣٩﴾ ع ١٤

39. posedo de tiuj je la dekstra flanko;

40. Granda nombro da ili estos el la antaŭaj generacioj,

ثُلَّةٌ مِّنَ الْاَوَّلِيْنَ ۙ﴿۴۰﴾

41. kaj granda nombro el la pli malfruaj.

وَثُلَّةٌ مِّنَ الْاٰخِرِيْنَ ؕ﴿۴۱﴾

42. Pri tiuj je la maldekstra flanko – kion vi scias pri tiuj je la maldekstra flanko? –

وَاَصْحٰبُ الشِّمَالِ ۙ مَاۤ اَصْحٰبُ الشِّمَالِ ؕ﴿۴۱﴾

43. ili estos inter varmega ventego kaj bolanta akvo,

فِيْ سَمُوْمٍ وَّحَمِيْمٍ ۙ﴿۴۲﴾

44. kaj ombroj el nigra fumo

وَّظِلٍّ مِّنْ يَّحْمُوْمٍ ۙ﴿۴۳﴾

45. nek malvarmeta nek refreŝiganta.

لَّا بَارِدٍ وَّلَا كَرِيْمٍ ۙ﴿۴۴﴾

46. Certe ili antaŭe pasigis sian vivon en komforteco,

اِنَّهُمْ كَانُوْا قَبْلَ ذٰلِكَ مُتْرَفِيْنَ ۚ﴿۴۵﴾

47. kaj ili vivis en grava pekado,

وَكَانُوْا يُصِرُّوْنَ عَلَى الْحِنْثِ الْعَظِيْمِ ۚ﴿۴۶﴾

48. kaj kutimis diri: "Kiel? Post kiam ni mortis kaj fariĝis polvo kaj ostoj, ni verdire vekiĝos?

وَكَانُوْا يَقُوْلُوْنَ ۙ اَئِذَا مِتْنَا وَكُنَّا تُرَابًا وَّعِظَامًا ءَاِنَّا لَمَبْعُوْثُوْنَ ۙ﴿۴۷﴾

49. Kaj same niaj prapatroj? ".

اَوَ اٰبَآؤُنَا الْاَوَّلُوْنَ ﴿۴۸﴾

50. Diru: "Vere la fruaj kaj la malfruaj,

قُلْ اِنَّ الْاَوَّلِيْنَ وَالْاٰخِرِيْنَ ۙ﴿۴۹﴾

51. ĉiuj kunvenos je difinita tempo en difinita tago.

لَمَجْمُوْعُوْنَ ۙ اِلٰى مِيْقَاتِ يَوْمٍ مَّعْلُوْمٍ ﴿۵۰﴾

52. Tiam, ho vi erarantoj, vi rifuzantoj,

ثُمَّ اِنَّكُمْ اَيُّهَا الضَّآلُّوْنَ الْمُكَذِّبُوْنَ ۙ﴿۵۱﴾

53. vi manĝos la fruktojn de la arbo Zakkûm,

لَاٰكِلُوْنَ مِنْ شَجَرٍ مِّنْ زَقُّوْمٍ ۙ﴿۵۲﴾

54. kaj plenigos per ili viajn ventrojn;

فَمَالِـُٔوْنَ مِنْهَا الْبُطُوْنَ ۚ﴿۵۳﴾

55. poste vi trinkos sur ilin bolantan akvon,

فَشٰرِبُوْنَ عَلَيْهِ مِنَ الْحَمِيْمِ ۚ﴿۵۴﴾

56. kiun vi trinkos, kiel trinkas la kamelo soifanta.

فَشٰرِبُوْنَ شُرْبَ الْهِيْمِ ؕ﴿۵۵﴾

57. Tiu estos la traktado por ili en la tago de la lasta Juĝo.

هٰذَا نُزُلُهُمْ يَوْمَ الدِّيْنِ ؕ﴿۵۶﴾

58. Ni kreis vin. Kial vi do ne volas rekoni la veron?

نَحْنُ خَلَقْنٰكُمْ فَلَوْلَا تُصَدِّقُوْنَ ﴿۵۷﴾

اَفَرَءَيْتُمْ مَّا تُمْنُوْنَ ؕ﴿۵۸﴾

59. Kion vi pensas pri la spermo, kiun vi elŝprucas?

ءَأَنتُمْ تَخْلُقُونَهُۥٓ أَمْ نَحْنُ ٱلْخَٰلِقُونَ ﴿٥٩﴾

60. Ĉu ĝin kreis vi aŭ Ni?

نَحْنُ قَدَّرْنَا بَيْنَكُمُ ٱلْمَوْتَ وَمَا نَحْنُ بِمَسْبُوقِينَ ﴿٦٠﴾

61. Ni destinis por vi la morton, kaj nenio povas malhelpi Nin

عَلَىٰٓ أَن نُّبَدِّلَ أَمْثَٰلَكُمْ وَنُنشِئَكُمْ فِى مَا لَا تَعْلَمُونَ ﴿٦١﴾

62. estigi similajn ulojn anstataŭ vi, kaj fari vin io alia, kion vi ne scias.

وَلَقَدْ عَلِمْتُمُ ٱلنَّشْأَةَ ٱلْأُولَىٰ فَلَوْلَا تَذَكَّرُونَ ﴿٦٢﴾

63. Vi certe konas la unuan kreon. Kial vi do ne volas pripensi?

أَفَرَءَيْتُم مَّا تَحْرُثُونَ ﴿٦٣﴾

64. Ĉu vi pripensas pri tio, kion vi semas?

ءَأَنتُمْ تَزْرَعُونَهُۥٓ أَمْ نَحْنُ ٱلزَّٰرِعُونَ ﴿٦٤﴾

65. Ĉu ĝin kreskigas vi aŭ Ni?

لَوْ نَشَآءُ لَجَعَلْنَٰهُ حُطَٰمًا فَظَلْتُمْ تَفَكَّهُونَ ﴿٦٥﴾

66. Se Ni volus, Ni povus fari ĝin polvo, tiam vi ne ĉesus plori:

إِنَّا لَمُغْرَمُونَ ﴿٦٦﴾

67. "Ni vere ruiniĝis!

بَلْ نَحْنُ مَحْرُومُونَ ﴿٦٧﴾

68. Ne! Ni estas prirabitaj! ".

أَفَرَءَيْتُمُ ٱلْمَآءَ ٱلَّذِى تَشْرَبُونَ ﴿٦٨﴾

69. Ĉu vi pripensas pri la akvo, kiun vi trinkas?

ءَأَنتُمْ أَنزَلْتُمُوهُ مِنَ ٱلْمُزْنِ أَمْ نَحْنُ ٱلْمُنزِلُونَ ﴿٦٩﴾

70. Ĉu sendas ĝin el la nuboj vi aŭ Ni?

لَوْ نَشَآءُ جَعَلْنَٰهُ أُجَاجًا فَلَوْلَا تَشْكُرُونَ ﴿٧٠﴾

71. Se Ni volus, Ni povus fari ĝin maldolĉa. Kial vi do ne dankas?

أَفَرَءَيْتُمُ ٱلنَّارَ ٱلَّتِى تُورُونَ ﴿٧١﴾

72. Ĉu vi pripensas pri la fajro, kiun vi ekbruligas?

ءَأَنتُمْ أَنشَأْتُمْ شَجَرَتَهَآ أَمْ نَحْنُ ٱلْمُنشِـُٔونَ ﴿٧٢﴾

73. Ĉu estis vi tiuj, kiuj estigis la arbon por ĝi, aŭ ĉu Ni estas la Kreinto?

نَحْنُ جَعَلْنَٰهَا تَذْكِرَةً وَمَتَٰعًا لِّلْمُقْوِينَ ﴿٧٣﴾ ع ٣ ١٥

74. Ni kreis ĝin kiel admonon kaj utilon por la vojaĝantoj tra la dezerto.

فَسَبِّحْ بِٱسْمِ رَبِّكَ ٱلْعَظِيمِ ﴿٧٤﴾

75. Tial vi gloregu la nomon de via Sinjoro, la Grandega.

فَلَآ أُقْسِمُ بِمَوَٰقِعِ ٱلنُّجُومِ ﴿٧٥﴾

76. Jes! Mi ĵuras per la subiro de la steloj,

وَإِنَّهُۥ لَقَسَمٌ لَّوْ تَعْلَمُونَ عَظِيمٌ ﴿٧٦﴾

إِنَّهُۥ لَقُرْءَانٌ كَرِيمٌ ﴿٧٧﴾

77. kaj vere ĉi tiu estas granda ĵuro – se vi nur scius!

78. Ĉi tiu vere estas nobla Korano

79. en Libro bone gardata,

80. kiun neniu alia povas tuŝi, ol la puruloj,

81. revelacio de la Sinjoro de l' Universo.

82. Ĉu vi volas rifuzi ĉi tiun Dian anoncon?

83. Ĉu vi volus fari la rifuzon de ĝi via ĉiutaga nutraĵo?

84. Kial do, kiam la animo de la mortonto supreniras al lia gorĝo,

85. kaj vi rigardas en tiu momento

86. kaj Ni estas pli proksima al li ol vi, sed vi ne vidas,

87. kial do, se vi ne volas esti juĝitaj,

88. vi ne puŝas ĝin reen, se vi estas sinceraj?

89. Se li nun estas unu el la proksimuloj al Dio,

90. tiam li ĝuos feliĉon kaj bonodoron kaj ĝardenon de ĝojo.

91. Se li estas unu el tiuj je la dekstra flanko,

92. "Pacon al vi, kiu estas unu el tiuj je la dekstra flanko! ".

93. Se li male estas unu el la rifuzintoj, erarintoj,

94. tiam la traktado kontraŭ li estos bolanta akvo

فِي كِتٰبٍ مَّكْنُوْنٍ ۙ ﴿٧٩﴾

لَّا يَمَسُّهٗٓ اِلَّا الْمُطَهَّرُوْنَ ﴿٨٠﴾

تَنْزِيْلٌ مِّنْ رَّبِّ الْعٰلَمِيْنَ ﴿٨١﴾

اَفَبِهٰذَا الْحَدِيْثِ اَنْتُمْ مُّدْهِنُوْنَ ۙ ﴿٨٢﴾

وَتَجْعَلُوْنَ رِزْقَكُمْ اَنَّكُمْ تُكَذِّبُوْنَ ﴿٨٣﴾

فَلَوْلَآ اِذَا بَلَغَتِ الْحُلْقُوْمَ ۙ ﴿٨٤﴾

وَاَنْتُمْ حِيْنَىِٕذٍ تَنْظُرُوْنَ ۙ ﴿٨٥﴾

وَنَحْنُ اَقْرَبُ اِلَيْهِ مِنْكُمْ وَلٰكِنْ لَّا تُبْصِرُوْنَ ﴿٨٦﴾

فَلَوْلَآ اِنْ كُنْتُمْ غَيْرَ مَدِيْنِيْنَ ۙ ﴿٨٧﴾

تَرْجِعُوْنَهَآ اِنْ كُنْتُمْ صٰدِقِيْنَ ﴿٨٨﴾

فَاَمَّآ اِنْ كَانَ مِنَ الْمُقَرَّبِيْنَ ۙ ﴿٨٩﴾

فَرَوْحٌ وَّرَيْحَانٌ ۙ وَّجَنَّتُ نَعِيْمٍ ﴿٩٠﴾

وَاَمَّآ اِنْ كَانَ مِنْ اَصْحٰبِ الْيَمِيْنِ ۙ ﴿٩١﴾

فَسَلٰمٌ لَّكَ مِنْ اَصْحٰبِ الْيَمِيْنِ ﴿٩٢﴾

وَاَمَّآ اِنْ كَانَ مِنَ الْمُكَذِّبِيْنَ الضَّآلِّيْنَ ۙ ﴿٩٣﴾

فَنُزُلٌ مِّنْ حَمِيْمٍ ۙ ﴿٩٤﴾

95. kaj brulado en la Infero.

96. Ĉi tio, vere, estas certa vero.

97. Tial vi gloregu la nomon de via Sinjoro, ia Grandega!

وَتَصْلِيَةُ جَحِيمٍ ﴿٩٤﴾
إِنَّ هَٰذَا لَهُوَ حَقُّ الْيَقِينِ ﴿٩٥﴾
فَسَبِّحْ بِاسْمِ رَبِّكَ الْعَظِيمِ ﴿٩٦﴾

Ĉapitro 57 **Al-Hadīd** _ (La fero)* 27-a parto

سُورَةُ الْحَدِيدِ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Gloregas Allahon, kio estas en la ĉieloj kaj sur la tero. Li estas la Ĉiopova, la Saĝa.

3. Al Li apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero. Li igas vivi kaj morti, kaj Li havas povon super ĉiuj aferoj.

4. Li estas la Unua kaj la Lasta, la Videbla kaj la Kaŝita, kaj Li scias ĉion.

5. Estas Li Tiu, kiu kreis la ĉielojn kaj la teron en ses tagoj, poste Li sidiĝis sur la Tronon. Li scias, kio eniras en la teron kaj kio eliras el ĝi, kaj kio malsupreniras de la ĉielo kaj kio supreniras al ĝi. Li estas kun vi, kie ajn vi estas. Allah vidas ĉion, kion vi faras.

6. Al Li apartenas la suvereneco de la ĉieloj kaj de la tero. Al Allah revenos ĉiuj aferoj.

7. Li igas la nokton eniri en la tagon, kaj Li igas la tagon eniri en la nokton. Li konas ĉion, kio estas en la brustoj.

8. Kredu je Allah kaj al Lia sendito kaj disdonu el tio, de kio Li faris vin heredantoj. Por tiuj el vi, kiuj kredas kaj almozdonas, estos granda rekompenco.

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ﴿١﴾
سَبَّحَ لِلَّهِ مَا فِي السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۖ وَهُوَ الْعَزِيزُ الْحَكِيمُ ﴿٢﴾
لَهُ مُلْكُ السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۚ يُحْيِي وَيُمِيتُ ۚ وَهُوَ عَلَىٰ كُلِّ شَيْءٍ قَدِيرٌ ﴿٣﴾
هُوَ الْأَوَّلُ وَالْآخِرُ وَالظَّاهِرُ وَالْبَاطِنُ ۖ وَهُوَ بِكُلِّ شَيْءٍ عَلِيمٌ ﴿٤﴾
هُوَ الَّذِي خَلَقَ السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضَ فِي سِتَّةِ أَيَّامٍ ثُمَّ اسْتَوَىٰ عَلَى الْعَرْشِ ۖ يَعْلَمُ مَا يَلِجُ فِي الْأَرْضِ وَمَا يَخْرُجُ مِنْهَا وَمَا يَنْزِلُ مِنَ السَّمَاءِ وَمَا يَعْرُجُ فِيهَا ۖ وَهُوَ مَعَكُمْ أَيْنَ مَا كُنْتُمْ ۗ وَاللَّهُ بِمَا تَعْمَلُونَ بَصِيرٌ ﴿٥﴾
لَهُ مُلْكُ السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۗ وَإِلَى اللَّهِ تُرْجَعُ الْأُمُورُ ﴿٦﴾

* v. la verson 26an

يُولِجُ الَّيْلَ فِي النَّهَارِ وَيُولِجُ النَّهَارَ فِي
الَّيْلِ ۚ وَهُوَ عَلِيمٌ بِذَاتِ الصُّدُورِ ﴿٦﴾
اٰمِنُوا بِاللَّهِ وَرَسُولِهِ وَأَنفِقُوا مِمَّا جَعَلَكُم
مُّسْتَخْلَفِينَ فِيهِ ۖ فَالَّذِينَ اٰمَنُوا مِنكُمْ وَأَنفَقُوا
لَهُمْ أَجْرٌ كَبِيرٌ ﴿٧﴾
وَمَا لَكُمْ لَا تُؤْمِنُونَ بِاللَّهِ ۙ وَالرَّسُولُ يَدْعُوكُمْ
لِتُؤْمِنُوا بِرَبِّكُمْ وَقَدْ أَخَذَ مِيثَاقَكُمْ إِن كُنتُم
مُّؤْمِنِينَ ﴿٨﴾
هُوَ الَّذِي يُنَزِّلُ عَلَىٰ عَبْدِهِ اٰيَاتٍ بَيِّنَاتٍ لِّيُخْرِجَكُم
مِّنَ الظُّلُمَاتِ إِلَى النُّورِ ۚ وَإِنَّ اللَّهَ بِكُمْ لَرَءُوفٌ
رَّحِيمٌ ﴿٩﴾
وَمَا لَكُمْ أَلَّا تُنفِقُوا فِي سَبِيلِ اللَّهِ وَلِلَّهِ مِيرَاثُ
السَّمَاوَاتِ وَالْأَرْضِ ۚ لَا يَسْتَوِي مِنكُم مَّنْ أَنفَقَ
مِن قَبْلِ الْفَتْحِ وَقَاتَلَ ۚ أُولَٰئِكَ أَعْظَمُ دَرَجَةً مِّنَ
الَّذِينَ أَنفَقُوا مِن بَعْدُ وَقَاتَلُوا ۚ وَكُلًّا وَعَدَ اللَّهُ
الْحُسْنَىٰ ۚ وَاللَّهُ بِمَا تَعْمَلُونَ خَبِيرٌ ﴿١٠﴾ ع
مَّن ذَا الَّذِي يُقْرِضُ اللَّهَ قَرْضًا حَسَنًا فَيُضَاعِفَهُ
لَهُ وَلَهُ أَجْرٌ كَرِيمٌ ﴿١١﴾
يَوْمَ تَرَى الْمُؤْمِنِينَ وَالْمُؤْمِنَاتِ يَسْعَىٰ نُورُهُم
بَيْنَ أَيْدِيهِمْ وَبِأَيْمَانِهِم بُشْرَاكُمُ الْيَوْمَ
جَنَّاتٌ تَجْرِي مِن تَحْتِهَا الْأَنْهَارُ خَالِدِينَ فِيهَا ۚ
ذَٰلِكَ هُوَ الْفَوْزُ الْعَظِيمُ ﴿١٢﴾

9. Kio estas al vi, ke vi ne kredas je Allah, kvankam la sendito vokas vin, por ke vi kredu je via Sinjoro, kaj jam ricevis de vi solenan promeson, se vi estas kredantoj?

10. Estas Li Tiu, kiu sendis al Sia servanto evidentajn signojn, por ke li konduku vin el la mallumego al la lumo. Vere Allah estas kompatema, pardonema al vi.

11. Kio estas al vi, ke vi ne almozdonas por la afero de Allah, kvankam la heredaĵo de la ĉieloj kaj de la tero apartenas al Allah? Tiuj el vi, kiuj almozdonis antaŭ la venko kaj poste batalis, tiuj ne estas egalaj – ili estas superaj je rango – al tiuj, kiuj almozdonis apenaŭ, post kiam ili batalis. Al ĉiuj tamen Allah promesis bonon. Allah bone scias, kion vi faras.

12. Kiu estas tiu, kiu donas al Allah belan prunton? Li multobligos ĝin por li, kaj por li estos nobla rekompenco.

13. Iutage vi vidos la kredantojn kaj la kredantinojn, kiam la radioj de ilia lumo antaŭiros ilin kaj iliajn manojn dekstrajn:* "Bona novaĵo por vi hodiaŭ! Gardenoj, sub kiuj fluas riveroj, por ke vi restu en ili por ĉiam. Tiu estas la plej granda feliĉo! ".

14. En tiu tago diros la hipokrituloj kaj la hipokritulinoj al la kredantoj: "Atendu nin! Ni volas pruntepreni iom da via lumo". Tiam estos dirite al ili: "Reiru malantaŭen kaj serĉu tie la lumon". Poste estos starigita inter ili muro, kaj en ĝi estos pordo. Gia interna parto estos kompato, kaj ĝia ekstera parto estos puno.

15. Tiam ili krios al la kredantoj: "Ĉu ni ne estis kun vi? ". Tiuj respondos: "Jes, sed vi tentis viajn animojn, kaj atendis, kaj dubis, kaj vin ebriigis viaj pasioj, ĝis venis

* ĉirkaŭos ilin

la ordono de Allah. La Trompisto trompis vin pri Allah.

16. Hodiaŭ tial estos akceptita elaĉeto nek de vi nek de la miskredantoj. Via restadejo estos la fajro; tiu estas taŭga loĝejo por vi. Malbona estas la destino! ".

17. Ĉu ne alvenis la tempo por la kredantoj, por ke iliaj koroj humiliĝu antaŭ la admono de Allah kaj antaŭ la vero, kiu venis, kaj por ke ili ne fariĝu kiel tiuj, al kiuj estis donita la Libro antaŭe, kaj al kiuj estis konsentita prokrasto, kies koroj tamen malmoliĝis kaj el kiuj multaj fariĝis malobeemaj?

18. Sciu, ke Allah revivigas la teron post ĝia morto. Ni klarigas por vi la revelaciojn, por ke vi komprenu.

19. Vere la almozdonantoj kaj la almozdonantinoj kaj tiuj, kiuj pruntedonas al Allah belan prunton, por ili Li multobligos ĝin, kaj por ili estos nobla rekompenco.

20. Tiuj, kiuj kredas je Allah kaj al Lia sendito, estas ili tiuj, kiuj estas sinceremuloj kaj atestantoj antaŭ sia Sinjoro. Ili ricevos sian rekompencon kaj sian lumon. Tiuj male, kiuj nekredas kaj rifuzas Niajn signojn, estas ili tiuj, kiuj estos loĝantoj de l' Infero.

21. Sciu, ke ĉi tiu vivo estas nur ludo kaj amuzaĵo kaj ornamaĵo kaj vantaĵo inter vi, kaj konkuro por pliigo de propraĵoj kaj de filoj. Gi similas al la pluvo, kiu kreskigas la herbojn, kies kresko ĝojigas la kamplojn, poste tamen sekiĝas, kaj vi vidas ilin flaviĝi, poste ili fariĝas polvo. En la vivo venonta estos severa puno, aŭ pardono kaj plezuro de Allah. Ĉi tiu vivo male nur estas trompo.

اِنْ تُقْرِضُوا اللّٰهَ قَرْضًا حَسَنًا يُّضٰعِفْهُ لَكُمْ وَ
يَغْفِرْ لَكُمْ ۗ وَاللّٰهُ شَكُوْرٌ حَلِيْمٌ ۝١٧
عٰلِمُ الْغَيْبِ وَالشَّهَادَةِ الْعَزِيْزُ الْحَكِيْمُ ۝١٨

17. Respektegu Allahon, kiel eble vi povas, kaj obeu kaj almozdonu. Tio estas plej bona por vi mem. Kiu estas savita de sia propra avareco, tiu estos sukcesa.

18. Se vi donas al Allah belan pruntedonon, ĝi estos pliigita por vi kaj Li pardonos al vi. Allah estas ŝatema, grandanima,

19. Ŝcianto de la Nevideblafoj kaj de la Videblafoj, la Ĉiopova, la Saĝa.

سُوْرَةُ الطَّلَاقِ مَدَنِيَّةٌ

revelaciita en Medino

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ho vi, Profeto! Kiam vi eksedziĝas de virinoj, faru tion por ilia difinita tempo, kaj kalkulu la tempon, kaj respektegu Allahon, vian Sinjoron. Ne forpelu ilin el iliaj domoj kaj ne lasu ilin foriri, krom se ili faras evidentajn hontindaĵojn. Tiuj estas la baroj de Allah. Kiu transpasas la barojn de Allah, tiu vere pekas kontraŭ si mem. Vi ne scias, eble Allah poste igos ion novan okazi.

3. Kiam pasis ilia tempo, tiam reprenu ilin ĝentile, aŭ disiĝu de ili ĝentilė, kaj prenu justulojn kiel atestantojn el via mezo, kaj faru tion atesto antaŭ Allah. Tio estas admono por tiu, kiu kredas je Allah kaj al la vivo venonta. Kiu respektegas Allahon, sciu: por tiu Li estigos eliron.

4. Li provizos vin, de kie vi ne supozas. Por tiu, kiu konfidas je Allah, Li sufiĉas. Vere Allah efektivigos Sian intencon. Vere Allah destinis mezuron por ĉiuj aferoj.

5. Se vi estas en dubo pri tiuj el viaj virinoj, kiuj ne plu esperas je la monataĵoj, sciu, ke ilia tempo estas tri monatoj kaj same estas por tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis monataĵon. Por la gravedulinoj vi gardu la tempon, ĝis ili senŝarĝiĝos de sia ŝarĝo. Al tiu, kiu respektegas Allahon, Li konsentos faciligon pri liaj aferoj.

6. Tiu estas la ordono de Allah, kiun Li sendis al vi. De tiu, kiu respektegas Allahon, Li forprenos liajn pekojn kaj pliigos lian rekompencon.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

يٰٓاَيُّهَا النَّبِيُّ اِذَا طَلَّقْتُمُ النِّسَآءَ فَطَلِّقُوْهُنَّ
لِعِدَّتِهِنَّ وَاَحْصُوا الْعِدَّةَ ۚ وَاتَّقُوا اللّٰهَ رَبَّكُمْ ۚ
لَا تُخْرِجُوْهُنَّ مِنْۢ بُيُوْتِهِنَّ وَلَا يَخْرُجْنَ اِلَّآ اَنْ
يَّاْتِيْنَ بِفَاحِشَةٍ مُّبَيِّنَةٍ ۚ وَتِلْكَ حُدُوْدُ اللّٰهِ ۚ وَ
مَنْ يَّتَعَدَّ حُدُوْدَ اللّٰهِ فَقَدْ ظَلَمَ نَفْسَهٗ ۚ لَا تَدْرِيْ
لَعَلَّ اللّٰهَ يُحْدِثُ بَعْدَ ذٰلِكَ اَمْرًا ②

فَاِذَا بَلَغْنَ اَجَلَهُنَّ فَاَمْسِكُوْهُنَّ بِمَعْرُوْفٍ اَوْ
فَارِقُوْهُنَّ بِمَعْرُوْفٍ وَّاَشْهِدُوْا ذَوَىْ عَدْلٍ
مِّنْكُمْ وَاَقِيْمُوا الشَّهَادَةَ لِلّٰهِ ۚ ذٰلِكُمْ يُوْعَظُ بِهٖ مَنْ
كَانَ يُؤْمِنُ بِاللّٰهِ وَالْيَوْمِ الْاٰخِرِ ۚ وَمَنْ يَّتَّقِ اللّٰهَ
يَجْعَلْ لَّهٗ مَخْرَجًا ③

وَّيَرْزُقْهُ مِنْ حَيْثُ لَا يَحْتَسِبُ ۚ وَمَنْ يَّتَوَكَّلْ عَلَى
اللّٰهِ فَهُوَ حَسْبُهٗ ۚ اِنَّ اللّٰهَ بَالِغُ اَمْرِهٖ ۚ قَدْ جَعَلَ
اللّٰهُ لِكُلِّ شَيْءٍ قَدْرًا ④

وَالّٰٓـِٔيْ يَئِسْنَ مِنَ الْمَحِيْضِ مِنْ نِّسَآئِكُمْ اِنِ ارْتَبْتُمْ
فَعِدَّتُهُنَّ ثَلٰثَةُ اَشْهُرٍ ۙ وَّالّٰٓـِٔيْ لَمْ يَحِضْنَ ۚ وَاُولَاتُ
الْاَحْمَالِ اَجَلُهُنَّ اَنْ يَّضَعْنَ حَمْلَهُنَّ ۚ وَمَنْ يَّتَّقِ
اللّٰهَ يَجْعَلْ لَّهٗ مِنْ اَمْرِهٖ يُسْرًا ⑤

ذٰلِكَ اَمْرُ اللّٰهِ اَنْزَلَهٗٓ اِلَيْكُمْ ۭ وَمَنْ يَّتَّقِ اللّٰهَ يُكَفِّرْ
عَنْهُ سَيِّاٰتِهٖ وَيُعْظِمْ لَهٗٓ اَجْرًا ۝

7. Lasu ilin loĝi, kie vi loĝas, laŭ viaj ebloj, kaj ne traktu ilin malbone por ĉagreni ilin. Se ili estas gravedaj, vivtenu ilin, ĝis ili senŝarĝiĝos de sia ŝarĝo. Se ili mamnutras infanon por vi, donu al ili ilian rekompencon, kaj konsiliĝu inter vi ĝentile. Se tio tamen embarasas vin, tiam alia virino mamnutru la infanon por vi.

اَسْكِنُوْهُنَّ مِنْ حَيْثُ سَكَنْتُمْ مِّنْ وُّجْدِكُمْ وَ
لَا تُضَاۗرُّوْهُنَّ لِتُضَيِّقُوْا عَلَيْهِنَّ ۭ وَاِنْ كُنَّ اُولَاتِ
حَمْلٍ فَاَنْفِقُوْا عَلَيْهِنَّ حَتّٰى يَضَعْنَ حَمْلَهُنَّ ۚ فَاِنْ
اَرْضَعْنَ لَكُمْ فَاٰتُوْهُنَّ اُجُوْرَهُنَّ ۚ وَاْتَمِرُوْا بَيْنَكُمْ
بِمَعْرُوْفٍ ۚ وَاِنْ تَعَاسَرْتُمْ فَسَتُرْضِعُ لَهٗٓ اُخْرٰى ۝

8. Kiu havas abundon, tiu elspezu laŭ sia abundo, kaj, kiu havas malabundon de proprajoj, tiu elspezu laŭ tio, kion Allah donis al li. Allah ne postulas de iu animo pli, ol Li mem donis al ĝi. Certe Allah estigos faciligon post la malfeliĉo.

لِيُنْفِقْ ذُوْ سَعَةٍ مِّنْ سَعَتِهٖ ۭ وَمَنْ قُدِرَ عَلَيْهِ
رِزْقُهٗ فَلْيُنْفِقْ مِمَّآ اٰتٰىهُ اللّٰهُ ۭ لَا يُكَلِّفُ اللّٰهُ نَفْسًا
اِلَّا مَآ اٰتٰىهَا ۭ سَيَجْعَلُ اللّٰهُ بَعْدَ عُسْرٍ يُّسْرًا ۝

9. Kiom multaj urboj kontraŭstaris la ordonon de sia Sinjoro kaj de Liaj senditoj, kaj Ni juĝis ilin severe kaj punis ilin per grava puno!

وَكَاَيِّنْ مِّنْ قَرْيَةٍ عَتَتْ عَنْ اَمْرِ رَبِّهَا وَرُسُلِهٖ
فَحَاسَبْنٰهَا حِسَابًا شَدِيْدًا ۙ وَّعَذَّبْنٰهَا عَذَابًا نُّكْرًا ۝
فَذَاقَتْ وَبَالَ اَمْرِهَا وَكَانَ عَاقِبَةُ اَمْرِهَا
خُسْرًا ۝

10. Tiel ili gustumis la malbonajn sekvojn de sia konduto, kaj la fino de ilia konduto estis pereo.

اَعَدَّ اللّٰهُ لَهُمْ عَذَابًا شَدِيْدًا ۙ فَاتَّقُوا اللّٰهَ يٰٓاُولِي
الْاَلْبَابِ ۚ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا ۭ قَدْ اَنْزَلَ اللّٰهُ اِلَيْكُمْ
ذِكْرًا ۝

11. Allah pretigis por ili severan punon, do respektegu Allahon, ho vi gento prudenta, kiu kredas! Vere Allah sendis al vi admonon,

رَّسُوْلًا يَّتْلُوْا عَلَيْكُمْ اٰيٰتِ اللّٰهِ مُبَيِّنٰتٍ لِّيُخْرِجَ
الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ مِنَ الظُّلُمٰتِ اِلَى
النُّوْرِ ۭ وَمَنْ يُّؤْمِنْۢ بِاللّٰهِ وَيَعْمَلْ صَالِحًا يُّدْخِلْهُ
جَنّٰتٍ تَجْرِيْ مِنْ تَحْتِهَا الْاَنْهٰرُ خٰلِدِيْنَ فِيْهَآ اَبَدًا ۭ
قَدْ اَحْسَنَ اللّٰهُ لَهٗ رِزْقًا ۝

12. senditon, kiu proklamas al vi la revelaciojn evidentajn de Allah, por konduki la kredantojn kaj bonfarantojn el la mallumego al la lumo, kaj tiun, kiu kredas je Allah kaj bonfaras, Li kondukos en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj, por ke li restu tie por ĉiam. Allah vere konsentis al li bonegan provizaĵon.

13. Estas Allah Tiu, kiu kreis sep ĉielojn kaj la saman nombron da teroj. La Dia ordono venas inter ilin, por ke vi eksciu, ke Allah havas povon super ĉiuj aferoj, kaj ke certe Allah ĉirkaŭas ĉiujn aĵojn per Sia scio.

اَللّٰهُ الَّذِیْ خَلَقَ سَبْعَ سَمٰوٰتٍ وَّمِنَ الْاَرْضِ مِثْلَهُنَّ ؕ
یَتَنَزَّلُ الْاَمْرُ بَیْنَهُنَّ لِتَعْلَمُوْۤا اَنَّ اللّٰهَ عَلٰی كُلِّ
شَیْءٍ قَدِیْرٌ ۙ۬ وَّاَنَّ اللّٰهَ قَدْ اَحَاطَ بِكُلِّ شَیْءٍ عِلْمًا ﴿۱۲﴾

سُوْرَةُ التَّحْرِیْمِ مَدَنِیَّةٌ

(٦٦) اٰیاتها رکوعاتها

revelaciita en Medino

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ho vi, Profeto! Kial vi malpermesas al vi mem tion, kion Allah permesis al vi? Ĉu vi volas komplezi viajn edzinojn? Allah estas senkulpigema, pardonema.

3. Allah vere konsentis al vi la absolvon de viaj ĵuroj, kaj Allah estas via Protektanto kaj Li estas la Ĉioscia, la Saĝa.

4. Kiam la Profeto konfidis sekreton al iu el siaj edzinoj, kaj ŝi babilis, kaj Allah sciigis tion al li, tiam li sciigis al ŝi iom da ĝi, sed silentis pri io alia. Kiam li do sciigis al ŝi tion, ŝi diris: "Kiu diris tion al vi? ", kaj li respondis: "La Ĉioscia, la Ĉiokona diris tion al mi".

5. Se vi ambaŭ tamen turnas vin pentante al Allah, tiam viaj koroj jam inklinas al tio, sed, se vi reciproke vin subtenas pri tio, vere Allah estas lia Protektanto kaj ankaŭ Gabrielo kaj la justuloj inter la kredantoj, kaj krome estas la anĝeloj liaj helpantoj.

6. Eble lia Sinjoro donos al li pli bonajn edzinojn ol vi estas – kiam li eksedziĝas – submetiĝantajn, kredantajn, obeemajn, pentantajn, piajn, fastantajn – vidvinojn kaj virgulinojn.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِیْمِ ﴿۱﴾
یٰۤاَیُّهَا النَّبِیُّ لِمَ تُحَرِّمُ مَاۤ اَحَلَّ اللّٰهُ لَكَ ۚ تَبْتَغِیْ
مَرْضَاتَ اَزْوَاجِكَ ؕ وَاللّٰهُ غَفُوْرٌ رَّحِیْمٌ ﴿۲﴾
قَدْ فَرَضَ اللّٰهُ لَكُمْ تَحِلَّةَ اَیْمَانِكُمْ ۚ وَاللّٰهُ مَوْلٰىكُمْ ۚ
وَهُوَ الْعَلِیْمُ الْحَكِیْمُ ﴿۳﴾
وَاِذْ اَسَرَّ النَّبِیُّ اِلٰی بَعْضِ اَزْوَاجِهٖ حَدِیْثًا ۚ فَلَمَّا
نَبَّاَتْ بِهٖ وَاَظْهَرَهُ اللّٰهُ عَلَیْهِ عَرَّفَ بَعْضَهٗ وَ
اَعْرَضَ عَنْۢ بَعْضٍ ۚ فَلَمَّا نَبَّاَهَا بِهٖ قَالَتْ مَنْ
اَنْۢبَاَكَ هٰذَا ؕ قَالَ نَبَّاَنِیَ الْعَلِیْمُ الْخَبِیْرُ ﴿۴﴾
اِنْ تَتُوْبَاۤ اِلَی اللّٰهِ فَقَدْ صَغَتْ قُلُوْبُكُمَا ۚ وَاِنْ
تَظٰهَرَا عَلَیْهِ فَاِنَّ اللّٰهَ هُوَ مَوْلٰىهُ وَجِبْرِیْلُ وَ
صَالِحُ الْمُؤْمِنِیْنَ ۚ وَالْمَلٰٓئِكَةُ بَعْدَ ذٰلِكَ ظَهِیْرٌ ﴿۵﴾
عَسٰی رَبُّهٗۤ اِنْ طَلَّقَكُنَّ اَنْ یُّبْدِلَهٗۤ اَزْوَاجًا خَیْرًا
مِّنْكُنَّ مُسْلِمٰتٍ مُّؤْمِنٰتٍ قٰنِتٰتٍ تٰٓئِبٰتٍ عٰبِدٰتٍ
سٰٓئِحٰتٍ ثَیِّبٰتٍ وَّاَبْكَارًا ﴿۶﴾

يَٰٓأَيُّهَا ٱلَّذِينَ ءَامَنُواْ قُوٓاْ أَنفُسَكُمۡ وَأَهۡلِيكُمۡ نَارٗا وَقُودُهَا ٱلنَّاسُ وَٱلۡحِجَارَةُ عَلَيۡهَا مَلَٰٓئِكَةٌ غِلَاظٞ شِدَادٞ لَّا يَعۡصُونَ ٱللَّهَ مَآ أَمَرَهُمۡ وَيَفۡعَلُونَ مَا يُؤۡمَرُونَ ٦

7. Ho vi, kredantoj! Savu vin kaj viajn familiojn de la fajro, kies brulaĵo estas homoj kaj ŝtonoj, super kiu regas anĝeloj fortegaj, severaj, kiuj ne malobeas Allahon pri tio, kion Li ordonas al ili, sed faras, kion Li ordonas.

يَٰٓأَيُّهَا ٱلَّذِينَ كَفَرُواْ لَا تَعۡتَذِرُواْ ٱلۡيَوۡمَۖ إِنَّمَا تُجۡزَوۡنَ مَا كُنتُمۡ تَعۡمَلُونَ ٧

8. Ho vi miskredantoj! Ne prezentu pretekstojn hodiaŭ. Vi estos rekompencitaj nur pro tio, kion vi kutimis fari.

يَٰٓأَيُّهَا ٱلَّذِينَ ءَامَنُواْ تُوبُوٓاْ إِلَى ٱللَّهِ تَوۡبَةٗ نَّصُوحًا عَسَىٰ رَبُّكُمۡ أَن يُكَفِّرَ عَنكُمۡ سَيِّـَٔاتِكُمۡ وَيُدۡخِلَكُمۡ جَنَّٰتٖ تَجۡرِي مِن تَحۡتِهَا ٱلۡأَنۡهَٰرُ يَوۡمَ لَا يُخۡزِي ٱللَّهُ ٱلنَّبِيَّ وَٱلَّذِينَ ءَامَنُواْ مَعَهُۥۖ نُورُهُمۡ يَسۡعَىٰ بَيۡنَ أَيۡدِيهِمۡ وَبِأَيۡمَٰنِهِمۡ يَقُولُونَ رَبَّنَآ أَتۡمِمۡ لَنَا نُورَنَا وَٱغۡفِرۡ لَنَآۖ إِنَّكَ عَلَىٰ كُلِّ شَيۡءٖ قَدِيرٞ ٨

9. Ho vi, kredantoj! Turnu vin al Allah en sincera pento. Eble via Sinjoro forprenos de vi viajn kulpojn kaj kondukos vin en ĝardenojn, sub kiuj fluas riveroj, en la tago en kiu Allah ne ruĝigos la Profeton nek la kredantojn kun li. Ilia lumo antaŭiros al ili kaj al iliaj manoj dekstraj.* Ili diros: "Nia Sinjoro, perfektigu por ni nian lumon kaj pardonu al ni. Vi vere havas povon super ĉiuj aferoj".

يَٰٓأَيُّهَا ٱلنَّبِيُّ جَٰهِدِ ٱلۡكُفَّارَ وَٱلۡمُنَٰفِقِينَ وَٱغۡلُظۡ عَلَيۡهِمۡۚ وَمَأۡوَىٰهُمۡ جَهَنَّمُۖ وَبِئۡسَ ٱلۡمَصِيرُ ٩

10. Ho vi, Profeto! Batalu kontraŭ la miskredantoj kaj la hipokrituloj, kaj estu severa kontraŭ ili. Ilia restadejo estos la Infero. Malbonega estas la destino!

ضَرَبَ ٱللَّهُ مَثَلٗا لِّلَّذِينَ كَفَرُواْ ٱمۡرَأَتَ نُوحٖ وَٱمۡرَأَتَ لُوطٖۖ كَانَتَا تَحۡتَ عَبۡدَيۡنِ مِنۡ عِبَادِنَا صَٰلِحَيۡنِ فَخَانَتَاهُمَا فَلَمۡ يُغۡنِيَا عَنۡهُمَا مِنَ ٱللَّهِ شَيۡـٔٗا وَقِيلَ ٱدۡخُلَا ٱلنَّارَ مَعَ ٱلدَّٰخِلِينَ ١٠

11. Allah proponas al la miskredantoj la ekzemplon de la edzino de Noa kaj de la edzino de Lot. Ambaŭ estis sub du el Niaj justaj servantoj, sed perfidis ilin, tial tiuj neniom utilis al ili antaŭ Allah, kaj al ili estis dirite: "Eniru ambaŭ en la fajron kun tiuj, kiuj eniras! ".

وَضَرَبَ ٱللَّهُ مَثَلٗا لِّلَّذِينَ ءَامَنُواْ ٱمۡرَأَتَ فِرۡعَوۡنَ إِذۡ قَالَتۡ رَبِّ ٱبۡنِ لِي عِندَكَ بَيۡتٗا فِي ٱلۡجَنَّةِ وَنَجِّنِي مِن فِرۡعَوۡنَ وَعَمَلِهِۦ وَنَجِّنِي مِنَ ٱلۡقَوۡمِ ٱلظَّٰلِمِينَ ١١

12. Allah proponas al la kredantoj la ekzemplon de la edzino de Faraono, kiam ŝi diris: "Mia Sinjoro, konstruu por mi domon ĉe Vi en la Paradizo, kaj savu min de Faraono kaj de liaj faroj kaj savu min de la popolo malpiega! "

* ĉirkaŭos ilin

وَمَرْيَمَ ابْنَتَ عِمْرٰنَ الَّتِيْٓ اَحْصَنَتْ فَرْجَهَا
فَنَفَخْنَا فِيْهِ مِنْ رُّوْحِنَا وَصَدَّقَتْ بِكَلِمٰتِ رَبِّهَا
وَكُتُبِهٖ وَكَانَتْ مِنَ الْقٰنِتِيْنَ ﴿١٢﴾

13. kaj la ekzemplon de Maria, la filino de Imrān, kiu gardis sian ĉastecon – tial Ni enblovis en ŝin Nian spiriton – kaj kredis je la vortoj de sia Sinjoro kaj je Liaj Skriboj, kaj estis unu el la obeemaj.

* Fino de la 28-a parto

سُوْرَةُ الْمُلْكِ مَكِّيَّةٌ (٦٧) اٰيَاتُهَا رُكُوْعَاتُهَا

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ﴿١﴾
تَبٰرَكَ الَّذِيْ بِيَدِهِ الْمُلْكُ وَهُوَ عَلٰى كُلِّ شَيْءٍ
قَدِيْرُ ﴿٢﴾
الَّذِيْ خَلَقَ الْمَوْتَ وَالْحَيٰوةَ لِيَبْلُوَكُمْ اَيُّكُمْ
اَحْسَنُ عَمَلًا ۭ وَهُوَ الْعَزِيْزُ الْغَفُوْرُ ﴿٣﴾
الَّذِيْ خَلَقَ سَبْعَ سَمٰوٰتٍ طِبَاقًا ۭ مَا تَرٰى فِيْ
خَلْقِ الرَّحْمٰنِ مِنْ تَفٰوُتٍ ۭ فَارْجِعِ الْبَصَرَ ۙ هَلْ
تَرٰى مِنْ فُطُوْرٍ ﴿٣﴾
ثُمَّ ارْجِعِ الْبَصَرَ كَرَّتَيْنِ يَنْقَلِبْ اِلَيْكَ الْبَصَرُ
خَاسِئًا وَّهُوَ حَسِيْرٌ ﴿٤﴾
وَلَقَدْ زَيَّنَّا السَّمَاۗءَ الدُّنْيَا بِمَصَابِيْحَ وَجَعَلْنٰهَا
رُجُوْمًا لِّلشَّيٰطِيْنِ وَاَعْتَدْنَا لَهُمْ عَذَابَ السَّعِيْرِ ﴿٥﴾
وَلِلَّذِيْنَ كَفَرُوْا بِرَبِّهِمْ عَذَابُ جَهَنَّمَ ۭ وَبِئْسَ
الْمَصِيْرُ ﴿٦﴾

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Estu benata Tiu, en kies mano estas la suvereneco. Li havas povon super ĉiuj aferoj.

3. Tiu, kiu kreis la morton kaj la vivon por elprovi vin, por eksciigi kiu el vi estas la plej bona ĉe la faroj. Li estas la Ĉiopova, la Senkulpigema.

4. Tiu, kiu kreis sep ĉielojn en akordo. Vi ne povas vidi en la kreo de la Donema iun ajn mankon. Turnu do ĉien ajn vian rigardon: ĉu vi vidas iun ajn mankon?

5. Poste turnu vian rigardon ankoraŭ dufoje. Via rigardo nur revenos al vi, lacigita kaj konfuzita.

6. Vere Ni ornamis la plej malsupran ĉielon per lampoj kaj faris el ili ilon por la forpelo de la Satanoj, kaj Ni pretigis por ili la punon de la flamoj.

7. Por tiuj, kiuj ne kredas je sia Sinjoro, estos la puno de l' Infero. Malbonega estas la destino!

إِذَآ أُلْقُوا۟ فِيهَا سَمِعُوا۟ لَهَا شَهِيقًا وَهِىَ تَفُورُ ۝٧

8. Kiam ili estos ĵetitaj en ĝin, ili aŭdos ĝin muĝi, dum ĝi bolas.

تَكَادُ تَمَيَّزُ مِنَ ٱلْغَيْظِ ۖ كُلَّمَآ أُلْقِىَ فِيهَا فَوْجٌ سَأَلَهُمْ خَزَنَتُهَآ أَلَمْ يَأْتِكُمْ نَذِيرٌ ۝٨

9. Ĝi preskaŭ eksplodos pro kolero. Kiam aro da ili estas ĵetita en ĝin, iliaj gardantoj demandas ilin: "Ĉu neniu admonanto venis al vi? ".

قَالُوا۟ بَلَىٰ قَدْ جَآءَنَا نَذِيرٌ فَكَذَّبْنَا وَقُلْنَا مَا نَزَّلَ ٱللَّهُ مِن شَىْءٍ إِنْ أَنتُمْ إِلَّا فِى ضَلَٰلٍ كَبِيرٍ ۝٩

10. Ili respondas: "Jes! Vere venis al ni admonanto, sed ni kulpigis lin pri mensogo kaj diris: Allah neniam sendis vin; vi estas nur en granda eraro".

وَقَالُوا۟ لَوْ كُنَّا نَسْمَعُ أَوْ نَعْقِلُ مَا كُنَّا فِىٓ أَصْحَٰبِ ٱلسَّعِيرِ ۝١٠

11. Kaj ili diros: "Se nur ni estus aŭskultintaj aŭ komprenintaj, ni ne estus inter la loĝantoj de la flamoj".

فَٱعْتَرَفُوا۟ بِذَنۢبِهِمْ ۖ فَسُحْقًا لِّأَصْحَٰبِ ٱلسَّعِيرِ ۝١١

12. Ili konfesos siajn pekojn; malproksime de la graco estas la loĝantoj de la flamoj!

إِنَّ ٱلَّذِينَ يَخْشَوْنَ رَبَّهُم بِٱلْغَيْبِ لَهُم مَّغْفِرَةٌ وَأَجْرٌ كَبِيرٌ ۝١٢

13. Vere por tiuj, kiuj sekrete timas sian Sinjoron, estos pardono kaj granda rekompenco.

وَأَسِرُّوا۟ قَوْلَكُمْ أَوِ ٱجْهَرُوا۟ بِهِۦٓ ۖ إِنَّهُۥ عَلِيمٌۢ بِذَاتِ ٱلصُّدُورِ ۝١٣

14. Ĉu vi kaŝas vian vorton, ĉu vi eldiras ĝin malkaŝe, vere Li konas la internon de la brustoj.

أَلَا يَعْلَمُ مَنْ خَلَقَ وَهُوَ ٱللَّطِيفُ ٱلْخَبِيرُ ۝١٤

15. Ĉu vi do ne konas Tiun, kiu kreis? Li estas la Scianto de la Kaŝitaĵoj, la Ĉiokona.

هُوَ ٱلَّذِى جَعَلَ لَكُمُ ٱلْأَرْضَ ذَلُولًا فَٱمْشُوا۟ فِى مَنَاكِبِهَا وَكُلُوا۟ مِن رِّزْقِهِۦ ۖ وَإِلَيْهِ ٱلنُّشُورُ ۝١٥

16. Estas Li Tiu, kiu igis la teron servi vin, do iru sur ĝiaj vojoj kaj manĝu el Liaj provizaĵoj. Al Li estos la releviĝo.

ءَأَمِنتُم مَّن فِى ٱلسَّمَآءِ أَن يَخْسِفَ بِكُمُ ٱلْأَرْضَ فَإِذَا هِىَ تَمُورُ ۝١٦

17. Ĉu vi estas sekuraj pri Tiu, kiu estas en la ĉielo, ke Li ne igos la teron engluti vin, kiam ĝi komencos tremi?

أَمْ أَمِنتُم مَّن فِى ٱلسَّمَآءِ أَن يُرْسِلَ عَلَيْكُمْ حَاصِبًا ۖ فَسَتَعْلَمُونَ كَيْفَ نَذِيرِ ۝١٧

18. Ĉu vi estas sekuraj pri Tiu, kiu estas en la ĉielo, ke Li ne sendos kontraŭ vin ventegon? Tiam vi ekscios, kia estis Mia admono!

وَلَقَدْ كَذَّبَ ٱلَّذِينَ مِن قَبْلِهِمْ فَكَيْفَ كَانَ نَكِيرِ ۝١٨

أَوَلَمْ يَرَوْا۟ إِلَى ٱلطَّيْرِ فَوْقَهُمْ صَٰٓفَّٰتٍ وَيَقْبِضْنَ ۚ

19. Jam negis tiuj, kiuj estis antaŭ ili; kia estis tiam la sekvo!

مَا يُمْسِكُهُنَّ إِلَّا الرَّحْمَٰنُ ۚ إِنَّهُ بِكُلِّ شَيْءٍ بَصِيرٌ ﴿١٩﴾

20. Ĉu ili ne vidis la birdojn super si mem, kiel ili strecas kaj faldas siajn flugilojn? Nur la Donema subtenas ilin. Vere Li vidas ĉiujn aĵojn.

أَمَّنْ هَٰذَا الَّذِي هُوَ جُندٌ لَّكُمْ يَنصُرُكُم مِّن دُونِ الرَّحْمَٰنِ ۚ إِنِ الْكَافِرُونَ إِلَّا فِي غُرُورٍ ﴿٢٠﴾

21. Aŭ kiu estas tiu, kiu povas esti kvazaŭ tuta armeo por vi, kiu povas helpi vin, krom la Donema? La miskredantoj estas nur en eraro.

أَمَّنْ هَٰذَا الَّذِي يَرْزُقُكُمْ إِنْ أَمْسَكَ رِزْقَهُ ۚ بَل لَّجُّوا فِي عُتُوٍّ وَنُفُورٍ ﴿٢١﴾

22. Aŭ kiu estas tiu, kiu provizas vin, se Li reprenas Sian provizaĵon? Ne! Ili tamen obstinas en sia kontraŭstaremo kaj malobeemo.

أَفَمَن يَمْشِي مُكِبًّا عَلَىٰ وَجْهِهِ أَهْدَىٰ أَمَّن يَمْشِي سَوِيًّا عَلَىٰ صِرَاطٍ مُّسْتَقِيمٍ ﴿٢٢﴾

23. Kiel? Ĉu estas tiu, kiu trenas sin sur sia vizaĵo, pli bone gvidata ol tiu, kiu iras rekte sur la rekta vojo?

قُلْ هُوَ الَّذِي أَنشَأَكُمْ وَجَعَلَ لَكُمُ السَّمْعَ وَالْأَبْصَارَ وَالْأَفْئِدَةَ ۖ قَلِيلًا مَّا تَشْكُرُونَ ﴿٢٣﴾

24. Diru: "Estas Li Tiu, kiu estigis vin kaj donis al vi aŭdadon kaj vidadon kaj koron. Malmultaj tamen estas dankemaj! ".

قُلْ هُوَ الَّذِي ذَرَأَكُمْ فِي الْأَرْضِ وَإِلَيْهِ تُحْشَرُونَ ﴿٢٤﴾

25. Diru: "Estas Li Tiu, kiu multigas vin sur la tero kaj al Li vi estos kunvenigitaj".

وَيَقُولُونَ مَتَىٰ هَٰذَا الْوَعْدُ إِن كُنتُمْ صَادِقِينَ ﴿٢٥﴾

26. Ili diras: "Kiam plenumiĝos tiu ĉi promeso, se vi estas sinceraj? ".

قُلْ إِنَّمَا الْعِلْمُ عِندَ اللَّهِ وَإِنَّمَا أَنَا نَذِيرٌ مُّبِينٌ ﴿٢٦﴾

27. Diru: "Vere la scio pri tio estas nur ĉe Allah. Mi vere estas nur klariga admonanto".

فَلَمَّا رَأَوْهُ زُلْفَةً سِيئَتْ وُجُوهُ الَّذِينَ كَفَرُوا وَقِيلَ هَٰذَا الَّذِي كُنتُم بِهِ تَدَّعُونَ ﴿٢٧﴾

28. Kiam ili tamen vidos ĝin alproksimiĝi, tiam la vizaĝoj de la miskredantoj kuntiriĝos kaj estos dirite: "Estas tio, kion vi kutimis postuli".

قُلْ أَرَأَيْتُمْ إِنْ أَهْلَكَنِيَ اللَّهُ وَمَن مَّعِيَ أَوْ رَحِمَنَا فَمَن يُجِيرُ الْكَافِرِينَ مِنْ عَذَابٍ أَلِيمٍ ﴿٢٨﴾

29. Diru: "Kion vi opinias? Se Allah neniigus min kaj tiujn, kiuj estas kun mi, aŭ se Li kompatus al ni, kiu tiam defendos la miskredantojn kontraŭ la dolora puno? ".

قُلْ هُوَ الرَّحْمَٰنُ آمَنَّا بِهِ وَعَلَيْهِ تَوَكَّلْنَا ۖ فَسَتَعْلَمُونَ مَنْ هُوَ فِي ضَلَالٍ مُّبِينٍ ﴿٢٩﴾

30. Diru: "Li estas la Donema; je Li ni kredas kaj je Li ni konfidas. Baldaŭ vi ekscios, kiu estas tiu, kiu troviĝas en evidenta eraro".

قُلْ أَرَأَيْتُمْ إِنْ أَصْبَحَ مَاؤُكُمْ غَوْرًا فَمَن يَأْتِيكُم بِمَاءٍ مَّعِينٍ ﴿٣٠﴾

31. Diru: "Kion vi opinias? Se via akvo sekiĝus, kiu tiam havigus al vi fluantan akvon? ".

سُوْرَةُ الْقَلَمِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

نٓ وَ الْقَلَمِ وَمَا يَسْطُرُوْنَ ②

2. Per la inkujo kaj per la plumo kaj per tio, kion ili skribas!

مَآ اَنْتَ بِنِعْمَةِ رَبِّكَ بِمَجْنُوْنٍ ③

3. Per la graco de via Sinjoro vi ne estas frenezulo,

وَاِنَّ لَكَ لَاَجْرًا غَيْرَ مَمْنُوْنٍ ④

4. kaj por vi certe estos senfina rekompenco,

وَاِنَّكَ لَعَلٰى خُلُقٍ عَظِيْمٍ ⑤

5. kaj vi certe posedas eminente noblan animon.

فَسَتُبْصِرُ وَيُبْصِرُوْنَ ⑥

6. Vi vidos kaj ili vidos,

بِاَيِّكُمُ الْمَفْتُوْنُ ⑦

7. kiu el vi estas la frenezulo;

اِنَّ رَبَّكَ هُوَ اَعْلَمُ بِمَنْ ضَلَّ عَنْ سَبِيْلِهٖ وَهُوَ اَعْلَمُ بِالْمُهْتَدِيْنَ ⑧

8. vere via Sinjoro scias bone, kiu devojiĝis de Lia afero, kaj Li bone konas la gvidatojn.

فَلَا تُطِعِ الْمُكَذِّبِيْنَ ⑨

9. Tial ne obeu la negantojn;

وَدُّوْا لَوْ تُدْهِنُ فَيُدْهِنُوْنَ ⑩

10. ili dezirus, ke vi estu konsentema al ili, tiam ili ankaŭ estus konsentemaj al vi.

وَلَا تُطِعْ كُلَّ حَلَّافٍ مَّهِيْنٍ ⑪

11. Ne obeu malŝatindan ĵuranton,

هَمَّازٍ مَّشَّآءٍۭ بِنَمِيْمٍ ⑫

12. kalumnianton, kiu disvastigas kalumniojn,

مَّنَّاعٍ لِّلْخَيْرِ مُعْتَدٍ اَثِيْمٍ ⑬

13. malhelpanton de la vero, ekscesanton, pekulon,

عُتُلٍّۭ بَعْدَ ذٰلِكَ زَنِيْمٍ ⑭

14. malbone kondutanton, krome malfidelulon,

اَنْ كَانَ ذَا مَالٍ وَّبَنِيْنَ ⑮

15. nur ĉar li posedas proprajojn kaj filojn.

اِذَا تُتْلٰى عَلَيْهِ اٰيٰتُنَا قَالَ اَسَاطِيْرُ الْاَوَّلِيْنَ ⑯

سَنَسِمُهٗ عَلَى الْخُرْطُوْمِ ⑰

16. Kiam estas proklamataj al li Niaj revelacioj, li diras: "Fabeloj de la prauloj! ".

17. Ni metas neforigeblan signon sur lian nazon.

18. Ni elprovas ilin, kiel Ni elprovis la loĝantojn de l' ĝardeno, kiam ili juris, ke ili rikoltos ĝiajn fruktojn la sekvontan matenon,

19. kaj ne faris iun ajn escepton.*

20. Uragano de via Sinjoro trafis ĝin, dum ili dormis,

21. tiel ke ĝi fariĝis kvazaŭ dezertigita;

22. tiam ili vokis unu la alian la sekvantan matenon:

23. "Iru frumatene sur vian kampon, se vi volas rikolti! "

24. kaj ili ekiris kaj flustris unu al la alia:

25. "Ne eniru ĝin hodiaŭ, por veni al vi, iu ajn malriĉulo! "

26. kaj ili ekiris frumatene, kun la intenco esti avaraj,

27. sed, kiam ili vidis ĝin, ili diris: "Vere ni estas en eraro!

28. Ne! Ni estas prirabitaj! ".

29. Diris la plej bona el ili: "Ĉu mi ne diris al vi: kial vi ne gloregas Dion? ".

30. Nun ili diris: "Sankta estas nia Sinjoro! Vere ni estis malpieguloj! ".

31. Tiam sin turnis iuj el ili al la aliaj, reciproke riproĉante,

إِنَّا بَلَوْنَٰهُمْ كَمَا بَلَوْنَآ أَصْحَٰبَ ٱلْجَنَّةِ إِذْ أَقْسَمُوا۟
لَيَصْرِمُنَّهَا مُصْبِحِينَ ﴿١٧﴾
وَلَا يَسْتَثْنُونَ ﴿١٨﴾
فَطَافَ عَلَيْهَا طَآئِفٌ مِّن رَّبِّكَ وَهُمْ نَآئِمُونَ ﴿١٩﴾
فَأَصْبَحَتْ كَٱلصَّرِيمِ ﴿٢٠﴾
فَتَنَادَوْا۟ مُصْبِحِينَ ﴿٢١﴾
أَنِ ٱغْدُوا۟ عَلَىٰ حَرْثِكُمْ إِن كُنتُمْ صَٰرِمِينَ ﴿٢٢﴾
فَٱنطَلَقُوا۟ وَهُمْ يَتَخَٰفَتُونَ ﴿٢٣﴾
أَن لَّا يَدْخُلَنَّهَا ٱلْيَوْمَ عَلَيْكُم مِّسْكِينٌ ﴿٢٤﴾
وَغَدَوْا۟ عَلَىٰ حَرْدٍ قَٰدِرِينَ ﴿٢٥﴾
فَلَمَّا رَأَوْهَا قَالُوٓا۟ إِنَّا لَضَآلُّونَ ﴿٢٦﴾
بَلْ نَحْنُ مَحْرُومُونَ ﴿٢٧﴾
قَالَ أَوْسَطُهُمْ أَلَمْ أَقُل لَّكُمْ لَوْلَا تُسَبِّحُونَ ﴿٢٨﴾
قَالُوا۟ سُبْحَٰنَ رَبِّنَآ إِنَّا كُنَّا ظَٰلِمِينَ ﴿٢٩﴾
فَأَقْبَلَ بَعْضُهُمْ عَلَىٰ بَعْضٍ يَتَلَٰوَمُونَ ﴿٣٠﴾
قَالُوا۟ يَٰوَيْلَنَآ إِنَّا كُنَّا طَٰغِينَ ﴿٣١﴾
عَسَىٰ رَبُّنَآ أَن يُبْدِلَنَا خَيْرًا مِّنْهَآ إِنَّآ إِلَىٰ رَبِّنَا
رَٰغِبُونَ ﴿٣٢﴾
كَذَٰلِكَ ٱلْعَذَابُ ۖ وَلَعَذَابُ ٱلْءَاخِرَةِ أَكْبَرُ ۘ لَوْ كَانُوا۟
يَعْلَمُونَ ﴿٣٣﴾

* t.e.: ili ne diris: "Se Allah volas! " (In-šâa-llā')

إِنَّ لِلْمُتَّقِينَ عِندَ رَبِّهِمْ جَنَّاتِ النَّعِيمِ ﴿٣٤﴾

32. kaj ili diris: "Ho ve al ni! Ni vere estis ribelemaj!

أَفَنَجْعَلُ الْمُسْلِمِينَ كَالْمُجْرِمِينَ ﴿٣٥﴾

33. Eble nia Sinjoro ŝanĝos por ni pli bonan ĝardenon kontraŭ tiu ĉi; ni vere plorpetas tion de nia Sinjoro".

مَا لَكُمْ كَيْفَ تَحْكُمُونَ ﴿٣٦﴾

أَمْ لَكُمْ كِتَابٌ فِيهِ تَدْرُسُونَ ﴿٣٧﴾

34. Tiel estas la puno, kaj la puno en la vivo venonta estos eĉ pli terura. Se ili nur scius!

إِنَّ لَكُمْ فِيهِ لَمَا تَخَيَّرُونَ ﴿٣٨﴾

أَمْ لَكُمْ أَيْمَانٌ عَلَيْنَا بَالِغَةٌ إِلَىٰ يَوْمِ الْقِيَامَةِ ۙ إِنَّ

لَكُمْ لَمَا تَحْكُمُونَ ﴿٣٩﴾

35. Por la justuloj vere estos ĉe ilia Sinjoro ĝardenoj de feliĉo.

سَلْهُمْ أَيُّهُم بِذَٰلِكَ زَعِيمٌ ﴿٤٠﴾

أَمْ لَهُمْ شُرَكَاءُ ۖ فَلْيَأْتُوا بِشُرَكَائِهِمْ إِن كَانُوا

صَادِقِينَ ﴿٤١﴾

36. Ĉu Ni traktu la submetiĝintojn kiel la kulpulojn?

يَوْمَ يُكْشَفُ عَن سَاقٍ وَيُدْعَوْنَ إِلَى السُّجُودِ فَلَا

يَسْتَطِيعُونَ ﴿٤٢﴾

37. Kion vi havas? Kiel vi juĝas?

خَاشِعَةً أَبْصَارُهُمْ تَرْهَقُهُمْ ذِلَّةٌ ۖ وَقَدْ كَانُوا

يُدْعَوْنَ إِلَى السُّجُودِ وَهُمْ سَالِمُونَ ﴿٤٣﴾

38. Ĉu vi posedas Libron por legi el ĝi,

فَذَرْنِي وَمَن يُكَذِّبُ بِهَٰذَا الْحَدِيثِ ۖ سَنَسْتَدْرِجُهُم

مِّنْ حَيْثُ لَا يَعْلَمُونَ ﴿٤٤﴾

39. ke vi ricevos de ĝi, kion vi deziras?

وَأُمْلِي لَهُمْ ۚ إِنَّ كَيْدِي مَتِينٌ ﴿٤٥﴾

40. Aŭ ĉu vi havas promesojn de Ni, devigajn ĝis la tago de la reviviĝo, ke al vi apartenos tio, kion vi volas?

أَمْ تَسْأَلُهُمْ أَجْرًا فَهُم مِّن مَّغْرَمٍ مُّثْقَلُونَ ﴿٤٦﴾

أَمْ عِندَهُمُ الْغَيْبُ فَهُمْ يَكْتُبُونَ ﴿٤٧﴾

41. Demandu ilin, kiu estas garantianto pri tio!

فَاصْبِرْ لِحُكْمِ رَبِّكَ وَلَا تَكُن كَصَاحِبِ الْحُوتِ

إِذْ نَادَىٰ وَهُوَ مَكْظُومٌ ﴿٤٨﴾

42. Aŭ ĉu ili havas idolojn? Tiam ili alportu siajn idolojn, se ili estas sinceraj.

لَّوْلَا أَن تَدَارَكَهُ نِعْمَةٌ مِّن رَّبِّهِ لَنُبِذَ بِالْعَرَاءِ

43. En la tago, en kiu la aflikto estos evidentigita, kaj estos ordonite al ili, ke ili terenkuŝiĝu, ili ne kapablos fari tion.

44. Iliaj rigardoj estos mallevitaj kaj la honto kovros ilin, ĉar ili estis ordonitaj terenkuŝiĝi, kiam ili bonfartis, sed ili ne obeis.

45. Lasu Min do sola kun tiuj, kiuj negis tiun ĉi Nian vorton. Ni malsuprenirigos ilin, iom post iom, per vojoj, kiujn ili ne konas.

وَهُوَ مَذْمُومٌ ﴿٤٥﴾

46. Ni konsentas al ili prokraston, ĉar Nia projekto estas fiksita.

فَاجْتَبٰهُ رَبُّهُ فَجَعَلَهُ مِنَ الصّٰلِحِيْنَ ﴿٤٦﴾

47. Ĉu vi postulis rekompencon de ili, tiel ke ili nun estas premataj de la ŝarĝo de siaj ŝuldoj?

وَاِنْ يَّكَادُ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا لَيُزْلِقُوْنَكَ بِاَبْصَارِهِمْ
لَمَّا سَمِعُوا الذِّكْرَ وَيَقُوْلُوْنَ اِنَّهٗ لَمَجْنُوْنٌ ﴿٥١﴾

48. Ĉu la Nevideblaĵo estas ĉe ili, tiel ke ili povas skribi Gin?

وَمَا هُوَ اِلَّا ذِكْرٌ لِّلْعٰلَمِيْنَ ﴿٥٢﴾

49. Atendu do pacience la juĝon de via Sinjoro kaj ne estu kiel la loĝanto de la fiŝego, kiam li vokis, afliktita.

50. Se lin ne estus atinginta la graco de lia Sinjoro, li certe estus ĵetita sur dezertan marbordon, humiligita.

51. Lia Sinjoro tamen elektis lin kaj faris lin justulo.

52. Preskaŭ faligus vin la miskredantoj per siaj koleraj rigardoj, kiam ili aŭdas la admonon kaj ili diras: "Vere li estas frenezulo! ".

53. Ĝi tamen estas nur admono por ĉiuj nacioj.

Ĉapitro 69 **Al-Hākka** (La Neeviteblaĵo) 29-a parto

سُوْرَةُ الْحَآقَّةِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ﴿١﴾

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

اَلْحَآقَّةُ ﴿٢﴾

2. La Neeviteblaĵo!

مَا الْحَآقَّةُ ﴿٣﴾

3. Kio estas la Neeviteblaĵo?

وَمَآ اَدْرٰىكَ مَا الْحَآقَّةُ ﴿٤﴾

4. Kio igas vin kompreni, kio estas la Neeviteblaĵo?

كَذَّبَتْ ثَمُوْدُ وَعَادٌۢ بِالْقَارِعَةِ ﴿٥﴾

5. La Tamudoj kaj la Aadanoj negis la tujan malfeliĉon.

فَاَمَّا ثَمُوْدُ فَاُهْلِكُوْا بِالطَّاغِيَةِ ﴿٦﴾

وَأَمَّا عَادٌ فَأُهْلِكُوا بِرِيحٍ صَرْصَرٍ عَاتِيَةٍ ۝٦

سَخَّرَهَا عَلَيْهِمْ سَبْعَ لَيَالٍ وَثَمَانِيَةَ أَيَّامٍ ۙ حُسُومًا ۖ فَتَرَى الْقَوْمَ فِيهَا صَرْعَىٰ كَأَنَّهُمْ أَعْجَازُ

نَخْلٍ خَاوِيَةٍ ۝٧

فَهَلْ تَرَىٰ لَهُمْ مِنْ بَاقِيَةٍ ۝٨

وَجَاءَ فِرْعَوْنُ وَمَنْ قَبْلَهُ وَالْمُؤْتَفِكَاتُ بِالْخَاطِئَةِ ۝٩

فَعَصَوْا رَسُولَ رَبِّهِمْ فَأَخَذَهُمْ أَخْذَةً رَابِيَةً ۝١٠

إِنَّا لَمَّا طَغَى الْمَاءُ حَمَلْنَاكُمْ فِي الْجَارِيَةِ ۝١١

لِنَجْعَلَهَا لَكُمْ تَذْكِرَةً وَتَعِيَهَا أُذُنٌ وَاعِيَةٌ ۝١٢

فَإِذَا نُفِخَ فِي الصُّورِ نَفْخَةٌ وَاحِدَةٌ ۝١٣

وَحُمِلَتِ الْأَرْضُ وَالْجِبَالُ فَدُكَّتَا دَكَّةً وَاحِدَةً ۝١٤

فَيَوْمَئِذٍ وَقَعَتِ الْوَاقِعَةُ ۝١٥

وَانْشَقَّتِ السَّمَاءُ فَهِيَ يَوْمَئِذٍ وَاهِيَةٌ ۝١٦

وَالْمَلَكُ عَلَىٰ أَرْجَائِهَا ۚ وَيَحْمِلُ عَرْشَ رَبِّكَ فَوْقَهُمْ

يَوْمَئِذٍ ثَمَانِيَةٌ ۝١٧

يَوْمَئِذٍ تُعْرَضُونَ لَا تَخْفَىٰ مِنْكُمْ خَافِيَةٌ ۝١٨

فَأَمَّا مَنْ أُوتِيَ كِتَابَهُ بِيَمِينِهِ فَيَقُولُ هَاؤُمُ اقْرَءُوا

كِتَابِيَهْ ۝١٩

إِنِّي ظَنَنْتُ أَنِّي مُلَاقٍ حِسَابِيَهْ ۝٢٠

فَهُوَ فِي عِيشَةٍ رَاضِيَةٍ ۝٢١

فِي جَنَّةٍ عَالِيَةٍ ۝٢٢

قُطُوفُهَا دَانِيَةٌ ۝٢٣

6. Pri tio, kio koncernas la Tamudojn: ili estis neniigitaj per terura fulmotondro.

7. Pri tio, kio koncernas la Aadanojn: ili estis neniigitaj per fortega ventego,

8. kiun Li igis furiozi kontraŭ ili sep noktojn kaj ok tagojn sencese, tiel ke vi estus povinta vidi la popolon, strecitan sur la tero, kvazaŭ ili estus malplenaj trunkoj de daktilpalmoj.

9. Ĉu vi do nun vidis iun ajn restaĵon de ili?

10. Faraono kaj tiuj, kiuj estis antaŭ li, kaj la urboj detruitaj, estis malpiegaj.

11. Ili estis ribelemaj kontraŭ la sendito de ilia propra Sinjoro, tial Li ekkaptis ilin per sufokanta preno.

12. Vere, kiam ŝvelis la akvoj, Ni portis vin per la arkeo,

13. por fari el ĝi admonilon por vi, por ke tenu ĝin ĉiu orelo, kiu kapablas teni ĝin.

14. Kiam estos blovite en la trumpeton per unu blovego,

15. kaj la tero estos levita kune kun la montoj, kaj poste estos elĵetita tute tuje,

16. kaj en tiu tago okazos la okazontaĵo,

17. kaj la ĉielo fendiĝos kaj en tiu tago ĝi disrompiĝos en pecojn,

18. kaj la anĝeloj staros je ĝiaj flankoj, kaj en tiu tago ok anĝeloj portos la Tronon de via Sinjoro.

19. En tiu tago vi estos kunvenigitaj kaj neniu el viaj sekretoj restos kaŝita.

20. Pri tiu, al kiu estos donita la libro de

liaj agoj en la manon dekstran, sciu, ke li diros: "Jen! Legu mian libron!

21. Vere mi ĉiam supozis, ke mi iam renkontos ĉi tiun juĝon".

22. Tiel, li troviĝos en agrabla vivo,

23. en alta ĝardeno,

24. kies fruktoj estos facile atingeblaj:

25. "Manĝu kaj trinku en kvieto pro tio, kion vi faris en la tagoj pasintaj".

26. Pri tiu, al kiu estos donita la libro de liaj agoj en la manon maldekstran, sciu, ke li diros: "Ho! se mi ne estus ricevinta mian libron!

27. Se mi neniam estus eksciinta, kia estas mia juĝo!

28. Ho, se la morto estus neniiginta min!

29. Neniom utilis al mi miaj proprajoj,

30. min forlasis mia povo! ".

31. "Ekprenu kaj ligu lin

32. poste ĵetu lin en la Inferon,

33. poste ligu lin per ĉeno, sepdek kubutojn longa;

34. li ja vere ne kredis je Allah, la Grandega,

35. kaj li neniam invitis por nutri la malriĉulojn,

36. tial ne estas por li hodiaŭ iu ajn amiko

37. nek nutrajo, krom miksajo el akvo kaj sango,

38. kiun manĝas nur la pekuloj".

كُلُوا۟ وَٱشْرَبُوا۟ هَنِيٓـًٔۢا بِمَآ أَسْلَفْتُمْ فِى ٱلْأَيَّامِ
ٱلْخَالِيَةِ ﴿٢٤﴾
وَأَمَّا مَنْ أُوتِىَ كِتَٰبَهُۥ بِشِمَالِهِۦ فَيَقُولُ يَٰلَيْتَنِى
لَمْ أُوتَ كِتَٰبِيَهْ ﴿٢٥﴾
وَلَمْ أَدْرِ مَا حِسَابِيَهْ ﴿٢٦﴾
يَٰلَيْتَهَا كَانَتِ ٱلْقَاضِيَةَ ﴿٢٧﴾
مَآ أَغْنَىٰ عَنِّى مَالِيَهْ ﴿٢٨﴾
هَلَكَ عَنِّى سُلْطَٰنِيَهْ ﴿٢٩﴾
خُذُوهُ فَغُلُّوهُ ﴿٣٠﴾
ثُمَّ ٱلْجَحِيمَ صَلُّوهُ ﴿٣١﴾
ثُمَّ فِى سِلْسِلَةٍ ذَرْعُهَا سَبْعُونَ ذِرَاعًا فَٱسْلُكُوهُ ﴿٣٢﴾
إِنَّهُۥ كَانَ لَا يُؤْمِنُ بِٱللَّهِ ٱلْعَظِيمِ ﴿٣٣﴾
وَلَا يَحُضُّ عَلَىٰ طَعَامِ ٱلْمِسْكِينِ ﴿٣٤﴾
فَلَيْسَ لَهُ ٱلْيَوْمَ هَٰهُنَا حَمِيمٌ ﴿٣٥﴾
وَلَا طَعَامٌ إِلَّا مِنْ غِسْلِينٍ ﴿٣٦﴾
لَّا يَأْكُلُهُۥٓ إِلَّا ٱلْخَٰطِـُٔونَ ﴿٣٧﴾

فَلَآ أُقْسِمُ بِمَا تُبْصِرُونَ ﴿٣٨﴾
وَمَا لَا تُبْصِرُونَ ﴿٣٩﴾
إِنَّهُۥ لَقَوْلُ رَسُولٍ كَرِيمٍ ﴿٤٠﴾
وَمَا هُوَ بِقَوْلِ شَاعِرٍ ۚ قَلِيلًا مَّا تُؤْمِنُونَ ﴿٤١﴾

39. Ne! Mi ĵuras per tio, kion vi vidas

40. kaj per tio, kion vi ne vidas:

41. tio ĉi estas la vorto de nobla sendito,

42. kaj ĝi ne estas la vorto de poeto. Malmulte estas, kion vi kredas!

43. Ĝi ankaŭ ne estas la vorto de divenisto. Malmulte estas, kion vi pripensas!

44. Revelacio de la Sinjoro de l' Universo!

45. Se li tamen estus alskribinta al Ni iujn vortojn,

46. tiam Ni certe estus ekkaptinta lin per Nia mano dekstra,

47. poste Ni estus tranĉinta lian korvejnon,

48. kaj neniu el ili estus povinta haltigi Nin for de li.

49. Vere, ĝi estas admonilo por la justuloj

50. kaj Ni vere scias, ke inter vi estas kelkaj mensoguloj,

51. kaj tio certe estos kaŭzo por malespero por la miskredantoj.

52. Vere, ĝi estas la vero mem,

53. tial gloregu la nomon de via Sinjoro, de la Grandega.

وَلَا بِقَوْلِ كَاهِنٍ ۚ قَلِيلًا مَّا تَذَكَّرُونَ ﴿٤٢﴾

تَنزِيلٌ مِّن رَّبِّ الْعَالَمِينَ ﴿٤٣﴾

وَلَوْ تَقَوَّلَ عَلَيْنَا بَعْضَ الْأَقَاوِيلِ ﴿٤٤﴾

لَأَخَذْنَا مِنْهُ بِالْيَمِينِ ﴿٤٥﴾

ثُمَّ لَقَطَعْنَا مِنْهُ الْوَتِينَ ﴿٤٦﴾

فَمَا مِنكُم مِّنْ أَحَدٍ عَنْهُ حَاجِزِينَ ﴿٤٧﴾

وَإِنَّهُ لَتَذْكِرَةٌ لِّلْمُتَّقِينَ ﴿٤٨﴾

وَإِنَّا لَنَعْلَمُ أَنَّ مِنكُم مُّكَذِّبِينَ ﴿٤٩﴾

وَإِنَّهُ لَحَسْرَةٌ عَلَى الْكَافِرِينَ ﴿٥٠﴾

وَإِنَّهُ لَحَقُّ الْيَقِينِ ﴿٥١﴾

فَسَبِّحْ بِاسْمِ رَبِّكَ الْعَظِيمِ ﴿٥٢﴾

سُورَةُ الْمَعَارِجِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

سَأَلَ سَائِلٌ بِعَذَابٍ وَاقِعٍ ②

2. Demandanto demandas pri la puno, kiu trafos

لِّلْكَافِرِينَ لَيْسَ لَهُ دَافِعٌ ③

3. la miskredantojn – neniu povas malhelpi ĝin –

مِّنَ اللهِ ذِي الْمَعَارِجِ ④

4. de Allah, la Majstro de la ĉieliro.

تَعْرُجُ الْمَلَائِكَةُ وَالرُّوحُ إِلَيْهِ فِي يَوْمٍ كَانَ مِقْدَارُهُ خَمْسِينَ أَلْفَ سَنَةٍ ⑤

5. Al Li supreniras la anĝeloj kaj la spirito en tago, kies daŭro estos kvindekmil jaroj;

فَاصْبِرْ صَبْرًا جَمِيلًا ⑥

6. tial persistu en konvena pacienco.

إِنَّهُمْ يَرَوْنَهُ بَعِيدًا ⑦

7. Ili supozas, ke ĝi estas malproksima,

وَنَرَاهُ قَرِيبًا ⑧

8. sed Ni vidas: ĝi estas proksima.

يَوْمَ تَكُونُ السَّمَاءُ كَالْمُهْلِ ⑨

9. En la tago, en kiu la ĉielo estos kvazaŭ fandita ferŝtono,

وَتَكُونُ الْجِبَالُ كَالْعِهْنِ ⑩

10. kaj la montoj estos kvazaŭ tinkturitaj lanflokoj,

وَلَا يَسْأَلُ حَمِيمٌ حَمِيمًا ⑪

11. kaj neniu amiko demandos pri la amiko.

يُبَصَّرُونَهُمْ يَوَدُّ الْمُجْرِمُ لَوْ يَفْتَدِي مِنْ عَذَابِ يَوْمِئِذٍ بِبَنِيهِ ⑫

12. Ili estos kunvenigitaj tiel, ke ili vidos unu la alian, kaj la kulpulo volos elaĉeti sin de la puno en tiu tago per fordono de siaj filoj

وَصَاحِبَتِهِ وَأَخِيهِ ⑬

13. kaj de sia edzino kaj de sia frato

وَفَصِيلَتِهِ الَّتِي تُؤْوِيهِ ⑭

14. kaj de sia tribo, kiu gastigis lin

وَمَن فِي الْأَرْضِ جَمِيعًا ثُمَّ يُنجِيهِ ⑮

15. kaj de ĉiuj, kiuj estas sur la tero, dezirante, ke tio savu lin mem.

كَلَّا إِنَّهَا لَظَىٰ ⑯

نَزَّاعَةً لِّلشَّوَىٰ ⑰

* v. la verson 4an

16. Ne! Ĝi estas fajro flamanta,

17. kiu senhaŭtigos iliajn kraniojn.

18. Ĝi vokos tiujn, kiuj turnis sin for kaj malproksimiĝis de la vero

19. kaj amasigis kaj fariĝis avaraj.

20. Vere la homo estis kreita avida;

21. kiam lin trafas malfeliĉo, li plendas,

22. kaj kiam lin trafas feliĉo, li fariĝas malvirta.

23. Alie estas la preĝantoj,

24. tiuj, kiuj estas persistaj je la preĝo,

25. kaj tiuj, en kies propraĵoj estas parto destinita

26. por la almozulo kaj por la malriĉulo hontema.

27. Tiuj, kiuj sincere proklamas vera la tagon de la lasta juĝo,

28. kaj tiuj, kiuj timas la punon de sia Sinjoro,

29. – vere kontraŭ la puno de sia Sinjoro neniu estas sekura –

30. kaj kiuj gardas sian ĉastecon,

31. krom rilate al siaj edzinoj aŭ al tiuj, kiujn posedas ilia mano dekstra: ili ne estas riproĉindaj.

32. Tiuj tamen, kiuj strebas al pli ol tio, estas ekscesantoj.

33. Tiuj, kiuj respektas tion, kio estis konfidita al ili, kaj sian aliancon,

34. kaj tiuj, kiuj estas sinceraj je siaj atestaĵoj,

تَدْعُوا۟ مَنْ أَدْبَرَ وَتَوَلَّىٰ ﴿١٧﴾

وَجَمَعَ فَأَوْعَىٰٓ ﴿١٨﴾

إِنَّ ٱلْإِنسَٰنَ خُلِقَ هَلُوعًا ﴿١٩﴾

إِذَا مَسَّهُ ٱلشَّرُّ جَزُوعًا ﴿٢٠﴾

وَإِذَا مَسَّهُ ٱلْخَيْرُ مَنُوعًا ﴿٢١﴾

إِلَّا ٱلْمُصَلِّينَ ﴿٢٢﴾

ٱلَّذِينَ هُمْ عَلَىٰ صَلَاتِهِمْ دَآئِمُونَ ﴿٢٣﴾

وَٱلَّذِينَ فِىٓ أَمْوَٰلِهِمْ حَقٌّ مَّعْلُومٌ ﴿٢٤﴾

لِّلسَّآئِلِ وَٱلْمَحْرُومِ ﴿٢٥﴾

وَٱلَّذِينَ يُصَدِّقُونَ بِيَوْمِ ٱلدِّينِ ﴿٢٦﴾

وَٱلَّذِينَ هُم مِّنْ عَذَابِ رَبِّهِم مُّشْفِقُونَ ﴿٢٧﴾

إِنَّ عَذَابَ رَبِّهِمْ غَيْرُ مَأْمُونٍ ﴿٢٨﴾

وَٱلَّذِينَ هُمْ لِفُرُوجِهِمْ حَٰفِظُونَ ﴿٢٩﴾

إِلَّا عَلَىٰٓ أَزْوَٰجِهِمْ أَوْ مَا مَلَكَتْ أَيْمَٰنُهُمْ فَإِنَّهُمْ غَيْرُ مَلُومِينَ ﴿٣٠﴾

فَمَنِ ٱبْتَغَىٰ وَرَآءَ ذَٰلِكَ فَأُو۟لَٰٓئِكَ هُمُ ٱلْعَادُونَ ﴿٣١﴾

وَٱلَّذِينَ هُمْ لِأَمَٰنَٰتِهِمْ وَعَهْدِهِمْ رَٰعُونَ ﴿٣٢﴾

وَٱلَّذِينَ هُم بِشَهَٰدَٰتِهِمْ قَآئِمُونَ ﴿٣٣﴾

وَٱلَّذِينَ هُمْ عَلَىٰ صَلَاتِهِمْ يُحَافِظُونَ ﴿٣٤﴾

أُو۟لَٰٓئِكَ فِى جَنَّٰتٍ مُّكْرَمُونَ ﴿٣٥﴾

فَمَالِ الَّذِينَ كَفَرُوا قِبَلَكَ مُهْطِعِينَ ﴿٣٥﴾

35. kaj tiuj, kiuj plenumas sian preĝon,

عَنِ الْيَمِينِ وَعَنِ الشِّمَالِ عِزِينَ ﴿٣٦﴾

36. estos en ĝardenoj, honorigitaj.

أَيَطْمَعُ كُلُّ امْرِئٍ مِّنْهُمْ أَن يُدْخَلَ جَنَّةَ نَعِيمٍ ﴿٣٧﴾

37. Kio tamen estas pri la miskredantoj, kiuj kuras al vi

كَلَّا ۖ إِنَّا خَلَقْنَاهُم مِّمَّا يَعْلَمُونَ ﴿٣٨﴾

38. de la dekstra kaj de la maldekstra flanko, en vicoj?

فَلَا أُقْسِمُ بِرَبِّ الْمَشَارِقِ وَالْمَغَارِبِ إِنَّا لَقَادِرُونَ ﴿٣٩﴾

39. Ĉu esperas ĉiu el ili, ke ili estos enirigitaj en la ĝardenon de la feliĉo?

عَلَىٰ أَن نُّبَدِّلَ خَيْرًا مِّنْهُمْ وَمَا نَحْنُ بِمَسْبُوقِينَ ﴿٤٠﴾

40. Neniam! Ni kreis ilin, por ke ili sciu,

فَذَرْهُمْ يَخُوضُوا وَيَلْعَبُوا حَتَّىٰ يُلَاقُوا يَوْمَهُمُ الَّذِي يُوعَدُونَ ﴿٤١﴾

41. sed ne! Mi ĵuras per la Sinjoro de la Orientoj kaj de la Okcidentoj, ke Ni povas

يَوْمَ يَخْرُجُونَ مِنَ الْأَجْدَاثِ سِرَاعًا كَأَنَّهُمْ إِلَىٰ نُصُبٍ يُوفِضُونَ ﴿٤٢﴾

42. estigi aliajn pli bonajn anstataŭ ili, kaj neniu povus malhelpi Nin fari tion.

خَاشِعَةً أَبْصَارُهُمْ تَرْهَقُهُمْ ذِلَّةٌ ۚ ذَٰلِكَ الْيَوْمُ الَّذِي كَانُوا يُوعَدُونَ ﴿٤٣﴾

43. Lasu ilin do disputi vane kaj amuziĝi, ĝis ili renkontos la tagon, pri kiu estis minacite al ili,

44. la tagon, en kiu ili eliros el siaj tomboj en urĝo, kvazaŭ ili rapidus al iu celo.

45. Iliaj rigardoj estos mallevitaj, la honto kovros ilin. Tiu estos la tago, pri kiu estis minacite al ili.

سُوْرَة نُوْح مَكِّيَّة

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

إِنَّآ أَرْسَلْنَا نُوْحًا إِلٰى قَوْمِهٖٓ أَنْ أَنْذِرْ قَوْمَكَ مِنْ
قَبْلِ أَنْ يَّأْتِيَهُمْ عَذَابٌ أَلِيْمٌ ②

2. Vere Ni sendis Noan al lia popolo: "Admonu vian popolon, antaŭ ol venos sur ĝin dolora puno".

قَالَ يٰقَوْمِ إِنِّيْ لَكُمْ نَذِيْرٌ مُّبِيْنٌ ③

3. Li diris: "Ho mia popolo! Mi vere estas por vi klariga admonanto,

أَنِ اعْبُدُوا اللّٰهَ وَاتَّقُوْهُ وَأَطِيْعُوْنِ ④

4. por ke vi adoru Allahon kaj respektegu Lin kaj obeu min.

يَغْفِرْ لَكُمْ مِّنْ ذُنُوْبِكُمْ وَيُؤَخِّرْكُمْ إِلٰٓى أَجَلٍ
مُّسَمًّى ۚ إِنَّ أَجَلَ اللّٰهِ إِذَا جَآءَ لَا يُؤَخَّرُ ۘ لَوْ كُنْتُمْ
تَعْلَمُوْنَ ⑤

5. Li pardonos al vi viajn pekojn kaj konsentos al vi prokraston, ĝis fiksita limtempo. Vere la limtempo de Allah, kiam ĝi venas, ne plu povas esti prokrastata – se vi nur scius!"

قَالَ رَبِّ إِنِّيْ دَعَوْتُ قَوْمِيْ لَيْلًا وَّنَهَارًا ⑥

6. Li diris: "Mia Sinjoro, mi vere vokis mian popolon, nokte kaj tage,

فَلَمْ يَزِدْهُمْ دُعَآءِيْٓ إِلَّا فِرَارًا ⑦

7. sed mia vokado nur pliigis ilian malŝatemon.

وَإِنِّيْ كُلَّمَا دَعَوْتُهُمْ لِتَغْفِرَ لَهُمْ جَعَلُوْٓا أَصَابِعَهُمْ
فِيْٓ أٰذَانِهِمْ وَاسْتَغْشَوْا ثِيَابَهُمْ وَأَصَرُّوْا وَاسْتَكْبَرُوا
اسْتِكْبَارًا ⑧

8. Ĉiam, kiam mi vokis ilin, dirante, ke Vi pardonos al ili, ili metis siajn fingrojn en siajn orelojn kaj implikis sin per siaj vestaĵoj kaj persistis je l' peko kaj fariĝis ege arogantaj.

ثُمَّ إِنِّيْ دَعَوْتُهُمْ جِهَارًا ⑨

9. Poste mi vere vokis ilin malkaŝe,

ثُمَّ إِنِّيْٓ أَعْلَنْتُ لَهُمْ وَأَسْرَرْتُ لَهُمْ إِسْرَارًا ⑩

10. poste mi vere predikis al ili publike, kaj parolis ankaŭ al ili sekrete,

فَقُلْتُ اسْتَغْفِرُوْا رَبَّكُمْ إِنَّهٗ كَانَ غَفَّارًا ⑪

11. kaj mi diris: "Petu pardonon de via Sinjoro. Vere Li kutimas esti senkulpigema,

يُّرْسِلِ السَّمَآءَ عَلَيْكُمْ مِّدْرَارًا ⑫
وَّيُمْدِدْكُمْ بِأَمْوَالٍ وَّبَنِيْنَ وَيَجْعَلْ لَّكُمْ جَنّٰتٍ
وَّيَجْعَلْ لَّكُمْ أَنْهٰرًا ⑬

12. Li sendos pluvon sur vin, abundan,

مَا لَكُمْ لَا تَرْجُونَ لِلّٰهِ وَقَارًا ﴿١٣﴾

13. kaj Li plifortigos vin je la proprafoj kaj je la filoj, kaj donos al vi ĝardenojn, kaj estigos por vi riverojn.

وَقَدْ خَلَقَكُمْ أَطْوَارًا ﴿١٤﴾

14. Kio estas ĉe vi, ke vi ne atendas por ricevi saĝecon de Allah?

أَلَمْ تَرَوْا كَيْفَ خَلَقَ اللّٰهُ سَبْعَ سَمٰوٰتٍ طِبَاقًا ﴿١٥﴾

15. Li tamen kreis vin laŭ diversaj rangoj.

وَجَعَلَ الْقَمَرَ فِيهِنَّ نُورًا وَجَعَلَ الشَّمْسَ سِرَاجًا ﴿١٦﴾

16. Ĉu vi ne vidis, kiel Allah kreis sep ĉielojn en akordo,

وَاللّٰهُ أَنْبَتَكُمْ مِنَ الْأَرْضِ نَبَاتًا ﴿١٧﴾

17. kaj metis en ilin la lunon kiel lumon kaj la sunon kiel lampon?

ثُمَّ يُعِيدُكُمْ فِيهَا وَيُخْرِجُكُمْ إِخْرَاجًا ﴿١٨﴾

18. Allah igis vin kreski el la tero kvazaŭ kreskafoj,

وَاللّٰهُ جَعَلَ لَكُمُ الْأَرْضَ بِسَاطًا ﴿١٩﴾

19. poste Li igos vin reiri en ĝin, kaj igos vin reeliri en nova naskiĝo.

لِتَسْلُكُوا مِنْهَا سُبُلًا فِجَاجًا ﴿٢٠﴾

20. Allah faris por vi la teron vasta ebenajo,

قَالَ نُوحٌ رَبِّ إِنَّهُمْ عَصَوْنِي وَاتَّبَعُوا مَنْ لَمْ يَزِدْهُ مَالُهُ وَوَلَدُهُ إِلَّا خَسَارًا ﴿٢١﴾

21. por ke vi povu iri sur ĝi, sur larĝaj vojoj."

وَمَكَرُوا مَكْرًا كُبَّارًا ﴿٢٢﴾

22. Noa plue diris: "Mia Sinjoro, ili ne obeis min, sed sekvis iun ulon, kies proprafoj kaj filoj nur pliigis lian malgajnon,

وَقَالُوا لَا تَذَرُنَّ آلِهَتَكُمْ وَلَا تَذَرُنَّ وَدًّا وَلَا سُوَاعًا وَلَا يَغُوثَ وَيَعُوقَ وَنَسْرًا ﴿٢٣﴾

23. kaj ili komplotis per terura konspiro,

وَقَدْ أَضَلُّوا كَثِيرًا وَلَا تَزِدِ الظّٰلِمِينَ إِلَّا ضَلٰلًا ﴿٢٤﴾

24. kaj parolas tiel: "Ne forlasu viajn Diojn, ne forlasu Vadon nek Suvan, nek Jaguson nek Ja'ukon nek Nasron",*

مِمَّا خَطِيٰٓئَاتِهِمْ أُغْرِقُوا فَأُدْخِلُوا نَارًا فَلَمْ يَجِدُوا لَهُمْ مِنْ دُونِ اللّٰهِ أَنْصَارًا ﴿٢٥﴾

25. ili vere devojigis multajn, tial vi plifortigu la erarantojn nur je ilia erarado"."

وَقَالَ نُوحٌ رَبِّ لَا تَذَرْ عَلَى الْأَرْضِ مِنَ الْكٰفِرِينَ دَيَّارًا ﴿٢٦﴾

26. Pro iliaj pekoj ili estis dronigitaj, kaj kondukitaj en la fajron, kaj ili ne kapablis trovi helpanton kontraŭ Allah.

إِنَّكَ إِنْ تَذَرْهُمْ يُضِلُّوا عِبَادَكَ وَلَا يَلِدُوا إِلَّا فَاجِرًا كَفَّارًا ﴿٢٧﴾

27. Noa diris: "Mia Sinjoro, ne postlasu sur la tero eĉ unu solan miskredanton;

* Antaŭislamaj diversspecaj idoloj

رَبِّ اغْفِرْ لِي وَلِوَالِدَيَّ وَلِمَنْ دَخَلَ بَيْتِيَ مُؤْمِنًا وَّ
لِلْمُؤْمِنِينَ وَالْمُؤْمِنٰتِ وَلَا تَزِدِ الظّٰلِمِينَ اِلَّا تَبَارًا ۝٢٨

28. se Vi fakte lasus ilin, ili devojigus Viajn servantojn kaj naskus nur malpiegan idaron de obstinaj miskredantoj;

29. mia Sinjoro, pardonu al mi kaj al miaj gepatroj kaj al tiu, kiu eniras kiel kredanto mian domon, kaj al la kredantoj kaj al la kredantinoj, kaj ne konsentu al la malpieguloj ion alian ol pereon".

Ĉapitro 72 Al-Ĵinn (La Ĝinnoj) 29-a parto

سُوْرَةُ الْجِنِّ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ۝١

قُلْ اُوْحِيَ اِلَيَّ اَنَّهُ اسْتَمَعَ نَفَرٌ مِّنَ الْجِنِّ فَقَالُوْٓا
اِنَّا سَمِعْنَا قُرْاٰنًا عَجَبًا ۝٢

يَّهْدِيْٓ اِلَى الرُّشْدِ فَاٰمَنَّا بِهٖ وَلَنْ نُّشْرِكَ بِرَبِّنَآ
اَحَدًا ۝٣

وَّاَنَّهٗ تَعٰلٰى جَدُّ رَبِّنَا مَا اتَّخَذَ صَاحِبَةً وَّلَا وَلَدًا ۝٤

وَّاَنَّهٗ كَانَ يَقُوْلُ سَفِيْهُنَا عَلَى اللّٰهِ شَطَطًا ۝٥

وَّاَنَّا ظَنَنَّآ اَنْ لَّنْ تَقُوْلَ الْاِنْسُ وَالْجِنُّ عَلَى اللّٰهِ
كَذِبًا ۝٦

وَّاَنَّهٗ كَانَ رِجَالٌ مِّنَ الْاِنْسِ يَعُوْذُوْنَ بِرِجَالٍ
مِّنَ الْجِنِّ فَزَادُوْهُمْ رَهَقًا ۝٦

وَّاَنَّهُمْ ظَنُّوْا كَمَا ظَنَنْتُمْ اَنْ لَّنْ يَّبْعَثَ اللّٰهُ اَحَدًا ۝٧

وَّاَنَّا لَمَسْنَا السَّمَآءَ فَوَجَدْنٰهَا مُلِئَتْ حَرَسًا
شَدِيْدًا وَّشُهُبًا ۝٨

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Diru: "Estis revelaciite al mi, ke grupo de Ĝinnoj* aŭskultis; ili diris:" Ni vere aŭskultis mirindan Koranon,

3. kiu gvidas al la justeco, kaj ni kredas al ĝi kaj ni neniam aldonos iun rivalon al nia Sinjoro;

4. la majesteco de nia Sinjoro vere estas eminenta, kaj Li prenis al Si nek edzinon nek filon.

5. Vere la malprudentuloj el ni kutimis diri kontraŭ Allah grandan mensogon,

6. kvankam ni supozis, ke nek homoj nek Ĝinnoj iam eldiros mensogon kontraŭ Allah.

7. Certe kutimis iuj el la homoj serĉi refugon ĉe iuj el la Ĝinnoj, tiel ke ĉi tiuj pliigis ilin je ilia malpiegeco.

8. Certe ili supozis, ke Allah neniam vekos iun ajn profeton.

* Grupo de Judoj kiuj venis kaŝe de Nasibajn (Irak) por aŭskulti la Profeton. La nomo Ĝinnoj signifas ĉi tie, ke temis pri superuloj.

9. Ni provis atingi la ĉielon, sed ni trovis ĝin plena de fortaj gardantoj kaj de brilegantaj flamoj.

وَّاَنَّا كُنَّا نَقْعُدُ مِنْهَا مَقَاعِدَ لِلسَّمْعِ فَمَنْ يَّسْتَمِعِ الْاٰنَ يَجِدْ لَهٗ شِهَابًا رَّصَدًا ۙ﴿۹﴾

10. Ni kutimis sidi sur seĝoj por aŭskulti. Kiu tamen nun aŭskultas, tiu trovas flamon brilegantan por si mem, en embusko.

وَّاَنَّا لَا نَدْرِيْٓ اَشَرٌّ اُرِيْدَ بِمَنْ فِي الْاَرْضِ اَمْ اَرَادَ بِهِمْ رَبُّهُمْ رَشَدًا ۙ﴿۱۰﴾

11. Ni ne scias, ĉu estas destinita malbono por tiuj, kiuj estas sur la tero, aŭ ĉu ilia Sinjoro intencas la bonon por ili.

وَّاَنَّا مِنَّا الصّٰلِحُوْنَ وَمِنَّا دُوْنَ ذٰلِكَ ۭ كُنَّا طَرَاۗىِٕقَ قِدَدًا ۙ﴿۱۱﴾

12. Iuj el ni estas bonfarantoj, kaj iuj el ni estas malproksimaj de tio. Inter ni ekzistas diversaj sektoj.

وَّاَنَّا ظَنَنَّآ اَنْ لَّنْ نُّعْجِزَ اللّٰهَ فِي الْاَرْضِ وَلَنْ نُّعْجِزَهٗ هَرَبًا ۙ﴿۱۲﴾

13. Ni scias, ke ni neniam kapablos malhelpi Allahon sur la tero, nek savi nin de Li per fuĝo.

وَّاَنَّا لَمَّا سَمِعْنَا الْهُدٰٓى اٰمَنَّا بِهٖ ۭ فَمَنْ يُّؤْمِنْۢ بِرَبِّهٖ فَلَا يَخَافُ بَخْسًا وَّلَا رَهَقًا ۙ﴿۱۳﴾

14. Kiam ni aŭdis pri la gvidilo, ni kredis al ĝi, kaj tiu, kiu kredas je sia Sinjoro, ne timas malgajnon nek maljustecon.

وَّاَنَّا مِنَّا الْمُسْلِمُوْنَ وَمِنَّا الْقٰسِطُوْنَ ۭ فَمَنْ اَسْلَمَ فَاُولٰۗىِٕكَ تَحَرَّوْا رَشَدًا ۝﴿۱۴﴾

15. Inter ni iuj estas submetiĝintoj, kaj aliaj malproksimiĝis de la vero". Tiuj, kiuj submetiĝis, vere trovis la rektan vojon.

وَاَمَّا الْقٰسِطُوْنَ فَكَانُوْا لِجَهَنَّمَ حَطَبًا ۙ﴿۱۵﴾

16. Tiuj tamen, kiuj malproksimiĝis de la vero, estos brulaĵo de l' Infero".

وَّاَنْ لَّوِ اسْتَقَامُوْا عَلَي الطَّرِيْقَةِ لَاَسْقَيْنٰهُمْ مَّاۗءً غَدَقًا ۙ﴿۱۶﴾

17. Al tiuj, kiuj sekvas la rektan vojon, Ni donos abundan akvon por trinki,

لِّنَفْتِنَهُمْ فِيْهِ ۭ وَمَنْ يُّعْرِضْ عَنْ ذِكْرِ رَبِّهٖ يَسْلُكْهُ عَذَابًا صَعَدًا ۙ﴿۱۷﴾

18. por elprovi ilin per ĝi. Kiu tiam turnas sin for de la admono de sia Sinjoro, tiun Li sendos al puno kruela.

وَّاَنَّ الْمَسٰجِدَ لِلّٰهِ فَلَا تَدْعُوْا مَعَ اللّٰهِ اَحَدًا ۙ﴿۱۸﴾

19. Ĉiuj moskeoj apartenas al Allah, tial ne alvoku iun alian, ol Allahon.

وَّاَنَّهٗ لَمَّا قَامَ عَبْدُ اللّٰهِ يَدْعُوْهُ كَادُوْا يَكُوْنُوْنَ عَلَيْهِ لِبَدًا ۝﴿۱۹﴾

20. Kiam stariĝas la servanto de Allah por preĝi, ili amasiĝas ĉirkaŭ li, tiel ke ili preskaŭ sufokas lin.

قُلْ اِنَّمَآ اَدْعُوْا رَبِّيْ وَلَآ اُشْرِكُ بِهٖٓ اَحَدًا ﴿۲۰﴾

21. Diru: "Mi nur vokas mian Sinjoron kaj ne aldonas al Li iun ajn rivalon".

22. Diru: "Mi ne havas povon por utili aŭ malutili al vi".

23. Diru: "Vere, neniu povos protekti min kontraŭ Allah kaj neniam mi trovos rifuĝon krom ĉe Li.

24. Mia ofico estas nur la transdono de la revelacio de Allah kaj de Liaj senditaĵoj". Por tiu, kiu kontraŭstaras Allahon kaj Lian senditon, estos la fajro de l' Infero, tie li restos por ĉiam.

25. Kiam ili vidos tion, pri kio estis minacite al ili, tiam ili ekscios, kiu estas malforta je helpantoj kaj malgrandnombra.

26. Diru: "Mi ne scias, ĉu tio, pri kio estis minacite al vi, estas proksima, aŭ ĉu mia Sinjoro difinis por ĝi malproksiman limtempon".

27. La Scianto de la Nevideblaĵo – Li al neniu malkaŝas Siajn sekretojn,

28. krom al tiu, kiun Li mem elektas, al sendito, antaŭ kiu kaj malantaŭ kiu Li igas marŝi taĉmenton de anĝeloj,

29. por ke li sciu, ke vere ili anoncis la vortojn de sia Sinjoro. Li ĉirkaŭas ĉion, kio estas ĉe ili, kaj Li registras ĉiujn aferojn.

قُلْ إِنِّي لَآ أَمْلِكُ لَكُمْ ضَرًّا وَلَا رَشَدًا ﴿٢١﴾

قُلْ إِنِّي لَن يُجِيرَنِي مِنَ اللَّهِ أَحَدٌ وَلَنْ أَجِدَ

مِن دُونِهِ مُلْتَحَدًا ﴿٢٢﴾

إِلَّا بَلَٰغًا مِّنَ اللَّهِ وَرِسَٰلَٰتِهِۦ ۚ وَمَن يَعْصِ اللَّهَ وَ

رَسُولَهُۥ فَإِنَّ لَهُۥ نَارَ جَهَنَّمَ خَٰلِدِينَ فِيهَآ أَبَدًا ﴿٢٣﴾

حَتَّىٰٓ إِذَا رَأَوْا مَا يُوعَدُونَ فَسَيَعْلَمُونَ مَنْ

أَضْعَفُ نَاصِرًا وَأَقَلُّ عَدَدًا ﴿٢٤﴾

قُلْ إِنْ أَدْرِيٓ أَقَرِيبٌ مَّا تُوعَدُونَ أَمْ يَجْعَلُ لَهُۥ

رَبِّيٓ أَمَدًا ﴿٢٥﴾

عَٰلِمُ ٱلْغَيْبِ فَلَا يُظْهِرُ عَلَىٰ غَيْبِهِۦٓ أَحَدًا ﴿٢٦﴾

إِلَّا مَنِ ٱرْتَضَىٰ مِن رَّسُولٍ فَإِنَّهُۥ يَسْلُكُ مِنۢ بَيْنِ

يَدَيْهِ وَمِنْ خَلْفِهِۦ رَصَدًا ﴿٢٧﴾

لِّيَعْلَمَ أَن قَدْ أَبْلَغُوا۟ رِسَٰلَٰتِ رَبِّهِمْ وَأَحَاطَ بِمَا

لَدَيْهِمْ وَأَحْصَىٰ كُلَّ شَىْءٍ عَدَدًا ﴿٢٨﴾

سُورَةُ الْمُزَّمِّلِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ①

يَا أَيُّهَا الْمُزَّمِّلُ ②

قُمِ اللَّيْلَ إِلَّا قَلِيلًا ③

نِّصْفَهُ أَوِ انقُصْ مِنْهُ قَلِيلًا ④

أَوْ زِدْ عَلَيْهِ وَرَتِّلِ الْقُرْآنَ تَرْتِيلًا ⑤

إِنَّا سَنُلْقِي عَلَيْكَ قَوْلًا ثَقِيلًا ⑥

إِنَّ نَاشِئَةَ اللَّيْلِ هِيَ أَشَدُّ وَطْئًا وَأَقْوَمُ قِيلًا ⑦

إِنَّ لَكَ فِي النَّهَارِ سَبْحًا طَوِيلًا ⑧

وَاذْكُرِ اسْمَ رَبِّكَ وَتَبَتَّلْ إِلَيْهِ تَبْتِيلًا ⑨

رَّبُّ الْمَشْرِقِ وَالْمَغْرِبِ لَا إِلَٰهَ إِلَّا هُوَ فَاتَّخِذْهُ وَكِيلًا ⑩

وَاصْبِرْ عَلَىٰ مَا يَقُولُونَ وَاهْجُرْهُمْ هَجْرًا جَمِيلًا ⑪

وَذَرْنِي وَالْمُكَذِّبِينَ أُولِي النَّعْمَةِ وَمَهِّلْهُمْ قَلِيلًا ⑫

إِنَّ لَدَيْنَا أَنكَالًا وَجَحِيمًا ⑬

وَطَعَامًا ذَا غُصَّةٍ وَعَذَابًا أَلِيمًا ⑭

يَوْمَ تَرْجُفُ الْأَرْضُ وَالْجِبَالُ وَكَانَتِ الْجِبَالُ كَثِيبًا مَّهِيلًا ⑮

إِنَّا أَرْسَلْنَا إِلَيْكُمْ رَسُولًا شَاهِدًا عَلَيْكُمْ كَمَا أَرْسَلْنَا إِلَىٰ فِرْعَوْنَ رَسُولًا ⑯

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ho vi, mantelkovrito!

3. Staru en preĝo preskaŭ la tutan nokton

4. escepte la duonon, aŭ eĉ malpliigu la escepton,

5. aŭ pliigu ĝin malmulte kaj eldiru la Koranon pripensante, malrapide.

6. Ni vere ŝarĝas vin per peza vorto.

7. Vere la komenco de la nokto estas la plej taŭga tempo por memdisciplino kaj por sincera eldiro;

8. certe dum la tago vi estas longtempe okupita.

9. Memoru la nomon de via Sinjoro kaj dediĉu vin al Li sindone;

10. la Sinjoro de la Oriento kaj de la Okcidento. Ne ekzistas alia Dio ol Li, tial prenu Lin kiel Protektanton.

11. Toleru pacience, kion ili diras, kaj disiĝu de ili konvene.

12. Lasu Min sola kun tiuj, kiuj negas kaj vivas en abundo; pacienculi pri ili iomete.

13. Ĉe Ni estas pezaj katenoj kaj flamoj

فَلْيَنظُرِ الْإِنسَانُ مِمَّ خُلِقَ ﴿٦﴾
خُلِقَ مِن مَّاءٍ دَافِقٍ ﴿٧﴾
يَخْرُجُ مِن بَيْنِ الصُّلْبِ وَالتَّرَائِبِ ﴿٨﴾
إِنَّهُ عَلَىٰ رَجْعِهِ لَقَادِرٌ ﴿٩﴾
يَوْمَ تُبْلَى السَّرَائِرُ ﴿١٠﴾

فَمَا لَهُ مِن قُوَّةٍ وَلَا نَاصِرٍ ﴿١١﴾

11. ĉar li ne havos forton nek helpanton.

وَالسَّمَاءِ ذَاتِ الرَّجْعِ ﴿١٢﴾

12. Per la nuboj, kiuj donas pluvon post pluvo,

وَالْأَرْضِ ذَاتِ الصَّدْعِ ﴿١٣﴾

13. kaj per la tero, kiu fendiĝas, kiam la kreskaĵoj ĝermas!

إِنَّهُ لَقَوْلٌ فَصْلٌ ﴿١٤﴾

14. Vere ĉi tiu estas decida vorto,

وَمَا هُوَ بِالْهَزْلِ ﴿١٥﴾

15. ĝi ne estas ŝerco.

إِنَّهُمْ يَكِيدُونَ كَيْدًا ﴿١٦﴾

16. Certe ili komplotas,

وَأَكِيدُ كَيْدًا ﴿١٧﴾

17. sed ankaŭ Mi komplotos kontraŭ ili,

فَمَهِّلِ الْكَافِرِينَ أَمْهِلْهُمْ رُوَيْدًا ﴿١٨﴾

18. tial vi konsentu tempon al la miskredantoj, lasu ilin iomete en paco.

سُورَةُ الْأَعْلَى مَكِّيَّةٌ (٨٧)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ﴿١﴾

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

سَبِّحِ اسْمَ رَبِّكَ الْأَعْلَى ﴿٢﴾

2. Gloregu la nomon de via Sinjoro, la Eminenta,

الَّذِي خَلَقَ فَسَوَّىٰ ﴿٣﴾

3. kiu kreis kaj perfektigis,

وَالَّذِي قَدَّرَ فَهَدَىٰ ﴿٤﴾

4. kaj kiu difinis la celojn, kaj gvidas,

وَالَّذِي أَخْرَجَ الْمَرْعَىٰ ﴿٥﴾

5. kiu kreskigas la herbon de la paŝtejoj,

فَجَعَلَهُ غُثَاءً أَحْوَىٰ ﴿٦﴾

6. kaj poste faras ĝin seka fojno.

سَنُقْرِئُكَ فَلَا تَنسَىٰ ﴿٧﴾

7. Ni instruos al vi la Koranon kaj vi ne forgesos ĝin,

إِلَّا مَا شَاءَ اللَّهُ ۚ إِنَّهُ يَعْلَمُ الْجَهْرَ وَمَا يَخْفَىٰ ﴿٨﴾

8. krom se Allah volas. Li vere scias, kio estas malkaŝita kaj kio estas kaŝita,

9. kaj Ni faciligos por vi la vojon.

10. Vi do admonu, ĉar la admono estas utila.

11. Ĝin akceptos tiu, kiu timas,

12. kaj evitos ĝin la malbonegulo,

13. tiu, kiu eniros en la grandan fajron,

14. poste en ĝi nek mortos nek vivos.

15. Vere estos sukcesa tiu, kiu sin purigas

16. kaj memoras la nomon de sia Sinjoro kaj preĝas.

17. Ne! Vi tamen preferas la vivon ĉi-tiean,

18. kvankam la vivo venonta estas pli bona kaj daŭra.

19. Vere tio estas la samo, kiu estis en la antikvaj Skriboj,

20. en la Skriboj de Abraham kaj de Moseo.

وَنُيَسِّرُكَ لِلْيُسْرَىٰ ﴿٨﴾
فَذَكِّرْ إِن نَّفَعَتِ الذِّكْرَىٰ ﴿٩﴾
سَيَذَّكَّرُ مَن يَخْشَىٰ ﴿١٠﴾
وَيَتَجَنَّبُهَا الْأَشْقَى ﴿١١﴾
الَّذِي يَصْلَى النَّارَ الْكُبْرَىٰ ﴿١٢﴾
ثُمَّ لَا يَمُوتُ فِيهَا وَلَا يَحْيَىٰ ﴿١٣﴾
قَدْ أَفْلَحَ مَن تَزَكَّىٰ ﴿١٤﴾
وَذَكَرَ اسْمَ رَبِّهِ فَصَلَّىٰ ﴿١٥﴾
بَلْ تُؤْثِرُونَ الْحَيَاةَ الدُّنْيَا ﴿١٦﴾
وَالْآخِرَةُ خَيْرٌ وَأَبْقَىٰ ﴿١٧﴾
إِنَّ هَٰذَا لَفِي الصُّحُفِ الْأُولَىٰ ﴿١٨﴾
صُحُفِ إِبْرَاهِيمَ وَمُوسَىٰ ﴿١٩﴾ ع ١٢

سُورَةُ الْغَاشِيَةِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ĉu atingis vin la novaĵo pri la renversanta okazontaĵo?

3. En tiu tago iuj vizaĝoj estos malgajaj,

4. laciĝintaj, afliktitaj,

5. ili eniros en timigan fajron,

6. ili estos trinkigataj el bolanta fonto,

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ﴿١﴾
هَلْ أَتَاكَ حَدِيثُ الْغَاشِيَةِ ﴿٢﴾
وُجُوهٌ يَوْمَئِذٍ خَاشِعَةٌ ﴿٣﴾
عَامِلَةٌ نَّاصِبَةٌ ﴿٤﴾
تَصْلَىٰ نَارًا حَامِيَةً ﴿٥﴾
تُسْقَىٰ مِنْ عَيْنٍ آنِيَةٍ ﴿٦﴾

7. ili ne havos alian manĝaĵon ol maldolĉan, dornan herbon,

لَيْسَ لَهُمْ طَعَامٌ إِلَّا مِن ضَرِيعٍ ۝٦

8. kiu nek nutras nek forigas la malsaton.

لَّا يُسْمِنُ وَلَا يُغْنِي مِن جُوعٍ ۝٧

9. En tiu tago iuj vizaĝoj estos gajaj,

وُجُوهٌ يَوْمَئِذٍ نَّاعِمَةٌ ۝٨

10. kontentaj pri sia laboro,

لِّسَعْيِهَا رَاضِيَةٌ ۝٩

11. en alta ĝardeno;

فِي جَنَّةٍ عَالِيَةٍ ۝١٠

12. tie vi ne aŭdos vanajn parolojn;

لَّا تَسْمَعُ فِيهَا لَاغِيَةً ۝١١

13. tie estos fluanta fonto,

فِيهَا عَيْنٌ جَارِيَةٌ ۝١٢

14. tie estos altaj litoj,

فِيهَا سُرُرٌ مَّرْفُوعَةٌ ۝١٣

15. kaj pokaloj surmetitaj,

وَأَكْوَابٌ مَّوْضُوعَةٌ ۝١٤

16. kaj kusenoj ordigitaj,

وَنَمَارِقُ مَصْفُوفَةٌ ۝١٥

17. kaj etenditaj tapiŝoj.

وَزَرَابِيُّ مَبْثُوثَةٌ ۝١٦

18. Kiel? Ĉu ili ne volas rigardi la nubojn, kiel ili estis kreitaj?

أَفَلَا يَنظُرُونَ إِلَى الْإِبِلِ كَيْفَ خُلِقَتْ ۝١٧

19. Kaj la ĉielon, kiel ĝi estis levita?

وَإِلَى السَّمَاءِ كَيْفَ رُفِعَتْ ۝١٨

20. Kaj la montojn, kiel ili estis starigitaj?

وَإِلَى الْجِبَالِ كَيْفَ نُصِبَتْ ۝١٩

21. Kaj la teron, kiel ĝi estis etendita?

وَإِلَى الْأَرْضِ كَيْفَ سُطِحَتْ ۝٢٠

22. Vi do admonu, ĉar vi estas nur admonanto,

فَذَكِّرْ إِنَّمَا أَنتَ مُذَكِّرٌ ۝٢١

23. vi ne estas gardanto super ili,

لَّسْتَ عَلَيْهِم بِمُصَيْطِرٍ ۝٢٢

24. sed tiun, kiu turnas sin for kaj nekredas,

إِلَّا مَن تَوَلَّىٰ وَكَفَرَ ۝٢٣

25. Allah punos per granda puno.

فَيُعَذِّبُهُ اللَّهُ الْعَذَابَ الْأَكْبَرَ ۝٢٤

26. Al Ni vere estos via hejmeniro,

إِنَّ إِلَيْنَا إِيَابَهُمْ ۝٢٥

27. kaj tiam Nin koncernos la juĝo pri vi.

ثُمَّ إِنَّ عَلَيْنَا حِسَابَهُم ۝٢٦

سُورَةُ الْفَجْرِ مَكِّيَّةٌ (٨٩) رُكُوعُهَا

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

وَالْفَجْرِ ②

وَلَيَالٍ عَشْرٍ ③

وَالشَّفْعِ وَالْوَتْرِ ④

وَالَّيْلِ إِذَا يَسْرِ ⑤

هَلْ فِيْ ذٰلِكَ قَسَمٌ لِّذِيْ حِجْرٍ ⑥

أَلَمْ تَرَ كَيْفَ فَعَلَ رَبُّكَ بِعَادٍ ⑦

إِرَمَ ذَاتِ الْعِمَادِ ⑧

الَّتِيْ لَمْ يُخْلَقْ مِثْلُهَا فِي الْبِلَادِ ⑨

وَثَمُوْدَ الَّذِيْنَ جَابُوا الصَّخْرَ بِالْوَادِ ⑩

وَفِرْعَوْنَ ذِي الْأَوْتَادِ ⑪

الَّذِيْنَ طَغَوْا فِي الْبِلَادِ ⑫

فَأَكْثَرُوْا فِيْهَا الْفَسَادَ ⑬

فَصَبَّ عَلَيْهِمْ رَبُّكَ سَوْطَ عَذَابٍ ⑭

إِنَّ رَبَّكَ لَبِالْمِرْصَادِ ⑮

فَأَمَّا الْإِنْسَانُ إِذَا مَا ابْتَلٰهُ رَبُّهُ فَأَكْرَمَهُ وَ

نَعَّمَهُ ۙ فَيَقُوْلُ رَبِّيْ أَكْرَمَنِ ⑯

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Per la tagiĝo!

3. Per la dek noktoj!

4. Per la para kaj per la nepara!

5. Per la nokto, kiam ĝi forpasas!

6. Ĉu en tio ne estas pruvo valida por prudentulo?

7. Ĉu vi ne vidis, kiel via Sinjoro agis pri la Aadanoj,

8. la popolo de Iram, la urbo de la altaj palacoj,

9. kiaj ne estis konstruitaj en aliaj urboj,

10. kaj pri la Tamudoj, kiuj elfosis logĝejojn en la ŝtonego, en la valo,

11. kaj pri Faraono, la sinjoro de la palisoj?

12. Tiuj trompis en la urboj,

13. kaj pliigis en ili la malvirton.

14. Tial via Sinjoro frapis ilin per la skurĝo de la puno.

15. Vere via Sinjoro estas vigla.

16. Kiam via Sinjoro elprovas homon, honorante kaj favorante lin, tiam li diras: "Mia Sinjoro honoris min",

17. kiam Li tamen elprovas lin, malpliigante lian provizaĵon, li diras: "Mia Sinjoro humiligis min".

18. Neniel! Ne! Vi tamen ne honoras la orfon,

19. nek instigas unu la alian al la nutrado de la malriĉuloj,

20. kaj vi tute konsumas la heredaĵon de la aliaj,

21. kaj vi amas la riĉaĵojn per senbrida amo.

22. Ne! Kiam la tero estos pistita en subtilan polvon,

23. kaj via Sinjoro kaj la anĝeloj venos en vicoj,

24. en tiu tago estos alproksimigita la Infero. En tiu tago la homo pripensos, sed kiom utilos al li la pripensado?

25. Li diros: "Ho, se mi estus provizinta antaŭe por ĉi tiu mia vivo! ".

26. En tiu tago neniu punos, kiel Li punos,

27. kaj neniu ligos tiel firme, kiel Li ligos.

28. Ho vi, animo, kiu estas en paco,

29. reiru al via Sinjoro, kontenta en Lia kontenteco!

30. Tial venu apud Miajn servantojn,

31. kaj eniru Mian Paradizon!

وَأَمَّآ إِذَا مَا ٱبْتَلَىٰهُ فَقَدَرَ عَلَيْهِ رِزْقَهُۥ فَيَقُولُ
رَبِّىٓ أَهَٰنَنِ ﴿١٦﴾
كَلَّا بَل لَّا تُكْرِمُونَ ٱلْيَتِيمَ ﴿١٧﴾
وَلَا تَحَٰٓضُّونَ عَلَىٰ طَعَامِ ٱلْمِسْكِينِ ﴿١٨﴾
وَتَأْكُلُونَ ٱلتُّرَاثَ أَكْلًا لَّمًّا ﴿١٩﴾
وَتُحِبُّونَ ٱلْمَالَ حُبًّا جَمًّا ﴿٢٠﴾
كَلَّآ إِذَا دُكَّتِ ٱلْأَرْضُ دَكًّا دَكًّا ﴿٢١﴾
وَجَآءَ رَبُّكَ وَٱلْمَلَكُ صَفًّا صَفًّا ﴿٢٢﴾
وَجِاْىٓءَ يَوْمَئِذٍۭ بِجَهَنَّمَ ۚ يَوْمَئِذٍ يَتَذَكَّرُ
ٱلْإِنسَٰنُ وَأَنَّىٰ لَهُ ٱلذِّكْرَىٰ ﴿٢٣﴾
يَقُولُ يَٰلَيْتَنِى قَدَّمْتُ لِحَيَاتِى ﴿٢٤﴾
فَيَوْمَئِذٍ لَّا يُعَذِّبُ عَذَابَهُۥٓ أَحَدٌ ﴿٢٥﴾
وَلَا يُوثِقُ وَثَاقَهُۥٓ أَحَدٌ ﴿٢٦﴾
يَٰٓأَيَّتُهَا ٱلنَّفْسُ ٱلْمُطْمَئِنَّةُ ﴿٢٧﴾
ٱرْجِعِىٓ إِلَىٰ رَبِّكِ رَاضِيَةً مَّرْضِيَّةً ﴿٢٨﴾
فَٱدْخُلِى فِى عِبَٰدِى ﴿٢٩﴾
وَٱدْخُلِى جَنَّتِى ﴿٣٠﴾

سُوْرَةُ الْبَلَدِ مَكِّيَّةٌ (٩٠) (دكوعها)

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Aŭskultu! Mi ĵuras per ĉi tiu urbo,*

3. – kaj vi loĝas en ĉi tiu urbo –

4. per la naskinto kaj per la naskito! **

5. Vere Ni kreis la homon en stato de mizero,

6. ĉu li nun eble supozas, ke neniu havas povon super li?

7. Li diras: "Mi konsumis grandan proprajon".

8. Ĉu li imagas, ke neniu lin vidas?

9. Ĉu Ni ne donis al li du okulojn

10. kaj langon kaj du lipojn?

11. Poste Ni gvidis lin al du larĝaj vojoj, al la bono kaj al la malbono.

12. Li tamen ne komencas supreniri.

13. Kio sciigas al vi, kio estas la supreniro?

14. Ĝi estas liberigo de sklavo

15. aŭ nutrado, en tempo de malriĉego,

16. de orfo, de proksima parenco

17. aŭ de mizerulo kuŝanta sur la tero,

18. kaj krome esti kredanto kaj admonan-

لِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

لَآ اُقْسِمُ بِهٰذَا الْبَلَدِ ②

وَاَنْتَ حِلٌّۢ بِهٰذَا الْبَلَدِ ③

وَوَالِدٍ وَّمَا وَلَدَ ④

لَقَدْ خَلَقْنَا الْاِنْسَانَ فِيْ كَبَدٍ ⑤

اَيَحْسَبُ اَنْ لَّنْ يَّقْدِرَ عَلَيْهِ اَحَدٌ ⑥

يَقُوْلُ اَهْلَكْتُ مَالًا لُّبَدًا ⑦

اَيَحْسَبُ اَنْ لَّمْ يَرَهٗٓ اَحَدٌ ⑧

اَلَمْ نَجْعَلْ لَّهٗ عَيْنَيْنِ ⑨

وَلِسَانًا وَّشَفَتَيْنِ ⑩

وَهَدَيْنٰهُ النَّجْدَيْنِ ⑪

فَلَا اقْتَحَمَ الْعَقَبَةَ ⑫

وَمَآ اَدْرٰىكَ مَا الْعَقَبَةُ ⑬

فَكُّ رَقَبَةٍ ⑭

اَوْ اِطْعٰمٌ فِيْ يَوْمٍ ذِيْ مَسْغَبَةٍ ⑮

يَّتِيْمًا ذَا مَقْرَبَةٍ ⑯

اَوْ مِسْكِيْنًا ذَا مَتْرَبَةٍ ⑰

ثُمَّ كَانَ مِنَ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَتَوَاصَوْا بِالصَّبْرِ وَتَوَاصَوْا بِالْمَرْحَمَةِ ⑱

* Mekko

** Abraham kaj Iŝmael

to al la persistemo kaj admonanto al la kompato.

19. Tiuj ĉi estos tiuj je la dekstra flanko.

20. Tiuj, kiuj rifuzas Niajn revelaciojn, estos tiuj je la maldekstra flanko,

21. ĉirkaŭ ili estos turmentanta fajro.

أُولَٰئِكَ أَصْحَٰبُ ٱلْمَيْمَنَةِ ﴿١٩﴾
وَٱلَّذِينَ كَفَرُوا۟ بِـَٔايَٰتِنَا هُمْ أَصْحَٰبُ ٱلْمَشْـَٔمَةِ ﴿٢٠﴾
عَلَيْهِمْ نَارٌ مُّؤْصَدَةٌ ﴿٢١﴾ ع

Ĉapitro 91 **Aŝ-Ŝams** (La suno) 30-a parto

سُورَةُ الشَّمْسِ مَكِّيَّةٌ (91)

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Per la suno kaj ĝia brilego!

3. Per la luno, kiu sekvas ĝin!

4. Per la tago, kiam ĝi senvualigas!

5. Per la nokto, kiam ĝi kovras ĝin per vualo!

6. Per la ĉielo kaj ĝia konstruo!

7. Per la tero kaj ĝia etendigo!

8. Per la animo kaj ĝia perfektigo!

9. Li donis al ĝi la senton por tio, kio estas maljusta, kaj por tio, kio estas justa.

10. Certe estos sukcesa tiu, kiu purigas ĝin,

11. kaj estos humiligita tiu, kiu lasas ĝin perei.

12. La Tamudoj negis la veron en sia ribelemo,

بِسْمِ ٱللَّهِ ٱلرَّحْمَٰنِ ٱلرَّحِيمِ ﴿١﴾
وَٱلشَّمْسِ وَضُحَىٰهَا ﴿٢﴾
وَٱلْقَمَرِ إِذَا تَلَىٰهَا ﴿٣﴾
وَٱلنَّهَارِ إِذَا جَلَّىٰهَا ﴿٤﴾
وَٱلَّيْلِ إِذَا يَغْشَىٰهَا ﴿٥﴾
وَٱلسَّمَآءِ وَمَا بَنَىٰهَا ﴿٦﴾
وَٱلْأَرْضِ وَمَا طَحَىٰهَا ﴿٧﴾
وَنَفْسٍ وَمَا سَوَّىٰهَا ﴿٨﴾
فَأَلْهَمَهَا فُجُورَهَا وَتَقْوَىٰهَا ﴿٩﴾
قَدْ أَفْلَحَ مَن زَكَّىٰهَا ﴿١٠﴾
وَقَدْ خَابَ مَن دَسَّىٰهَا ﴿١١﴾
كَذَّبَتْ ثَمُودُ بِطَغْوَىٰهَآ ﴿١٢﴾

13. kiam ekstaris la plej malpia el ili.

14. Tiam diris al ili la sendito de Allah: "Ĉi tiu estas la kamelino de Allah, ne malhelpu ĝin je la trinkado".

15. Ili tamen forpelis lin kaj buĉis ĝin, tial ilia Sinjoro neniigis ilin pro iliaj pekoj kaj Li kompletigis la neniigon,

16. kaj Li ne timis la sekvojn.

إِذِ انۢبَعَثَ أَشۡقَىٰهَا ﴿١٢﴾
فَقَالَ لَهُمۡ رَسُولُ ٱللَّهِ نَاقَةَ ٱللَّهِ وَسُقۡيَٰهَا ﴿١٣﴾
فَكَذَّبُوهُ فَعَقَرُوهَا فَدَمۡدَمَ عَلَيۡهِمۡ رَبُّهُم بِذَنۢبِهِمۡ فَسَوَّىٰهَا ﴿١٤﴾
وَلَا يَخَافُ عُقۡبَٰهَا ﴿١٥﴾

Ĉapitro 92 **Al-Lajl** (La nokto) 30-a parto

سُورَةُ ٱلَّيۡلِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Per la nokto, kiu kovras la teron per vualo!

3. Per la tago, kiu aperas radiluma!

4. Per la kreo de la viro kaj de la virino!

5. Vere via klopodado estas diverscela,

6. tiu tamen, kiu almozdonas kaj estas justa

7. kaj kredas je la bono:

8. Ni volas faciligi por li la vojon al la feliĉo.

9. Tiu tamen, kiu estas avara kaj indiferenta

10. kaj rifuzas la bonon:

11. por li Ni volas faciligi la vojon al la malfeliĉo,

بِسۡمِ ٱللَّهِ ٱلرَّحۡمَٰنِ ٱلرَّحِيمِ ﴿١﴾
وَٱلَّيۡلِ إِذَا يَغۡشَىٰ ﴿٢﴾
وَٱلنَّهَارِ إِذَا تَجَلَّىٰ ﴿٣﴾
وَمَا خَلَقَ ٱلذَّكَرَ وَٱلۡأُنثَىٰٓ ﴿٤﴾
إِنَّ سَعۡيَكُمۡ لَشَتَّىٰ ﴿٥﴾
فَأَمَّا مَنۡ أَعۡطَىٰ وَٱتَّقَىٰ ﴿٦﴾
وَصَدَّقَ بِٱلۡحُسۡنَىٰ ﴿٧﴾
فَسَنُيَسِّرُهُۥ لِلۡيُسۡرَىٰ ﴿٨﴾
وَأَمَّا مَنۢ بَخِلَ وَٱسۡتَغۡنَىٰ ﴿٩﴾
وَكَذَّبَ بِٱلۡحُسۡنَىٰ ﴿١٠﴾
فَسَنُيَسِّرُهُۥ لِلۡعُسۡرَىٰ ﴿١١﴾

وَمَا يُغْنِي عَنْهُ مَالُهُ إِذَا تَرَدَّىٰ ﴿١١﴾

12. kaj al li neniom utilos la propraĵoj, kiam li pereos.

إِنَّ عَلَيْنَا لَلْهُدَىٰ ﴿١٢﴾

13. Vere, Nin koncernas la gvidado,

وَإِنَّ لَنَا لَلْآخِرَةَ وَالْأُولَىٰ ﴿١٣﴾

14. kaj al Ni apartenas la venonta kaj la ĉi-tiea vivo,

فَأَنذَرْتُكُمْ نَارًا تَلَظَّىٰ ﴿١٤﴾

15. tial Mi admonas vin pri la flamanta fajro;

لَا يَصْلَاهَا إِلَّا الْأَشْقَى ﴿١٥﴾

16. en ĝin eniros nur la malbonfarinto,

الَّذِي كَذَّبَ وَتَوَلَّىٰ ﴿١٦﴾

17. tiu, kiu negis kaj turnis sin for;

وَسَيُجَنَّبُهَا الْأَتْقَى ﴿١٧﴾

18. malproksimege de li estos la justulo,

الَّذِي يُؤْتِي مَالَهُ يَتَزَكَّىٰ ﴿١٨﴾

19. tiu, kiu disdonas siajn propraĵojn por puriĝi,

وَمَا لِأَحَدٍ عِندَهُ مِن نِّعْمَةٍ تُجْزَىٰ ﴿١٩﴾

20. kaj al neniu ŝuldas repagendan favoron,

إِلَّا ابْتِغَاءَ وَجْهِ رَبِّهِ الْأَعْلَىٰ ﴿٢٠﴾

21. krom por atingi la plezuron de sia Sinjoro, la Eminenta.

وَلَسَوْفَ يَرْضَىٰ ﴿٢١﴾

22. Baldaŭ Li estos kontenta pri li.

Ĉapitro 93 **Ad-Duhā** (La antaŭtagmezo) 30-a parto

سُورَةُ الضُّحَىٰ مَكِّيَّةٌ (٩٣)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ﴿١﴾

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

وَالضُّحَىٰ ﴿٢﴾

2. Per la antaŭtagmezo!

وَاللَّيْلِ إِذَا سَجَىٰ ﴿٣﴾

3. Per la nokto, kies mallumo disvastiĝas!

مَا وَدَّعَكَ رَبُّكَ وَمَا قَلَىٰ ﴿٤﴾

4. Via Sinjoro nek forlasis vin nek koleras.

وَلَلْآخِرَةُ خَيْرٌ لَّكَ مِنَ الْأُولَىٰ ﴿٥﴾

5. Vere la vivo venonta estos pli bona ol la ĉi-tiea,

6. kaj certe via Sinjoro donos al vi la rekompencon kaj vi estos kontenta.

وَلَسَوْفَ يُعْطِيكَ رَبُّكَ فَتَرْضَىٰ ۝٥

7. Ĉu Li ne trovis vin orfo kaj gastigis vin?

أَلَمْ يَجِدْكَ يَتِيمًا فَآوَىٰ ۝٦

8. Li trovis vin vaganta kaj gvidis vin,

وَوَجَدَكَ ضَالًّا فَهَدَىٰ ۝٧

9. Li trovis vin malriĉa kaj faris vin riĉa.

وَوَجَدَكَ عَائِلًا فَأَغْنَىٰ ۝٨

10. Tial vi ne subpremu la orfon,

فَأَمَّا الْيَتِيمَ فَلَا تَقْهَرْ ۝٩

11. kaj ne forpelu la almozulon,

وَأَمَّا السَّائِلَ فَلَا تَنْهَرْ ۝١٠

12. kaj rakontu pri la graco de via Sinjoro.

وَأَمَّا بِنِعْمَةِ رَبِّكَ فَحَدِّثْ ۝١١

سُورَةُ الِانْشِرَاحِ مَكِّيَّةٌ

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ۝١

2. Ĉu Ni ne dislarĝigis por vi vian bruston,

أَلَمْ نَشْرَحْ لَكَ صَدْرَكَ ۝٢

3. kaj forprenis de vi vian ŝarĝon,

وَوَضَعْنَا عَنْكَ وِزْرَكَ ۝٣

4. kiu ŝarĝis vian dorson?

الَّذِي أَنْقَضَ ظَهْرَكَ ۝٤

5. Ĉu Ni ne pliigis por vi vian famon?

وَرَفَعْنَا لَكَ ذِكْرَكَ ۝٥

6. Vere post la malfeliĉo venas la faciligo;

فَإِنَّ مَعَ الْعُسْرِ يُسْرًا ۝٦

7. post la malfeliĉo venas la faciligo,

إِنَّ مَعَ الْعُسْرِ يُسْرًا ۝٧

8. kiam do vi estas senŝarĝita, vi fervoru,

فَإِذَا فَرَغْتَ فَانْصَبْ ۝٨

9. kaj dediĉu vin al via Sinjoro.

وَإِلَىٰ رَبِّكَ فَارْغَبْ ۝٩

Ĉapitro 95 **At-Tîn** (La figo) 30-a parto

سُوْرَةُ التِّيْنِ مَكِّيَّةٌ (٩٥)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

وَالتِّيْنِ وَالزَّيْتُوْنِ ②

وَطُوْرِ سِيْنِيْنَ ③

وَهٰذَا الْبَلَدِ الْاَمِيْنِ ④

لَقَدْ خَلَقْنَا الْاِنْسَانَ فِيْٓ اَحْسَنِ تَقْوِيْمٍ ⑤

ثُمَّ رَدَدْنٰهُ اَسْفَلَ سٰفِلِيْنَ ⑥

اِلَّا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ فَلَهُمْ اَجْرٌ غَيْرُ مَمْنُوْنٍ ⑦

فَمَا يُكَذِّبُكَ بَعْدُ بِالدِّيْنِ ⑧

اَلَيْسَ اللّٰهُ بِاَحْكَمِ الْحٰكِمِيْنَ ⑨

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Per la figo kaj per la olivarbo!

3. Per la monto Sinaj!

4. Per ĉi tiu urbo de la paco!

5. Ni vere kreis la homon en perfekta formo;

6. se li poste malbonfaras, Ni forpelos lin kiel la plej malŝatindan el la malŝatinduloj.

7. Tiel tamen ne estas la kredantoj kaj la bonfarantoj; por ili estos senfina rekompenco.

8. Kiu do povos kulpigi vin pri mensogo post tiu ĉi vorto pri la lasta Juĝo?

9. Ĉu ne estas Allah la plej bona juĝanto?

Ĉapitro 96 **Al-'Alak** * (La buleto de koaguliĝinta sango) 30-a parto

سُوْرَةُ الْعَلَقِ مَكِّيَّةٌ (٩٦)

revelaciita en Mekko

* La unuaj ses versoj de ĉi tiu ĉapitro estas universale akceptitaj kiel la unua revelacio el la tuta Korano, donita al la Profeto Mahometo fare de Allah per la perado de la anĝelo Gabrielo en la "Lajlat-ul-Kadr" (nokto de la Dia dekreto aŭ nokto de la Destino) t.e. en iu nokto en la monato Ramadân en la kaverno sur la monto Hira, en la jaro 611 p.K. Estas ĝenerale akceptita fakto, ke la tempa ordo de la revelacioj ne estis la sama kiel en la hodiaŭa aranĝo de la Korano. Tiu fina aranĝo nome korespondas al la necesoj de la nunaj kaj de la venontaj generacioj kaj estis ankaŭ fiksita fare de la Profeto koresponde al Dia ordono, dum la unua sinsekva ordo estis adaptita al la primitiva stato de la tiamaj gentoj.

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Proklamu je la nomo de via Sinjoro, kiu kreis ĉion,

3. kiu kreis la homon el buleto de koaguliĝinta sango!

4. Proklamu! Via Sinjoro estas la Grandanima,

5. Tiu, kiu instruis per la plumo,

6. kiu instruis al la homo tion, kion li ne sciis.

7. Ne! Certe la homo estas ribelema,

8. ĉar li imagas, ke li estas sendependa.

9. Vere al via Sinjoro estos la reveno.

10. Ĉu vi ne vidis tiun, kiu malhelpas

11. Nian servanton, dum tiu ĉi preĝas?

12. Ĉu vi vidis lin sur la rekta vojo

13. aŭ instigantan al la justeco?

14. Aŭ ĉu vi vidis lin negi kaj turni sin for?

15. Ĉu li ne scias, ke Allah vidas lin?

16. Ne! Se li ne forlasos, Ni certe ekkaptos lin je lia hartufo,

17. je lia mensogema, pekema hartufo.

18. Li tiam voku siajn kunkulpulojn,

19. Ni tiam ankaŭ vokos Nian gvardion.

20. Ne! Ne obeu lin, sed terenkuŝiĝu kaj alproksimiĝu!

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

اِقْرَاْ بِاسْمِ رَبِّكَ الَّذِىْ خَلَقَ ②

خَلَقَ الْاِنْسَانَ مِنْ عَلَقٍ ③

اِقْرَاْ وَرَبُّكَ الْاَكْرَمُ ④

الَّذِىْ عَلَّمَ بِالْقَلَمِ ⑤

عَلَّمَ الْاِنْسَانَ مَا لَمْ يَعْلَمْ ⑥

كَلَّآ اِنَّ الْاِنْسَانَ لَيَطْغٰٓى ⑦

اَنْ رَّاٰهُ اسْتَغْنٰى ⑧

اِنَّ اِلٰى رَبِّكَ الرُّجْعٰى ⑨

اَرَءَيْتَ الَّذِىْ يَنْهٰى ⑩

عَبْدًا اِذَا صَلّٰى ⑪

اَرَءَيْتَ اِنْ كَانَ عَلَى الْهُدٰٓى ⑫

اَوْ اَمَرَ بِالتَّقْوٰى ⑬

اَرَءَيْتَ اِنْ كَذَّبَ وَتَوَلّٰى ⑭

اَلَمْ يَعْلَمْ بِاَنَّ اللّٰهَ يَرٰى ⑮

كَلَّا لَئِنْ لَّمْ يَنْتَهِ ۙ لَنَسْفَعًا بِالنَّاصِيَةِ ⑯

نَاصِيَةٍ كَاذِبَةٍ خَاطِئَةٍ ⑰

فَلْيَدْعُ نَادِيَهٗ ⑱

سَنَدْعُ الزَّبَانِيَةَ ⑲

كَلَّا لَا تُطِعْهُ وَاسْجُدْ وَاقْتَرِبْ ۩ ⑳

Ĉapitro 97 **Al-Kadr** (La Dia dekreto) 30-a parto

سُورَةُ الْقَدْرِ مَكِّيَّةٌ (٩٧)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيمِ ①

إِنَّآ أَنزَلْنَٰهُ فِى لَيْلَةِ الْقَدْرِ ②

وَمَآ أَدْرَىٰكَ مَا لَيْلَةُ الْقَدْرِ ③

لَيْلَةُ الْقَدْرِ خَيْرٌ مِّنْ أَلْفِ شَهْرٍ ④

تَنَزَّلُ الْمَلَٰٓئِكَةُ وَالرُّوحُ فِيهَا بِإِذْنِ رَبِّهِم مِّن كُلِّ أَمْرٍ ⑤

سَلَٰمٌ هِىَ حَتَّىٰ مَطْلَعِ الْفَجْرِ ⑥

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Vere Ni sendis la Koranon en la nokto de la Dia dekreto.

3. Kio sciigas al vi, kio estas la nokto de la Dia dekreto?

4. La nokto de la Dia dekreto estas pli bona ol mil monatoj,

5. en ĝi malsupreniras la anĝeloj kaj la spirito laŭ la ordono de ilia Sinjoro – kun ĉiu afero.

6. La paco daŭras ĝis la tagiĝo.

Ĉapitro 98 **Al-Bajjenā** (La pruvo evidenta) 30-a parto

سُورَةُ الْبَيِّنَةِ مَكِّيَّةٌ (٩٨)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيمِ ①

لَمْ يَكُنِ الَّذِينَ كَفَرُوا مِنْ أَهْلِ الْكِتَٰبِ وَالْمُشْرِكِينَ مُنفَكِّينَ حَتَّىٰ تَأْتِيَهُمُ الْبَيِّنَةُ ②

رَسُولٌ مِّنَ اللهِ يَتْلُوا صُحُفًا مُّطَهَّرَةً ③

فِيهَا كُتُبٌ قَيِّمَةٌ ④

وَمَا تَفَرَّقَ الَّذِينَ أُوتُوا الْكِتَٰبَ إِلَّا مِنۢ بَعْدِ مَا جَآءَتْهُمُ الْبَيِّنَةُ ⑤

وَمَآ أُمِرُوٓا إِلَّا لِيَعْبُدُوا اللهَ مُخْلِصِينَ لَهُ

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Tiuj el la popolo de la Skribo, kiuj nekredas, kaj la idolanoj ne estis liberigitaj de la eraro, antaŭ ol venis al ili evidenta pruvo,

3. sendito de Allah, kiu proklamis noblajn skribojn,

4. en kiuj estas skribitaj eternaj dekretoj,

5. kaj tiuj, al kiuj estis donita la Skribo, ne disiĝis, antaŭ ol venis al ili pruvoj evidentaj,

الَّذِيْنَ حُنَفَآءَ وَيُقِيْمُوا الصَّلٰوةَ وَيُؤْتُوا الزَّكٰوةَ
وَذٰلِكَ دِيْنُ الْقَيِّمَةِ ۝٥

6. sed al ili estis ordonite nur, ke ili adoru Allahon en perfekta obeemo al Li kaj en sincera kredo, kaj ke ili levu la preĝon kaj almozdonu. Tiu ĉi estas la ĉiama kredo.

اِنَّ الَّذِيْنَ كَفَرُوْا مِنْ اَهْلِ الْكِتٰبِ وَالْمُشْرِكِيْنَ
فِيْ نَارِ جَهَنَّمَ خٰلِدِيْنَ فِيْهَا ؕ اُولٰٓئِكَ هُمْ شَرُّ
الْبَرِيَّةِ ۝٦

7. Vere tiuj el la popolo de la Skribo, kiuj nekredis, kaj la idolanoj, estos en la fajro de l' Infero kaj restos tie por ĉiam. Ili vere estas la plej malbonaj kreitaĵoj.

اِنَّ الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ ۙ اُولٰٓئِكَ هُمْ
خَيْرُ الْبَرِيَّةِ ۝٧

8. Vere tiuj, kiuj kredas kaj bonfaras, estas la plej bonaj kreitaĵoj.

جَزَآؤُهُمْ عِنْدَ رَبِّهِمْ جَنّٰتُ عَدْنٍ تَجْرِيْ مِنْ
تَحْتِهَا الْاَنْهٰرُ خٰلِدِيْنَ فِيْهَآ اَبَدًا ؕ رَضِيَ اللّٰهُ
عَنْهُمْ وَرَضُوْا عَنْهُ ؕ ذٰلِكَ لِمَنْ خَشِيَ رَبَّهٗ ۝٨ ع

9. Ilia rekompenco estas ĉe ilia Sinjoro: ĝardenoj de la eterneco, sub kiuj fluas riveroj: tie ili restos por ĉiam. Allah estas kontenta pri ili kaj ili estos kontentaj pri Li. Tio estas por tiu, kiu respektegas sian Sinjoron.

سُوْرَةُ الزِّلْزَالِ مَكِّيَّةٌ (٩٩)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ۝١

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

اِذَا زُلْزِلَتِ الْاَرْضُ زِلْزَالَهَا ۝٢

2. Kiam la tero skuiĝos per sia tremego,

وَاَخْرَجَتِ الْاَرْضُ اَثْقَالَهَا ۝٣

3. kaj la tero elpelos siajn ŝarĝojn,

وَقَالَ الْاِنْسَانُ مَا لَهَا ۝٤

4. kaj la homo diros: "Kio okazas al ĝi? "

يَوْمَئِذٍ تُحَدِّثُ اَخْبَارَهَا ۝٥

5. en tiu tago ĝi rakontos siajn rakontojn,

بِاَنَّ رَبَّكَ اَوْحٰى لَهَا ۝٦

6. ĉar via Sinjoro revelaciis al ĝi.

يَوْمَئِذٍ يَّصْدُرُ النَّاسُ اَشْتَاتًا ۙ لِّيُرَوْا اَعْمَالَهُمْ ۝٧

7. En tiu tago kunvenos la homoj en neordigitaj grupoj, por ke estu montritaj al ili iliaj faroj.

فَمَنْ يَّعْمَلْ مِثْقَالَ ذَرَّةٍ خَيْرًا يَّرَهٗ ۝٨

8. Kiu faris bonon, eĉ tiel malgrandan kiel sableron, tiu tiam vidos ĝin,

وَمَنْ يَّعْمَلْ مِثْقَالَ ذَرَّةٍ شَرًّا يَّرَهٗ ۝٩ ع

9. kaj kiu faris malbonon, eĉ tiel malgrandan kiel sableron, tiu tiam vidos ĝin.

سُورَةُ الْعَادِيَاتِ مَكِّيَّةٌ (١٠٠)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللَّهِ الرَّحْمَٰنِ الرَّحِيمِ ①

وَالْعَادِيَاتِ ضَبْحًا ②

فَالْمُورِيَاتِ قَدْحًا ③

فَالْمُغِيرَاتِ صُبْحًا ④

فَأَثَرْنَ بِهِ نَقْعًا ⑤

فَوَسَطْنَ بِهِ جَمْعًا ⑥

إِنَّ الْإِنسَانَ لِرَبِّهِ لَكَنُودٌ ⑦

وَإِنَّهُ عَلَىٰ ذَٰلِكَ لَشَهِيدٌ ⑧

وَإِنَّهُ لِحُبِّ الْخَيْرِ لَشَدِيدٌ ⑨

أَفَلَا يَعْلَمُ إِذَا بُعْثِرَ مَا فِي الْقُبُورِ ⑩

وَحُصِّلَ مَا فِي الصُّدُورِ ⑪

إِنَّ رَبَّهُم بِهِمْ يَوْمَئِذٍ لَّخَبِيرٌ ⑫

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Per la spiregantaj atakantoj,

3. kiuj piedfrapante estigas fajrerojn,

4. kiuj atakas frumatene,

5. kaj per tio levas polvegon,

6. kaj tiel penetras en la mezon de la malamikoj!

7. Certe la homo estas sendanka kontraŭ sia Sinjoro,

8. vere, li mem atestas tion,

9. kaj li estás fervorega en sia amo al la aĵoj de ĉi tiu vivo.

10. Ĉu li do ne scias, ke – kiam estos renversita tio kio estas en la tomboj,

11. kaj kiam estos malkaŝita tio, kio estas en la brustoj –

12. ilia Sinjoro sola konos ilin plej bone en tiu tago?

سُوْرَةُ الْقَارِعَةِ مَكِّيَّةٌ (١٠١)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

اَلْقَارِعَةُ ②

2. La frapego!

مَا الْقَارِعَةُ ③

3. Kio estas la frapego?

وَمَآ اَدْرٰىكَ مَا الْقَارِعَةُ ④

4. Kio sciigas al vi, kio estas la frapego?

يَوْمَ يَكُوْنُ النَّاسُ كَالْفَرَاشِ الْمَبْثُوْثِ ⑤

5. En la tago, en kiu la homoj estos kvazaŭ dispelitaj tineoj,

وَتَكُوْنُ الْجِبَالُ كَالْعِهْنِ الْمَنْفُوْشِ ⑥

6. kaj la montoj estos kvazaŭ tinkturita kombita lano,

فَاَمَّا مَنْ ثَقُلَتْ مَوَازِيْنُهٗ ⑦

7. tiu, kies pesilo estos peza pro bonaj agoj,

فَهُوَ فِيْ عِيْشَةٍ رَّاضِيَةٍ ⑧

8. havos agrablan vivon,

وَاَمَّا مَنْ خَفَّتْ مَوَازِيْنُهٗ ⑨

9. sed ties, kies pesilo estos malpeza,

فَاُمُّهٗ هَاوِيَةٌ ⑩

10. estos patrino la Abismo.

وَمَآ اَدْرٰىكَ مَا هِيَهْ ⑪

11. Kio sciigas al vi, kio tio estas?

نَارٌ حَامِيَةٌ ⑫

12. Tio estas detruanta fajro!

Ĉapitro 102 **At-Takāsur** (La konkuro) 30-a parto

سُوْرَةُ التَّكَاثُرِ مَكِّيَّةٌ (١٠٢) آياتها ركوعها

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

2. La konkuro pri la riĉaĵoj distras vin,

اَلْهٰىكُمُ التَّكَاثُرُ ۙ ②

3. ĝis vi atingas la tombojn.

حَتّٰى زُرْتُمُ الْمَقَابِرَ ؕ ③

4. Ne! Baldaŭ vi ekscios!

كَلَّا سَوْفَ تَعْلَمُوْنَ ۙ ④

5. Ankoraŭfoje ne! Baldaŭ vi ekscios!

ثُمَّ كَلَّا سَوْفَ تَعْلَمُوْنَ ؕ ⑤

6. Ne! Se vi scius per certa scio,

كَلَّا لَوْ تَعْلَمُوْنَ عِلْمَ الْيَقِيْنِ ؕ ⑥

7. vi certe vidus la Inferon ankaŭ en ĉi tiu vivo,

لَتَرَوُنَّ الْجَحِيْمَ ۙ ⑦

8. poste vi tamen certe vidos ĝin per la okuloj de la certeco,

ثُمَّ لَتَرَوُنَّهَا عَيْنَ الْيَقِيْنِ ۙ ⑧

9. poste, en tiu tago, vi estos pridemanditaj pri la riĉaĵoj.

ثُمَّ لَتُسْـَٔلُنَّ يَوْمَئِذٍ عَنِ النَّعِيْمِ ع ⑨ ع ١ ٩ ٢٤

Ĉapitro 103 **Al-'Asr** (La posttagmezo) 30-a parto

سُوْرَةُ الْعَصْرِ مَكِّيَّةٌ (١٠٣) آياتها ركوعها

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

2. Per la posttagmezo!

وَالْعَصْرِ ②

3. Vere la homoj iras al sia pereo,

اِنَّ الْاِنْسَانَ لَفِيْ خُسْرٍ ۙ ③

4. krom la kredantaj kaj bonfarantaj, kaj la reciproke admonantaj pri la vero, kaj la reciproke rekomendantaj la paciencon.

اِلَّا الَّذِيْنَ اٰمَنُوْا وَعَمِلُوا الصّٰلِحٰتِ وَتَوَاصَوْا بِالْحَقِّ ۙ وَتَوَاصَوْا بِالصَّبْرِ ع ④ ع ١ ٢٨

Ĉapitro 104 **Al-Humaza** (La kalumnianto) 30-a parto

سُوْرَةُ الْهُمَزَةِ مَكِّيَّةٌ

ايَاتُهَا (١٠٤) رُكُوعُهَا

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

2. Ve al ĉiu malbondiranto, kalumnianto,

وَيْلٌ لِّكُلِّ هُمَزَةٍ لُّمَزَةِ ۙ ②

3. kiu amasigis riĉaĵojn kaj ĉiam denombras ilin!

الَّذِىْ جَمَعَ مَالًا وَّعَدَّدَهٗ ۙ ③

4. Li imagas, ke liaj riĉaĵoj faros lin senmorta.

يَحْسَبُ اَنَّ مَالَهٗٓ اَخْلَدَهٗ ۚ ④

5. Ne! Li certe estos enĵetita en la konsumantan.

كَلَّا لَيُنْۢبَذَنَّ فِى الْحُطَمَةِ ۖ ⑤

6. Kio sciigas al vi, kio estas la konsumanta?

وَمَآ اَدْرٰىكَ مَا الْحُطَمَةُ ؕ ⑥

7. Ĝi estas la fajro de Allah, kiu ekbrulis,

نَارُ اللّٰهِ الْمُوْقَدَةُ ۙ ⑦

8. kaj kiu flamos trans la korojn;

الَّتِىْ تَطَّلِعُ عَلَى الْاَفْـِٕدَةِ ؕ ⑧

9. ĝi fariĝos kvazaŭ arkaĵo super ili

اِنَّهَا عَلَيْهِمْ مُّؤْصَدَةٌ ۙ ⑨

10. sur altaj kolonoj.

فِىْ عَمَدٍ مُّمَدَّدَةٍ ع ⑩ ١ ٢٩

Ĉapitro 105 **Al-Fīl** (La elefanto) 30-a parto

سُوْرَةُ الْفِيْلِ مَكِّيَّةٌ

ايَاتُهَا (١٠٥) رُكُوعُهَا

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

2. Ĉu vi ne vidis, kiel kondutis via Sinjoro kontraŭ tiuj de la elefanto?

اَلَمْ تَرَ كَيْفَ فَعَلَ رَبُّكَ بِاَصْحٰبِ الْفِيْلِ ؕ ②

3. Ĉu Li ne neniigis ilian komploton?

اَلَمْ يَجْعَلْ كَيْدَهُمْ فِىْ تَضْلِيْلٍ ۙ ③

4. Li sendis kontraŭ ilin birdojn po aroj,

وَّاَرْسَلَ عَلَيْهِمْ طَيْرًا اَبَابِيْلَ ۙ ④

5. kiuj ĵetis ilin ĉirkaŭen kiel ŝtonojn el bakita argilo.

تَرْمِيْهِمْ بِحِجَارَةٍ مِّنْ سِجِّيْلٍ ۖ ⑤

6. Kaj Li faris ilin kvazaŭ grenŝelojn.

فَجَعَلَهُمْ كَعَصْفٍ مَّاْكُوْلٍ ع ⑥ ١ ٣٠

Ĉapitro 106 **Al-Kurajŝ** (La Kurajŝ) 30-a parto

سُوْرَةُ الْقُرَيْشِ مَكِّيَّةٌ (١٠٦) اٰياتها ركوعها

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Per la protekto de la Kurajŝ!

3. Per ilia protekto por la vojaĝoj, vintre kaj somere.

4. Ili do adoru la Sinjoron de ĉi tiu Domo,

5. kiu nutris ilin kontraŭ la malsato, kaj donis al ili sekurecon kontraŭ la timo.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

لِاِيْلٰفِ قُرَيْشٍ ②

اٖلٰفِهِمْ رِحْلَةَ الشِّتَآءِ وَالصَّيْفِ ③

فَلْيَعْبُدُوْا رَبَّ هٰذَا الْبَيْتِ ④

ع الَّذِيْٓ اَطْعَمَهُمْ مِّنْ جُوْعٍ ۙ وَّاٰمَنَهُمْ مِّنْ خَوْفٍ ⑤

Ĉapitro 107 **Al-Mā'ūn** (La afablaĵoj) 30-a parto

سُوْرَةُ الْمَاعُوْنِ مَكِّيَّةٌ (١٠٧) اٰياتها ركوعها

revelaciita en Mekko

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Ĉu vi do ne vidis tiun, kiu negas la religion?

3. Li estas tiu, kiu forpelas la orfon

4. kaj ne instigas al la nutrado de la malriĉuloj.

5. Ve al la preĝantoj,

6. kiuj estas maldiligentaj pri siaj preĝoj,

7. kiuj volas nur, ke oni ilin vidu

8. kaj ne volas fari afablaĵojn.

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

اَرَءَيْتَ الَّذِيْ يُكَذِّبُ بِالدِّيْنِ ②

فَذٰلِكَ الَّذِيْ يَدُعُّ الْيَتِيْمَ ③

وَلَا يَحُضُّ عَلٰى طَعَامِ الْمِسْكِيْنِ ④

فَوَيْلٌ لِّلْمُصَلِّيْنَ ⑤

الَّذِيْنَ هُمْ عَنْ صَلَاتِهِمْ سَاهُوْنَ ⑥

الَّذِيْنَ هُمْ يُرَآءُوْنَ ⑦

ع وَيَمْنَعُوْنَ الْمَاعُوْنَ ⑧

Ĉapitro 108 **Al-Kauŝār** (La abundo) 30-a parto

سُوْرَةُ الْكَوْثَرِ مَكِّيَّةٌ (١٠٨) اياتها ركوعها

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①
اِنَّآ اَعْطَيْنٰكَ الْكَوْثَرَ ②
فَصَلِّ لِرَبِّكَ وَانْحَرْ ③
اِنَّ شَانِئَكَ هُوَ الْاَبْتَرُ ④ ع ١ ٣٣

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Vere Ni donis al vi la abundon,

3. tial preĝu al via Sinjoro kaj oferu.

4. Vere via malamiko estas nefekunda.

Ĉapitro 109 **Al-Kāferūn** (La miskredantoj) 30-a parto

سُوْرَةُ الْكٰفِرُوْنَ مَكِّيَّةٌ (١٠٩) اياتها ركوعها

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①
قُلْ يٰٓاَيُّهَا الْكٰفِرُوْنَ ②
لَآ اَعْبُدُ مَا تَعْبُدُوْنَ ③
وَلَآ اَنْتُمْ عٰبِدُوْنَ مَآ اَعْبُدُ ④
وَلَآ اَنَا عَابِدٌ مَّا عَبَدْتُّمْ ⑤
وَلَآ اَنْتُمْ عٰبِدُوْنَ مَآ اَعْبُدُ ⑥
لَكُمْ دِيْنُكُمْ وَلِيَ دِيْنِ ⑦ ع ١ ٣٤

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Diru: "Ho vi miskredantoj!

3. Mi ne adoras, kion vi adoras,

4. kaj vi ne adoras, kion mi adoras;

5. mi ne volas adori, kion vi adoras,

6. kaj vi ne volas adori, kion mi adoras.

7. Vi havas vian kredon, kaj mi havas mian kredon! ".

Ĉapitro 110 **An-Nasr** (La helpo) 30-a parto

سُوْرَةُ النَّصْرِ مَدَنِيَّةٌ (١١٠)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①
إِذَا جَآءَ نَصْرُ اللّٰهِ وَالْفَتْحُ ②
وَرَأَيْتَ النَّاسَ يَدْخُلُوْنَ فِيْ دِيْنِ اللّٰهِ أَفْوَاجًا ③
فَسَبِّحْ بِحَمْدِ رَبِّكَ وَاسْتَغْفِرْهُ إِنَّهُ كَانَ تَوَّابًا ④

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Kiam venas la helpo de Allah kaj la venko,

3. kaj vi vidas la homojn eniri amase en la religion de Allah,

4. tiam vi laŭdegu la gloron de via Sinjoro kaj petu Lian pardonon; Li certe turnos Sin kompateme al vi.

Ĉapitro 111 **Al-Lahab** (La flamo) 30-a parto

سُوْرَةُ اللَّهَبِ مَكِّيَّةٌ (١١١)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①
تَبَّتْ يَدَآ أَبِيْ لَهَبٍ وَّتَبَّ ②
مَآ أَغْنٰى عَنْهُ مَالُهٗ وَمَا كَسَبَ ③
سَيَصْلٰى نَارًا ذَاتَ لَهَبٍ ④
وَامْرَأَتُهٗ حَمَّالَةَ الْحَطَبِ ⑤
فِيْ جِيْدِهَا حَبْلٌ مِّنْ مَّسَدٍ ⑥

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Pereu ambaŭ manoj de Abŭ Lahab kaj pereu li mem!

3. Neniom utilos al li la riĉaĵoj kaj tio, kion li amasigis,

4. baldaŭ li eniros en la flamantan fajron

5. kune kun sia virino, kiu alportos la brulaĵon;

6. ĉirkaŭ ŝia kolo estos ŝnuro el palmaj fibroj.

Ĉapitro 112 **Al-Iħlās*** (La kulto sincera) 30-a parto

سُوْرَةُ الْإِخْلَاصِ مَكِّيَّةٌ (١١٢)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

قُلْ هُوَ اللّٰهُ اَحَدٌ ②

اَللّٰهُ الصَّمَدُ ③

لَمْ يَلِدْ ۙ وَلَمْ يُوْلَدْ ④

وَلَمْ يَكُنْ لَّهٗ كُفُوًا اَحَدٌ ⑤

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Diru: "Li estas Allah, la Unueco,

3. Allah la Sendependa, de kiu ĉio dependas,

4. Li ne naskis kaj ne estis naskita,

5. kaj neniu estas simila al Li".

Ĉapitro 113 **Al-Falak** (La matenruĝo) 30-a parto

سُوْرَةُ الْفَلَقِ مَكِّيَّةٌ (١١٣)

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

قُلْ اَعُوْذُ بِرَبِّ الْفَلَقِ ۙ ①

مِنْ شَرِّ مَا خَلَقَ ۙ ②

وَمِنْ شَرِّ غَاسِقٍ اِذَا وَقَبَ ۙ ③

وَمِنْ شَرِّ النَّفّٰثٰتِ فِى الْعُقَدِ ۙ ④

وَمِنْ شَرِّ حَاسِدٍ اِذَا حَسَدَ ⑤

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

2. Diru: "Mi serĉas rifuĝon ĉe la Sinjoro de la matenruĝo

3. kontraŭ la malbono, kiu ekzistas en la kreaĵo,

4. kaj kontraŭ la malbono de la malluma nokto, kiu disvastiĝas,

5. kaj kontraŭ la malbono de tiuj, kiuj blovas sur la nodojn (por disigi ilin),**

6. kaj kontraŭ la malbono de la envianto, kiu envias".

---

* Ĉi tiu ĉapitro, kiu apartenas al la selekto de tiuj, kiuj plej ofte estas eldiritaj okaze de la rita preĝo, havas ankaŭ plurajn aliajn nomojn, k.ekz.: At-Tafrīd, At-Taĝrīd, As-Samād, Al-Asās ktp.

** t.e.: por estigi skismoj

سُوْرَةُ النَّاسِ مَكِّيَّةٌ

آياتها (١١٤) ركوعها

revelaciita en Mekko

بِسْمِ اللّٰهِ الرَّحْمٰنِ الرَّحِيْمِ ①

1. Je la nomo de Allah, la Donema, la Pardonema.

قُلْ اَعُوْذُ بِرَبِّ النَّاسِ ۙ ②

2. Diru: "Mi serĉas rifuĝon ĉe la Sinjoro de la homoj,

مَلِكِ النَّاسِ ۙ ③

3. la Reĝo de la homoj,

اِلٰهِ النَّاسِ ۙ ④

4. la Dio de la homoj,

مِنْ شَرِّ الْوَسْوَاسِ ۙ الْخَنَّاسِ ۙ ⑤

5. kontraŭ la malbono de la flustranto rampanta,

الَّذِيْ يُوَسْوِسُ فِيْ صُدُوْرِ النَّاسِ ۙ ⑥

6. de tiu, kiu flustras en la korojn de la homoj,

مِنَ الْجِنَّةِ وَالنَّاسِ ع ⑦ ع ١ ٣٩

7. de la Ĝinnoj kaj de la homoj.

* Fino de la 30-a parto

Fino de la Nobla Korano

صَدَقَ اللّٰهُ الْعَظِيْمُ

SUBJEKTA INDEKSO

(la unua numero indikas la ĉapitron, la sekvantaj la versojn)

Abraham	2:125-134; 2:261; 6:75-82; 11:70-77; 14:36-42; 21:52-71; 26:70-90; 29:17-19, 32-33; 37:103-114;
Adam	2:31-39; 5:28-32; 7:12-26; 20:116-124;
Adulto kaj aliaj hontindaĵoj	4:16-17; 17:33; 24:3-10, 20; 25:69;
Almozoj	2:262-275, 278; 47:39; 57:19; 64:18;
Amo al kaj de Allah	2:166; 3:32; 19:97; 85:15;
Anĝeloj	8:10; 15:8-9, 29-31; 16:50-51; 32:12; 35:2; 37:2-4; 39:76; 50:18-28; 69:18; 79:2-6; 82:11-13; 97:5;
Atesto	4:136; 5:9, 107-109;
Aŭtoritatoj (obeo al la)	4:60;
Celo de la kreo	51:57;
Eksedziĝo	2:228-242; 4:36; 4:129-131; 33:50; 58:2-5; 65:2-8;
Evangelio kaj Torao	3:4; 5:45-48; 7:158; 48:30; 62:6;
Fasto	2:184-188;
Geedziĝo	4:4-5; (v. ankaŭ "virinoj")
Gefiloj	42:50-51;
Gepatroj	2:84; 6:152; 17:24-25; 29:9; 31:15-16; 46:16-18;
Gog kaj Magog	18:95; 21:97;
Ĝinnoj	6:101, 129, 131; 15:28; 27:18, 40; 41:26, 30; 46:30; 55:16, 34; 72:2;
Hazardludo	2:220; 5:91-92;
Heredo	4:8-9; 4:12-13, 177;

Iblīs	2:31-39; 15:29-45;
Idolkulto	4:49, 117; 9:28; 9:113; 25:4; 28:62-67;
Infero	6:129; 7:180; 11:107-108, 120; 15:44-45; 20:75; 26:92-103; 32:14; 38:56-65; 40:50-51; 43:75-79; 56:42-57; 73:13-14; 74:27-32;
Islamo	3:20; 3:86; 5:4; 6:126; 39:23;
Jesuo	3:46-54; 3:56-58; 4:158; 5:76; 5:111-120; 19:30-36;
Judoj	2:41-75; 4:154-162; 5:19-27;
Ĵuroj	4:136; 5:9, 107-109;
Kalumnio	4:113; 24:12-17; 49:13;
Kreo	7:55; 13:3-4; 21:17-18; 22:66-67; 24:46; 30:9; 36:82-83; 41:10-13; 46:4; 50:39; 65:13; 78:7-17;
Kristanoj	2:63; 3:53-54, 200; 5:15, 112-115; 9:30-31; 22:18; 61:15;
Malpermesitaj manĝaĵoj	2:174; 5:4; 6:122, 146; 16:116;
Maria	3:37-48; 4:157; 19:17-31; 21:92; 23:51; 66:13;
Milito	2:191-194; 8:40, 58-63; 22:40-42; 47:5; 49:10;
Naskiĝo de la homo	22:6; 23:13-15; 30:55; 32:8-10; 35:12; 39:7; 40:68; 86:6-8; 96:2-3;
Nutraĵoj	15:20-22; 41:11; 42:28;
Paradizo	2:26; 3:16; 10:10-11; 32:20; 47:16; 55:47-77; 56:13-41; 76:13-23;
Pekoj kaj pento	2:161; 3:90, 136; 4:18, 111; 5:40; 6:55; 7:154; 9:104; 25:71-72; 39:54; 42:26;
Pilgrimo	2:197-204; 22:27-38;
Preĝo	2:128-130, 287; 3:9-10, 17, 27-28, 192-195; 4:102-104; 23:110, 119; 25:75; 40:8-10; 59:11; 62:10-11;

Procentego	2:276-277, 279-281; 3:131; 30:40;
Profetoj	2:39, 254; 4:70; 7:95; 10:48; 14:10-14; 35:25; 58:21; 72:27-29;
Prunto	2:283-284;
Purigo	4:44; 5:7;
Satano	4:118-121; 7:201-202, 15:18-19; 16:99-101; 23:98-99; 35:7; 38:42; 59:17;
Signoj de Allah	2:165; 6:96-100; 13:4-5; 16:11-17; 25:46-50; 30:21-29; 31:11, 29-33; 36:34-45; 81:2-15;
Ŝtelo	5:39;
Toleremo	2:257; 9:6; 10:100-101, 109; 16:10, 94; 18:30;
Triunuo	4:172; 5:73-74;
Vino	2:220; 5:91-92;
Virinoj	2:188, 222-242; 4:23-26, 33-35, 128-131; 5:6; 24:32-34, 61; 33:36, 60; 65:2, 3, 7, 8;
Vorroj de Allah	18:110; 31:28;

TABELO DE LA PLEJ GRAVAJ HISTORIAJ DATOJ PRI LA ISLAMO

Kristana Jaro		Heĝira (elmigro) Jaro
570	Naskiĝo de la Profeto Mahometo en Mekko	
576	Li orfiĝas kaj pri li zorgas la onklo Abu Talib	
595	Li edziĝas al Khadiĝa	
605	Li adoptas kiel filon Zajd-on, filon de Harit	
610	Meditado en la kaverno sur la monto Hira	
611	Unua revelacio, kiun sekvas longdaŭra interrompo	
613	Rekomenciĝas la revelacioj	
613	Publika predikado	
615	Unua elmigro de persekutataj Islamanoj al Abisenujo	
615	Delegacio de la Kurajŝ iras al Abisenujo por repreni la elmigrintajn Islamanojn. Rifuzo de la Neguso	
616	Dua elmigro al Abisenujo	
617-9	La Islamanoj estas deklaritaj "for de la leĝo" fare de la Kurajŝ	
619	Morto de Khadiĝa kaj de Abu Talib	
620	Malsukcesa ekspedicio al Tâ'if kaj vizio de la kredantaj Ĝinnoj*	
621	Unua submetiĝo en Akaba, nomita "submetiĝo de la virinoj"	

* v. detalan klarigon al ĉapitro 34a "Sabâ" verso 13a

Kristana Jaro		Heĝira Jaro
622	Dua submetiĝo en Akaba fare de pli ol 70 Medinanoj – kun la promeso, ke ili protektos la Profeton – nomita "submetiĝo de la milito"	
622	Heĝiro – Elmigro. Ŝajnas, ke la Profeto alvenis en Medino la 24an de Septembro 622. La nova erao tamen komenciĝas la 1an de la monato Muharram de la sama jaro, t.e. la 16an de Julio 622	
622-3	Konstruo de la unua moskeo, la "Moskeo de la Profeto" en Medino	1-2
622-3	Fratiĝo de la Muhâĝerîn (Elmigrintoj) kaj de la Ansâr (Helpintoj). Alianco inter la Islamanoj de Medino kaj la triboj de la Judoj	2
623	Fasto dum la monato Ramadân anstataŭas la antaŭan faston de unu tago	2
623	Mekko estas deklarita Kibla* anstataŭ Jeruzalemo	2
623	La Profeto edziĝas al 'Âjŝa	2
623	Unua Id-ul-Adja (festo de la ofero)	2
624 Jan	Venko de la Islamanoj kontraŭ la Kurajŝ apud Badr	2
624 Feb	Judoj de la tribo Kajnuka estas ekzilitaj	2
624-5	Fatima, filino de la Profeto, edziniĝas al 'Alî. Naskiĝo de Hasan kaj de Husajn	2-3
625	Malvenko de la Islamanoj apud Uhud	3
625	Judoj de la tribo Nadîr atakitaj kaj ekzilitaj	4

* Direkto al kiu sin turnas 5foje ĉiutage la Islamanoj por plenumi la ritan preĝon.

Kristana Jaro		Heĝira Jaro
626	La Profeto edziĝas al Zajnab, eksedzinigita de Zajd. 'Ājŝa kulpigita kaj defendita	5
627	Blokado de Medino kaj batalo de la Tranĉeo	5
627	Judoj de la tribo Krajda ekstermitaj	5
627-8	Deksep ekspedicioj. La plej interesa, tiu kontraŭ la Bānī Muŝtalik (v. ĉapitron 24an "An-Nūr", versojn 12a k.s., rilatantajn al 'Ājŝa)	6
628	La Profeto kaj liaj disĉiploj pilgrimas al Hudajbija. Juro de fideleco, nomita "Juro de la arbo" kaj diplomatia sukceso de la Profeto	6
628	Ambasadoroj estas senditaj al la reĝoj de Bizanco, Persujo kaj Abisenujo, por inviti ilin akcepti la Islamon	6
628	Konkero de Khajbar	7
629	La malgranda pilgrimo estas plenumita. La Profeto edziĝas al Majmuna, deka edzino post la morto de Khadiĝa	7
630	Konkero de Mekko kaj detruo de la idoloj de la Ka'ba*	8
630	Venko de Hunajn	8
630-1	Submetiĝo de Arabaj triboj. Ekspedicio al Tabuk	9
630	Submetiĝo de Tā'if kaj detruo de la idoloj	9
631	Ordono batali kontraŭ la idolanoj	9
631	Submetiĝo de diversaj Kristanaj triboj	9

* v. noton al ĉapitro 5a "Al-Mā-eda" verson 96an

Kristana Jaro		Hiĝira Jaro
632	Lasta pilgrimo de la Profeto al Mekko	10
632	Morto de la Profeto	11
632-4	Kalifo (Anstataŭanto) Abu-Bakr	11-13
632-5	La Korano estas kolektita en unu libron fare de Zajd, filo de Sabit, laŭ la ordono da Abu-Bakr	11-14
634-44	Kalifo Omar	13-24
644-56	Kalifo Usman	24-36
651	Kontrolo kaj eldono de la oficiala teksto de la Korano laŭ la ordono de Usman	30
656-61	Kalifo 'Alī	36-41

INDEKSO LAŬ LA NUMEROJ DE LA ĈAPITROJ

Ĉapitro		Paĝo
1	Al-Fâteha (La malfermanta)	5
2	Al-Bákara (La bovino)	6
3	Âl-Imrân (La gento de Imrân)	50
4	An-Nisâ (La virinoj)	75
5	Al-Mâ-eda (La tablo kovrita)	101
6	Al-An'âm (La gregoj)	120
7	Al-A'râf (La altrando)	142
8	Al-Anfâl (La batalakirajo)	166
9	At-Taŭba (La pento)	175
10	Jûnus (Jona)	193
11	Hûd (Hud)	206
12	Jûsuf (Jozef)	220
13	Ar-Ra'd (La tondro)	233
14	Ibrâhîm (Abraham)	239
15	Al-Hiĝ'r (Al-Hiĝ'r)	246
16	An-Nahl (La abelo)	253
17	Bani Isrâ-îl (Idoj de Izrael)	267
18	Al-Kahf (La kaverno)	279
19	Marjam (Maria)	292
20	Tŭâ-Hâ (Tŭâ-Hâ)	301
21	Al-Anbijâ (La Profetoj)	312
22	Al-Haĝĝ (La pilgrimo)	322
23	Al-Mo'minûn (La kredantoj)	332
24	An-Nûr (La lumo)	341
25	Al-Furkân (La ekkonigilo)	351
26	Aŝ-Ŝu'arâ (La Poetoj)	359
27	An-Naml (Naml)	373
28	Al-Kasas (La historio)	383
29	Al-Ankabût (La araneo)	394
30	Ar-Rûm (La Romanoj)	402
31	Lukmân Lukmân)	409
32	As-Saĝda (La terenkuŝiĝo)	413
33	Al-Ahzâb (La konfederacianoj)	416
34	Sabâ (Sebâ)	426
35	Al-Fâtir (La Kreinto)	433
36	Jâ-Sîn (Jâ-Sîn)	439
37	As-Sâffât (La sin ordigantaj)	446
38	Sŭâd (Sŭâd)	457
39	Az-Zumar (La grupoj)	464
40	Al-Mo'min (La kredanto)	473

Ĉapitro Paĝo

41 Hā-Mīm-As-Saĝda (La terenkuŝiĝo) 483
42 Aŝ-Sūrā (La konsiliĝo) 490
43 Az-Zuĥruf (La oraj ornamaĵoj) 497
44 Ad-Ḍuĥān (La fumo) 504
45 Al-Ĝāseja (La surgenuiĝo) 508
46 Al-Aḥkāf (La dunoj) 512
47 Muḥammad (Mahometo) 517
48 Al-Fath (La venko) 521
49 Al-Huĝurāt (La loĝĉambroj) 526
50 Kāf (Kāf) 529
51 Az-Zārejāt (La ventoj dissemantaj) 533
52 At-Tūr (La monto) 537
53 An-Naĝm (La stelo) 540
54 Al-Kamar (La luno) 544
55 Ar-Raḥmān (La Donema) 548
56 Al-Vāke'a (La okazontaĵo) 553
57 Al-Hadīd (La fero) 558
58 Al-Muĝādila (La disputantino) 563
59 Al-Haŝr (La proklamo) 567
60 Al-Mumtaḥana (La virino elprovita) 570
61 As-Ṣŭaff (La vicoj) 573
62 Al-Ĝumu'a (La vendredo) 575
63 Al-Munāfikūn (La hipokrituloj) 577
64 At-Tagābun (La malgajno kaj la gajno) 579
65 At-Tŭalāk (La eksedziĝo) 581
66 At-Taḥrīm (La malpermeso) 583
67 Al-Mulk (La suvereneco) 585
68 Al-Kalam (La plumo) 588
69 Al Hākka (La Neeviteblaĵo) 591
70 Al-Ma'āreĝ (La ĉieliro) 595
71 Nūḥ (Noa) 598
72 Al-Jinn (La Ĝinnoj) 600
73 Al-Muzzammil (La mantelkovrito) 603
74 Al-Muddassir (La mantelenvolvito) 605
75 Al-Kejama (La reviviĝo) 608
76 Ad-Dahr (La momento) 611
77 Al-Mursalāt (La senditoj) 613
78 An-Nabā (La anonco) 616
79 An-Nāze'āt (La altirantoj) 618
80 'Abasa (Li sulkigis la frunton) 621
81 At-Takvīr (La envolvo) 623
82 Al-Infetŭār (La fendo) 625
83 At-Tatfīf (Tiuj, kiuj donas nesifiĉan mezuron) . . . 626
84 Al-Inŝekāk (La krevo) 628
85 Al-Burūĝ (La konstelacioj) 630
86 At-Tŭārek (La stelo de l' mateno) 631
87 Al-A'lā (La Eminenta) 632

Ĉapitro Paĝo

88 Al-Gāŝeja (La renversanta okazontaĵo) 633
89 Al-Faĝr (La tagiĝo) 635
90 Al-Ḅalad (La urbo) 637
91 Aŝ-Ŝams (La suno) 638
92 Al-Lajl (La nokto) 639
93 Ad-Duhā (La antaŭtagmezo) 640
94 Al-Inŝerāh (la dislarĝigo) 641
95 At-Tīn (La figo) 642
96 Al-'Alak (La buleto de koaguliĝinta sango) 642
97 Al-Kadr (La Dia dekreto) 644
98 Al-Bajjenā (La pruvo evidenta) 644
99 Az-Zilzāl (La tertremo) 645
100 Al-Ādejāt (La atakantoj) 646
101 Al-Kāre'a (La frapego) 647
102 At-Takāsur (La konkuro) 648
103 Al-'Asr (La posttagmezo) 648
104 Al-Humaza (La kalumnianto) 649
105 Al-Fīl (La elefanto) 649
106 Al-Kurajŝ (La Kurajŝ) 650
107 Al-Mā'ūn (La afablaĵoj) 650
108 Al-Kaŭsār (La abundo) 651
109 Al-Kāferūn (La miskredantoj) 651
110 An-Nasr (La helpo) 652
111 Al-Lahab (La flamo) 652
112 Al-Iĥlās (La kulto sincera) 653
113 Al-Falak (La matenruĝo) 653
114 An-nās (La homoj) 654

Ĉi tiu libro estas kompostita per IBM Composer kun skribo Roman Press kaj presita sur papero 607 de La unuiĝintaj Paperfabrikoj (Danlando).

Ĝi estas kompostita kaj presita de la eldonejo.
La librobindadon faris Concordia, Kopenhago.